

J. R. R. Tolkien

LA MASTRO DE L' RINGOJ

LA REVENO DE LA REÛO



Serio
MONDLITERATURO
Volume 5




**John Ronald Reuel
Tolkien**

**THE RETURN
OF THE KING**

Being the third part of
The Lord of the Rings

London
1955



John Ronald Reuel Tolkien
LA REVENO DE LA REĜO

La titolo de la originalo
The Return of the King

Serio *Mondliteraturo*, volumo 5

2a eldono, korektita 2007
1a eldono 1997

Tradukis el la angla lingvo
William Auld

Redaktis, kompostis kaj enpaĝigis
Aleksander Korĵenkov

Provlegis
Brian Drake, Andreas Emmerich, William Harmon

Korektis
Halina Gorecka

Kovrilo de
Vladimiras Beresniovass

La eldonon ebligis seninteresa prunto de FAME-Fondaĵo.

TOLKIEN, J. R. R.

La reveno de la Reĝo: La tria parto de *La Mastro de l' Ringoj* / Trad. el la angla William Auld. — 2a eld., kor. — Kaliningrado: Sezonoj, 2007. — 328 pĝ. — (Serio *Mondliteraturo*; №5).

© Traduko William Auld, 1997.
© Mapoj, aranĝo *Sezonoj*, 2007.

*Tri ringoj por la elfoj sub la hela ciel',
Sep por la gnomoj en salonoj el ŝton'.
Naŭ por la homoj sub la morto-sigel',
Unu por la Nigra Reĝo sur la nigra tron'
Kie kuŝas Ombroj en Mordora Land'.
Unu Ringo ilin regas, Unu ilin prenas,
Unu Ringo en mallumon ilin gvidas kaj katenas
Kie kuŝas Ombroj en Mordora Land'.*

RESUMO

Jen la tria parto de *La Mastro de l' Ringoj*.

La unua parto, *La Kunularo de l' Ringo*, rakontis kiel Gandolfo la Griza eltrovis, ke la ringo, posedata de la hobito Frodo, estas fakte la Unu Ringo, reganto de ĉiuj Ringoj de Potenco. Ĝi priskribis la fuĝon de Frodo kaj ties kunuloj el ilia hejmo en la kvietaj Provinco, persekutate de la teroro de la Nigraj Rajdantoj de Mordoro, ĝis finfine, helpate de Aragorno, disirulo el Eriadoro, ili trapasis gravajn danĝerojn ĝis la Domo de Elrondo en Rivendelo.

Tie kunsidis la granda Konsilio de Elrondo, ĉe kiu estis decidite provi detruon de la Ringo, kaj Frodon oni nomumis kiel Ringoportanton. La membroj de la Kunularo de la Ringo estis elektitaj por helpi lin al lia celo: veni se eble al la Monto de Fajro en Mordoro, la lando de la Malamiko, la sola loko, kie eblis malfari la Ringon. En tiu Kunularo estis Aragorno kaj Boronairo, filo de la Mastro de Gondoro, reprezentantaj la homojn; Legolaso, filo de la elfa reĝo en Mornarbaro, por la elfoj; Gimlio, filo de Gloino, de la Soleca Monto, por la gnomoj; Frodo kun sia servisto Samsaĝo, kaj liaj du junaj parencoj Gajadoko kaj Peregrino, por la hobitoj; kaj Gandolfo la Griza.

La kunuloj vojaĝis sekrete foren el Rivendelo en la nordo, ĝis malsukcesinte je sia provo transiri vintre la altan pasejon de Karadraso, ili estis kondukataj de Gandolfo tra la kaŝita pordo kaj eniris la vastajn minejojn de Morio, serĉante vojon sub la montoj. Tie Gandolfo, batalante kontraŭ timinda spirito de la submondo, falis en malhelan abismon. Sed Aragorno, nun rivelita kiel la kaŝita heredanto de la antikvaj reĝoj de l' okcidento, gvidis la Kunularon antaŭen de la Orienta Pordo de Morio, tra la elfa lando Lorieno, kaj sur la granda rivero Anduino, ĝis ili alvenis la akvofalojn de Raŭroso. Ili jam konstatis, ke ilian vojaĝon observas spionoj, kaj ke la kreaĵo Golumo, kiu iam posedis la Ringon kaj daŭre avidis ĝin, sekvas iliajn spurojn.

Nun iĝis necese, ke ili decidu ĉu turniĝi orienten al Mordoro, ĉu akompani Boromiron al Minaso Tirit, la ĉefurbo de Gondoro, helpe en la venonta milito; ĉu dispartiĝi. Kiam evidentiĝis, ke la Ringoportanto obstine intencas daŭrigi sian senesperan vojaĝon al la lando de la

Malamiko, Boromiro klopodis preni perforte la Ringon. La unua parto finiĝis per la submetiĝo de Boromiro al la logo de la Ringo; per la eskapo kaj malapero de Frodo kaj ties servisto Samsaĝo; kaj per la dispeliĝo de la ceteraj kunularanoj pro subita atako de orkaj soldatoj, iuj servantaj la Malhelan Mastron de Mordoro, iuj la perfidulon Sarumano el Isengardo. La celo de la Ringoportanto ŝajnis jam trafita de katastrofo.

La dua parto (la tria kaj la kvara libroj), *La Du Turegoj*, rakontis la agadon de ĉiuj kunuloj post la dispeliĝo de la Kunularo de l' Ringo. La tria libro rakontis pri la pento kaj morto de Boromiro kaj pri lia sepulto en boato direktita al la Akvofaloj de Raŭroso; pri la kapto de Gajadoko kaj Peregrino per orkaj soldatoj, kiuj portis ilin direkte al Isengardo tra la orientaj ebenaĵoj de Rohano; kaj pri ilia postsekvado fare de Aragorno, Legolaso kaj Gimlio.

La rajdistoj de Rohano poste aperis. Trupo da rajdistoj komandita de marŝalo Eomero ĉirkaŭis la orkojn ĉe la rando de la Arbaro Fangorno kaj detruis ilin; sed la hobitoj eskapis en la arbaron kaj tie renkontis la enton Arbobarbo, la sekretan estron de Fangorno. En ties kunesto ili ĉeestis koleriĝon de la arbopopolo kaj ties marŝadon al Isengardo.

Dume Aragorno kaj ties kunuloj renkontis Eomeron revenantan de la batalo. Li havigis al ili ĉevalojn, kaj ili plurajdis en la arbaron. Tie dum ili vane serĉis la hobitojn, ili renkontis denove Gandalfon, revenintan el la morto, nun la Blankan Rajdanton, tamen ankoraŭ vualitan per grizo. Kun li ili trarajdis Rohanon ĝis la halegoj de Teodeno, la reĝo de tiu lando, kie Gandolfo sanigis la malĵunan reĝon kaj savis lin el la sorĉo de Vermlango, lia malica konsilisto, sekreta aliancano de Sarumano. Ili poste rajdis kun la reĝo kaj ties armeo kontraŭ la soldatojn de Isengardo kaj partoprenis la surprizan venkon ĉe Kornburgo. Gandolfo poste gvidis ilin al Isengardo, kaj ili trovis la grandan fortikaĵon ruinigita de la arbopopolo, kaj Sarumanon kaj Vermlangon sieĝataj en la nesuperebla turego de Ortanko.

En la traktado antaŭ la pordo Sarumano rifuzis penti, kaj Gandolfo eloficigis lin kaj rompis lian bastonon, lasante lin al la vigilado de la entoj. El alta fenestro Vermlango ĵetis ŝtonon kontraŭ Gandalfon; sed ĝi maltrafis lin, kaj ĝin levis Peregrino. Tio pruviĝis unu el la tri travivintaj *palantiroj*, la Vidantaj Ŝtonoj de Numenoro. Pli poste dum nokto Peregrino submetiĝis al la logo de la Ŝtono; li ŝtelis ĝin kaj enrigardis ĝin kaj tiel vidiĝis al Saŭrono. La libro finiĝis per la alveno de nazgulo super la ebenaĵoj de Rohano, ringofantomo sur fluganta

êvalo, averto pri okazonta milito. Gandolfo transdonis la *palantiron* al Aragorno, kaj preninte Peregrinon forrajdis al Minaso Tirit.


La kvara libro turnis sin al Frodo kaj Samsaĝo, vojperditaj en la morna montaro de Emin Muilo. Ĝi rakontis kiel ili eskapis el la montoj, kaj estis atingitaj de Smeagolo-Golumo; kaj kiel Frodo malsovaĝigis Golumon kaj preskaŭ venkis ties malicon, tiel ke Golumo kondukis ilin tra la Mortaj Marĉoj kaj la ruinigitaj terenoj ĝis Morano, la Nigra Pordo en la nordo de la lando Mordoro.

Tien eniri estis neeble, kaj Frodo akceptis la konsilon de Golumo serĉi "sekretan enirejon", kiun li konis, sude en la Ombraj Montoj, la okcidenta muro de Mordoro. Vojaĝante tien ili estis kaptitaj de esplorista trupo de Gondoro, estrata de Faramiro, frato de Boromiro. Faramiro eltrovis la naturon de ilia komisiono, sed li rezistis la tenton al kiu submetiĝis Boromiro, kaj plusendis ilin al la lasta etapo de ilia vojaĝo al Cirito Ungol, la Aranea Pasejo; tamen li avertis ilin, ke tio estas mortminace danĝera loko, pri kiu Golumo rakontis al ili malpli ol li konis. Ĝuste kiam ili atingis la Krucvojon kaj ekiris laŭ la vojo al la timiga urbo Minaso Morgul, forta mallumo venis el Mordoro kaj kovris ĉiujn terenojn. Tiam Saŭrono elsendis sian unuan armeon, kiun estris la Nigra Reĝo de la Ringofantomoj: komenciĝis la Milito de la Ringo.

Golumo gvidis la hobitojn al sekreta vojo, kiu evitis Minason Morgul, kaj en la mallumo ili venis finfine al Cirito Ungol. Tie Golumo refalis en misecon kaj klopodis perfidi ilin al Ŝeloba, la monstra gardanto de l' pasejo. Lin malsukcesigis la heroeco de Samsaĝo, kiu forbatis lian atakon kaj vundis Ŝeloban.

La dua parto finiĝas per la elektoj de Samsaĝo. Frodo, pikita de Ŝeloba, kuŝis verŝajne morta: la komisiono nepre finiĝos per katastrofo, aŭ Samsaĝo devos forlasi sian mastron. Finfine li prenis la Ringon por provi daŭrigi sola la senesperan komision. Sed ĝuste kiam li estis transironta en la landon Mordoro, orkoj venis supren el Minaso Morgul kaj malsupren el la turego de Cirito Ungol, kiu gardis la supron de l' pasejo. Kaŝite per la Ringo, Samsaĝo eksciis laŭ la interkverelado de la orkoj, ke Frodo estis ne morta, sed drogita. Tro malfrue li persekutis ilin; sed la orkoj forportis la korpon de Frodo malsupren laŭ tunelo kondukanta al la malantaŭa pordo de sia turego. Samsaĝo falis antaŭ ĝi sveninte, kiam ĝi fermiĝis sonore.

Tiu ĉi, la tria kaj lasta parto, rakontos pri la kontrastaj strategioj de Gandolfo kaj Saŭrono, ĝis la forta mallumo estos forigita en la horo de fina malvenko. Ni reiras unue al la sorto de l' batalo en la okcidento.



1. Isengardo, 2. Üestfaldo, 3. Profundažo de Helmo,
4. Tol Brandiro, 5. Kairo Andros, 6. Norda Itilio,
7. Uduno, 8. Minaso Morgul, 9. Minaso Tirit,
10. Losarnaĥo, 11. Ereĥo, 12. Lamedono, 13. Tolfalaso

HĀNDO

HARADO

ROHANO

EOSTFALDO

GONDORO

ANORIENO

MORDORO

LEBENINO

SUDA GONDORO
(dezertigita teritorio)

Emin Muilo

Mortaj Marĉoj
Moranono

Eredo Litui

Erefo Duad

Baraduro
Orodrumo

Gorgoro

Dol Amroto

Anfalaso

Belfalaso

Linhiro

Pelargito

Haruano

Naurieno

r. Iseno

Fangorno

Edoraso

r. Eshvasho

Nindalfo

r. Cihveno

r. Ringo

r. Andulino

al Umbaro

Ĉapitro 1

MINASO TIRIT

Grinĉjo elrigardis de la ŝirmo de l' mantelo de Gandalfo. Li scivolis, ĉu li vekigis aŭ plu dormas, daŭre en la rapidmova sonĝo, en kiu li estis tiom longe volvita ekde kiam komenciĝis la granda rajdado. La malhela mondo preterrapidegis, kaj vento laŭte kantis en liaj oreloj. Li povis vidi nenion escepte de la girantaj steloj, kaj fore dekstre vastajn ombrojn kontraŭ la ĉielo, kie la montoj de la sudo marŝis preterpaŝe. Dormeme li klopodis kalkuli la tempojn kaj etapojn de la vojaĝo, sed lia memoro duondormis kaj malcertis.

Okazis la unua rajdado terure rapida kaj senhalta, kaj poste en la aŭroro li vidis palan ekbrilon oran, kaj ili alvenis silentan urbon kaj la grandan senhoman domon sur monteto. Kaj apenaŭ ili atingis ties ŝirmon, jen la flugilhava ombro denove preterpasis supre, kaj homoj velkis pro timo. Sed Gandalfo alparolis lin per mallaŭtaj vortoj, kaj li dormis en angulo, lace sed maltrankvile, malklare konscia pri venoj kaj iroj kaj pri homoj parolantaj kaj Gandalfo ordonanta. Kaj poste rajdado, rajdado en la nokto. Jen estis la dua, ne, la tria nokto post kiam li enrigardis la Ŝtonon. Kaj pro tiu hida memoraĵo li plene vekigis kaj ekstremis, kaj la bruo de la vento pleniĝis de voĉoj minacaj.

Lumo ĉendiĝis sur la ĉielo, ekflagro de flava fajro post malhelaj bariloj. Grinĉjo retrokaŭris, momente timoplena, scivolante en kiun timigan landon Gandalfo portas lin. Li frotis siajn okulojn kaj ekvidis, ke tio estas la luno leviĝanta super la orientaj ombroj, preskaŭ jam tute plena. Do la nokto ankoraŭ ne maljunis, kaj dum horoj daŭros la malhela vojaĝo. Li ekmoviĝis kaj parolis.

— Kie ni estas, Gandalfo?

— En la regno Gondoro, — la sorĉisto respondis. — La provinco Anorieno ankoraŭ preterpasas.

Regis denove silento dum kelka tempo. Post subite Grinĉjo ekkriis:

— Kio estas tio? Vidu! Fajro, ruĝa fajro! Ĉu en tiu ĉi lando estas drakoj? Vidu, jen alia!

Responde Gandolfo laŭte kriis al sia ĉevalo:

— Ek, Ombrofakso! Necesas rapidi. Mallonga estas la tempo. Vidu! La signalfajroj de Gondoro flamas vokante helpon. Milito ekbrulas. Vidu, jen la fajro sur Amono Din, kaj flamo sur Ejlenaĥo; kaj jen ili rapidas okcidenten: Nardolo, Erelaso, Min-Rimono, Kalenhado, kaj Halifirieno rande de Rohano.

Sed Ombrofakso paŭzis dumpaŝe, malrapidante al promeno, kaj poste ĝi levis sian kapon kaj henis. Kaj el la mallumo venis responde henado; kaj baldaŭ aŭdiĝis tondrado de hufoj, kaj tri rajdantoj albalaiĝis kaj pasis kiel flugantaj fantomoj antaŭ la luno kaj malaperis okcidenten. Tiam Ombrofakso kuntiriĝe pretigis sin kaj forsaltis, kaj la nokto trafluis ĝin kvazaŭ muĝa vento.

Grinĉjo denove dormemiĝis kaj malmulte atentis Gandalfon, dum tiu rakontis al li pri la moroj de Gondoro, kaj kiel la Reganto de la urbo konstruigis signalfajrojn sur la pintoj de margenaj montetoj laŭlonge de ambaŭ flankoj de la granda montaro kaj konservis posteonojn tiuloke, kie freŝaj ĉevaloj ĉiam pretis por porti liajn mesaĝistojn al Rohano en la nordo, aŭ al Belfalaso en la sudo.

— Jam delonge ne flamis la signalfajroj de la nordo, — li diris, — kaj dum la antikvaj tagoj de Gondoro ili ne estis bezonataj, ĉar oni havis la Sep Ŝtonojn.

Grinĉjo ekmoviĝis maltrankvile.

— Dormu denove kaj ne timu! — diris Gandolfo. — Ĉar vi iras ne kiel Frodo al Mordoro, sed al Minaso Tirit, kaj tie vi estos tiel sekura, kiel oni povas esti nuntempe. Se Gondoro falos, aŭ la Ringo estos kaptita, poste la Provinco estos nenia rifuĝejo.

— Vi ne komfortigas min, — diris Grinĉjo, tamen dormo tragrimpis lin. La lasta afero, kiun li memoris antaŭ ol li profunde ekdormis, estis ekvido de altaj blankaj montopintoj, glimantaj kvazaŭ ŝvebantaj insuloj super la nuboj, dum ilin trafis la lumo de la okcidentira luno. Li scivolis, kie estas Frodo, ĉu li estas jam en Mordoro, aŭ ĉu li mortis; kaj li ne sciis, ke Frodo de tre malproksime rigardas tiun saman lunon, dum ĝi subeniras malantaŭ Gondoro antaŭ alveno de la tago.

Grinĉjo vekigis aŭdante voĉojn. Alia tago de sinkaŝo kaj nokto de vojaĝado jam forrapidis. Estis krepuske: malvarma tagiĝo estis denove baldaŭa, kaj ĉirkaŭis ilin frostigaj grizaj nebuletoj. Ombrofakso staris ŝvite vaporante, sed ĝi tenis la kolon fiere kaj evidentigis neniun signon de laciĝo. Multaj altaj homoj peze mantelitaj staris apud ĝi, kaj

malantaŭ ili baŭmis en la nebuleto ŝtona muro. Parte ruina ĝi ŝajnis, sed jam antaŭ forpaso de la nokto aŭdiĝis la bruo de hasta laborado: martelbatado, trultintado kaj grincado de radoj. Torĉoj kaj flagriloj malarde flametis ie-tie en la nebuleto. Gandolfo alparolis la homojn, kiuj baris lian vojon, kaj aŭskultante Grinĉjo konstatis, ke li mem estas diskutata.

— Jes, vere, ni konas vin, Mitrandiro, — diris la estro de l' homoj, — kaj vi posedas la pasvortojn de la Sep Pordoj kaj rajtas libere antaŭeniri. Sed vian kunulon ni ne konas. Kio li estas? Ĉu gnomo el la montaro de l' nordo? Ni deziras neniujn fremdulojn en la lando nuntempe, krom se ili estas potencaj armilportantoj, pri kies fidindeco kaj helpo ni povas certi.

— Mi garantios lin antaŭ la trono de Denetoro, — diris Gandolfo. — Kaj se temas pri kuraĝo, tion oni ne povas taksi laŭ la staturato. Li trapasis pli da bataloj kaj danĝeroj ol vi trapasis, Ingoldo, kvankam vi staturas duoble pli alte ol li; kaj li venas nun de la breĉado de Isengardo, pri kiu ni alportas informojn, kaj li treege lacas, aŭ mi vekus lin. Li nomiĝas Peregrino, soldato tre kuraĝa.

— Ĉu soldato? — diris Ingoldo dubeme, kaj la ceteraj ridis.

— Soldato! — kriis Grinĉjo, jam komplete viglilita. — Ĉu soldato! Tute ne! Mi estas hobito kaj ne pli kuraĝa ol mi estas soldata, krom eble de tempo al tempo pro neceso. Ne permesu, ke Gandolfo vin trompu!

— Multaj plenumintoj de kuraĝaj agoj eble neniom pli dirus, — diris Ingoldo. — Sed kio estas hobito?

— Duonulo, — respondis Gandolfo. — Ne, ne tiu pri kiu oni rakontis, — li aldonis, vidante miron sur la vizaĝoj de l' homoj. — Ne tiu, sed parenco lia.

— Jes, kaj iu, kiu vojaĝis kun li, — diris Grinĉjo. — Kaj Boromiro el via urbo estis kun ni, kaj li savis min en la neĝoj de la nordo, kaj en la fino li estis mortigita min defendante kontraŭ multaj malamikoj.

— Lasu tion! — diris Gandolfo. — Informon pri tiu doloraĵo oni devus unuavice sciigi al lia patro.

— Tio estas jam divenita, — diris Ingoldo, — ĉar okazis ĉi tie lastatempe strangaj antaŭsignoj. Sed trapasu nun rapide! Ĉar la Reganto de Minaso Tirit avidas renkonti iun ajn, kiu alportas la plej lastajn informojn pri lia filo, ĉu tiu estas homo aŭ...

— Hobito, — diris Grinĉjo. — Malmulte da servado mi povos proponi al via estro, sed kion mi kapablas, tion mi plenumos, memorante la bravan Boromiron.

— Fartu bone! — diris Ingoldo, kaj la homoj liberigis la vojon al Ombrofakso, kaj tiu trapasis mallarĝan pordon en la muro. — Ke vi portu al Denetoro bonajn konsilojn dum lia bezono kaj al ni ĉiuj, Mitrandiro! — Ingoldo kriis. — Sed vi venas kun sciigoj pri malĝojo kaj danĝero, laŭ, oni diras, via kutimo.

— Pro tio ke mi venas malofte, nur kiam mia helpo estas bezonata, — respondis Gandolfo. — Kaj koncerne konsilojn, al vi mi volas diri, ke tro malfrue vi riparas la muron de Pelenoro. Kuraĝo estos jam via plej bona defendo kontraŭ la ŝtormo proksimiĝanta — tio kaj tiom da espero, kiom mi alportas. Ĉar ne ĉiuj informoj, kiujn mi alportas, estas misaj. Sed lasu viajn trulojn kaj akriĝu viajn glavojn!

— La laboro estos finita antaŭ la vespero, — diris Ingoldo. — Tiu ĉi estas la lasta murparto pretigota por defendo: la malplej aperta por atako, ĉar ĝi frontas niajn amikojn el Rohano. Ĉu vi scias ion pri ili? Ĉu ili sekvas la alvokon, laŭ via opinio?

— Jes, ili venos. Sed ili spertis multajn batalojn malantaŭ viaj dorsoj. Nek tiu ĉi vojo, nek iu ajn vojo frontas sekurecon. Estu atentaj! Se ne ekzistus Gandolfo Ŝtormkorvo, vi estus vidintaj amason da malamikoj venantaj el Anorieno kaj neniujn rajdistojn de Rohano. Kaj tio eĉ nun povos okazi. Fartu bone, kaj ne dormu!

Gandolfo nun trapasis en la larĝan terenon post Ramaso Ekor. Tiel la gondoranoj nomis la limmuron, kiun ili penege konstruis, post kiam Itilio submetiĝis al la ombro de la Malamiko. Tra dek leŭgoj aŭ pli ĝi etendiĝis de la montara subo kaj tiom reen, enfermante per sia barilo la kampojn de Pelenoro: belaj kaj fekundaj urborandoj sur la longaj deklivoj kaj terasoj descendantaj al la profundaj niveloj de Anduino. Ĉe sia plej fora punkto de la Granda Pordego de l' urbo, nord-oriente, la muro malproksimis kvar leŭgojn, kaj tie de brovumanta bordo ĝi superrigardis la longajn ebenaĵojn apud la rivero, kaj oni konstruis ĝin alta kaj fortika; ĉar tiuloke, sur murhava digvojo, la vojo alvenis de la travadejoj kaj pontoj de Osgiliado kaj trapasis gardatan pordon inter krenelitaj turoj. Plej proksime la muro troviĝis malmulte pli ol unu leŭgon de la urbo, kaj tio estis sud-oriente. Tie Anduino, fluante laŭ larĝa kurbo ĉirkaŭ la montetoj de Emin Arveno en Suda Itilio direktiĝis abrupte okcidenten, kaj leviĝis la limmuro sur ĝia vera rando; kaj sube kuŝis la kajoj kaj albordiĝejoj de Harlondo por boatoj, kiuj venis laŭ la rivero de la sudaj provincoj.

La regiono estis riĉa, kun larĝaj kultivaĵoj kaj multaj fruktarbaroj, kaj troviĝis parceloj kun sekigejoj kaj grenejoj, ŝafejoj kaj staloj, kaj

multaj rojoj tra la verde ondetantaj de l' altejoj ĝis Anduino. Tamen la paŝtistoj kaj terkulturistoj tie loĝantaj estis malmultaj, kaj la pliparto de la gondoranoj loĝis en la sep cirkloj de la urbo, aŭ en la altaj valoj de la montaraj limoj en Losarnaño, aŭ pli sude en bela Lebenino kun ties kvin rapidaj riveretoj. Tie loĝis hardita popolo inter la montoj kaj la maro. Oni taksis ilin homoj el Gondoro, tamen ilia sango estis miksitita, kaj inter ili estis malaltaj brunhaŭtuloj, kies prapatroj devenis de la forgesitoj, kiuj loĝis en ombro de la montoj dum la Malhelaj Jaroj antaŭ la alveno de la reĝoj. Sed poste, en la granda feŭdo Belfalaso, loĝis princo Imrahilo en sia kastelo Dol Amroto apud la maro, kaj li estis altrasa, kaj ankaŭ lia popolo: altkreskaj fieraj homoj kun okuloj margrizaj.

Nun kiam rajdis Gandolfo kelkan tempon, taglumo plifortiĝis sur la ĉielo, kaj Grinĉjo vigligis sin kaj rigardis supren. Maldekstre kuŝis nebuletomaro, leviĝanta ĝis morna ombro en la oriento; sed dekstre grandaj montaraj suprenstreĉis siajn vertojn, etendiĝante de la okcidento al kruta kaj subita ekstremo, kvazaŭ dum kreado de la lando la rivero trarompus grandan barilon, eltranĉante potencaĵon valon por esti tereno de batalado kaj debatoj en venontaj tempoj. Kaj tie, kie la Blankaj Montoj de Eredo Nimrajs alvenis sian finon, li vidis, kiel promesis Gandolfo, la malhelan amason de monto Mindoluino, la profunde purpurajn ombrojn de ties altaj valetoj, kaj ĝian altan facon blankiĝanta en la naskiĝanta tago. Kaj sur ties elpuŝita genuo estis la Gardata Urbo, kun ĝiaj sep ŝtonaj muroj tiel fortaj kaj malnovaj, ke ĝi ŝajnis ne konstruita, sed elfosita de gigantoj el la ostoj de la tero.

Ĝuste kiam Grinĉjo mire rigardis ilin, la muroj ŝanĝiĝis de baŭma grizo al blanko, malforte ruĝiĝante en la aŭroro; kaj subite la suno grimpis super la orientan ombron kaj elpuŝis radion, kiu frapis la facon de la urbo. Tiam Grinĉjo laŭte ekkriis, ĉar la Turego de Ekteliono, staranta alta interne de la plej supra muro, elradiis antaŭ la ĉielo, ekbrilante kiel pikilo perla kaj arĝenta, alta kaj svelta kaj belforma, kaj ties pinto ekbrilis kvazaŭ ĝi estus farita el kristaloj; kaj blankaj standardoj malvolviĝis kaj bloviĝis sur la krenelaro en la matena venteto, kaj alte kaj fore li aŭdis klaran sonorono kvazaŭ de arĝentaj trumpetoj.

Tiel Gandolfo kaj Peregrino rajdis al la Granda Pordego de Gondoro ĉe leviĝo de la suno, kaj la feraj pordoklapoj rulmalfermiĝis antaŭ ili.

— Mitrandiro! Mitrandiro! — homoj kriis. — Jam ni scias, ke la ŝtormo estas proksima!

— Ĝi venos tuj, — diris Gandolfo. — Mi rajdis sur ties flugiloj. Lasu min pasi! Mi devas veni al via Reganto Denetoro, dum daŭras lia regado. Kio ajn okazos, vi alvenis la finon de tiu Gondoro, kiun vi konis. Lasu min pasi!

Tiam la homoj retroiris pro la ordonemo de lia voĉo kaj ne plu pridemandis lin, kvankam ili gapis mirante al la hobito sidanta antaŭ li kaj al la ĉevalo kiu portis lin. Ĉar la urbanoj tre malmulte utiligis ĉevalojn kaj tiujn oni malofte vidis sur la stratoj, krom nur tiujn rajdatajn de la kurieroj de ilia reganto. Kaj ili diris: “Nepre tiu estas unu el la grandaj ĉevaloj de la reĝo de Rohano, ĉu ne? Eble la rohananoj baldaŭ venos por nin plifortigi”. Sed Ombrofakso paŝis fiere laŭ la longa serpentuma vojo.

Ĉar la formo de Minaso Tirit estis tia, ke ĝi estis konstruita je sep niveloj, unuope elfositaj sur la monto, kaj ĉirkaŭ ĉiu el ili estis metita muro, kaj en ĉiu muro estis pordo. Sed la pordoj ne estis metitaj en vico: la Granda Pordego en la Urba Muro troviĝis ĉe la orienta punkto de la rondiro, sed la plej proksima frontis duone suden, kaj la tria duone norden, kaj tiel tien-reen supren; tiel ke la pavimita vojo, kiu grimpis al la Citadelo turniĝis jen tien jen alien tra la faco de la monteto. Kaj ĉiufoje kiam ĝi pasis la linion de la Granda Pordego ĝi trairis arkan tunelon, penetrante vastan roktrumon kies enorma elpuŝiĝo disduigis ĉiujn cirklojn de la urbo krom la unua. Ĉar parte laŭ la praa formo de la monteto, parte pro la potencaj faklerto kaj laboro en la pratempo, elstariĝis el la malantaŭo de la larĝa korto malantaŭ la Pordego turanta ŝtonbastiono, kies eĝo, akra kiel ŝipa kilo, frontis orienten. Supren ĝi leviĝis ĝis la nivelo de la plej supra cirklo, kaj tie ĝin kronis krenelaro; tiel ke personoj en la Citadelo povis, kiel maristoj sur monteca ŝipo, malsupren rigardi al la Granda Pordego sepcent futojn sube. Ankaŭ la enirejo de la Citadelo frontis orienten, sed estis elfosita en la kerno de la roko; de tie longa lamplumita deklivo etendiĝis supren al la sepa pordo. Tiel oni fine atingis la Altan Korton, kaj la Placon de l' Fontano antaŭ la subaĵo de la Blanka Turego: alta kaj belforma ĝi estis, cent kvindek klaftojn de la bazo ĝis la pinto, kie flosis la standardo de la Regantoj je mil futoj super la ebenaĵo.

Fortika citadelo ĝi ja estis, kaj ne venkebla per amaso da malamikoj, dum enestis iuj kapablaj teni armilojn; krom se iu malamiko

povus veni de malantaŭe kaj grimpi la pli malaltajn randojn de Mindoluino, kaj tiel alveni la mallarĝan ŝultron kiu ligis la Monton de Gardado kun la montara pasejo. Sed tiu ŝultro, kiu supreniĝis ĝis alteco de la kvina muro, estis barita per grandaj remparoj eĉ ĝis la krutegaĵo kiu superpendis ĝian okcidentan ekstremon; kaj en tiu spaco staris la domoj kaj kupolaj tomboj de forpasintaj reĝoj kaj regantoj, eterne silentaj inter la monto kaj la turego.

Ĉiam pli mirigite Grinĉjo gapis al la granda ŝtonurbo, pli vasta kaj pli impona ol io ajn pri kio li imagis; pli granda kaj pli fortika ol Isengardo, kaj multe pli bela. Tamen ĝi estis efektive jaron post jaro kadukiĝanta; kaj jam al ĝi mankis duono de la homoj, kiuj povus loĝi tie senĝene. Sur ĉiu strato ili pasis iun grandan domon aŭ korton, super kies pordoj kaj arkitaĵaj trairejoj estis ĉizitaj multaj belaj literoj strange kaj antikve formitaj: nomoj, Grinĉjo konjektis, de eminentuloj kaj parencaroj, kiuj iam loĝis tie; kaj tamen nun ili estis silentaj, kaj neniuj paŝoj bruis sur la larĝaj pavimoj, nek aŭdiĝis en ties haloj voĉoj, nek elrigardis vizaĝo tra pordo aŭ malplena fenestro.

Fine ili eliris el la ombro al la sepa pordo kaj la varma suno, mal-supren brilanta trans la rivero; dum Frodo marŝis en valetoj de Itilio, ĉi tie ardis sur la glataj muroj kaj fortikaj pilastroj, kaj la granda arkaĵo kun ĉefŝtono ĉizita laŭ similaĵo de kronita kaj reĝeca kapo. Gandalfo elseliĝis, ĉar al neniuj ĉevaloj estis permesite eniri la Citadelon, kaj Ombrofakso konsentis forkondukiĝi pro mallaŭta vorto de sia mastro.

La gardantoj de la pordo estis vestitaj nigre, kaj iliaj kaskoj estis strangformaj, altvertaj, kun longaj vangoŝirmiloj strikte proksimaj al la vizaĝo, kaj super la vangoŝirmiloj estis lokitaj la blankaj flugiloj de marbirdoj; sed la kaskoj ekbrilis arĝentflame, ĉar ili estis efektive faritaj el *mitrilo*, heredaĵoj el la gloro de l' malnova tempo. Sur la nigraj kiteloj estis blanke brodita po arbo floranta kvazaŭ neĝe sub arĝenta krono kaj steloj multpintaj. Tio estis la livreo de la heredintoj de Elen-dilo, kaj neniuj portis tion en la tuta Gondoro krom la gardistoj de la Citadelo antaŭ la Korto de l' Fontano, kie iam kreskis la Blanka Arbo.

Jam ŝajnis, ke informo pri ilia alveno anticipis ilin; kaj tuj ili estis enlasitaj, silente kaj senkondiĉe. Rapide Gandalfo transpaŝis la blanke pavimitan korton. Dolĉa fontano tie ŝprucis en la matena sunlumo, kaj razeno helverda ĉirkaŭis ĝin; sed meze, klinita super la lageto,

staris mortinta arbo, kaj la falantaj akveroj gutis malgaje de ĝiaj malfekundaj kaj rompitaĵaj branĉoj reen en la klaran akvon.

Grinĉo ekrigardis ĝin dum li rapidis post Gandolfo. Ĝi aspektas morne, li pensis, kaj li scivolis, kial la mortinta arbo estis lasita sur tiu loko, kie ĉio alia estis bone prizorgita.

Sep stelojn, sep ŝtonojn, kaj unu blankan arbon.

La vortoj murmuritaj de Gandolfo revenis al lia menso. Kaj poste li troviĝis ĉe la pordo de la halego sub la brilanta turo; kaj malantaŭ la sorĉisto li preterpasis la altajn silentajn pordogardistojn kaj eniris la friskajn reeĥajn ombrojn de la domo el ŝtono.

Ili marŝis laŭ pavimita koridoro, longa kaj vaka, kaj dumire Gandolfo alparolis mallaŭte Grinĉon.

— Zorgu pri viaj vortoj, mastro Peregrino! Malkonvenas la okazo por hobita impertinento. Teodeno estas bonkora maljunulo. Denetoro estas alispeca, fieraj kaj subtila, homo de pli gravaj deveno kaj potenco, kvankam oni ne titolas lin reĝo. Sed li alparolos pli multe vin, kaj multe pridemandos vin, ĉar vi povos rakonti al li pri lia filo Boromiro. Li amis tiun profunde: eble tro profunde; kaj tiom pli ĉar ili malsimilis unu la alian. Sed sub kovro de tiu amo li supozos pli facile ekscii per vi tion, kion li volas, prefere ol per mi. Ne sciigu al li pli ol necesas, kaj lasu netuŝita la temon de la komisiono de Frodo. Mi traktos tion ĝustatempe. Kaj ankaŭ diru nenion pri Aragorno, krom se necesas.

— Kial? Kio misas pri Paŝegulo? — Grinĉo flustris. — Li intencis veni ĉi tien, ĉu ne? Kaj eble li mem baldaŭ alvenos.

— Eble, eble, — diris Gandolfo. — Kvankam se li venos, probable tio okazos laŭ maniero, kiun neniu antaŭvidas, eĉ ne Denetoro. Estos pli bone tiel. Li almenaŭ prefere venu neheroldita de ni. — Gandolfo haltis antaŭ alta pordo el polurita metalo. — Vidu, mastro Grinĉo, mankas nun tempo por instrui vin pri la historio de Gondoro; kvankam eble estintus pli bone, se vi lernus ion pri ĝi dum vi ankoraŭ serĉis birdajn nestojn kaj vagadis dum la kursotempo en arbaroj de la Provinco. Faru laŭ mia ordono! Ne tre saĝe estas, kiam oni alportas sciigon al potenca reganto pri la morto de ties heredonto, tro priparoli la alvenon de iu kiu, se li venos, pretendos la reĝecon. Ĉu tio sufiĉas?

— Ĉu la reĝecon? — diris Grinĉo mirigite.

— Jes, — diris Gandolfo. — Se vi marŝis tiom da tagoj kun fermitaj oreloj kaj dormanta menso, jam vekigu!

Li frapis sur la pordon.

La pordo malfermiĝis, sed neniu malferminto vidiĝis. Grinĉjo enrigardis grandan halegon. Ĝin lumigis profundaj fenestroj en la larĝaj aloj ambaŭflanke, malantaŭ la vicoj de altaj pilastroj, kiuj subtenis la plafonon. Monolitoj el nigra marmoro, ili leviĝis ĝis grandaj kapitejoj ĉizitaj laŭ multaj strangaj formoj de bestoj kaj folioj; kaj multe pli supre en ombro la larĝa kupolo brilis malhele ora, enkrustita per fluaj aĵuraĵoj multkoloraj. Neniuj tapetoj nek amasiĝintaj kurtenoj, nek ajnaj objektoj el teksaĵo aŭ ligno vidiĝis en tiu longa solena halego; sed inter la pilastroj staris silenta aro de altaj skulptaĵoj ĉizitaj el malvarma ŝtono.

Subite Grinĉjo memoris pri la ĉizitaj rokoj de Argonato, kaj imponiĝo inundis lin, kiam li rigardis tiun avenueon de reĝoj delonge mortintaj. Ĉe la fora ekstremo sur podio multŝtupa estis alta trono sub baldakeno el marmoro farita kiel kronforma kasko; post ĝi estis ĉizita sur la muro kaj enkrustita de gemoj bildo de arbo floranta. Sed la trono estis vaka. Sube de la podio, sur la plej malsupra ŝtupo, kiu estis larĝa kaj profunda, estis ŝtona seĝo, nigra kaj senornama, kaj sur ĝi sidis maljunulo rigardanta sian sinon. En lia mano estis blanka bastono kun ora tubero. Li ne suprenrigardis. Solene ili trapaŝis la longan plankon al li, ĝis ili staris je tri paŝoj de lia tabureto. Tiam Gandolfo ekparolis.

— Saluton, Mastro kaj Reganto de Minaso Tirit, Denetoro, filo de Ekteliono! Mi venis kun konsiloj kaj novaĵoj en tiu ĉi malhela horo.

Tiam la maljunulo suprenrigardis. Grinĉjo vidis lian ĉizitecan vizaĝon kun ties fieraj ostoj kaj haŭto ebureca, kaj la longan kurban nazon inter la malhelaj profundaj okuloj; kaj li estis memorigita malpli pri Boromiro ol pri Aragorno.

— Ja la horo estas malhela, — diris la maljunulo, — kaj en tiaj tempoj vi kutimas veni, Mitrandiro. Sed malgraŭ tio, ke ĉiuj signoj antaŭdiras, ke la malfortuno de Gondoro proksimiĝas, malpli trafas min nun tiu mallumo ol mia propra mallumo. Estas dirite al mi, ke vi kunportas iun, kiu vidis mian filon morti. Ĉu jen li?

— Estas, — diris Gandolfo. — Unu el la du. La alia estas kun Teodeno en Rohano kaj eble sekvos poste. Duonuloj ili estas, kiel vi vidas, tamen tiu ĉi ne estas tiu, pri kiu parolis la profetaĵo.

— Tamen duonulo, — diris Denetoro minaceme, — kaj malmulte mi amas tiun nomon, de kiam venis tiuj malbenindaj vortoj ĝeni niajn interkonsilojn kaj forlogi mian filon al tiu malprudenta komisio kaj lia morto. Mia Boromiro! Nun ni bezonas vin. Faramiro devintus iri anstataŭe.

— Li irus, — diris Gandolfo. — Ne maljustu pro via doloro! Boromiro pretendis la komision kaj ne permesis, ke iu alia akceptu ĝin. Li estis homo mastrema, kaj preninto de ĉio, kion li volis. Ni longe vojaĝis kun li kaj eksciis multe pri liaj humoroj. Sed vi parolas pri lia morto. Vi ricevis malbonan novaĵon tiurilate antaŭ ol ni alvenis, ĉu?

— Tion ĉi mi ricevis, — diris Denetoro, kaj formetinte sian bastonon li levis de sia sino tion, kion li alrigardis. Po unumane li suprenenis duonojn de granda korno trarompita meze: ura kornego arĝente ornamita.

— Tio estas la korno, kiun Boromiro ĉiam kunportis! — kriis Grinĉjo.

— Vere, — diris Denetoro. — Kaj miavice mi portis ĝin, kaj same faris ĉiu pliaĝa filo de nia domo, fore en la prajarojn antaŭ ol malaperis la reĝoj, de kiam Vorondilo, la patro de Mardilo, ĉasis urojn de Aravo en la foraj kampoj de Rhuno. Mi aŭdis malklare ĝin sonoranta ĉe la norda limregiono antaŭ dek tri tagoj, kaj la Rivero portis ĝin al mi, rompitan: ĝi ne plu sonoros. — Li paŭzis kaj sekvis peza silento. Subite li turnis sian malhelan rigardon al Grinĉjo. — Kion vi diras pri tio, duonulo?

— Dek tri, dek tri tagoj, — hezitis Grinĉjo. — Jes, mi opinias, ke estas tiel. Jes, mi staris apud li, kiam li blovis la kornon. Sed nenia helpo venis. Nur pli da orkoj.

— Do, — diris Denetoro, akre rigardante la vizaĝon de Grinĉjo. — Vi ĉeestis, ĉu? Rakontu pli! Kial ne venis helpo? Kaj kiel eskapis vi, tamen ne li, tiom potenca homo li estis, dum nur orkoj kontraŭis lin.

Grinĉjo ruĝiĝis kaj forgesis sian timon.

— Homo plej potenca estas mortigebla per unu sago, — li diris, — kaj Boromiron trapikis multaj. Kiam mi lastfoje vidis lin, li kolapsis apud arbo kaj eltiris nigrapluman sagon el sia flanko. Tiam mi svenis kaj estis kaptita. Mi ne plu vidis lin, kaj scias nenion pli. Sed mi honoras lian memoron, ĉar li estis kuraĝega. Li mortis por savi nin, mian parencon Gajadokon kaj min, embuskitajn en la arbaro de soldatoj de la Malhela Mastro; kaj kvankam li pereis kaj malsukcesis, mia dankemo ne malpliĝas.

Tiam Grinĉjo rigardis la maljunulon rekte en la okulojn, ĉar fiero ekmoviĝis strange en li, ankoraŭ pikita de la malestimo kaj suspektemo de tiu malvarma voĉo.

— Ne grandan servon, sendube, supozas trovi tiel grava estro de homoj en hobito, duonulo el la norda Provinco; sed tia, kia ĝi estas, mi

volas ĝin proponi, page al mia ŝuldo. — Forskuinte sian grizan mantelon, Grinĉjo elingigis sian glaveton kaj metis ĝin antaŭ la piedojn de Denetoro.

Pala rideto, kiel ekbrilo de malvarma sunlumo en vintra vespero, trapasis la vizaĝon de la maljunulo; sed li klinis sian kapon kaj etendis sian manon, flankenmetante la pecojn de la korno.

— Donu al mi la armilon! — li diris.

Grinĉjo levis ĝin kaj prezentis al li la tenilon. — De kie venis ĝi? Multaj, multaj jaroj surkuŝas ĝin. Certe tio ĉi estas klingo farita de nia parencaro en la nordo dum la malproksima pasinteco.

— Ĝi alvenis el la dolmenoj, kiuj troviĝas ĉe la limoj de mia lando, — diris Grinĉjo. — Sed tie nun loĝas nur malicaj fantomoj, kaj mi ne volonte pli rakontos pri ili.

— Mi konstatas, ke strangaj rakontoj plektiĝas ĉirkaŭ vi, — diris Denetoro, — kaj ankoraŭfoje evidentiĝas, ke povas trompi aspekto de homo, aŭ de duonulo. Vian servon mi akceptas. Ĉar vin ne timigas vortoj; kaj via parolo estas ĝentila, eĉ se ĝi sonas strange al ni en la sudo. Kaj ni bezonas ĉiujn personojn ĝentilajn, ĉu grandajn ĉu malgrandajn, en la venontaj tagoj. Ĵuru al mi nun!

— Enmanigu la tenilon, — diris Gandolfo, — kaj ripetu post la Reganto, se vi estas certa pri tio ĉi.

— Mi estas, — diris Grinĉjo.

La maljunulo kuŝigis la glavon laŭlonge de sia sino, kaj Grinĉjo metis manon al la tenilo, kaj diris malrapide post Denetoro.

— Jen mi ĵuras lojalecon kaj servadon al Gondoro, kaj al la Mastro kaj Reganto de la regno, por paroli kaj silenti, por fari kaj nefari, por veni kaj iri, en manko aŭ malmanko, dum paco aŭ milito, vivante aŭ mortante, ekde tiu ĉi horo, ĝis mia mastro min liberigos, aŭ morto trafos min, aŭ la mondo finiĝos. Tion diras mi, Peregrino, filo de Paladino, el la Provinco de la Duonuloj.

— Kaj tion aŭdas mi, Denetoro, filo de Ekteliono, Mastro de Gondoro, reganta nome de la Alta Reĝo, kaj mi tion ne forgesos, nek malsukcesos rekompenci tion, kio estas donita: lojalecon kun amo, kuraĝon kun honoro, ĵurorompon kun venĝo.

Grinĉjo rericevis sian glavon kaj eningigis ĝin.

— Kaj nun, — diris Denetoro, — jen mia unua ordono al vi: parolu kaj ne silentu! Rakontu al mi vian plenan historion, kaj certigu, ke vi memoras ĉion eblan pri mia filo Boromiro. Sidiĝu jam kaj komencu! — Parolante li frapis arĝentan gongeton, kiu staris apud lia

piedapogilo, kaj tuj paŝis antaŭen servistoj. Grinĉjo konstatis, ke tiuj staris en alkovoj ambaŭflanke de la pordo, neviditaj kiam envenis li kaj Gandalfo.

— Alportu vinon kaj manĝaĵon kaj seĝojn por la gastoj, — diris Denetoro, — kaj certigu, ke neniu ĝenu nin dum unu horo.

— Nur tiom da tempo mi disponas, ĉar multaj aliaj aferoj estas traktendaj, — li diris al Gandalfo. — Multe pli gravaj, eble ŝajnos, kaj tamen por mi malpli urĝaj. Sed eble ni povos denove interparoli tagofine.

— Eĉ pli frue, espereble, — diris Gandalfo. — Ĉar mi rajdis ĉi tien el Isengardo cent kvindek leŭgojn laŭ rapideco de vento ne nur por alporti al vi unu malgrandan batalanton, kiom ajn ĝentilan. Ĉu signifas nenion al vi, ke Teodeno travivis grandan batalon, kaj ke Isengardo estas venkita, kaj ke mi rompis la bastonon de Sarumano?

— Tio signifas al mi multon. Sed mi jam scias sufiĉe pri tiuj faritaĵoj por miaj propraj planoj kontraŭ la minaco en la oriento. — Li turnis siajn malhelajn okulojn al Gandalfo, kaj nun Grinĉjo vidis similecon inter la du, kaj li sentis streĉitecon inter ili, preskaŭ kvazaŭ li vidus linion da subbrula fajro tirata de okulo al okulo, kiu eble ekflamus subite.

Efektive Denetoro aspektis multe pli granda sorĉisto ol Gandalfo, pli reĝeca, bela, kaj potenca; kaj pli maljuna. Tamen per sentumo alia ol vido Grinĉjo perceptis, ke Gandalfo posedas pli grandan potencon, kaj pli profundan saĝon, kaj majeston vualitan. Kaj li estas pli maljuna, multe pli maljuna. “Kiom pli aĝa?” — li scivolis, kaj poste li pensis, kiel strange estas ke li neniam antaŭe pensis pri tio. Arbobarbo diris ion pri sorĉistoj, sed eĉ tiam li ne taksis Gandalfon unu el ili. Kio estas Gandalfo? En kiuj malproksimaj tempo kaj loko li venis en la mondon, kaj kiam li forlasos ĝin? Kaj tiam ĉesis lia meditado, kaj li vidis, ke Denetoro kaj Gandalfo daŭre rigardas l’ okulojn unu de la alia, kvazaŭ legante la menson de l’ alia. Sed estis Denetoro, kiu la unua forturnis sian rigardon.

— Jes, — li diris; — ĉar malgraŭ tio, ke la Ŝtonoj estas perditaj, onidire, tamen la Mastroj de Gondoro pli akre vidas ol homoj malpli gravaj, kaj multaj mesaĝoj venas al ili.

Poste venis viroj portantaj seĝon kaj malaltan tabureton, kaj unu alportis pleton kun arĝenta pokalo, tasoj kaj blankaj kukoj. Grinĉjo sidiĝis, sed li ne povis forturni sian rigardon de la maljuna Reganto.

Ĉu estis tiel, aŭ tion li nur imagis, ke parolante pri la Ŝtonoj subita ekbrilo en lia okulo trafis la vizaĝon de Grinĉjo?

— Nun rakontu al mi vian historion, mia lojalulo, — diris Denetoro, duone afable, duone moke. — Ĉar la vortoj de iu, al kiu amikiĝis mia filo, estos vere bonvenaj.

Grinĉjo neniam forgesis tiun horon en la granda halego sub la trapikaj okuloj de la Mastro de Gondoro, trafite ĉiam denove per ties sagacaj demandoj, kaj konscia la tutan tempon pri Gandolfo apude, kiu rigardis kaj aŭskultis, kaj (tion sentis Grinĉjo) bridis kreskantajn koleron kaj senpaciencon. Kiam finiĝis la horo, kaj Denetoro denove sonorigis la gongon, Grinĉjo sentis sin elĉerpita. “Ne povas esti pli malfrue ol la naŭa horo, — li pensis. — Mi povus nun konsumi tri matenmanĝojn sinsekve”.

— Konduku la mastron Mitrandiro al la loĝejo pretigita por li, — diris Denetoro, — kaj lia kunulo rajtas loĝi kun li provizore, se li volas. Sed estu konate, ke mi ĵure servistigis lin, kaj oni nomos lin Peregrino, filo de Paladino, kaj instruos al li la malpli gravajn pasvortojn. Sendu mesaĝon al la komandantoj, ke ili kunvenu kun mi ĉi tie, laŭeble baldaŭ post sonorigo de la tria horo.

» Kaj ankaŭ vi, moŝto Mitrandiro, venu, kiel kaj kiam vi volos. Neniu malhelpos vian alvenon al mi iam ajn, krom nur dum miaj mallongaj dormohoroj. Lasu fordreniĝi vian koleron pro la malsaĝo de maljunulo, kaj poste revenu por min konsoli!

— Ĉu malsaĝo? — diris Gandolfo. — Ne, estra moŝto, la saĝo forlasos vin nur kune kun la vivo. Vi kapablas uzi eĉ vian doloron kiel mantelon. Ĉu vi opinias, ke mi ne komprenas vian celon: enketi dum horo iun, kiu plej malmulton scias, dum mi sidas proksime?

— Se vi tion komprenas, tiam estu kontenta, — respondis Denetoro. — Tia fiero estus fola, kia malŝatus helpoj kaj konsilojn laŭbezone; sed vi disdonas tiajn donacojn laŭ viaj propraj intencoj. Tamen la Mastro de Gondoro neniam estos perilo de aliulaj celoj, kiel ajn indaj. Kaj al li neniu celo pli altas en la mondo, kia ĝi nun estas, ol la bono de Gondoro; kaj regado de Gondoro, moŝto, estas mia kaj de neniu aliulo, krom se la reĝo revenus.

— Krom se la reĝo revenus? — diris Gandolfo. — Nu, mia moŝta Reganto, via tasko estas konservi iom da regno ĝis tiu okazaĵo, kiun malmultaj jam atendas vidi. Por tiu tasko vi ricevos tiom da helpo, kiom vi bonvolos peti. Sed tion ĉi mi volas diri: regado de neniu regno estas mia, nek de Gondoro, nek de alia, ĉu granda aŭ malgranda. Sed

mia zorgo estas ĉiuj indaj aferoj, kiuj troviĝas en danĝero pro la nuna stato de la mondo. Kaj miaparte mi ne tute fiaskos rilate mian taskon, eĉ se Gondoro pereus, se io ajn trapasos tiun ĉi nokton, kio kapablos plu beliĝi aŭ frukti kaj flori denove en la venontaj tagoj. Ĉar ankaŭ mi estas reganto. Ĉu vi ne sciis? — kaj post tio li sin turnis kaj forpaŝis el la halego, dum Grinĉjo kuris apude.

Gandolfo ne rigardis Grinĉjon nek ion diris al li dum la foriro. Ilia gvidanto ekiris kun ili de la halega pordo, kaj poste kondukis ilin tra la Korto de l' Fontano en vojeton inter altaj ŝtonkonstruaĵoj. Post kelkaj turniĝoj ili alvenis domon proksiman al la citadela muro je la norda flanko, ne malproksime de l' ŝultro kiu ligis la deklivon al la monto. Interne, sur la unua etaĝo super la strato laŭ larĝa skulptita ŝtuparo, li montris al ili belan ĉambron lumplenan kaj aerumatan, kun bonkvalitaj tapetoj el malbrila ora muaro senbrodaĵa. Ĝi estis malabunde meblita, havante nur tableton, du seĝojn kaj benkon; sed ambaŭflanke troviĝis kurtenitaj alkovoj kaj bone kovritaj litoj interne kun ujoj kaj pelvoj por sinlavado. Troviĝis tri altaj mallarĝaj fenestroj, kiuj frontis norden tra la granda kurbiĝo de Anduino, ankoraŭ vualita per nebuleto, al Emin Muilo kaj Raŭroso malproksimaj. Grinĉjo devis grimpi sur la benkon por elrigardi trans la profunda ŝtona sojlo.

— Ĉu vi koleras pri mi, Gandolfo? — li demandis, kiam ilia gvidinto eliris kaj fermis la pordon. — Mi faris laŭeble plej bone.

— Tion vi ja faris! — diris Gandolfo, subite ekridante; kaj li starigis apud Grinĉjo, ĉirkaŭante per sia brako la ŝultrojn de la hobito, kaj elrigardante tra la fenestro.

Grinĉjo rigardis iom mire la vizaĝon jam proksiman al sia propra, ĉar tiu rido sonis gaja kaj senzorga. Tamen sur la vizaĝo de la sorĉisto li vidis komence nur sulketojn de zorgo kaj malĝojo; kvankam rigardinte pli atente li perceptis, ke sub ĉio ĉi estis granda ĝojo: fontano da amuziĝo sufiĉa por ridigi tutan regnon, se ĝi elŝprucus.

— Efektive, vi faris laŭeble plej bone, — diris la sorĉisto, — kaj mi esperas, ke pasos longa tempo antaŭ ol vi denove trovos vin en tia malfacila situacio inter du tiel timigaj maljunuloj. Tamen la Mastro de Gondoro eksciis per vi pli ol vi eble supozis, Grinĉjo. Vi ne povis kaŝi la fakton, ke Boromiro ne estris la Kunularon ekde Morio, kaj ke inter vi troviĝis iu alte honorinda kiu venos al Minaso Tirit; kaj ke tiu portis faman glavon. La homoj en Gondoro multe pripensas la historiojn pri la pratempo; kaj Denetoro longe meditis pri la rimaĵo kaj pri la vortoj *plago de Isilduro*, de kiam foriris Boromiro.

» Nuntempe li ne similas aliajn homojn, Grinĉjo, kaj kia ajn estis lia deveno de patro al filo, hazarde la sango de Okcidentio fluas preskaŭ seninterrompe en li; tia estas lia alia filo, Faramiro, kaj tamen ne Boromiro, kiun li pleje amis. Li estas longvida. Li povas percepti, se al tio li klinas sian volon, multon el tio, kio trapasas la mensojn de la homoj, eĉ tiujn kiuj loĝas malproksime. Estas malfacile trompi lin, kaj danĝere tion provi.

» Memoru tion! Ĉar nun vi estas ĵurita al lia servado. Mi ne scias, kio enkapigis aŭ enkorigis al vi tion. Sed estis bone farite. Mi tion ne malhelpis, ĉar malavaran faron devus ne bremsi malvarma konsilo. Tio kortuŝis lin, kiel ĝi ankaŭ (mi rajtu diri) plaĉis al lia humoro. Kaj almenaŭ vi jam rajtas libere vagadi laŭvole en Minaso Tirit — kiam vi ne deĵoros. Ĉar ekzistas alia flanko de la afero. Li rajtas ordoni al vi, kaj tion li ne forgesos. Estu pli singarda!

Li silentiĝis kaj suspiris.

— Nu, ne necesas mediti pri morgaŭaj eblaj okazaĵoj. Ekzemple, morgaŭ certe alportos pli malbonan ol hodiaŭ, dum multaj venontaj tagoj. Kaj nenion plu mi povas fari por plibonigi tion. La ludtabulo estas starigita, kaj la ludpecoj moviĝas. Unu peco, kiun mi tre deziras trovi, estas Faramiro, jam la heredonto de Denetoro. Al mi ŝajnas, ke li ne estas en la urbo; sed mankis al mi tempo ekserĉi novaĵojn. Mi devas eliri, Grinĉjo. Mi devas ĉeesti tiun konsilion de komandantoj kaj ekscii, kiom mi povos. Sed estas la vico de la Malamiko fari movon, kaj li tuj komencos sian plenan ludon. Kaj peonoj probable spertos tiom el ĝi kiom iu ajn, Peregrino, filo de Paladino, soldato de Gondoro. Akriĝu vian klingon! — Gandolfo iris al la pordo, kaj tie li turnis sin. — Mi hastas, Grinĉjo. Komplezu al mi, kiam vi eliros. Eĉ antaŭ ol ripozi, se vi ne estas tro laca. Iru trovi Ombrofakson kaj konstatu kiel ĝi estas enstaligita. Ĉi tieaj homoj afable traktas bestojn, ĉar ili estas popolo bona kaj saĝa, sed ili malpli lertas ol iuj rilate ĉevalojn.

Tion dirinte Gandolfo eliris; kaj ĝuste kiam li faris tion, aŭdiĝis klara belsona sonorilo en la turo de la citadelo. Trifoje ĝi batis, kiel arĝento sur la aero, kaj ĉesis: la tria horo post la leviĝo de la suno.

Post minuto Grinĉjo iris al la pordo kaj malsupren laŭ la ŝtuparo kaj ĉirkaŭrigardis sur la strato. La suno nun brilis varme kaj hele, kaj la turoj kaj altaj domoj ĵetis longajn klare difinitajn ombrojn okcidenten. Alte en la blua aero monto Mindoluino levis sian blankan

kreston kaj neĝan mantelon. Armitoj iris tien-reen sur la vojoj de la urbo, kvazaŭ irante je la horsonoro al ŝanĝiĝo de postenoj kaj devoj.

— La naŭa horo mi nomus tion en la Provinco, — diris Grinĉjo voĉe al si. — Ĝusta tempo por agrabla matenmanĝo apud malfermita fenestro en printempa sunlumo. Kaj kiom plaĉus al mi matenmanĝo! Ĉu ĉi tieaj homoj iam manĝas tion, aŭ ĉu ĝi finiĝis? Kaj kiam ili tagmanĝas, kaj kie?

Baldaŭ li rimarkis viron, nigre kaj blanke vestitan, kiu iris laŭ la mallarĝa strateto el la centro de la citadelo al li. Grinĉjo sentis sin soleca kaj decidis alparoli la viron; sed tio ne necesis. La viro venis rekte al li.

— Vi estas duonulo Peregrino, ĉu? — li demandis. — Oni informis min, ke vi ĵuris servi la Mastron kaj la Urbon. Bonvenon! — Li etendis sian manon kaj Grinĉjo akceptis ĝin. — Mi nomiĝas Beregondo, filo de Baranoro. Mi ne postenas ĉi-matene, kaj oni sendis min por instrui al vi la pasvortojn kaj informi vin pri kelkaj el la multaj aferoj, kiujn vi sendube volos ekkoni. Kaj miaflanke, mi deziras ankaŭ lerni pri vi. Ĉar neniam antaŭe mi vidis duonulon en tiu ĉi lando kaj malgraŭ tio, ke ni aŭdis onidirojn pri ili, malmulto estas rakontita pri ili en la historioj al ni konataj. Cetere, vi estas amiko de Mitrandiro. Ĉu vi konas lin bone?

— Nu, — diris Grinĉjo. — Mi scias *pri* li dum mia tuta mallonga vivo, kiel oni povus diri; kaj lastatempe mi longe vojaĝis kun li. Sed multo legindas en tiu libro, kaj mi ne rajtas pretendi, ke mi vidis pli ol unu-du paĝojn. Tamen eble mi konas lin tiel bone, kiel iu ajn, krom malmultaj. Aragorno estis la sola en nia Kunularo, mi opinias, kiu vere konis lin.

— Aragorno? — diris Beregondo. — Kiu li estas?

— Ho, — balbutis Grinĉjo, — estas iu, kiu iris kun ni. Mi pensas, ke li nun estas en Rohano.

— Vi estis en Rohano, mi aŭdis. Estas multo, pri kio mi volus demandi vin ankaŭ pri tiu lando; ĉar ni investas multon el nia malgranda espero en ties popolo. Sed mi forgesas pri mia komisio, kiu estis unue respondi tion, kion vi volas demandi. Kion vi volas scii, mastro Peregrino?

— Nu ja, — diris Grinĉjo, — se mi risku tion diri, iom brula demando en mia menso nuntempe koncernas, nu, kio pri matenmanĝo kaj tiel plu? Mi volas diri, kiam estas la manĝohoroj, se vi komprenas min, kaj kie estas la manĝoĉambro, se tio ekzistas? Kaj la

tavernoj? Mi gvatis, sed eĉ unu tian mi ne vidis, dum ni trarajdis, kvankam min subtenis espero pri gluto da biero tuj, kiam ni atingos la hejmojn de homoj saĝaj kaj ĝentilaj.

Beregondo rigardis lin serioze.

— Sperta kampanjinto, mi konstatas, — li diris. — Oni diras, ke tiuj, kiuj iras milite en malproksimo, ĉiam antaŭvidas venontan esperon pri manĝaĵoj kaj trinkaĵoj; kvankam mi mem ne vojaĝis multe. Do hodiaŭ vi ankoraŭ ne manĝis, ĉu?

— Nu jes, se paroli ĝentile, jes, — diris Grinĉjo. — Sed ne pli ol tason da vino kaj unu-du blankajn kuketojn pro la afablo de via Mastro; sed kontraŭ tio li torturis min dum horo da demandoj, kaj tio estas laboro malsatiga.

— Ĉetable etuloj povas plenumi bravaĵojn grandajn, ni diras, — ridis Beregondo. — Sed vi ĉesigis vian faston tiel bone, kiel iu ajn viro en la Citadelo, kaj pli honore. Tio ĉi estas fortikaĵo kaj gardoturego kaj nun militpretas. Ni leviĝas pli frue ol la suno kaj glutas manĝeton en la griza lumo, kaj iras al niaj postenoj je la malferma horo. Sed ne malesperu! — li ridis denove, vidante la konsterniĝon sur la vizaĝo de Grinĉjo. — Tiuj, kiuj havis *pezan* deĵoron, glutas ion por refreŝigi sian forton en mezmateno. Poste okazas tagmanĝo, je tagmezo aŭ iom poste laŭ eblecoj de l' deĵorado; kaj oni kuniĝas por vespermanĝo kaj tia plezuro, kia ankoraŭ eblas ĉirkaŭ la horo de la sunsubiro. Venu! Ni iom promenos kaj poste iros trovi iom da nutraĵo, kaj manĝos kaj trinkos sur la remparo, kaj videsploros la belan matenon.

— Momenton! — diris Grinĉjo hontruĝiĝante. — Avido aŭ malsato, se vi konsentas ĝentili, forigis jenon el mia menso. Sed Gandolfo, kiun vi nomas Mitrandro, petis, ke mi prizorgu lian ĉevalon Ombrofakso, grandan ĉevalon el Rohano, la plej ŝatatan posedaĵon de la reĝo, oni diras, kvankam li donacis ĝin al Mitrandro pro ties servoj. Mi opinias, ke ĝia nova mastro amas tiun beston pli sincere ol li amas multajn homojn, kaj se lia bonkoro estas iel valora por tiu ĉi urbo, vi traktu Ombrofakson kun plena honoro: kun pli granda afableco ol vi traktis tiun ĉi hobiton, se tio eblas.

— Ĉu hobito? — diris Beregondo.

— Tiel ni nomas nin, — diris Grinĉjo.

— Mi ĝojas ekscii tion, — diris Beregondo, — ĉar mi jam rajtas diri, ke fremdaj prononcoj ne malbeligas amikecajn parolojn, kaj hobitoj estas popolo amike parola. Sed venu! Vi konatigos al mi tiun bravan ĉevalon. Bestojn mi amas, kaj ni malofte vidas ilin en tiu ĉi

ŝtona urbo; sed miaj prapatroj devenis de la montaj valoj, kaj antaŭ tio de Itilio. Sed ne timu! La vizito estos mallonga, nura ĝentila saluto, kaj de tie ni iros al la provizejoj.

Grinĉjo trovis, ke Ombrofakso estis bone enstaligita kaj prizorgita. Ĉar en la sesa rondo estis kelkaj bonstataj staloj, kie estis lokitaj pluraj rapidaj ĉevaloj, proksime al la loĝejoj de la mesaĝistoj de la Mastro: kurieroj ĉiam pretaj ekiri pro urĝa ordono de Denetoro aŭ ties ĉefaj komandantoj. Sed nuntempe ĉiuj ĉevaloj kaj rajdistoj estis for.

Ombrofakso henis kaj turnis sian kapon, kiam Grinĉjo eniris la stalon.

— Bonan matenon! — diris Grinĉjo. — Gandolfo venos kiel eble plej baldaŭ. Li estas okupata, sed li sendas saluton, kaj mia tasko estas certigi, ke ĉio estas en ordo ĉe vi; dum vi ripozas, espereble, post viaj longaj laboroj.

Ombrofakso skuis sian kapon kaj stamfis. Sed ĝi permesis, ke Beregondo karesu ĝian kapon milde kaj karesu ĝiajn flankegojn.

— Ĝi aspektas, kvazaŭ ĝi avidus vetkuron kaj ne nove venintus post longa vojaĝo, — diris Beregondo. — Kiom ĝi estas forta kaj fiera! Kie estas ĝia jungaĵo? Ĝi devus esti riĉa kaj belega.

— Neniu estas por ĝi sufiĉe riĉa aŭ belega, — diris Grinĉjo. — Ĝi volas neniom. Se ĝi konsentas porti vin, ĝi tion faras; kaj se ne, nu, neniun buŝfero, brido, vipo aŭ ligaĵo malsovaĝigos ĝin. Adiaŭ, Ombrofakso! Pacienca. Batalo venas.

Ombrofakso levis sian kapon kaj henis tiel, ke la staloj skuiĝis, kaj ili kovris siajn orelojn. Poste ili adiaŭis, certiĝinte, ke la manĝujo estis kontentige plenigita.

— Kaj nun al nia manĝujo, — diris Beregondo, kaj li gvidis Grinĉjon ree al la citadelo, kaj al pordo en la norda flanko de la turego. Tie ili malsupreniris laŭ longa malvarmeta ŝtuparo en larĝan aleon lamplumigitan. En la flankaj muroj estis giĉetoj, el kiuj unu estis malfermita.

— Tio ĉi estas la varejo kaj provizejo de mia gardista trupo, — diris Beregondo. — Saluton, Targono! — li vokis tra la giĉeto. — Estas ankorau frue, sed jen estas nova veninto, kiun la Mastro akceptis en sian servistaron. Li rajdis longe kaj granddistance kun strikta zono, kaj li forte laboris ĉi-matene kaj li malsatas. Donu, kion vi havas.

Ili ricevis panon, kaj buteron, kaj fromaĝon, kaj pomojn: tiuj lastaj

estis el fino de l' vintra provizo, sulketaj sed bonstataj kaj dolĉaj; kaj ledan ujon da freŝe verŝita biero, kaj lignajn telerojn kaj tasojn. Ĉion ili enigis en vimenan korbon kaj regrimis al la sunlumo; kaj Beregondo kondukis Grinĉjon al loko ĉe la orienta ekstremo de l' granda elpuŝita remparo, kie troviĝis embrazuro en la muro kun ŝtona sidloko sub la sojlo. De tie ili povis elrigardi al la mateno super la mondo.

Ili manĝis kaj trinkis; kaj ili parolis jen pri Gondoro kaj ties moroj kaj kutimoj, jen pri la Provinco kaj la strangaj landoj, vizititaj de Grinĉjo. Kaj ĉiam dum la interparolo Beregondo pli kaj pli miris kaj rigardis kun granda surprizo al la hobito, svinganta siajn mallongajn krurojn, dum li sidis surseĝe, aŭ stariĝis piedpinte por gapi trans la sojlon al la terenoj sube.

— Mi ne volas kaŝi antaŭ vi, mastro Peregrino, — diris Beregondo, — ke al ni vi aspektas preskaŭ kiel unu el niaj infanoj, knabo proksimume naŭsomera; kaj tamen vi spertis danĝerojn kaj vidis mirindaĵojn, kiajn povus prifanfaroni malmultaj el niaj grizbarbuloj. Mi pensis, ke estis kaprico de nia Mastro havigi al si noblan paĝion, laŭ kutimoj de la prareĝoj, oni diras. Sed mi konstatas, ke ne estas tiel, kaj vi devas pardoni mian stultecon.

— Mi pardonas, — diris Grinĉjo. — Kvankam vi ne tre eraras. Mi estas ankoraŭ ne multe pli ol knabo laŭ la kalkulado en mia propra popolo, kaj pasos pluaj kvar jaroj ĝis mi “maturiĝos”, kiel ni diras en la Provinco. Sed ne ĝenu vin pri mi. Venu rigardi kaj diru al mi, kion mi vidas.

La suno jam altiĝadis, kaj la nebuleto en la suba valo disiĝis. Ties restaĵo estis forflosanta, tutsupre, kiel eroj da blanka nuboj portitaj per la fortiĝanta venteto el la oriento, kiu nun klakigis kaj ektiris la flagojn kaj blankajn standardojn de la citadelo. Forfore sur la vala fundo, je ĉirkaŭ kvin leŭgoj laŭ la okultrafo, la Granda Rivero jam vidiĝis griza kaj ekbrila, venante el la nord-okcidento kaj kurbiĝante laŭ impona etendiĝo suden kaj denove okcidenten, ĝis ĝi nevidebliĝis en nebuleto kaj trembrilo, post kiu kuŝis la maro kvindek leŭgojn for.

Grinĉjo povis vidi la tutan Pelenoron elmetitan antaŭ li, trapunktita en la malproksimon per farmbienoj kun etaj muroj, grenejoj kaj bovostaloj, sed nenie li vidis bovinojn aŭ aliajn bestojn. Multaj vojoj kaj padoj transiris la verdajn kampojn, kaj okazis multe da moviĝado: furgonoj irantaj vice al la Granda Pordego, kaj aliaj elirantaj. De tempo al tempo venis rajdisto, salte elseliĝis kaj rapidis en la urbon. Sed la

plimulta trafiko foriris laŭ la ĉefŝoseo, kaj tiu turniĝis suden, kaj kurbigante poste pli akute ol la Rivero ĉirkaŭiris la montetojn kaj baldaŭ forpasis el la vidkampo. Ĝi estis larĝa kaj bone pavimita, kaj laŭ ĝia orienta flanko iris larĝa verda rajdvojo, kaj post ĝi estis muro. Sur la rajdvojo galopis tien-reen rajdistoj, sed la tuta ŝoseo ŝajnis ŝtopita per grandaj furgonoj irantaj suden. Sed baldaŭ Grinĉjo konstatis, ke ĉio estas fakte bonorda: la furgonoj moviĝis en tri spaliroj, unu pli rapida ĉevaltrenite; alia malpli rapida, grandaj furgonoj kun belaj flankoj multkoloraj, virbovtrenite; kaj laŭ la okcidenta vojflanko multaj ĉaroj malpli grandaj, kiujn trenis plandantaj homoj.

— Tio estas la vojo al la valoj Tumladeno kaj Losarnaĥo, kaj la montaj vilaĝoj, kaj poste al Lebenino, — diris Beregondo. — Jen foriras la lastaj furgonoj, kiuj forportas al rifuĝejo la maljunulojn, infanojn, kaj virinojn, kiuj devas akompani ilin. Ili ĉiuj devas foriri de la Pordego kaj la vojo devas esti libera je unu leŭgo antaŭ la tagmezo: tiel estis ordonite. Ĝi estas malĝojiga neceso. — Li suspiris. — Eble malmultaj el tiuj, kiuj nun disiĝas, ree renkontiĝos. Kaj ĉiam estis tro malmulte da infanoj en tiu ĉi urbo; sed nun estas neniuj, krom kelkaj junuloj, kiuj ne volas foriri, kaj eble trovos iun fareblan taskon: inter tiuj estas mia filo.

Ili silentiĝis por kelka tempo. Grinĉjo gapis maltrankvile orienten, kvazaŭ en ĉiu momento li eble vidus milojn da orkoj alverŝiĝantaj sur la kampoj.

— Kion mi vidas tie? — li demandis, indikante la mezon de l' granda Anduina kurbigo. — Ĉu alia urbo, aŭ kio ĝi estas?

— Iam ĝi estis urbo, — diris Beregondo, — la ĉefurbo de Gondoro, kies fortikaĵo estis tiu ĉi nure. Ĝi estas la ruinaĵo de Osgiliado ambaŭflanke de Anduino, kiun niaj malamikoj antaŭlonge kaptis kaj bruligis. Tamen ni regajnis ĝin dum la junaj tagoj de Denetoro: ne por loĝi tie, sed por teni kiel antaŭpostenon, kaj por rekonstrui la ponton por transpaso de niaj armitoj. Kaj poste venis la Kruelaj Rajdantoj el Minaso Morgul.

— Ĉu la Nigraj Rajdantoj? — diris Grinĉjo, malfermante siajn okulojn ĝis ili estis larĝaj kaj malhelaj pro malnova timo revekita.

— Jes, ili estis nigraj, — diris Beregondo, — kaj mi konstatas, ke vi konas ion pri ili, kvankam vi ne menciis ilin en viaj historioj.

— Mi scias pri ili, — diris Grinĉjo mallaŭte, — sed mi ne parolos nun pri ili, tiel proksime, tiel proksime...

Li eksilentis kaj levis siajn okulojn super la riveron, kaj ŝajnis al li,

ke li vidas nur vastan kaj minacan ombron. Eble tio estis montoj baŭmantaj lime de la vidpovo, ties akrangulaj randoj moligitaj de preskaŭ dudek leŭgoj da nebuleta aero; eble ĝi estis nura nubmuro, kaj post tio eĉ pli profunda morno. Sed ĝuste dum li rigardis ĝin, ŝajnis laŭ liaj okuloj, ke la morno kreskas kaj kuniĝas, tre malrapide, malrapide leviĝante por sufoki la regionojn de la sunlumo.

— Ĉu tiel proksime al Mordoro? — diris Beregondo kviete. — Jes, tie ĝi kuŝas. Ni malofte aludas ĝin; sed ni loĝas ĉiam en vido de tiu ombro: foje ĝi ŝajnas pli malforta kaj pli fora; foje pli proksima kaj pli malhela. Nun ĝi kreskas kaj malheliĝas; kaj tial kreskas ankaŭ niaj timo kaj maltrankvilo. Kaj la Kruelaj Rajdantoj antaŭ malpli ol unu jaro reakiris la transirejojn, kaj multaj el niaj plej valoraj viroj estis mortigitaj. Ĝuste Boromiro finfine repelis la malamikojn el tiu ĉi okcidenta bordo, kaj ni ankoraŭ okupas la pli proksiman duonon de Osgiliado. Provizore. Sed ni atendas novan atakon tie. Eble la ĉefatakon en la venonta milito.

— Kiam? — demandis Grinĉjo. — Ĉu vi povas konjekti? Ĉar mi vidis hieraŭ nokte la signalfajrojn kaj la mesaĝrajdistojn; kaj Gandalf diris, ke tio estas signo, ke la milito komenciĝis. Li ŝajnis krize hastema. Sed nun ĉio ŝajnas denove malrapidanta.

— Nur pro tio, ke ĉio estas jam preta, — diris Beregondo. — Temas nur pri la profunda enspiro antaŭ la plonĝo.

— Sed kial estis la signalfajroj flamigitaj hieraŭ nokte?

— Tro malfruas alvoki helpon, kiam oni estas jam sieĝata. Sed mi ne konas la planojn de la Mastro kaj ties komandantoj. Ili havas multajn metodojn havigi informojn. Kaj la Mastro Denetoro estas malsimila al aliuloj: li vidas malproksimen. Iuj diras, ke sidante sola en sia alta ĉambro en la Turego nokte kaj turnante tien-reen siajn pensojn, li kapablas iomete antaŭvidi la estontecon; kaj ke li kelkfoje elserĉas eĉ la pensojn de la Malamiko, luktante kontraŭ li. Kaj tiel estas, ke li maljunas, antaŭtempe kaduka. Sed kiel ajn, estro Faramiro estas ekstere, post la rivero pro iu danĝera komizio, kaj eble li sendis informojn.

» Sed se vi volas scii, kio laŭ mia opinio flamigis la signalfajrojn, tio estis la novaĵo, kiu alvenis hieraŭ vespere el Lebenino. Granda ŝiparo proksimiĝas al la elfluejoj de Anduino, navigata de la korsaroj el Umbaro en la sudo. Tiuj jam delonge ĉesis timi la potencon de Gondoro, kaj ili alianciĝis al la Malamiko, kaj nun plenumas pezan baton liakomisie. Ĉar tiu atako forlogos grandan parton de tiu helpe, kiun ni

supozis havi el Lebenino kaj Belfalaso, kie la homoj estas harditaj kaj multnombraj. Tiom pli iras niaj pensoj norden al Rohano; kaj des pli feliĉigas nin tiuj novaĵoj pri venko, kiujn vi alportis.

» Kaj tamen, — li paŭzis, stariĝis kaj ĉirkaŭrigardis norden, orienten kaj suden, — la okazaĵoj ĉe Isengardo devus averti nin, ke ni estas implikitaj nun en grandaj reto kaj strategio. Ne plu estas kverelado ĉe la vadejoj, kaperado el Itilio kaj el Anorieno, embuskado kaj rabado. Tio ĉi estas granda milito longe planita, kaj ni estas nur unu peono en ĝi, kion ajn asertas la fiero. Io moviĝas en la fora oriento aliflanke de la Interna Maro, laŭ la raportoj; norde en Mornarbaro kaj post ĝi; kaj sude en Harado. Kaj nun ĉiuj regnoj estos submetitaj al provado, por stari aŭ fali — sub la Ombro.

» Tamen, mastro Peregrino, ni havas jenan honoron: ĉiam ni ricevas la ĉefan malamon de la Malhela Mastro, ĉar tiu malamo devenas el la profundoj de la tempo kaj trans la profundoj de la maro. Ĉi tie trafos plej forte la martelbato. Kaj pro tio Mitrandiro venis ĉi tien tiel haste. Ĉar se ni falos, kiu staros? Kaj, mastro Peregrino, ĉu vi vidas ian esperon, ke ni staros?

Grinĉjo ne respondis. Li rigardis la muregojn, la turojn kaj bravajn standardojn, kaj la sunon sur la alta ĉielo, kaj poste al la kreskanta malhelo en la oriento; kaj li pensis pri la longaj fingroj de tiu Ombro: pri la orkoj en la arbaroj kaj montaroj, perfidemo de Isengardo, birdoj misokulaj, Nigraj Rajdantoj eĉ en la vojetoj de la Provinco kaj pri la flugilhavaj teruraĵoj — la nazguloj. Li ekstre megis, kaj espero ŝajnis velki. Kaj precize tiam la suno momente hezitis kaj estis kaŝita, kva-zaŭ ĝin transpasus malhela flugilo. Preskaŭ preteraŭde li supozis, ke li konstatis, alte kaj fore en la ĉielo, krion mallaŭtan, sed korprenman, kruelan kaj malvarman. Li paliĝis kaj kaŭris kontraŭ la muro.

— Kio estis tio? — demandis Beregondo. — Ĉu ankaŭ vi sentis ion?

— Jes, — murmuris Grinĉjo. — Ĝi estas signo pri nia falo, kaj la ombro misfortuna, Kruela Rajdanto de l' aero.

— Jes, la ombro misfortuna, — diris Beregondo. — Mi timas, ke Minaso Tirit falos. Nokto venas. La varmo de mia sango mem ŝajnas forrabita.

Dum kelka tempo ili sidis kune kun la klinitaj kapoj kaj ne parolis. Subite Grinĉjo rigardis supren kaj vidis, ke la suno plu brilas kaj la standardoj plu flirtas en la venteto. Li skuis sin.

— Ĝi jam pasis, — li diris. — Ne, mia koro rifuzas nun malesperi. Gandolfo falis kaj revenis kaj estas kun ni. Ni eble staros, eĉ se nur per unu kruro, aŭ almenaŭ pluvivos surgenue.

— Prave dirite! — ekkriis Beregondo, leviĝante kaj paŝante tien-reen. — Ne, kvankam ĉio ekzistanta devas finfine tute ĉesi, Gondoro ankoraŭ ne pereos. Eĉ se la murojn kaptos senbrida malamiko, kiu konstruos monton da kadavroj antaŭ si. Troviĝas ankoraŭ aliaj fortikaĵoj kaj sekretaj eskapaj vojoj en la montaron. Espero kaj memoro vivos ankoraŭ en iu kaŝita valo, kie la herbo estas verda.

— Tamen mi preferus, ke ĝi estus finita, ĉu bone, ĉu mise, — diris Grinĉjo. — Mi tute ne estas batalisto kaj malŝatas eĉ pensi pri batalo; sed atendado rande de batalo, kiun mi ne povas eviti, estas plej malbona. Kiel longa ŝajnas jam ĉi tiu tago! Mi estus pli kontenta, se ni ne estus devigataj stari rigardante, neniel moviĝante, nenie batante la unuaj. Laŭ mia opinio, sen Gandolfo neniu bato estus farita en Rohano.

— Ha, tie vi tuŝas la vundon, kiun multaj sentas! — diris Beregondo. — Sed eble ŝanĝiĝos la cirkonstancoj, kiam revenos Faramiro. Li estas aŭdaca, pli aŭdaca, ol taksas multaj; ĉar en la nuna tempo la homoj malvolonte kredas, ke estro povas esti saĝa kaj klera pri la anuloj de tradicioj kaj kantoj, kiel li, kaj tamen hardita kaj rapide decidkapabla sur batalkampo. Sed tia estas Faramiro. Malpli impeta kaj senzorga ol Boromiro, sed ne malpli rezoluta. Tamen kion li povos fari? Ni ne povas alsturmi la montojn de... de tiu regno. Nia atingopovo mallongiĝis, kaj ni ne povas bati ĝis iu malamiko venas al ĝia etendiĝo. Tiam nia mano devas esti peza! — Li frapis la tenilon de sia glavo.

Grinĉjo rigardis lin: altan, fieran kaj noblan, kiel ĉiuj viroj, kiujn li ĝis nun vidis en tiu lando, kaj kun ekbrilo en l' okuloj li pensis pri la batalo. "Ve! mia propra mano sentiĝas plume malpeza, — li pensis, sed li diris nenion. — Ĉu peono, diris Gandolfo? Eble, sed sur la malĝusta ŝaktabulo".

Tiel ili interparolis, ĝis la suno atingis sian zeniton, kaj subite la tagmeza sonorado aŭdiĝis, kaj en la citadelo estis moviĝo, ĉar ĉiuj krom la sentineloj iris manĝi.

— Ĉu vi volas akompani min?— diris Beregondo. — Vi rajtas aliĝi al mia manĝorondo hodiaŭ. Mi ne scias, al kiu trupo vi estos nomita, aŭ la Mastro eble retenos vin sub la propra komando. Sed vi estos

bonvena. Kaj estos bone, ke vi konatiĝu kun laŭeble multaj homoj, dum ankoraŭ restas tempo.

— Mi venos tre volonte, — diris Grinĉjo. — Mi sentas min soleca, se diri la veron. Mi postlasis mian ĉefamikon en Rohano, kaj mankis al mi iu, kun kiu mi babilu aŭ spritu. Eble mi povus efektive aliĝi al via trupo, ĉu? Ĉu vi estas la trupestro? Se jes, vi povus akcepti min, aŭ subteni mian proponon, ĉu?

— Ne, ne, — Beregondo ridis, — mi neniel estas trupestro. Nek oficon, nek rangon, nek estrecon mi havas, ĉar mi estas nur ordinara soldato en la Tria Trupo de la Citadelo. Tamen, sinjoro Peregrino, esti nur ordinara soldato inter la gardistaro de l' Turego de Gondoro estas alte taksata en la urbo, kaj tiaj homoj estas honorataj en la lando.

— Tiuokaze ĝi estas ekster mia atingo, — diris Grinĉjo. — Rekonduku min al nia ĉambro, kaj se Gandolfo ne estos tie, mi iros kien ajn plaĉos al vi — kiel via gasto.

Gandolfo ne estis en la loĝejo kaj sendis neniun mesaĝon; do Grinĉjo akompanis Beregondon kaj estis prezentita al la viroj de la Tria Trupo. Kaj ŝajnis, ke Beregondo estis tiel honorata kiel lia gasto, ĉar Grinĉjo estis tre bonvena. Jam oni multe klaĉis en la citadelo pri la kunulo de Mitrandiro kaj ties longa kunestado kun la Mastro; kaj oni-diĝo deklaris, ke Princo de la duonuloj venis el la nordo por proponi al Gondoro lojalecon kaj kvin mil glavojn. Kelkaj diris, ke kiam venos la rajdistoj el Rohano, ĉiu el ili kunrajdigos duonulan bataliston, eble malgrandan, tamen bravan.

Kvankam Grinĉjo devis kun bedaŭro detrui tiun esperigan rakonton, li ne povis liberiĝi de sia nova rango, tre taŭga, la homoj pensis, por amiko de Boromiro kaj honorito de la Mastro Denetoro; kaj ili dankis lin pro tio, ke li venis inter ilin, kaj avide aŭskultis liajn dirojn kaj historiojn pri la eksterejoj, kaj donis al li tiom da manĝaĵo kaj biero, kiom li povis deziri. Efektive lia sola problemo estis "singardi" laŭ la konsilo de Gandolfo, kaj ne permesi al sia lango liberan moviĝadon laŭ kutimo de la hobitoj inter amikoj.

Finfine Beregondo stariĝis.

— Adiaŭ povizore! — li diris. — Mi nun deĵoros ĝis la sunsubiro, kiel ĉiuj aliaj ĉi tie, mi opinias. Sed se vi estas soleca, kiel vi diris, eble plaĉos al vi gaja gvidanto tra la urbo. Mia filo tre volonte akompanos vin. Brava knabo, mi rajtas diri. Se tion vi ŝatus, malsupreniru ĝis la

plej malalta rondo kaj demandu pri la Malnova Gastejo sur la Rat Celedrajno, la Lampfarista Strato. Tie vi trovos lin kun aliaj junuloj, kiuj restas en la urbo. Eble okazos vidindaĵoj ĉe la Granda Pordego antaŭ ol ĝi estos fermita.

Li eliris kaj baldaŭ sekvis lin la aliaj. La tago estis ankoraŭ bela, kvankam ĝi nebulletiĝis, kaj estis pli ol kutime varme en marto, eĉ tiom sude. Grinĉjo sentis sin dormema, sed la loĝejo ŝajnis sengaja, kaj li decidis malsupreniri kaj esplori la urbon. Li prenis kelkajn frandaĵojn, kiujn li konservis, al Ombrofakso, kaj tiuj estis ĝentile akceptitaj, kvankam verŝajne al la ĉevalo mankis nenio. Poste li pluiris suben laŭ multaj serpentumaj vojetoj.

La homoj multe gapis lin, kiam li preterpasis. Fronte al li la homoj seriozmiene ĝentilis, salutante lin laŭ la Gondora maniero per klinita kapo kaj manoj ĉebruste; sed post si li aŭdis multajn vokojn, kiam subĉieluloj avertis endomulojn, ke ili venu vidi la Princon de l' Duonuloj, la kunulon de Mitrandiro. Multaj uzis lingvon alian ol la Komunan, sed postnelonge li jam eksciis, kion signifas *Ernil i Pheriannath*, kaj konstatis, ke lia titolo penetris la urbon antaŭ li mem.

Li venis finfine per arkaĵaj stratoj kaj multaj belaj vojetoj kaj pavimoj al la rondo plej malalta kaj plej larĝa, kaj tie oni direktis lin al la Lampfarista Strato, larĝa vojo direkte al la Granda Pordego. Sur ĝi li trovis la malnovan gastejon, grandan konstruaĵon el griza veterumita ŝtono kun du aloj retroetendiĝantaj de la strato, kaj inter ili mallarĝan razenon, post kiu estis la multfenestra domo, kies tutan larĝon frontis pilastrita portiko kaj ŝtupoj al la razeno. Inter la pilastroj ludis knaboj, la nuraj infanoj viditaj de Grinĉjo en Minaso Tirit, kaj li haltis por rigardi ilin. Baldaŭ unu el ili ekvidis lin kaj kun krio transsaltis la herbon kaj venis sur la straton, sekvate de pluraj aliaj. Tie li staris antaŭ Grinĉjo, rigardante lin de l' kapo ĝis la piedoj.

— Saluton, — diris la junulo. — De kie vi venis? Vi estas fremdulo en la urbo.

— Tia mi estis, — diris Grinĉjo, — sed oni diras, ke mi fariĝis viro de Gondoro.

— Ne diru! — diris la knabo. — Tiuokaze ni ĉiuj ĉi tie estas viroj. Sed kiom vi aĝas, kaj kiel vi nomiĝas? Mi estas jam dekjara, kaj baldaŭ altos kvin futojn. Mi pli altas ol vi. Sed mia patro, vidu, estas gardisto, unu el la plej altstaturaj. Kio estas via patro?

— Kiun demandon mi respondu unue? Mia patro kulturis la teron ĉirkaŭ Vitvelo proksime al Tjukboro en la Provinco. Mi aĝas

preskaŭ dudek naŭ jarojn, do tiurilate mi superas vin; tamen mi altas nur kvar futojn, kaj tre verŝajne mi ne plu kreskos, krom flanken.

— Ĉu dudek naŭ! — kriis la knabo kaj fajfis. — Vidu, vi estas sufiĉe maljuna! Tiom maljuna, kiom mia onklo Iorlaso. Tamen, — li aldonis espereme, — mi vetas, ke mi povus starigi vin kaposuben aŭ kuŝigi vin surdorsen.

— Eble vi povus, se mi permesus al vi, — diris Grinĉjo ridante. — Kaj eble mi povus fari same al vi: mi konas kelkajn luktolertojn de mia landeto. Kie, mi sciigu al vi, oni taksas min nekutime granda kaj forta; kaj mi neniam permesis, ke iu ajn starigu min kaposuben. Do se okazus provo, kaj nenio alia utilus, mi eble estus devigita vin mortigi. Ĉar kiam vi estos pli aĝa, vi lernos, ke la homoj ne estas ĉiam tiaj, kiaj ili ŝajnas; kaj kvankam vi eble taksis min malforta fremduleto kaj facila predo, permesu averti vin: tia mi ne estas, mi estas duonulo hardita, kuraĝa kaj malica! — Grinĉjo tiel minace grimacis, ke la knabo retropaŝis unu paŝon, sed tuj li revenis kun pugnigitaj manoj kaj batalardo en la okuloj.

— Ne! — Grinĉjo ridis. — Ankaŭ ne kredu tion, kion fremduloj diras pri si! Batalisto mi ne estas. Sed ĉiuokaze estus pli ĝentile, ke la provokanto diru, kiu li estas.

La knabo rektigis sin fiere:

— Mi estas Bergilo, filo de Beregondo de la gardistaro.

— Tion mi supozis, — diris Grinĉjo, — ĉar vi aspekte similas vian patron. Lin mi konas, kaj li sendis min por vin trovi.

— Do kial vi ne diris tion senprokraste? — diris Bergilo, kaj subite lia mieno esprimis maltrankvilon. — Ne diru al mi, ke li ŝanĝis sian intencon kaj min forsendos kun la junulinoj! Sed ne, la lastaj furgonoj jam foriris.

— Lia mesaĝo estas malpli malagrabra ol tio, se ne tute agraba, — diris Grinĉjo. — Li diris, ke se vi preferus fari tion ol starigi min kaposuben, vi eble gvidus min tra la urbo dum kelka tempo. Reciproke mi povus iom rakonti al vi pri foraj landoj.

Bergilo manklakis kaj ridis malŝarĝite.

— Ĉio en ordo, — li kriis. — Do venu! Ni estis baldaŭ ironataj al la Pordo por spekti. Ni iros jam nun.

— Kio okazos tie?

— La trupestrojn de la eksterejoj oni atendas sur la Suda Vojo antaŭ la sunsubiro. Venu kun ni, kaj vi vidos.

Bergilo pruviĝis bona kamarado, la plej agrabla societo por Grinĉjo de kiam li disiĝis de Gaja, kaj baldaŭ ili ridis kaj interparolis gaje dum ili trairis la stratojn, senzorgaj pri la multaj rigardoj direktitaj de la homoj al ili. Postnelonge ili trovis sin en homamaso iranta al la Granda Pordego. Tie Grinĉjon multe pli estimis Bergilo, ĉar kiam li diris sian nomon kaj la pasvorton, la gardisto salutis lin kaj lasis lin trapasi; kaj krom tio permesis, ke lin akompanu lia kunulo.

— Tre bone! — diris Bergilo. — Al ni knaboj ne plu estas permesate trapasi la Pordegon sen plenaĝulo. Jam ni vidos pli bone.

Post la Pordego troviĝis homamaso laŭlonge de la vojflanko kaj de la granda pavimita spaco, al kiu direktiĝis ĉiuj vojoj al Minaso Tirit. Ĉies okuloj estis turnitaj suden, kaj baldaŭ leviĝis murmurado: “Jen polvo en la foro! Ili venas!”

Grinĉjo kaj Bergilo iom post iom progresis ĝis la antaŭo de la homamaso, kaj atendis. Kornoj aŭdiĝis iom malproksime, kaj la bruo de huraoj ruliĝis al ili kvazaŭ plifortiĝanta vento. Poste okazis laŭta trumpetado, kaj ĉie ĉirkaŭ ili la homoj kriadis.

— Forlongo! Forlongo!

— Kion oni diras? — demandis Grinĉjo aŭdinte la homojn voki.

— Forlongo venis, — Bergilo respondis, — maljuna Forlongo la Grasa, la Estro de Losarnaĥo. Tie loĝas mia avo. Hura! Jen li. Brave Forlongo!

Fronte de la spaliro promenis granda dikmembra ĉevalo, sur kiu sidis viro larĝaŝultra kaj ĉirkaŭmezure grandega, sed maljuna kaj grizbarba, tamen kirasita kaj nigrakaska kaj portanta longan pezan lancon. Malantaŭ li fiere marŝis polvokovrita spaliro da bone armitaj viroj, portantaj grandajn batalhakilojn; minacvizaĝaj ili estis, malpli altaj kaj iomete pli brunhaŭtaj ol la homoj, kiujn Grinĉjo ĝis tiam vidis en Gondoro.

— Forlongo! — la homoj kriis. — Verkora, vera amiko! Forlongo! — Sed kiam la viroj el Losarnaĥo jam pasis, ili murmuris: — Tiom malmultaj! Ducent, kiom valoras? Ni esperis pri dekoble tiom. Tio supozeble estas la novaĵo de la nigra ŝiparo. Ili disponigas nur deknonon de sia nombro. Tamen ĉiu ereto estas gajno.

Kaj tiel venis la trupoj kaj estis salutataj kaj huraumataj kaj trapasis la Pordegon, homoj de l' eksterejoj marŝantaj por defendi la ĉefurbon de Gondoro en malluma horo; sed ĉiam tro malmultaj, ĉiam malpli ol espero atendis aŭ neceso postulis. Tricento da viroj el Valo

Ringlo malantaŭ la filo de sia estro Dervorino marŝanta piede. El la altejoj de Morthondo, la granda Nigraradika Valo, alta Duinhiro kun siaj filoj Duilino kaj Derufino kaj kvincent pafarkistoj. El Enfalaso, la fora Longstrando, longa spaliro da viroj multspecaj, ĉasistoj kaj paŝtistoj kaj vilaĝanoj, malabunde ekipitaj krom la domanaro de ilia estro Golasgilo. El Lamedono, kelkaj severaj montaranoj sen koman-danto. Fiŝkaptistoj de Etiro, cento aŭ pli liberigitaj de la ŝipoj. Hir-luino la Bela de la Verdaj Montoj el Pinato Gelin kun tri centoj da bravaj verdevestitaj viroj. Kaj laste kaj plej fiere, Imrahilo, princo de Dol Amroto, parenco de Denetoro, kun orumitaj standardoj surhavantaj lian markon de la Ŝipo kaj la Arĝenta Cigno, kaj trupo de kavaliroj en plena kirasaĵo rajdantaj grizajn ĉevalojn; kaj malantaŭ ili sepcent armitoj, altaj kiel princoj, grizokulaj, malhelharaj, kiuj kantis ven-ante.

Kaj jen ĉio, malpli ol tri mil sume. Venos neniom pli. Iliaj krioj kaj la batado de iliaj piedoj pasis en la urbon kaj forvelkis. La spektintoj staris kelkan tempon silentaj. Polvo ŝvebis en la aero, ĉar la vento formortis kaj la vespero estis pezaera. Jam proksimiĝis la fermohoro, kaj la ruĝa suno jam estis malantaŭ Mindoluino. Ombreco ekkovris la urbon.

Grinĉjo suprenrigardis, kaj ŝajnis al li, ke la ĉielo iĝis cindrogriza, kvazaŭ vasta polvaĵo kaj fumo pendus super ili, kaj la lumo nur sordin-ite trapasis tion. Sed okcidente la mortanta suno ekflamigis la tutan fumaĵon, kaj nun Mindoluino staris nigra antaŭ brula ardo trastrekita je cindraĵo.

— Tiel finiĝas bela tago per kolero! — Grinĉjo diris, forgesinte pri la knabo ĉe sia flanko.

— Tiel ja estos, se ni ne reiros antaŭ la sunsubira sonorado, — diris Bergilo. — Ek! Jam sonas la trumpeto por fermi la Pordegon.

Manenmane ili reiris la urbon, la lastaj trapasintoj antaŭ ol estis fermita la Pordego; kaj kiam ili atingis la Lampfaristan Straton, ĉiuj sonoriloj en la turoj sonoris solene. Lumoj ekaperis en multaj fenest-roj, kaj el la domoj kaj gardejoj de la armitoj laŭlonge de la muroj aŭdiĝis kantado.

— Ĝis revido provizore, — diris Bergilo. — Salutu mianome mian patron, kaj danku lin pro la societo, kiun li sendis. Revenu baldaŭ, mi petegas. Preskaŭ mi nun volas, ke milito ne estu, ĉar ni eble dividus multe da plezuro. Ni eble vojaĝus al Losarnaĥo, al la domo de mia

avo; estas agrable tie en printempo, la arbaroj kaj kampoj plenas je floroj. Sed eble ni iros kune tien en iamo. Ili neniam venkos nian Mastron, kaj mia patro estas tre kuraĝa. Ĝis revido kaj revenu!

Ili disiĝis, kaj Grinĉjo rapidis reen al la citadelo. La vojo ŝajnis longa, kaj li tre varmiĝis kaj malsatiĝis; kaj la nokto inundis rapida kaj malluma. Neniu stelo trapikis la ĉielon. Li malfruis al vespermanĝo en la manĝejo, kaj Beregondo salutis lin ĝoje, kaj sidigis lin apude por aŭdi novaĵon pri sia filo. Post la vespermanĝo Grinĉjo iom restadis, kaj poste adiaŭis, ĉar lin okupis stranga morneco, kaj li jam tre deziris revidi Gandalfon.

— Ĉu vi trovos la vojon? — diris Beregondo ĉe la pordo de la haleto, nordflanke de la citadelo, en kiu ili sidis. — Nigras la nokto, kaj ĉiam pli nigre, de kiam venis la ordono, ke la lumoj estu malfortigitaj en la urbo, kaj neniu disradiu de la muroj. Kaj mi povas sciigi vin pri alia ordono: oni alvokos vin al la Mastro Denetoro frue morgaŭ. Mi timas, ke vi ne estas destinita por la Tria Trupo. Tamen mi rajtas esperi pri rerenkontiĝo. Ĝis la, kaj dormu pace!

La loĝejo estis senluma, krom lampeto starigita sur la tablo. Gandolfo ne estis tie. Melankolio pli profunde okupis Grinĉjon. Li grimpis sur la benkon kaj provis elrigardi tra fenestro, sed tio estis kvazaŭ enrigardi lageton da inko. Li degrimpis, fermis la fenestrovilon kaj enlitiĝis. Dum kelka tempo li kuŝis atendante sonojn de reveno de Gandolfo, kaj poste li maltrankvile ekdormis.

Nokte lin vekis iu lumo, kaj li vidis, ke Gandolfo venis kaj paŝadas tien-reen en la ĉambro malantaŭ la alkova kurteno. Sur la tablo estis kandeloj kaj pergamenaj rulaĵoj. Li aŭdis la sorĉiston suspiri kaj murmuri:

— Kiam revenos Faramiro?

— Saluton! — diris Grinĉjo, elŝovante sian kapon ĉirkaŭ la kurtenon. — Mi pensis, ke vi tute forgesis pri mi. Mi ĝojas vidi vin reveninta. La tago estis longa.

— Sed la nokto estos tro mallonga, — diris Gandolfo. — Mi revenis ĉi tien, ĉar mi urĝe bezonas iom da trankvilo en soleco. Vi devus dormi en lito, dum tio ankoraŭ eblas. Je sunleviĝo mi kondukos vin denove al la Mastro Denetoro. Ne, kiam venos la alvoko, ne je sunleviĝo. La malhelo komenciĝis. Aŭroro ne estos.

Ĉapitro 2

LA FORPASO DE LA GRIZA TRUPO

Gandolfo jam foriris, kaj la batantaj hufoj de Ombrofakso perdiĝis. En la nokto, kiam Gaja revenis al Aragorno. Li portis nur malpezan pakon, ĉar sian tornistran li perdis ĉe Part Galeno, kaj lia tuta havaĵo estis kelkaj utilaĵoj, kiujn li prenis en la ruinaĵo de Isengardo. Hasufelo estis jam selita. Legolaso kaj Gimlio kun sia ĉevalo staris proksime.

— Do restas ankoraŭ kvar el la Kunularo, — diris Aragorno. — Ni plu rajdos kune. Sed ni ne iros solaj, kiel mi supozis. La reĝo jam firme decidis tuj ekiri. Post la veno de l' flugilhava ombro li deziras reiri al la montetoj kaŝite de la nokto.

— Kaj poste kien? — diris Legolaso.

— Mi ankoraŭ ne scias, — Aragorno respondis. — koncerne la reĝon, li iros al la armea apelo, kiun li ordonis en Edoraso, kvar noktojn de nun. Kaj tie, mi pensas, li aŭdos novaĵon pri milito, kaj la rajdistoj de Rohano iros al Minaso Tirit. Krom mi kaj tiuj, kiuj akompanos min.

— Inter ili mi! — kriis Legolaso.

— Kaj kun li Gimlio! — diris la gnomo.

— Nu, koncerne min, — diris Aragorno, — antaŭ mi estas mal-lume. Ankaŭ mi devos iri al Minaso Tirit, tamen mi ne vidas ankoraŭ la vojon. Horo delonge preparita proksimiĝas.

— Ne lasu min malantaŭe! — diris Gaja. — Mi ĝis nun ne multe utilis; sed mi ne volas flankenmetiĝi, kvazaŭ pakaĵo reprenota, kiam ĉio estos finita. Al mi ŝajnas, ke la rajdistoj jam ne deziras ĝeniĝi pri mi. Kvankam, kompreneble, la reĝo ja diris, ke mi sidiĝu apud li, kiam li alvenos sian domon kaj rakontadu al li pri la Provinco.

— Jes, — diris Aragorno, — kaj mi opinias, ke via vojo troviĝas kun li, Gaja. Sed ne atendu gajecon en la fino. Estos tre longe, mi timas, antaŭ ol Teodeno denove sidos komforte en Meduseldo. Multaj esperoĵ velkos en tiu ĉi amara printempo.

Baldaŭ ĉiuj estis pretaj foriri: dudek kvar ĉevaloj, kun Gimlio post Legolaso, kaj Gaja antaŭ Aragorno. Postnelonge ili rajdis rapidege tra la nokto. Ili ne longe pasis la teramasojn ĉe la Travadejoj de Iseno, kiam rajdisto algalopis de la malantaŭo de la spaliro.

— Mia mastro, — li diris al la reĝo, — malantaŭ ni estas rajdistoj. Trairante la travadejojn mi pensis aŭdi ilin. Nun ni estas certaj. Ili ekatingas nin, rajdante senindulge.

Teodeno tuj ordonis halti. La rajdistoj turnis sin kaj kaptis siajn lancojn. Aragorno elseliĝis kaj metis Gajan sur la teron, kaj elingiginte sian glavon stariĝis apud la piedingo de l' reĝo. Eomero kaj ties eskviro rajdis al la malantaŭo. Gaja pli ol antaŭe sentis sin nebezonata pakaĵo, kaj li scivolis, kion li faru, se okazos batalo. Se la malmulta reĝa sekvantaro estus embuskita kaj venkita, kaj nur li eskapus en la mallumon, sola en la sovaĝaj kampoj de Rohano, sen koncepto pri kie li estus en la tuta senlimaĵo? "Ne taŭgas!" — li pensis. Li elingigis sian glavon kaj striktigis sian zonon.

La subirantan lunon kovris granda velanta nuboj, sed subite ĝi senkovriĝis denove. Tiam ĉiuj aŭdis bruon de hufoj, kaj sammomente ili vidis malhelajn figurojn rapide venantajn sur la pado de l' travadejoj. La lunlumo ekbrilis ie-tie sur la pintoj de lancoj. La nombro da persekutantoj ne estis kalkulebla, sed tiuj ŝajnis ne malpli ol la reĝa eskortantaro, minimume.

Kiam ili malproksimis ĉirkaŭ kvindek paŝojn, Eomero kriis laŭtvoĉe:

— Haltu! Haltu! Kiu rajdas en Rohano?

La persekutantoj abrupte haltigis siajn ĉevalojn. Sekvis silento; kaj poste en la lunlumo oni vidis rajdiston elseliĝi kaj marŝi malrapide antaŭen. Lia mano vidiĝis blanka, kiam li levis ĝin polmantaŭe, en signo de paco; sed la soldatoj de la reĝo kroĉis siajn armilojn. Dek paŝojn for la homo haltis. Li estis altstatura, staranta ombro malhela. Poste sonis sonore lia klara voĉo.

— Ĉu Rohano? Ĉu Rohanon vi diris? Tio estas vorto ĝojiga. Ni serĉas haste tiun landon de malproksime.

— Vi trovis ĝin, — diris Eomero. — Transirinte tiujn travadejojn vi eniris ĝin. Sed ĝi estas regno de la reĝo Teodeno. Neniu rajdas ĉi tie sen lia permeso. Kiu vi estas? Kaj pro kio via hasto?

— Dunadano Halberado, disirulo de l' nordo mi estas, — kriis la homo. — Ni serĉas Aragornon, filon de Aratorno, kaj ni aŭdis, ke li estas en Rohano.

— Kaj ankaŭ lin vi trovis! — kriis Aragorno. Transdoninte sian kondukrimenon al Gaja, li kuris antaŭen kaj brakumis la ĵusveninton. — Halberado! El ĉiuj ĝojoj, tiu ĉi estas plej neatendita!

Gaja suspiris malstreĉiĝe. Li ja pensis, ke jen iu lasta trompo de Sarumano, embuski la reĝon, dum tiu havis nur malmultajn homojn; sed ŝajnis, ke ne neceso morti defendante Teodenon, almenaŭ ne tuj. Li eningigis sian glavon.

— Ĉio en ordo, — diris Aragorno, returnante sin. — Jen kelkaj el miaj parencoj el la fora lando, kie mi loĝis. Sed kial ili venis, kaj kiom ili estas, Halberado sciigos al ni.

— Kun mi estas trideko, — diris Halberado. — Tio estas ĉiuj niaj parencoj, kiujn oni povis rapide kunigi; sed la fratoj Eladano kaj Elrohiro rajdis kun ni, dezirante militiri. Ni rajdis laŭeble plej haste, kiam venis via alvoko.

— Sed mi ne alvokis vin, — diris Aragorno, — krom nur en la menso. Miaj pensoj ofte turniĝis al vi, kaj malofte pli ol hodiaŭ vespere; tamen neniun vorton mi sendis. Sed venu! Ĉiuj aferoj tiaj devas prokrastiĝi. Vi trovas nin rajdantaj en hasto kaj danĝero. Rajdu nun kun ni, se la reĝo donos permeson.

Teodeno efektive ĝojis pri la novaĵo.

— Estas bone! — li diris. — Se jenaj parencoj entute similas vin, princo Aragorno, tridek tiaj kavaliroj estos forto ne kalkulebla laŭ la kapoj.

Poste la rajdistoj ekiris denove, kaj Aragorno dum kelka tempo rajdis kun la dunadanoj; kaj post kiam ili priparolis novaĵojn en la nordo kaj en la sudo, Elrohiro diris al li:

— Mi kunportis al vi diraĵon de mia patro: *La tagoj mallongas. Se vi hastas, memoru la Padojn de l' Mortintoj.*

— Ĉiam miaj tagoj ŝajnis al mi tro mallongaj por plenumi mian deziron, — respondis Aragorno. — Sed efektive rapida estos mia hasto, antaŭ ol mi tiun vojon iros.

— Tio baldaŭ vidiĝos, — diris Elrohiro. — Sed ni ne plu priparolu tiajn aferojn sur la senŝirma vojo!

Kaj Aragorno diris al Halberado:

— Kion vi portas, parenco? — Ĉar li vidis, ke tiu portas anstataŭ lancŝan altan bastonon, kvazaŭ ĝi estus standardo, sed ĝi estis strikte volvita en nigra tuko ĉirkaŭligita per multaj ŝnuretoj.

— Ĝi estas donaco, kiun mi portas al vi de la Damo de Rivendelo,

— respondis Halberado. — *Ŝi verkis ĝin sekrete, kaj longa estis la farado. Sed ŝi sendas ankaŭ mesaĝon al vi: Jam mallongas la tagoj. Venas aŭ nia espero, aŭ la fino de ĉia espero. Tial mi sendas al vi tion, kion mi faris por vi. Fartu bone, Elfŝtono!*

Kaj Aragorno diris:

— Jam mi scias, kion vi portas. Portu ĝin plu por mi dum kelka tempo! — Kaj li forturnis sin kaj foren rigardis al la nordo sub la grandaj steloj, kaj poste li silentiĝis kaj ne plu parolis dum la tuta nokta vojaĝo.

La nokto estis malnova kaj grizis la oriento, kiam ili finfine rajdis supren el la Profunda Kavaĵo kaj revenis al Kornburgo por kuŝi, iomete ripozi kaj interkonsiliĝi.

Gaja dormis ĝis lin vekis Legolaso kaj Gimlio.

— La suno estas alta, — diris Legolaso. — Ĉiuj aliaj jam aktivas. Venu, sinjoro Pigrulo, rigardi ĉi tiun lokon dum tio eblas!

— Ĉi tie estis batalo antaŭ tri noktoj, — diris Gimlio, — kaj ĉi tie Legolaso kaj mi ludis ludon, en kiu mi gajnis per ununura orko. Venu vidi, kiel estis! Kaj estas kavernoj, Gaja, kavernoj da mirindaĵoj! Ĉu ni vizitos ilin, Legolaso, laŭ via supozo?

— Ne! Mankas tempo, — diris la elfo. — Ne fuŝu la miron pro rapideemo! Mi promesis al vi, ke mi revenos ĉi tien kun vi, se revenos tago de paco kaj libereco. Sed nun proksimas al la tagmezo, kaj tiuhore ni manĝos, kaj poste ekvojaĝos denove, mi aŭdis.

Gaja stariĝis kaj oscedis. Lia kelkhora dormo tute ne sufiĉis; li estis laca kaj iom deprimita. Mankis al li Grinĉjo, kaj li sentis sin nura ŝarĝo, dum ĉiuj planadis por rapideco en afero, kiun li ne plene komprenis.

— Kie estas Aragorno? — li demandis.

— En la alta ĉambro de la Burgo, — diris Legolaso. — Li nek ripozis, nek dormis, laŭ mia opinio. Li iris tien antaŭ kelkaj horoj, dirante ke li devas iom mediti, kaj nur lia parenco Halberado akompanis lin; sed ia malhela dubo aŭ zorgo okupas lin.

— Ili estas stranga trupo, tiuj novvenintoj, — diris Gimlio. — Fortuloj nobelaj ili estas, kaj la rajdistoj de Rohano apud ili aspektas preskaŭ knabecaj; ĉar ili estas vizaĝe severaj, plejparte glataj kiel veterumitaj rokoj, samkiel Aragorno mem; kaj ili silentas.

— Sed samkiel Aragorno ili estas ĝentilaj, se ili ĉesas silenti, — diris Legolaso. — Kaj ĉu vi notis la fratojn Eladano kaj Elrohiro?

Malpli sombra estas ilia ekipaĵo ol ĉe la aliaj, kaj ili estas belaj kaj bravaj kiel elfaj princoj; kaj tio ne estas miriga en la filoj de Elrondo de Rivendelo.

— Kial ili venis? Ĉu vi aŭdis? — demandis Gaja. Li estis jam vestita kaj surŝultrigis sian grizan mantelon; kaj la triopo kune eliris al la ruinigita pordo de la Burgo.

— Ili respondis alvokon, kiel vi aŭdis, — diris Gimlio. — Mesaĝo venis al Rivendelo, ili diras: *Aragorno bezonas siajn parencojn. La dunadanoj rajdu al li en Rohanon!* Sed de kie venis tiu mesaĝo ili nun pridubas. Gandolfo sendis ĝin, mi konjektas.

— Ne, Galadriela, — diris Legolaso. — Ĉu ŝi ne parolis per Gandolfo pri la rajdado de la griza trupo el la nordo?

— Jes, vi trafas, — diris Gimlio. — La Damo de l' Arbaro! Ŝi legis multajn korojn kaj dezirojn. Nu, kial ni ne vokis mense iujn el niaj propraj parencaĵoj, Legolaso?

Legolaso staris antaŭ la pordo kaj turnis siajn helajn okulojn for norden kaj orienten, kaj lia bela vizaĝo esprimis ĝenon.

— Ne ŝajnas al mi, ke iuj venus, — li respondis. — Ne necesas al ili alrajdi militon; milito jam marŝas en ilia propra tereno.

Dum kelka tempo la tri kunuloj promenis kune, parolante pri tiu kaj alia elturniĝo de la batalo, kaj ili malsupreniris de la rompita pordo, kaj preterpasis la teramasojn de la falintoj sur la verdejo apud la vojo, ĝis ili staris sur la Ŝtonmuro de Helmo kaj enrigardis la Kavaĵon. La Morta Monteto jam staris tie, nigra kaj alta kaj ŝtonoza, kaj la vasta piedpremado kaj grategado de la herbo far la huornoj estis klare videblaj. La dunlandanoj kaj multaj viroj el la garnizono de la Burgo prilaboris la Ŝtonmuron, sur la kampoj kaj ĉirkaŭ la frakasitaj muroj malantaŭe; tamen ĉio ŝajnis strange silenta: laca valo ripozanta post granda ŝtormo. Baldaŭ ili returniĝis kaj iris al la tagmeza manĝo en la halego de la Burgo.

La reĝo estis jam tie, kaj tuj kiam ili eniris li alvokis Gajan kaj ordonis, ke seĝo estu metita por li ĉe sia flanko.

— Ne estas tiel, kiel mi dezirus, — diris Teodeno, — ĉar tio ĉi mal multe similas mian belan domon en Edoraso. Kaj foriris via amiko, kiu ankaŭ devus esti ĉi tie. Sed eble estos longe, antaŭ ol ni sidos, vi kaj mi, ĉe la alta tablo en Meduseldo; mankos tempo por festado kiam mi revenos tien. Sed ek jam! Manĝu kaj trinku, kaj ni interparolu dum ni havas okazon. Kaj poste vi rajdos kun mi.

— Ĉu vere? — diris Gaja, surprizite kaj ĝojigite. — Tio estos belega! — Li neniam estis pli dankema pro vorta afableco. — Mi timas, ke mi estas nur obstaklo por ĉiuj, — li balbutis, — sed al mi plaĉus fari ion ajn, kion mi povas, sciui.

— Tion mi ne dubas, — diris la reĝo. — Mi ordonis pretigi por vi bravan montetponeon. Ĝi portos vin tiel rapide, kiel ĉevalo sur la vojoj, kiujn ni sekvos. Ĉar mi forrajdos de la Burgo laŭ montaj padoj, ne sur la ebenajo, kaj tiel venos al Edoraso tra Dunharo, kie atendas min Damo Eovina. Vi estos mia eskviro, se vi volas. Ĉu troviĝas en tiu ĉi loko armilaro, kiun povus uzi mia glavportulo, Eomero?

— Ne estas ĉi tie grandaj armilaj stokoj, reĝo, — respondis Eomero. — Eble troveblos por li malpeza kasko, kiu konvenos al li; sed ni ne havas maŝkirason nek glavon por iu liastatura.

— Glavon mi havas, — diris Gaja, degrimpante de sia seĝo kaj elingigante sian brilan klingeton el ties nigra ingo. Subite plenigite de amo al tiu ĉi maljunulo, li apogis sin sur unu genuo, kaptis lian manon kaj ĝin kisis. — Ĉu mi rajtas kuŝigi la glavon de Gajadoko de l' Provinco sur vian sinon, reĝo Teodeno? Akceptu mian servon, se vi volas!

— Ĝoje mi akceptas ĝin, — diris la reĝo, kaj metinte siajn longajn maljunajn manojn sur la harojn de la hobito, li benis lin. — Leviĝu nun, Gajadoko, eskviro de Rohano en la domanaro de Meduseldo! Prenu vian glavon kaj portu ĝin al bona sorto.

— Vi estos al mi kvazaŭ patro, — diris Gaja.

— Dum kelka tempo, — diris Teodeno.

Tiam ili interparolis dum la manĝado, ĝis baldaŭ parolis Eomero.

— Proksimiĝas la horo, kiun ni nomis por nia foriro, reĝo, — li diris. — Ĉu mi ordonu ke oni blovu la trumpetojn? Sed kie estas Aragorno? Lia loko malplenas, kaj li ja ne manĝis.

— Ni pretiĝos por rajdado, — diris Teodeno, — sed oni sendu informon al la princo Aragorno, ke la horo estas proksima.

La reĝo kun sia gardistaro kaj Gaja apude pasis suben de la burga pordo ĝis kie la rajdistoj kunvenis sur la razeno. Multaj estis jam surĉevalaj. Tio estis granda trupo, ĉar la reĝo postlasos nur malgrandan garnizonon en la Burgo, kaj ĉiuj allaseblaj rajdos al la apelo en Edoraso. Jam mil lancistoj forrajdis nokte; sed ankoraŭ estos ĉirkaŭ kvincent por akompani la reĝon, plejparte viroj el la kampoj kaj valoj de Ŭestfaldo. Iom aparte sidis la disiruloj, silentaj, en orda societo, arm-itaj je lancoj, pafarkoj kaj glavoj. Ili estis vestitaj en manteloj malhele

grizaj, kaj iliaj kapuĉoj estis nun kovrantaj la kaskon kaj kapon. Iliaj ĉevaloj estis fortaj kaj fieraj, sed malglatharaj; kaj unu staris sen rajdanto, la propra ĉevalo de Aragorno, kiun ili aligis el la nordo; Roherino estis ties nomo. Estis neniu ekbrilo de gemo aŭ oro, nek ornamaĵo sur ilia tuta armilaro kaj kirasaro, kiel la rajdistoj portis neniun insignon aŭ blazonon, krom nur ke ĉiu mantelo estis pinglita ĉe la maldekstra ŝultro per broĉo arĝenta en la formo de disradia stelo.

La reĝo suriĝis sian ĉevalon Neĝkolaĵo, kaj Gaja sidis apud li sur sia poneo, kiu nomiĝis Stibo. Baldaŭ Eomero elvenis tra la pordo, kaj kun li estis Aragorno kaj Halberado portanta la grandan bastonon nigre volvitan, kaj du altaj viroj, nek junaj nek maljunaj. La filoj de Elrondo tiom similis, ke malmultaj kapablis disdistingi ilin: malhelharaj, grizokulaj, kun vizaĝoj elfe palaj, vestitaj samece en hela maŝaĵo sur manteloj arĝentgrizaj. Malantaŭ ili marŝis Legolaso kaj Gimlio. Sed Gaja rigardis nur Aragornon, tiom konsterna estis la ŝanĝiĝo, kiun li vidis en tiu, kvazaŭ dum unu nokto multaj jaroj falus sur lian kapon. Severege estis lia vizaĝo, grizkolora kaj lacega.

— Mia menso estas zorgoplena, mastro, — li diris, starante apud la ĉevalo de l' reĝo. — Mi aŭdis strangajn vortojn, kaj mi vidas novajn danĝerojn en la foro. Mi longe peze pensadis, kaj nun mi timas, ke mi devas ŝanĝi mian celon. Diru, Teodeno, nun vi rajdos al Dunharo, kiom longe ĝis vi alvenos tien?

— Estas jam plena horo post la tagmezo, — diris Eomero. — Antaŭ la nokto de la tria tago ekde nun ni devos alveni la Fortikaĵon. La luno estos tiam unu nokton post la pleno, kaj la kunveno, kiun la reĝo ordonis, okazos en la posta tago. Pli rapide ni ne povos fari, se la forto de Rohano estu kunigita.

Aragorno silentis momente.

— Tri tagojn, — li murmuris, — kaj la kunveno de Rohano estos nur komencita. Sed mi konstatas, ke jam ne eblas tion hastigi. — Li rigardis supren, kaj ŝajne li ion pridecidis; lia vizaĝo estis malpli zorgoplena. — Do, kun via permeso, reĝo, mi devos sekvi novan konsilon por mi kaj mia parencaro. Ni devos rajdi laŭ propra vojo, kaj ne plu kaŝe. Por mi la tempo de sekreteco jam forpasis. Mi rajdos orienten laŭ la plej rapida vojo, kaj mi iros la Padojn de l' Mortintoj.

— Ĉu la Padojn de l' Mortintoj! — diris Teodeno kaj tremis.

— Kial vi parolas pri tiuj? — Eomero turnis sin kaj rigardadis Aragornon, kaj ŝajnis al Gaja, ke la vizaĝoj de la rajdistoj, kiuj sidis en aŭdodistanco, paliĝis.

— Se tiaj padoj veras, — diris Teodeno, — ties enirejo troviĝas en Dunharo; sed neniu vivanto rajtas trapasi ĝin.

— Ve! Aragorno, amiko mia! — diris Eomero. — Mi esperis, ke ni militiros kune; sed se vi celas la Padojn de l' Mortintoj, nia disiĝo sekve okazas, kaj tre neverŝajne estas, ke ni iam renkontiĝos denove sub la suno.

— Tamen tiun vojon mi iros, — diris Aragorno. — Sed mi diras al vi, Eomero, ke en batalo ni eble denove renkontiĝos, eĉ se ĉiuj amasoj de Mordoro staros inter ni.

— Vi faros laŭ via volo, mastro Aragorno, — diris Teodeno. — Estas via sorto, eble, paŝi strangajn vojojn, kiujn aliaj ne aŭdacas. Tiu ĉi disiĝo dolorigas min, kaj pro ĝi mia forto malpliĝas; sed nun mi devas iri laŭ la montetaj vojoj kaj ne plu prokrasti. Adiaŭ!

— Adiaŭ, mastro! — diris Aragorno. — Rajdu al granda famo! Adiaŭ, Gaja! Mi lasas vin en bonaj manoj, pli bonaj ol ni esperis, kiam ni ĉasis la orkojn al Fangorno. Legolaso kaj Gimlio plu ĉasos kun mi, mi esperas; sed ni ne forgesos vin.

— Adiaŭ! — diris Gaja. Nenion pli li trovis por diri. Li sentis sin tre malgranda, kaj lin embarasis kaj deprimis ĉiuj tiuj mornaj vortoj. Pli ol antaŭe mankis al li la neestingebla gajeco de Grinĉjo. La rajdistoj estis pretaj, kaj ties ĉevaloj nerveze movetiĝis; li volis, ke ili ekiru kaj metu punkton al la afero.

Nun Teodeno parolis al Eomero, kaj tiu levis sian manon kaj kriegis, kaj pro tiu signalo la rajdistoj ekiris. Ili rajdis trans la Ŝtonmuron kaj suben laŭ la Kavaĵo, kaj poste, turninte sin rapide orienten, ili sekvis padon, kiu laŭiris la montosubon tra proksimume unu mejlo, ĝis kurbiĝinte suden ĝi retropasis inter la montetoj kaj malaperis el la vidkampo. Aragorno rajdis ĝis la Ŝtonmuro kaj rigardis ĝis la reĝaj soldatoj tre foris sur la Kavaĵo. Tiam li turnis sin al Halberado.

— Jen iras tri, kiujn mi amas, kaj ne malplej la plej etan, — li diris. — Li ne scias, al kiu celo li rajdas; tamen se li tion scius, li same pluirus.

— Popolo malgranda, sed ege valora, estas la provincoj, — diris Halberado. — Malmulton ili scias pri nia longa laboro por gardi iliajn landlimojn, tamen tion mi ne domaĝas.

— Kaj nun niaj sortoj estas kunteksitaj, — diris Aragorno. — Tamen, ve! ĉi tie ni devas disiĝi. Nu, mi devas manĝi iomete, kaj poste ankaŭ ni devos forrapidi. Venu, Legolaso kaj Gimlio! Mi devas interparoli kun vi, dum mi manĝas.

Kune ili reiris al la Burgo; tamen dum kelka tempo Aragorno sidis silente ĉe la tablo en la halego, kaj la aliaj atendis lian ekparolon.

— Vidu, — diris Legolaso fine. — Parolu kaj konsoliĝu, kaj forskuu la ombron! Kio okazis, post kiam ni revenis al tiu ĉi malagrabla loko en la griza mateno?

— Lukto iom pli serioza miaopinie ol la batalo de Kornburgo, — respondis Aragorno. — Mi enrigardis la Ŝtonon de Ortanko, miaj amikoj.

— Ĉu vi enrigardis tiun malbenitan ŝtonon sorĉistan! — ekkriis Gimlio kun timo kaj surprizego survizaĝe. — Ĉu ion vi diris al... li? Eĉ Gandolfo timis tiun renkontiĝon.

— Vi forgesis, al kiu vi parolas, — diris Aragorno admone, kaj liaj okuloj ekbriletis. — Ĉu mi ne deklaris publike mian titolon antaŭ la pordego de Edoraso? Kion, laŭ via timo, mi dirus al li? Ne, Gimlio, — li diris per voĉo malpli laŭta, kaj la severo lasis lian vizaĝon, kaj li aspektis kiel iu, kiu penis dum multaj noktoj en sendorma doloro. — Ne, amikoj miaj, mi estas la laŭleĝa mastro de la Ŝtono, kaj mi havis tiel la rajton kiel la forton uzi ĝin, aŭ tiel mi juĝis. Pri la rajto ne povas esti dubo. La forto sufiĉis, sentroe.

Li enspiris profunde.

— Tio estis senkompata lukto, kaj la laco malrapide pasas. Neniun vorton mi diris al li, kaj en la fino mi ŝiris la Ŝtonon al mia propra volo. Eĉ tion solan li malfacile toleros. Kaj li ekvidis min. Jes, mastro Gimlio, li ekvidis min, sed en formo alia, ol vi vidas min ĉi tie. Se tio helpas lin, mi agis mise. Sed tion mi ne opinias. Scii, ke mi vivas kaj promenas sur la tero, estis bato al lia koro, laŭ mia takso, ĉar tion li ĝis nun ne sciis. La okuloj en Ortanko ne vidis min tra la armaĵo de Teodeno, sed Saŭrono ne forgesis Isilduron kaj la glavon de Elendilo. Nun en la horo mem de liaj grandaj projektoj la heredinto de Isilduro kaj la Glavo estas rivelitaj; ĉar mi montris al li la klingon reforĝitan. Li ankoraŭ ne tiom potencas, ke li ne spertas timon; ne, dubo ĉiam mordetas lin.

— Sed li vaste dominas, malgraŭ ĉio, — diris Gimlio, — kaj jam li frapos pli rapide.

— Hasta frapo ofte mistrafas, — diris Aragorno. — Ni devas premadi nian Malamikon, kaj ne plu atendi, ke li iniciatu la movon. Vidu, miaj amikoj, ekmastrinte la Ŝtonon mi lernis multajn aferojn. Gravan minacon mi vidis venanta tute neatendite al Gondoro el la sudo, kiu forlogos grandan forton de la defendado de Minas Tirit. Se

ĝi ne estos rapide kontraŭstarita, mi taksas, ke la urbo estos perdita antaŭ ol pasos dek tagoj.

— Do perdita ĝi devos esti, — diris Gimlio. — Ĉar kiun helpon oni povas sendi tien, kaj kiel ĝi povus alveni ĝustatempe?

— Mi ne havas helpon sendeblan, tial mi devos mem iri, — diris Aragorno. — Sed ekzistas nur unu vojo tra la montaro, kiu venigos min al la marborda regiono antaŭ ol perdiĝos ĉio. Tiu estas la Padoj de l' Mortintoj.

— La Padoj de l' Mortintoj! — diris Gimlio. — Tio estas nomo misfortuna, kaj ĝi malmulte plaĉas al la rohananoj, kiel mi rimarkis. Ĉu vivantoj povas uzi tiun vojon senpere? Kaj eĉ se vi pasos per tiu vojo, kiom valoros tiel malmultaj por kontraŭi la batojn de Mordoro?

— Vivantoj ne uzis tiun vojon depost la alveno de la rohananoj, — diris Aragorno, — ĉar ĝi estas fermita kontraŭ ili. Sed en tiu ĉi malluma horo la heredanto de Isilduro rajtas uzi ĝin, se li aŭdacas. Aŭskultu! Jen estas la vortoj, alportitaj al mi de la filoj de Elrondo, de ilia patro en Rivendelo, la plej saĝa pri analoj: *Diru, ke Aragorno memoru la vortojn de la profeto kaj la Padojn de l' Mortintoj.*

— Kaj kiuj estas la vortoj de la profeto? — diris Legolaso.

— Tiel parolis Malbeto la Profeto, dum la tagoj de Arveduo, la lasta reĝo de Fornosto, — diris Aragorno:

*Kuŝas tra l' lando ombro longa,
ŝovas mallumon okcidenten.
Tremas Turego; al tomboj reĝaj
iras la sort'. Mortintoj vekigas:
venis la horo de l' ĵurrompintoj:
ili staros denove ĉe l' Ŝton' de Ereĥo
kaj aŭdos tie kornon surmontan.
Kies la korno? Kiu ilin vokos
el griza krepusko, la forgesitojn?
La heredanto de l' alĵurito.
Li venos el nordo, necespelate:
li pasos la Pordon de l' Padoj Mortintaj.*

— Vojoj mallumaj, sendube, — diris Gimlio, — sed ne pli mallumaj ol estas tiuj versoj al mi.

— Se vi volas kompreni ilin pli bone, tiam mi petas, ke vi akompanu min, ĉar tiun vojon mi nun iros. Sed mi faras tion senĝoje; pelas min nur la neceso. Sekve nur laŭ via libera volo mi deziras, ke vi venu, ĉar vi trovos tiel laboron kiel timegon, kaj eble ion pli malbonan.

— Mi akompanos vin eĉ sur la Padoj de l' Mortintoj, kaj al kiu ajn celo ili kondukos, — diris Gimlio.

— Ankaŭ mi venos, — diris Legolaso, — ĉar la mortintojn mi ne timas.

— Mi esperas, ke la forgesitoj ne jam forgesis, kiel oni batalas, — diris Gimlio, — ĉar sen tio mi ne scias, kial ni ĝenu ilin.

— Ni scios tion, se ni atingos Ereĥon, — diris Aragorno. — Sed la ĵuro, kiun ili rompis, estis, ke ili batalos kontraŭ Saŭronon, kaj ili sekve devos batali, se ili plenumos ĝin. Ĉar ĉe Ereĥo eĉ nun staras nigra ŝtono, kiu estis alportita, oni diris, de Isilduro el Numenoro; kaj ĝi estis starigita sur monteto, kaj sur ĝi la reĝo de la montoj ĵuris lojalecon al li komence de la regno Gondoro. Sed kiam Saŭrono revenis kaj denove iĝis potenca, Isilduro alvokis la homojn de la montoj plenumi la ĵuron, kaj ili rifuzis, ĉar ili adoris Saŭronon dum la Mal-lumaj Jaroj. Tiam Isilduro diris al ilia reĝo: "Vi estos la lasta reĝo. Kaj se la okcidento pruviĝos pli forta ol via Nigra Mastro, jene mi malbenos vin kaj vian popolon: neniam vi ripozos ĝis via ĵuro estos plenumita. Ĉar tiu ĉi milito daŭros dum jaroj nekalkuleblaj, kaj vi estos denove alvokita antaŭ ĝia fino". Kaj ili fuĝis antaŭ la kolero de Isilduro, kaj ne kuraĝis militiri subtene al Saŭrono; kaj ili sin kaŝis en lokoj sekretaj en la montaro kaj neniel kontaktis aliajn homojn, sed iom post iom malkreskis en la senfrukta montaro. Kaj timego pri la sendormaj mortintoj ĉirkaŭas la monton Ereĥo kaj ĉiujn lokojn, kie tiu popolo restadis. Sed laŭ tiu vojo mi devos iri, tial ke neniu vivanto povas helpi min.

Li starigis.

— Venu! — li kriis kaj elingigis sian glavon, kaj tiu ekbrilis en la duonluma halego de la Burgo. — Al la Ŝtono de Ereĥo! Mi serĉas la Padojn de l' Mortintoj. Akompanu min, kiuj volas!

Legolaso kaj Gimlio nenion respondis, sed ili leviĝis kaj sekvis Aragornon el la halego. Sur la razeno atendis, senmovaj kaj silentaj, la kapuĉitaj disiruloj. Legolaso kaj Gimlio surĉevaliĝis. Aragorno sursaltis Roherinon. Tiam Halberado levis grandan kornon, kaj ties sono eĥis en la Profundaĵo de Helmo, kaj je tio ili forsaltis, rajdante tondre malsupren laŭ la Kavaĵo, dum ĉiuj postrestintoj sur Ŝtonmuro kaj Burgo gapis mirigite.

Kaj dum Teodeno iris laŭ malrapidaj vojetoj sur la montaro, la Griza Trupo pasis rapide tra la ebenaĵo, kaj la sekvan posttagmezon ili

venis al Edoraso; kaj tie ili haltis nur mallonge antaŭ ol supreniri laŭ la valo, kaj tiel venis al Dunharo, kiam vespere mallumiĝis.

Damo Eovina salutis ilin kaj ĝojis pro ilia alveno, ĉar nenium pli fortan ŝi jam vidis, ol la dunadanojn kaj la belajn filojn de Elrondo; sed pleje ĉe Aragorno restis ŝia rigardo. Kaj kiam ili vespermanĝis kun ŝi, ili interparolis, kaj ŝi aŭdis pri tio, kio okazis post la forraĵdo de Teodeno, pri kiu ĝis tiam atingis ŝin nur hastaj informoj; kaj kiam ŝi aŭdis pri la batalo en la Profundaĵo de Helmo kaj la granda mortigado de iliaj malamikoj kaj pri la sturmado far Teodeno kaj ties kavaliroj, ŝiaj okuloj brilis. Sed fine ŝi diris:

— Sinjoroj, vi estas laĉaj kaj jam iros al viaj litoj kun tia komforto, kian oni povas haste aranĝi. Sed morgaŭ pli taŭga loĝejo estos trovita por vi.

Sed Aragorno diris:

— Ne, damo, ne ĝenu vin pri ni! Se ni povos ripozi ĉi tie hodiaŭ nokte kaj matenmanĝi morgaŭ, tio estos sufiĉa. Ĉar mi rajdas pro komisio plej urĝa, kaj je l' unua lumo de la mateno ni devos foriri.

Ŝi ridetis al li kaj diris:

— Do estis afable farite, moŝto, rajdi tiom da mejloj devie de via vojo por alporti informojn al Eovina, kaj interparoli kun ŝi en ŝia ekzilo.

— Efektive neniu viro taksus tian vojaĝon malŝparo, — diris Aragorno, — kaj tamen, damo, mi venis ĉi tien, ĉar la vojo, kiun mi devos laŭiri, kondukas min al Dunharo.

Kaj ŝi respondis kiel iu, al kiu ne plaĉas la diraĵo:

— Do, sinjoro, vi deviis, ĉar el Harvalo neniu vojo kondukas orienten aŭ suden, kaj prefere vi reiru tiel, kiel vi venis.

— Ne, damo, — li diris, — mi ne deviis, ĉar mi promenis en tiu ĉi lando antaŭ ol vi naskiĝis por ornami ĝin. Ekzistas vojo el tiu ĉi valo, kaj tiun vojon ni iros. Morgaŭ mi rajdos laŭ la Padoj de l' Mortintoj.

Tiam ŝi gapis al li afliktite, kaj ŝia vizaĝo palegiĝis, kaj longe ŝi nenion pli diris, dum ĉiuj sidis silentaj.

— Sed, Aragorno, — ŝi diris fine, — ĉu via komisio estas serĉi la morton? Ĉar nur tion vi trovos sur tiu vojo. Ili ne permesas, ke la vivantoj trapasu.

— Ili devos permesi, ke mi trapasu, — diris Aragorno, — sed mi minimume riskos ĝin. Neniu alia vojo sufiĉos.

— Sed estas frenezaĵo. Ĉar jen estas viroj famaj kaj bravegaj, kiujn vi devus gvidi ne en la ombrojn, sed al milito, kie viroj estas bezonataj.

Mi petegas, ke vi restu kaj rajdu kun mia frato, ĉar tiuokaze ĉiuj niaj koroj ĝojegos, kaj nia espero estos eĉ pli hela.

— Ne estas frenezaĵo, damo, ĉar mi iros laŭ pado destinita. Sed tiuj, kiuj sekvas min, tion faras libervole; kaj se ili nun volos resti kaj rajdi kun la rohananoj, ili rajtos tion fari. Sed mi iros la Padojn de l' Mortintoj sola, se necese.

Poste ili diris nenion pli, kaj ili manĝis silente, sed ŝiaj okuloj ĉiam turniĝis al Aragorno, kaj la aliaj vidis, ke mense ŝi tre turmentigas. Finfine ili stariĝis kaj adiaŭis la Damon, kaj dankis ŝin pro la prizorgo, kaj iris al sia ripozejo.

Sed kiam Aragorno alvenis la tendon, kie li loĝos kun Legolaso kaj Gimlio, kaj liaj kunuloj jam eniris, Damo Eovina sekvis lin kaj alvokis lin. Li turniĝis kaj vidis ŝin kiel ekbrilon en la nokto, ĉar ŝi estis vestita blanke, kaj ŝiaj okuloj fajreris.

— Aragorno, — ŝi diris, — kial vi iros laŭ tiu danĝeriga vojo?

— Ĉar tio necesas. Nur tiel mi vidas esperon plenumi mian rolon en la milito kontraŭ Saŭrono. Vojojn danĝeroplajn mi ne elektas, Eovina. Se mi irus tien, kie loĝas mia koro, fore en la nordo, mi jam vagus en la bela valo Rivendelo.

Dum kelka tempo ŝi silentis, kvazaŭ meditante la signifon de tio. Poste ŝi subite kaptis lian brakon kaj diris:

— Vi estas mastro severa kaj rezoluta; kaj tiel viroj akiras famon.

— Ŝi paŭzis. — Sinjoro, se vi nepre devos iri, permesu, ke mi rajdu inter via sekvantaro. Ĉar min tedas sinkaŝado en la montaro, kaj mi volas fronti danĝeron kaj batalon.

— Via devo estas ĉe via popolo, — li respondis.

— Tro ofte mi aŭdis pri devo, — ŝi ekkriis. — Sed ĉu mi ne estas domano de Eorlo, ŝildulino kaj ne vartistino? Mi jam tro longe atendis sur piedoj hezitemaj. Tial ke ili ne plu hezitas, ŝajne, ĉu mi ne rajtas nun pasigi mian volon propradezire?

— Malmultaj rajtas fari tion kun honoro, — li respondis. — Sed viakaze, damo: ĉu vi ne akceptis la taskon regi la popolon ĝis la reveno de ties mastro? Se vi ne estus elektita, tiuokaze iu marŝalo aŭ trupestro estus starigita sur la saman lokon, kaj tiu ne povus rajdi for de sia respondeco, ĉu aŭ ne li tediĝus pri ĝi.

— Ĉu ĉiam estos elektita mi? — ŝi diris amare. — Ĉu oni ĉiam postlasos min, kiam la rajdistoj foriras, por prizorgi la domon, dum ili akiras famon, kaj trovi manĝaĵojn kaj litojn, kiam ili revenas?

— Eble baldaŭ venos okazo, — li diris, — kiam revenos neniu.

Tiam necesos kuraĝo sen famo, ĉar neniu memoros la farojn de la lasta defendado de viaj hejmoj. Tamen la faroj ne estos malpli bravaj pro tio, ke ili estos nelaŭditaj.

Kaj ŝi respondis:

— Ĉiuj viaj vortoj diras nur: vi estas virino, kaj via rolo estas en la domo. Sed kiam la viroj mortos en batalo kun honoro, al vi estos permesite bruliĝi en la domo, ĉar la viroj ne plu bezonos ĝin. Sed mi estas domano de Eorlo kaj ne servistino. Mi scias rajdi kaj uzi la klingon, kaj mi timas nek doloron nek morton.

— Kion vi timas, damo? — li demandis.

— Kaĝon, — ŝi diris. — Resti malantaŭ krado, ĝis kutimiĝo kaj maljuneco akceptos tion, kaj ĉiu ebleco fari bravajn agojn foriros preter revoko aŭ deziro.

— Tamen vi konsilis min ne riski la vojon, kiun mi elektis, pro tio, ke ĝi estas danĝera, ĉu ne?

— Tiel oni rajtas konsili aliulon. Tamen mi ne diris, ke vi evitu danĝeron, sed rajdu al batalo, kie via glavo eble akiros famon kaj venkon. Mi ne volus vidi ion altan kaj bonegan nenecese forĵetita.

— Ankaŭ mi ne, — li diris. — Tial mi diras al vi, damo: restu! Ĉar vi havas neniun komision iri suden.

— Kiel ankaŭ ne havas tiuj, kiuj akompanos vin. Ili iros nur, ĉar ili ne volas esti disigitaj de vi; ĉar ili amas vin. — Ŝi turniĝis kaj malaperis en la nokton.

Kiam la taga lumo aperis sur la ĉielo, sed la suno ankoraŭ ne leviĝis super la altajn firstojn en la oriento, Aragorno pretiĝis por foriro. Lia trupo estis jam surĉevala, kaj li estis saltonta sur la selon, kiam Damo Eovina venis por adiaŭi ilin. Ŝi estis rajdiste vestita kaj ĉezone portis glavon. En sia mano ŝi portis tason, kaj ĝin ŝi metis al siaj lipoj kaj trinkis iomete, dezirante al ili bonan sorton; kaj poste ŝi donis la tason al Aragorno, kaj tiu trinkis, kaj li diris:

— Adiaŭ, Damo de Rohano! Mi tostas la fortunojn de via Domo, kaj de vi, kaj de via tuta popolo. Diru al via frato: post la ombroj ni eble renkontiĝos denove!

Tiam ŝajnis al Gimlio kaj Legolaso, kiuj estis proksimaj, ke ŝi ploras, kaj ĉe iu tiel severa kaj fiera tio ŝajnis eĉ pli doloriga. Sed ŝi diris:

— Aragorno, ĉu vi volas iri?

— Mi volas.

— Do ĉu vi ne permesos, ke mi rajdu kun tiu ĉi trupo, kiel mi petis?

— Tion mi ne permesos, damo, ĉar tion mi ne permesus sen konsento de la reĝo kaj de via frato; kaj ili ne revenos antaŭ morgaŭ. Sed mi jam kalkulas ĉiun horon, fakte ĉiun minuton. Adiaŭ!

Tiam ŝi falis surgenuen, dirante:

— Mi petegas!

— Ne, damo, — li diris, kaj kaptinte ŝian manon li starigis ŝin. Poste li kisis ŝian manon, salte surseliĝis, forrajdis kaj ne retrorigardis, kaj nur tiuj, kiuj konis lin intime kaj apudis lin, vidis la doloron, kiun li suferis.

Sed Eovina staris senmova kiel figuro skulptita el ŝtono, kun la manoj pugnigitaj ĉe sia flanko, kaj ŝi rigardis ilin, ĝis ili eniris la ombrojn sub la nigra Dvimorbergo, la Hantata Monto, sur kiu estis la Pordo de l' Mortintoj. Kiam ili pasis el la vidkampo, ŝi turniĝis, stumblante kvazaŭ blinda, kaj reiris al sia loĝejo. Sed neniu el ŝia popolo vidis tiun disiĝon, ĉar ili sin kaŝis pro timo kaj ne eliris ĝis la plena tago, kaj la malprudentaj vojaĝantoj jam foriris.

Kaj kelkaj diris:

— Tiuj estas elfaj personoj. Ili iru tien, kie ili indiĝenas, al la lokoj mallumaj, kaj neniam revenu. La epoko jam sufiĉe misas.

La lumo ankoraŭ grizis, dum ili rajdis, ĉar la suno ankoraŭ ne grimpis super la nigrajn firstojn de la Hantata Monto antaŭ ili. Antaŭtimo kroĉiĝis al ili, precize kiam ili trapasis inter la vicoj de antikvaj ŝtonoj kaj tiel venis al Dimholto. Tie sub la morno de nigraj arboj, kiun eĉ Legolaso ne povis longe toleri, ili trovis kavan lokon faŭkantan ĉe la monta radiko, kaj ĝuste sur ilia vojo staris unuopa fortika ŝtono kvazaŭ fingro de fortuno.

— Mia sango fluas fridege, — diris Gimlio, sed la aliaj silentis, kaj lia voĉo falis dampite al la humidaj abipingloj ĉe liaj piedoj. La ĉevaloj ne volis pasi la minacan ŝtonon, ĝis la rajdantoj elseliĝis kaj kondukis ilin ĉirkaŭen. Kaj tiel ili alvenis finfine en la profundon de la valo; kaj tie staris kruta rokmuro, kaj en la muro la Malhela Pordo faŭkis antaŭ ili kvazaŭ la noktobuŝo. Signoj kaj figuroj estis ĉizitaj super ĝia larĝa arkaĵo tro malklaraj por legi, kaj timo disfluis el ĝi kvazaŭ griza vaporo.

La trupo haltis, kaj inter ili neniu koro ne tremegis, krom eble nur la koro de Legolaso el la elfoj, kiun ne teruras la fantomoj de homoj.

— Tiu pordo estas misaŭgura, — diris Halberado, — kaj post ĝi kuŝas mia morto. Tamen mi aŭdacos trapasi ĝin; sed neniu ĉevalo volos eniri.

— Sed ni devas eniri, kaj sekve ankaŭ la ĉevaloj devos, — diris Aragorno. — Ĉar se ni entute trapasos tiun ĉi mallumon, multaj leŭgoj troviĝas aliflanke, kaj ĉiu horo perdita pliproksimigas la triumfon de Saŭrono. Sekvu min!

Aragorno iris la unua, kaj tioma estis lia volforto en tiu horo, ke sekvis lin ĉiuj dunadanoj kaj ties ĉevaloj. Kaj efektive la amo, kiun la ĉevaloj de la disiruloj sentis al siaj rajdantoj, estis tiel granda, ke ili pretis konfronti eĉ la teruron de la Pordo, se la koroj de iliaj mastroj estus senŝancelaj, dum ili marŝas apude. Sed Arodo, la ĉevalo de Rohano, rifuzis la vojon, kaj ĝi staris ŝvitante kaj tremante pro timo, kiun vidi dolorigis. Tiam Legolaso kovris ties okulojn per la manoj kaj kantis kelkajn vortojn, kiuj sonis mallaŭte en la malhelo, ĝis ĝi permesis gvidi sin, kaj Legolaso eniris. Kaj staris tie la gnomo Gimlio, lasite tute sola.

Liaj genuoj tremis, kaj li koleris pri si.

— Jen afero senprecedenca! — li diris. — Elfo iras subteren, kaj gnomo tion ne aŭdacas! — Post tio li ensaltis. Sed al li ŝajnis, ke liaj kruroj plumbece treniĝas trans la sojlon; kaj blindeco tuj trafis lin, eĉ Gimlion, filon de Gloino, kiu promenis netimigite en multaj profundaj lokoj en la mondo.

Aragorno alportis torĉojn el Dunharo, kaj nun li iris antaŭe portante torĉon alte; kaj kun alia iris Eladano malantaŭe, kaj Gimlio, stumblante poste, klopodis atingi lin. Li povis vidi nenion krom la malfortan flamon de la torĉoj; sed kiam la trupo haltis, ŝajne aŭdiĝis ĉirkaŭ li senfina voĉflustrado, murmuro de vortoj en lingvo, kiun li neniam antaŭe aŭdis.

Nenio atakis la trupon aŭ kontraŭstaris ties trapason, kaj tamen timo poiome kreskis en la gnomo, dum li pluiris: plejparte ĉar li jam sciis, ke retroiro ne plu eblas; ĉiuj padoj malantaŭe estis plenplenaj de nevidata amaso, kiu sekvis tra la mallumo.

Tiel pasis tempo nekalkulebla, ĝis Gimlio vidis ion, kion ĉiam poste li malvolonte rememoris. La vojo estis larĝa, kiom li povis juĝi, sed nun la trupo subite venis al granda malplenaĵo, kaj ne plu estis muroj ambaŭflanke. Tiom pezis sur lin la teruro, ke li apenaŭ kapablis marŝi. Fore maldekstre io briletis en la sombro, kiam proksimiĝis la

torĉo de Aragorno. Tiam Aragorno haltis kaj iris rigardi, kio estas tio.

— Ĉu neniun timon li spertas? — murmuris la gnomo. — En ajna alia kaverno Gimlio, filo de Gloino, kurus la unua al ekbrilo de oro. Sed ne ĉi tie! Lasu ĝin kuŝanta!

Tamen li proksimiĝis, kaj vidis Aragornon genuanta, dum Eladano tenis alte ambaŭ torĉojn. Antaŭ li estis la ostoj de fortegulo. Li estis vestita en maŝkiraso, kaj lia armaĵo ankoraŭ kuŝis tie senmanka, ĉar la kaverna aero estis seka kiel polvo, kaj lia kiraso estis orumita. Lia zono estis el oro kaj grenatoj, kaj riĉe ora estis la kasko sur lia osta kapo kuŝanta vizaĝaltere. Li falis proksime al la fora muro de la kaverno, kiel estis nun videble, kaj antaŭ li staris ŝtona pordo strikte fermita: liaj fingrostoj ankoraŭ ungotenis la fendetojn. Apud li kuŝis noĉita kaj rompita glavo, kvazaŭ dum sia lasta malespero li batadus la rokon.

Aragorno ne tuŝis lin, sed post iom da silenta rigardado li stariĝis kaj suspiris:

— Ĉi tien neniam venos floroj de *simbelmynë* ĝis la mondofino, — li murmuris. — Naŭ plus sep dolmenoj nun herboverdas, kaj dum ĉiuj longaj jaroj li kuŝis antaŭ la pordo, kiun li ne povis malŝlosi. Kien ĝi kondukas? Kial li volis trapasi? Neniu iam scios!.. ĉar ne tio estas mia komiso! — li kriis, returniĝante kaj parolante al la flustra mallumo malantaŭe. — Tenu kaŝitaj viajn trezorojn kaj viajn sekretojn en la Malbenitaj Jaroj! Nur rapidon ni postulas. Lasu nin pasi, kaj poste venu! Mi alvokas vin al la Ŝtono de Ereĥo.

Venis neniu respondo, krom se temis pri kompleta silento pli timiga ol la antaŭaj flustroj; kaj poste venis frosta trablovo, pro kiu la torĉoj flagris kaj estingiĝis, kaj ne povis esti refajrigitaj. Pri la tempo, kiu sekvis, unu horo aŭ multaj, Gimlio memoris malmulton. La aliaj antaŭeniris, sed li ĉiam estis la lasta, persekutate de palpa teruraĵo, kiu ŝajnis ĉiam kaptonta lin; kaj brueto postsekvis lin kvazaŭ ombroso de multaj piedoj. Li stumbladis antaŭen, ĝis li rampis beste sur la tero kaj sentis, ke li nenion pli kapablas toleri: li devos aŭ trovi finojon kaj eskapi aŭ retrokuri en frenezo renkonte al la persekutanta timo.

Subite li aŭdis tintadon de akvo, sonon duran kaj klaran kiel ŝtono enfalanta sonĝon de malhela ombro. Lumo plifortiĝis, kaj jen! la trupo trapasis alian pordejon, altarkaĵan kaj larĝan, kaj rojo elfluis apude; kaj poste, iranta apike suben, estis vojo inter krutaj klifoj, tranĉileĝaj kontraŭ la ĉielo fore supra. Tiel profunda kaj mallarĝa

estis tiu abismo, ke la ĉielo malhelis, kaj sur ĝi briletis malgrandaj steloj. Tamen kiel Gimlio poste eksciis, mankis ankoraŭ du horoj ĝis sunsubiro de la tago, en kiu ili ekiris de Dunharo; kvankam laŭ lia tiama taksopovo povus esti krepusko en iu posta jaro, aŭ en iu alia mondo.

La trupo nun surseliĝis denove, kaj Gimlio reiris al Legolaso. Ili rajdis spalire, kaj vespero venis kaj profunde blua krepusko; kaj daŭre timo persekutis ilin. Legolaso turninte sin por paroli al Gimlio retro-rigardis, kaj la gnomo vidis antaŭ sia vizaĝo ekbrilon en la helaj okuloj de la elfo. Malantaŭ ili rajdis Eladano, lasta el la trupo, sed ne lasta el tiuj, kiuj laŭiris la vojon suben.

— La mortintoj sekvas, — diris Legolaso. — Mi vidas figurojn de homoj kaj de ĉevaloj, kaj palajn standardojn kiel nubĉifonojn, kaj lancojn kiel vintrajn densejojn dum nokto nebuloza. La mortintoj sekvas.

— Jes, la mortintoj rajdas malantaŭe. Ili estas alvokitaj, — diris Eladano.

La trupo venis finfine el la ravino, tiel subite, kvazaŭ ili eliris tra fendeto en muro; kaj antaŭ ili kuŝis la altaĵoj de granda valo, kaj la rojo apud ili malsupreniris fridvoĉe tra multaj akvfaloj.

— Kie en Mez-Tero ni estas? — diris Gimlio, kaj Eladano respondis:

— Ni descendis de la fonto de Morthondo, la longa malvarma rivero, kiu fluas fine al tiu maro, kiu lavas la murojn de Dol Amroto. Ne necesos al vi demandi, de kie venas ĝia nomo: oni nomas ĝin Nigroradiko.

La Morthonda Valo formis grandan golfeton, kiu premiĝis al la krutaj sudaj facoj de la montaro. Ĝiaj apikaj deklivoj estis herbokovritaj; sed ĉio estis griza en tiu horo, ĉar la suno jam foriris, kaj fore sube briletis lumoj en la domoj de homoj. La valo estis fekunda, kaj multaj loĝis tie.

Poste sen returniĝo Aragorno laŭte kriis tiel, ke ĉiuj povu aŭdi:

— Amikoj, forgesu pri via laco! Rajdu jam, rajdu! Ni devas veni al la Ŝtono de Ereĥo antaŭ ol forpasos tiu ĉi tago, kaj ankoraŭ longa estas la vojo.

Do sen rerigardo ili trarajdis la montajn kampojn, ĝis ili alvenis ponton super la plifortiĝanta torento kaj trovis padon, kiu subeniris al la ebenaĵo.

Lumoj estingiĝis en domoj kaj vilaĝoj, kiam ili alvenis, kaj pordoj estis fermitaj, kaj homoj eksterdomaj kriegis pro timo kaj kuris freneze kiel ĉasataj cervoj. Ĉiam leviĝis sama krio en la densiĝanta krepusko:

— La reĝo de l' mortintoj! La reĝo de l' mortintoj venas al ni!

Sonoriloj aŭdiĝis en la fora subo, kaj ĉiuj homoj fuĝis antaŭ la vizaĝo de Aragorno; sed la Griza Trupo pro sia hasto rajdis kiel ĉasistoj, ĝis iliaj ĉevaloj stumblis pro elĉerpiĝo. Kaj tiel, ĝuste antaŭ la noktomezo, kaj en mallumo nigra kiel la montaraj kavernoj, ili finfine venis al la Monto de Ereĥo.

Delonge teruro pri la mortintoj okupis tiun monton kaj la malplenajn kampojn ĉirkaŭ ĝi. Ĉar sur la supro staris nigra ŝtono, ronda kiel globego, samalta kiel homo, kvankam duone ĝi estis enterigita. Netera ĝi aspektis, kvazaŭ ĝi falus el la ĉielo, kiel kredis iuj; sed tiuj, kiuj ankoraŭ memoris la tradiciojn de Okcidentio, rakontis, ke ĝi estis alportita el la ruina Numenoro kaj starigita tie de Isilduro post ties albordiĝo. Neniuj el la valanoj aŭdacis proksimiĝi al ĝi, kiel ili ankaŭ rifuzis loĝi proksime; ĉar oni diris, ke ĝi estas renkontejo de la ombruloj, kiuj kuniĝas en epokoj timoplenaj, amasiĝante ĉirkaŭ la Ŝtono kaj flustrante.

Al tiu Ŝtono venis la trupo kaj haltis en la senluma nokto. Tiam Elrohiro transdonis al Aragorno arĝentan kornon, kaj tiu blovis ĝin; kaj ŝajnis al la apudstarantoj, ke ili aŭdas bruon de respondantaj kornoj, kvazaŭ eĥon en profundaj kavernoj malproksimaj. Neniun alian sonon ili aŭdis, kaj tamen ili konsciis pri granda amaso kuniĝinta ĉirkaŭ la monto, sur kiu ili staris; kaj frosta vento, kiel spiro de fantomoj, descendis de la montaro. Sed Aragorno elseliĝis, kaj starante apud la Ŝtono li laŭte kriis:

— Ĵurrompintoj, kial vi venis?

Kaj voĉo aŭdiĝis tra la nokto, kaj respondis al li, kvazaŭ de tre fore:

— Por plenumi nian ĵuron kaj trovi trankvilon.

Poste Aragorno diris:

— Finfine venas la horo. Nun mi iros al Pelargiro sur Anduino, kaj vi sekvos min. Kaj kiam tiu ĉi tuta lando estos purigita de l' servantoj de Saŭrono, mi taksos la ĵuron plenumita, kaj vi havos trankvilon kaj foriros por ĉiam. Ĉar mi estas Elesaro, heredinto de Isilduro en Gondoro.

Kaj tion dirinte li ordonis, ke Halberado malvolvu la grandan

standardon, kiun li alportis; kaj jen! ĝi estis nigra, kaj se estis sur ĝi iu signo, tiu estis kaŝita en la mallumo. Poste estis silento, kaj nek flustro, nek suspiro denove aŭdeblis tra la tuta longa nokto. La trupo bivakis apud la Ŝtono, sed ili malmulte dormis, pro timo pri la ombroj, kiuj ĉirkaŭbaris ilin.

Sed kiam la tagiĝo venis, malvarma kaj pala, Aragorno leviĝis haste, kaj li kondukis for la trupon al vojaĝo plej rapidega kaj laciga el la spertitaj de ĉiuj, krom nur li, kaj nur lia volo konvinkis ilin plui. Neniuj aliaj mortemuloj povus toleri tion, sed nur la dunadanoj el la nordo, kaj kun tiuj gnomo Gimlio kaj elfo Legolaso.

Ili preterpasis la Kolon de Tarlango kaj venis en Lamedonon; kaj la ombra armeo premis malantaŭe kaj timo antaŭiris ilin, ĝis ili alvenis Kalembelon sur Cirilo, kaj la suno malsupreniris kvazaŭ sango post Pinato Gelin en la fora okcidento malantaŭ ili. La urbon kaj la travadejojn de Cirilo ili trovis dizertitaj, ĉar multaj viroj foriris al la milito, kaj ĉiuj restintoj fuĝis al la montaro pro onidiro pri proksimiĝo de la reĝo de l' mortintoj. Sed la postan tagon venis neniun aŭroro, kaj la Griza Trupo pluiris en la mallumon de la ŝtormo de Mordoro kaj forpasis el la homa vidkampo; sed sekvis ĝin la mortintoj.

Ĉapitro 3

LA APELO EN ROHANO

Nun ĉiuj vojoj kune kondukis orienten por renkonti la alvenon de milito kaj la atakon de la Ombro. Kaj ĝuste kiam Grinĉjo staris ĉe la Granda Pordego de la Urbo kaj vidis la princon de Dol Amroto trarajdi kun siaj standardoj, la Reĝo de Rohano venis malsupren de la montaro.

La tago ekvelkis. En la lastaj sunradioj la rajdistoj kreis longajn pintajn ombrojn, kiuj antaŭiris ilin. Mallumo jam rampis sub la murmurajn abiarojn, kiuj vestis la krutajn montflankojn. La reĝo rajdis jam malrapide je fino de la tago. Baldaŭ la pado ĉirkaŭiris grandan nudan rokŝultron kaj plonĝis en la sombron de softsusuraj arboj. Suben, suben ili iris en longa serpentuma spaliro. Kiam fine ili alvenis la fundon de la ravino, ili konstatis, ke jam vesperiĝis en la profund-ejoj. Foriris la suno. Krepusko kovris la akvofalojn.

Tra la tuta tago sub ili salta rivereto suben impetis el la alta pasejo malantaŭe, tranĉante sian mallarĝan vojon inter pinkovritaj muroj; kaj nun tra ŝtona pordo ĝi elfluis kaj eniris valon pli larĝan. La rajdistoj sekvis ĝin, kaj subite Harvalo kuŝis antaŭ ili, laŭta pro la akvobruo en la vespero. Tie la blanka Neĝburno, al kiu aliĝis la fluo malpli granda, impetis, vaporante kontraŭ la ŝtonoj, suben al Edoraso kaj la verdaj montetoj kaj la ebenaĵo. Fore dekstre ĉekape de la granda valo baŭmis la fortika Starkhorno kun vastaj apogaĵoj nubvolvitaj; sed ties akr-eĝa pinto, vestita per eterna neĝo, brilis forege super la tero, blumombra oriente, sunsubire ruĝmakulita okcidente.

Gaja rigardis mire tiun strangan landon, pri kiu li aŭdis multajn rakontojn dum la longa vojaĝo. Ĝi estis mondo senĉiela, je kiu liaj okuloj, tra malklaraj golfoj da ombreca aero, vidis nur deklivojn ĉiam pli suprenirajn, ŝtonmuregojn malantaŭ muregoj, kaj brovumantajn krutegaĵojn nebulvolvitajn. Li sidis momente duonreve, aŭskultante la bruon de la akvo, la flustron de malhelaj arboj, krakadon de ŝtonoj, kaj la vastan embuskan silenton post ĉiuj sonoj. Montojn li amis, aŭ iam amis pensi pri ili rande de historioj alportitaj de malproksime;

sed nun lin premis la netolerebla pezo de Mez-Tero. Li sopiris forbari la vastecon en kvietaj ĉambroj apud fajrujo.

Li estis tre laca, ĉar malgraŭ tio, ke ili rajdis malrapide, ili rajdis kun tre malmulte da ripozo. Horon post horo dum preskaŭ tri lacigaj tagoj li trote supren-subeniris, trans pasejojn kaj tra longaj valoj, kaj trans multajn riveretojn. Kelkfoje kiam la vojo estis pli larĝa li rajdis apud la reĝo, ne rimarkante, ke multaj rajdistoj ridetis vidante tiujn du kune: la hobiton sur la vila griza poneo kaj la Mastron de Rohano sur la blanka ĉevalo. Li ankaŭ interparolis kun Teodeno, rakontante al li pri sia hejmo kaj pri la faradoj de la provincoj, aŭ reciproke aŭskultante rakontojn pri Markio kaj ties fortikuloj en la malnova tempo. Sed plejparte, precipe dum tiu ĉi lasta tago, Gaja rajdis sola ĝuste post la reĝo, dirante nenion, kaj klopodante kompreni la malrapidan sonorajn paroladon rohanan, kiun li aŭdis la virojn malantaŭajn uzadi. Tio estis lingvo, en kiu ŝajne troviĝis multaj vortoj al li konataj, kvankam prononcitaj pli riĉe kaj forte ol en la Provinco, tamen li ne povis kunligi la vortojn. De tempo al tempo iu rajdisto ekkantis stimule per klara voĉo, kaj Gaja sentis sian koron respondi, kvankam li ne sciis, pri kio temas.

Ĉiuokaze li sentis sin soleca, kaj neniam pli ol nun en la fino de la tago. Li scivolis kien en tiu ĉi stranga mondo Grinĉjo alvenis; kaj kiel fortunos Aragorno, Legolaso kaj Gimlio. Tiam subite, kvazaŭ frosto tuŝus lian koron, li pensis pri Frodo kaj Sam. "Mi forgesas pri ili! — li diris al si riproĉe. — Kaj tamen ili pli gravas ol ĉiuj ni ceteraj. Kaj mi venis por helpi ilin; sed nun ili certe foras centojn da mejloj, se ili plu vivas". Li ektemis.

— Harvalo finfine! — diris Eomero. — Nia vojaĝo preskaŭ finiĝis.

Ili haltis. La padoj el la mallarĝa ravino descendis abrupte. Nur fragmente, kvazaŭ tra alta fenestro, vidiĝis la valego en la suba krepusko. Unuopa eta lumo videblis ekbrile apud la rivero.

— Eble finiĝis tiu ĉi vojaĝo, — diris Teodeno, — sed mi devos ankoraŭ longe plui. Hieraŭ nokte estis plenluno, kaj matene mi rajdos al Edoras por la apelo de Markio.

— Sed se vi volus akcepti mian konsilon, — diris Eomero mallaŭte, — vi poste revenus ĉi tien, ĝis la milito finiĝas, ĉu venke, ĉu malvenke.

Teodeno ridetis.

— Ne, filo mia, ĉar tiel mi volas nomi vin, ne parolu la insidajn

vortojn de Vermlango al miaj maljunaj oreloj! — Li rektigis sin kaj retrorigardis al la longa vico de siaj viroj malaperantaj en la krepuskon malantaŭe. — Longaj jaroj dum kelkaj tagoj ŝajnas al mi, de kiam mi ekrajdis okcidenten; sed neniam plu mi apogos min per bastono. Se milite ni malvenkos, kiom utilos mia sinkaŝado inter la montoj? Kaj se ni venkos, kiel tio malĝojigos, eĉ se mi pereos uzante mian lastan forton? Sed nun mi rezignos pri tio. Ĉi-nokte mi ripozos en la fortikaĵo de Dunharo. Unu vespero da paco ankoraŭ restas al ni. Ni rajdu antaŭen!

En la profundiganta krepusko ili venis malsupren en la valon. Tie Neĝburno fluis proksime al la okcidentaj flankoj de la valo, kaj baldaŭ la pado kondukis ilin al travadejo, kie la malprofunda akvo murmuris kontraŭ la ŝtonoj. La travadejo estis gardata. Kiam la reĝo proksimiĝis, multaj viroj saltaperis el la ombro de la rokoj; kaj vidante la reĝon ili ekkriis ĝoje:

— Reĝo Teodeno! Reĝo Teodeno! La Reĝo de Markio revenis!

Poste iu blovis longan signalon per korno. Tiu eĥis en la valo. Aliaj kornoj respondis, kaj lumoj ekbrilis trans la rivero.

Kaj subite aŭdiĝis granda ĥoro da trumpetoj el altsupre, sonorante el iu loko kava, kiel ŝajnis, kiu kunrastis la notojn al unu voĉo kaj sendis tiun ruliĝantan kaj batantan la ŝtonmurojn.

Tiel la Reĝo de Markio revenis venke el la okcidento al Dunharo sube de la Blankaj Montoj. Tie li trovis jam kuniĝinta la restantan forton de sia popolo; ĉar tuj kiam diskoniĝis lia alveno, komandantoj rajdis renkonte al li ĉe la travadejo, portante mesaĝojn de Gandolfo. Dunhero, ĉefo de la homoj en Harvalo, venis la unua.

— Je aŭroro antaŭ tri tagoj, mastro, — li diris, — Ombrofakso venis ventece el la okcidento al Edoraso, kaj Gandolfo havigis informon pri via venko, kiu ĝojigis niajn korojn. Sed li havigis ankaŭ sciigon de vi, ke oni rapidigu la apelon de l' rajdistoj. Kaj poste venis la flugilhava Ombro.

— Ĉu la flugilhava Ombro? — diris Teodeno. — Ankaŭ ni vidis ĝin, sed tio okazis meze de la nokto antaŭ ol Gandolfo forlasis nin.

— Eble, moŝto, — diris Dunhero. — Tamen tiu sama, aŭ alia simila, fluganta mallumaĵo en formo de monstra birdo, pasis super Edoraso tiun matenon, kaj ĉiuj skuiĝis pro timo. Ĉar ĝi plonĝis al Meduseldo, kaj kiam ĝi malaltiĝis, preskaŭ ĝis la gablo, aŭdiĝis krio, kiu haltigis niajn korojn. Tiam do Gandolfo konsilis, ke ni ne faru apelon sur la

kampoj, sed renkontu vin ĉi tie en la valo sub la montoj. Kaj li ordonis, ke ni ne bruligu pli da lumoj aŭ fajroj ol postulas la plej urĝa neceso. Tiel ni faris. Gandolfo parolis obeige. Ni esperas, ke tio estas laŭ via deziro. Nenion oni vidis en Harvalo el tiuj fiaĵoj.

— Estas bone, — diris Teodeno. — Jam mi rajdos al la Fortikaĵo, kaj tie antaŭ ol ekriprozi mi renkontos la marŝalojn kaj komandantojn. Ili venu al mi laŭeble baldaŭ!

La vojo nun kondukis orienten rekte trans la valon, kiu tiupunkte estis malmulte pli ol duonmejlon larĝa. Platejoj kaj kampoj da malmola herbo, nun grizaj en la velkanta taglumo, ĉirkaŭkuŝis, sed antaŭe je la fora flanko de la valo Gaja vidis brovumantan muron, lastan limon de la grandaj radikoj de Starkhorno, fenditaj de la rivero en praepoko.

Sur ĉiuj ebenejoj estis granda homamaso. Iuj premiĝis al la vojflanko, salutante per ĝojaj krioj la reĝon kaj la rajdintojn el la okcidento; sed etendiĝintaj al la fora malproksimo malantaŭe estis ordaj vicoj da tendoj kaj budoj, kaj spaliroj da krurigitaj ĉevaloj, kaj granda stoko da armiloj, kaj staplitaj lancoj hirtaj kiel densejoj da nove plantitaj arboj. Nun la granda homamaso kovriĝis de ombro, kaj tamen, malgraŭ ke bloviĝis de la altaĵoj nokta malvarmo, ardis neniuj lanternoj, neniuj fajroj estis bruligitaj. Sentineloj peze mantelitaj paŝis tien kaj reen.

Gaja scivolis, kiom da rajdistoj ĉeestas. Li ne povis diveni ties nombron en la kreskanta malhelo, sed ĝi ŝajnis al li granda armeo el miloj da homoj. Dum li gapis de flanko al flanko, la reĝa trupo venis sub la baŭmantan klifon orientflanke de la valo; kaj tie subite la pado komencis supreniri, kaj Gaja mirante rigardis supren. Li estis sur tia vojo, kian li neniam antaŭe vidis, granda faraĵo de homaj manoj en jaroj preter atingo de la kantoj. Supren ĝi turniĝadis, kvazaŭ serpente volviĝanta, ŝovante sian direkton trans la apikan rokdeklivon. Kruta kiel ŝtuparo, ĝi kurbiĝis tien kaj reen dum la ascendo. Laŭ ĝi ĉevaloj povis marŝi, kaj furgonojn oni povis malrapide treni; sed neniu malamiko kapablis iri tiuvoje, krom el la aero, se oni defendis ĝin supre. Ĉe ĉiu vojturno estis starantaj ŝtonegoj, kiuj estis ĉizitaj homsimile, grandegaj kaj krudmembraj, sidantaj kruckrure kun la stumpaj brakoj kunfalditaj sur grasaj ventroj. Kelkaj pro la tempo jam perdis ĉiujn vizaĝtraĵojn krom la malhelaj truoj, kiuj plu rigardadis triste la preterpasantojn. La rajdistoj apenaŭ ekrigardis ilin. Pukel-homoj oni

nomis ilin, kaj malmulte atentis ilin: en ili restis plu neniom da potenco aŭ teruro; sed Gaja rigardis ilin mire kaj sentante preskaŭ kompton, kiam ili baŭmis morne en la krepusko.

Post kelka tempo li retrorigardis kaj konstatis, ke li jam grimpis kelkcent futojn super la valo, sed fore sube li ankoraŭ povis malklare vidi serpentumantan spaliron da rajdistoj, trairantaj la vadejon kaj sekvantaj laŭ la vojo al la bivakejo preparita por ili. Nur la reĝo kaj ties gardistaro estis supreniranta en la Fortikaĵon.

Finfine la reĝa trupo alvenis abruptan randon, kaj la grimpanta vojo enpasis tranĉaĵon inter rokmuroj, kaj tiel supreniris mallongan deklivon kaj eksteren sur larĝan altejon. Tion oni nomis Firenfeldo, verda montara kampo da herbo kaj erikoj, alta super la profunde fositaj fluejoj de Neĝburno, kuŝigita sur la sino de la grandaj montoj malantaŭe: sude Starkhorno kaj norde la segildenta maso de Irensago, inter kiuj frontis al la rajdistoj la malafabla nigra muro de Dvimorbergo, la Hantata Monto leviĝanta el krutaj deklivoj de sombraj pinoj. Disduigante la altejon etendiĝis duobla spaliro da starantaj ŝtonoj, malklariĝanta en la krepusko kaj malaperanta inter la arboj. Kiuj riskis sekvi tiun vojon, tiuj baldaŭ alvenis la nigran Dimholton sub Dvimorbergo, kaj la minacon de l' ŝtonpilastro, kaj la oscedan ombron de la malpermesita pordo.

Tia estis malhela Dunharo, konstruita de homoj longe forgesitaj. Ili nomo estis perdita kaj neniu kanto aŭ legendo memorigis pri ili. Kiucele ili kreis tiun lokon, kiel urbon aŭ sekretan templon aŭ tombon de reĝoj, neniu jam sciis. Tie ili laboris dum la Malhelaj Jaroj, eĉ antaŭ ol venis ŝipo al la okcidentaj marbordo, kaj antaŭ ol la dundanoj ekkonstruis Gondoron; kaj nun ili estis malaperintaj, kaj nur la Pukel-homoj postrestis, daŭre sidantaj apud la vojturnoj.

Gaja gapis al la vicoj de etendiĝantaj ŝtonoj: ili estis trivitaj kaj nigraj; iuj kliniĝis, iuj jam falis, iuj estis fenditaj aŭ rompita; ili aspektis kiel vicoj da maljunaj kaj malsataj dentoj. Li scivolis, kio ili estis, kaj li esperis, ke la reĝo ne intencas sekvi ilin poste en la mallumon. Poste li vidis, ke ambaŭflanke de l' ŝtonoza vojo troviĝis tendoj kaj budoj; sed tiuj ne estis starigitaj proksime al la arboj, kaj ŝajnis prefere kunpremiĝi for de ili en la direkto de la klifrado. Ili estis pli multaj dekstre, kie Firenfeldo estis pli larĝa; kaj maldekstre troviĝis tendaro pli malgranda, en kies mezo staris alta pavilono. De tiu flanko nun venis rajdanto renkonte al ili, kaj ili turniĝis for de la vojo.

Kiam ili proksimiĝis, Gaja konstatis, ke la rajdanto estas virino

kun longaj plektitaj haroj ekbrilantaj en la krepusko, tamen ŝi portis kaskon kaj estis ĝistalie vestita bataliste kaj zonita kun glavo.

— Saluton, Mastro de Markio! — ŝi kriis. — Mia koro ĝojas pro via reveno.

— Kaj al vi, Eovina, — diris Teodeno, — ĉu ĉio en ordo ĉe vi?

— Ĉio en ordo, — ŝi respondis, tamen ŝajnis al Gaja, ke ŝia voĉo kontraŭdiris tion, kaj li supozus ĝin plori, se tio kredeblus pri iu tiel severtrajta. — Ĉio en ordo. Tio estis vojo laciga al la popolo subite ŝirita de siaj hejmoj. Aŭdiĝis krudaj vortoj, ĉar jam delonge milito ne forpelis nin el la verdaj kampoj, sed mankis misfarado. Ĉio estas jam ordigita, kiel vi vidas. Kaj via loĝejo estas preta por vi, ĉar mi estas plene informita pri vi kaj mi sciis la horon de via alveno.

— Do, Aragono jam venis, — diris Eomero. — Ĉu li ankoraŭ estas ĉi tie?

— Ne, li foriris, — diris Eovina, sin forturnante kaj rigardante la malhelajn montojn antaŭ la oriento kaj la sudo.

— Kien li iris? — demandis Eomero.

— Mi ne scias, — ŝi respondis. — Li venis nokte, kaj forrajdis hieraŭ matene, antaŭ ol la suno grimpis super la montopintojn. Li estas for.

— Vi malĝojas, filino, — diris Teodeno. — Kio okazis? Diru, ĉu li parolis pri tiu vojo? — li indikis laŭ la malheliĝanta linio de ŝtonoj al la Dvimorbergo. — Pri la Padoj de l' Mortintoj?

— Jes, mastro, — diris Eovina. — Kaj li eniris la ombrojn, el kiuj neniu revenis. Mi ne povis malinstigi lin. Li estas for.

— Sekve niaj vojoj estas disigitaj, — diris Eomero. — Li estas perdita. Ni devos rajdi sen li, kaj nia espero malfortiĝas.

Malrapide ili trapasis la mallongan erikejon kaj altejan herbon, ne plu parolante, ĝis ili alvenis la reĝan pavilonon. Tie Gaja konstatis, ke ĉio estas pretigita, kaj ke li mem ne estas forgesita. Eta tendo estis starigita por li apud la reĝa loĝejo, kaj tie li sidis sola, dum homoj iris tien-reen enirante al la reĝo kaj konsiliĝante kun li. Nokto profundigis, kaj la duone vidataj pintoj de la okcidentaj montoj estis kronitaj de steloj, sed la oriento estis malluma kaj senforma. La etendiĝantaj ŝtonoj malrapide velkis el la vidkampo, sed preter ili, pli nigra ol la malhelo, brovumis la larĝa kaŭra ombro de Dvimorbergo.

— La Padoj de l' Mortintoj, — li murmuris al si. — Ĉu la padoj de l' Mortintoj? Kion signifas ĉio ĉi? Ili jam ĉiuj forlasis min. Ili ĉiuj iris al

iu sorto: Gandolfo kaj Grinĉjo al milito en la oriento; Sam kaj Frodo al Mordoro; Paŝegulo, Legolaso kaj Gimlio al la Padoj de l' Mortintoj. Sed mia vico venos sufiĉe baldaŭ supozeble. Mi scivolas, pri kio ili ĉiuj parolas, kaj kion la reĝo intencas fari. Ĉar mi jam devos iri, kien li iras.

Meze de tiuj malgajaj pensoj, li subite rememoris, ke li tre mal-satas, kaj li stariĝis por iri vidi, ĉu iu alia en tiu stranga tendaro sentis same. Sed ĝuste tiumomente sonoris trumpeto, kaj viro venis alvoki lin, la eskviro de la reĝo, por deĵori ĉe la reĝa tablo.

En la interna parto de la pavilono estis eta spaco, kurtenita per broditaj tolpendaĵoj kaj kun feloj dismetitaj; kaj tie ĉe tableto sidis Teodeno kun Eomero kaj Eovina, kaj Dunhero estro de Harvalo. Gaja staris malantaŭ la reĝa tabureto kaj servis lin, ĝis baldaŭ la maljunulo, elpensigante, turniĝis al li kaj ridetis.

— Venu, sinjoro Gajadoko! — li diris. — Ne staru. Sidiĝu apud mi, tiel longe kiel mi restas sur mia propra tereno, kaj malpezigu mian koron per rakontoj.

Oni liberigis lokon por la hobito maldekstre de la reĝo, sed neniu petis rakonton. Efektive oni malmulte parolis, kaj oni manĝis kaj trinkis plejparte silente, ĝis finfine, trovinte kuraĝon, Gaja starigis la demandon, kiu turmentis lin.

— Dufoje jam, mastro, mi aŭdis pri la Padoj de l' Mortintoj, — li diris. — Kio ili estas? Kaj kien iris Paŝegulo, nome mastro Aragorno, kien li iris?

La reĝo suspiris, sed neniu respondis, ĝis finfine Eomero ekparolis:

— Ni ne scias, kaj pezas niaj koroj. Sed rilate la Padojn de l' Mortintoj, vi mem surpaŝis ties unuajn ŝtupojn. Ne, neniujn vortojn misfortunajn mi parolas! Tiu vojo, kiun ni grimpis, estas aliro al la Pordo, tie en Dimholto. Sed kio kuŝas post ĝi, tion scias neniu.

— Scias neniu, — diris Teodeno, — tamen pralegendo, nuntempe apenaŭ menciata, raportas ion. Se parolas vere tiuj malnovaj historioj, kiuj pasadis de patro al filo en la Domo de Eorlo, la Pordo sub Dvimorbergo kondukas al sekreta vojo, kiu iras sub la monto al iu forgesita loko. Sed neniu iam ajn aŭdacis eniri por serĉi ties sekretojn, de kiam Baldoro, filo de Brego, trapasis la Pordon kaj neniam plu estis vidita inter la homoj. Malprudentan voton li prononcis, eltrinkinte kornon ĉe tiu festo, kiun starigis Brego por sanktigi nove konstruitan Meduseldon, kaj li neniam venis al tiu alta seĝo, kies heredanto li

estis. Oni diras, ke Mortintoj el la Mallumaj Jaroj gardas la vojon kaj permesas al neniŭ vivanto aliron al siaj kaŝitaj haloj; sed de tempo al tempo ili mem videblas trapasante ombrece la pordon kaj irante laŭ la ŝtonvojo. Tiam la homoj en Harvalo firme fermas siajn pordojn kaj kovras siajn fenestrojn kaj timas. Sed malofte la Mortintoj elvenas, nur en horoj de granda maltrankvilo kaj proksimiĝanta morto.

— Tamen oni diras en Harvalo, — diris Eovina mallaŭte, — ke dum la senlunaj noktoj antaŭ ne tre longe amaso tre strange vestita preterpasis. De kie ili venis, sciis neniŭ, sed ili laŭiris la ŝtonvojon kaj malaperis en la monton, kvazaŭ ili irus al rendevuo.

— Do kial Aragono iris tiun vojon? — demandis Gaja. — Ĉu vi scias ion, kio klarigus tion?

— Krom se li diris ion al vi kiel al sia amiko, kion ni ne aŭdis, — diris Eomero, — nun neniŭ en la lando de la vivantoj povas diveni lian intencon.

— Ege ŝanĝita li ŝajnis al mi, post kiam mi la unuan fojon vidis lin en la reĝa domo, — diris Eovina, — pli serioza, pli maljuna. Envultita mi taksis lin, kaj simila al iu vokata de la Mortintoj.

— Eble li estis vokata, — diris Teodeno, — kaj mia koro diras al mi, ke mi neniam plu vidos lin. Tamen li estas reĝeca persono, alte destinita. Kaj konsoliĝu per tio, filino, tiel ke konsolon vi ŝajne bezonas pro via doloro pri tiu gasto. Oni diras, ke kiam la eorlidoj venis el la nordo kaj pasis finfine supren laŭ Neĝburno, serĉante sekurajn rifuĝejojn en tempo premanta, Brego kaj ties filo Baldoro supreniris la Ŝtuparon de la Fortikaĵo kaj tiel staris antaŭ la Pordo. Ĉe la sojlo sidis oldulo, nediveneble maljunega, alta kaj reĝeca li antaŭe estis, sed nun li estis velkinta kiel malnova ŝtono. Efektive ŝtono ili supozis lin, ĉar li tute ne moviĝis kaj diris neniun vorton, ĝis ili celis preterpasi lin kaj eniri. Kaj tiam voĉo eliĝis el li, kvazaŭ el la tero, kaj surprize al ili ĝi parolis en la okcidenta lingvo: *La vojo estas fermita.*

» Tiam ili haltis kaj rigardis lin kaj vidis, ke li vivas ankoraŭ; sed li ilin ne rigardis. *La vojo estas fermita*, lia voĉo diris denove. *Ĝin kreis tiuj, kiuj estas Mortintaj, kaj la Mortintoj gardas ĝin, ĝis venos la okazo. La vojo estas fermita.*

» *Kaj kiam la okazo venos?* demandis Baldoro. Sed neniun respondon li ricevis. Ĉar la maljunulo mortis tiuhore kaj falis survizaĝen; kaj neniun pluan informon pri la praloĝantoj de la montaro nia popolo iam eksciis. Tamen eble finfine la epoko aŭgurita jam venis, kaj Aragono eble trapasos.

— Sed kiel oni konstatu, ĉu aŭ ne tiu epoko venis, krom riskante la Pordon? — demandis Eomero. — Kaj tiun vojon mi ne irus eĉ se ĉiuj hordoj de Mordoro starus antaŭ mi, kaj mi estus sola kaj havus neniun alian rifuĝejon. Ve, ke humoro tiel envulta trafis viron tiel grandkoran en tiu ĉi horo de bezono! Ĉu ne estas sufiĉe da misaj afe-roj en la mondo, sen ke oni serĉu ilin sub la tero? Milito proksimas.

Li paŭzis, ĉar tiumomente aŭdiĝis bruo ekstere, vira voĉo krianta la nomon de Teodeno, kaj la kiu-iras de la sentinelo.

Baldaŭ la estro de l' sentineloj flankenŝovis la kurtenon kaj diris:

— Mastro, venis komisiito el Gondoro. Li volas tuj veni al vi.

— Li venu! — diris Teodeno.

Eniris altulo, kaj Gaja sufokis ekkriion; ĉar ŝajnis al li, ke Boromiro denove vivas kaj revenis. Poste li konstatis, ke tiel ne estas; la viro estis nekonata, kvankam tiel simila al Boromiro, ke li ŝajnis parenca, alta, grizokula kaj fiera. Li estis vestita rajdiste per mantelo el malhela verdo super delikata maŝkitelo; sur la antaŭo de lia kasko estis verkita arĝenta steleto. En la mano li portis unu sagon, nigrapluman kaj ŝtal-pintan, sed la pinto estis ruĝe farbita.

Li unukrure genuiĝis kaj transdonis la sagon al Teodeno.

— Saluton, Mastro de la rohananoj, amiko de Gondoro! Mi estas Hirgono, komisiito de Denetoro, kiu alportas al vi ĉi tiun militsignon. Gondoro estas en grava danĝero. Ofte la rohananoj helpis nin, sed nun la Mastro Denetoro petas vian tutan forton kaj vian tutan rapidecon, ĉar eble Gondoro finfine detruigis.

— La Ruĝa Sago! — diris Teodeno, tenante ĝin kvazaŭ li ricevus alvokon longe atenditan, tamen teruran, kiam ĝi venas. Lia mano tremis. — La Ruĝa Sago ne estas vidita en Markio dum ĉiuj miaj jaroj! Ĉu vere ni venis ĝis tio? Kaj kiom supozas Mastro Denetoro mian tutan forton kaj mian tutan rapidecon?

— Tion plej bone scias vi, mastro, — diris Hirgono. — Sed post nelonge povos okazi, ke Minaso Tirit estos ĉirkaŭbarita, kaj se vi ne estas sufiĉe forta por trableĉi sieĝon multpotencan, Mastro Denetoro ordonis al mi diri, ke laŭ lia prijugo la fortaj armiloj de la rohananoj pli utilos interne de liaj muroj ol ekstere.

— Sed li scias, ke nia popolo batalas prefere surĉevalo kaj en malfermiteco, kaj ankaŭ ke ni estas popolo disloĝanta kaj necesas tempo por kunigi niajn rajdistojn. Ĉu ne vere estas, Hirgono, ke la Mastro de Minaso Tirit scias pli, ol li inkluzivas en sia mesaĝo? Ĉar ni jam

militas, kiel vi eble vidis, kaj vi ne trovas nin tute senpreparaj. Gandalfo la Griza estis inter ni, kaj ĝuste nun ni kuniĝas por batalo en la oriento.

— Kion Mastro Denetoro eble scias aŭ konjektas, mi ne povas diri, — respondis Hirgono. — Sed efektive nia situacio estas danĝeriga. Mia Mastro ne sendas al vi iun ordonon, li nur petas, ke vi memoru la malnovan amikecon kaj votojn delonge diritajn, kaj por via propra prospero faru vian plejebulon. Estas raportite al ni, ke multaj reĝoj alrajdis el la oriento por servi al Mordoro. De la nordo ĝis la kampo de Dagorlado estas interbatiĝo kaj onidiroj pri milito. En la sudo haradanoj moviĝas, kaj timo inundis niajn marbordojn, tiel ke malmulte da helpo venos al ni de tie. Rapidu! Ĉar ĝuste antaŭ la muroj de Minaso Tirit la sorto de nia epoko estos decidita, kaj se la tajdo ne estos haltigita tie, poste ĝi trafluos ĉiujn belajn kampojn de Rohano, kaj eĉ en tiu ĉi Fortikaĵo inter la montetoj ne estos rifuĝejo.

— Mallumaj sciigoj, — diris Teodeno, — tamen ne tute nesupozitaj. Sed diru al Denetoro, ke eĉ se Rohano mem ne sentus danĝeron, ni tamen venus helpi lin. Sed nin trafis multaj perdoj en niaj bataloj kontraŭ la perfidulo Sarumano, kaj ni devas plu konsideri nian landlimon norde kaj oriente, kiel vidigas liaj propraj informoj. La granda potenco, kiun la Malluma Mastro nun ŝajnas disponi, eble povus haltigi nin en batalo antaŭ la urbo kaj tamen frapi grandforte trans la Riveron fore preter la Reĝa Pordo.

» Sed ni ne plu parolos, kiel konsilas la prudento. Ni venos. La apelo estas aranĝita por morgaŭ. Kiam ĉio estos ordigita, ni ekvojaĝos. Dek mil lancistojn mi eble povintus rajdigi tra la ebenaĵo por konsterni viajn malamikojn. Sed estos malpli multe, bedaŭrinde, ĉar mi ne volas lasi negarditaj miajn fortikaĵojn. Tamen almenaŭ ses mil rajdos post mi. Diru al Denetoro, ke ĉi-hore la Reĝo de Markio mem descendos al la lando Gondoro, kvankam eble li ne rajdos returnen. Sed ĝi estas vojo longa, kaj homoj kaj bestoj devos alveni la finon kun forto por la batalo. Eble pasos semajno ekde la morgaŭa mateno antaŭ ol vi aŭdos kriegon de la filoj de Eorlo proksimiĝanta el la nordo.

— Ĉu semajno! — diris Hirgono. — Se tiel devas esti, tiel estu. Sed vi probable trovos nur murojn ruinigitajn je sep tagoj de la nuno, krom se venos neatendite alia helpo. Nu, vi povos almenaŭ perturbi la orkojn kaj la brunhaŭtulojn, dum tiuj festos en la Blanka Turego.

— Ni faros almenaŭ tion, — diris Teodeno. — Sed mi mem ĵus

venis el batalo kaj longa vojaĝo, kaj mi iros nun ripozi. Restu ĉi tie ĉi-nokte. Poste vi rigardos la apelon de Rohano kaj forrajdos tiom pli ĝoja pro la vido, kaj pli rapide pro la ripozo. Konsiliĝoj plej trafas matene, kaj nokto ŝanĝas multajn aferojn.

Tion dirinte la reĝo stariĝis, kaj ĉiuj stariĝis.

— Iru nun ĉiu al sia ripozo, — li diris, — kaj dormu bone. Kaj vin, sinjoro Gajadoko, mi ne plu bezonas hodiaŭ nokte. Sed estu preta por mia alvoko tiel baldaŭ kiel la suno leviĝos.

— Mi estos preta, — diris Gaja, — eĉ se vi ordonos, ke mi rajdu kun vi laŭ la Padoj de l' Mortintoj.

— Ne parolu la vortojn aŭgurajn! — diris la reĝo. — Ĉar eble ekzistas pli ol unu vojo meritanta tiun nomon. Sed mi ne diris, ke mi ordonos al vi rajdi kun mi laŭ iu ajn vojo. Bonan nokton!

— Mi rifuzas postlasiĝi, ke oni retrovu min revenante! — diris Gaja. — Mi rifuzas postlasiĝi, mi rifuzas. — Kaj tion ripetante ĉiam denove al si, li finfine ekdormis en sia tendo.

Lin vekis homo, skuanta lin.

— Vekiĝu, vekigu, sinjoro Holbitlo! — kriis tiu, kaj finfine Gaja vekigis el profunda sonĝo kaj sidiĝis tikante. Ankoraŭ ŝajnas tre malhele, li pensis.

— Kio okazas? — li demandis.

— La reĝo vin alvokas.

— Sed la suno ankoraŭ ne leviĝis.

— Ne, kaj ne leviĝos hodiaŭ, sinjoro Holbitlo. Nek iam plu, oni supozus sub jena nuboj. Sed la tempo ne senmoviĝas, eĉ se la suno estas perdita. Rapidu!

Surmetinte kelkajn vestojn Gaja rigardis eksteren. La mondo estis malheleca. La aero mem ŝajnis bruna, kaj ĉio ĉirkaŭe estis nigra kaj griza kaj senombra. Regis plena senmoveco. Neniu nuboj videblis, krom eble fore en la okcidento, kie la plej malproksimaj palpantaj fingroj de la granda morno plu rampis antaŭen kaj trapenetris ilin iom da lumo. Supre pendis peza tegmento, sombra kaj senforma, kaj la lumo ŝajnis velki pli ol kreski.

Gaja vidis multajn personojn starantajn, suprenrigardantajn kaj murmurantajn; ĉies vizaĝoj estis grizaj kaj malĝojaj, kaj iuj timis. Kun peziĝanta koro li sin direktis al la reĝo. La gondora rajdisto Hirgono anticipis lin, kaj apud tiu nun staris alia viro simila al li kaj same

vestita, sed pli malalta kaj pli larĝa. Kiam Gaja eniris, tiu alparolis la reĝon.

— Ĝi venas el Mordoro, moŝto, — li diris. — Ĝi komenciĝis hieraŭ vespere je sunsubiro. El la montoj de Eostfaldo en via regno mi vidis ĝin leviĝi kaj trarampi la ĉielon, kaj tutnokte, dum mi rajdis, ĝi venis malantaŭe glutante la stelojn. Jam la nubego superombras la tutan teron inter ĉi tie kaj la Ombraj Montoj, kaj ĝi pliprofundiĝas. Milito jam komenciĝis.

Dum iom da tempo la reĝo sidis silenta. Fine li ekparolis:

— Do ni alvenas ĝin en la fino, la grandan batalon de nia epoko, en kiu forpasos multaj aferoj. Sed almenaŭ ne plu necesas kaŝiĝo. Ni rajdos laŭ la rekta kaj senŝirma vojo kaj per tuta nia rapido. La apelo komenciĝos jam tuj, kaj atendos neniun malfruanton. Ĉu en Minaso Tirit vi havas sufiĉe da provianto? Ĉar se ni devos nun rajdi plej haste, ni sekve devos rajdi senŝarĝe, kun nur sufiĉe da greno kaj akvo por nutri nin ĝisbatale.

— Ni havas grandan stokon jam longe preparitan, — respondis Hirgono. — Rajdu nun laŭeble senŝarĝe kaj rapide!

— Do alvoku la heroldojn, Eomero, — diris Teodeno. — La rajdistoj estu envicigitaj!

Eomero eliris, kaj baldaŭ la trumpetoj sonoris en la Fortikaĵo kaj ilin respondis multaj malsupre; sed ties voĉoj ne plu sonis klare kaj brave, kiel ili ŝajnis al Gaja la antaŭan vesperon. Obtuzaj ili ŝajnis kaj aspraj en la peza aero, henante sinistre.

La reĝo sin turnis al Gaja.

— Mi iras al milito, sinjoro Gajadoko, — li diris. — Tre baldaŭ mi ekvojaĝos. Mi liberigas vin el mia servado, sed ne el mia amikeco. Vi restos ĉi tie kaj, se vi volos, vi servos Damon Eovina, kiu regos la popolon anstataŭ mi.

— Sed, sed, mastro, — Gaja balbutis, — mi proponis al vi mian glavon. Mi ne volas esti disigita de vi, reĝo Teodeno. Kaj pro tio, ke ĉiuj miaj amikoj iris al la batalo, mi hontus resti malantaŭe.

— Sed ni rajdos sur ĉevaloj altaj kaj rapidaj, — diris Teodeno, — kaj malgraŭ tio, ke via koro estas granda, vi ne povos rajdi tiajn bestojn.

— Do ligu min al ies dorso, aŭ permesu al mi kroĉiĝi al ies piedingo, aŭ io. Estas longa vojo por kuranto, sed mi ja kuros, se mi ne

povos rajdi, eĉ se mi fortrivos miajn piedojn kaj alvenos semajnojn tro malfrue.

Teodeno ridetis.

— Prefere ol tio, mi kunportus vin sur Neĝkolaĵo, — li diris. — Sed vi almenaŭ rajdos kun mi ĝis Edoraso kaj rigardos al Meduseldo, ĉar tien mi iros. Ĝis tie povos vin porti Stibo: la granda vetkuro ne komenciĝos ĝis ni atingos la ebenaĵon.

Tiam Eovina stariĝis.

— Venu jam, Gajadoko! — ŝi diris. — Mi montros al vi la ekipaĵon, kiun mi preparis por vi. — Ili eliris kune. — Nur tiun ĉi peton starigis al mi Aragorno, — diris Eovina, dum ili trapasis inter la tendoj, — ke vi estu armita por la batalo. Tion mi konsentis laŭ miaj eblecoj. Ĉar mia koro diras al mi, ke vi bezonos tian ekipaĵon antaŭ la fino.

Ŝi kondukis Gajan al budo inter la loĝejoj de la reĝa gardistaro; kaj tie armilisto portis al ŝi malgrandan kaskon, rondan ŝildon kaj aliajn armaĵojn.

— Neniun maŝkirason ni havas, kiu povus adaptiĝi al vi, — diris Eovina, — nek tempon por forĝi tian maŝkirason; sed jen estas dika brustvesto el ledo, zono kaj ponardo. Glavon vi jam havas.

Gaja riverencis, kaj la damo montris al li la ŝildon, kiu similis la ŝildon donitan al Gimlio, kaj ĝi surhavis la insignon de la blanka ĉevalo.

— Prenu ĉion ĉi, — ŝi diris, — kaj portu ilin al bonfortuno! Adiaŭ jam, sinjoro Gajadoko! Ni eble tamen renkontiĝos denove, vi kaj mi.

Tiel okazis, ke en profundiĝanta sombro la Reĝo de Markio prepariĝis por konduki ĉiujn siajn rajdistojn laŭ la orienta vojo. Koroj pezis, kaj multaj timis en la ombro. Sed ili estis popolo severa, lojala al sia mastro, kaj malmulte da plorado aŭ murmurado aŭdiĝis, eĉ en la tendaro en la Fortikaĵo, kie loĝis la ekzilitoj el Edoraso, virinoj, infanoj kaj gemaljunuloj. Missorto ŝvebis super ili, sed ili frontis ĝin silente.

Pasis du rapidaj horoj, kaj nun la reĝo sidis sur sia blanka ĉevalo, ekbrilanta en la duonlumo. Fiera kaj alta li ŝajnis, malgraŭ tio, ke la haroj fluantaj sub lia alta kasko similis la neĝon; kaj multaj rigardis lin mire kaj kuraĝiĝis vidante lin malkliniĝa kaj sentima.

Tie sur la larĝaj ebenaĵoj apud la brua rivero estis ordigitaj en multaj trupoj preskaŭ kvincent kvin centoj da rajdistoj plenarmitaj, kaj pluraj centoj da aliuloj kun rezervaj ĉevaloj malpeze ŝarĝitaj. Unuopa

trumpeto sonoris. La reĝo levis sian manon, kaj tiam silente la armeo da markianoj ekiris. Unue iris dek du domanoj de la reĝo, renomaj rajdistoj. Poste sekvis la reĝo kun Eomero dekstre. Li jam adiaŭis al Eovina supre en la Fortikaĵo, kaj tiu memoro estis malĝojjiga; sed nun li turnis sian atenton al la vojo antaŭe. Malantaŭ li Gaja rajdis sur Stibo kun la mesaĝistoj de Gondoro, kaj pli malantaŭe alia dekduo de reĝaj domanoj. Ili preterpasis la longajn vicojn da atendantoj kun severaj kaj senemociaj vizaĝoj. Sed kiam ili preskaŭ alvenis la ekstremon de la vicoj, iu direktis rigardon akran al la hobito. Junulo, pensis Gaja reciproke rigardante, malpli alta kaj fortika ol la plimulto. Li konstatis ekbrilon de klaraj grizaj okuloj; kaj tiam li ektremetis, ĉar subite venis al li en la kapon, ke tio estas vizaĝo de persono senespera, kiu iras serĉi la morton.

Plu laŭ la griza vojo ili iris apud Neĝburno hastanta sur siaj ŝtonoj; tra la vilaĝetoj Subharo kaj Supraburno, kie multaj malgajaj virinaj vizaĝoj rigardis tra malhelaj pordejoj; kaj tiel sen korno aŭ harpo aŭ virvoĉa muziko la granda rajdado orienten komenciĝis, pri kiu okupiĝis la kantoj de Rohano dum multaj longaj homvivoj poste.

*El Dunharo en morna mateno
rajdis kun komandantoj fil' de Tengelo:
venis al Edoraso, l' antikvaj haloj
de l' limgardantoj nebulumitaj;
orajn labojn malhelo mantelis.
Li adiaŭis liberan popolon,
la tronon, fajrujojn, kaj lokojn sanktajn,
kie festadis li antaŭ krepusko.
Elrajdis la reĝo, tim' malantaŭe,
fato antaŭe. Li lojaladis
al votoj faritaj, ilin plenumis.
Teodeno elrajdis. Kvin noktojn kaj tagojn
al oriento rajdis eorlidoj
tra Foldo, Fenmarĉo kaj Firenarbaro,
ses mil lancoj al Sunlendingo,
Mundburgo potenca sub Mindoluino,
mar-reĝa urbo en suda reĝlando
sieĝata, fajr-ĉirkaŭita.
Sort' ilin pelis. Glutis mallumo
ĉevalojn kaj homojn; hufbatoj fore
sinkis silenten: rakontas la kantoj.*

Efektive en profundiganta malhelo venis la reĝo al Edoraso, kvankam temis nur pri tagmezo laŭhorloĝe. Tie li haltis nur mallonge kaj plifortigis sian armeon per ĉirkaŭ sesdeko da rajdistoj venintaj malfrue al la apelo. Nun manĝinte li pretigis sin denove por ekvojaĝi, kaj li afable adiaŭis sian eskviron. Sed Gaja lastfoje petegis, ke li ne estu apartigita.

— Jen ne estas vojaĝo por tiaj rajdbestoj kiaj Stibo, mi jam diris al vi, — diris Teodeno. — Kaj en tia batalo, kian ni intencas fari sur la kampoj de Gondoro, kion vi farus, sinjoro Gajadoko, kvankam vi estas glavmajstro kun pli da koro ol da staturato.

— Tiurilate kiu povas antaŭvidi? — respondis Gaja. — Sed kial, mastro, vi ricevis min kiel glavmajstron, se ne por resti ĉe via flanko? Kaj mi ne volas, ke oni diru pri mi en kantoj, ke mi ĉiam estis postlasita!

— Mi ricevis vin por sekurigi vin, — respondis Teodeno, — kaj ankaŭ por ke vi faru laŭ miaj eventualaj ordonoj. Neniu el miaj rajdistoj povos porti vin kiel ŝarĝon. Se la batalo okazus antaŭ miaj pordoj, eble viajn farojn rememorus la menestreloj, sed estas cent du leŭgoj ĝis Mundburgo, kie Denetoro regas. Pli mi ne diras.

Gaja riverencis kaj foriris malĝoje, kaj gapis al la vicoj da rajdistoj. Jam la trupoj estis pretiĝantaj por ekiro: viroj striktigis selzonojn, prizorgis la selojn, karesis siajn ĉevalojn; iuj maltrankvile rigardis la premantan ĉielon. Nerimarkite alvenis rajdisto kaj alparolis mallaŭte en la orelo de la hobito.

— *Kie emo ne mankas, liberiĝas vojo*, tiel ni diras, — li flustris; — kaj tion mi mem konstatis. — Gaja suprenrigardis kaj vidis, ke tiu estas la juna rajdisto, kiun li matene rimarkis. — Vi volas iri tien, kien iras la Mastro de Markio: mi vidas tion en via vizaĝesprimo.

— Vere, — diris Gaja.

— Do vi akompanos min, — diris la rajdisto. — Mi kunportos vin antaŭ mi, sub mia mantelo ĝis ni estos en malproksimo kaj jena malumo pli mallumos. Tian bonvolon oni ne rifuzu. Nenion plu diru al iu ajn, sed venu!

— Mi vere tre dankas! — diris Gaja. — Dankon, sinjoro, kvankam vian nomon mi ne scias.

— Ĉu ne? — diris la rajdisto mallaŭte. — Do nomu min Dernkasko.

Tiel okazis, ke kiam la reĝo ekvojaĝis, antaŭ Dernkasko sidis la hobito Gajadoko, kaj la griza ĉevalo Ventfola malzorgis pri la ŝarĝo;

ĉar Dernkasko malpli pezis ol multaj viroj, kvankam li estis supla kaj forme fortikeca.

Antaŭen en la ombbron ili rajdis. En la salikaj densejoj, kie Neĝburno fluis en Entvaŝon, je dek du leŭgoj oriente de Edoraso, oni biva-kis tiunokte. Kaj poste antaŭen denove tra Foldo; kaj tra Fenmarĉo, kie dekstre grimpis grandaj kverkejoj sur la montflankoj sub la ombroj de malhela Halifirieno apud la limoj de Gondoro; sed fore maldekstre nebuletoj surkuŝis la marĉojn kreitajn de la elfluejoj de Entvaŝo. Kaj dum ili rajdis, venis onidiroj pri milito en la nordo. Unuopuloj, sovaĝe rajdante, alportis sciigojn pri malamikoj atakantaj ilian orientan limon, pri orkamasoj marŝantaj en la steparo de Rohano.

— Rajdu plu! Rajdu plu! — kriis Eomero. — Tro malfrue jam por flankeniri. La marĉejoj de Entvaŝo devos gardi nian flankon. Nun rapidon ni bezonas. Rajdu plu!

Kaj tiel Reĝo Teodeno foriris el sia regno, kaj leŭgon post leŭgo la longa vojo forserpentumis, kaj la signalfajraj montetoj pretermarŝis: Kalenhado, Min-Rimono, Erelaso, Nardolo. Sed ties fajroj estis estingitaj. La tuta tereno estis griza kaj senmova; kaj ĉiam pli da ombro profundiĝis antaŭ ili, kaj espero malkreskis en ĉiu koro.

Ĉapitro 4

LA SIEĜO DE GONDORO

Grinĉjo estis vekita de Gandolfo. Kandeloj estis fajrigitaj en ilia ĉambro, ĉar tra la fenestroj venis nur malforta krepusko; la aero pezis kvazaŭ pro proksimiĝanta tondro.

— Kioma horo estas? — diris Grinĉjo oscedante.

— Post la dua horo, — diris Gandolfo. — Jam estas tempo ellitiĝi kaj ordigi vin. Vi estas vokita al la Mastro de la Urbo por ekscii viajn novajn devojn.

— Kaj ĉu li havigos matenmanĝon?

— Ne! Ĝin mi havigos: ĉion kion vi ricevos ĝis la tagmezo. Manĝaĵoj estas nun porciumataj laŭordone.

Grinĉjo rigardis malgaje la malgrandan panon kaj (laŭ lia opinio) tre nesufiĉan buterpecon, kiuj estis elmetitaj por li apud taso da maldensa lakto.

— Kial vi kondukis min ĉi tien? — li diris.

— Vi tre bone scias, — diris Gandolfo. — Por disigi vin de malutilo; kaj se ne plaĉas al vi esti ĉi tie, vi rajtas memori, ke vi tion mem trudis al vi.

Grinĉjo diris nenion plu.

Post nelonge li marŝis kun Gandolfo denove tra la malvarma koridoro al la pordo de la Turega Halo. Tie Denetoro sidis en griza sombro, kvazaŭ maljuna pacienca araneo, Grinĉjo pensis; li ŝajnis ne esti moviĝinta ekde la antaŭa tago. Li fingrovokis Gandalfon al seĝo, sed Grinĉjo daŭre staris dum kelka tempo malatentite. Fine la maljunulo turnis sin al li:

— Nu, sinjoro Peregrino, espereble vi utiligis hieraŭon por via profito, kaj agrable por vi? Tamen mi timas, ke la tablo en tiu ĉi urbo estas malpli ŝarĝita ol laŭ via deziro.

Grinĉjo sentis iom senkomforte, ke la plimulto de tio, kion li diris aŭ faris, estas iel konata al la Mastro de la Urbo, kaj cetere multo el tio, kion li pensis. Li nenion respondis.

— Kaj kion vi volas fari en mia servado?

— Mi supozis, mastro, ke vi difinos al mi miajn devojn.

— Tion mi faros, kiam mi ekscios por kio vi taŭgas, — diris Denetoro. — Sed tion mi ekscios plej frue, eble, se mi tenos vin apud mi. La eskviro de mia ĉambro petis permeson iri al la ekstera garnizono, do vi anstataŭos lin dum iom da tempo. Vi servos min, portos mesaĝojn, kaj parolos al mi, se la milito kaj konsiliĝo lasos al mi senokupan tempon. Ĉu vi scias kanti?

— Jes, — diris Grinĉjo. — Nu, jes, sufiĉe bone por mia propra popolo. Sed ni ne havas kantojn taŭgajn en halegoj kaj misepokoj, moŝto. Ni malofte kantas pri io pli terura ol vento aŭ pluvo. Kaj la plimultaj miaj kantoj temas pri aferoj, kiuj ridigas min; aŭ pri manĝado kaj trinkado, kompreneble.

— Kaj kial tiaj kantoj ne estu taŭgaj en miaj haloj, aŭ dum tiaj horoj kiaj la nunaj? Ĉu ni, kiuj vivis longe sub la Ombro, supozeble rajtas aŭskulti eĥojn el lando neĝenata de ĝi? Tiam ni povos senti, ke ne senfrukta estis nia maldormo, kvankam ĝi eble estis sendanka.

Grinĉjo deprimiĝis. Al li ne plaĉis la ideo kanti iun kanton el la Provinco al la Mastro de Minaso Tirit, certe ne la komikajn, kiujn li plej bone konis; tiuj estus tro, nu, kamparanecaj por tia okazo. Li estis tamen provizore liberigita de la turmento. Oni ne ordonis, ke li kantu. Denetoro turnis sin al Gandolfo, starigante demandojn pri la rohananoj kaj ties politiko kaj la situacio de Eomero, nevo de la reĝo. Grinĉjo miris pri kiom la Mastro verŝajne sciis pri popolo loĝanta tiel fore, kvankam certe, li pensis, pasis multaj jaroj post kiam Denetoro mem rajdis eksteren.

Baldaŭ Denetoro gestis al Grinĉjo kaj provizore forsendis lin.

— Iru al la armilejo de la Citadelo, — li diris, — kaj akiru tie la livreon kaj ekipaĵon de la Turego. Ĝi estos preta. Ĝi estis mendita hieraŭ. Revenu kiam vi estos vestita!

Okazis laŭ lia diro; kaj Grinĉjo baldaŭ trovis sin vestita per strangaj vestaĵoj, ĉiuj el nigro kaj arĝento. Li havis etan maŝkirason, kies ringoj estis forĝitaj el ŝtalo, eble, tamen gagate nigraj; kaj altvertan kaskon kun etaj korvflugiloj ambaŭflanke, inkrustitan per arĝenta stelo en la mezo de la cirkleto. Super la maŝo estis mallonga nigra kitelo, arĝente brodita en la centro je la emblemo de la Arbo. Liaj malnovaj vestoj estis falditaj kaj metitaj en tirkeston; al li estis permesate reteni nur la grizan mantelon de Lorieno, sed ne porti ĝin dumdejure. Li aspektis jam, se li nur sciis tion, kiel vera *Ernil i Pheriannath*, la

Princo de la Duonuloj, kiel la homoj nomis lin; sed li sentis sin nekomforta. Kaj la malhelo komencis deprimi lian spiriton.

Estis malhele kaj krepuske dum la tuta tago. Ekde la sensuna tagiĝo ĝis la vespero la peza ombro profundigis, kaj ĉiuj koroj en la Urbo estis deprimitaj. Altsupre granda nuboj moviĝis malrapide okcidenten el la Nigra Lando, vorante la lumon, portate sur vento de milito; sed sube la aero estis senmova kaj senspira, kvazaŭ la tuta valo de Anduino atendus la atakon de ruiniga ŝtormo.

Ĉirkaŭ la dek-unua horo, liberigite finfine de deĵorado dum iom da tempo, Grinĉjo elvenis kaj iris serĉi manĝaĵon kaj trinkaĵon por gajigi sian pezan koron kaj igi pli subtenebla sian atendotaskon. En la manĝejo li renkontis denove Beregondon, kiu ĵus revenis post komisiono trans Pelenoro al la gardoturoj sur la ĉefvojo. Kune ili elpromenis al la muroj; ĉar interne Grinĉjo sentis sin enkarcerigita, kaj sufokita eĉ en la altplafona citadelo. Nun ili sidis flankalflanke denove en la niĉo frontanta orienten, kie la antaŭan tagon ili manĝis kaj interparolis.

Estis la sunsubira horo, sed la granda vualo jam etendiĝis foren al la okcidento, kaj nur kiam ĝi sinkis fine en la maron la suno eskapis por elsendi mallongan adiaŭan ekbrilon antaŭ la nokto, samkiel Frodo vidis ĝin ĉe la Krucvojo tuŝanta la kapon de l' falinta reĝo. Sed al la kampoj de Pelenoro, sub la ombro de Mindoluino, venis neniu ekbrilo: ili estis brunaj kaj mornaj.

Jam ŝajnis al Grinĉjo, ke pasis jaroj post kiam li sidis tie antaŭe, en iu duonforgesita tempo, kiam li ankoraŭ estis hobito, facilanima vaganto malmulte tuŝata de la trapasitaj danĝeroj. Nun li estis unuopa soldateto en urbo preparanta sin por granda atako, vestita en la fiera sed sombra maniero de la Garda Turego.

En aliaj tempo kaj loko eble plaĉus al Grinĉjo la nova vesto, sed li nun sciis, ke li ne partoprenas ludon; li estis tute serioze servisto de mastro severa en plej grava danĝero. La maŝkiraso estis peza ŝarĝo, kaj la kasko pezis sur lia kapo. La mantelon li flankenĵetis sur la sidlokon. Li forturnis siajn lacajn okulojn de la mallumaj kampoj sube kaj oscedis, kaj poste li suspiris.

— Vi laciĝis pri tiu ĉi tago, ĉu? — diris Beregondo.

— Jes, — diris Grinĉjo, — tre. Laciĝis pro neniofarado kaj atendado. Mi sentaskadis antaŭ la pordo de l' ĉambro de mia mastro dum multaj malrapidaj horoj, dum li debatis kun Gandolfo kaj la princo kaj

aliaj eminentuloj. Kaj mi ne kutimas, mastro Beregondo, servadi mal-sata aliajn dum ili manĝas. Tio terure streĉas hobiton. Sendube vi opinias, ke mi devus tiom pli konsciiĝi pri la honoro. Sed por kio taŭgas tia honoro? Efektive por kio taŭgas manĝaĵo kaj trinkaĵo sub tiu ĉi rampanta ombro? Kion ĝi signifas? La aero mem ŝajnas densa kaj bruna! Ĉu vi ofte spertas tiajn mornojn kiam la vento venas el la oriento?

— Ne, — diris Beregondo, — tio ne estas vetero de la mondo. Tio estas elpenaĵo de lia malico, iu kirlaĵo de fumo el la Fajromonto, kiun li sendas por malheligi korojn kaj kapojn. Kaj tion ĝi ja faras. Mi volas, ke mastro Faramiro revenu. Lin tio ne malesperigus. Sed nun, kiu scias, ĉu li iam revenos trans la Riveron el la mallumo?

— Jes, — diris Grinĉjo, — ankaŭ Gandolfo maltrankviliĝas. Lin desapontis, ŝajnas al mi, ne trovi Faramiron ĉi tie. Kaj kien li mem iris? Li forlasis la konsiliĝon ĉe la Reganto antaŭ la tagmeza manĝo, kaj cetere, ne bonhumora, laŭ mia opinio. Eble li antaŭscias pri malbona novaĵo.

Subite dum la interparolo ili mutiĝis, kvazaŭ glaciigintaj je aŭskultaj ŝtonoj. Grinĉjo kaŭris kun la manoj premitaj al siaj oreloj; sed Beregondo, kiu dumparole pri Faramiro elrigardis trans la remparon, restis tie rigidiĝante, gapante per la apertegaj okuloj. Grinĉjo rekonis la tremigan krion, kiun li aŭdis: ĝi estis tiu sama, kiun li antaŭlonge aŭdis en la Mariŝo de la Provinco, sed jam ĝi estis kreskinta potence kaj malamplene, trapikante la koron per venena malespero.

Fine Beregondo parolis peneg:

— Ili jam venis! Ekkuraĝu kaj rigardu! Sube estas misegaĵoj.

Malvolonte Grinĉjo grimpis sur la sidlokon kaj elrigardis trans la muron. Pelenoro kuŝis malklare sub li, forvelkante en la foron ĝis la apenaŭ divenebla linio de la Granda Rivero. Sed nun, girantajn rapide trans tiun, kvazaŭ ombrojn de mistempa nokto, li vidis sube en la meza aero grandajn birdsimilajn figurojn, hidajn kiel kadavromanĝuloj tamen pli grandajn ol agloj, tiel kruelajn kiel la morto. Jen ili alflugis proksimen, riskante preskaŭ pafdistance de la muroj, jen ili forcirkkis.

— Nigraj Rajdantoj! — murmuris Grinĉjo. — Nigraj Rajdantoj de la aero! Sed vidu, Beregondo! — li kriis. — Ili serĉas ion, ĉu ne? Vidu kiel ili giras kaj plonĝas, ĉiam direkte al iu punkto tie! Kaj ĉu vi vidas ion moviĝi sur la tero? Etaj malhelaĵoj. Jes, homoj sur ĉevaloj: kvar aŭ kvin. Aĥ! Mi ne toleras tion! Gandolfo! Gandolfo savu nin!

Alia longa kriĉo leviĝis kaj malleviĝis, kaj li retroĵetis sin denove disde la muro, anhelante kvazaŭ ĉasata besto. Li aŭdis veni de sube sonon de trumpeto, mallaŭtan kaj ŝajne foran en tiu vibra kriego, finiĝantan per longa alta noto.

— Faramiro! Mastro Faramiro! Jen lia signalo! — ekkriis Beregondo. — Brava koro! Sed kiel li atingu la Pordegon, se tiuj fiaj inferakcipitroj havas aliajn armilojn krom timo? Sed vidu! Ili eltenas. Ili alvenos la Pordegon. Ne! la ĉevaloj diskuras freneze. Vidu! la homoj estas elseligitaj; ili kuras surpiede. Ne, unu ankoraŭ surselas, sed li retrorajdas al la ceteraj. Tiu nepre estas la komandanto: li scias mastri tiel bestojn kiel homojn. Ha! jen unu el tiuj fiaĵoj plonĝas al li. Helpon! helpon! Ĉu neniu eliros al li? Faramiro!

Tion dirinte, Beregondo saltis for kaj kuris en la malhelon. Hontante pri sia teruriĝo, dum Beregondo pensis unuavice pri la amata komandanto, Grinĉjo supreniris kaj elgapis. Tiumomente li ekvidis ekbrilon de blanko kaj arĝento venanta el la nordo, kiel eta stelo suben al la krepuskaj kampoj. Ĝi moviĝis sagrapide kaj pligrandiĝis dum la veno, konverĝante rapide kun la fuĝo de la kvar homoj al la Pordego. Ŝajnis al Grinĉjo, ke pala lumo disvastiĝas ĉirkaŭ ĝi, kaj la pezaj ombroj cedas antaŭ ĝi; kaj poste kiam ĝi proksimiĝis, li supozis aŭdi, kvazaŭ eĥon inter la muroj, vokadon de forta voĉo.

— Gandolfo! — li kriis. — Gandolfo! Li ĉiam aperas, kiam la aferoj plej mallumas. Antaŭen! Antaŭen, Blanka Rajdanto! Gandolfo! Gandolfo! — li kriis senrezerve, kiel spektanto ĉe grava vetkuro urĝanta kuranton, kiu estas ekster atingo de kuraĝigo.

Sed la malhelaj flugantaj ombroj konsciĝis pri la nova veninto. Unu direktiĝis al li, sed ŝajnis al Grinĉjo, ke li levis sian manon, el kiu radio de blanka lumo pikis supren. La nazgulo eligis longan ululan krion kaj flankeniĝis; kaj post tio la kvar aliaj iom hezitis kaj, rapide spirallante supren, foriris orienten, malaperante en la minacan nubaron supre; kaj sube sur Pelenoro ŝajnis provizore pli hele.

Grinĉjo daŭre spektis, kaj li vidis la rajdiston kaj la Blankan Rajdanton renkontiĝi kaj halti, atendante la piedirantojn. Homoj jam rapidis al ili el la Urbo; kaj baldaŭ ĉiuj el la vido forpasis sub la eksteraj muroj, kaj li sciis, ke ili eniras la Pordegon. Konjektante ke ili tuj venos al la Turego kaj la Reganto, li rapidis al la citadela enirejo. Tie aliĝis al li multaj aliaj, kiuj spektis de la altaj muroj la vetkuron kaj la saviĝon.

Post nelonge aŭdiĝis bruego sur la stratoj kondukantaj supren de la eksteraj cirkloj, kaj okazis multe da huraado kaj kriado de la nomoj

Faramiro kaj Mitrandiro. Baldaŭ Grinĉjo vidis torĉojn, kaj sekvataj de homamasoj du rajdistojn rajdantajn malrapide: unu estis blanka sed ne plu brila, pala en la krepusko kvazaŭ lia fajro estus estingita aŭ vualita; la alia estis malhela kaj lia kapo estis klinita. Ili elseliĝis, kaj dum ĉevalzorgantoj forkondukis Ombrofikson kaj la alian ĉevalon, ili marŝis antaŭen al la sentinelo ĉeporda: Gandolfo sensancele, kun la griza mantelo retroŝovita kaj ardo daŭre subbrula en la okuloj; la alia, vestita tute en verdo, malrapide, iom ŝanceliĝe kiel homo laca aŭ vundita.

Grinĉjo premis sin antaŭen, kiam ili pasis sub la lampo malsupre de la porda arko, kaj vidante la palan vizaĝon de Faramiro li enspiris abrupte. Tio estis vizaĝo de iu, kiu estis atakita de granda timo aŭ turmentiĝo, sed jam estris ĝin kaj estis nun kvietita. Fiera kaj seriozega li staris, dum li alparolis la sentinelon, kaj Grinĉjo vidis, kiel proksime li similis sian fraton Boromiro, kiun ŝatis Grinĉjo dekomence, admirante la majestatan sed bonkoran sintenon de la grandulo. Tamen subite pri Faramiro lia koro estis strange emociita pro sento, kiun li ne konis antaŭe. Jen estis iu kun tia mieno de alta nobleco, kian Aragorno kelkfoje vidigis, eble malpli alta, tamen ankaŭ malpli netaksebla kaj forceca: unu el la reĝoj de la homoj naskiĝinta pli malfrue, sed tuŝita de la saĝo kaj malĝojo de la Pliaga Raso. Li nun sciis, kial Beregondo elparolis ties nomon ameme. Li estis komandanto obeota de viroj, obeota ankaŭ de li, eĉ sub la ombro de la nigraj flugiloj.

— Faramiro! — li kriis laŭte kun la ceteraj. — Faramiro!

Kaj Faramiro, rimarkante lian fremdan voĉon en la bruado de la urbanoj, turniĝis kaj rigardis suben al li kaj estis mirigita.

— De kie vi venis? — li diris. — Duonulo, kaj en la livreo de la Turego! De kie?..

Sed tiumomente Gandolfo paŝis al lia flanko kaj parolis:

— Li venis kun mi el la lando de la duonuloj. Li venis kun mi. Sed ne prokrastu ĉi tie. Multo estas dirota kaj farota, kaj vi estas laca. Li akompanos nin. Fakte li devos tion fari, ĉar se li ne forgesas siajn novajn devojn pli facile ol mi, li devos ĉeesti sian mastron dum la nuna horo. Venu, Grinĉjo, sekvu nin!

Do fine ili atingis la privatan ĉambron de la Mastro de l' Urbo. Tie profundaj seĝoj estis metitaj ĉirkaŭ braĝujo; kaj vino estis alportita; kaj tie Grinĉjo, apenaŭ rimarkita, staris malantaŭ la seĝo de Denetoro kaj spertis malmulte sian lacon, ĉar li avide aŭskultis ĉion diratan.

Kiam Faramiro jam manĝis blankan panon kaj trinkis iomete da vino, li sidiĝis sur malalta seĝo maldekstre de sia patro. Iomete pli fore aliflanke sidis Gandolfo sur seĝo el ĉizita ligno; kaj komence li ŝajnis dormanta. Ĉar komence Faramiro parolis nur pri la komisio, pro kiu li estis elsendita antaŭ dek tagoj, kaj li alportis informojn pri Itilio kaj la movoj de la malamiko kaj ties aliancanoj; kaj li rakontis pri la batalo sur la vojo, kiam la haradanoj kaj ties granda besto estis venkitaj: komandanto raportanta al sia mastro tiajn aferojn, kiaj estis ofte aŭditaj pli frue, malgravaj aferetoj en limlanda milito, kiu jam ŝajnis senutila kaj bagatela, senigitaj de la renomo.

Tiam subite Faramiro rigardis al Grinĉjo kaj diris:

— Sed nun ni alvenas aferojn strangajn. Ĉar tiu ĉi ne estas la unua duonulo, kiun mi vidis marŝi el la nordaj legendoj en la Sudlandon.

Je tio Gandolfo rektiĝis kaj kaptis la apogilojn de sia seĝo; sed li diris nenion, kaj per rigardo mutigis la ekkrion sur la lipoj de Grinĉjo. Denetoro rigardis iliajn vizaĝojn kaj balancis la kapon, kvazaŭ signante ke li konstatis multon antaŭ ol io estis eldirita. Malrapide, dum la aliaj sidis silentaj kaj senmovaj, Faramiro rakontis sian historion, kun la okuloj direktitaj plejparte al Gandolfo, kvankam de tempo al tempo lia ekrigardo flanketurniĝis al Grinĉjo, kvazaŭ por refreŝigi sian memoron pri aliaj, kiujn li vidis.

Dum disvolviĝis lia rakonto pri la renkontiĝo kun Frodo kaj ties servanto kaj pri la okazaĵoj ĉe Heneto Anun, Grinĉjo konsciiĝis, ke la manoj de Gandolfo tremas kroĉante la ĉizitan lignaĵon. Blankaj ili jam ŝajnis kaj tre maljunaj, kaj rigardante ilin, Grinĉjo konstatis kun ekflago de timo, ke Gandolfo, eĉ Gandolfo, estas perturbita, eĉ timanta. La aero en la ĉambro estis prema kaj senmova. Kiam fine Faramiro parolis pri sia disiĝo de la vojaĝantoj kaj ties decido iri al Cirito Ungol, lia voĉo malfortiĝis, kaj li skuis sian kapon kaj suspiris. Tiam Gandolfo saltleviĝis.

— Ĉu Cirito Ungol? Morgula Valo? — li diris. — Kiam, Faramiro, kiam? Kiam vi disiĝis de ili? Kiam ili alvenus tiun malbenitan valon?

— Mi disiĝis de ili matene antaŭ du tagoj, — diris Faramiro. — De tie estas dek kvin leŭgoj ĝis la valo de Morgulduino, se ili iris rekte suden; kaj tiam ili estus ankoraŭ je kvin leŭgoj okcidente de la malbenita Turego. Plej rapide ili ne povus alveni tien antaŭ hodiaŭ, kaj eble ili ankoraŭ ne alvenis tien. Efektive mi komprenas, kion vi timas. Sed la mallumo ne rezultas de ilia aventuro. Ĝi komenciĝis hieraŭ vespere, kaj la tuta Itilio troviĝis sub la ombro hieraŭ nokte. Estas klare al

mi, ke la Malamiko jam delonge planis atakon kontraŭ nin, kaj ties horo jam estis decidita antaŭ ol la vojaĝantoj lasis mian gardadon.

Gandalfo paŝadis sur la planko.

— La mateno de antaŭ du tagoj, preskaŭ tri tagoj da vojaĝado! Kiom malproksimas la loko, kie vi disiĝis?

— Ĉirkaŭ dudek kvin leŭgoj laŭ birda flugo, — respondis Faramiro. — Sed mi ne povis veni pli rapide. Hieraŭ vespere mi bivakis ĉe Kairo Andros, tiu longa insulo en la Rivero norde, kiun ni defendas; kaj ĉevaloj estas tenitaj sur la ĉi-flanka bordo. Kiam la mallumo plifortiĝis, mi sciis, ke necesas rapido, do mi rajdis de tie kun tri aliaj, por kiuj ankaŭ troviĝis ĉevaloj. La restaĵon de mia trupo mi sendis suden por plifortigi la garnizonon ĉe la travadejoj de Osgiliado. Esperable mi ne faris mise? — Li rigardis sian patron.

— Ĉu mise? — kriis Denetoro, kaj liaj okuloj flagris subite. — Kial vi demandas? La viroj estis sub via komando. Aŭ ĉu vi petas mian prijuĝon rilate ĉiujn viajn agojn? Via sinteno estas humila en mia ĉeesto, tamen jam delonge vi ne deviis de la propra vojo pro miaj konsiloj. Vidu, vi parolis lerte, kiel ĉiam; sed mi, ĉu mi ne vidis vian okulon turnita al Mitrandiro, por elserĉi, ĉu vi parolis bone aŭ tro multe? Li delonge kaptis vian koron. Filo mia, via patro estas maljuna, sed ankoraŭ ne kaduka. Mi povas vidi kaj aŭdi, kiel mi kutimis; kaj malmulto el tio, kion vi duone esprimis aŭ lasis neesprimita, estas nun kaŝita antaŭ mi. Mi konas la solvon de multaj enigmoj. Ve, ve pri Boromiro!

— Se al vi malplaĉas tio, kion mi faris, patro mia, — diris Faramiro kviete, — mi dezirus koni vian konsilon antaŭ ol la ŝarĝo de tiom peza decido estis donita al mi.

— Ĉu tio sufiĉus por ŝanĝi vian decidon? — diris Denetoro. — Vi plu farus tute same, laŭ mia opinio. Mi tre bone konas vin. Ĉiam vi deziras aspekti majeste kaj malavare kiel reĝo de l' pratempo, degna kaj ĝentila. Tio eble taŭgas por iu altrasa, kiu sidas en potenco kaj paco. Sed dum horoj krizaj ĝentilecon eble repagos morto.

— Tiel estu, — diris Faramiro.

— Ĉu tiel estu! — kriis Denetoro. — Sed ne nur via morto, mastro Faramiro: la morto ankaŭ de via patro, kaj de via tuta popolo, kiujn protekti estas jam via rolo, post la forpaso de Boromiro.

— Ĉu vi deziras do, ke niaj lokoj estus interŝanĝitaj?

— Jes, tion mi ja deziras, ĉar Boromiro estis lojala al mi kaj ne estis lernanto de iu sorĉisto. Li memorus la bezonon de sia patro kaj

ne malŝparus tion, kion donis la sorto. Li alportus al mi la potencan donacon.

Momente la sinrego de Faramiro cedis.

— Mi petas vin, patro mia, memori kial okazis, ke mi, ne li, estis en Itilio. Je minimume unu okazo via konsilo venkis, antaŭnelonge. Ĝuste la Mastro de la Urbo donis al li tiun komision.

— Ne kirlu la feĉon en la taso, kiun mi miksis por mi mem, — diris Denetoro. — Ĉu mi ne gustis tion sur mia lango jam multajn noktojn, anticipante ke en la feĉo kaŝiĝas io eĉ pli malbona? Kiel nun mi efektive konstatas, ke tiel ne devis esti! Ke tiu aĵo devus esti veninta al mi!

— Konsolu vin! — diris Gandolfo. — Neniel Boromiro alportus al vi ĝin. Li estas mortinta, kaj mortis brave. Li dormu en paco! Tamen vi trompas vin. Li elstreĉus sian manon al tiu aĵo, kaj kaptinte ĝin li falus. Li retenus ĝin al si, kaj kiam li revenus, vi ne rekonus vian filon.

La vizaĝo de Denetoro rigidiĝis malmole kaj malvarme.

— Vi trovis Boromiron malpli lernema sub via mano, ĉu ne? — li diris mallaŭte. — Sed mi, lia patro, diras, ke li alportus ĝin al mi. Vi estas saĝa, eble, Mitrandiro, tamen malgraŭ ĉiuj viaj subtilaĵoj, vi ne posedas la tutan saĝecon. Troveblas solvoj, kiuj estas nek la araneajoj de sorĉistoj nek la rapidemo de stultuloj. Mi havas pri tiu ĉi afero pli da sperto kaj saĝo ol vi supozas.

— Kia estas do via saĝo? — demandis Gandolfo.

— Sufiĉa por percepti, ke du stultaĵoj estas evitendaj. Uzi tiun aĵon estas danĝeroplene. Je tiu ĉi horo sendi ĝin en la manoj de sensagaca duonulo al la lando de la Malamiko mem, kiel faris vi kaj jena filo mia, tio estas frenezaĵo.

— Kaj kion farus Reganto Denetoro?

— Neniun el ambaŭ. Sed plej certe ne pro iu ajn argumento li metus tiun aĵon al risko preter ĉio krom la espero de stultulo, riskante nian kompletan ruiniĝon se la Malamiko rehavos tion, kion li perdis. Ne, ĝi devus esti retenita, kaŝita, kaŝita en mallumo kaj profundo. Ne uzota, mi diras, krom ĉe la lasta ekstremo de bezono, sed metita for de lia kroĉo, krom post venko tiel finfina, ke tio, kio okazos poste, ne tuŝus nin ĉar ni mortus.

— Vi pensas laŭ via kutimo, moŝto, nur pri Gondoro, — diris Gandolfo. — Tamen ekzistas aliaj homoj kaj aliaj vivoj, kaj tempo ankoraŭ estos. Kaj miaflanke, mi kompatas eĉ liajn sklavojn.

— Kaj kie aliaj homoj trovos helpon, se Gondoro falos? — respondis Denetoro. — Se mi nun havus tiun aĵon en iu el la profundaj keloj

de tiu ĉi citadelo, ni ne tremus terurite sub tiu ĉi malhelo, timante la plej malbonan, kaj niaj konsiliĝoj estus neperturbitaj. Se vi ne fidas, ke mi tolerus la provon, vi ankoraŭ ne konas min.

— Malgraŭ ĉio mi vin ne fidas, — diris Gandolfo. — Se mi fidus, mi povus sendi tiun aĵon ĉi tien al via gardado kaj ŝparus al mi mem kaj al aliaj multe da angoro. Kaj nun, aŭdinte vian parolon, mi fidas vin malpli, ne pli ol Boromiron. Ne, regu vian koleron! Min mem mi ne fidas en ĉi afero, kaj mi rifuzis tiun aĵon, eĉ kiel donacon libere donitan. Vi estas forta kaj pri certaj aferoj ankoraŭ kapablus regi vin, Denetoro; tamen se vi ricevus tiun aĵon, ĝi venkus vin. Eĉ se ĝi estus enterigita sub la radikoj de Mindoluino, ĝi tamen forbruligus vian menson, kiel kreskas la mallumo, kaj la aferoj ankoraŭ pli malbonaj sekvus, kiuj baldaŭ trafos nin.

Momente la okuloj de Denetoro denove ardis, kiam li frontis al Gandolfo, kaj Grinĉjo sentis denove la streĉitecon inter iliaj volo; sed nun ŝajnis preskaŭ ke iliaj rigardoj estas rapiroj de okulo al okulo, flagrantaj dum la skermado. Grinĉjo tremis timante iun teruran baton. Sed subite Denetoro malstreĉiĝis kaj denove malardiĝis. Li ŝultrotiris.

— Se mi us! Se vi us! — li diris. — Tiaj vortoj kaj seoj vanas. Ĝi eniris la ombron, kaj nur la tempo montros, kia sorto atendas ĝin kaj nin. Tiu tempo ne estos longa. En la restaĵo, ĉiuj, kiuj siamaniere batalas kontraŭ la Malamiko, unuiĝu, kaj esperu dum tio eblos, kaj post la espero ankoraŭ kuraĝu morti liberaj. — Li turnis sin al Faramiro. — Kion vi opinias pri la garnizono ĉe Osgiliado?

— Ĝi ne estas forta, — diris Faramiro. — Mi sendis la trupon de Itilio por plifortigi ĝin, kiel mi jam diris.

— Ne sufiĉos, ŝajnas al mi, — diris Denetoro. — Ĝuste tie falos la unua bato. Oni bezonos tie iun bravan komandanton.

— Tie kaj en multaj aliaj lokoj, — diris Faramiro kaj ĝemspiris. — Ve pri mia frato, kiun ankaŭ mi amis! — Li stariĝis. — Ĉu vi permesas, patro?

Kaj tiam li ŝanceliĝis kaj apogis sin al la seĝo de la patro.

— Vi estas laca, mi vidas, — diris Denetoro. — Vi rajdis rapide kaj longe, kaj sub misombroj en la aero, oni diris al mi.

— Pri tio ni ne parolu! — diris Faramiro.

— Do ni ne parolos, — diris Denetoro. — Iru nun kaj ripozu laŭeble. La neceso morgaŭ estos pli severa.

Ĉiuj nun forlasis la Mastron de la Urbo kaj iris ripozi, dum tio ankoraŭ eblis. Ekstere estis senstela mallumo, dum Gandalfo kun Grinĉjo, apude portanta malgrandan torĉon, vojis al sia loĝejo. Ili ne parolis ĝis kiam ili estis malantaŭ fermitaj pordoj. Tiam finfine Grinĉjo kaptis la manon de Gandalfo.

— Diru al mi, ĉu ekzistas iu espero? Rilate Frodon, mi volas diri; aŭ almenaŭ ĉefe rilate Frodon.

Gandalfo metis manon sur la kapon de Grinĉjo.

— Neniam estis multe da espero, — li respondis. — Nur espero de stultulo, kiel oni diris al mi. Kaj kiam mi aŭdis pri Cirito Ungol... — Li interrompis sin kaj paŝis al la fenestro, kvazaŭ liaj okuloj kapablus trapiki la nokton oriente. Li murmuris: — Cirito Ungol! Kial tiuvoje, mi scivolas? — Li turniĝis. — Ĝuste nun, Grinĉjo, mia koro preskaŭ krevis, aŭdinte tiun nomon. Kaj tamen mi opinias vere, ke la novaĵo alportita de Faramiro portas en si iom da espero. Ĉar ŝajnas klare, ke nia Malamiko finfine ekmilitis kaj faris la unuan movon, dum Frodo ankoraŭ liberas. Do dum multaj tagoj ekde nun lia okulo turniĝos tien kaj reen, for de la propra lando. Kaj tamen, Grinĉjo, mi sentas defore lian haston kaj lian timon. Li komencis pli frue ol li volus. Okazis io por instigi lin.

Gandalfo staris momente en pensado.

— Eble, — li murmuris. — Eble helpis eĉ via stultaĵo, knabo mia. Mi pripensu: jam antaŭ proksimume kvin tagoj li certe malkovris, ke ni venkis Sarumanon kaj prenis la Ŝtonon. Sed kiel gravis? Ni ne povus ĝin uzi tre utile, nek sen lia ekscio. Ha, mi scivolas. Ĉu Aragorno? Proksimiĝas lia horo. Kaj li estas forta kaj firma kiel fundamento, Grinĉjo; kuraĝa, sensancela, kapabla agi laŭ propra volo kaj riskegi, se necese. Eble pro tio. Li eble utiligis la Ŝtonon kaj montris sin al la Malamiko, defiante lin, ĝuste tiucele. Mi scivolas. Nu, la respondon ni ne ricevos ĝis venos la rajdistoj de Rohano, se ili venos ne tro malfrue. Antaŭ ni estas tagoj malbonegaj. Ni dormu, dum ni tion povas!

— Sed, — diris Grinĉjo.

— Sed kio? — demandis Gandalfo. — Nur unu *sedon* mi permesos ĉi-nokte.

— Golumo, — diris Grinĉjo. — Kiel okazas, ke ili vojaĝas *kun* li, eĉ sekvas lin? Kaj mi konstatis, ke al Faramiro ne pli ol al vi plaĉis la loko, al kiu li kondukas ilin. Kio misas?

— Tion mi ne povas respondi nun, — diris Gandalfo. — Tamen mia koro konjektis, ke Frodo kaj Golumo renkontiĝos antaŭ la fino.

Por bono aŭ malbono. Sed pri Cirito Ungol mi ne parolos hodiaŭ nokte. Perfidon, perfidon mi timas; perfidon far tiu mizera kreaĵo. Sed tiel devas esti. Ni memoru, ke perfidulo povas perfidi sin mem kaj okazigi bonon senintence. Povas esti tiel, kelkfoje. Bonan nokton!

La posta tago venis per mateno simila al bruna krepusko, kaj la homaj koroj, provizore levitaj pro la reveno de Faramiro, denove perturbiĝis. La flugilhavaj kreaĵoj ne estis viditaj tiutage, tamen de tempo al tempo, alte super la urbo, aŭdiĝis mallaŭta krio, kaj multaj, kiuj aŭdis tion, staris frapite de pasema timego, dum la malpli kuraĝaj kunpremiĝis kaj ploris.

Kaj nun Faramiro denove foriris.

— Oni permesis al li neniom da ripozo, — iuj murmuris. — La Mastro tro senindulge pelas sian filon, kaj nun li devas plenumi la devon de du, de li kaj de tiu, kiu ne revenos.

Kaj ĉiam la homoj rigardis norden, demandante:

— Kie estas la rajdistoj de Rohano?

Fakte Faramiro ne iris propravole. Sed la Mastro de la Urbo estis estro de sia konsilio, kaj tiutage li ne havis humoron sin klini antaŭ aliaj. En la frumateno la konsilio estis kunvokita.

Tie ĉiuj komandantoj taksis, ke pro la minaco en la sudo ilia forto ne sufiĉas por entrepreni militagadon propraflanke, krom se hazarde la rajdistoj de Rohano tamen venus. Dume ili devos gardostari sur la muroj kaj atendi.

— Malgraŭ ĉio, — diris Denetoro, — ni ne devus tro facilanime forlasi la eksterajn defendejojn de Ramaso, kiuj estis konstruitaj per tiom da laborego. Kaj la Malamiko devos pagi multekoste la transiron de la Rivero. Tion li ne povos fari sufiĉe multnombre por ataki la Urbon, ĉu norde de Kairo Andros pro la marĉoj, ĉu sude en la direkto de Lebenino pro la larĝeco de la Rivero, kiu postulas multajn boatojn. Ĝuste ĉe Osgiliado li lokigos sian pezon, kiel pli frue, kiam Boromiro rifuzis al li la trapason.

— Tio estis nura esploro, — diris Faramiro. — Hodiaŭ ni eble pagigus dekoble la malamikon pli ol nin ĉe la pasejo kaj tamen bedaŭrus la interŝanĝon. Ĉar li malpli damaĝe por si perdis armeon ol ni perdis trupon. Kaj la retreto de tiuj, kiujn ni elmetos sur la fora kampo, estos danĝeroplena, se li sukcesos multnombre transiri.

— Kaj kio pri Kairo Andros? — diris princo Imrahilo. — Ankaŭ tiu devos esti defendata, se oni defendos Osgiliadon. Ni ne forgesu la

danĝeron je nia maldekstro. La rohananoj eble venos, eble ne. Sed Faramiro sciigis nin pri grandaj fortoj senĉese alirantaj la Nigran Pordegon. Pli ol unu armeo eble eliros tra ĝi, kaj celos pli ol unu trapasejon.

— Multo estas riskenda dum milito, — diris Denetoro. — En Kairo Andros jam estas soldatoj, kaj neniam pli oni povas sendi tiel foren. Sed mi ne cedos senbatale la Riveron kaj Pelenoron, dum ankoraŭ estas komandanto ĉi tie, kiu plu kuraĝas agi laŭ la volo de sia estro.

Poste ĉiuj silentis. Sed finfine Faramiro diris:

— Mi ne kontraŭas vian volon, moŝto. Ĉar rabita al vi estas Boro-miro, mi iros kaj faros laŭ mia eblo anstataŭ li, se vi tion ordonas.

— Mi ordonas, — diris Denetoro.

— Do, adiaŭ! — diris Faramiro. — Sed se mi revenos, pensu pli favore pri mi!

— Tio dependos de la maniero de via reveno, — diris Denetoro.

Gandolfo la lasta parolis al Faramiro, antaŭ ol tiu rajdis orienten.

— Ne forĵetu vian vivon malprudente aŭ pro amareco, — li diris.

— Vi estas bezonata ĉi tie por aliaj aferoj krom milito. Via patro amas vin, Faramiro, kaj tion memoros antaŭ la fino. Adiaŭ!

Do nun estro Faramiro estis for denove, kaj kunprenis tiom da viroj, kiom konsentis iri aŭ estis malhaveblaj. Sur la muroj iuj rigardis tra la malhelo al la ruinigita urbo, kaj ili scivolis kio okazas tie, ĉar nenio estis videbla. Kaj aliaj, kiel ĉiam, rigardis norden kaj kalkulis la leŭgojn ĝis Teodeno en Rohano.

— Ĉu li venos? Ĉu li memoros nian malnovan aliancon? — ili diris.

— Jes, li venos, — diris Gandolfo, — eĉ se li venos tro malfrue. Sed pensu! En plej bona kazo la Ruĝa Sago ne povis atingi lin pli frue ol antaŭ du tagoj, kaj multas la mejloj de Edoraso.

Estis denove nokte, kiam venis novaĵo. Homo rajdis haste de la trapasejoj, dirante ke armeo eliris el Minaso Morgul kaj jam proksimiĝas al Osgiliado; kaj aliĝis al ĝi regimentoj el la sudo, haradanoj, kru-elaj kaj altaj.

— Kaj mi eksciis, — diris la kuriero, — ke la Nigra Komandanto estras ilin denove, kaj timo pri li antaŭis lin trans la Riveron.

Per tiuj misaŭguraj vortoj fermiĝis la tria tago de kiam Grinĉjo venis al Minaso Tirit. Malmultaj iris ripozi, ĉar malmulte da espero havis iu ajn, ke eĉ Faramiro sukcesos longe bari la trapasejojn.

La postan tagon, kvankam la mallumo atingis sian zeniton kaj ne pli densiĝis, ĝi pli peze deprimis la homajn korojn, kaj ilin plenigis granda antaŭtimo. Malagrabla novaĵo baldaŭ venis.

La Malamiko transiris Anduinon. Faramiro retretis al la muro de Pelenoro, kuraĝigante siajn soldatojn ĝis la Digvojaj Fortikaĵoj; sed li estis dekoble supernombrita.

— Se li entute sukcesos transiri Pelenoron, liaj malamikoj baldaŭ lin dense sekvos, — diris la kuriero. — Ili pagis multekoste la transiron, sed malpli multekoste ol ni esperis. La plano estas bone preparita. Vidiĝas nun, ke ili longe konstruadis en la orienta Osgiliado flosojn kaj pramojn multnombre. Ili transsvarmis kvazaŭ skaraboj. Sed ĝuste la Nigra Komandanto venkas nin. Malmultaj pretas stari kaj toleri eĉ onidiron pri lia alveno. Lia propra popolo timegas lin, kaj ili mortigus sin se li ordonus.

— Do tie mi necesas pli ol ĉi tie, — diris Gandolfo kaj tuj forrajdis, kaj lia ekbrilo baldaŭ forvelkis el la vidkampo. Kaj tiun tutan nokton Grinĉjo sola kaj sendorma staris sur la muro kaj rigardadis orienten.

Apenaŭ denove sonoris la tagsonoriloj, mokaĵo en la senluma malhelo, kiam en la malproksimo li vidis ekflamon de fajroj, transe en la malklaraj spacoj, kie staris la muroj de Pelenoro. La sentineleoj ekkriis, kaj ĉiuj viroj en la Urbo posteniĝis. Nun de tempo al tempo vidiĝis ruĝa ekflamo, kaj malrapide tra la peza aero aŭdiĝis obtuzaj muĝoj.

— Ili kaptis la muron! — homoj kriis. — Ili eksplode trabreĉas ĝin. Ili venas!

— Kie estas Faramiro? — kriis Beregondo maltrankvile. — Ne diru, ke li falis!

Ĝuste Gandolfo alportis la unuajn novaĵojn. Kun manpleno da rajdistoj li venis mezmatene, rajdante kiel eskorto de vico da furgonoj. Ili estis plenaj je vunditoj, kiujn oni sukcesis savi el la ruinaĵo de la Digvojaj Fortikaĵoj. Li tuj iris al Denetoro.

La Mastro de la Urbo sidis en alta ĉambro super la halego de la Blanka Turego kun Grinĉjo apude. Tra la malhelaj fenestroj norden, suden kaj orienten li direktis siajn malhelajn okulojn, kvazaŭ por trapiki la ombrojn de la sorto, kiuj ĉirkaŭringis lin. Plejparte norden li rigardis, kaj paŭzis kelkfoje por aŭskulti, kvazaŭ per ia antikva lerteco liaj oreloj povus aŭdi tondradon de hufoj sur la malproksimaj ebenaĵoj.

— Ĉu Faramiro venis? — li demandis.

— Ne, — diris Gandolfo. — Sed li vivis ankoraŭ, kiam mi forlasis lin. Tamen li firme intencas resti kun la ariergardo, por ke la retreto trans Pelenoron ne fariĝu disfuĝo. Eble li povos kunteni siajn virojn sufiĉe longe, kvankam mi dubas pri tio. Li frontas malamikojn tro multajn. Ĉar alvenis iu, pri kiu mi timis.

— Ne... ne la Malhela Mastro, ĉu? — ekkriis Grinĉjo, forgesinte pro teruro sian servistecon.

Denetoro ridis amare.

— Ne, ankoraŭ ne, sinjoro Peregrino! Li ne venos, krom nur por ĝui sian triumfon kontraŭ mi post kiam la tuto estos venkita. Aliulojn li uzas kiel armilojn. Tion faras ĉiuj grandaj estroj, se ili sagacas, sinjoro duonulo. Alie, kial mi sidu ĉi tie en mia turego kaj pensu, kaj gva-tu, kaj atendu, elspezante eĉ miajn filojn? Ĉar mi ankoraŭ kapablas svingi glavon.

Li stariĝis kaj ĵetmalfermis sian longan nigran mantelon, kaj jen! li estis maŝkirase vestita sube, kaj ĉe la zono estis longa glavo, grandtenila en ingo el nigro kaj arĝento.

— Tia mi marŝas, kaj tia jam delonge dum multaj jaroj mi dormas, — li diris, — por ke mia korpo ne moliĝu kaj timiĝu pro maljuneco.

— Tamen nun sub la Mastro de Baraduro la plej danĝera el ĉiuj liaj komandantoj jam tenas viajn eksterajn murojn, — diris Gandolfo. — Reĝo de Angmaro antaŭlonge, sorĉisto, ringofantomo, Mastro de la nazguloj, lanco de teroro en la mano de Saŭrono, ombro de malespero.

— Tiukaze, Mitrandiro, vi havis kontraŭulon egalecan, — diris Denetoro. — Miaflanke, mi delonge scias, kiu estas la ĉefa armeestro de la Malhela Turego. Ĉu vi revenis nur por diri tiom? Aŭ ĉu eble vi retretis, ĉar vi estis superfortita?

Grinĉjo tremis, timante ke Gandolfo estos spronita al subita kole-ro, sed lia timo estis senbaza.

— Povus esti, — Gandolfo respondis mallaŭte. — Sed nia fortkonkuro ankoraŭ ne okazis. Kaj se vortoj prononcitaj pratempe veras, ne pro vira mano li pereos, kaj kaŝita antaŭ la Saĝuloj estas la sorto atendanta lin. Kiel ajn, la Komandanto de Malespero ankoraŭ ne urĝas antaŭen, ĝis nun. Li regas prefere laŭ tiu saĝo, pri kiu vi ĵus parolis, de la ariergardo, pelante antaŭ si la frenezigitajn sklavojn. Ne, mi venis por gardi la vunditojn, kiuj ankoraŭ kuraceblas, ĉar Ramaso estas breĉita tre vaste, kaj baldaŭ la armeo de Morgulo trairos multloke. Kaj

mi venis ĉefe por diri jenon. Baldaŭ okazos batalo sur la kampoj. Atakeliro devas esti pretigita. Ĝi estu rajdisto. Ĉe ili kuŝas nia mallonga espero, ĉar nur unurilate la malamikoj estas magre provizitaj: ili havas malmultajn rajdistojn.

— Ankaŭ ni havas malmultajn. Nun alveno de Rohano estus ĝustatempa, — diris Denetoro.

— Ni probable vidos unue aliajn venintojn, — diris Gandolfo. — Fuĝintoj el Kairo Andros jam atingis nin. La insulo falis. Alia armeo venis de la Nigra Pordego, transirinte el la nord-oriento.

— Iuj akuzis vin, Mitrandiro, ke vi ĝojas alporti malbonajn novaĵojn, — diris Denetoro, — sed por mi tio ne plu estas novaĵo: mi sciis pri ĝi antaŭ la noktiĝo hieraŭ. Rilate la eliratakon, mi jam pripensis tion. Ni malsupreniru.

Pasis la tempo. Finfine la surmuraj gvatantoj povis vidi la retreton de la eksteraj trupoj. Unue venis etaj aroj da lacaj kaj vunditaj soldatoj en malmulte da ordo; iuj kuris freneze kvazaŭ persekutataj. En la fora oriento la malproksimaj fajroj flagris; kaj nun ŝajnis, ke ie-tie ili rampas trans la ebenaĵon. Domoj kaj grenejoj brulis. Poste de multaj lokoj riveretoj da ruĝaj flamoj antaŭiris haste, serpentumante tra la malhelo, konverĝante al la linio de la larĝa vojo kondukanta de la Urba Pordego al Osgiliado.

— La malamikoj, — homoj murmuris. — La digo falis. Jen ili venas, verŝiĝante tra la breĉoj! Kaj ili portas torĉojn, ŝajnas. Kie estas niaj homoj?

Ĉiuhore proksimiĝis la vespero, kaj tiel malhelis la lumo, ke eĉ forviduloj sur la Citadelo povis klare distingi malmulton sur la kampoj, krom nur bruladoj ĉiam plimultiĝantaj, kaj la fajrlinioj, kiuj kreskis longece kaj rapidece. Fine, je malpli ol unu mejlo de la Urbo, vidiĝis homamaso pli orda, marŝanta ne kurante, ankoraŭ kunstrebanta.

La gvatantoj retenis sian spiron.

— Faramiro nepre estas tie, — ili diris. — Li scias regi homojn kaj bestojn. Malgraŭ ĉio li trairos.

Nun la retretantoj foris je apenaŭ du mejl-okonoj. El la malhelo malantaŭa galopis eta trupo da rajdistoj, la tuta restaĵo de la arierardo. Ankoraŭfoje ili turnis sin defie, frontante la proksimiĝantajn fajrliniojn. Subite aŭdiĝis sovaĝa kritumulto. Rajdistoj de la malamiko alsturmis. La fajrlinioj iĝis fluaj torentoj, vico post vico da orkoj

portantaj flamojn, kaj sovaĝaj sudanoj kun ruĝaj standardoj, kriante en aspraj lingvoj, alondante, atingante la retretantojn. Kaj kun pika krio el la malklara ĉielo plonĝis la flugilhavaj ombroj — nazguloj descendantaj por mortigi.

La retreto iĝis disfuĝo. Jam homoj forŝiriĝis, disfuĝante freneze kaj sence, forĵetante siajn armilojn, time kriegante, falante teren.

Kaj tiam sonoris trumpeto en la Citadelo, kaj Denetoro finfine ellasis la atakeliron. Ordigite en la ombro de la Pordego kaj sub la baŭmantaj muroj ekstere, ili atendis lian signalon: ĉiuj rajdistoj, kiuj restis en la Urbo. Nun ili saltis antaŭen, enviciĝis, ekgalopis kaj alsturmis kun granda krio. Kaj de sur la muroj leviĝis responda krio; ĉar unue sur la batalkampoj rajdis la cigno-kavaliroj de Dol Amroto kun sia princo kaj ties blua standardo antaŭe.

— Amroto por Gondoro! — ili kriis. — Amroto al Faramiro!

Tondrece ili sturmis la malamikojn ambaŭflanke de la retretanta trupo; sed unu rajdanto postlasis ĉiujn, rapida kiel vento tra la herbo: Ombrofakso portis lin, brilantan, denove senvualan, kun lumo suprenŝoviĝanta de lia levita mano.

La nazguloj kriĉis kaj forsvingiĝis, ĉar ilia Komandanto ankoraŭ ne venis por defii la blankan fajron de sia kontraŭulo. La armeo de Morgulo koncentrite al sia predo, senaverte trafita meze de freneza sturmo, deviis, disirante kvazaŭ fajreroj pro ventego. La retretanta trupo kun laŭta hurao returnis sin kaj batis siajn persekutintojn. La persekutitoj iĝis persekutantoj. La retreto iĝis atako. Sur la kampo estis sternitaj frapitaj orkoj kaj homoj, kaj fetoro leviĝis de forĵetitaj torĉoj, flagre estingiĝantaj en kirla fumo. La rajdistoj plurajdis.

Sed Denetoro ne permesis, ke ili iru tro foren. Kvankam la malamikoj estis haltigitaj kaj provizore retropelitaj, grandaj soldataroj enfluadis el la oriento. Denove sonoris la trumpeto, signalante retirigon. La rajdistaro de Gondoro haltis. Malantaŭ ties ŝirmbaro reformiĝis la eksteraj trupoj. Poste ili orde retromarŝis. Ili atingis la Pordegon de la Urbo kaj fiere reeniris; kaj fiere la urbanoj rigardis ilin kaj kriis siajn laŭdojn, kaj tamen ili restis kore perturbitaj. Ĉar la trupoj estis grave reduktitaj. Faramiro perdis trionon de siaj viroj. Kaj kie estis li?

Lasta el ĉiuj li venis. Liaj soldatoj pasis internen. La surĉevalaj kavaliroj revenis, kaj ariere la standardo de Dol Amroto, kaj la princo. Kaj sur la brakoj antaŭ si li portis la korpon de sia parenco Faramiro, filo de Denetoro, trovitan sur la batalkampoj.

— Faramiro! Faramiro! — oni kriis, plorante sur la stratoj. Sed tiu ne respondis, kaj oni forportis lin laŭ la serpentuma vojo supren al la Citadelo kaj lia patro. Ĝuste kiam la nazguloj flanken iris for de l' atako de la Blanka Rajdanto, venis mortiga saĝeto, kaj Faramiro, dum li skermis kun surĉevala batalmajstro el Harado, falis teren. Nur la alsturmo de Dol Amroto savis lin de la ruĝaj sudlandaj glavoj, kiuj volis dishaki lin kuŝantan.

Princo Imrahilo portis Faramiron ĝis la Blanka Turego kaj diris:

— Via filo revenis, sinjoro, post bravaj faroj, — kaj li rakontis ĉion, kion li vidis. Sed Denetoro starigis kaj rigardis la vizaĝon de sia filo kaj silentis. Poste li ordonis, ke oni starigu liton en la ĉambro kaj kuŝigu Faramiron sur ĝin kaj foriru. Sed li mem iris sola en la sekretnan ĉambron sub la supro de la Turego kaj multaj, kiuj rigardis tien tiutempe vidis palan lumon, kiu ekbrilis kaj flagris ĉe la mallarĝaj fenestroj dum kelka tempo kaj estingiĝis. Kiam Denetoro denove descendis, li iris al Faramiro kaj sidis apud li senparole, sed la vizaĝo de la Mastro estis griza, pli mortsimila ol tiu de lia filo.

Do finfine la Urbo estis sieĝata, enfermita en ringo de malamikoj. Ramaso estis rompita, kaj la tuta Pelenoro okupita de la Malamiko. La lasta sciigo el ekster la muroj estis portita de homoj fuĝintaj laŭ la nord-vojo antaŭ ol la Pordego estis fermita. Tiuj estis restaĵo de la gardistoj, kiuj postenis ĉe tiu loko, kie la vojo el Anorieno kaj Rohano eniris la urbajn terenojn. Ingoldo estris ilin, tiu sama kiu enlasis Gandalfon kaj Grinĉjon antaŭ malpli ol kvin tagoj, dum la suno ankoraŭ leviĝis kaj en la mateno estis espero.

— Mankas novaĵoj pri la rohananoj, — li diris. — Rohano jam ne venos. Aŭ se venos, tio ne helpos nin. Venis unue la nova armeo, pri kiu ni estis informitaj, el trans la Rivero laŭvoje de Androso, oni diras. Tiu estas forta: batalionoj da orkoj de l' Okulo, kaj sennombraj trupoj da homoj novspecaj, kies specon ni antaŭe ne renkontis. Ne altaj, sed larĝaj kaj severaj, barbozaj kvazaŭ gnomoj, portantaj hakilegojn. El iu sovaĝa lando en la vasta oriento ili venis, laŭ nia supozo. Ili tenas la nord-vojon; kaj multaj pluiris en Anorienon. La rohananoj ne povos veni.

La Pordego estis fermita. La tutan nokton sentineloj sur la muroj aŭdis rumoron de la malamikoj vagantaj ekstere, bruligantaj kampojn kaj arbojn, kaj hakantaj ĉiun homon, kiun ili trafis ekstere, ĉu

vivan aŭ mortan. La nombron de tiuj, kiuj jam trapasis la Riveron, oni ne povis diveni, sed kiam la mateno, aŭ ties malhela ombro, ŝteliris sur la ebenaĵon, videblis, ke eĉ nokta timo apenaŭ trommultigis ilin. La ebenaĵo estis nigra pro la marŝantaj trupoj, kaj tiel malproksime, kiel okuloj povis streĉrigardi en la malhelo, kreskis, kvazaŭ fiaj fungaĉoj, ĉie ĉirkaŭ la sieĝata urbo grandaj tendaroj nigraj aŭ sombre ruĝaj.

Formikece okupataj, hastantaj orkoj fosis, fosadis vicojn da profundaj tranĉeoj laŭ granda ringo, tuj post la sagatingo de sur la muroj; kaj kiam ajna tranĉeo kompletiĝis, ĝi estis plenigita de fajro, kvankam kiel ĝi estis bruligata aŭ nutrata, neniu povis vidi. La tutan tagon la laborego progresis, dum la homoj de Minaso Tirit spektis, ne kapablaj malhelpi ĝin. Kaj kiam ĉiu tranĉeolongo kompletiĝis, oni povis vidi proksimiĝon de grandaj furgonoj; kaj baldaŭ ankoraŭ pli da trupoj de la malamikoj rapide starigis post la ŝirmo de tranĉeo grandajn maŝinojn por ĵetado de pafaĵoj. Nenio tia sur la urbaj muroj sufiĉe grandis por atingi tien aŭ haltigi la laboron.

Komence la homoj ridis kaj ne tre timis tiajn maŝinojn. La ĉefmuro de la Urbo estis tre alta kaj mirinde dika, konstruita antaŭ ol la potenco kaj lerto de Numenoro velkis en ekzilo; kaj ĝia ekstera faco similis la Turegon de Ortanko, malmola, malhela kaj glata, nevenkebla per ŝtalo aŭ fajro, nefrakasebla krom per ia konvulsio, kiu fendus la teron mem, sur kiu ĝi staris.

— Ne, — ili diris, — eĉ se venus la Nenomenda mem, eĉ li ne kapablus enveni ĉi tien, dum ni plu vivas.

Sed kelkaj respondis:

— Ĉu dum ni plu vivas? Kiom longe? Li posedas armilon, kiu malstarigis multajn fortikaĵojn de kiam la mondo komenciĝis. Malsato. La vojoj estas baritaj. Rohano ne venos.

Sed la maŝinoj ne malŝparis municion kontraŭ la nerompebla muro. Ne estis iu bandito aŭ ĉeforko, kiu ordonis la atakon kontraŭ la plej forta malamiko de la Mastro de Mordoro. Gvidis ĝin potenco kaj malica menso. Tuj kiam la grandaj katapultoj estis pretaj, kun multaj krioj kaj tirado de ŝnuregoj kaj vinĉo, oni komencis ĵeti pafaĵojn mirinde alten, tiel ke ili trapasis super la remparon kaj falis obtuze brue en la unua cirklo de la Urbo; kaj multaj el ili pro ia sekreta arto ekflamis malsuprenire.

Baldaŭ estiĝis granda fajrodanĝero malantaŭ la muro, kaj ĉiuj kiuj haveblis okupiĝis estingante la flamojn, kiuj ekbrulis en multaj lokoj. Poste inter la pli grandaj ĵetoj falis alia hajlo, malpli ruiniga sed pli

terura. Ĉie sur la stratoj kaj vojetoj malantaŭ la Pordego falis etaj rondaj pafaĵoj, kiuj ne flamiĝis. Sed kiam la homoj kuris por konstati, kio estas tio, ili kriis aŭ ploris. Ĉar la malamikoj ĵetadis en la Urbon la kapojn de tiuj, kiuj mortis batalante ĉe Osgiliado, ĉe Ramaso, aŭ sur la kampoj. Tiuj estis teruraj; ĉar kvankam kelkaj estis kunpremitaj kaj senformaj, kaj iuj estis kruele hakitaj, tamen multaj havis vizaĝojn rekoneblajn, kaj ŝajnis, ke tiuj mortis en doloro; kaj ĉiuj estis brulstampitaj je la fia signo de la Senpalpebra Okulo. Sed malgraŭ ke ili estis difektitaj kaj malhonoritaj, ofte okazis, ke iu revidis vizaĝon de konito, kiu iam marŝis fiere armite, aŭ plugis la kampon, aŭ alrajdis libertempe el la verdaj valoj inter la montoj.

Vane homoj skuis siajn pugnoj kontraŭ la senkompataj malamikoj svarmantaj ĉe la Pordego. Malbenojn ili ne atentis, nek komprenis la lingvojn de okcidentanoj, kriante per aspraj vortoj kvazaŭ bestoj aŭ karnomanĝaj birdoj. Sed baldaŭ troviĝis malmultaj en Minaso Tirit, kiuj plu sufiĉe entuziasmis por stariĝi kaj defii la armeojn de Mordoro. Ĉar ankoraŭ unu armilon, pli rapidan ol la malsato, havis la Mastro de l' Malluma Turego: timon kaj malesperon.

La nazguloj revenis, kaj dum ilia Malhela Mastro kreskis kaj sendis sian volon, iliaj voĉoj, kiuj esprimis nur lian volon kaj lian malicon, estis plenaj de miso kaj hororo. Ĉiam ili cirkulis super la Urbo, kiel vulturoj atendantaj satmanĝon de la karno de kondamnitaj. Nevideble kaj nepafeble ili flugis, kaj tamen senĉese ĉeestis, kaj iliaj mortminacaj voĉoj fendis la aeron. Pli netolereblaj ili iĝis kun ĉiu nova kriĉo. Finfine eĉ la kuraĝuloj komencis ĵeti sin teren, kiam la kaŝita minaco pasis supre, aŭ ili staris lasante, ke la armiloj falu el iliaj sennervaj manoj dum en iliajn mensojn venis ia nigreco, kaj ili ne plu pensis pri batalado, sed nur pri sinkaŝado aŭ pri rampado, kaj pri morto.

Dum tiu tuta nigra tago Faramiro kuŝis sur sia lito en la ĉambro de la Blanka Turego, vagante en furioza febro; mortanta, diris iu, kaj baldaŭ "mortanta" ĉiuj diris sur la muroj kaj sur la stratoj. Kaj apud li sidis lia patro kaj diris nenion, sed rigardis, kaj ne plu atentis la defendadon.

Neniam horojn tiel senlumajn konis Grinĉjo, eĉ ne kaptite de la uruk-hajoj. Lia devo estis servi sian Mastron, kaj tion li faris, ŝajne forgesite, starante apud la pordo de la nelumigita ĉambro, regante laŭeble siajn proprajn timojn. Kaj dum li atendis, ŝajnis al li, ke Deneratoro maljuniĝas antaŭ liaj okuloj, kvazaŭ rompiĝus io en lia volo fiera,

kaj lia severa menso estus renversata. Malĝojo eble kaŭzis tion, kaj kulposento. Li vidis larmojn sur tiu iam senlarma vizaĝo, pli netolerablajn ol kolero.

— Ne ploru, sinjoro, — li balbutis. — Eble li resaniĝos. Ĉu vi demandis Gandalfon?

— Ne konsolu min per sorĉistoj! — diris Denetoro. — La stultula espero malvenkis. La Malamiko trovis ĝin, kaj nun lia potenco plifortiĝas; li vidas eĉ niajn pensojn, kaj ĉio, kion li faras, estas ruiniga. Mi forsendis mian filon sendankan, nebenitan, en nenecesan danĝeron, kaj jen li kuŝas kun veneno en la vejnoj. Ne, ne, kio ajn eble nun okazos en la milito, ankaŭ mia linio finiĝas, falas eĉ la Domo de la Regantoj. Maleminentuloj regos la restaĵon de la popolo de la reĝoj de l' homoj, sinkaŝante en la montaro ĝis ĉiuj estos elpelitaj.

Venis al la pordo homoj vokantaj la Mastron de la Urbo.

— Ne, mi ne iros suben, — li diris. — Mi devas resti apud mia filo. Li eble parolos antaŭ la fino. Sed tiu proksimas. Sekvu kiun ajn vi volas, eĉ la Grizan Stultulon, kvankam lia espero malvenkis! Mi restos ĉi tie.

Tiel okazis, ke Gandolfo ekkomandis la lastan defendon de la Ĉefurbo de Gondoro. Kien ajn li iris, la homaj koroj refortiĝis, kaj la flugilhavaj ombroj forpasis el la memoro. Senlace li paŝadis de Citadelo ĝis la Pordego, de la nordo ĝis la sudo sur la muroj; kaj kun li iris la princo de Dol Amroto en sia brila maŝkiraso. Ĉar tiu kaj ties viroj plu sintenis kiel princoj en kiuj la raso de Numenoro restis senmakula, oni vidante ilin flustris:

— Verŝajne la malnovaj rakontoj parolis veron; en la vejnoj de tiu popolo estas sango elfa, ĉar iam antaŭ longe la Nimrodela popolo loĝis en tiu lando.

Kaj tiam kutime iu kantis en la malhelo kelkajn versojn de la kanto pri Nimrodela aŭ aliajn kantojn de la Valo Anduina el malaperintaj jaroj.

Kaj tamen, kiam ili foriris, la ombroj denove ĉirkaŭis la homojn kaj iliaj koroj fridiĝis, kaj la kuraĝo de Gondoro velke cindriĝis. Kaj tiel malrapide ili forpasis el tago malhela je timoj en la mallumon de furioza nokto. Fajroj jam flamegis sen malhelpo en la unua cirklo de la Urbo, kaj la garnizono sur la ekstera muro estis jam multloke barita de retroiro. Sed la fideluloj restantaj tie ĉepostene estis malmultaj; la plimulto jam fuĝis tra la dua pordego.

Fore malantaŭ la batalo, la Rivero estis rapide trapontita, kaj dum la tuta tago pli da soldatoj kaj armiloj transversigis. Finfine en mezo de la nokto atako komenciĝis. La avangardo trapasis la fajrotranĉeojn per multaj malrektaj padoj lasitaj inter ili. Oni iris antaŭen malzorgaj pri perditoj dum la avanco, ankoraŭ kunproksimaj kaj pelataj, en pafatingon de la pafarkistoj sur la muro. Sed efektive restis tie tro malmultaj por kaŭzi grandan malutilon, kvankam la fajrolumo vidigis multajn celindulojn por pafarkistoj tiel lertaj, kiel Gondoro iam pri-fieris. Tiam konstatante, ke la braveco de la Urbo estas jam terenbati-ta, la kaŝita Komandanto elmetis siajn fortojn. Malrapide la grandaj sieĝturoj, konstruitaj en Osgiliado, ruliĝis antaŭen tra la mallumo.

Mesaĝistoj venis denove al la ĉambro en la Blanka Turego, kaj Grinĉjo enlasis ilin, ĉar ili urĝis. Denetoro forturnis malrapide sian kapon de la vizaĝo de Faramiro kaj silente rigardis ilin.

— La unua cirklo de la Urbo brulas, mastro, — ili diris. — Kion vi ordonas? Vi daŭre estas la Mastro kaj Reganto. Ne ĉiu obeas Mitran-diron. Homoj fuĝas de sur la muroj kaj lasas ilin sendefendaj.

— Kial? Kial la stultuloj fuĝas? — diris Denetoro. — Prefere brul-iĝi frue ol malfrue, ĉar bruliĝi endas. Reiru al via fajrego! Kaj mi? Mi iros nun al mia sepulta fajro. Al mia sepulta fajro! Neniu tombo por Denetoro kaj Faramiro. Neniu tombo! Neniu longa malrapida mortodormo balzamite. Ni bruligos nin kiel paganaj reĝoj antaŭ ol la unua ŝipo alvelis ĉi tien el la Okcidento. La Okcidento malvenkis. Reiru kaj brulu.

La mesaĝistoj sen riverenco kaj respondo returnis sin kaj forkuris.

Tiam Denetoro stariĝis kaj liberigis la febran manon de Faramiro, kiun li antaŭe tenis.

— Li brulas, jam brulas, — li diris malĝoje. — Lia domo diseriĝas. — Poste paŝinte mallaŭte al Grinĉjo, li subenrigardis al li kaj diris:

— Adiaŭ! Adiaŭ, Peregrino, filo de Paladino! Via servado estis mallonga kaj nun proksimiĝas al fino. Mi liberigas vin el tiu malmul-to, kiu restas. Iru nun kaj mortu laŭ maniero, kiu ŝajnas al vi preferin-da. Kaj kune kun iu ajn, vi volas, eĉ tiu amiko, kies stulteco kondukis vin al tiu ĉi morto. Voku miajn servistojn kaj poste foriru. Adiaŭ!

— Mi ne diros adiaŭ, mastro, — diris Grinĉjo genuante. Poste, subite hobiteca denove, li stariĝis kaj rigardis en la okulojn de la mal-junulo. — Mi akceptos vian forpermeson, sinjoro, ĉar mi treege dezi-ras kontakti Gandalfon. Sed li estas nenia stultulo; kaj mi ne pensos

pri morto, ĝis li malesperos pri la vivo. Sed el mia voto kaj servado al vi mi ne volas liberiĝi, dum vi vivas. Kaj se ili venos finfine al la Citadelo, mi esperas ĉeesti kaj stari apud vi kaj meriti la armilojn, kiujn vi donis al mi.

— Faru laŭvole, sinjoro duonulo, — diris Denetoro. — Sed mia vivo estas rompita. Voku miajn servistojn!

Li returnis sin al Faramiro.

Grinĉjo forlasis lin kaj vokis la servistojn, kaj tiuj venis: ses viroj el la domanaro, fortaj kaj belaj; tamen ili tremis pro la alvoko. Per kvieta voĉo Denetoro ordonis, ke ili metu varmajn kovrilojn sur la liton de Faramiro kaj levu ĝin. Tion ili faris, kaj levinte la liton, ili forportis ĝin el la ĉambro. Malrapide ili paŝis por ĝeni la februlon laŭeble plej malmulte, kaj Denetoro apogante sin per bastono sekvis ilin; kaj la lasta iris Grinĉjo.

Eksteren el la Blanka Turego ili marŝis, kvazaŭ al entombigo, eksteren en la mallumon, kie la suprendanta nuboj estis sube lumigita je flagroj da malhela ruĝo. Kviete ili trapaŝis la grandan korton, kaj pro vorto de Denetoro ili haltis apud la Velkinta Arbo.

Ĉio silentis, krom militrumoro en la suba Urbo, kaj ili aŭdis malĝojan gutadon de akvo el la mortaj branĉoj en la laĝeton. Poste ili pluiris tra la citadela pordo, kie la sentinelo gapis al ili mire kaj konsternite, kiam ili preterpasis. Turniĝante okcidenten ili venis finfine al pordo en la malantaŭa muro de la sesa cirklo. Tiu nomiĝis Fen Holeno, ĉar ĝi restis ĉiam fermita krom por entombigoj, kaj nur la Mastro de la Urbo rajtis iri tiun vojon, aŭ tiuj, kiuj portis la insignon de la tomboj kaj prizorgis la domojn de la mortintoj. Post la pordo la serpentuma vojo subiris laŭ multaj kurboj ĝis la malvasta tereno sub ombro de krutegaĵo Mindoluino, kie staris la domegoj de la mortintaj Reĝoj kaj de la Regantoj.

Pordisto sidis en dometo apud la vojo, kaj kun timo en la okuloj li elvenis portante lanternon en la mano. Pro ordono de la Mastro li malŝlosis la pordon kaj silente retrosvingis ĝin; kaj ili trapasis, preninte el lia mano la lanternon. Estis mallume sur la grimpa vojo inter antikvaj muroj kaj multpilastraj balustradoj baŭmantaj en la svingiĝantaj lanternoradioj. Iliaj malrapidaj piedoj eĥis, dum ili marŝis suben, suben, ĝis fine ili atingis la Silentan Straton, Rat Dineno, inter palaj kupoloj kaj vakaj haloj kaj bildoj de homoj delonge mortintaj; kaj ili eniris la Domon de la Regantoj kaj demetis sian ŝarĝon.

Tie Grinĉjo, maltrankvile ĉirkaŭrigardante, vidis, ke li troviĝas en larĝa volbita ĉambro, kvazaŭ drapirita per la ombregoj, kiujn la eta lanterno ĵetis sur ĝiajn vualitajn murojn. Kaj malklare vidiĝis multaj tabloj, ĉizitaj el marmoro; kaj sur ĉiu tablo kuŝis figuro dormanta, kun kunfalditaj manoj kaj la kapo apogita per ŝtonkuseno. Sed unu tablo proksima staris larĝa kaj senkorpa. Sur tiun pro signo de Denetoro ili kuŝigis Faramiron kaj ties patron unu apud alia, kaj kovris ilin per unusola kovrilo kaj poste staris kun la klinitaj kapoj kvazaŭ funebrantoj apud mortolito. Poste Denetoro parolis mallaŭte.

— Ĉi tie ni atentos. Sed ne alvoku la balzamistojn. Alportu al ni lignon rapidbrulan kaj metu ĝin ĉirkaŭ ni kaj sube; kaj verŝu sur ĝin oleon. Kaj kiam mi ordonos, enŝovu torĉon. Faru tion kaj ne plu alparolu min. Adiaŭ!

— Laŭ via permeso, mastro! — diris Grinĉjo kaj turnis sin kaj fuĝis terurite el tiu morteca domo.

“Kompatinda Faramiro! — li pensis. — Necesas trovi Gandalfon. Kompatinda Faramiro! Tre verŝajne li pli bezonas medicinon ol lar-mojn. Ho, kie mi trovu Gandalfon? En mezo de l' aferoj, supozeble, sed al li mankos tempo dediĉota al mortantoj aŭ frenezuloj”.

Ĉeporde li turnis sin al unu el la servistoj, kiuj sentinelis tie.

— Via mastro ne estas normala, — li diris. — Malrapidu! Portu neniom da fajro al tiu ĉi loko, dum Faramiro vivas! Faru nenion, ĝis venos Gandolfo!

— Kiu regas en Minaso Tirit? — la homo respondis. — Ĉu Mastro Denetoro aŭ la Griza Vagulo?

— La Griza Vagulo aŭ neni, ŝajnas, — diris Grinĉjo kaj rekuris supren laŭ la serpentuma vojo tiel rapide kiel povis porti lin liaj kruroj, preter la mirigita pordisto, eksteren tra la pordo, kaj plu, ĝis li proksimiĝis al la pordo de la Citadelo. La sentinelo alvokis lin, kaj li rekonis la voĉon de Beregondo.

— Kien vi kuras, mastro Peregrino? — li ekkriis.

— Por trovi Mitrandiron.

— La komisioj de la Mastro urĝas kaj devus ne esti malhelpataj de mi, — diris Beregondo, — sed diru al mi rapide, se vi rajtas: kio okazas? Kien iris mia Mastro? Mi ĵus ekdeĵoris, sed mi aŭdis, ke li pasis al la Fermita Pordo, kaj homoj portis antaŭ li Faramiron.

— Jes, — diris Grinĉjo, — al la Silenta Strato.

Beregondo klinis sian kapon por kaŝi larmojn.

— Oni diris, ke li mortas, — li ĝemspiris, — kaj jam li mortis.

— Ne, — diris Grinĉjo, — ankoraŭ ne. Kaj eĉ nun eblas malhelpi lian morton, mi opinias. Sed la Mastro de la Urbo, Beregondo, malvenkis antaŭ ol malvenkis lia urbo. Li estas envultita kaj danĝera. — Rapide li sciigis al Beregondo la strangajn vortojn kaj farojn de Denetoro. — Mi devas tuj trovi Gandalfon.

— Do vi devos subeniri al la batalo.

— Mi scias. La Mastro forpermesis min. Sed, Beregondo, se vi povas, faru ion por malhelpi, ke okazu io terura.

— La Mastro ne permesas al portantoj de la nigro kaj arĝento forlasi sian postenon ajnmotive, krom pro lia propra ordono.

— Nu, vi devos elekti inter ordonoj kaj la vivo de Faramiro, — diris Grinĉjo. — Kaj rilate la ordonojn, mi opinias, ke vi havas frenezulon pritraktotan, ne mastron. Mi devas kuri. Mi revenos, se mi povos.

Li plukuris suben, suben al la ekstera urbo. Homoj fuĝantaj de la brulado pasis lin, kaj kelkaj vidinte lian livreon turniĝis kaj kriis, sed li malatentis. Finfine li trapasis la duan pordon, post kiu impetis supren inter la muroj grandaj fajroj. Tamen ĉio ŝajnis strange silenta. Aŭdiĝis neniuj bruoj, nek batalkrioj, nek armilaj klakadoj. Tiam subite aŭdiĝis terura krio kaj sentiĝis forta skuo, kaj profunda eĥanta muĝo. Devigante sin antaŭen kontraŭ blovo el timo kaj teruriĝo, kiu skuis lin preskaŭ surgenuen, Grinĉjo ĉirkaŭiris angulon kiu malfermiĝis al la larĝa placo malantaŭ la Urba Pordego. Li haltis abrupte. Li jam trovis Gandalfon, sed li kuntiriĝis, kaŭrante en ombro.

Ekde la noktomezo la granda atako daŭris. Tamburoj tondregis. Norde kaj sude trupo post trupo de la malamikoj sturmis la murojn. Venis bestegoj, kiel moviĝantaj domoj en la ruĝa kaj intermita lumo, la *mumakoj* de Harado, kiuj trenis tra la vojetoj inter la fajroj enormajn turojn kaj maŝinojn. Tamen ilia Komandanto ne multe zorgis pri tio, kion ili faris, aŭ kiom el ili estis mortigitaj: ilia celo estis nur provi la forton de la defendado kaj plenokupi multloke la soldatojn de Gondoro. Ĝuste kontraŭ la Pordegon li direktos sian plejan pezon. Malgraŭ ĝia fortiko, konstruita el ŝtalo kaj fero kaj gardita per turoj kaj bastionoj el nevenkebla ŝtono, ĝi estis la ŝlosilo, la plej malforta loko en tiu alta kaj nepenetrebla muro.

La tamburoj ektondris pli laŭte. Fajroj suprensaltis. Grandaj maŝinoj rampis trans la batalkampon; kaj en la mezo estis ramego, arbege granda, cent futojn longa, svingiĝanta sur potencaj ĉenoj. Longe oni forĝis ĝin en la mallumaj forĝejoj de Mordoro, kaj ĝia hida

kapo, fandita el nigra ŝtalo, estis forme simila al malsata lupo; sur ĝi kuŝis ruinigaj envultoj. Oni nomis ĝin Grondo, memore pri la Martelo de la Submondo en la pratempo. Trenis ĝin grandaj bestoj, orkoj ĉirkaŭis ĝin, kaj malantaŭe marŝis montaj troloj por manipuli ĝin.

Sed ĉirkaŭ la Pordego rezistado ankoraŭ bravis, kaj tie la kavaliroj el Dol Amroto kaj la plej kuraĝaj el la garnizono staris lastpostene. Sagoj kaj sagetoj falis dense; sieĝturoj krakfalis aŭ subite ekflamis kvazaŭ torĉoj. Antaŭ la muroj ambaŭflanke de la Pordego la teron kovris ruinaĵoj kaj kadavroj de la mortigitoj; tamen pelitaj kvazaŭ freneze ĉiam pli kaj pli alvenis.

Grondo rampis plu. Fajro ne povis difekti ĝian ŝelon; kaj kvankam iu el la bestegoj, kiuj portis ĝin, jen kaj jen freneziĝis kaj vaste dispremis la nenombreblajn orkojn, kiuj gardis ĝin, iliaj korpoj estis forĵetataj de la vojo kaj aliaj prenis ilian lokon.

Grondo rampis plu. La tamburoj sovaĝe tondregis. Sur la montetoj da mortigitoj subite aperis hida figuro: rajdanto, alta, kapuĉita, mantelita en nigro. Malrapide, tramplante la falintojn, li rajdis plu, ne atentante sagojn. Li haltis kaj levis longan palan glavon. Kaj kiam li faris tion, granda timo trafis ĉiujn, tiel defendantojn, kiel malamikojn, kaj la manoj de la homoj kurbiĝis al iliaj flankoj, kaj neniu pafarko sonoris. Momente ĉio senmoviĝis.

La tamburoj tondregis kaj klakis. Larĝimpete Grondo estis ĵetita antaŭen per grandegaj manoj. Ĝi atingis la Pordegon. Ĝi svingiĝis. Profunda bruego ruliĝis tra la Urbo kiel tondro impetanta en la nuboj. Sed la fera pordego kaj ŝtalaj fostoj eltenis la bategon.

Tiam la Nigra Komandanto stariĝis en la piedingoj kaj laŭte kriis per terura voĉo, parolante en iu forgesita lingvo, vortojn potencajn kaj timigajn, indajn por ŝiri tiel korojn kiel ŝtonojn.

Trifoje li kriis. Trifoje la ramego bruis, kaj subite pro la lasta bato la Pordego de Gondoro rompiĝis. Kvazaŭ trafite de iu eksplodiga sorĉo ĝi disbatiĝis: vidiĝis flagrego de brula fulmo, kaj la pordego falegis frakasite al la tero.

Enrajdis la estro de la nazguloj. Kiel granda nigra figuro antaŭ la fajroj malantaŭe li baŭmis, kreskinta je vasta minaco senesperiga. Enrajdis la estro de la nazguloj sub la arkaĵon, tra kiu ĝis tiam pasis neniu malamiko, kaj fuĝis ĉiuj antaŭ lia vido.

Ĉiuj krom unu. Tie atendante, silenta kaj senmova en la spaco antaŭ la Pordego, sidis Gandolfo sur Ombrofakso: Ombrofakso, la

sola inter la ĉevaloj de la tero toleris la teruron, nemoviĝante, firma kiel ĉizita skulptaĵo en Rat Dineno.

— Vi ne povas eniri ĉi tien, — diris Gandolfo, kaj la ombrego haltis. — Reiru al la abismo pretigita por vi! Reiru! Falu en la neniecon, kiu atendas vin kaj vian Mastron! Iru!

La Nigra Rajdanto ĵetis malantaŭen sian kapuĉon, kaj jen! li havis reĝecan kronon; kaj tamen sur neniuj videblaj kapoj ĝi estis metita. La ruĝaj fajroj brilis inter ĝi kaj la mantelitaĵoj ŝultroj vastaj kaj malhelaj. El la buŝo nevidebla venis morteca ridado.

— Maljuna stultulo! — li diris. — Maljuna stultulo! Venis mia horo. Ĉu vi ne rekonas la morton, kiam vi vidas ĝin? Mortu jam kaj malbenu vane!

Dirinte tion li levis alte sian glavon, kaj flamoj trakuris la klingon.

Gandolfo ne moviĝis. Kaj ĝuste tiumomente aŭdiĝis malproksime en iu korto de la Urbo kokeriko de koko. Kriĉe kaj klare ĝi kokerikis, ignorante sorĉadon kaj militon, bonvenigante la matenon, kiu sur la ĉielo forsupre super la ombroj de morto venadis kun la aŭroro.

Kaj kvazaŭ responde aŭdiĝis en foro alia sono. Kornoj, kornoj, kornoj. En la flankoj de malluma Mindoluino ili malklare reeĥis. Grandaj kornoj de la nordo sovaĝe sonoritis. Rohano finfine venis.

Ĉapitro 5

LA RAJDADO DE LA ROHANANOJ

Estis mallume, kaj Gaja povis vidi nenion, dum li kuŝis sur la tero involvite en lankovrilo; tamen kvankam la nokto estis senaera kaj senventa, ĉie ĉirkaŭe arboj suspiris mallaŭte. Li levis sian kapon. Tiam li aŭdis denove tion: sonon kvazaŭ de sordinitaj tamburoj en la arbarkovritaj montetoj kaj montoŝtupoj. La tamburado subite ĉesis kaj rekomenciĝis ĉe iu alia punkto, jen pli proksima, jen pli fora. Li sciivolis, ĉu la gardantoj aŭdis tion.

Tiujn li ne povis vidi, sed li sciis, ke ĉie ĉirkaŭe estis trupoj de la rohananoj. Li povis flari la ĉevalojn en la mallumo, kaj povis aŭdi ties ekmoviĝojn kaj mallaŭtan hufbatadon sur la pingingla tero. La armeo bivakis en la pinarbaro, kiu densiĝis ĉirkaŭ la signalfajro de Ejlenaĥo, alta monteto elstaranta de la longaj firstoj de la arbaro Druadano, kiu apudis la grandan vojon en orienta Anorieno.

Malgraŭ lacego Gaja ne povis ekdormi. Li jam rajdis dum kvar sinsekvaj tagoj, kaj la ĉiamprofundiĝanta morno malrapide pezis sur lian koron. Li komencis sin demandi, kial li tiom entuziasmis pri la kuniro, dum al li estis proponitaj ĉiaj senkulpigoj, eĉ ordono de la estro, ke li postrestu. Li demandis sin ankaŭ, ĉu la maljuna reĝo estos kolera, se li ekscios, ke lia ordono estas malobeita. Probable, ne. Ŝajne Dernkasko iel interkonsentis kun Elfhelmo, la marŝalo de la *eored*, en kiu ili rajdis. Li kaj liaj viroj ŝajnis ne rimarki Gajan, se tiu alparolis. Li estis kvazaŭ plia pakaĵo portata de Dernkasko. Ankaŭ Dernkasko havigis neniom da konsolo: li malofte eĉ vorton parolis. Gaja sentis sin malgranda, nedezirata kaj sola. La tempo estis zorgoplena, kaj la armeo en danĝero. Ĝi troviĝis je malpli ol unutaga rajdado de la eksteraj muroj de Minaso Tirit, kiuj ĉirkaŭis la urban terenon. Skoltoj estis senditaj antaŭen. Iuj ne revenis. Aliaj haste reveninte raportis, ke la vojo estas forte barita kontraŭ ili. Amaso el la malamikoj bivakis sur ĝi, tri mejlojn okcidente de Amono Din, kaj iu soldataro jam peliĝis laŭ la vojo kaj estis ne pli ol tri leŭgojn for. Orkoj vagadis sur la montoj kaj en la arbaroj apud la vojo. La reĝo kaj Eomero interkonsiliĝis dum la noktaj vaĉoj.

Gaja deziris alparoloton, kaj li pensis pri Grinĉjo. Sed tio nur plifortigis lian maltrankvilon. Kompatinda Grinĉjo, enfermita en granda ŝtona urbo, sola kaj timoplena. Gaja sopiris esti alta rajdanto kiel Eomero kaj povi sonorigi kornon aŭ simile kaj iri galope al lia savo. Li eksidis, aŭskultante la tamburojn, kiuj denove pulsadis, jam pli proksime. Baldaŭ li aŭdis mallaŭtajn voĉojn kaj ekvidis malbrilajn duonvualitajn lanternojn pasantaj tra la arboj. Viroj proksimaj komencis moviĝi malcerte en la mallumo.

Alta figuro aperis kaj stumblis kontraŭ li, sakrante pri la arbradikoj. Li rekonis la voĉon de Elfhelmo, la estro de la trupo, kun kiu li rajdis.

— Mi ne estas arbradiko, sinjoro, — li diris, — sed kontuzita hobioto. Kompense bonvolu sciigi al mi, kio elpaŝas.

— Ĉio ajn kio kapablas tion fari en tiu ĉi diabla senlumo, — respondis Elfhelmo. — Sed mia estro sendis ordonon, ke ni devas teni nin pretaj: eble venos ordonoj pri subita translokiĝo.

— Ĉu do la malamikoj venas? — demandis Gaja netrankvile. — Ĉu estas iliaj tamburoj? Mi komencis supozi, ke mi imagas ilin, ĉar neniu alia ŝajne atentis ilin.

— Ne, ne, — diris Elfhelmo, — la malamikoj estas sur la vojo, ne en la montaro. Vi aŭdas la vozojn, la sovaĝulojn de l' arbaroj: tiamaniere ili interparolas je distanco. Ili plu hantas la arbaron Druadano, laŭdire. Restaĵoj el epoko pli praa ili estas, vivante malmultnombre kaj sekrete, sovaĝaj kaj singardaj kiel la bestoj. Ili ne iras militen kun Gondoro aŭ Markio; sed nun ilin ĉagrenas la mallumo kaj alveno de la orkoj: ili timas, ke la Mallumaj Jaroj eble revenas, kio ŝajnas sufiĉe probable. Ni estu dankemaj, ke ne nin ili ĉasas: ĉar ili uzas venenajn sagojn, oni diras, kaj ili estas senkompare lertaj pri arbarumado. Sed ili proponis sian servadon al Teodeno. Ĝuste nun unu el iliaj ĉefoj estas kondukata al la reĝo. Tie videblas la lumoj. Tiom mi aŭdis, sed nenion pli. Kaj nun mi devas okupiĝi pri la ordonoj de mia estro.

Li malaperis en la ombrojn. Al Gaja ne plaĉis tiu parolado pri sovaĝuloj kaj venenaj sagoj, sed tute aparte de tio granda timego premis lin. Atendado estis netolerebla. Li sopiris scii, kio estas okazonta. Li stariĝis kaj baldaŭ marŝis singarde, sekvante la lastan lanternon antaŭ ol ĝi malaperis inter la arboj.

Baldaŭ li venis al aperta loko, kie malgranda tendo estis starigita sub granda arbo por la reĝo. Lanternego supre ŝirmita pendis de

branĉo kaj dismetis sube palan lumocirklon. Tie sidis Teodeno kaj Eomero, kaj antaŭ ili sur la tero sidis stranga stumpa virformo, nodoza kiel malnova ŝtono, kaj la haroj de ties maldensa barbo dissterniĝis sur lia bulba mentono kiel seka musko. Li estis kurtkrura kaj grasbraka, dika kaj stumpa, vestita nur per herbo ĉirkaŭ la talio. Gaja sentis, ke jam pli frue li vidis lin ie, kaj subite li memoris la Pukel-homojn en Dunharo. Jen estis vivigita unu el tiuj malnovaj skulptaĵoj, aŭ eble kreaĵo rase deveninta dum senfinaj jaroj de la modeloj, uzitaj de la forgesitaj metiistoj antaŭlonge.

Estis silento, dum Gaja rampis pli proksimen, kaj poste la sovaĝulo ekparolis, verŝajne responde al iu demando. Lia voĉo estis profunda kaj guturala, tamen surprize al Gaja li parolis la Komunan Lingvon, kvankam hezite, kaj enmiksiĝis vortoj krudaj.

— Ne, patro de ĉevalrajdantoj, — li diris, — ni ne batalas. Nur ĉasas. Mortigas *gorgunojn* en arbaro, malamegas orkpopolon. Ankaŭ vi malamegas *gorgunojn*. Ni helpas laŭeble. Sovaĝuloj havas orelojn longajn kaj okulojn longajn; konas ĉiujn padojn. Sovaĝuloj vivis ĉi tie antaŭ ol Ŝtondomoj; antaŭ ol Altuloj venis supren el Akvo.

— Sed ni bezonas helpon en batalo, — diris Eomero. — Kiel helpas nin vi kaj via popolo?

— Alportos sciigojn, — diris la sovaĝulo. — Ni rigardos de sur montoj. Ni grimpos montegon kaj subenrigardos. Ŝtonurbo estas fermita. Fajro brulas tie ekstere; jam ankaŭ interne. Vi volas veni tien, ĉu? Do vi devos rapidi. Sed *gorgunoj* kaj homoj el malproksimo, — li gestis per mallonga nodoza brako orienten, — sidas sur ĉevalvojo. Tre multaj, pli ol ĉevalrajdantoj.

— Kiel vi scias tion? — diris Eomero.

La plata vizaĝo kaj malhelaj okuloj de la maljunulo indikis nenion, sed lia voĉo estis senplezure malafabla.

— Sovaĝuloj estas liberaj, sed ne infanecaj, — li respondis. — Mi estas granda gvidanto, Gan-Buri-Gano. Mi kalkulas multajn aferojn: stelojn sur ĉielo, foliojn sur arboj, homojn en mallumo. Vi havas dudekon da dudekoj kalkulitan dekoble kaj kvinoble. Ili havas pli. Batalego, kaj kiu venkos? Kaj multe pli ĉirkaŭmarŝas la murojn de Ŝtondomoj.

— Ve! Li parolas elstare sagace, — diris Teodeno. — Kaj niaj skolttoj diras, ke ili dismetis tranĉeojn kaj fostojn trans la vojon. Ni ne povos forviŝi ilin per subita sturmo.

— Kaj tamen necesas urĝa hasto, — diris Eomero. — Mundburgo brulas!

— Permesu, ke Gan-Buri-Gano finparolu! — diris la sovaĝulo. — Pli ol unu vojon li konas. Li kondukos vin laŭ pado kie ne troviĝas truoj, neniuj *gorgunoj* marŝas, nur Sovaĝuloj kaj bestoj. Multaj padoj estis kreitaj kiam ŝtondomuloj pli fortis. Ili tranĉis montojn kiel ĉasistoj tranĉas bestviandon. Sovaĝuloj pensas, ke ili manĝis ŝtonojn por sin nutri. Ili trairis Druadanon al Rimono kun grandaj furgonoj. Ne plu ili iras. Pado estas forgesita, sed ne de la Sovaĝuloj. Trans la monton kaj malantaŭ monto ĝi kuŝas plu sub herboj kaj arboj, tie malantaŭ Rimono kaj suben ĝis Dino, kaj fine denove al rajdista vojo. Sovaĝuloj montros al vi tiun padon. Poste vi mortigos *gorgunojn* kaj forpelos fian malhelon per hela fero, kaj Sovaĝuloj povos ekdormi denove en la sovaĝaj arbaroj.

Eomero kaj la reĝo kunparolis en sia propra lingvo. Finfine Teodeno sin turnis al la sovaĝulo.

— Ni akceptos vian proponon, — li diris. — Ĉar, kvankam ni postlasos amason da malamikoj, kiel gravas? Se la Ŝtonurbo malvenkos, al ni tiam ne eblos reiro. Se ĝi estos savita, tiam la orkarmeo estos izolita. Se vi estos fidela, Gan-Buri-Gano, tiam ni riĉe kompensos vin, kaj por ĉiam vi posedos la amikecon de Markio.

— Mortintoj ne amikas al vivantoj kaj donas al ili neniom da donacoj, — diris la sovaĝulo. — Sed se vi vivos post la mallumo, tiam lasu la Sovaĝulojn neĝenataj en la arbaro kaj ne ĉasu ilin kvazaŭ bestojn plu. Gan-Buri-Gano ne gvidos vin en kaptilon. Li iros mem kun la patro de ĉevalrajdantoj, kaj se li misgvidos vin, vi lin mortigos.

— Estu tiel! — diris Teodeno.

— Kiom longe necesos preterpasi la malamikojn kaj reveni al la vojo? — demandis Eomero. — Ni devos iri marŝtakte, se vi gvidos nin; kaj mi ne dubas, ke la vojo estas mallarĝa.

— Sovaĝuloj rapide paŝas, — diris Gano. — Vojo larĝas sufiĉe por kvar ĉevaloj tie en Ŝtonfurgona Valo, — li gestis suden per la mano, — sed mallarĝa komence kaj fine. Sovaĝulo povus marŝi de ĉi tie ĝis Dino inter sunleviĝo kaj tagmezo.

— Do ni devas kalkuli minimume sep horojn por la avangardo, — diris Eomero; — sed ni devas supozi prefere iajn dek horojn por la tuto. Neantaŭviditaj okazaĵoj eble malhelpos nin, kaj se nia armeo estos disspacigita, necesos longa tempo por reordigi ĝin, kiam ni eliros el la montaro. Kioma horo nun estas?

— Kiu scias? — diris Teodeno. — Nun komplete noktas.

— Estas komplete mallume, sed ne komplete nokte, — diris Gano.

— Kiam venas la suno, ni sentas ĝin, eĉ kiam ĝi estas kaŝita. Jam ĝi grimpas super la Orientajn Montojn. Malfermiĝas la tago sur la ĉielkampoj.

— Do ni devas ekvojaĝi kiel eble plej baldaŭ, — diris Eomero. — Eĉ tiel ni ne rajtas esperi pri helpo al Gondoro hodiaŭ.

Gaja ne atendis por aŭdi pli, sed forglitis por pretiĝi antaŭ alvoko ekmarŝi. Jen estis la lasta stadio antaŭ batalo. Al li ne ŝajnis probable, ke multaj el ili travivos ĝin. Sed li pensis pri Grinĉjo kaj la flamoj en Minaso Tirit, kaj li sufokis sian propran antaŭtimon.

Tiutage ĉio iris glate, kaj ili nenion vidis nek aŭdis rilate malamiĵojn, kiuj atendis por embuski ilin. La sovaĝuloj dismetis ŝirmaĵon da singardaj ĉasistoj, tiel ke neniu orko aŭ vaganta spiono eksciis pri la moviĝado en la montaro. La lumo eĉ pli malfortiĝis, dum ili proksimiĝis al la sieĝata urbo, kaj la rajdistoj pasis longspalire kiel malhelaj ombroj de homoj kaj ĉevaloj. Ĉiun trupon gvidis sovaĝula arbaristo; sed maljuna Gano marŝis apud la reĝo. La komenco estis malpli rapida, ol oni esperis, ĉar necesis tempo por ke la rajdistoj, marŝante kaj kondukante siajn ĉevalojn, trovu padojn tra la dense arbovitaj firstoj malantaŭ sia tendaro kaj suben en la kaŝitan Ŝtonfurgonan Valon. Estis frue posttagmeze, kiam la avangardo alvenis larĝajn grizajn densejojn etendiĝantaj post la orientan flankon de Amono Din, kaj maskantaj larĝan breĉon en la montolinio, kiu etendiĝis orienten kaj okcidenten de Nardolo ĝis Dino. Tra la breĉo la forgesita furgono vojo antaŭ longe subeniris, reen al la ĉefa ĉevalvojo el la Urbo tra Anorieno; sed jam dum multaj homvivoj arboj libere pritraktis ĝin, kaj ĝi malaperis, frakasita kaj entombigita sub la folioj de sennombraj jaroj. Sed la densejoj proponis al la rajdistoj ties lastan esperon pri ŝirmado antaŭ ol ili iros en senkaŝan batalon; ĉar post ili kuŝis la vojo kaj la ebenaĵoj de Anduino, dum oriente kaj sude la deklivoj estis nudaj kaj rokecaj, dum la torditaj montetoj kunpremiĝis kaj supreniris, bastiono post bastiono, al la granda masivo kaj ŝultroj de Mindoluino.

La unua trupo estis haltigita kaj kiam la sekvantoj spalis supren el la trogo de la Ŝtonfurgona Valo, ili dismetiĝis kaj pasis al bivakejoj sub la grizaj arboj. La reĝo alvokis la komandantojn al konsiliĝo, Eomero dissendis skoltojn por spioni la vojon; sed maljuna Gano skuis sian kapon.

— Ne bone sendi rajdistojn, — li diris. — Sovajuloj jam vidis ĉion videblan en la malutila aero. Ili venos baldaŭ por paroli al mi ĉi tie.

La komandantoj venis; kaj poste el inter arboj singlarde alŝteliĝis aliaj pukel-figuroj tiel similaj al maljuna Gano, ke Gaja apenaŭ povis distingigi ilin. Ili parolis al Gano en stranga gorĝsona lingvo.

Baldaŭ Gano turnis sin al la reĝo.

— Sovaĝuloj diras multajn aferojn, — li diris. — Unue, estu singlardej! Daŭre multaj homoj en bivakejo post Dino, je unuhora marŝado tiudirekte, — li svingis sian brakon okcidenten al la nigra signalfajro. — Sed neniu videbla inter ĉi tie kaj novaj muroj de Ŝtonpopolo. Multaj okupiĝas tie. Muroj staras ne plu: *gorgunoj* faligis ilin per tertondro kaj per klaboroj el nigra fero. Ili estas sensuspektaj kaj ne ĉirkaŭrigardas. Ili supozas, ke iliaj amikoj sentinelas ĉiujn vojojn!

Dirinte tion la maljuna Gano eligis strangan gargarsonon, kaj ŝajne li ridis.

— Bona novaĵo! — kriis Eomero. — Eĉ en tiu ĉi malhelo espero denove brilas. La lertaĵoj de nia Malamiko ofte servas nin spite al li. La damninda mallumo mem estis mantelo por ni. Kaj nun, avidante detruĝi Gondoron kaj deĵeti ĝin ŝtonpostŝtone, liaj orkoj forigis mian plej grandan timon. La ekstera muro estus daŭra baraĵo kontraŭ ni. Sed jam ni povos trasturmi ĝin — se ni iam povos atingi tiel proksimen.

— Denove mi dankas vin, Gan-Buri-Gano de l' arbaro, — diris Teodeno. — Bona fortune akompanu vin pro viaj informoj kaj konsiloj!

— Mortigu *gorgunojn*! Mortigu orkan popolon! Neniu aliaj vortoj plaĉas al la Sovaĝuloj, — respondis Gano. — Forpelu fetoran aeron kaj mallumon per hela feraĵo!

— Por fari tion ni longe rajdadis, — diris la reĝo, — kaj ni klopodos pri tio. Sed kion ni plenumos, tion nur morgaŭo montros.

Gan-Buri-Gano kaŭris kaj tuŝis la teron per sia korneca frunto kiel signon de adiaŭo. Poste li stariĝis kvazaŭ por foriri. Sed subite li haltis rigardante supren, kvazaŭ surprizita arbara besteto snufanta fremdan aeron. Lumo ekaperis en liaj okuloj.

— Vento ŝanĝiĝas! — li kriis, kaj tuj, palpebrumrapide, aŭ tiel ŝajnis, li kaj liaj kunuloj malaperis en la malhelejon, neniam denove vidotaj de iu ajn rohana rajdisto. Post nelonge en la orienta malproksimo denove pulsadis la mallaŭtaj tamburoj. Tamen al neniu koro en la tuta armeo venis timo, ke la sovaĝuloj malfidelas, kiel ajn ili aspektis strangaj kaj nebelaj.

— Plia gvidado ne necesas por ni, — diris Elfhelmo; — ĉar en la

armeo estas rajdistoj, kiuj subenrajdis al Mundburgo dum tagoj de paco. Inkluzive de mi. Kiam ni alvenos la vojon, ĝi devios suden, kaj kuŝos antaŭ ni ankoraŭ sep leŭgoj antaŭ ol ni atingos la muron de la urba tereno. Laŭ la plejparto de tiu vojo troviĝas multe da herbo ambaŭflanke. Per tiu etendaĵo la mesaĝistoj de Gondoro antaŭvidis progresi plej rapide. Ni povos rajdi sur ĝi rapide kaj sen granda bruo.

— Do tial ke antaŭ ni estas danĝeraj faroj, kaj ni bezonos nian tutan forton, — diris Eomero, — mi konsilas, ke ni nun ripozu kaj ekiru de ĉi tie dumnokte, kaj tiel kalkulu nian ekiron, ke ni alvenu la kampojn, kiam la morgaŭo estos maksimume hela, aŭ kiam nia estro signalos.

La reĝo konsentis pri tio, kaj la komandantoj foriris. Sed baldaŭ Elfhelmo revenis.

— La skoltoj trovis nenion raportendan post la griza arbaro, moŝto, — li diris, — krom nur du virojn mortintajn kaj du mortajn ĉevalojn.

— Nu? — diris Eomero. — Kial gravas?

— Tial, moŝto: ili estis mesaĝistoj de Gondoro; Hirgono estis unu el ili, eble. Nu, lia mano plu tenis la Ruĝan Sagon, sed lia kapo estis forhakita. Kaj krome jeno: laŭ la postsignoj ŝajnas, ke ili fuĝis *okcidenten*, kiam ili pereis. Laŭ mia interpreto, ili trovis la malamikojn jam sur la ekstera muro, aŭ tiun atakantaj, kiam ili revenis; kaj tio nepre okazis antaŭ du noktoj, se ili uzis laŭ sia kutimo freŝajn ĉevalojn el la stafetaj stacioj. Ili ne povis atingi la Urbon kaj returniĝis.

— Ve! — diris Teodeno. — Sekve Denetoro ne ricevis informojn pri nia rajdado kaj malesperos pri nia alveno.

— *Neceso prokraston ne toleras, tamen pli bone estas malfrue ol neniam*, — diris Eomero. — Kaj eble en la nuna epoko tiu malnova proverbo pruviĝos pli trafa ol iam antaŭe, de kiam la homoj parolas buŝe.

Estis nokte. Ambaŭflanke de la vojo la armeo de Rohano moviĝis silente. Nun la vojo ĉirkaŭante la limojn de Mindoluino turniĝis suden. Malproksime kaj preskaŭ rekte antaŭe vidiĝis ruĝa ardo sub la nigra ĉielo kaj la flankoj de la montego baŭmis malhele antaŭ ĝi. Ili proksimiĝis al Ramaso de Pelenoro, sed ankoraŭ ne tagiĝis.

La reĝo rajdis meze de la plej antaŭa trupo, kun sia domanaro ĉirkaŭe. La *eored* de Elfhelmo sekvis; kaj nun Gaja rimarkis, ke Dernkasko rezignis sian lokon kaj en la mallumo moviĝis seninterrompe antaŭen, ĝis fine li rajdis ĝuste malantaŭ la reĝa gardistaro. Okazis

haltigo. Gaja aŭdis voĉojn antaŭe, kiuj mallaŭte interparolis. Revenis skoltoj, kiuj riskis antaŭen preskaŭ ĝis la muro. Ili alvenis la reĝon.

— Troviĝas grandaj fajroj, moŝto, — diris unu el ili. — La Urbon ĉirkaŭringas fajro, kaj la kampo plenplenas de malamikoj. Sed ĉiuj ŝajnas direktitaj al la atako. Laŭ mia plej preciza takso malmultaj restas sur la ekstera muro, kaj tiuj malatentas, okupate pri detruado.

— Ĉu vi memoras la vortojn de la sovaĝulo, mastro? — diris alia skolto. — Dumpace mi loĝas sur aperta montetaro. Vidfaro estas mia nomo, kaj ankaŭ al mi la aero portas mesaĝojn. Jam la vento turniĝas. Venas spiro el la sudo; en ĝi estas marodoro, kvankam malforta. La mateno alportos novajn aferojn. Super la fumo estos aŭrore, kiam vi trapasos la muron.

— Se vi parolas verece, Vidfaro, vivu post tiu ĉi tago dum jaroj da benateco! — diris Teodeno. Li sin turnis al siaj proksimaj domanoj, kaj li parolis nun per klara voĉo tiel, ke ankaŭ multaj rajdistoj en la unua *eored* aŭdis lin:

— Jam venis la horo, rajdistoj de Markio, filoj de Eorlo! Antaŭ vi estas malamikoj kaj fajro, kaj fore malantaŭe estas viaj hejmoj. Tamen malgraŭ tio, ke vi batalos sur fremda kampo, la gloro, kiun vi rikoltos tie estos poreterne via. Ĵurojn vi donis: nun plenumu ĉiujn, al la reĝo kaj lando kaj amikeca kunligo!

Viroj batis ŝildojn per lancoj.

— Eomero, mia filo! Vi estras la unuan *eoredon*, — diris Teodeno, — kaj ĝi sekvos la reĝan standardon en la mezo. Elfhelmo, gvidu vian trupon dekstren, kiam vi trapasos la muron. Kaj Grimboldo gvidos la sian maldekstren. La ceteraj trupoj malantaŭe sekvu tiujn tri avangardajn laŭ la eblecoj. Ataku kie ajn la malamikoj grupiĝas. Aliajn planojn ni ne povas fari, ĉar ni ankoraŭ ne scias, kiel statas la aferoj sur la kampo. Jam for, kaj timu neniun mallumon!

La avangarda trupo forrajdis kiel eble plej rapide, ĉar ankoraŭ plu profundis la malhelo, kia ajn estis la ŝanĝiĝo antaŭdirita de Vidfaro. Gaja rajdis post DERNKASKO, kroĉiĝante per la maldekstra mano, dum per la dekstra li klopodis liberigi sian glavon en ties ingo. Li jam sentis amare la veron de la vortoj de l' maljuna reĝo: *en tia batalo, kion vi farus, Gajadoko?* “Ĝuste tion ĉi, — li pensis: — ŝarĝi rajdiston, kaj esperi maksimume pri restado sur mia sidloko kaj ne ĝismorte batiĝi per galopantaj hufoj!”

Temis pri ne pli ol unu leŭgo ĝis kie pli frue staris la eksteraj muroj. Baldaŭ ili venis al tiuj; tro baldaŭ, laŭ Gaja. Sovaĝaj krioj eksplodis, kaj okazis iom da armila klakado, sed tio estis mallonga. La orkoj okupitaj ĉirkaŭ la muroj estis malmultaj kaj konsternitaj, kaj ilin oni rapide mortigis aŭ forpelis. Antaŭ la ruinigita norda pordego en Ramaso denove haltis la reĝo. La unua *eoredo* vicigis malantaŭ li kaj ĉirkaŭ li ambaŭflanke. Dernkasko restis proksima al la reĝo, kvankam la trupo de Elfhelmo troviĝis dekstre malproksime. La viroj de Grimboldo turniĝis flanken kaj venis ĝis breĉego en la muro pli oriente.

Gaja gapis de post la dorso de Dernkasko. En la foro, eble je dek mejloj aŭ pli, estis granda brulado, sed inter ĝi kaj la rajdistoj flamis fajrolinioj en larĝa krescento, plej proksime je leŭga distanco. Li povis vidi malmulte pli sur la malhela ebenaĵo, kaj ĝis tiam li vidis nek esperon pri mateno, nek sentis ajnan venton, ŝanĝitan aŭ neŝanĝitan.

La armeo de Rohano silente pluiris sur la kampon de Gondoro, enverŝigante malrapide sed seninterrompe, kvazaŭ leviĝanta tajdo tra breĉoj en ŝtonmuro, kiun la homoj supozis sekura. Sed la menso kaj volo de la Nigra Komandanto direktiĝis tute al la pereanta urbo, kaj ĝis tiam ne atingis lin sciigo avertanta, ke liaj planoj estas malperfek-taj.

Post kelka tempo la reĝo kondukis siajn virojn iom orienten, por interveni inter la sieĝaj fajroj kaj la eksteraj kampoj. Ankoraŭ ili estis nedefiitaj, kaj ankoraŭ Teodeno nenion signalis. Finfine li denove haltis. La Urbo estis jam pli proksima. En la aero estis brulodoro kaj vera ombro de la morto. La ĉevaloj estis maltrankvilaj. Sed la reĝo sidis sur Neĝkolaĵo senmove, rigardante la agonion de Minaso Tirit, kvazaŭ subite trafita je angoro, aŭ je timego. Li ŝajnis ŝrumpi, venkita de maljunaĝo. Gaja mem sentis kvazaŭ lin ŝarĝus granda pezo de hororo kaj dubo. Lia koro batis malrapide. La tempo ŝajnis ŝvebi en malcerteco. Ili venis tro malfrue! Tro malfrue estis pli malbone ol neniam! Eble Teodeno ŝanceliĝos, klinos sian maljunan kapon, turniĝos, forŝteliĝos por sin kaŝi en la montaro.

Tiam Gaja subite sentis fine kaj eksterdube ŝanĝiĝon. Vento blovis al lia vizaĝo! Lumo ekbriletis. Tre, tre fore en la sudo la nuboj malklare videblis kiel distaj grizaj formoj, alruliĝantaj, drivaj: post ili kuŝis mateno.

Sed tiumomente okazis flagro, kvazaŭ fulmo suprensaltus de la

tero sub la Urbo. Dum brula sekundo ĝi staris fore blindigante en nigro kaj blanko, ĝia plej supra turo kiel ekbrila kudrilo; kaj poste, kiam la mallumo revenis, aŭdiĝis ruliĝante tra la kampoj laŭta *bu-u-u-um*.

Je tiu sono la kurbiĝanta figuro de l' reĝo subite rektiĝis. Alta kaj fiera li ŝajnis denove; kaj stariĝante sur la piedingoj li kriis laŭte, pli klare ol iu ajn ĉeestanto iam antaŭe aŭdis mortemulon:

*Leviĝu, rajdistoj de Teodeno!
Vekiĝas fifaroj: fajro kaj buĉo!
Lancoj skuiĝos, ŝildoj splitiĝos,
ruĝos glavtag' antaŭ suna leviĝo!
Rajdu jam, rajdu jam! Rajdu Gondoren!*

Poste li kaptis grandan kornon de sia standardisto Gutlafo, kaj blovis per ĝi tian noton, ke ĝi dissplitiĝis. Kaj tuj ĉiuj kornoj en la armeo aŭdiĝis muzike, kaj la sonorado de la kornoj de Rohano tiuhore similis ŝtormon sur la ebenaĵo kaj tondron en la montaro.

Rajdu jam, rajdu jam! Rajdu Gondoren!

Subite la reĝo kriis al Neĝkolaĵo kaj la ĉevalo saltis antaŭen. Post li flirtis en la vento lia standardo, blanka ĉevalo sur kampo verda, sed li pli rapidis ol ĝi. Post li tondris la kavaliroj de lia domo, sed li ĉiam antaŭis ilin. Eomero rajdis tie kun la blanka ĉevalvosto sur la kasko flosanta pro lia rapido, kaj la vicoj de la unua *eored* muĝis kiel ondego ŝaŭmanta surborden, sed Teodeno estis neatingebla. Sorĉita li ŝajnis, aŭ la batalfuriozo de liaj prapatroj trakuris kiel freŝa fajro en liaj vejnoj, kaj lin subtenis Neĝkolaĵo kvazaŭ dion pratempan, samkiel Oromeon la Grandan en la batalo de la Valaroj, kiam la mondo estis juna. Lia ora ŝildo estis nekovrita, kaj jen! ĝi brilis kiel bildo de la suno, kaj la herbo ekflagris verde ĉirkaŭ la piedoj de lia rajdbesto. Ĉar venis la mateno, mateno kaj vento de sur la maro; kaj mallumo estis forigita, kaj la armeoj de Mordoro ululis, kaj timego trafis ilin, kaj ili fuĝis kaj mortis, kaj la hufoj koleraj trarajdis ilin. Kaj tiam la tuta armeo de Rohano ekkantis, kaj ili kantis, dum ili mortigis, ĉar la ĝojo de batalo regis ilin, kaj la bruo de ilia bela kaj terura kantado atingis eĉ la Urbon.

Ĉapitro 6

LA Batalo sur la Kampoj Pelenoraj

Sed tiu estis nek ĉeforko nek bandito, kiu gvidis la atakon kontraŭ Gondoro. La malhelo tro frue rompiĝis, antaŭ la dato difinita por tio fare de lia Mastro; la sorto provizore perfidis lin, kaj la mondo turniĝis kontraŭ lin; venko forglitis el lia kroĉo ĝuste kiam li etendis la manon por ekkapti ĝin. Sed longa estis lia brako. Li ankoraŭ komandis, manipulante grandajn potencojn. Reĝo, Ringofantomo, Estro de la nazguloj, li posedis multajn armilojn. Li forlasis la Pordegon kaj malaperis.

Teodeno, Reĝo de Markio, alvenis la vojon inter la Pordego kaj la Rivero, kaj li turnis sin al la Urbo, kiu jam proksimis malpli ol unu mejlon. Li malpliigis iomete sian rapidecon, serĉante novajn malamikojn, kaj liaj kavaliroj alvenis ĉirkaŭ lin, kaj Dernkasko estis kun ili. Antaŭe, pli proksime al la muroj, la viroj de Elfhelmo troviĝis inter la sieĝiloj, hakante, mortigante, pelante malamikojn en la fajroputojn. Preskaŭ la tuta norda duono de Pelenoro estis konkerita, kaj tie brulis tendaroj, orkoj fuĝis al la Rivero kiel gregoj antaŭ la ĉasantoj; kaj la rohananoj iris tien-reen laŭvole. Sed ili ankoraŭ ne venkis la sieĝon, nek konkeris la Pordegon. Antaŭ ĝi staris multaj kontraŭuloj, kaj sur la fora duono de la ebenaĵo estis aliaj armeoj ankoraŭ ne kontraŭbatalitaj. Sude post la vojo kuŝis la ĉefarmeoj de la haradanoj, kaj tie la rajdistoj ĉirkaŭis la standardon de sia ĉefo. Kaj tiu elrigardis, kaj en la burĝonanta lumo li vidis la standardon de la reĝo, kaj ke ĝi estas tre ege antaŭ la batalo kaj ĉirkaŭas ĝin malmultaj homoj. Tiam plenigis lin ruĝa kolerego kaj li kriis laŭte kaj vidigante sian flagon, nigran serpenton sur skarlato, li alvenis kontraŭ la blankan ĉevalon kaj la verdon kun amasego da viroj; kaj la elingigo de la sabroj de la suduloj similis ekbrilon de steloj.

Tiam Teodeno konsciiĝis pri li kaj ne volis atendi lian atakon, sed kriinte al Neĝkolaĵo li senrezerve sturmis por saluti lin. Granda estis la bruo de ilia renkontiĝo. Sed la blanka furiozo de la norduloj brulis pli

arde, kaj pli lerta estis ilia kavalireco pri lancoj longaj kaj avidaj. Malpli multaj ili estis, sed ili fendis la sudulojn kiel fulmofajro en arbaro. Senhalte tra la amaso premis sin Teodeno, filo de Tengelo, kaj lia lanco splitiĝis, kiam li deĵetis ilian ĉefon. Elingiĝis lia glavo, kaj li spronis al la standardo, hakis foston kaj portanton; kaj la nigra serpento falis. Poste la nemortigita restaĵo de ilia rajdistaro turniĝis kaj fuĝis foren.

Sed jen! subite en mezo de la reĝa gloro, lia ora ŝildo malbrilis. La nova mateno forviŝiĝis sur la ĉielo. Mallumiĝis ĉirkaŭ li. Ĉevaloj baŭmis kaj kriĉis. Viroj elseligitaj kaŭris sur la tero.

— Al mi! Al mi! — kriis Teodeno. — Supren Eorlidoj! Timu neniu malhelon! — Sed Neĝkolaĵo terurite staris alte, batante la aeron, kaj poste kun alta kriĉo falegis flanken: nigra sago trapikis ĝin. La reĝo falis sub ĝi.

La ombrego malsupreniĝis kvazaŭ falanta nuboj. Kaj jen! ĝi estis kreaĵo flugilhava: se birdo, do pli granda ol ĉiuj ceteraj birdoj, kaj ĝi estis nuda, kaj havis nek pikilojn, nek plumojn, kaj ĝiaj larĝaj flugiloj estis kvazaŭ araneaĵoj da felo inter fingroj kornozaĵoj; kaj ĝi fetoris. Kreaĵo el mondo pli antikva ĝi eble estis, kies specio, postrestante en forgesitaj montoj malvarmaj sub la luno, postvivis sian epokon, kaj en hida nestejo generis ĉi lastan pretertempo idaron, taŭgan por misaĵoj. Kaj la Malhela Mastro prenis tiun kaj nutris ĝin per abomena viando, ĝis ĝi kreskis pli granda ol mezuriĝis ĉiuj aliaj flugantaĵoj; kaj tiam li donis ĝin al sia servisto, ke ĝi estu ties rajdbesto. Suben, suben ĝi venis, kaj poste, faldinte siajn fingroaranaĵojn, ĝi eligis raŭkan krion, kaj sidiĝis sur la kadavro de Neĝkolaĵo, kroĉante ĝin per siaj ungegoj, kurbigante sian longan nudan kolon.

Sur ĝi sidis figuro, nigre mantelita, enorma kaj minaca. Kronon el ŝtalo tiu portis, sed inter ĝia rando kaj vesto videblis nenio, krom nur terura brilo de okuloj: la Mastro de la Nazguloj. Al la aero li reiris, alvokinte sian rajdbeston antaŭ ol la malhelo foriĝis, kaj nun li revenis, alportante ruĝon, malesperigante esperon, kaj venkon mortkondamnante. Grandan nigran madzon li svingis.

Sed Teodeno ne estis tute forlasita. Liaj domaj kavaliroj kuŝis ĉirkaŭ li mortigitaj, aŭ estis portitaj foren regite per la frenezeco de siaj rajdbestoj. Tamen ankoraŭ tie staris unu: la juna Dernkasko, fide-la pli ol tima; kaj li ploris, ĉar li amis sian estron kiel patron. Tra la tuta sturmado Gaja estis portita sendamaĝe malantaŭ li, ĝis venis la Ombrego; kaj tiam forĵetis ilin terurita Ventfola kaj nun kuradis

frenezece sur la ebenaĵo. Gaja rampis kvarmembre kvazaŭ obtuzigita besto, kaj tiom lin regis timego, ke li blindis kaj vomemis.

“Servisto reĝa! Servisto reĝa! — lia koro kriis interne. — Vi devas resti ĉe li. *Kvazaŭ patro vi estos al mi, vi diris*”. — Sed lia volo ne respondis, kaj lia korpo skuiĝis. Li aŭdacis nek malfermi siajn okulojn nek rigardi supren.

Tiam tra la mensa nigro ŝajnis al li, ke li aŭdas Dernkaskon paroli; tamen jam la voĉo ŝajnis stranga, memoriganta pri alia voĉo, kiun li iam konis.

— For, fia vivkadavro, mastro de kadavraĵoj! Lasu en paco la mortintojn!

Malvarma voĉo respondis:

— Ne venu inter la nazgulo kaj ties predo! Aŭ viavice vin li ne mortigos. Li forportos vin al la domoj de lamentado, preter ĉia mal-lumo, kie via karno estos vorita kaj via ŝrumpinta menso lasiĝos nuda antaŭ la Okulo Senpalpebra.

Glavo sonoritis elingigita.

— Faru laŭvole; sed tion mi malhelpos, se mi povos.

— Ĉu malhelpi? Stultulo. Neniu viro vivanta kapablas malhelpi min!

Tiam Gaja aŭdis la plej strangan el ĉiuj sonoj en tiu horo. Ŝajnis, ke Dernkasko ridas, kaj la klara voĉo estis kiel la sonoro de ŝtalo.

— Sed viro vivanta mi ne estas! Vi rigardas virinon. Eovina mi estas, filino de Eomundo. Vi staras inter mi kaj mia mastro kaj parenco. Foriru, se vi ne estas senmorta! Ĉar ĉu vivanton aŭ sorĉan vivmortinton, mi bategos vin, se vi tuŝos lin.

La flugilhava kreaĵo kriĉis al ŝi, sed la Ringofantomio nenion respondis kaj silentis, kvazaŭ subite dubanta. Mirego momente venkis la timon de Gaja. Li malfermis siajn okulojn kaj la malhelto forviŝiĝis de ili. Je kelkaj paŝoj de li sidis la bestego, kaj ĉio ĉirkaŭ ĝi ŝajnis malluma, kaj super ĝi baŭmis la Nazgulestro kvazaŭ ombro malespera. Iom maldekstre fronte al ili staris ŝi, kiun li nomis Dernkasko. Sed la kasko de ŝia sekreteco jam forfalis, kaj ŝia bela hararo, liberigita de ligaĵoj, ekbrilis pale ora sur ŝiaj ŝultroj. Ŝiaj okuloj grizaj kiel la maro estis malmolaj kaj minacaj, kaj tamen sur ŝiaj vangoj estis larmoj. Glavo estis en ŝia mano, kaj ŝi levis sian ŝildon antaŭ la hororaj okuloj de sia malamiko.

Eovina tiu estis, kaj ankaŭ Dernkasko. Ĉar en la menso de Gaja fulmis memoro pri tiu vizaĝo, kiun li vidis dum la rajdado el Dunharo:

vizaĝo de iu, kiu iras serĉante la morton, ĉar mankis espero. Kompatu plenigis lian koron kaj ankaŭ mirego, kaj subite vekigis la lante-ĉenda kuraĝo de lia raso. Li pugnigis sian manon. Ŝi ne mortu, tiom bela, tiom senespera! Almenaŭ ŝi ne mortu sola, nehelpe.

La vizaĝo de ilia malamiko ne estis turnita al li, tamen li apenaŭ aŭdacis moviĝi, pro timo ke la mortigaj okuloj trafu lin. Malrapide, malrapide li komencis rampi flanken; sed la Nigra Komandanto, atentante dubeme kaj malice la virinon antaŭ si, ne pli rimarkis lin ol vermon en koto.

Subite la bestego batis siajn hidajn flugilojn, kaj ties vento estis fetora. Denove ĝi saltis en la aeron kaj poste falis rapide al Eovina, ŝrikante, frapante per la beko kaj ungoj.

Tamen ŝi daŭre ne paliĝis, rohana junulino, ido de reĝoj, svelta tamen ŝtalkingeca, belega tamen terura. Per rapida bato ŝi frapis, sperte kaj mortige. La etenditan kolon ŝi disduigis, kaj la hakita kapo falis kvazaŭ ŝtone. Ŝi retrosaltis kiam la figuro falegis pereinte, kun larĝaj flugiloj dismetitaj, kolapsinte sur la tero; kaj samtempe kun la falo forpasis la ombro. Lumo ĉirkaŭis ŝin, kaj ŝiaj haroj helis sub la sunleviĝo.

El la ruino leviĝis la Nigra Rajdanto, alta kaj minaca, baŭmanta super ŝi. Kun krio malamoplana, kiu pikis la orelojn mem venene, li faligis sian madzon. Ŝia ŝildo estis diserigita, kaj ŝia brako estis rompita; ŝi stumbe surgenuiĝis. Li klinis sin nubece super ŝin, kaj liaj okuloj ekbrilis; li levis sian madzon mortigocele.

Sed subite ankaŭ li stumblis antaŭen kun amara dolorkrio, kaj lia bato maltrafis, frapegante la teron. La glavo de Gaja trapikis lin de malantaŭe, ŝire penetrante la nigran mantelon kaj pasante supren sub la maŝkiraso, trafis la tendenon malantaŭ lia fortega genuo.

— Eovina! Eovina! — kriis Gaja. Tiam ŝanceliĝe, baraktante por stariĝi, per sia lasta forto ŝi enbatis sian glavon inter la kronon kaj la mantelon, dum la ŝultregoj kliniĝis antaŭ ŝi. La glavo rompiĝis flagre je multaj eroj. La krono forruliĝis tintante. Eovina falis antaŭen sur sian falintan malamikon. Sed jen! la mantelo kaj la maŝkiraso estis malplenaj. Senforme ili nun kuŝis sur la tero, ŝiritaj kaj ĉifitaj; kaj krio leviĝis en la tremegan aeron, kaj velkis ĝis akra ululo, forirante sur la vento, voĉo senkorpa kaj maldensa formortis, kaj estis englutita, kaj neniam plu aŭdiĝis en tiu epoko de la mondo.

Kaj tie staris la hobito Gajadoko meze de la mortigitaj, palpebrumante kvazaŭ strigo en taglumo, ĉar blindigis lin larmoj; kaj tra

nebleto li rigardis la blondan kapon de Eovina, dum ŝi kuŝis kaj ne moviĝis; kaj li rigardis la vizaĝon de la reĝo, falinta meze de sia gloro. Ĉar Neĝkoloĵo agoniante forruliĝis de li denove; tamen ĝi estis la misorto de sia mastro.

Gaja kliniĝis kaj levis lian manon por ĝin kisi, kaj jen! Teodeno malfermis siajn okulojn, kaj ili estis klaraj, kaj li parolis per voĉo kvieta tamen penanta.

— Adiaŭ, sinjoro Holbitlo! Mia korpo estas rompita. Mi iras al miaj prapatroj. Kaj eĉ en ties potenca kompanio mi jam ne hontos. Mi pereigis la nigran serpenton. Minaca mateno, kaj ĝoja tago, kaj ora sunsubiro!

Gaja ne povis paroli, sed ploris denove.

— Pardonu min, moŝto, — li diris finfine, — se mi malobeis vian ordonon, kaj tamen ne pli faris por servi vin, ol plori pro nia disiĝo.

La maljuna reĝo ridetis.

— Ne malĝoju! Estas pardonite. Granda koro ne estas rifuzebla. Vivu jam benate; kaj kiam vi sidos pace kun via pipo, pensu pri mi! Ĉar jam neniam mi sidos kun vi en Meduseldo, kiel mi promesis, nek aŭskultos vian herboscion. — Li fermis la okulojn, kaj Gaja kliniĝis apude. Baldaŭ li parolis denove. — Kie estas Eomero? Miaj okuloj malheliĝas, kaj mi volas vidi lin antaŭ ol mi foriros. Li devos esti reĝo post mi. Kaj mi volas sendi mesaĝon al Eovina. Ŝi, ŝi ne volis, ke mi forlasu ŝin, kaj jam mi ne revidos ŝin, pli karan ol filino.

— Mastro, mastro, — ekparolis Gaja plorsingulte, — ŝi estas... — sed tiumomente aŭdiĝis bruego, kaj ĉie ĉirkaŭe bloviĝis kornoj kaj trumpetoj. Gaja ĉirkaŭrigardis: li forgesis pri la milito kaj pri la tuta cetera mondo, kaj ŝajnis pasi multaj horoj post kiam la reĝo rajdis al sia falo, kvankam efektive tio estis nur mallonga tempo. Sed nun li vidis, ke minacas ilin ebleco implikiĝi en la mezo mem de la granda batalo, kiu baldaŭ okazos.

Novaj malamikaj trupoj alrapidadis laŭ la vojo de la Rivero; kaj de sub la muroj venis legioj de Morgulo; kaj de la sudaj kampoj venis infanterio de Harado kun rajdistoj antaŭe, kaj malantaŭ tiuj leviĝis grandaj dorsoj de *mumakoj*, sur kiuj estis militaj turoj. Sed norde la blanka kresto de Eomero estris la grandan fronton de la rohananoj, kiujn li denove kunigis kaj ordigis; kaj el la Urbo venis tuta armeo, kaj la arĝenta cigno de Dol Amroto estis portata avangarde, pelante la malamikojn for de la Pordego.

Momente trafulis la menson de Gaja ekpenso: “Kie estas

Gandolfo? Ĉu li ne ĉeestas? Ĉu li ne povintus savi la reĝon kaj Eovinan?" Sed ĝuste tiam alrajdis Eomero hastante, kaj kun li venis la domaj kavaliroj ankoraŭ vivantaj kaj jam mastrintaj siajn ĉevalojn. Ili mire rigardis la kadavron de la bestego tie kuŝanta; kaj iliaj rajdbestoj rifuzis proksimiĝi. Sed Eomero salte elseliĝis, kaj doloro kaj konsterniĝo trafis lin, kiam li alvenis la reĝon kaj staris tie silente.

Tiam unu el la kavaliroj prenis la reĝan standardon el la mano de Gutlafo la standardisto, kiu kuŝis mortinta, kaj li levis ĝin. Malrapide Teodeno malfermis siajn okulojn. Vidante la standardon, li signis, ke oni transdonu ĝin al Eomero.

— Saluton, Reĝo de Markio! — li diris. — Rajdu nun al venko! Adiaŭ Eovinan! — Kaj tiel li mortis, kaj ne sciis, ke Eovina kuŝas proksime. Kaj la apudstarantoj ploris kriante:

— Reĝo Teodeno! Reĝo Teodeno!

Sed Eomero diris al ili:

*Ne tro lamentadu! La reĝo potencis,
la mort' meritplenis. Kiam staros menhiro,
ploros virinoj. Vokas milito nun!*

Tamen dumparole li mem larmis.

— Liaj kavaliroj restu ĉi tie, — li diris, — kaj portu honore lian korpon de sur la kampo, por ke ne transrajdu ĝin la batalo! Jes, kaj ĉiujn aliajn el la reĝa korpuso, kiuj kuŝas ĉi tie. — Kaj li rigardis la mortigitojn, revokante ties nomojn. Tiam subite li ekvidis sian frat-inon Eovina tie, kie ŝi kuŝis, kaj li rekonis ŝin. Li staris momente kvazaŭ homo trapikita dumkrie de trakora sago, kaj poste lia vizaĝo mortpaliĝis, kaj leviĝis en la malvarma furiozo, tiel ke parolpovon li provizore perdis. Trafis lin humoro sorĉita.

— Eovina, Eovina! — li ekkriis finfine. — Eovina, kiel okazis, ke vi estas ĉi tie? Kia frenezo aŭ fimagio estas tio ĉi? Morto, morto, morto prenu nin ĉiujn.

Tiam ne konsiliĝinte, nek atendinte proksimiĝon de la urbaj viroj, li spronis rekte reen ĝis la fronto de la homamasego, kaj blovis kordon, kaj krie ordonis la atakon. Tra la kampo sonoris lia klara voĉo:

— Morto! Rajdu, rajdu al ruino kaj la fino de l' mondo!

Kaj post tio la armeo komencis moviĝi. Sed la rohananoj ne plu kantis. "Morto", — ili kriis per unusona voĉo laŭta kaj terura, kaj pli-rapidante kvazaŭ granda tajdo ilia batalo ĉirkaŭimpetis la falintan reĝon kaj pasis formuĝante suden.

Kaj daŭre la hobito Gajadoko staris tie palpebrumante tra larmoj, kaj neniŭ alparolis lin, efektive neniŭ ŝajnis atenti lin. Li forviŝis la larmojn, kaj kliniĝis por levi la verdan ŝildon donitan al li de Eovina, kaj tiun li pendigis dorse. Poste li serĉis sian glavon, kiun li lasis fali; ĉar ĝuste kiam li batis, lia brako sentiĝis, kaj nun li povis uzi nur la maldekstran. Kaj jen! tie kuŝis lia armilo, sed la klingo fumis kiel seka branĉo enŝovita en fajron; kaj dum li rigardis ĝin, ĝi tordiĝis, velkis kaj konsumiĝis.

Tiel pasis la glavo de Dolmenejo, laboraĵo el la okcidento. Sed ĝoje konus ĝian sorton tiu, kiu prilaboris ĝin malrapide antaŭlonge en la Norda Reĝlando, kiam la dunadanoj estis junaj, kaj ĉefa inter ties malamikoj estis la timiga regno Angmaro kaj ĝia sorĉista reĝo. Neniŭ alia klingo, eĉ se ĝin utiligus manoj pli potencaj, povus tiel draste vundi tiun malamikon, fendante la mortvivan karnon, rompante la sorĉon, kiu ligis ĝiajn nevideblajn tendenojn al ĝia volo.

Oni levis la reĝon, kaj surmetinte mantelojn sur lanclangojn sukcesis forporti lin al la Urbo; kaj aliaj levis milde Eovinan kaj portante sekvis lin. Sed la virojn el la reĝa domanaro ili ankoraŭ ne povis elkampigi; ĉar sep reĝaj kavaliroj falis tie, kaj inter ili estis Deorvino, ilia ĉefo. Do oni kuŝigis ilin aparte de iliaj malamikoj kaj la terura bestego kaj ĉirkaŭ ilin starigis lancojn. Kaj poste kiam ĉio estis farita, viroj revenis kaj bruligis fajron tie, kaj bruligis la kadavron de la bestego; sed por Neĝkolaĵo ili fosis tombon kaj starigis ŝtonon, sur kiu estis ĉizita en la lingvoj de Gondoro kaj Markio:

*Servist' fidela, sed al mastro perfida,
id' de Leĝerpiedo, Neĝkolaĵo rapida.*

Verda kaj longa kreskis la herbo sur Neĝkolaĵa Monteto, sed ĉiam nigra kaj senherba estis la tero, kie brulis la bestego.

Jam malrapide kaj triste Gaja marŝis apud la portantoj, kaj li ne plu atentis la batalon. Li estis lacega kaj dolorplena, kaj liaj membroj tremis kvazaŭ pro malvarmumo. El la Maro venis pluvego, kaj ŝajnis ke ĉio ploras pro Teodeno kaj Eovina, sufokante per grizaj larmoj la fajrojn en la Urbo. Tra nebuleto li baldaŭ vidis proksimiĝanta la avangardon de la viroj el Gondoro. Imrahilo, princo de Dol Amroto, alrajdis kaj haltis antaŭ ili.

— Kian ŝarĝon vi portas, viroj el Rohano? — li kriis.

— Reĝon Teodeno, — ili respondis. — Li estas mortinta. Sed reĝo Eomero jam rajdas en la batalo: tiu kun la blanka kresto sur la vento.

Tiam la princo forlasis sian ĉevalon, kaj genuis apud la kadavroportilo honore al la reĝo kaj ties granda alsturmo, kaj li ploris. Kaj stariĝinte li rigardis al Eovina kaj miris.

— Jen virino, ĉu ne? — li diris. — Ĉu eĉ la virinoj de la rohananoj venis militi pro nia bezono?

— Ne! Nur unu, — oni respondis. — Ŝi estas Damo Eovina, fratino de Eomero; kaj ni sciis nenion pri ŝia rajdado ĝis la nuna horo, kaj multe ni bedaŭras tion.

Tiam la princo vidante ŝian belon, kvankam ŝia vizaĝo estis pala kaj malvarma, tuŝis ŝian manon, dum li kliniĝis por rigardi ŝin de pli proksime.

— Viroj de Rohano! — li ekkriis. — Ĉu inter vi estas kuracistoj? Ŝi estas vundita, eble mortige, sed mi opinias, ke ŝi daŭre vivas. — Kaj li tenis antaŭ ŝiaj malvarmaj lipoj la poluritan brakŝirmilon sur sia brako, kaj jen! iom da nebuleto tegis ĝin apenaŭ videble.

— Rapido necesas, — li diris kaj sendis iun rerajdanton rapide al la Urbo por helpo. Sed profunde riverencinte al la mortigitoj, li adiaŭis ilin kaj surseliĝinte forrajdis en la batalon.

Kaj la batalado jam furioziĝis sur la kampoj de Pelenoro; kaj leviĝis alte la bruego de armiloj kun kriado de la homoj kaj henado de la ĉevaloj. Kornoj estis blovataj kaj blekis trumpetoj, kaj la *mumakoj* muĝis pelate en militon. Sub la sudaj muroj de la Urbo la piedsoldatoj el Gondoro nun peliĝis kontraŭ la legiojn de Mordoro, kiuj plu multnombris tie. Sed la rajdistoj iris orienten por helpi Eomeron: Hurino la Alta, Gardisto de l' Ŝlosiloj, kaj la Estro de Losarnaĥo, kaj Hirluino el la Verdaj Montoj, kaj princo Imrahilo la Bela ĉirkaŭita de siaj kavaliroj.

Ne tro frue venis ilia helpo al la rohananoj; ĉar fortune sin turnis kontraŭ Eomero, kaj lia furiozo perfidis lin. La kolerego de lia alsturmo tute venkis la fronton de liaj malamikoj, kaj kojnegoj de liaj rajdistoj tute trapasis la vicojn de la suduloj, konsternante ties rajdistojn kaj trete ruinigante ties piedsoldatojn. Sed kie ajn venis la *mumakoj*, tien rifuzis iri la ĉevaloj, kiuj timegis kaj forturnis sin; kaj la grandaj monstroj estis ne atakitaj, kaj staris kvazaŭ defendaj turoj, kaj la haradanoj reformiĝis ĉirkaŭ ili. Kaj se la rohananoj jam de la komenco estis trioble superitaj de la nuraj haradanoj, baldaŭ ilia situacio iĝis

malpli favora, ĉar novaj trupoj nun alverŝiĝis el Osgiliado sur la kampon. Tie ili estis starigitaj por trarabo de la Urbo kaj la perforto de Gondoro, atendante la alvokon de sia komandanto. Tiu jam estis detruita, sed Gotmogo, la estro de Morgulo, sendis ilin en la lukton; orientulojn kun hakiloj, variagojn el Khando, sudulojn skarlatvestitajn, kaj el fora Harado nigrajn virojn kvazaŭ duontrolojn kun blankaj okuloj kaj ruĝaj langoj. Iuj jam alrapidis malantaŭ la rohananoj, aliaj iris okcidenten por fortenti la soldatojn de Gondoro kaj malhelpi, ke ili aliĝu al Rohano.

Ĝuste kiam la tago ekmalfavoris Gondoron, kaj ties espero ŝanceliĝis, aŭdiĝis nova kriego en la Urbo, kiam estis jam meze de l' mateno, kaj granda vento blovis, kaj la pluvo flugis norden, kaj la suno brilis. En tiu klara aero gardistoj sur la muroj vidis malproksime novan timindaĵon, kaj forlasis ilin ilia lasta espero.

Ĉar Anduino, de la kurbo ĉe Harlondo, tiel fluis, ke el la Urbo la homoj povis laŭrigardi ĝin longe tra pluraj leŭgoj, kaj akra vidulo povis vidi proksimiĝantajn ŝipojn. Kaj rigardante tien ili ekkriis konsternite, ĉar antaŭ la ekbrila riverfluo ili vidis nigran ŝiparon ventpelatan: fregatojn kaj ŝipojn ampleksajn kun multaj remiloj, kaj kun nigraj veloj ventoplenaj.

— La korsaroj de Umbaro! — homoj kriis. — La korsaroj de Umbaro! Vidu! La korsaroj de Umbaro venas! Do Belfalaso estas kaptita, kaj la Etiro, kaj perdiĝis Lebenino. La korsaroj atakas nin! Jen la lasta bato de la sorto!

Kaj iuj senordone, ĉar neniu troveblis por komandi ilin en la Urbo, kuris al la sonoriloj kaj sonorigis alarmon; kaj iuj blovis trumpete la signalon de la retroiro.

— Reen al la muroj! — ili kriis. — Reen al la muroj! Revenu al la Urbo antaŭ ol ĉiuj estos superverŝitaj! — Sed tiu vento, kiu rapidigis la ŝipojn, forblovis ilian tutan bruegon.

La rohananoj efektive ne bezonis informojn aŭ alarmon. Tre klare ili povis mem vidi la nigrajn velojn. Ĉar Eomero jam troviĝis apenaŭ pli ol unu mejlon for de Harlondo, kaj granda amaso de liaj unuaj malamikoj estis inter li kaj la haveno, dum novaj malamikoj venis kirlige de malantaŭe, fortranĉante lin disde la princo. Nun li alrigardis la Riveron, kaj espero mortis en lia koro, kaj tiun venton, kiun li antaŭe benis, li nun nomis malbenita. Sed la armeo de Mordoro estis kuraĝigita, kaj pleniĝis de freŝaj avido kaj furiozo dum ili kriegante alsturmis.

Rigora estis nun la humoro de Eomero, kaj lia menso denove klaris. Li blovigis la kornojn por voki al siaj standardoj ĉiujn, kiuj povis tien alveni; ĉar li pensis starigi grandan ŝildmuron en la fino, kaj stari tie batalante ĝis ĉiuj pereus, kaj fari kantindaĵon sur la kampo de Pelenoro, eĉ se neniu homo restus en la okcidento por memori la lastan Reĝon de Markio. Do li rajdis ĝis verda teramaseto kaj tie starigis sian standardon, kaj la Blanka Ĉevalo kuris flirte en la vento.

*El dubo, el malhelo al la tagleviĝo
mi venis subsune kantante, glavon eltire.
Esperofinen mi rajdis kaj korrumpiĝen:
jam koler', ruiniĝo kaj ruĝa noktiĝo!*

Tiujn versojn li elparolis, tamen li ridis dirante ilin. Ĉar denove inundis lin batalavido; kaj li plu estis nevundita, kaj li estis juna, kaj li estis reĝo: mastro de potenco popolo. Kaj jen! ĝuste dum li priridis malesperon, li rigardis denove la nigrajn ŝipojn, kaj li levis sian glavon por defii ilin.

Kaj tiam lin trafis miro kaj granda ĝojego; kaj li ĵetis supren sian glavon en la sunlumo kaj kantis rekaptinte ĝin. Kaj ĉies okuloj sekvis lian rigardon, kaj vidu! sur la plej antaŭa ŝipo malfaldiĝis granda standardo, kaj la vento vidigis ĝin, kiam ĝi turnis sin al Harlondo. Tie floris la Blanka Arbo, kaj tiu reprezentis Gondoron; sed Sep Steloj ĉirkaŭis ĝin, kaj super ĝi estis alta krono, la signoj de Elendilo, kiujn posedis neniu regnestro dum jaroj nenombreblaj. Kaj la steloj flamis en la sunbrilo, ĉar ili estis kreitaj el gemoj de Arvena, filino de Elrondo, kaj la krono brilis en la mateno, ĉar ĝi estis farita el mitrilo kaj oro.

Tiel venis Aragorno, filo de Aratorno, Elesaro, heredinto de Isilduro, el la Padoj de la Mortintoj, portate de vento de la Maro al la reĝlando Gondoro; kaj la ĝojo de la rohananoj estis torento de ridado kaj flagrado da glavoj, kaj la ĝojo kaj mirego de la Urbo estis muziko de trumpetoj kaj sonorado de sonoriloj. Sed la armeojn de Mordoro trafis konfuziĝo, kaj tio ŝajnis al ili granda sorĉistaĵo, ke iliaj propraj ŝipoj estis plenaj de la malamikoj; kaj nigra timego inundis ilin, ĉar ili konstatis, ke la tajdoj de la sorto turniĝis kontraŭ ilin kaj ilia pereco estis proksima.

Orienten rajdis la kavaliroj de Dol Amroto, pelante antaŭ si la malamikojn: trolhomojn, variagojn kaj orkojn, kiuj malamis la

sunlumon. Suden paŝegis Eomero kaj ili fuĝis antaŭ lia vizaĝo, kaj ili estis kaptitaj inter martelo kaj amboso. Ĉar jam viroj saltis el la ŝipoj sur la kajojn de Harlondo kaj kuregis norden kvazaŭ ŝtormo. Tien venis Legolaso, kaj Gimlio swinganta sian hakilon, kaj Halberado kun la standardo, kaj Eladano kaj Elrohiro kun steloj sur la fruntoj, kaj la durmanaj dunadanoj, la disiruloj de la nordo, kondukante grandan bravularon el Lebenino kaj Lamedono kaj la sudaj provincoj. Sed antaŭ ĉiuj iris Aragorno kun la Flamo de l' Okcidento, Andurilo kiel nove ĉendita fajro, Narsilo reforĝita same terurige, kiel en pratempo; kaj sur lia frunto estis la stelo de Elendilo.

Kaj tiel finfine Eomero kaj Aragorno renkontiĝis meze de la batalo, kaj ili apogis sin per siaj glavoj kaj rigardis unu la alian kaj estis ĝojaj.

— Tiel ni renkontiĝas denove, malgraŭ tio, ke ĉiuj armeoj de Mordoro staris inter ni, — diris Aragorno. — Ĉu mi ne diris tion ĉe Kornburgo?

— Tion vi diris, — respondis Eomero, — sed espero ofte trompas, kaj tiam mi ne sciis, ke vi estas homo antaŭvidiva. Tamen duoble benita estas helpo neatendita, kaj neniam estis pli ĝoja renkontiĝo de amikoj. — Kaj ili manpremis. — Ankaŭ ne pli ĝustatempe, — diris Eomero. — Neniel tro frue vi venas, amiko mia. Multe da perdo kaj malĝojo trafis nin.

— Do ni venĝu tion antaŭ ol paroli pri ĝi! — diris Aragorno, kaj kune ili rerajdis al la batalo.

Malfacilan lukton kaj longan laboron ili ankoraŭ havis, ĉar la sudanoj estis kuraĝaj kaj severaj, kaj en malespero batalemaj, kaj la orientanoj estis fortaj kaj militharditaj kaj petis neniom da indulgo. Kaj tial en tiu loko kaj alia, apud bruligitaj farmdomoj aŭ grentenejoj, sur montetoj aŭ teramasoj, sub muroj kaj sur kampoj, ankoraŭ ili kuniĝis kaj reformiĝis kaj batalis ĝis la forvelko de la tago.

Tiam la suno finfine iris malantaŭ Mindoluinon kaj plenigis la ĉielon per granda brulado, tiel ke la montetoj kaj montoj tinkturiĝis kvazaŭ sange; fajro ardis en la Rivero, kaj la herbo de Pelenoro kuŝis ruĝa en la noktiĝo. Kaj en tiu horo finiĝis la granda batalo sur la kampe de Gondoro; kaj eĉ unu vivanta malamiko ne restis interne de la perimetro de Ramaso Ekor. Ĉiuj estis mortigitaj krom tiuj, kiuj fuĝis por morti aŭ droni en la ruĝa ŝaŭmo de la Rivero. Malmultaj revenis orienten al Morgulo aŭ Mordoro; kaj al la lando de la haradanoj venis

nur rakonto el la malproksimo: onidiro pri la kolerego kaj teruro de Gondoro.

Aragorno, Eomero kaj Imrahilo rajdis reen al la Pordego de la Urbo, kaj ili jam lacis ekster ĝojo aŭ malĝojo. Tiuj tri estis nevunditaj, ĉar tia estis ilia sorto kaj la lerto kaj potenco de iliaj armiloj, kaj vere malmultaj aŭdacis konfronti ilin aŭ rigardi iliajn vizaĝojn dum la horo de ilia kolero. Sed multaj aliaj estis vunditaj aŭ lamigitaj aŭ mortigitaj sur la kampo. Hakiloj tranĉis Forlongon, dum li batalis sola kaj senĉevala; kaj Duilino el Morthondo kaj lia frato ambaŭ estis trample mortigitaj kiam ili atakis la *mumakojn*, kondukinte siajn pafarkistojn pli proksimen por celi la okulojn de la monstroj. Nek Hirluino la Bela revenos al Pinato Gelin, nek Grimboldo al Grimslado, nek Halberado, durmana disirulo, al la Norda Lando. Ne malmultaj pereis, famaj aŭ senrenomaj, kapitanoj aŭ soldatoj; ĉar tio estis granda batalo kaj la plenan sumon de ĝi neniu historio rakontis.

Do longe poste poeto en Rohano diris en sia kanto pri la dolmenoj de Mundburgo.

*Ni aŭdis pri l' kornoj en montoj sonoraj,
pri l' glavoj brilantaj en Suda reĝlando.
Paŝis ĉevaloj al Stoninglando
kiel vento matena. Ĉendiĝis milito.
Pereis Teodeno, potenca princido,
al oraj haloj kaj verdaj paŝtejoj
en nordaj kampoj neniam revene,
l' arma ĉefestro. Hardingo, Gutlafo,
Dunhero, Deorvino, la brava Grimboldo,
Herefaro, Herubrando, Horno, Fastredo,
batalis kaj falis en fora tereno:
en Montoj Mundburgaj sub hum' ili kuŝas
kun aliancanoj, princoj Gondoraj.
Nek bela Hirluino al mara montaro,
nek olda Forlongo al valoj florantaj
al Arnaĥo iam, lia propra hejmloko
reiris triumfe; nek altaj pafistoj
Derufin', Duilino, al akvo malhela,
marŝoj Morthondaj sub monta ombraro.
Morto matene kaj fine de l' tago
lordojn kaj ordinarulojn prenis, longe*

*jam dormas ili sub herbo Gondora
apud la Granda River' nun griza larmece
kaj brile arĝenta, tiam ĝi ruĝis
ruliĝe, akvo brue blekanta:
ŝaŭmo sanga flamis je sunsubiro;
vespere brulis montoj signalofajre;
ruĝis la roso en Ramaso Ekor.*

Ĉapitro 7

LA ŜTIPARO DE DENETORO

Kiam la malhela ombro ĉe la Pordego foriris, Gandolfo plu sidis senmove. Sed Grinĉjo stariĝis, kvazaŭ granda pezo estus forlevita de li; kaj li staris aŭskultante la kornojn, kaj ŝajnis al li, ke ili rompos al li la koron pro ĝojo. Kaj neniam dum postaj jaroj li povis aŭdi kornon en la malproksimo sen tio, ke larmoj aperis en liaj okuloj. Sed nun lia komisio subite revenis al lia memoro, kaj li kuris antaŭen. Tiumomente Gandolfo ekmoviĝis kaj parolis al Ombrofikso, kaj estis rajdonta tra la Pordego.

— Gandolfo, Gandolfo! — kriis Grinĉjo, kaj Ombrofikso haltis.

— Kial vi estas ĉi tie? — diris Gandolfo. — Ĉu ne estas leĝo en la Urbo, ke portantoj de la nigro kaj arĝento devas resti en la Citadelo, krom se la Mastro permesas, ke ili foriru?

— Tion li faris, — diris Grinĉjo. — Li forsendis min. Sed mi timas. Io terura eble okazos tie supre. La Mastro malsaĝiĝis, laŭ mia opinio. Mi timas, ke li sin mortigos, kaj mortigos ankaŭ Faramiron. Ĉu vi ne povas ion fari?

Gandolfo trarigardis la gapan Pordegon, kaj jam sur la kampoj li aŭdis la kreskantan bruon de batalado. Li pugnigis sian manon.

— Mi devas iri, — li diris. — La Nigra Rajdanto vagas, kaj li ankorau alportos al ni ruinojn. Mankas al mi tempo.

— Tamen Faramiro! — kriis Grinĉjo. — Li ne estas mortinta, kaj oni bruligos lin vivantan, se iu ne malhelpos ilin.

— Ĉu bruligos vivantan? — diris Gandolfo. — Pri kio temas? Rapidu!

— Denetoro iris al la Tomboj, — diris Grinĉjo, — kaj li kunprenis Faramiron, kaj li diris, ke ni ĉiuj estas bruligotaj, kaj li ne atendos, kaj oni devos konstrui ŝtiparon kaj bruligi sur ĝi lin kaj Faramiron. Kaj li sendis homojn por alporti lignon kaj oleon. Kaj mi sciigis Beregondon, sed mi timas, ke li ne riskos forlasi sian postenon: li sentinelas. Kaj ĉiuokaze, kion li povas fari? — Tiel Grinĉjo elverŝis sian rakonton, streĉante sin supren kaj tuŝante la genuon de Gandolfo per la tremaj manoj. — Ĉu vi povas savi Faramiron?

— Eble mi povas, — diris Gandolfo; — sed se jes, tiam mortos aliaj, mi timas. Nu mi devas veni, ĉar neniuj aliaj helpo povas atingi lin. Sed el tio ĉi venos miso kaj malĝojo. Eĉ en la mezo de nia fortikaĵo la Malamiko kapablas trafi nin: ĉar ĝuste lia volo enmiksiĝas.

Tiam decidiĝinte li agis rapide; kaj levinte Grinĉjon kaj lin sidiginte antaŭ sin, per vorto li turnis Ombrofikson. Supren laŭ la ascendaj vojoj de Minaso Tirit ili klakadis, dum la milita bruoj kreskis malantaŭ ili. Ĉie viroj stariĝis el siaj malespero kaj timego, kaptante siajn armilojn, kriante unu al alia: “Rohano venis!” Komandantoj kriis, kompanioj apeliĝis; multaj jam marŝis suben al la Pordego.

Ili renkontis princon Imrahilo, kaj tiu vokis al ili:

— Kien nun, Mitrandiro? La rohananoj batalas sur la kampoj de Gondoro! Ni devas kunigi ĉiujn troveblajn fortojn.

— Vi bezonas ĉiujn virojn kaj pli, — diris Gandolfo. — Laŭeble rapidu. Mi venos, kiam mi povos. Sed mi havas komision pri Mastro Denetoro, kiu estas neprokrastebla. Komandu dum la foresto de la Mastro!

Ili pluiris; kaj dum ili plialtiĝis kaj proksimiĝis al la Citadelo, ili sentis la venton sur siaj vizaĝoj, kaj ili ekvidis brileton de la mateno en foro, lumon kreskantan sur la suda ĉielo. Sed tiu alportis al ili malmulte da espero, sensciaj pri la misaĵo, kiu kuŝis antaŭ ili, timantaj veni tro malfrue.

— La mallumo forpasas, — diris Gandolfo, — sed ĝi ankoraŭ kuŝas peze sur tiu ĉi Urbo.

Ĉe la pordo de la Citadelo ili trovis neniun sentinelon.

— Do Beregondo iris, — diris Grinĉjo pli espere. Ili forturnis sin kaj rapidis laŭ la vojo al la Fermita Pordo. Ĝi staris larĝe aperta, kaj la gardisto kuŝis antaŭ ĝi. Li estis mortigita, kaj lia ŝlosilo estis forprenita.

— Fare de la Malamiko! — diris Gandolfo. — Tiajn farojn li ŝatas: amiko militu kontraŭ amiko; lojalo dividita pro konfuziĝo de koroj. — Li elseliĝis kaj ordonis, ke Ombrofikso reiru al sia stalo. — Ĉar, amiko mia, vi kaj mi devis antaŭlonge reiri al la kampoj, sed aliaj aferoj prokrastigas min. Tamen venu rapide, kiam mi vokos!

Ili pasis la pordon kaj marŝis suben laŭ la serpentuma vojo. Lumo kreskis, kaj la altaj kolonoj kaj ĉizitaj figuroj apudvoje preteriris malrapide kvazaŭ grizaj fantomoj.

Subite la silento estis rompita, kaj ili aŭdis sube kriojn kaj

sonoradon de glavoj: tiajn sonojn, kiaj ne estis aŭditaj en la sanktaj lokoj depost la konstruado de la Urbo. Finfine ili alvenis al Rat Dine-no kaj rapidis al la Domo de la Regantoj, kiu baŭmis sub sia granda kupolo en la krepusko.

— Ĉesu! Ĉesu! — kriis Gandolfo, saltante antaŭen al la ŝtona ŝtuparo antaŭ la pordo. — Ĉesigu ĉi frenezajon!

Ĉar tie estis la servistoj de Denetoro kun glavoj kaj torĉoj en la manoj; sed sola sub la portiko sur la plej alta ŝtupo staris Beregondo, vestita per la nigro kaj arĝento de la gardistaro; kaj li forbaris al ili la pordon. Du el ili jam falis pro lia glavo, makulante la sanktejon per sia sango; kaj aliaj malbenis lin, nomante lin eksterleĝulo kaj perfidinto de la Mastro.

Ĝuste kiam Gandolfo kaj Grinĉjo kuris antaŭen, ili aŭdis en la domo de la mortintoj la voĉon de Denetoro krianta:

— Rapidu, rapidu! Faru laŭ mia ordono! Mortigu por mi tiun reneĝaton! Aŭ ĉu mi mem devos tion fari?

Tiam la pordo, kiun Beregondo maldekstramane tenis fermita, estis abrupte malfermita, kaj tie malantaŭ li staris la Mastro de la Urbo, alta kaj minaca; lumo flamsimila estis en liaj okuloj, kaj li tenis elingigitan glavon.

Sed Gandolfo saltis supren laŭ la ŝtupoj, kaj la homoj retroiris antaŭ li kaj kovris siajn okulojn; ĉar lia alveno similis envenon de blanka lumo en lokon malhelan, kaj li venis ege kolera. Li levis sian manon, kaj dum bato mem la glavo de Denetoro flugis alten kaj eliris el lia man-teno kaj falis malantaŭ li en la ombroj de la domo; kaj Denetoro retropaŝis antaŭ Gandolfo mirigite.

— Kio estas tio ĉi, Mastro? — diris la sorĉisto. — La domoj de la mortintoj ne taŭgas al vivantoj. Kaj kial viroj batalas ĉi tie en la sanktejo, kiam sufiĉe da milito okazas antaŭ la Pordego? Aŭ ĉu nia Malamiko venis eĉ al Rat Dineno?

— Ekde kiam la Mastro de Gondoro devas pravigi sin al vi? — demandis Denetoro. — Aŭ ĉu mi ne rajtas ordoni al miaj servistoj?

— Vi rajtas, — diris Gandolfo. — Sed aliaj rajtas kontraŭstari vian volon, kiam ĝi turniĝas al frenezo kaj miso. Kie estas via filo Faramiro?

— Li kuŝas interne, — diris Denetoro, — brulanta, jam brulanta. Ili bruligis fajron en lia karno. Sed baldaŭ forbrulos ĉiuj. La Okcidento malsukcesis. Ĝi detruigis en granda incendio, kaj ĉio finiĝos. Cindro! Cindro kaj fumo forblovotaj per la vento!

Gandolfo, vidante la frenezon, kiu okupis lin, timis, ke li jam plenumis ian misaĵon, kaj li impetis antaŭen kun Beregondo kaj Grinĉo malantaŭe, dum Denetoro retroiris ĝis li haltis apud la tablo interne. Sed tie ili trovis Faramiron, plu sonĝantan en sia febro, kuŝanta sur la tablo. Ligno estis staplita sub la tablo kaj alte ĉirkaŭ ĝi, kaj ĉio estis saturita je oleo, eĉ la vestaĵoj de Faramiro kaj la tukoj; sed ankoraŭ ne estis ĉendita la brulaĵo. Tiam Gandolfo vidigis la forton, kiu en li estis kaŝita, samkiel la lumo de lia potenco estis kaŝita sub lia griza mantelo. Li suprensaltis sur la ŝtipojn, kaj levinte la malsanulon senstreĉe li resaltis suben, kaj portis lin al la pordo. Sed dum li faris tion, Faramiro ĝemis kaj alvokis sian patron dumsonĝe.

Denetoro tikegis kvazaŭ vekiĝanta el tranco, kaj la flamo formortis en liaj okuloj, kaj li ekploris; kaj li diris:

— Ne forprenu de mi mian filon! Li alvokas min.

— Li vokas, — diris Gandolfo, — sed vi ankoraŭ ne rajtas veni al li. Ĉar li devas serĉi kuracon sur la sojlo de la morto, kaj eble ne trovi ĝin. Intertempe via rolo estas eliri al la batalo en via Urbo, kie eble atendas vin morto. Tion vi scias en via koro.

— Li ne revekiĝos, — diris Denetoro. — Batalado vanas. Kial ni deziru vivi pli longe? Kial ni ne iru morten flank-al-flanke?

— Aŭtoritato ne estas donita al vi, Reganto de Gondoro, decidi la horon de via morto, — respondis Gandolfo. — Kaj nur la reĝoj paganaj, sub la regno de la Malhela Potenco, faris tiel, mortigante sin en fiero kaj malespero, murdante sian parencaron por faciligi la propran morton.

Poste, trapasinte la pordon, li prenis Faramiron el la mortiga domo kaj kuŝigis lin sur la kadavroportilon, sur kiu li estis alportita, kaj kiu estis nun starigita sub la portiko. Denetoro sekvis lin, kaj staris tremante, rigardante sopire la vizaĝon de sia filo. Kaj momente, dum ĉiuj silentis kaj senmovis, rigardantaj la Mastron en ties agonio, li ŝanceliĝis.

— Venu! — diris Gandolfo. — Ni estas bezonataj. Multon vi ankoraŭ povos fari.

Tiam subite Denetoro ridis. Li staris denove alta kaj fiera, kaj repaŝinta rapide al la tablo li levis de sur ĝi la kusenon, al kiu lia kapo estis apogita. Poste, veninte al la enirejo li flanken ŝovis la kovrilon, kaj jen! li tenis inter la manoj *palantiron*. Kaj kiam li levis ĝin, ŝajnis al la spektantoj, ke la globo ekardas pro interna flamo, tiel ke la magran vizaĝon de la Mastro prilumis kvazaŭruĝa fajro, kaj ĝi ŝajnis

ĉizita el ŝtono dura, akra pro nigraj ombroj, nobla, fieraj, kaj terura. Liaj okuloj ekbriletis.

— Ĉu fiero kaj malespero! — li kriis. — Ĉu vi supozis, ke blindas la okuloj de la Blanka Turego? Ne, mi vidis pli ol vi scias, Griza Folulo. Ĉar via espero estas nur sencio. Iru do kaj laboru kurace! Eliru kaj batalu! Vanto. Dum iomete da tempo vi eble triumfos sur la kampo, dum unu tago. Sed la Potenco nun leviĝanta nevenkeblas. Al tiu ĉi Urbo nur la unua fingro de ties mano ĝis nun etendiĝis. La tuta oriento moviĝas. Kaj jam nun la vento de via espero trompas vin, kaj alblas laŭ Anduino ŝiparon kun nigraj veloj. La Okcidento malsukcesis. Jam tempo estas, ke ĉiuj foriru, kiuj ne volas esti sklavo.

— Tiaj konsiloj efektive certigos la Malamikan venkon, — diris Gandalfo.

— Do esperu plu! — ridis Denetoro. — Ĉu mi ne konas vin, Mitrandiro? Vi esperas regi anstataŭ mi, stari malantaŭ ĉiu trono, norde, sude kaj okcidente. Mi tralegis vian menson kaj ties politikon. Ĉu mi ne scias, ke vi ordonis al jena duonulo daŭre silenti? Ke vi alportis lin ĉi tien, por ke li estu spiono en mia ĉambro mem? Kaj tamen dum nia interparolo mi ekkonis la nomojn kaj celon de ĉiuj viaj kunuloj. Do! Per la maldekstra mano vi volas uzi min dum kelka tempo kiel ŝirmilon kontraŭ Mordoro, kaj per la dekstra alvenigi tiun disirulon de la nordo por anstataŭi min. Sed mi diras al vi, Gandalfo Mitrandiro, ke mi ne estos via instrumento! Mi estas Reganto el la Domo de Anariono. Mi ne cedos por esti kaduka ĉambelano de iu parvenuo. Eĉ se lia pretendo estus pruvita al ni, lia deveno estas nur laŭ la linio de Isilduro. Mi ne kliniĝos al tia persono, la lasta el ĉifona domanaro jam longe senigita je nobeleco kaj digno.

— Kion do vi volus havi, — diris Gandalfo, — se via volo ricevus sian deziron?

— Mi volus, ke ĉio estu tia, kia ĝi estis dum ĉiuj tagoj de mia vivo, — respondis Denetoro, — kaj dum la tagoj de miaj prapatroj antaŭ mi: estri la Urbon en paco, kaj lasi post mi seĝon por mia filo, kiu estus la propra mastro kaj ne lernanto de sorĉisto. Sed se la sorto rifuzas tion al mi, tiam mi volas havi *nenion*: nek vivon reduktitan, nek duonigitan amon, nek honoron malfortigitan.

— Al mi ne ŝajnas, ke Reganto, kiu fidele transdonus sian regaĵon, estus reduktita rilate amon aŭ honoron, — diris Gandalfo. — Kaj minimume vi ne rabos al via filo lian elekton dum lia morto plu dubindas.

Je tiuj vortoj la okuloj de Denetoro reflamiĝis, kaj subakseliginte la ŝtonon li elingigis ponardon kaj paŝis al la kadavroportilo. Sed Beregondo saltis antaŭen kaj stariĝis antaŭ Faramiro.

— Do! — kriis Denetoro. — Vi jam forŝtelis duonon de la amo de mia filo. Nun vi ŝtelas ankaŭ la korojn de miaj kavaliroj, tiel ke ili tute rabas al mi mian filon en la fino. Sed almenaŭ pri tio ĉi vi ne kontraŭstaros mian volon: regi mian propran finon. Venu! — li kriis al siaj servistoj. — Venu, se vi ne estas ĉiuj perfidintoj!

Tiam du el ili kuris al li supren laŭ la ŝtuparo. Rapide li kaptis torĉon el la mano de unu el ili kaj resaltis en la domon. Antaŭ ol Gandolfo povis malhelpi tion, li ŝovis la ardaĵon inter la brulaĵojn, kaj tuj ili ekkrakis kaj muĝe flamiĝis.

Poste Denetoro saltis sur la tablon, kaj starante tie volvita per fajro kaj fumo, li levis la bastonon de sia reganteco, kiu kuŝis antaŭ liaj piedoj, kaj rompis ĝin per sia genuo. Ĵetinte la pecojn en la flamojn, li riverencis kaj sin kuŝigis sur la tablo, ambaŭmane premante al sia brusto la *palantiron*. Kaj oni diras, ke ĉiam poste, se iu rigardis en tiun ŝtonon, krom se li havus grandan volforton por alimaniere utiligi ĝin, li vidis nur du maljunajn manojn velkantaj en flamoj.

Gandolfo en malĝojo kaj hororo forturnis la vizaĝon kaj fermis la pordon. Kelkan tempon li staris penseme, silenta sur la sojlo, dum tiuj, kiuj estis ekstere, aŭdis la avidan muĝon de la fajro interne. Kaj poste Denetoro eligis laŭtan krion, kaj poste ne plu parolis, nek estis iam ajn denove vidita de mortemuloj.

— Tiel forpasas Denetoro, filo de Ekteliono, — diris Gandolfo. Poste li sin turnis al Beregondo kaj la servistoj de la Mastro, kiuj staris tie konsternite. — Kaj tiel pasas ankaŭ tiuj tagoj de Gondoro, kiujn vi konis: ĉu bone, ĉu malbone, ili finiĝis. Misajoj estas faritaj ĉi tie; sed nun metu flanken ĉiun malamikecon, kiu estas inter vi, ĉar ĝin aranĝis la Malamiko, kaj ĝi efikas laŭ lia volo. Vi estis kaptitaj per araneajo de kontraŭantaj devoj, kiun ne vi teksis. Sed pensu, vi servistoj de la Mastro, blinde obeemaj, ke sen la perfido de Beregondo ankaŭ Faramiro, komandanto de la Blanka Turego, jam estus bruligita. Forportu el tiu ĉi malfeliĉa loko viajn kamaradojn, kiuj pereis. Kaj ni portos Faramiron, Mastron de Gondoro, al loko, kie li povos dormi pace, aŭ morti, se tia estos lia sorto.

Gandolfo kaj Beregondo, levinte la portilon, forportis ĝin al la Domoj de Kuracado, dum malantaŭ ili marŝis Grinĉjo kun la klinita

kapo. Sed la servistoj de la Mastro staris rigardante kiel afliktitoj la domon de la mortintoj. Kaj ĝuste kiam Gandolfo atingis la finon de Rat Dineno aŭdiĝis bruego. Retrorigardante ili vidis la kupolon de la domo splitiĝi kaj fumojn eliĝi; kaj poste kun falego kaj muĝado de ŝtonoj ĝi falis en agitiĝo de fajro; sed plu nereduktite la flamoj dancis kaj flagris en la ruinaĵo. Tiam terurite la servistoj fuĝis kaj sekvis Gandalfon.

Fine ili revenis al la Pordo de l' Regantoj, kaj Beregondo rigardis malĝoje la pordiston.

— Tiun faron mi ĉiam bedaŭros, — li diris; — sed freneza hastemo pelis min, kaj li ne volis aŭskulti, sed elingigis glavon kontraŭ min. — Preninte la ŝlosilon, kiun li kaptis de la mortigito, li fermis la pordon kaj ŝlosis ĝin. — Tion ĉi oni nun devus transdoni al la Mastro Faramiro, — li diris.

— La princo de Dol Amroto komandas dum la foresto de la Mastro, — diris Gandolfo, — sed pro tio, ke li ne ĉeestas, mi devas mem respondeci pri tio ĉi. Mi ordonas, ke vi konservu la ŝlosilon kaj ĝin gardu, ĝis la Urbo denove estos ordigita.

Nun finfine ili pasis en la altajn rondojn de la Urbo, kaj en la mate-na lumo ili vojiris al la Domoj de Kuracado; kaj tiuj estis belaj domoj destinitaj prizorgi tiujn, kiuj grave malsanis, sed nun ili estis pretigitaj por flegado de vunditoj en batalo aŭ mortontoj. Ili staris ne malproksime de la Citadela Pordo, en la sesa rondo, apud ties suda muro, kaj ĉirkaŭ ili estis ĝardeno kaj razeno kun arboj, la sola tia loko en la Urbo. Tie loĝis la malmultaj virinoj, al kiuj estis permesite resti en Minaso Tirit, ĉar ili estis lertaj pri kuracado aŭ servantoj de la kuracistoj.

Sed ĝuste kiam Gandolfo kaj liaj kunuloj venis portante la portilon al la ĉefpordo de la Domoj, ili aŭdis kriegon, kiu leviĝis el la kampo antaŭ la Pordego kaj leviĝinte akre kaj trapike sur la ĉielon pasis, kaj formortis sur la vento. Tiel terura estis la krio, ke momente ĉiuj staris senmove, kaj tamen post ĝia forpaso subite iliaj koroj estis ekzaltitaj per tia espero, kian ili ne konis de kiam la mallumo venis el la oriento; kaj ŝajnis al ili, ke la lumo klariĝas kaj la suno trarompas la nubojn.

Sed la vizaĝo de Gandolfo estis serioza kaj malĝoja, kaj ordoninte, ke Beregondo kaj Grinĉjo prenu Faramiron en la Domojn de Kuracado, li suriris la apudajn murojn; kaj tiel kiel figuro ĉizita el blanko li

staris sub la nova suno kaj forrigardis. Kaj li vidis per la vidkapablo, donita al li, ĉion, kio okazis; kaj kiam Eomero elrajdis el la avangardo de la batalo kaj staris apud tiuj, kiuj falis sur la kampo, li suspiris, kaj li denove ĵetis sur sin sian mantelon, kaj foriris de sur la muroj. Kaj Beregondo kaj Grinĉjo trovis lin staranta penseme antaŭ la pordo de la Domoj, kiam ili eliris.

Ili rigardis lin, kaj dum kelka tempo li silentis. Fine li ekparolis:

— Amikoj miaj kaj ĉiuj homoj de tiu ĉi urbo kaj de la okcidentaj landoj! Aferoj ege tristaj kaj gloraj estas okazintaj. Ĉu ni ploru aŭ ĝoju? Pli ol ni esperis, la Komandanto de niaj malamikoj estas detruita, kaj vi aŭdis la eĥon de lia lasta malespero. Sed li ne iris sen doloro kaj amaraj perdoj. Kaj tion mi eble evitus, se ne okazus la frenezeco de Denetoro. Tiel longe etendiĝas la atingo de nia Malamiko! Ve! Sed nun mi konstatas, kiel lia volo povis eniri la kernon mem de la Urbo.

» Kvankam la Regantoj supozis, ke tio estas sekreto konservata nur de ili, jam longe mi scias, ke ĉi tie en la Blanka Turego, kiel ĉe Ortanko, unu el la Sep Ŝtonoj estas gardata. Dum la tagoj de sia saĝo Denetoro ne arogis al si uzi ĝin, nek defii Saŭronon, konante la limojn de la propra forto. Sed lia saĝo velkis; kaj mi timas, ke dum kreskis la danĝero de lia regno li enrigardis la Ŝtonon kaj estis trompita: pli ol unufoje, mi konjektas, post kiam Boromiro foriris. Li estis tro forta por submetiĝi al la volo de la Malhela Potenco, tamen li vidis nur tion, kion tiu Potenco permesis al li. La informoj, kiujn li akiris, sendube ofte utilis al li; tamen la vizio de la granda potenco de Mordoro, kiu estis montrita al li, nutris la malesperon en lia koro ĝis ĝi renversis lian menson.

— Jam mi komprenas tion, kio ŝajnis al mi stranga! — diris Grinĉjo, tremegante pro la rememoro dumparole. — La Mastro foriris el la ĉambro en kiu kuŝis Faramiro; kaj nur post lia reveno mi pensis la unuan fojon, ke li estas ŝanĝita, maljuna kaj kaduka.

— Estis ĝuste en la horo mem, en kiu Faramiro estis portita al la Turego, ke multaj el ni vidis strangan lumon en la plejalta ĉambro, — diris Beregondo. — Sed ni vidis pli frue tiun lumon, kaj jam delonge en la Urbo vastiĝis onidiro, ke la Mastro de tempo al tempo luktis enpense kontraŭ sia Malamiko.

— Ve! do mi konjektis prave, — diris Gandolfo. — Tiel la volo de Saŭrono eniris en Minason Tirit; kaj tial mi estas prokrastigita ĉi tie. Kaj ĉi tie mi estos devigata resti, ĉar baldaŭ min ŝarĝos aliaj taskoj, ne nur Faramiro. Nun mi devas iri suben por renkonti la venontajn. Mi

vidis sur la kampo ion, kio tre malĝojigas mian koron, kaj eble realiĝos eĉ pli granda malĝojo. Akompanu min, Grinĉjo! Sed vi, Beregon-do, devas reiri al la Citadelo kaj rakonti tie al la ĉefgardisto ĉion, kio okazis. Estos lia devo, bedaŭrinde, eksigi vin el la gardistaro, sed diru al li, ke se mi rajtas konsili lin, vi devus esti sendita al la Domoj de Kuracado por esti la gardanto kaj servisto de via komandanto, kaj esti ĉe lia flanko, kiam li vekiĝos — se tio iam ajn okazos. Ĉar ĝuste vi savis lin el la fajro. Iru tuj! Mi revenos baldaŭ.

Tion dirinte li forturniĝis kaj iris kun Grinĉjo malsupren al la subaj partoj de la urbo. Kaj ĝuste kiam ili rapide laŭvojis la vento alportis grizan pluvon, kaj ĉiuj fajroj malardiĝis, kaj leviĝis antaŭ ili granda fumego.

Ĉapitro 8

LA DOMOJ DE KURACADO

En la okuloj de Gaja estis nebuleto kaj laco, kiam ili proksimiĝis al la ruinigita Pordego de Minaso Tirit. Li malmulte atentis la ruinaĵon kaj buĉadon, kiuj estis ĉirkaŭe. Fajro, fumo kaj fetoro estis en la aero; ĉar multaj maŝinoj estis bruligitaj aŭ ŝetitaj en la fajroputojn, kaj ankaŭ multaj mortigitoj, dum ie-tie kuŝis multaj kadavroj de la grandaj sudaj monstroj, duonbruligitaj, aŭ rompitaĵoj per ŝtonĵeto, aŭ okule trapafitaĵoj de la kuraĝaj pafarkistoj de Morthondo. La pluvo jam ĉesis antaŭ kelka tempo, kaj la suno ekbrilis supre; sed la tutan suban urbon daŭre volvis arda fumaĵo.

Jam laboris homoj por liberigi vojon tra la postlasaĵo de la batalo; kaj nun tra la pordo eliris palankenistoj. Milde ili kuŝigis Eovinan sur molajn kusenojn; sed la korpon de la reĝo ili kovris per tukego ora, kaj ĉirkaŭ li ili portis torĉojn, kaj ties flamojn, palajn en la sunlumo, flirtigis la vento.

Tiel venis Teodeno kaj Eovina al la ĉefurbo de Gondoro, kaj ĉiuj kiuj vidis ilin, malkovris la kapon kaj riverencis; kaj ili trapasis la cindrojn kaj fumon de la bruligita cirklo, kaj pluiris supren laŭ la ŝtonaj stratoj. Al Gaja la supreniro ŝajnis epoklonga, vojaĝo sensenca en malagrablega sonĝo, plu kaj plu iranta al iu neklara fino, kiun la memoro ne povas rekapti.

Malrapide la lumoj de la torĉoj antaŭ li flagris kaj estingiĝis, kaj li marŝis en mallumo; kaj li pensis: "Tio ĉi estas tunelo kondukanta al tombo; tie ni restos poreterne". Sed subite en lian sonĝon falis voĉo vivanta.

— Nu, Gaja! Dank' al sorto mi trovis vin!

Li suprenrigardis kaj la nebuleto sur liaj okuloj iom klariĝis. Estis Grinĉjo! Ili estis vizaĝ-al-vizaĝe en mallarĝa vojeto, kaj krom ili en ĝi estis neniuj. Li frotis siajn okulojn.

— Kie estas la reĝo? — li diris. — Kaj Eovina? — Poste li stumblis kaj sidiĝis sur doman antaŭŝtupon kaj komencis plori denove.

— Ili iris supren en la Citadelon, — diris Grinĉjo. — Ŝajnas al mi,

ke vi ekdormis marŝante kaj iris malĝustan vojon. Kiam ni konstatis, ke vi ne estas kun ili, Gandolfo sendis min por serĉi vin. Kompatinda Gajĉjo! Kiom mi ĝojas revidante vin! Sed vi estas elĉerpita, kaj mi ne ĝenos vin per parolado. Sed diru al mi, ĉu vi estas difektita, aŭ vundita?

— Ne, — diris Gaja. — Nu, ne, mi opinias, ke ne. Sed mi ne povas uzi mian dekstran brakon, Grinĉjo, de kiam mi trapikis lin. Kaj mia glavo brulis kvazaŭ ŝtipeto.

La vizaĝo de Grinĉjo zorgoplenis.

— Nu, prefere venu kun mi laŭeble rapide, — li diris. — Se nur mi povus porti vin. Vi ne sufiĉe fortas por marŝi plu. Oni ne devis permesi, ke vi entute marŝu; sed vi devas pardoni ilin. Okazis tiom da teruraj aferoj en la Urbo, Gaja, ke unu kompatinda hobito venanta post la batalo estas facile pretervidebla.

— Esti pretervidata ne ĉiam estas misfortune, — diris Gaja. — Min pretervidis ĵus... ne, ne, pri tio mi ne volas paroli. Helpu min, Grinĉjo! Ĉio denove mallumiĝas, kaj mia brako tiom malvarmas.

— Apogu vin al mi, knabo Gaja! — diris Grinĉjo. — Ek jam! Piedon post piedo. Ne estas malproksime.

— Ĉu vi intencas entombigi min? — demandis Gaja.

— Ja ne! — diris Grinĉjo, klopodante soni feliĉa, kvankam lian koron vringis timo kaj kompatato. — Ne, ni iras al la Domoj de Kuracado.

Ili turnis sin el la voĵeto, kiu pasis inter altaj domoj kaj la ekstera muro de la kvara cirklo, kaj ili retrovis la ĉefstraton kondukantan supren al la Citadelo. Paŝon post paŝo ili iris, dum Gaja ŝanceliĝis kaj murmuris kvazaŭ dormanto.

“Mi neniam venigos lin tien, — pensis Grinĉjo. — Ĉu troveblas neniu por helpi min? Mi ne povas lasi lin ĉi tie”. Ĝuste tiam je lia surprizo knabo kure alvenis malantaŭe, kaj tiun pasanton li rekonis kiel Bergilon, filon de Beregondo.

— Saluton, Bergilo, — li vokis. — Kien vi iras? Mi ĝojas revidi vin, kaj ankoraŭ vivantan!

— Mi kure plenumas komisionojn por la kuracistoj, — diris Bergilo. — Mi ne povas halti.

— Ne haltu! — diris Grinĉjo. — Sed diru al ili tie supre, ke ĉe ni estas malsana hobito, *periano*, notu, veninta post la batalo. Al mi ŝajnas, ke li ne povas marŝi tiomdistance. Se Mitrandiro estos tie, li ĝojos pri la mesaĝo. — Bergilo plu kuris.

“Prefere mi atendu ĉi tie”, — pensis Grinĉjo. Do li permesis, ke Gaja sinku malrapide al la pavimo en lageto da sunlumo, kaj poste li sidiĝis apud li, kuŝigante la kapon de Gaja sur sia sino. Li palpis milde lian korpon kaj liajn membrojn, kaj prenis la manojn de sia amiko inter la proprajn. La dekstra mano sentiĝis glacieca.

Post nelonge Gandolfo mem venis, serĉante ilin. Li kliniĝis super Gaja kaj karesis ties frunton; poste li zorge levis lin.

— Li devis esti portita honore en tiun ĉi urbon, — li diris. — Li plene pravigis mian fidon; ĉar se Elrondo ne cedus al mi, neniu el vi ambaŭ ekirus; kaj tiuokaze multe pli misaj estus la fiaĵoj de ĉi tiu tago. — Li suspiris. — Kaj tamen jen por mi alia ŝarĝo, dum la tutan tempon la batalo balanciĝas.

Do finfine Faramiro, Eovina kaj Gajadoko estis enlitigitaj en la Domoj de Kuracado; kaj tie oni flegis ilin bone. Ĉar kvankam ĉiu klero estis lastatempe falinta de sia antikva pleno, la kuracarto en Gondoro plu estis saĝa kaj lerta pri kuracado de vundoj kaj difektoj kaj ĉiuj malsanoj, kiujn suferis homoj oriente de la Maro. Krom nur la maljuneco. Ĉar por tio ili trovis neniun kuracon, kaj efektive la longeco de iliaj vivoj jam velkis ĝis nur iomete pli ol ĉe aliaj homoj, kaj tiuj el ili, kiuj preterpasis kun vigleco dek jardekojn estis malmultaj, krom en iuj domoj pli purrasaj. Sed nun iliaj arto kaj klero estis perpleksigitaj; ĉar troviĝis multaj malsanaj pro morbo, kiun ili ne povis kuraci; kaj tiun ili nomis la Nigra Ombro, ĉar ĝi devenis de la nazguloj. Tiuj, kiujn ĝi trafis, malrapide pli kaj pli profunde ekdormis, kaj poste pasis al silento kaj terura malvarmego, kaj tiel mortis. Kaj ŝajnis al la flegantoj, ke la duonulon kaj la Damon de Rohano peze premis tiu morbo. Tamen kelkfoje dum pasado de la mateno ili parolis, murmurante en siaj sonĝoj; kaj la flegantoj aŭskultis ĉion diratan, eble esperante ekscii ion, kio helpus kompreni iliajn afliktojn. Sed baldaŭ ili komencis enfali la mallumon kaj, kiam la suno turniĝis okcidenten, sur iliajn vizaĝojn rampis griza ombro. Sed Faramiro brulis je febro, kiu ne konsentis malpliigi.

Gandolfo iris zorgoplena de unu al la alia, kaj al li estis rakontita ĉio, kion la flegantoj aŭdis. Kaj tiel pasis la tago, dum la batalego ekstere daŭris kun ŝanceliĝaj esperoj kaj strangaj novaĵoj; kaj plu Gandolfo atendis kaj rigardis kaj ne eliris; ĝis fine la ruĝa sunsubiro plenigis la tutan ĉielon, kaj la lumo trafenestra falis sur la grizajn vizaĝojn de la malsanuloj. Tiam ŝajnis al la apudstarantoj, ke en la

ardo la vizaĝoj ruĝiĝis kvazaŭ pro sano revenanta, sed tio nur estis mokado de la espero.

Tiam maljunulino Joreta, la plej aĝa el la virinoj kiuj servis en tiu domo, rigardante la belan vizaĝon de Faramiro ekploris, ĉar amis lin la tuta popolo. Kaj ŝi diris:

— Ve! se li mortos. Se nur troviĝus reĝoj en Gondoro, kiel siatempe estis laŭdire! Ĉar estas dirite en malnova saĝaĵo: *La reĝaj manoj estas la manoj de kuracisto*. Tiel oni ĉiam povas koni la laŭleĝan reĝon.

Kaj Gandolfo, kiu staris apude, diris:

— La homoj eble memoros longe viajn vortojn, Joreta! Ĉar en ili estas espero. Eble reĝo efektive revenis al Gondoro; aŭ ĉu vi ne aŭdis la strangan novaĵon venintan en la Urbon?

— Mi estis tro okupata pri tio kaj alio por atenti la tutan kriadon kaj vokadon, — ŝi respondis. — Mi nur esperas, ke tiuj murdemaj diabloj ne venos al tiu ĉi Domo kaj ne ĝenos la malsanulojn.

Tiam Gandolfo eliris haste, kaj jam la ĉiela fajro forbruliĝis, kaj la ardaĵ montetoj velkis, dum cindrogriza vespero rampis sur la kampojn.

Nun kiam la suno estis subiranta, Aragorno, Eomero kaj Imrahilo proksimiĝis al la Urbo kun siaj komandantoj kaj kavaliroj, kaj kiam ili alvenis antaŭ la Pordego, Aragorno diris:

— Vidu la sunon subiranta en granda fajro! Ĝi estas signo de la fino kaj falo de multaj aferoj, kaj ŝanĝiĝo je la tajdoj de la mondo. Sed tiu ĉi Urbo restis komandita de la Regantoj dum multaj longaj jaroj, kaj mi timas, ke se mi enirus ĝin neinvitite, dubo kaj debato eble leviĝus, kiuj ne devus okazi dum tiu ĉi milito. Mi ne eniros, nek starigos ajnan pretendon, ĝis vidiĝos, ĉu venkos ni aŭ Mordoro. Oni starigos miajn tendojn sur la kampo, kaj ĉi tie mi atendos la bonvenigon far la Mastro de la Urbo.

Sed Eomero diris:

— Vi jam levis la standardon de la Reĝoj kaj vidigis la emblemojn de la domo de Elendilo. Ĉu vi permesos, ke tiujn oni defiu?

— Ne, — diris Aragorno. — Sed mi taksas la tempon nematura; kaj mi ne emas al lukto krom kontraŭ nia Malamiko kaj liaj servistoj.

Kaj la princo Imrahilo diris:

— Viaj vortoj saĝas, Mastro, se iu kiu estas parenco de Mastro Denetoro rajtas konsili al vi pri tiu ĉi afero. Li estas fortvola kaj fiera,

sed maljuna; kaj lia humoro estis stranga de kiam lia filo estis faligita. Tamen mi ne volus, ke vi restu kiel almozulo ĉe la pordo.

— Ne kiel almozulo, — diris Aragorno. — Ni diru, kiel komandanto de la disiruloj, kiuj ne kutimiĝis al urboj kaj domoj el ŝtono. — Kaj li ordonis, ke lia standardo estu faldita; kaj li demetis la Stelon de la Norda Regno kaj transdonis ĝin por gardado al la filoj de Elrondo.

Tiam princo Imrahilo kaj Eomero de Rohano lasis lin kaj pasis tra la Urbo kaj la tumulto de la popolo, kaj supreniris al la Citadelo; kaj ili venis al la Halo de la Turego, serĉante la Reganton. Sed ili trovis lian seĝon neokupata, kaj antaŭ la podio kuŝis Teodeno, la reĝo de Markio, sur lito ornamita; kaj ĉirkaŭ ĝi staris dek du torĉoj, kaj dek du gardistoj, kavaliroj el Rohano kaj el Gondoro. Kaj la drapaĵoj de la lito estis el verdo kaj blanko, sed sur la reĝo estis sternita ĝis lia brusto la granda tuko ora, kaj sur ĝi lia glavo, kaj ĉepiede lia ŝildo. La lumo de la torĉoj briletis en lia blanka hararo kiel sunlumo en la ŝaŭmo de fontano, sed lia vizaĝo estis bela kaj juna, krom ke sur ĝi esprimiĝis tia paco, kian ne povas atingi la juneco; kaj ŝajnis, ke li dormas.

Post kiam ili staris kelkan tempon silentaj apud la reĝo, Imrahilo diris:

— Kie estas la Reganto? Kaj ankaŭ kie estas Mitrandiro?

Kaj unu el la gardistoj respondis:

— La Reganto de Gondoro estas en la Domoj de Kuracado.

Sed Eomero diris:

— Kie estas Damo Eovina, mia fratino, ĉar ĉu ŝi ne devus kuŝi apud la reĝo, kaj sen ne malpli da honoro? Kien oni metis ŝin?

Kaj Imrahilo diris:

— Sed Damo Eovina ankoraŭ vivis, kiam oni alportis ŝin ĉi tien. Ĉu vi tion ne sciis?

Tiam espero neatendita venis tiel subite al la koro de Eomero, kaj kun ĝi la mordo de zorgo kaj timo renovigitaj, ke li diris nenion pli, sed turnis sin kaj iris rapide el la halo; kaj la princo sekvis lin. Kaj kiam ili eliris, jam vesperiĝis kaj multaj steloj estis sur la ĉielo. Kaj venis Gandolfo piede kaj kun li iu mantelita per grizo; kaj ili renkontiĝis antaŭ la pordo de la Domoj de Kuracado. Kaj ili salutis Gandalfon kaj diris:

— Ni serĉas la Reganton, kaj oni diras, ke li estas en tiu ĉi Domo. Ĉu trafis lin iu damaĝo? Kaj Damo Eovina, kie estas ŝi?

Kaj Gandolfo respondis:

— Ŝi kuŝas interne kaj ne estas mortinta, sed estas proksima al la morto. Sed Mastron Faramiro vundis sago misa, kiel vi aŭdis, kaj li estas nun la Reganto: ĉar foriris Denetoro, kaj lia Domo estas cindrigita. — Kaj plenigis ilin doloro kaj miro pro la historio rakontita.

Sed Imrahilo diris:

— Do el la venko estas forŝirita la ĝojo, kaj ĝi estas amare pagita, se Gondoro kaj Rohano ambaŭ estas samtage rabitaj de siaj estroj. Eomero regas la rohananojn. Kiu regos la Urbon dume? Ĉu ni ne sendu nun por Mastro Aragorno?

Kaj la mantelito ekparolis:

— Li jam venis.

Kaj oni vidis, kiam li enpaŝis la lumon de la ĉeporda lanterno, ke tiu estas Aragorno, volvita per la griza mantelo de Lorieno sur la armaĵo, kaj portanta neniun alian signon ol la verdan ŝtonon de Galadriela.

— Mi venis, ĉar Gandalfo petas tion, — li diris. — Sed dume mi estas nur la Komandanto de la Dunadanoj el Arnoro; kaj la Mastro de Dol Amroto regos la Urbon ĝis vekiĝos Faramiro. Sed mia konsilo estas, ke Gandalfo regu nin ĉiujn en la tagoj sekvontaj kaj dum nia traktado pri la Malamiko. — Kaj tion ili konsentis.

Poste Gandalfo diris:

— Ni ne restu ĉe la pordo, ĉar la tempo urĝas. Ni eniru! Ĉar nur en la alveno de Aragorno restas ajna espero por la malsanuloj kuŝantaj en la Domo. Tiel parolis Joreta, saĝulino de Gondoro: *La reĝaj manoj estas la manoj de kuracisto, kaj tiel oni povas koni la laŭleĝan reĝon.*

Tiam Aragorno eniris la unua, kaj la aliaj sekvis. Kaj tie ĉe la pordo estis du gardistoj en la livreco de la Citadelo: unu alta, sed la alia apenaŭ kun alteco de knabo; kaj vidante ilin, li ekkriis laŭte en surprizo kaj ĝojo.

— Paŝegulo! Kiom belege! Ĉu vi scias, mi konjektis, ke estas vi sur la nigraj ŝipoj. Sed ĉiuj kriis “korsaroj” kaj rifuzis aŭskulti min. Kiel vi faris tion?

Aragorno ridis kaj kaptis la manon de la hobito.

— Vere bela renkontiĝo! — li diris. — Sed ankoraŭ ne estas tempo por vojaĝistaj rakontoj.

Sed Imrahilo diris al Eomero:

— Ĉu tiel ni alparolas niajn reĝojn? Tamen eble li portos sian kronon kun alia nomo!

Kaj Aragorno, aŭdinte lin, sin turnis kaj diris:

— Vere, ĉar en la alta malnova lingvo mi estas *Elesaro*, la Elfŝtono, kaj *Envinjataro* la Renoviganto, — li levis de sia brusto la verdan ŝtonon, kiu kuŝis tie. — Sed Paŝegulo estos la nomo de mia domanaro, se tiu iam estos starigita. En la alta lingvo ĝi ne sonos tiom malbone, kaj *Telkontaro* estos mi kaj ĉiuj miaj heredantoj.

Kaj post tio ili pasis en la Domon; kaj dum ili iris al la ĉambroj, en kiuj oni flegis la malsanulojn, Gandolfo rakontis pri la faroj de Eovina kaj Gajadoko:

— Mi longe staris apud ili, kaj komence ili multe parolis dum sia songado, antaŭ ol sinki en la mortan mallumon. Ankaŭ estas donite al mi vidi multajn aferojn malproksimajn.

Aragorno unue iris al Faramiro, kaj poste al Damo Eovina, kaj laste al Gaja. Rigardinte la vizaĝojn de la malsanuloj kaj vidinte ties dolorojn, li suspiris.

— Ĉi tie mi devos utiligi la tutajn potencon kaj lerton donitajn al mi, — li diris. — Se nur Elrondo estus ĉi tie, ĉar li estas la plejaĝa el nia tuta raso, kaj posedas la plej grandan potencon.

Kaj Eomero, konstatante, ke li estas samtempe malĝoja kaj lacega diris:

— Unue vi devas ripozi, ĉu ne, kaj almenaŭ manĝi iomete.

Sed Aragorno respondis:

— Ne, por tiuj tri, kaj plej frue por Faramiro, la tempo elĉerpiĝas. Necesas plej granda rapideco.

Poste li vokis Joretan kaj diris:

— Vi havas stokon da sanigaj herboj en tiu ĉi Domo, ĉu ne?

— Jes, sinjoro, — ŝi respondis, — sed ne sufiĉe, laŭ mia takso, por ĉiuj, kiuj bezonas ilin. Sed certe mi ne scias, kie ni akiros pli, ĉar ĉio misas en tiuj ĉi teruraj tagoj pro fajro kaj bruladoj, kaj la knaboj, kiuj plenumas komisionojn, tiel malmultas, kaj ĉiuj vojoj estas baritaj. Vidu, jam de tagoj sennombraj neniuj ĉaristoj venis el Losarnaĥo al la bazarero! Sed ni faras nian plejebilon en la Domo per tio, kion ni havas, kiel certe via moŝto scias.

— Mi prijuĝos tion post la vido, — diris Aragorno. — Ankaŭ alia afero malmultas, tempo por parolado. Ĉu vi havas *atelason*?

— Mi ne scias, vere, moŝto, almenaŭ ne tiunome. Mi iros enketi ĉe la herbmajstro, li konas ĉiujn malnovajn nomojn.

— Oni nomas ĝin ankaŭ *reĝfolio*, — diris Aragorno, — kaj eble vi konas ĝin laŭ tiu nomo, ĉar tiel nomas ĝin la kamparanoj en ĉi lastaj tagoj.

— Ho, tion! — diris Joreta. — Nu, se via moŝto tiel nomus ĝin komence, mi povus diri al vi. Ne, ni havas neniom, mi certas. Vidu, mi neniam aŭdis, ke ĝi posedas iun apartan virton; kaj fakte mi ofte diris al miaj fratinoj, kiam ni trovis ĝin en la arbaro: “reĝfolio, — mi diris, — jen stranga nomo, kaj mi scivolas, kial ĝi estas nomita tiel; ĉar se mi estus reĝo, mi kreskigus plantojn pli helajn en mia ĝardeno”. Tamen ĝi odoras agrable kiam pistita, ĉu ne? Se agrable estas la ĝusta vorto: eble pli taŭgas sanige.

— Vere sanige, — diris Aragorno. — Kaj nun, virino, se vi amas Mastron Faramiro, kuru tiel rapide, kiel via lango, kaj akiru por mi reĝfolion, se en la Urbo troviĝas almenaŭ unu folio.

— Kaj se ne, — diris Gandolfo, — mi rajdos al Losarnaĥo kun Joreta malantaŭe, kaj ŝi kondukos min al la arbaro, sed ne al siaj fratinoj. Kaj Ombrofakso instruos al ŝi la signifon de hasto.

Kiam Joreta iris, Aragorno ordonis, ke la ceteraj virinoj varmigu akvon. Poste li kaptis la manon de Faramiro, kaj metis sian alian manon sur la frunton de la malsanulo. Tion kovris ŝvito; sed Faramiro ne moviĝis, nek faris iun ajn indikon, kaj ŝajnis apenaŭ spiri.

— Li preskaŭ elĉerpiĝis, — diris Aragorno, sin turnante al Gandolfo. — Sed tio ne devenas de la vundo. Vidu! tiu resaniĝas. Se li estus trafita de sageto nazgula, li jam tiun nokton mortus. Tiun vundon kaŭzis sudula sago, laŭ mia konjekto. Kiu ĝin eltiris? Ĉu ĝi estas konservita?

— Eltiris ĝin mi, — diris Imrahilo, — kaj ĉesigis sangadon el la vundo. Sed la sagon mi ne retenis, ĉar ĉe ni multo farendis. Ĝi estis laŭ mia memoro ĝuste tia sago, kiajn uzas la suduloj. Tamen mi supozas, ke ĝi venis el la Ombroj supre, ĉar alie liaj febro kaj malsano ne estas kompreneblaj; ĉar la vundo estis nek profunda nek vivminaca. Kiel do vi legas la aferon?

— Laco, doloro pro la patra humoro, vundo, kaj antaŭ ĉio la Nigra Spiro, — diris Aragorno. — Li estas homo fortvola, ĉar li jam proksimiĝis sub la Ombro antaŭ ol li iam rajdis batali sur la eksteraj muroj. Malrapide la malhelo certe lin alrampis, ĝuste dum li luktis kaj klopodis teni sian postenon. Se mi estus ĉi tie pli frue!

Tiumomente venis la herbmajstro kaj diris:

— Via moŝto postulis reĝfolion, kiel nomas ĝin la kamparanoj, aŭ *atelason* laŭ la nobla lingvo, aŭ laŭ tiuj, kiuj iom konas la Valinoran...

— Tion mi postulis, — diris Aragorno, — kaj al mi ne gravas, ĉu vi diras *aseo aranion* aŭ *reĝfolio*, kondiĉe, ke vi havas iom da.

— Pardonu, mastro! — diris la viro. — Mi konstatas, ke vi estas klermajstro, ne nur milita komandanto. Sed ve! sinjoro, ni ne konservas tiun en la Domoj de Kuracado, kie nur la grave vunditaj aŭ malsanaj estas flegataj. Ĉar ĝi havas neniun virton laŭ nia scio, krom eble por dolĉigi fetoran aeron, aŭ forpeli provizoran malviglon. Krom, kompreneble, se vi atentigas rimaĵojn pratempajn, kiujn maljunulinoj tiaj, kia nia bona Joreta, plu ripetas senkomprene:

*Kiam blovas spir' perforta
kaj kreskas ombro morta
kaj ekas lumforpaso,
venu atelaso, atelaso!
Foriĝu la malsano
per tuŝ' de l' reĝa mano!*

Tio estas nur galimatio, bedaŭrinde, fuŝmiksita en la memoro de kadukulinoj. Ties signifon mi lasas al via prijuĝo, se entute ĝi havas tian. Sed gemaljunuloj ankoraŭ uzas infuzojn de la herbo kontraŭ kapdoloroj.

— Do nome de la reĝo iru trovi iun maljunulon malpli kleran kaj pli saĝan, kiu konservas iom en sia domo! — kriis Gandolfo.

Nun Aragorno genuis apud Faramiro, kaj tenis la manon sur ties frunto. Kaj la rigardantoj sentis, ke okazas iu luktego. Ĉar la vizaĝo de Aragorno griziĝis pro laco; kaj tiam kaj ĉiam li vokis la nomon de Faramiro, sed ĉiufoje pli mallaŭte al ilia aŭdo, kvazaŭ Aragorno mem estus forigita de ili, kaj marŝus fore en iu malhela valo, vokante iun perditon.

Finfine Bergilo enkuris, kaj li portis ses foliojn volvitajn en tuko.

— Jen estas reĝfolio, moŝto, — li diris, — sed, bedaŭrinde, ne freŝa. Ĝi certe estis plukita antaŭ minimume du semajnoj. Espereble ĝi taŭgos, moŝto? — rigardante Faramiron li ekploris.

Sed Aragorno ridetis.

— Ĝi taŭgos, — li diris. — Jam pasis la plej malbona. Restu kaj konsoliĝu.

Kaptinte du foliojn, li metis ilin sur siajn manojn kaj alspiris ilin, kaj poste li pistis ilin, kaj tuj plenigis la ĉambron vigla freŝeco, kvazaŭ la aero mem vekigis kaj vibrus, flagrante pro ĝojo. Kaj poste li ĵetis la

foliojn en la bovlojn da vaporanta akvo, alportitaj al li, kaj tuj ĉiu koroj malŝarĝiĝis. Ĉar laodoro, kiu venis al ĉiu el ili, similis memoron pri rosaj matenoj je senombra suno en iu lando, pri kiu la bela mondo printempa estas mem nur pasema memoro. Sed Aragorno stariĝis kvazaŭ refreŝigita, kaj liaj okuloj ridetis, dum li tenis la bovlon antaŭ la songanta vizaĝo de Faramiro.

— Ja mirinde! Kiu tion antaŭsupozus? — diris Joreta al virino apudstaranta. — Tiu lolo estas pli efika ol mi supozis. Ĝi memorigas min pri la rozoj de Imloto Meluio, kiam mi estis juna, kaj neniuj reĝoj rajtus postuli pli bonan.

Subite Faramiro ekmoviĝis, kaj li malfermis siajn okulojn, kaj li rigardis Aragornon, kiu kliniĝis super li; kaj lumo scia kaj ama eklumiĝis en liaj okuloj, kaj li ekparolis mallaŭte:

— Mastro, vi vokis min. Mi venas. Kion ordonas la reĝo?

— Ne plu promenu en la ombroj, sed vekigu! — diris Aragorno. — Vi estas laca. Ripozu iom, kaj manĝu, kaj estu preta, kiam mi revenos.

— Mi tion faros, Mastro, — diris Faramiro. — Kiu volus kuŝi senfare post la reveno de la reĝo?

— Do provizore adiaŭ! — diris Aragorno. — Mi devas iri al aliaj, kiuj bezonas min.

Li forlasis la ĉambron kun Gandolfo kaj Imrahilo; sed Beregondo kaj ties filo postrestis, senpovaj por subpremi sian ĝojon. Dum li sekvis Gandalfon kaj fermis la pordon, Grinĉjo aŭdis Joretan ekkrii:

— Reĝo! Ĉu vi aŭdis tion? Kion mi antaŭdiris? La manoj de kuracisto, mi ja diris. — Kaj baldaŭ disiris el la Domo, ke la reĝo efektive revenis inter ilin, kaj post milito li kunportis kuracadon; kaj la novaĝo trakuris la Urbon.

Sed Aragorno venis al Eovina kaj diris:

— Ĉi tie estas grava doloro kaj peza bato. La rompita brako estas flegita per taŭga lerto, kaj post kelka tempo ĝi resaniĝos, se ŝi estas sufiĉe forta por vivi. Vundita estas la ŝildbrako; sed la ĉefa misaĝo venis tra la glavbrako. En ĝi nun ŝajnas neniuj vivo, malgraŭ tio, ke ĝi estas nerompita.

» Ve! Ŝi stariĝis kontraŭ malamiko tro forta por ŝiaj menso kaj korpo. Kaj tiuj, kiuj levas armilon kontraŭ tia malamiko, devas esti pli harditaj ol ŝtalo, ke la bato ne detruu ilin. Sorto malbona starigis ŝin sur lian vojon. Ĉar ŝi estas junulino bela, damo plej bela el la domo de reĝinoj. Kaj tamen mi ne scias, kiel mi devus preparoli ŝin. Kiam mi

unuafaje rigardis ŝin kaj rimarkis ŝian malĝojon, al mi ŝajnis, ke mi vidas blankan floron starantan rekte kaj fiere, belforman kiel lilio, kaj tamen mi sciis, ke ĝi estas malmola, kvazaŭ prilaborita el ŝtalo de elfaj metiistoj. Aŭ ĉu eble frosto glaciigis ĝian sukon, kaj tial ĝi staris dolĉamare, ankoraŭ videble bela, sed vundita, baldaŭ falonta kaj mortonta? Ŝia malsano komenciĝis longe antaŭ tiu ĉi tago, ĉu ne, Eomero?

— Mi miras, ke vi demandas min, mastro, — li respondis. — Ĉar mi taksas vin senkulpa en tiu ĉi afero, kiel en ĉio alia; sed mi ne konstatis, ke Eovina, mia fratino, estas frostotuŝita, ĝis ŝi ekvidis vin je la unua fojo. Zorgojn kaj timojn ŝi havis kaj dividis kun mi, dum la tagoj de Vermlango kaj la sorĉado kontraŭ la reĝo; kaj ŝi servis la reĝon en kreskanta timo. Sed tio ne kondukis ŝin al jena krizo!

— Amiko mia, — diris Gandolfo. — Vi havis ĉevalojn, kaj armilajn farojn, kaj liberajn kampojn, sed ŝi, naskite en la korpo de junulino, posedis spiriton kaj kuraĝon minimume egalajn al la viaj. Sed ŝi estis kondamnita prizorgi maljunulon, kiun ŝi amis kiel patron, kaj observi lin falanta en mizeran senhonoran kadukecon; kaj ŝia rolo ŝajnis al ŝi pli malnobla ol tiu de bastono, per kiu li apogis sin.

» Ĉu vi supozas, ke Vermlango venenis nur la orelojn de Teodoro? *Kadukulo! Kio estas la Domo de Eorlo, se ne pajlotegmenta stokejo, kie banditoj drinkas en la stinkaĉo, kaj iliaj bubaĉoj rampaĉas sur la planko inter la hundoj?* Ĉu tiujn vortojn vi ne aŭdis pli frue? Sarumano parolis ilin, la instruinto de Vermlango. Kvankam mi ne dubas, ke Vermlango hejme volvis ties signifon per terminoj pli ruzaj. Mastro, se la amo de via fratino al vi, kaj ŝia volo ankoraŭ direktita al ŝia devo, ne bridus ŝiajn lipojn, vi eble aŭdus eĉ tiajn aferojn eskapi tra ili. Sed kiu scias, kion ŝi diris al la mallumo, sola dum la krizaj horoj de la nokto, kiam ŝia tuta vivo ŝajnis ŝrumpi, kaj la muroj de ŝia laŭbo pli fermiĝis ĉirkaŭ ŝi, budo por enfermi iun sovaĝan estaĵon?

Eomero silentis kaj rigardis sian fratinton, kvazaŭ meditante freŝe pri ĉiuj el la tagoj pasigitaj de ili kune. Sed Aragorno diris:

— Ankaŭ mi vidis tion, kion vi vidis, Eomero. Malmultaj doloroj inter la misokazoj de tiu ĉi mondo enhavas pli da amareco kaj honto por koro vira, ol konstati la amon de damo bela kaj kuraĝa, kiu estas ne reciprokebla. Malĝojo kaj kompatato persekutis min ekde kiam mi lasis ŝin senesperan en Dunharo kaj rajdis al la Padoj de l' Mortintoj; kaj sur tiu vojo neniu timo tiel aktualis, kiel la timo pri tio, kio povus okazi al ŝi. Kaj tamen, Eomero, mi diras al vi, ke vin ŝi amas pli

senmanke ol min; ĉar vin ŝi amas kaj konas; sed en mi ŝi amas nur ombron kaj penson: esperon pri gloro kaj bravaj plenumoj, kaj landojn malproksime de la kampoj de Rohano. Eble mi kapablas kuraci ŝian korpon kaj revoki ŝin el la malluma valo. Sed mi ne scias al kio ŝi vekigos: ĉu al espero, forgeso aŭ malespero. Kaj se al malespero, tiam ŝi mortos, krom se venos alia kuraco, kiun mi ne povas havigi. Ve! ĉar ŝiaj faroj starigis ŝin inter la reĝinojn elstare famajn.

Tiam Aragorno kliniĝis kaj rigardis ŝian vizaĝon, kiu estis blanka kiel lilio, malvarma kiel frostoj, kaj malmola kiel gravurita ŝtono. Sed li kliniĝis, kisis ŝian frunton, kaj alvokis ŝin mallaŭte, dirante:

— Eovina, filino de Eomundo, vekigu! ĉar forpasis via malamiko!

Ŝi ne moviĝis, sed nun ŝi rekomencis spiri profunde, tiel ke ŝia brusto leviĝis kaj malleviĝis sub la blanka lino de la tuko. Denove Aragorno pistis du foliojn de *atelaso* kaj ĵetis ilin en vaporantan akvon; kaj per tio li lavis ŝian frunton, kaj ŝian dekstran brakon kuŝantan malvarme kaj sennerve sur la litotuko.

Eble Aragorno ja posedis iun forgesitan potencon de Okcidentio, aŭ eble efikis al ili nur liaj vortoj pri Damo Eovina, sed kiam la dolĉa influo de la kuracherbo ŝteliris tra la ĉambro, ŝajnis al la apudstarantoj, ke tra la fenestro blovas akra vento, kaj ĝi alportis neniun aromon, sed la aero estis tute freŝa kaj pura kaj juna, kvazaŭ ĝin neniam antaŭe enspiris ajna vivantaĵo kaj ĝi venis novkreita de neĝokovritaj montoj altaj sub la kupolo de steloj, aŭ de arĝentaj marbordoj en malproksimo lavitaj de ŝaŭmaj maroj.

— Vekiĝu, Eovina, Damo de Rohano! — diris Aragorno, kaj li kaptis per la sia ŝian dekstran manon. — Vekiĝu! La ombro jam foriris kaj ĉio malluma estas lave purigita! — Poste li kuŝigis ŝian manon sur tiun de Eomero kaj forpaŝis. — Voku ŝin! — li diris, kaj li silente eliris el la ĉambro.

— Eovina, Eovina! — kriis Eomero inter siaj larmoj. Sed ŝi malfermis siajn okulojn kaj diris:

— Eomero! Kia ĝojo! Ĉar oni diris, ke vi estas mortigita... Ne, sed tio estis nur la malhelaj voĉoj en mia sonĝo. Kiom longe mi sonĝis?

— Ne longe, fratino mia, — diris Eomero. — Sed ne plu pripensu tion!

— Mi estas strange lacega, — ŝi diris. — Mi devos iom ripozi. Sed diru al mi, kio pri la Mastro de Markio? Ve! ne diru, ke tio estis sonĝo; ĉar mi scias, ke sonĝo ĝi ne estis. Li estas mortinta, kiel li antaŭvidis.

— Li estas mortinta, — diris Eomero, — sed li ordonis, ke mi diru adiaŭon al Eovina, pli kara ol filino. Li nun kuŝas en granda honoro en la Citadelo de Gondoro.

— Tio estas malĝojiga, — ŝi diris. — Kaj tamen ĝi estas pli bona ol ĉio, kion mi riskis esperi dum la malhelaj tagoj, kiam ŝajnis, ke la Domo de Eorlo senhonorigis pli ol la budo de ŝafpaŝtisto. Kaj kio pri la reĝa eskviro, la duonulo? Eomero, vi devas nomi lin kavaliro de Rajdmarkio, ĉar li estas bravulo!

— Li kuŝas proksime en tiu ĉi Domo, kaj mi iros al li, — diris Gandolfo. — Eomero restos ĉi tie kelkan tempon. Sed ankoraŭ ne parolu pri milito aŭ malespero ĝis resaniĝo. Vere ĝojige estas vidi vin, tiom kuraĝan damon, ree maldorman antaŭ reveno de sano kaj espero!

— Ĉu sano? — diris Eovina. — Eble estos tiel. Almenaŭ dum troviĝas malplena selo de iu falinta rajdisto, kiun mi povos plenigi, kaj restas faroj plenumendaj. Sed ĉu espero? Mi ne scias.

Gandolfo kaj Grinĉjo venis al la ĉambro de Gaja, kaj tie ili trovis Aragornon staranta apud la lito.

— Kompatinda Gajĉjo! — kriis Grinĉjo kaj kuris al la lito, ĉar ŝajnis al li, ke lia amiko aspektas pli malbone, kaj grizo estas sur lia vizaĝo, kvazaŭ jaroj da malĝojo pezus sur lin; kaj subite kaptis Grinĉjon timo, ke Gaja mortos.

— Ne timu, — diris Aragorno. — Mi venis ĝustatempe, kaj mi revokis lin. Li nun estas laca kaj malĝoja, kaj li vundiĝis kiel Damo Eovina, aŭdacinte bati tiun minacaĵon. Sed tiuj misaĵoj estas bonigebraj, ĉar en li estas spirito tre forta kaj gaja. Sian doloron li ne forgesos; sed ĝi ne mallumigos lian koron, ĝi instruos al li saĝon.

Poste Aragorno metis sian manon sur la kapon de Gaja, kaj pasiginte sian manon milde tra la bukloj brunaj, li tuŝis la palpebrojn, kaj vokis lian nomon. Kaj kiam la aromo de la *atelaso* ŝteliĝis tra la ĉambro, kvazaŭ odoro de orkideoj kaj de eriko en sunlumo abeloplana, subite Gaja vekigis, kaj diris:

— Mi malsatas. Kioma horo estas?

— Jam post la vespermanĝa horo, — diris Grinĉjo; — kvankam supozeble mi povus alporti ion, se oni permesus.

— Oni ja permesos, — diris Gandolfo. — Kaj cetere ion ajn, kion eble deziras tiu ĉi rajdisto de Rohano, se ĝi estas trovebla en Minaso Tirit, kie oni honoras lian nomon.

— Bone! — diris Gaja. — Tiukaze mi volas unue vespermanĝon

kaj poste pipon. — Sed tuj lia vizaĝo malĝoĝiĝis. — Ne, ne pipon. Al mi ŝajnas, ke mi neniam plu fumos.

— Kial ne? — diris Grinĉjo.

— Nu, — respondis Gaja malrapide. — Li estas mortinta. Tio revokis al mi la tutan aferon. Li diris, ke li bedaŭras neniam havi eblecon preparoli kun mi la herbokleron. Preskaŭ lia lasta diraĵo. Mi neniam plu povos fumi sen pensoj pri li kaj pri tiu tago, Grinĉjo, kiam li alrajdis Isengardon kaj estis tiom ĝentila.

— Fumu do, kaj pensu pri li! — diris Aragorno. — Ĉar li estis mildkora kaj granda reĝo, kaj li respektis siajn ĵurojn; kaj li leviĝis el la ombroj al lasta bela mateno. Kvankam via servado al li estis mallonga, ĝi devus esti memoro ĝoja kaj honorinda ĝis la fino de viaj tagoj.

Gaja ridetis.

— Nu, do, — li diris, — se Paŝegulo havigos la bezonaĵon, mi fumos kaj pensos. Mi havis en mia tornistro iom el la plejbona de Sarumano, sed kio okazis al ĝi dum la batalo, mi certe ne scias.

— Mastro Gajadoko, — diris Aragorno, — se vi supozas, ke mi trapasis la montaron kaj la regnon Gondoro kun fajro kaj glavo por alporti herbojn al malzorgema soldato, kiu forĵetas sian ekipaĵon, vi eraras. Se oni ne trovis vian tornistran, tiam vi devus alvoki la herbmajstron de tiu ĉi Domo. Kaj li diros al vi, ke li ne sciis, ke la herbo de vi dezirata posedas iujn virtojn, sed ke la vulgaruloj nomas ĝin *okcidentula lolo*, kaj la nobluloj *galenaso*, kaj aliajn nomojn en la lingvoj pli kleraj, kaj aldoninte kelkajn duone forgesitajn rimaĵojn, kiujn li ne komprenas, li kun bedaŭro informos vin, ke en la Domo troviĝas neniom, kaj li lasos vin pripensi la historion de la lingvoj. Kaj tion nun devas fari mi. Ĉar mi ne dormis en tia lito, de kiam mi forrajdis el Dunharo, nek manĝis de post la mallumo antaŭaŭrora.

Gaja kaptis lian manon kaj kisis ĝin.

— Mi terure bedaŭras, — li diris. — Iru tuj. Ĉiam post tiu nokto en Brio ni estas ĝenaĵo por vi. Sed mia popolo kutimas uzi vortojn leĝerajn en tia situacio kaj diri malpli ol ni intencas. Ni timas trodiri. Tio rabas al ni la ĝustajn vortojn, kiam ŝerco estas maltaŭga.

— Tion mi bone scias, alie mi ne same traktus vin, — diris Aragorno. — Ke la Provinco vivu ĉiam nevelkinte! — Kaj kisinte Gajan li eliris, kaj Gandolfo akompanis lin.

Grinĉjo postrestis.

— Ĉu iam estis iu simila al li? — li diris. — Escepte de Gandolfo,

kompreneble. Mi opinias, ke certe ili estas parencaj. Mia kara azeno, via tornistro kuŝas apud via lito, kaj vi portis ĝin sur la dorso, kiam mi renkontis vin. Li vidis ĝin la tutan tempon, kompreneble. Kaj ĉiukaze ankaŭ mi havas iom. Ek jam! Longfunda Folio ĝi estas. Plenigu la pipon, dum mi kuros aranĝi iom da manĝaĵo. Kaj poste ni trankvilu iomete. Ho ve, ni Tjukoj kaj Brandobokoj, ni ne povas elteni longe sur la altaĵoj.

— Ne, — diris Gaja. — Tion mi ne povas. Ankoraŭ ne, almenaŭ. Sed minimume, Grinĉjo, nun mi povas vidi ilin, kaj honori ilin. Prefere ami unue tion, kion vi kapablas ami, supozeble. Oni devas komenci ie kaj posedi kelkajn radikojn, kaj la grundo de la Provinco profundas. Tamen ekzistas aferoj pli profundaj kaj pli altaj; kaj sen ili neniu oldulo povus kultivi sian ĝardenon en tio, kion li nomas paco, ĉu li scias pri ili aŭ ne. Mi ĝojas, ke mi scias pri ili, iomete. Sed mi ne scias, kial mi tiom paroladas. Kie estas tiu foliaro? Kaj eligu mian pipon el mia tornistro, se ĝi ne estas rompita.

Aragorno kaj Gandolfo iris al la estro de la Domoj de Kuracado, kaj ili konsilis al li, ke Faramiro kaj Eovina restu tie kaj estu flegataj kun zorgo dum multaj tagoj.

— Damo Eovina, — diris Aragorno, — baldaŭ volos leviĝi kaj foriri; sed tion oni ne devus permesi al ŝi, se vi povos iel malhelpi ŝin, dum almenaŭ dek tagoj.

— Rilate Faramiron, — diris Gandolfo, — li devos baldaŭ ekscii, ke lia patro estas mortinta. Sed la plena historio pri la frenezeco de Denetoro ne estu rakontita al li, ĝis li tute resaniĝos kaj havos devojn plenumendajn. Certigu ke Beregondo kaj la *periano*, kiuj ĉeestis, ankoraŭ ne parolu al li pri tiuj aferoj!

— Kaj la alia *periano*, Gajadoko, kiun mi prizorgas, kio pri li? — diris la domestro.

— Tre probable li jam morgaŭ sufiĉe sanos por leviĝi, — diris Aragorno. — Permesu, ke li tion faru, se li volos. Li rajtos promeni iomete, zorgate de amikoj.

— Rimarkinda raso, — diris la domestro kapjesante. — Tre duraj en la fibroj, mi opinias.

Antaŭ la pordo de la Domoj jam kuniĝis multaj por vidi Aragornon, kaj ili sekvis lin; kaj kiam fine li vespermanĝis, homoj venis kaj

petegis, ke li kuracu iliajn parencojn aŭ amikojn, kies vivoj estis minacataj pro doloro aŭ vundo, aŭ kiuj kuŝis sub la Nigra Ombro. Kaj Aragono starigis kaj eliris, kaj li alvokis la filojn de Elrondo, kaj kune ili laboris longe dumnokte. Kaj sciigo trairis la Urbon: "La Reĝo revenis efektive". Kaj oni nomis lin Elfŝtono, pro la verda ŝtono, kiun li portis, kaj tiel la nomo aŭgurita je lia naskiĝo, ke li portos ĝin, estis elektita por li de lia propra popolo.

Kaj kiam li ne plu povis labori, li volvis sin per sia mantelo, kaj ŝteliris el la Urbo, kaj iris al sia tendo ĝuste antaŭ la tagiĝo kaj dormis iomete. Kaj matene la standardo de Dol Amroto, blanka ŝipo cignosimila sur blua akvo, floris sur la Turego, kaj la homoj suprenrigardis kaj scivolis, ĉu la alveno de la Reĝo estis nur sonĝo.

Ĉapitro 9

LA LASTA DEBATO

Mateno venis post la tago de batalo, kaj ĝi estis bela kun malpezaj nuboj kaj vento turniĝanta okcidenten. Legolaso kaj Gimlio frue eliris kaj petis permeson supreniri en la Urbon, ĉar ili forte volis vidi Gajan kaj Grinĉjon.

— Estas bone scii, ke ili pluviavas, — diris Gimlio, — ĉar ili kostis al ni grandajn penojn dum nia marŝado trans Rohanon, kaj mi ne volus, ke tiaj penoj estu vanaj.

Kune la elfo kaj la gnomo eniris Minason Tirit, kaj vidantoj de ilia preterpaso miris pri tiaj kunuloj; ĉar Legolaso estis belvizaĝa ekster mezureblo de la homoj, kaj li kantis klarvoĉe elfan kanton promenante matene, sed Gimlio paŝis minace apud li karesante sian barbon kaj ĉirkaŭgapanante.

— Ĉi tie ekzistas iom da bona masonaĵo, — li diris rigardante la murojn; — sed ankaŭ iom da malpli bona, kaj la stratojn oni povus pli taŭge aranĝi. Kiam Aragorno ricevos sian heredaĵon, mi proponos al li servadon de masonistoj de la Monto, kaj ni rekreos fierinde la urbon.

— Ili bezonas pliajn ĝardenojn, — diris Legolaso. — La domoj estas mortaj, kaj tro malmulto kreskas ĉi tie ĝojante. Se Aragorno ricevos sian heredaĵon, la arbara popolo alportos al li birdojn, kiuj kantas, kaj arbojn, kiuj ne mortas.

Fine ili venis al princo Imrahilo, kaj Legolaso rigardis lin kaj profunde riverencis; ĉar li rimarkis, ke jen efektive estas iu, en kies vejnoj fluas elfa sango.

— Saluton, mastro! — li diris. — Jam delonge la popolo de Nimrodela forlasis la arbarojn de Lorieno, kaj ankoraŭ videblas, ke ne ĉiuj velis okcidenten trans akvon el la haveno de Amroto.

— Tiel estas dirite laŭ la mialandaj legendoj, — diris la princo, — tamen neniam estis vidita tie iu el la helularo dum jaroj nekalkuleblaj. Kaj mi mire vidas tian ĉi tie nun meze de malĝojo kaj milito. Kion vi serĉas?

— Mi estas unu el la Naŭ Kunuloj, kiuj ekvojaĝis kun Mitrandiro el Imladriso, — diris Legolaso, — kaj kun tiu ĉi gnomo, mia amiko, mi venis kun Mastro Aragorno. Sed nun ni volas vidi niajn amikojn, Gajadoko kaj Peregrino, kiuj estas sub via egido, laŭ informoj.

— Vi trovos ilin en la Domoj de Kuracado, kaj mi gvidos vin tien, — diris Imrahilo.

— Sufiĉos se vi sendos iun por gvidi nin, mastro, — diris Legolaso. — Ĉar Aragorno sendas al vi jenan mesaĝon. Li ne volas reeniri la Urbon en tiu ĉi tempo. Tamen necesas, ke la komandantoj tuj konsiligu, kaj li petas, ke vi kaj Eomero el Rohano subeniru al lia tendaro laŭeble baldaŭ. Mitrandiro jam ĉeestas.

— Mi iros, — diris Imrahilo, kaj ili disiĝis kun ĝentilaj vortoj.

— Tiu estas bela princo kaj granda komandanto de la homoj, — diris Legolaso. — Se Gondoro ankoraŭ disponas tiajn homojn dum ĉi tiuj velkaj tagoj, grandioza certe estis ĝia gloro dum la tagoj de ĝia leviĝo.

— Kaj sendube la bonkvalita masonaĵo estas la pli malnova kaj estis farita dum la unua konstruado, — diris Gimlio. — Ĉiam estas tiel pri la aferoj komencitaj de homoj: okazas frosto dum printempo, aŭ plago dum somero, kaj la aferoj malsukcesas plenumiĝi laŭpromese.

— Tamen malofte ilia semado malsukcesas, — diris Legolaso. — Kaj semo kuŝos en la polvo kaj putros, por poste rekreski en tempoj kaj lokoj neantaŭviditaj. La faroj de la homoj pretervivos nin, Gimlio.

— Kaj tamen en la fino iĝas nur povintusaĵoj, laŭ mia konjekto, — diris la gnomo.

— Pri tio la elfoj ne konas respondon, — diris Legolaso.

Poste servisto de la Princo venis kaj kondukis ilin al la Domoj de Kuracado; kaj tie ili trovis siajn amikojn en la ĝardeno, kaj tiu renkontiĝo estis ĝoja. Dum kelka tempo ili marŝis kaj interparolis, jubilante dum mallonga tempo en trankvilo kaj ripozo sub matena ĉielo supre en la ventozaj cirkloj de la Urbo. Poste, kiam Gaja laciĝis, ili iris sidi sur la muro kun la razeno de la Domoj de Kuracado malantaŭ ili; kaj forsude antaŭ ili Anduino brilis en la sunlumo, dum ĝi fluis for, neatingeble eĉ por la vidkapablo de Legolaso, al la larĝaj platejoj kaj verda nebuleto de Lebenino kaj Suda Itilio.

Kaj nun Legolaso silentiĝis, dum la aliaj parolis, kaj li elrigardis kontraŭ la sunon, kaj rigardante li vidis blankajn marbirdojn urĝantajn kontraŭfluen laŭ la Rivero.

— Vidu! — li kriis. — Mevoj! Ili flugas profunde enlanden. Miro ili estas por mi kaj ĝenas mian koron. Neniam dum mia vivo mi renkontis ilin, ĝis mi venis al Pelargiro, kaj tie mi aŭdis ilin krientaj en la aero, dum ni rajdis al la batalo de la ŝipoj. Tiam mi staris senmova, forgesante pri la milito en Mez-Tero, ĉar iliaj veantaj voĉoj parolis al mi pri la Maro. La Maro! Ve! Mi ankoraŭ ne vidis ĝin. Sed profunde en la koro de ĉiu mia parenco kuŝas la marnostalgio, kies moviĝo danĝeras. Ve pri la mevoj! Neniun trankvilon mi denove spertos subfage kaj subulme.

— Ne diru tion! — diris Gimlio. — Ekzistas sennombraj aferoj vidotaj en Mez-Tero, kaj grandiozaj verkoj farotaj. Sed se ĉiuj heluloj iros al la havenoj, la mondo estos loko pli malbrila por tiuj, kies sorto estas postresti.

— Malbrila kaj morna, efektive! — diris Gaja. — Vi devos ne iri al la Havenoj, Legolaso. Ĉiam troviĝos iuj, grandaj aŭ malgrandaj, kaj eĉ kelkaj saĝaj gnomoj kiel Gimlio, kiuj bezonas vin. Mi almenaŭ esperas tion. Kvankam mi iel sentas, ke la plej malbona parto de tiu ĉi milito estas ankoraŭ venonta. Kiom mi deziras, ke ĝi estu finita, kaj bone finita!

— Ne tiom sombru! — kriis Grinĉjo. — Brilas la suno, kaj jen ni estas kunaj minimume por unu-du tagoj. Mi deziras aŭdi pli pri vi ĉiuj. Ek, Gimlio! Vi kaj Legolaso aludis vian strangan vojaĝon kun Paŝegulo jam ĉirkaŭ dekfoje hodiaŭ matene. Sed vi rakontis al ni nenion pri ĝi.

— Eble brilas la suno ĉi tie, — diris Gimlio, — sed estas memoroj pri tiu vojo, kiujn mi ne volas revoki el la mallumo. Se mi scius, kio estas antaŭ mi, mi opinias, ke pro neniu ajn amikeco mi laŭirus la Padojn de l' Mortintoj.

— La Padoj de l' Mortintoj? — diris Grinĉjo. — Mi aŭdis Aragonon diri tion, kaj mi scivolis, kion li aludis. Ĉu vi ne rakontu al ni iom pli.

— Ne volonte, — diris Gimlio. — Ĉar sur tiu vojo mi spertis honton: Gimlio, filo de Gloino, kiu taksis sin pli fortika ol la homoj, kaj pli eltenema sub la tero ol iu ajn elfo. Sed neniun el ambaŭ mi pruvis, kaj mi estis tenita sur la vojo nur dank' al la volo de Aragono.

— Kaj ankaŭ pro amo al li, — diris Legolaso. — Ĉar ĉiuj, kiuj ekkonas lin, ekamas lin laŭ sia maniero, eĉ la malvarma rohana junulino. Estis frumatene en la tago antaŭ ol vi venis tien, Gaja, kiam ni forlasis Dunharon, kaj tiom timegis la tuta popolo, ke neniun volis rigardi nian

foriron krom Damo Eovina, kiu kuŝas nun dolorigita en la Domo sube. En tiu disiĝo estis malĝojo, kaj vidante tion mi malĝojis.

— Ve! Mia koro turniĝis nur al mi, — diris Gimlio.— Ne! Pri tiu vojaĝo mi ne parolos.

Li silentiĝis, sed Grinĉjo kaj Gaja tiom avidis novaĵojn, ke finfine Legolaso diris:

— Mi rakontos al vi sufiĉon por via trankviliĝo, ĉar mi ne spertis la teruron, kaj mi ne timis la ombrojn de homoj, senpovaj kaj malfortaj laŭ mia takso.

Li rapide rakontis pri la hantita vojo sub la montaro, kaj la malhela renkontiĝo ĉe Ereĥo, kaj la granda rajdo el tie, naŭdek leŭgojn plus tri, ĝis Pelargiro sur Anduino.

— Kvar tagojn kaj noktojn, kaj daŭre la kvinan ni rajdis de la Nigra Ŝtono. Kaj jen! en la malhelo de Mordoro nia espero kreskis; ĉar en tiu malhelo la Ombrarmeo ŝajnis plifortiĝi kaj pli teruraspekti. Iujn mi vidis rajdantaj, iujn paŝegantaj, tamen ĉiuj moviĝis samrapidege. Ili silentis, sed en iliaj okuloj estis ekbrilo. En la altaĵoj de Lamedono ili atingis niajn ĉevalojn, kaj ĉirkaŭis nin, kaj preterpasus nin se Aragorno ne estus malpermesinta tion. Pro lia ordono ili prokrastis. “Eĉ la homaj ombroj obeas lian volon, — mi pensis. — Eble ili tamen servos laŭ liaj bezonoj!”

» Dum unu tago luma ni rajdis, kaj poste venis la tago senaŭrora, kaj plu ni rajdadis, kaj Kirilon kaj Ringlon ni transiris; kaj en la tria tago ni venis al Linhiro super la elfluejo de Gilreno. Kaj tie viroj el Lamedono batalis ĉe la vadejoj kontraŭ minaculoj el Umbaro kaj Harado, kiuj navigis laŭ la rivero. Sed kiel la defendantoj tiel ankaŭ la malamikoj rezignis pri la batalo kaj fuĝis, kiam ni venis, kriegante ke la Reĝo de la Mortintoj venis. Nur Angboro, la reganto de Lamedono, sufiĉe kuraĝe toleris nin, kaj Aragorno ordonis, ke li ordigu sian armeon kaj postsekvu, se ili aŭdacos, kiam la Griza Armeo forpasos.

» — Ĉe Pelargiro la Heredanto de Isilduro bezonos vin, — li diris.

» Tiel ni transiris Gilrenon, pelante antaŭ ni la aliancantojn de Mordoro; kaj poste ni ripozis iomete. Sed baldaŭ Aragorno stariĝis, dirante: “Vidu! Jam Minaso Tirit estas atakata. Mi timas, ke ĝi pereos antaŭ ol ni alvenos por helpi ĝin”. Do ni denove surseliĝis antaŭ forpaso de la nokto, kaj pluiris sur la ebenaĵoj de Lebenino per la tuta rapideco, kiun niaj ĉevaloj kapablis elteni.

Legolaso paŭzis kaj suspiris, kaj turninte la okulojn suden li mal-laŭte kantis:

*Arĝente fluas rojoj de Celos ĝis Erui
 en verdaj kampoj de Lebenino!
 Altas la herboj tie. Pro l' vent' demara
 balanciĝas blankaj lilioj,
 kaj oraj sonoriloj skuiĝas de malosoj kaj alfiroj
 en verdaj kampoj de Lebenino,
 pro l' vento demara!*

» Verdas tiuj kampoj en la kantoj de mia popolo, sed tiam ili malhelis, grizaj dezertoj en la nigro antaŭ ni. Kaj tra la vasta lando, tretante senzorge la herbojn kaj la florojn, ni ĉasis niajn malamikojn dum unu tago kaj unu nokto, ĝis ni venis je l' amara fino al la Granda Rivero. Tiam en mia koro mi pensis, ke ni proksimiĝas al la maro; ĉar larĝa estis la akvo en la mallumo, kaj sennombraj marbirdoj kriĉis sur ĝiaj bordoj. Ve pri la meva kriĉado! Ĉu la Damo ne diris, ke mi gardu min kontraŭ ilin? Kaj nun mi ne povas forgesi ilin.

— Miaparte mi tute ne atentis ilin, — diris Gimlio; — ĉar tiam ni venis finfine al serioza batalo. Tie ĉe Pelargiro estis la ĉefŝiparo el Umbaro, kvindek grandaj ŝipoj kaj nekalkuleblaj malpli grandaj. Multaj el niaj ĉasatoj atingis la havenojn antaŭ ni, kaj kunportis sian timon; kaj iuj el la ŝipoj ekfuĝis, celante eskapi laŭ la Rivero aŭ atingi la kontraŭan bordon; kaj multaj el la pli malgrandaj flambrulis. Sed la haradanoj, pelitaj al la prudentorando, turniĝis por finbatali, kaj pro senespero ili estis ferocaj; kaj ili ridis vidante nin, ĉar ili estis armeo ankoraŭ granda.

» Sed Aragorno haltis kaj kriis per voĉo potenca: "Venu nun! Je la Nigra Ŝtono mi alvokas vin!" Kaj subite la Ombra Armeo, kiu lastatempe postrestis, venis kiel griza tajdo, forbalaante ĉion antaŭ si. Mallaŭtajn kriojn ni aŭdis, kaj forajn kornojn blovatajn, kaj murmuron kvazaŭ de sennombraj malproksimaj voĉoj: tio similis eĥon de iu forgesita batalo dum la Malhelaj Prajaroj. Palaj glavoj elingiĝis, sed mi ne scias, ĉu ties klingoj ankoraŭ mordus, ĉar la Mortintoj ne plu bezonis alian armilon krom timigo. Neniu povis kontraŭstari ilin.

» Ili venis al ĉiu ŝipo, kiu estis albordigita, kaj poste ili transiris la akvon al la ankritaj; kaj ĉiujn maristojn plenigis frenezo de teruro kaj ili saltis en la akvon, krom nur la sklavoj ĉenitaj al la remiloj. Senzorge ni rajdis inter niaj fuĝantaj malamikoj, pelante ilin kvazaŭ foliojn, ĝis ni alvenis la bordon. Kaj tiam al ĉiu granda ŝipo restinta Aragorno sendis po unu dunadano, kaj ili konsolis la surŝipajn kaptitojn kaj

instigis ilin formeti la timon kaj esti liberaj. Antaŭ la fino de tiu mal-luma tago neniu restis el la malamikoj por rezisti: ĉiuj dronis aŭ fuĝis suden esperante trovi la propran landon perpiede. Strange kaj mirinde mi taksis, ke la projektojn de Mordoro povis renversi tiaj fantomoj el timo kaj mallumo. Per la propraj armiloj ĝi estis venkita!

— Efektive strange, — diris Legolaso. — En tiu horo mi rigardis Aragornon kaj pensis, kia granda kaj terura Mastro li povintus estiĝi pro la forto de sia volo, se li prenis al si la Ringon. Ne senmotive Mordoro timas lin. Sed pli nobla estas lia spirito ol la kompreno de Saŭrono; ĉar ĉu li ne estas el la idoj de Lutiena? Neniam pereos tiu linio, eĉ se la jaroj plimultiĝos nekalkuleble.

— Tiuj aŭguroj estas ekster la okuloj de la gnomoj, — diris Gimlio. — Sed ja potenca estis Aragorno tiutage. Jen! la tuta nigra ŝiparo estis en liaj manoj; kaj li elektis por si la plej grandan ŝipon, kaj ni suriris ĝin. Poste li sonorigis grandan nombron da trumpetoj prenitaj de la malamikoj; kaj la Ombra Armeo reiris sur la bordon. Tie ili staris silentaj, apenaŭ videblaj krom pro ruĝa brileto en la okuloj, kiuj spegulis la lumon de la brulantaj ŝipoj. Kaj Aragorno parolis laŭtvoĉe al la Mortintoj, kriante:

» — Aŭdu nun la vortojn de la Heredanto de Isilduro! Via ĵuro estas plenumita. Retroiru kaj neniam plu ĝenu la valojn! Foriru kaj ripozu!

» Kaj tiam la Reĝo de la Mortintoj stariĝis antaŭ la amaso kaj rompis sian lancon kaj ĵetis ĝin teren. Poste li profunde riverencis kaj forturnis sin; kaj rapide la tuta griza amaso retroiris kaj malaperis kvazaŭ nebuleto repuŝita per subita vento; kaj ŝajnis al mi, ke mi vekigis el sonĝo.

» Tiunokte ni ripozis, dum laboris aliaj. Ĉar multaj kaptitoj estis liberigitaj, kaj multaj sklavoj senkatenigitaj, kiuj estis gondoranoj kaptitaj dum rabatakoj; kaj baldaŭ estis ankaŭ granda kuniĝo de homoj el Lebenino kaj E tiro, kaj Angboro el Lamedono venis kun ĉiuj rajdistoj, kiujn li sukcesis reordigi. Nun, kiam timo pri la Mortintoj estis forigita, ili venis por helpi nin kaj rigardi la Heredanton de Isilduro; ĉar informo pri tiu nomo disvastiĝis kvazaŭ fajro en mallumo.

» Kaj tio proksimas al la fino de nia rakonto. Ĉar dum tiuj vespero kaj nokto multaj ŝipoj estis pretigitaj kaj hompleniĝis; kaj matene la ŝiparo ekvelis. Tio nun ŝajnas longe pasinta, tamen estis nur matene en la antaŭhieraŭo, la sesa tago post kiam ni elrajdis el Dunharo. Sed ankoraŭ Aragornon pelis timo, ke tro urĝas la tempo. “Temas pri

kvardek leŝoj plus du de Pelargiro ĝis la albordiĝejoj ĉe Harlondo, — li diris. — Tamen al Harlondo ni devos veni morgaŭ aŭ tute fiaski”.

» La remilojn nun manipulis liberaj homoj, kaj virece ili penadis; tamen malrapide ni pasis laŭ la Granda Rivero, ĉar ni penis kontraŭ ties fluo, kaj kvankam tiu ne estas rapida en la sudo, ni ricevis neniom da helpo per vento. Peza estintus mia koro, se Legolaso ne ridus subite.

» — Supren la barbo, posteulo de Durino! — li diris. — Ĉar tiel estas dirite: *Espero ofte naskiĝas, kiam ĉio fiaskas*. Sed kian esperon li vidis de malproksime, tion li rifuzis diri. Kiam venis la nokto, ĝi nur pliprofundigis la mallumon, kaj niaj koroj ardis, ĉar fore en la nordo ni vidis ruĝan ardon sub la nuboj, kaj Aragorno diris: “Minaso Tirit brulas”. Sed noktomeze espero efektive naskiĝis denove. Marspertaj viroj de Etiro rigardante suden parolis pri ŝanĝiĝo venonta kun freŝa vento de la maro. Longe antaŭ la mateniĝo la masthavaj ŝipoj hisis la velojn, kaj nia rapido kreskis, ĝis aŭroro blankigis la ŝaŭmon antaŭ niaj pruoj. Kaj tiel estis, kiel vi jam scias, ke ni venis je la tria horo de la mateno kun favora vento kaj senvaligita suno, kaj ni malvolvis la grandan standardon en batalo. Tio estis tago grandioza kaj grandioza horo, sekvu kio ajn.

— Sekvu kio ajn, grandiozaj faroj ne estas senvalorigataj, — diris Legolaso. — Faro grandioza estis rajdado sur la Padoj de l’ Mortintoj, kaj grandioza ĝi restos, eĉ se neniu restos en Gondoro por prikanti ĝin en la venontaj tagoj.

— Kaj tio tre povos okazi, — diris Gimlio. — Ĉar la vizaĝoj de Aragorno kaj Gandolfo seriozas. Multe mi scivolas, kiaj konsiliĝoj okazas en la tendoj tie sube. Miaparte, kiel Gaja, mi sopiras, ke pro nia venko la milito jam estu finita. Tamen kio ajn restas farota, mi esperas partopreni ĝin, pro honoro de la popolo de l’ Soleca Monto.

— Kaj mi pro la popolo de la Granda Arbaro, — diris Legolaso, — kaj pro la amo al la Mastro de la Blanka Arbo.

Poste la kunuloj silentiĝis, sed dum kelka tempo ili sidis tie sur la alta loko, ĉiu okupata pri la propraj pensoj, dum la Komandantoj debatis.

Kiam princo Imrahilo disiĝis de Legolaso kaj Gimlio, li tuj vokis Eomeron, kaj ili duope subeniris el la Urbo, kaj ili venis al la tendoj de Aragorno, starigitaj sur la kampo ne malproksime de kie pereis reĝo Teodeno. Kaj tie ili konsiliĝis kune kun Gandolfo kaj Aragorno kaj la filoj de Elrondo.

— Miaj sinjoroj, — diris Gandolfo, — aŭskultu la vortojn de la Reganto de Gondoro antaŭ ol li mortis: *Vi eble triumfos sur la kampoj de Pelenoro dum unu tago, sed nevenkeblas la Potenco nun leviĝanta*. Mi ne diras, ke vi malesperu, kiel li faris, sed pripensu la veron en tiuj ĉi vortoj.

» La Ŝtonoj de Vidado ne mensogas, kaj eĉ la Mastro de Baraduro ne povas mensogigi ilin. Li povas, eble, laŭ sia volo elekti, kiajn aferojn vidu mensoj pli malfortaj, aŭ igi, ke ili miskomprenu la viditaĵon. Malgraŭ tio ne estas dubeble, ke kiam Denetoro vidis grandajn amasojn ordigitajn kontraŭ li en Mordoro, kaj ankoraŭ pliajn kunigatajn, li vidis tion, kio vere estas.

» Nia forto sufiĉis nur por forbati la unuan grandan atakon. La sekva estos pli granda. Tiu ĉi milito malhavas finan esperon, kiel Denetoro perceptis. Venkon ne povas akiri armiloj, ĉu vi sidas ĉi tie por toleri sieĝon post sieĝo, aŭ elmarŝas por esti pereigitaj trans la Rivero. Vi havas nur elekton inter misaĵoj; kaj la prudento konsilus, ke vi plifortigu tiajn fortikejojn kiajn vi disponas, kaj tie atendu la sturmon, ĉar tiel la tempo antaŭ via pereco estos iom plilongigita.

— Do vi volas, ke ni retretu al Minaso Tirit, aŭ Dol Amroto, aŭ Dunharo, kaj sidu tie kvazaŭ infanoj sur sablokasteloj, kiam la tajdo flusas, ĉu? — demandis Imrahilo.

— Tiu konsilo neniel estus nova, — diris Gandolfo. — Ĉu vi ne faris tion kaj malmulton plian dum la tagoj de Denetoro? Sed ne! Mi diris, ke tio estus prudenta. Prudenton mi ne konsilas. Mi diris, ke venkon ne povas akiri armiloj. Mi plu esperas pri venko, sed ne per armiloj. Ĉar en la mezon de ĉiuj ĉi politikaĵoj venas la Ringo de Potenco, la fundamento de Baraduro, kaj la espero de Saŭrono.

» Koncerne ĉion ĉi, miaj sinjoroj, vi ĉiuj scias sufiĉe por kompreni nian malfeliĉan staton, kaj tiun de Saŭrono. Se li reakiros ĝin, via kuraĝo estos vana, kaj lia venko okazos rapide kaj komplete: tiel komplete, ke neniu povos antaŭvidi ĝian finon, dum tiu ĉi mondo ekzistos. Se ĝi estos detruita, tiam li pereos, kaj li falos tiel profunden, ke neniu povas antaŭvidi lian releviĝon. Ĉar li perdos la plejparton de tiu forto, kiu estas propra al li de lia komenco, kaj ĉio kreita aŭ komencita per tiu potenco diseriĝos, kaj li estos eterne senkorpigita, kaj estiĝos nura spirito de malico, kiu sin mordos en la ombroj, sed neniam denove povos kreski aŭ enkorpigi. Kaj tiel estos forigita la granda misaĵo de tiu ĉi mondo.

» Eble venos aliaj misaĵoj, ĉar Saŭrono mem estas nura servanto

aŭ sendito. Tamen ne estas nia rolo mastri ĉiujn periodojn de la mondo, sed fari ion, en kiu ni estas, por savi tiujn jarojn, en kiuj ni estas lokitaj, elradikigante la misherberojn en la kampoj, kiujn ni konas, tiel ke la postvivontoj povu disponi puran grundon por kultivi. La vetero, kiun ili spertis, ne estas sub nia rego.

» Nu, ĉion ĉi Saŭrono scias, kaj li scias, ke tiu trezoro, kiun li perdis, estas retrovita, sed li ankoraŭ ne scias, kie ĝi estas, aŭ ni tiel esperas. Kaj tial li nun forte dubemas. Ĉar se ni trovis tiun aĵon, inter ni estas kelkaj sufiĉe fortaj por utiligi ĝin. Ankaŭ tion li scias. Ĉar ĉu mi ne prave konjektas, Aragorno, ke vi montris vin al li en la Ŝtono de Ortanko?

— Mi tion faris antaŭ ol forrajdi el Kornburgo, — respondis Aragorno. — Mi taksis la tempon matura, kaj ke la Ŝtono venis al mi ĝuste tiucele. Tiam jam pasis dek tagoj de kiam la Ringoportanto iris orienten de Raŭroso, kaj la Okulo de Saŭrono, mi opiniis, devus esti fortrenita el la propra lando. Tro malofte li estis defiita, de kiam li reiris al sia Turego. Kvankam mi antaŭvidis, kiom rapida estos lia responda atako, eble mi ne devis aŭdaci montri min. Apenaŭ sufiĉe da tempo estis donita al mi por veni kaj helpi vin.

— Sed kiel estas? — demandis Eomero. — Ĉio estas vana, laŭ vi, se li havas la Ringon. Kial li supozu ne vana alsturmi nin, se ni ĝin posedas?

— Li ankoraŭ ne certas, — diris Gandolfo, — kaj li ne amasigis sian potencon por atendado ĝis liaj malamikoj estas sekuraj, kiel faris ni. Cetere ni ne povus lerni dum unu tago, kiel utiligi la plenan potencon. Efektive, ĝin povas utiligi nur unu sola mastro, ne multaj; kaj li atendos tempon de kverelado, antaŭ ol unu el la granduloj inter ni igos sin mastro kaj subŝovos ĉiujn aliajn. Dum tiu tempo la Ringo eble helpus lin, se li subitus.

» Li rigardadas. Multon li vidas kaj multon aŭdas. Liaj nazguloj plu disvagas. Ili preterpasis super ĉi tiu kampo antaŭ la sunleviĝo, kvankam malmultaj el la lacaj aŭ dormantaj rimarkis ilin. Li studas la signojn: Glavo, kiu senigis lin de lia valorajo, estas rekreita; la ventoj de fortuna turniĝis por favori nin, kaj la neatendita malsukceso de lia unua sturmo; la pereado de lia granda Komandanto.

» Lia dubemo certe kreskas, dum ni interparolas ĉi tie. Lia Okulo nun streĉiĝas niadirekten, blinda al preskaŭ ĉio alia, kio moviĝas. Tion ni devas konservi. En tio troviĝas nia tuta espero. Jen do mia konsilo. La Ringon ni ne havas. Saĝe aŭ malsaĝege, ĝi estas forsendita

por esti detruita, ke ĝi ne detruu nin. Sen ĝi ni ne povas per forto venki lian forton. Sed ni devas ĉiupreze forturni lian Okulon de lia vera danĝero. Ni ne povas venki per armiloj, sed per armiloj ni povas havigi al la Ringoportanto ties solan eblon, kvankam ĝi estas fragila.

» Kiel Aragorno komencis, tiel ni devas daŭrigi. Ni devas puŝi Saŭronon al lia lasta provo. Ni devas elvoki lian kaŝitan forton, por ke li malplenigu sian propran landon. Ni devas senprokraste elmarŝi renkonten al li. Ni devas fari el ni logaĵon, eĉ se liaj makzeloj fermiĝos ĉirkaŭ nin. Li glutos tiun logaĵon, en espero kaj en avido, ĉar li supozas, ke en tia malzorgo li vidas la orgojlon de la nova Ringmastro, kaj li diros: "Do! Li etendas sian kolon tro frue kaj tro distancen. Li proksimiĝu kaj jen mi havos lin en kaptilo, el kiu li ne povos eskapi. Tie mi dispremos lin, kaj tio, kion li impertinente prenis, estos mia denove kaj poreterne".

» Ni devas marŝi apertokule en tiun kaptilon, kun kuraĝo, sed kun malmulte da espero pri ni mem. Ĉar, miaj sinjoroj, tre povas esti, ke ni mem tute pereos en nigra batalo malproksime de l' vivantaj landoj; tiel ke eĉ se Baraduro estos faligita, ni ne travivos por vidi novan epokon. Sed tio, laŭ mia opinio, estas nia devo. Kaj pli bona ol tamen detruigi — kio nepre okazos, se ni sidos ĉi tie — kaj scii mortante, ke nova epoko ne estiĝos.

Ili silentis kelkan tempon. Finfine Aragorno parolis:

— Kiel mi komencis, tiel mi daŭrigos. Ni venas nun ĝis la rando mem, kie parencas espero kaj malespero. Ŝanceliĝi signifas fali. Neniu nun rifuzu la konsilojn de Gandolfo, kies longa laboro kontraŭ Saŭrono venas finfine al sia pruviĝo. Sen li ĉio estus jam delonge perdita. Tamen mi ne pretendas ankoraŭ komandi iun ajn. Aliaj elektu laŭ sia volo.

Tiam diris Elrohiro:

— El la nordo ni venis ĝuste tiucele, kaj ni venigis la saman konsilon de nia patro Elrondo. Ni ne retroiros.

— Koncerne min, — diris Eomero, — mi scias malmulton pri tiuj profundaj aferoj; sed tion mi ne bezonas. Jenon mi scias, kaj estas sufiĉe, ke kiel mia amiko Aragorno savis min kaj mian popolon, tiel mi helpos lin, kiam li vokas. Mi kuniros.

— Koncerne min, — diris Imrahilo, — mi taksas Mastron Aragorno mia feŭdestro, ĉu li pretendas tion aŭ ne. Lia volo estas por mi ordono. Ankaŭ mi kuniros. Tamen provizore mi staras sur la loko de l' Reganto de Gondoro, kaj mi devas pripensi unuavice la bonstaton

de ĝia popolo. Al prudento oni devas ankoraŭ direkti iom da atento. Ĉar ni devas prepariĝi por ĉiuj ebloj, bonaj kaj misaj. Nu, eble ni triumfos, kaj dum restas iom da espero pri tio, Gondoro devos esti defendata. Mi ne volas, ke ni revenu venkinte al la Urbo ruinigita kaj lando prirabita malantaŭ ni. Kaj tamen ni eksciis de la rohananoj, ke ankoraŭ troviĝas armeo ne kontraŭbatalita ĉe nia norda flanko.

— Tio estas vera, — diris Gandolfo. — Mi ne konsilas, ke vi lasu la Urbon senhoma. Fakte la armeo, kiun ni gvidos orienten, ne devas esti sufiĉe multnombra por ajna serioza sturmo de Mordoro, sed ĝi estu sufiĉe granda por defii al batalo. Kaj ĝi devos baldaŭ ekmoviĝi. Tial mi demandas al la komandantoj: kian armeon ni povus kunmeti kaj elkonduki post maksimume du tagoj? Kaj tiuj devas esti viroj fortikaj, kiuj ekiras volonte, konante sian danĝeron.

— Ĉiuj lacegas, kaj tre multaj suferis vundojn ĉu malgravajn ĉu gravajn, — diris Eomero, — kaj ni suferis perdon de multaj ĉevaloj, kaj tio estas malfacile tolerebla. Se necesas rajdi baldaŭ, mi ne povas esperi, ke mi kondukos eĉ du milojn, kaj tamen postlasi sufiĉajn por defendo de la Urbo.

— Enkalkulindas ne nur tiuj, kiuj batalis sur tiu ĉi kampo, — diris Aragorno. — Nova forto estas survoje el la sudaj provincoj nun, kiam la marbordo estas pribalaita. Kvar milojn mi ekspedis marŝe el Pelargiro tra Losarnaño antaŭ du tagoj; kaj Angboro la Sentima rajdas antaŭ ili. Se ni ekiros post du tagoj, ili proksimiĝos antaŭ ol ni ekvojos. Cetere al multaj estis ordonite sekvi min sur la Rivero sur iu ajn akirebla boato, kaj per tiu ĉi vento tiuj baldaŭ venos, efektive pluraj boatoj jam venis al Harlondo. Mi kalkulas, ke ni elkondukos sep mil rajdistojn kaj infanterianojn, kaj tamen lasos la Urbon pli bone defendata ol ĝi estis, kiam komenciĝis la sturmo.

— La Pordego estas detruita, — diris Imrahilo, — kaj kie nun estas la faklerto por rekonstrui kaj restarigi ĝin.

— En Ereboro, la Reĝlando de Daino, troviĝas tia lerto, — diris Aragorno; — kaj se ĉiuj niaj esperoj ne pereos, poste en konvena tempo mi sendos Gimlion, filon de Gloino, por peti metiistojn de la Montaro. Sed homoj estas superaj al pordoj, kaj neniu pordo eltenos kontraŭ nia malamiko, se la homoj forlasos ĝin.

Tio do estis la fino de la estra debato: ke ili ekvojos en la dua mateno post tiu tago, kun sep mil, se tiom estos troveblaj; kaj la plimulto el tiu armeo estos marŝantoj, pro la misaj landoj, en kiuj ili iros.

Aragorno devos trovi proksimume du milojn el tiuj, kiujn li kunigis en la sudo; sed Imrahilo devos trovi tri milojn kaj duonon; kaj Eomero kvin centojn el la rohananoj, kiuj estis senĉevaligitaj sed militkapablaj, kaj li mem devos gvidi kvincenton da siaj plej bonaj surĉevalaj rajdistoj; kaj alia trupo el kvincent rajdistoj devos esti, inter kiuj rajdos la dunadanoj kaj la kavaliroj el Dol Amroto, sume ses mil infanterianoj kaj mil rajdistoj. Sed la ĉefa forto de la rohananoj, kiuj havis ĉevalojn kaj kapablis batali, entute tri miloj sub la gvido de Elfhelmo, devos embuski la Okcidentan Vojon kontraŭ la malamikojn, kiuj estis en Anorieno. Kaj tuj rapidaj rajdantoj estis elsenditaj por laŭeble akiri informojn norden kaj orienten, al Osgiliado kaj la vojo al Minaso Morgul.

Kaj kiam ili jam kalkulis sian tutan forton kaj pripensis la vojaĝon entreprenotan kaj la vojojn nepre elektotajn, Imrahilo subite ekridis laŭte.

— Ĉu ne? Tio estas la plej granda ŝerco en la tuta historio de Gondoro, ke ni elrajdos kun sep miloj, apenaŭ tiom, kiom en la avangardo de nia armeo en la tagoj de l' potenco, por ataki la montojn kaj la nepenetreblan pordegon de la Nigra Lando! Eble tiel infano minacus armaĵitan kavaliro per pafarko el ŝnuro kaj nematura salikaĵo! Se la Malhela Mastro scias tion, kion vi asertas, Mitrandiro, ĉu li ne prefere ridetos ol timos, kaj dispremos nin per sia etfingro kiel muŝon, kiu provas piki lin?

— Ne, li klopodos kapti la muŝon kaj forigi la pikilon, — diris Gandolfo. — Kaj inter ni estas personoj, kiuj valoras pli ol po mil armaĵitaj kavaliroj. Ne, li ne ridetos.

— Ankaŭ ni ne, — diris Aragorno. — Se tio ĉi estas ŝerco, ĝi estas tro amara por ridigi. Ne, ĝi estas la lasta moviĝo en danĝerego, kaj al iu flanko aŭ alia ĝi havigos la finon de la ludo. — Li elingigis Andurilon kaj levis ĝin ekbrilantan en la sunlumo. — Vi ne plu eningiĝos ĝis la lasta batalo estos decidita, — li diris.

Ĉapitro 10

LA NIGRA PORDEGO MALFERMIĜAS

Du tagojn poste la armeo de la Okcidento estis komplete kunigita sur Pelenoro. Amasego da orkoj kaj orientuloj estis returniĝinta el Anorieno, sed incitite kaj disigitaj de la rohananoj, ili frakasigis kaj fuĝis kun malmulta batalado al Kairo Andros; kaj pro tiu minaco detruita kaj nova forto venanta el la sudo la Urbo estis sufiĉe bone garnizonita. Skoltoj raportis, ke nenioj malamikoj restis sur la vojo oriente ĝis la Krucvojo de la Falinta Reĝo. Ĉio jam pretis por la lasta ĵeto.

Legolaso kaj Gimlio estis denove rajdontaj kune en la trupo de Aragorno kaj Gandolfo, kiuj iris en la avangardo kun la dunadanoj kaj la filoj de Elrondo. Sed Gaja hontis ne akompani ilin.

— Vi ne sufiĉe sanas por tia vojaĝo, — diris Aragorno. — Sed ne hontu. Se vi nenion plu faros en tiu ĉi milito, vi jam meritis grandan honoron. Peregrino iros kaj reprezentos la Provincon; kaj ne domaĝu al li lian danĝereblecon, ĉar kvankam li faris tiel bone, kiel permesis lia fortuna, li ankoraŭ ne egalas vian faron. Sed vere ĉiuj nun same estas en danĝero. Kvankam eble nia rolo estos trafi malĝojan finon antaŭ la Pordego de Mordoro, se tio okazos, tiam ankaŭ vi venos ĝis lasta konfrontiĝo, ĉu ĉi tie aŭ kie ajn la nigra tajdo ĝisatingos vin. Adiaŭ!

Kaj do deprimate Gaja nun staris kaj rigardis la ordigon de la armeo. Kun li estis Bergilo, kaj ankaŭ tiu estis deprimita; ĉar lia patro estis marŝonta estronte kompanion de la urbaj viroj: li ne povis realiĝi al la gardistaro, ĝis estos prijuĝita lia proceso. En tiu sama kompanio estis irona Grinĉjo, kiel soldato de Gondoro. Gaja povis vidi lin ne malproksime, eta sed rekta figuro inter la altuloj de Minaso Tirit.

Finfine sonoris la trumpetoj, kaj la armeo komencis formoviĝi. Trupo post trupo, kaj kompanio post kompanio, ili turniĝis kaj foriris orienten. Kaj dumlonge post kiam ili forpasis el videbleco laŭ la

granda vojo al la Digvojo, Gaja staris tie. La lasta ekbrilo de la matena sunlumo sur lancoj kaj kaskoj flagris kaj perdiĝis, kaj daŭre li restis kun la klinita kapo kaj peza koro, sentante sin senamika kaj soleca. Ĉiu, kiun li amis, foriris en tiun malhelon pendantan antaŭ la fora orienta ĉielo; kaj malmulta espero restis en lia koro, ke li iam revidos iun ajn el ili.

Kvazaŭ revokita pro la senespera humoro, la doloro en lia brako revenis, kaj li sentis sin malforta kaj maljuna, kaj la sunlumo ŝajnis maldensa. Lin rekonsciigis tuŝo per la mano de Bergilo.

— Venu, sinjoro periano! — diris la knabo. — Vi ankoraŭ spertas doloron, mi vidas. Mi helpos vin reiri al la kuracistoj. Sed ne timu! Ili revenos. La homoj de Minaso Tirit neniam estos venkitaj. Kaj nun ili havas Mastron Elfŝtono, kaj ankaŭ Beregondon el la gardistaro.

Antaŭ la tagmezo la armeo venis al Osgiliado. Tie ĉiuj disponeblaj laboristoj kaj metiistoj estis okupataj. Iuj riparis la pramojn kaj boatajn pontojn, kiujn la malamikoj konstruis kaj parte detruis, kiam ili fuĝis; iuj kolektis provianton kaj rabaĵon; kaj aliaj ĉe la orienta flanko trans la Rivero haste starigis defendaĵojn.

La avangardo pluiris tra la ruinoj de Malnova Gondoro, kaj trans la larĝan Riveron, kaj plu laŭ la longa rekta vojo, kiu en la altaj tagoj estis farita ekde la bela Turego de la Suno al la alta Turego de la Luno, kiu nun estis Minaso Morgul en ĝia malbenita valo. Je kvin mejloj post Osgiliado ili haltis, kompletiginte sian marŝon de la unua tago.

Sed la rajdistoj peliĝis antaŭen kaj antaŭ la vespero ili venis ĝis la Krucvojo kaj la ringego da arboj, kaj ĉio estis silenta. Neniu signon pri malamikoj ili vidis, neniu krio aŭ voko estis aŭdita, neniu sago fulmis el roko aŭ densejo apud la vojo, tamen ĉiam dum ili iris antaŭen ili sentis plifortiĝon de la landa gvatado. Arboj kaj ŝtonoj, herberoj kaj folioj estis aŭskultantaj. La malhelo estis dispelita, kaj en la fora okcidento sunsubiro tuŝis la valon de Anduino, kaj la blankaj pintoj de la montoj ruĝiĝis en la blua aero; sed ia ombro kaj morno ŝvebis sur Efelu Duad.

Tiam Aragorno starigis trumpetistojn po unu ĉe la kvar vojoj etendiĝantaj en la arboringegon, kaj tiuj laŭte fanfaris, kaj la heroldo laŭte kriis: “Revenis la Mastroj de Gondoro, kaj ili reprenas ĉion, kio estas ilia en tiu ĉi lando”. La hida orka kapo starigita sur la ĉizita figuro estis deĵetita kaj disrompita, kaj la kapo de la malnova reĝo estis levita kaj starigita denove sur sia loko, ankoraŭ kronita je floroj blankaj kaj

oraj; kaj homoj laboris por forlavi kaj forskrapi ĉiujn fiskribojn, kiujn orkoj surŝtonigis.

Nu, dum la konsiliĝo iuj proponis, ke Minaso Morgul estu atakita la unua, kaj se ili sukcesus kapti ĝin, ĝi estu komplete detruita.

— Kaj eble, — diris Imrahilo, — la vojo kondukanta de tie al la pasejo supre pruvigis pli facila atakvojo kontraŭ la Malhela Mastro ol lia norda pordego.

Sed kontraŭ tion Gandalfo parolis urĝe, pro la misaĵoj loĝantaj en tiu valo, kie la mensoj de homaj vivantoj freneziĝus kaj hororiĝus, kaj ankaŭ pro la novaĵo alportita de Faramiro. Ĉar se la Ringoportanto efektive iris tiun vojon, tiam antaŭ ĉio ili ne tiru tien la Okulon de Mordoro. Do la postan tagon, kiam la ĉefarmeo venis, ili starigis fortan gardistaron ĉe la Krucvojo por certigi iom da defendo, se Mordoro sendus trupon tra la pasejo de Morgulo, aŭ aligus pliajn soldatojn el la sudo. Por tiu gardado ili elektis plejparte arkpafistojn, kiuj konis la terenon de Itilio kaj kiuj kuŝos kaŝe en la arbaroj kaj deklivoj ĉirkaŭ la vojrenkontiĝo. Sed Gandalfo kaj Aragorno rajdis kun la avangardo al la enirejo de la Morgula Valo kaj rigardis la fian urbegon.

Ĝi estis malluma kaj senviva, ĉar la orkoj kaj aliaj kreitoj kiuj loĝis tie, estis detruitaj dum la batalo, kaj la nazguloj forestis. Tamen la etoso de la valo estis peza je timo kaj malamikeco. Tiam ili frakasis la fian ponton, fajrigis ruĝajn flamojn en la fetoraj kampoj kaj foriris.

La postan tagon, kiu estis la tria tago post la ekiro el Minaso Tirit, la armeo komencis sian marŝadon norden sur la vojo. Laŭ tiu vojo estis proksimume cent mejloj de la Krucvojo ĝis Moranono, kaj neniu sciis, kio eble okazos al ili antaŭ la alveno tiel malproksime. Ili iris malkaŝe sed singarde, kun surĉevalaj skoltoj antaŭe sur la vojo, kaj aliaj piedirantaj ambaŭflanke, precipe ĉe la orienta flanko, ĉar tie etendiĝis malmumaj densejoj, kaj malorda tero el rokaj ravinetoj kaj apikaĵoj, malantaŭ kiuj grimpis supren la longaj severaj deklivoj de Efelo Duad. La vetero daŭre favoris en la mondo, kaj la vento plu blovis el la okcidento, sed nenio kapablis forblovi la mornojn kaj la tristajn nebuletojn, kiuj kroĉiĝis ĉirkaŭ la Montoj de Ombro; kaj malantaŭ ili de tempo al tempo leviĝis fumegoj kaj ŝvebis en la superaj ventoj.

De tempo al tempo Gandalfo sonorigis la trumpetojn, kaj la heroldoj kriis: “La Mastroj de Gondoro estas venintaj! Ĉiuj forlasu tiun ĉi landon aŭ kapitulacu!” Sed Imrahilo diris:

— Ne diru “la Mastroj de Gondoro”. Diru “Reĝo Elesaro”. Ĉar tio

estas vera malgraŭ tio, ke li ankoraŭ ne sidiĝis sur la trono; kaj plipensigos la Malamikon, se la heroldoj uzos tiun nomon.

Kaj poste trifoje ĉiutage la heroldoj proklamis la venon de Reĝo Elesaro. Sed neniu respondis al la defio.

Tamen, kvankam ili marŝis ŝajne en paco, la koroj de la tuta armeo, de la plej altranga ĝis la plej senranga, estis deprimitaj, kaj je ĉiu mejlo, kiun ili pasis norden, aŭguro pri misaĵoj pli peze ŝarĝis ilin. Estis proksime al la fino de l' dua tago de ilia marŝado post la Krucvojo, kiam ili la unuan fojon renkontis ian batalproponon, ĉar forta trupo da orkoj kaj orientuloj klopodis kapti la avangardajn kompaniojn en embusko; kaj tio estis ĝuste en la sama loko, kie Faramiro embuskis la homojn el Harado, kaj la vojo trairis profundan fendegon tra elstarajo de la orientaj montetoj. Sed la trupestroj de la Okcidento estis bone avertitaj de siaj skoltoj, lertuloj el Heneto Anun estrataj de Mablungo, kaj la embusko mem estis kaptita. Ĉar rajdistoj larĝe ĉirkaŭiris okcidente kaj alvenis flanke de la malamikoj kaj de malantaŭe, kaj tiuj estis detruitaj aŭ pelitaj orienten en la montetaron.

Sed la venko malmulte kuraĝigis la komandantojn.

— Tio estas nura finto, — diris Aragorno, — kaj ĝia ĉefa celo, miaopinie, estis prefere logi nin antaŭen pro malvera konjekto pri malforto de la Malamiko ol multe damaĝi nin provizore.

Ekde tiu vespero venis nazguloj kaj sekvis ĉiun moviĝon de la armeo. Ili ankoraŭ flugis altege kaj nevideble de ĉiuj krom Legolaso, tamen ilia ĉeesto estis sentebla, kiel plifortiĝo de ombro kaj malheliĝo de la suno; kaj kvankam la ringofantomoj ankoraŭ ne falatakis malalten kontraŭ siaj malamikoj kaj silentis, eligante neniun krion, timo pri ili ne estis forskuebla.

Tiel tempo kaj la senespera vojaĝo forpasis. Je la kvara tago post la Krucvojo kaj la sesa el Minaso Tirit ili venis finfine al la ekstremo de la loĝataj landoj, kaj ekeniris la dezerton, kuŝantan antaŭ la pordoj de la pasejo Cirito Gorgor; kaj ili povis vidi la marĉojn kaj la senkreskaĵojn, kiuj etendiĝis norden kaj okcidenten al Emin Muilo. Tiel dezertaj estis tiuj lokoj kaj tiel profunda la hororo kuŝanta sur ili, ke iuj el la armeo perdis sian kuraĝon, kaj tiuj povis nek rajdi nek marŝi pluen al la nordo.

Aragorno rigardis ilin, kaj en liaj okuloj estis pli da kompatato ol kolero, ĉar tiuj estis junuloj el Rohano, el fora Ŭestfaldo, aŭ terkulturistoj el Losarnaĥo, kaj por ili Mordoro estis ekde l' infanaĝo nomo

misa, kaj tamen nereala, legendo, kiu ne koncernis ilian simplan vivon; kaj nun ili marŝis kvazaŭ homoj en hida sonĝo realigita, kaj ili ne komprenis tiun ĉi militon nek kial la sorto kondukis ilin ĝis tia travivaĵo.

— Iru! — diris Aragorno. — Sed retenu tiom da honoro, kiom vi kapablas, kaj ne kuru! Ekzistas tasko, kiun vi eble provu por ne esti komplete hontigitaj. Celu sud-okcidenten ĝis Kairo Andros, kaj se ĝin ankoraŭ okupas malamikoj, kiel mi supozas, tiam rekaptu ĝin, se vi povos, kaj okupu ĝin ĝis la fino defende al Gondoro kaj Rohano!

Tiam iuj hontigitaj de lia indulgo venkis sian timon kaj pluiris, kaj la ceteraj ekesperis denove, aŭdinte pri vireca faro, al kiu ili povis sin turni, kaj ili foriris. Kaj tiel, ĉar multaj soldatoj estis jam lasitaj ĉe la Kruvojo, okazis ke kun malpli ol ses miloj la Komandantoj de la Okcidento venis finfine por defii la Nigran Pordegon kaj la potencon de Mordoro.

Ili iris antaŭen malrapide, atendante ĉiuhore respondon al sia defio, kaj ili rekuniĝis ĉar estus nura malŝparo de soldatoj elsendo de skoltoj aŭ grupetoj for de la ĉefarmeo. Je noktiĝo en la kvina marŝtago post la Morgula Valo ili starigis sian lastan tendaron kaj metis fajrojn ĉirkaŭe el tia morta ligno kaj eriko, kian ili povis trovi. Ili pasigis la noktohorojn maldorme kaj konsciis pri multaj aĵoj duonvideblaj, kiuj marŝis kaj ŝtelvagadis ĉie ĉirkaŭe, kaj ili aŭdis hurladon de lupoj. La vento ĉesis kaj la tuta aero ŝajnis senmova. Malmulton ili povis vidi, ĉar kvankam mankis nuboj kaj la kreskanta luno jam aĝis kvar noktojn, troviĝis fumoj kaj haladzoj leviĝantaj el la tero kaj la blankan krescenton vualis la nebuletoj de Mordoro.

Malvarmiĝis. Matene la vento denove ekblovis, sed ĝi nun venis el la nordo, kaj baldaŭ ĝi plifortiĝis al akcelanta blovado. Jam foriris la noktovagintoj, kaj la tereno ŝajnis malplena. Norde inter fetoraj putoj kuŝis la unua el la amasegoj kaj montetoj da skorio kaj frakasita rokaĵo kaj eksplodita grundo, la vomaĵo de la larvuloj de Mordoro; sed sude kaj jam proksime baŭmis la granda remparo de Cirito Gorgor, kaj meze la Nigra Pordego, kaj la du Turegoj de l' Dentoj altaj kaj malhelaj ambaŭflanke. Ĉar dum sia lasta marŝo la komandantoj forturnis sin de la malnova vojo, kiam ĝi deviis orienten kaj evitis la danĝeron de la embuskaj montetoj, kaj sekve nun ili alproksimiĝis al Moranono de la nord-okcidento, samkiel faris Frodo.

La du vastaj metalaj pordoklapoj de la Nigra Pordego estis firme fermitaj sub sia brovumanta arkaĵo. Sur la remparo nenio estis vid-ebla. Ĉio estis silenta sed atenta. Ili jam alvenis la lastan ekstremon de sia foleco kaj staris senespere kaj frostante en la griza lumo de l' frua tago antaŭ turegoj kaj muroj, kiujn ilia armeo ne povus sturmi es-pe-ro-plene, eĉ se ĝi alportus tien maŝinojn grandpotencajn, kaj la mal-amiko disponus neniom pli da forto ol sufiĉus por garnizoni nur la pordegon kaj la muron. Sed ili sciis, ke ĉiuj montetoj kaj rokejoj ĉirkaŭ Moranono estas plenaj je kaŝitaj malamikoj, kaj la ombreca deklivo transe estas borita kaj tunelita de svarmantaj kovaĵoj da miskreaĵoj. Kaj starante ili vidis ĉiujn nazgulojn kuniĝintaj, ŝvebantaj vulturece super la Turegoj de l' Dentoj; kaj ili sciis, ke ili estas gvat-ataj. Sed daŭre la Malamiko donis neniun signon.

Neniu elekto restis al ili krom ludi ĝisfine sian rolon. Tial Aragorno nun aranĝis la armeon laŭ la plejble konvena maniero; kaj ili estis ordigitaj sur du grandaj amasegoj de eksploditaj ŝtonoj kaj grundo, kiujn la orkoj amasigis dum jaroj da laboro. Antaŭ ili direkte al Mordoro kuŝis kvazaŭ ĉirkaŭfosaĵo marĉego el fumanta koto kaj fetoraj lagetoj. Kiam ĉio estis ordigita, la Komandantoj forrajdis al la Nigra Pordego kun multnombra gardistaro kaj la standardo kaj heroldoj kaj trumpetistoj. Tie estis Gandolfo kiel ĉefheroldo, kaj Aragorno kun la filoj de Elrondo, kaj Eomero el Rohano, kaj Imrahilo; ankaŭ al Legolaso, Gimlio kaj Peregrino estis ordonite kuniri, tiel ke ĉiuj malamikoj de Mordoro havu atestanton.

Ili venis ĝis aŭdodistanco de Moranono kaj malvolvis la standar-don, kaj blovis siajn trumpetojn; kaj la heroldoj antaŭenpaŝis kaj sendis siajn voĉojn supren trans la remparon de Mordoro.

— Elvenu! — ili kriis. — La Mastro de la Nigra Lando elvenu! Justecon li spertos. Ĉar li maljuste militis kontraŭ Gondoro kaj for-rabis ties terojn. Pro tio la Reĝo de Gondoro postulas, ke li kompensu siajn misfarojn kaj foriru porĉiame. Elvenu!

Sekvis longa silento, kaj nek de muro nek de pordo aŭdiĝis krio aŭ sono. Sed Saŭrono jam pretigis siajn planojn, kaj li emis priludi tiujn musojn kruele antaŭ ol bati mortige. Tial okazis, ke kiam la komand-antoj estis sin forturnontaj, la silento subite estis rompita. Aŭdiĝis longa grumblado de tamburegoj kiel tondro en la montaro, kaj poste blekado de kornoj, kiuj skuis la ŝtonojn mem kaj kontuzis la orelojn de la homoj. Kaj je tio pordo meze de la Nigra Pordego estis ĵetmal-fermita kun laŭta tintego kaj elvenis ambasado el la Nigra Turego.

Ĉekape rajdis alta kaj misega figuro sur nigra ĉevalo, se tio estis ĉevalo, ĉar ĝi estis grandega kaj hida, kaj ĝia vizaĝo estis terura masko, pli simila al kranio ol al viva kapo, kaj en la orbitoj de la okuloj kaj en la naztruoj brulis flamo. La rajdanto estis tute nigre vestita, kaj nigris lia alta kasko; tamen li estis ne ringofantomo, sed vivanta homo. La komandanto de la Turego Baraduro li estis, kaj lian nomon memoris neniu rakonto, ĉar li mem forgesis ĝin kaj li diris: "Mi estas la Buŝo de Saŭrono". Sed oni rakontis, ke li estis renegato, kiu devenis de la raso de tiuj, kiuj nomiĝis la nigraj numenoranoj, ĉar ili starigis siajn loĝejojn en Mez-Tero dum la jaroj de la regado de Saŭrono, kaj ili adoris lin, ĉar ili enamiĝis al miskleriĝo. Kaj li eniris servadon de la Nigra Turego kiam ĝi frue releviĝis, kaj pro sia ruzemo li ĉiam plialtiĝis en favoro de la Mastro, kaj li lernis grandan sorĉadon, kaj multe konis la menson de Saŭrono; kaj li pli kruelis ol ajna orko.

Ĝuste li nun elrajdis, kaj kun li venis nur eta trupo da nigre armajitaj soldatoj kaj unusola standardo, nigra sed surhavanta en ruĝo la Misfaran Okulon. Haltinte je kelkaj paŝoj antaŭ la Komandantoj el la Okcidento, li inspektis ilin supren-suben kaj ridis.

— Ĉu en tiu ĉi bandaĉo estas iu aŭtoritatulo taŭga por trakti kun mi? — li demandis. — Aŭ iu sufiĉe sagaca por kompreni min? Ĉiuokaze ne vi! — li mokis, sin turnante malestime al Aragorno. — Por krei reĝon necesas pli ol peco da elfa vitro, aŭ tia bandaĉo. Vidu, iu ajn bandito en la montaro povas vidiĝi sekvantaron simile imponan.

Aragorno nenion respondis, sed li rigardis la okulojn de l' alia kaj kroĉis la rigardon, kaj dum momento ili tiel interluktis; sed baldaŭ, kvankam Aragorno nek moviĝis nek metis manon al armilo, la alia ŝanceliĝis kaj retropaŝis, kvazaŭ bate minacita.

— Mi estas heroldo kaj ambasadoro, kaj oni ne rajtas ataki min! — li ekkriis.

— Kie tiaj leĝoj validas, — diris Gandolfo, — estas ankaŭ kutime, ke ambasadoroj malpli impertinentas. Sed neniu minacis vin. Nenio timindas ĉe ni ĝis kompletigo via komisiono. Sed se via mastro ne akiris novan saĝecon, tiam vi kun ĉiuj liaj servantoj troviĝos en granda danĝero.

— Do! — diris la mesaĝisto. — Sekve vi estas la proparolanto, maljuna grizbarbulo, ĉu? Ĉu ni ne aŭdis pri vi kelkfoje, kaj pri viaj vagoj, ĉiam kovanta komplotojn kaj damaĝojn en sekura malproksimo? Sed ĉi-foje vi elŝovis tro foren vian nazon, Mastro Gandolfo, kaj vi vidos, kio okazas al tiu, kiu starigas siajn malsaĝajn araneajojn antaŭ

la piedojn de Saŭrono la Granda. Mi havas signojn, kiujn oni ordonis montri al vi — precipe al vi, se vi aŭdacus veni.

Li gestis al unu el la gardistoj, kaj tiu paŝis antaŭen portante pakajon volvitan per nigraj tukoj.

Tiujn la mesaĝisto metis flanken, kaj tie, mirigante kaj konsternante ĉiujn Komandantojn, li montris unue tian mallongan glavon, kian portis Sam, kaj poste grizan mantelon kun elfa broĉo, kaj fine la mitrilan maŝkirason, kiun Frodo portis volvite en siaj ĉifitaj vestaĵoj. Nigro kovris iliajn okulojn, kaj ŝajnis al ili dum momenta silento, ke la mondo senmoviĝas, sed iliaj koroj svenis kaj la lasta espero malaperis. Grinĉjo, kiu staris malantaŭ princo Imrahilo, saltis antaŭen kun dolorkrio.

— Silentu! — diris Gandalfo severe, retroŝovante lin, sed la mesaĝisto laŭte ridis.

— Do vi havas kun vi ankoraŭ alian el tiuj nanoj! Kian utilon vi konstatas en ili, mi ja ne divenas, sed sendi ilin spioni en Mordoron preterpaŝas eĉ vian kutiman stultecon. Tamen mi dankas lin, ĉar evidente minimume tiu bubaĉo pli frue vidis tiujn ĉi signojn, kaj estus vane se vi nun malakceptus ilin.

— Mi ne volas malakcepti ilin, — diris Gandalfo. — Efektive mi konas ilin kaj ilian tutan historion, kaj malgraŭ via rikanado, fia Buŝo de Saŭrono, tion vi ne povas pretendi. Sed kial vi alportis ilin ĉi tien?

— Gnoma kiraso, elfa mantelo, klingo el la pereinta Okcidento, kaj spiono el la eta ratlando Provinco... Ne, ne surpriziĝu! Ni konas komplete tion: jen la markoj de konspiro. Nu, eble tiu, kiu portis ĉi aĵojn, estis kreito pro kies perdo vi ne funebros, kaj eble male: eble, iu kara por vi? Se jes, rapide konsiliĝu laŭ tiu malmulto da sagaco, kiu restas al vi. Ĉar Saŭrono ne amas spionojn, kaj lia estonta sorto jam dependas de via elekto.

Neniu respondis al li; sed li vidis iliajn vizaĝojn grizaj pro timo kaj la terurigo en iliaj okuloj, kaj li denove ridis, ĉar ŝajnis al li, ke lia ludo iras kontentige.

— Bone, bone! — li diris. — Li estis kara al vi, mi vidas. Aŭ eble lia komisiio estis tia, kian vi ne volis malsukcesinta, ĉu? Ĝi tamen malsukcesis. Kaj nun li eltenos la malrapidan turmenton dum jaroj, tiel longe kaj malrapide, kiel povos rimedi niaj artoj en la Granda Turego, kaj neniam liberiĝos, krom eble kiam li estos ŝanĝita kaj rompita tiel ke li venu al vi, kaj vi vidos tion, kion vi respondecis. Tio ĉi certe okazos, krom se vi akceptos la kondiĉojn de mia Mastro.

— Listu la kondiĉojn, — diris Gandolfo senŝancele, sed la apudstarantoj vidis la angoron sur lia vizaĝo, kaj nun li ŝajnis maljuna ŝrumpinto, kunpremita, finfine venkita. Oni ne dubis, ke li akceptos.

— Jen la kondiĉoj, — diris la mesaĝisto kaj ridetis rigardante ilin unu post la alia. — La bandaĉo de Gondoro kaj ties mislogitaj aliancanoj tuj retroiros trans Anduinon, unue ĵurinte neniam plu ataki armeile Saŭronon la Grandan, ĉu malkaŝe, ĉu sekrete. Ĉiuj terenoj oriente de Anduino apartenos al Saŭrono por ĉiam, nure. Okcidente de Anduino ĝis la Nebulecaj Montoj kaj la Breĉo de Rohano estos tributantoj de Mordoro, kaj tie la homoj ne portos armilojn, sed havos permeson regi siajn proprajn aferojn. Sed ili helpos rekonstrui Isengardon, kiun ili sovaĝe detruis, kaj tiu apartenos al Saŭrono, kaj tie loĝos lia komandanto: ne Sarumano, sed iu pli fidinda.

Rigardante la okulojn de la mesaĝisto ili komprenis lian penson. Li estos tiu komandanto, kaj kunigos ĉion restantan el la Okcidento sub sian regadon: li estos ilia tirano kaj ili liaj sklavo.

Sed Gandolfo diris:

— Tio estas postuli multon kontraŭ livero de unu servisto: ke via mastro ricevu interŝanĝe ion, pro kio li devos aliokaze militi multfoje! Aŭ ĉu la batalkampoj de Gondoro detruis liajn militesperojn, tiel ke li turnas sin al marĉando? Kaj se efektive ni taksus tiel alte la kaptiton, kian certecon ni havos, ke Saŭrono, la Fia Mastro de Perfidemo, plenumos sian flankon? Kie estas tiu kaptito? Oni elkonduku lin kaj transdonu lin al ni, kaj tiam ni pripensos tiujn postulojn.

Al la atentema Gandolfo ŝajnis, kiel al skermanto kontraŭ mortigema oponulo, ke dum spirlongo la mesaĝisto estas konsternita, tamen li rapide denove ridis:

— Ne ĵetu vortojn insolentajn al la Buŝo de Saŭrono! — li kriis. — Certecon vi deziras! Saŭrono tion ne donas. Se vi petegos lian indulgon, unue vi devos obei lin. Tiuj estas liaj kondiĉoj. Akceptu aŭ malakceptu!

— Tiujn ni akceptos! — diris Gandolfo subite. Li forĵetis sian mantelon kaj blanka lumo elradiis kvazaŭ glavo en tiu malhela loko. Antaŭ lia levita mano la mesaĝisto retropaŝis kaj Gandolfo proksimiĝinte kaptis kaj forprenis de li la signojn: kiraso, mantelo kaj glavo. — Tiujn ni prenos memore pri nia amiko. Sed koncerne viajn kondiĉojn, ni tute rifuzas ilin. Foriru, ĉar via komisiono finiĝis kaj morto apudas al vi. Ĉi tien ni venis ne por malŝpari vortojn traktante kun Saŭrono, senfida kaj malbenita, tiom malpli kun iu el liaj sklavo. Foriru!

Tiam la mesaĝisto de Mordoro ne plu ridis. Lia vizaĝo tordiĝis pro miro kaj kolero ĝis ĝi similis iun sovaĝbeston kiu, kaŭrante sur sia predo, estas batita ĉe la makzelo per doloriga vergo. Kolerego plenigis lin kaj lia buŝo bavis, kaj senformaj furiozaj sonoj venis strangole el lia faŭko. Sed li rigardis la minacajn vizaĝojn de la Komandantoj kaj ties mortigemajn okulojn, kaj timo venkis lian koleregon. Li eligis laŭtan krion, turniĝis, sursaltis sian ĉevalon, kaj kun sia trupo retrogalopis freneze al Cirito Gorgor. Sed dumire liaj soldatoj blovis siajn kornojn laŭ signalo delonge aranĝita; kaj eĉ antaŭ ol ili atingis la poridon, Saŭrono fermis sian kaptilon.

Tamburoj tondris kaj fajroj impetis supren. La granda pordego de Moranono larĝe svingmalfermiĝis. Tra ĝi elfluis granda armeo tiel rapide, kiel kirlaj akvoj kiam kluzklapo estas levata.

La Komandantoj denove surĉevaliĝis kaj retrorajdis, kaj el la armeo de Mordoro aŭdiĝis nova kriego. Polvo leviĝis sufoke en la aeron dum deproksime almarŝis armeo de orientanoj, kiuj atendis la signalon en la ombroj de Eredo Litui malantaŭ la pli fora turego. Suben de sur la montaroj ambaŭflanke de Moranono verŝiĝis nenombreblaj orkoj. La okcidentanoj estis enretigitaj, kaj baldaŭ, ĉie ĉirkaŭ la grizaj teramasoj, sur kiuj ili staris, potencoj dekoble kaj pli ol dekoble pli grandaj ol la ilia, ringos ilin en maro de malamikoj. Saŭrono prenis la proponitan logaĵon en ŝtalajn makzelojn.

Malmulta tempo restis al Aragorno por ordigi la batalfronton. Sur la unua monteto li staris kun Gandolfo, kaj tie bela kaj senespera estis hisita la standardo de la Arbo kaj Steloj. Sur la alia monteto tutproksima staris la standardoj de Rohano kaj Dol Amroto: Blanka Ĉevalo kaj Arĝenta Cigno. Kaj ĉirkaŭ ĉiu monteto estis starigita ringo frontanta ĉiudirekten, hirta je lancoj kaj glavoj. Sed antaŭe direkte al Mordoro, de kie venos la unua severa atako, staris la filoj de Elrondo maldekstre kun dunadanoj ĉirkaŭ ili, kaj dekstre princo Imrahilo kun la viroj de Dol Amroto altaj kaj belaj, kaj elektitaj viroj el la Turego de Gardado.

Blovis la vento, la trumpetoj sonoris, kaj sagoj sibilis; sed la suno nun supreniranta al la sudo, estis vualita per la fumoj de Mordoro, kaj tra minaca nebuleto ĝi ekbrilis, forega, paŭta ruĝo, kvazaŭ temus pri tagfino, aŭ la fino eble de la tuta mondo de lumo. Kaj el la debutanta malhelo venis la nazguloj kun malvarmaj voĉoj kriantaj vortojn de morto; kaj tiam ĉiu espero estingiĝis.

Grinĉjo kliniĝis hororpremite, kiam li aŭdis Gandalfon rifuzi la kondiĉojn kaj kondamni Frodon al turmento en la Turego; sed li regis sin, kaj nun li staris apud Beregondo en la unua vico de Gondoro kun la soldatoj de Imrahilo. Ĉar ŝajnis al li preferinde morti baldaŭ kaj lasi la amaran historion de sia vivo, tial ke ĉio ruiniĝis.

— Se nur Gaja estus ĉi tie, — li aŭdis sin diri, kaj rapidaj pensoj hastis tra lia menso, ĝuste dum li rigardis la malamikojn impeti al atako: “Nu, nu, jam ĉiuokaze mi komprenas kompatindan Denetoron iom pli bone. Ni eble mortus kune, Gaja kaj mi, ĉar ni devos morti, kial ne? Nu, tial ke li ne ĉeestas, mi esperas, ke lin trafos fino pli facila. Sed nun mi devas fari mian plejblon”.

Li elingigis sian glavon kaj rigardis ĝin kaj la interplektiĝajn formojn el ruĝo kaj oro; kaj la fluaj literoj de Numenoro flagris fajrece sur la klingo. “Ĉi estas forĝita ĝuste por tiu horo, — li pensis. — Se mi nur povus bati tiun fian mesaĝiston per ĝi, tiam mi preskaŭ egaligus al Gajĉjo. Nu, mi batos kelkajn el ĉi brutaj kovaĵoj antaŭ la fino. Se nur mi povus vidi denove friskan sunlumon kaj verdajn herbojn!”

Ĝuste dum li pensis tiel, la unua sturmo karambolis kun ili. La orkoj malhelpataj de la marĉoj antaŭ la montetoj haltis kaj pafis siajn sagojn en la defendajn vicojn. Sed tra ili venis paŝegante, blekante brutece, granda trupo de montetaj troloj el Gorgoroto. Pli altaj kaj pli larĝaj ol homoj ili estis, kaj ili estis vestitaj nur per strikta maŝkiraso el kornecaj skvamoj, aŭ eble tio estis ilia hida haŭto; sed ili portis rondajn ŝildojn enormajn kaj nigrajn kaj svingis pezajn martelojn per siaj nodozaj manoj. Senskrupule ili saltis en la lagetojn kaj travadis, blekante dum la alveno. Kvazaŭ ŝtormo ili inundis la vicon de la gondoranoj kaj batis kaskojn kaj kapojn, brakojn kaj ŝildojn, kvazaŭ forĝistoj prilaborantaj la ardan kurbiĝan feron. Apud Grinĉjo Beregondo estis senkonsciigita kaj transpaŝita, kaj li falis; kaj la granda ĉefontrolo, kiu batis lin, kliniĝis super lin etendante kroĉan krifon, ĉar tiuj fikreitoj kutimis mordi la gorĝojn de tiuj, kiujn ili faligis.


Tiam Grinĉjo batis supren, kaj la surskribita okcidenta klingo trapikis la haŭton kaj profunde eniris la organojn de la trolo, kaj ties nigra sango elsputegis. Li ŝanceliĝis antaŭen kaj kraŝis kvazaŭ falanta roko, kovrante tiujn, kiuj estis sube. Nigro kaj fetoro kaj prema doloro inundis Grinĉjon, kaj lia menso forsvenis en nigregon.

“Tiel tio finiĝas laŭ mia antaŭsupozo”, — li pensis forflagrante. Kaj tiu penso iomete ridis en li dumfuĝe, ŝajne preskaŭ gaja ĉar formetanta finfine ĉiajn dubojn kaj zorgojn kaj timojn. Kaj tiam ĝuste

forflugante en forgeson li aŭdis voĉojn, kaj tiuj ŝajnis krei en iu forgesita mondo forsupre.

— La agloj venas! La agloj venas!

Ankoraŭ unu momenton ŝvebis la penso de Grinĉjo: “Bilbo! Sed ne! Tio venis el lia rakonto, antaŭ tre longe. Tio estas mia rakonto, kaj ĝi jam finiĝis. Adiaŭ!” Kaj lia penso flugis foren kaj liaj okuloj nenion pli vidis.



1. Golfo de Ljuno
2. Grizaj Havenoj
3. La Provinco
4. Malnova Arbaro
5. Veterverto
6. Rivendelo
7. Pordo de Morio
8. Isengardo
9. Iridaj Kampoj
10. Lorteno
11. Dol Gulduro
12. Minaso Tirit
13. Minaso Morgul
14. Breço de Rohano

Ĉapitro 1

LA TUREGO DE CIRITO UNGOL

Sam levis sin dolorplene de sur la tero. Momente li scivolis, kie li Sestas, kaj poste revenis al li la tutaj mizero kaj senespero. Li estis en la profunda malhelo antaŭ la suba enirejo de la orka fortikaĵo; ties latuna pordo estis fermita. Verŝajne li falis senkonscia, kiam li ĵetis sin kontraŭ ĝin; sed kiom longe li kuŝis tie, li ne sciis. Tiam li estis arda, senespera kaj furioza; nun lin tremigis la malvarmo. Li ŝteliris al la pordo kaj premis al ĝi sian oreton.

Forinterne li povis aŭdi mallaŭte la voĉojn de orkoj bruegantaj, sed baldaŭ ili ĉesis aŭ forpasis el aŭdodistanco, kaj ĉio silentiĝis. Lia kapo doloris, kaj liaj okuloj vidis fantomajn lumojn en la malhelo, sed li baraktis por sin ordigi kaj pensi. Estis ĉiuokaze klare, ke mankas espero pri eniro al la orka fortikaĵo tra tiu pordo; li eble atendus tie dum tagoj antaŭ ol ĝi estus malfermita, kaj atendado ne eblis: la tempo estis terure valora. Li jam ne plu dubis pri sia devo: li devos savi sian mastron aŭ perei klopodante.

— La perejo pli probablas, kaj ĉiuokaze estos pli facila, — li diris serioze al si, dum li eningigis Pikilon kaj fortunis sin de la latuna pordo. Li malrapide palpserĉis vojon en la mallumo tra la tunelo, ne riskante uzi la elfan lumon; kaj dumire li provis kunligi la okazaĵojn post kiam Frodo kaj li forlasis la kruevojn. Li scivolis, kioma horo estas. Ie inter unu tago kaj alia, li supozis, sed eĉ pri la tagoj li jam perdis la kalkulon. Li estis en malluma lando, kie la tagoj de la mondo ŝajnis forgesitaj, kaj kie ankaŭ ĉiuj enirintoj estis forgesataj.

— Mi scivolas, ĉu ili entute pensas pri ni, — li diris, — kaj kio okazas al ili ĉiuj tie fore. — Li gestis malprecize per sia mano en la aero; sed li fakte nun frontis suden, revenante al la tunelo de Ŝeloba, ne okcidenten. Fore okcidente en la mondo proksimiĝis la tagmezo de la dek-kvara tago de marto laŭ la Provinca kalkulo, kaj ĝuste nun Aragono rekondukis el Pelargiro la nigran ŝiparon, kaj Gaja rajdis kun la rohananoj tra la Ŝtonfurgona Valo, dum en Minaso Tirit flamoj leviĝis kaj Grinĉo vidis la frenezecon plifortiĝi en la okuloj de Denetoro.

Tamen inter ĉiuj zorgoj kaj timoj la pensoj de iliaj amikoj konstante direktiĝis al Frodo kaj Sam. Ili ne estis forgesitaj. Sed ili estis fore ekster la helpatingo, kaj neniun penso povis havigi helpon al Samsaĝo, filo de Hamfasto. Li estis tutege sola.

Li revenis finfine al la ŝtona pordo de la orka koridoro, kaj plu ne kapablis trovi la klinkon aŭ riglilon, kiu fermtenis ĝin, li kiel antaŭe transgrimpis ĝin kaj falis malkrude al la tero. Poste li vojis kaŝeme al la elirejo de la tunelo de Ŝeloba, kie la ĉifonoj de ŝia granda araneaĵo daŭre disbloviĝis kaj ŝanceliĝis en la malvarma aero. Ĉar malvarma ĝi ŝajnis al Sam post la fetora mallumo malantaŭe; sed ties spiro refreŝigis lin. Li ŝteliris singarde eksteren.

Ĉio estis misaŭgure kvieta. La lumo ne pli fortis ol tiu de krepusko je fino de malhela tago. La vastaj vaporoj, kiuj leviĝis en Mordoro kaj fluis okcidenten, pasis malalte super lia kapo, granda konfuzaĵo el nuboj kaj fumo, jam denove prilumata per malvigle ruĝa ardo.

Sam rigardis supren al la orka turego, kaj subite tra ties mallarĝaj fenestroj lumoj gapis eksteren kvazaŭ ruĝaj okuletoj. Li scivolis, ĉu ili estas iaspeca signalo. Lia timo pri la orkoj, provizore forgesita pro lia kolero kaj lia senesperigo, nun revenis. Laŭ lia supozo nur unu proceduro eblis al li: plui kaj trovi la ĉefpordon de la terura turego, sed liaj genuoj sentiĝis feblaj, kaj li konstatis, ke li tremas. Tirante suben siajn okulojn de la turego kaj la kornoj de la fendaĵo antaŭ li, li obeigis siajn malvolontajn piedojn, kaj malrapide, plenstreĉe aŭskultante, gapante en densajn ombrojn de la apudvojaj rokegoj, li postsekvis siajn paŝojn, preter la loko, kie Frodo falis kaj daŭre la odoraĉo de Ŝeloba postrestis, kaj poste supren plu, ĝis li staris denove en la fendego mem, kie li surmetis la Ringon kaj vidis pasi la trupon de Ŝagrato.

Tie li haltis kaj sidiĝis. Provizore li ne plu povis peli sin antaŭen. Li sentis, ke post kiam li pasos la verdon de la pasejo kaj faros unu paŝon vere suben al la lando Mordoro, tiu paŝo estos nerevokebla. Li neniam povus reveni. Sen klara celo li elprenis la Ringon kaj denove surmetis ĝin. Li tuj spertis la ŝarĝegon de ĝia pezo, kaj sentis freŝe, sed jam pli forte kaj urĝe ol iam, la malicon de la Mordora Okulo, serĉanta, klopodanta trapiki la ombrojn, kiujn ĝi kreis sindefende, sed kiuj nun malhelpis ĝin dum ĝia maltrankvilo kaj dubemo.

Kiel antaŭe Sam konstatis, ke lia aŭdkapablo akriĝis, sed laŭ lia vido la ĉi-mondaj aferoj ŝajnis maldensaj kaj malprecizaj. La rokmuoj de la vojo estis palaj, kvazaŭ vidataj tra nebuleto, sed ankoraŭ li

aŭdis fore la bobeladon de Ŝeloba en ties mizero; akre, klare kaj tre proksime tio ŝajnis, li aŭdis kriojn kaj interfrapon de metalo. Li saltstariĝis, kaj premis sin al la apudvoja muro. Lin ĝojigis la Ringo, ĉar jen estis alia trupo da orkoj marŝanta. Aŭ tiel li unue supozis. Tiam subite li konstatis, ke ne estas tiel, lia aŭdado trompis lin: la orkaj krioj venis el la turego, kies plej alta korno estis nun rekte super li, maldekstre de la fendego.

Sam horortremis kaj klopodis devigi sin moviĝi. Klare estis iu fimagio. Eble malgraŭ ĉiuj ordonoj la krueleco de la orkoj superregis ilin, kaj ili turmentas Frodon, aŭ eĉ sovaĝe dishakas lin. Li aŭskultis; kaj al li venis ekbrilo de espero. Ne multe dubebliis: okazas luktado en la turego, la orkoj evidente batalas inter si, Ŝagrato kaj Gorbago venis al interbatiĝo. Malgraŭ malforto de la espero alportita de lia konjekto, ĝi sufiĉis por vigligi lin. Eble troviĝis eta ebleco. Lia amo al Frodo leviĝis super ĉiujn aliajn pensojn, kaj forgesinte sian danĝeron li kriis laŭte:

— Mi venas, sinjoro Frodo!

Li kuris antaŭen ĝis la verto de la suprenira pado kaj transiris ĝin. Tuj la vojo turniĝis maldekstren kaj plonĝis krute suben. Sam jam transiris en Mordoron.

Li demetis la Ringon, motivita eble per iu profunda antaŭvido de danĝero, kvankam interne li pensis nur, ke li deziras vidi pli klare.

— Prefere rigardi la plej malbonan, — li murmuris. — Ne utilas ĉirkaŭstumbli en nebulo!

Malmola kaj kruela kaj amara estis la lando, kiun trafis lia rigardo. Antaŭ liaj piedoj la plejalta firsto de Efelu Duad apike subiris laŭ grandaj klifoj en malluman kavon, aliflanke de kiu leviĝis alia firsto, malpli alta, kies randon noĉis kaj zigzagis rokoj dentaĉsimilaj, kiuj elstaris nigre kontraŭ la ruĝa lumo malantaŭa: tio estis la morna Morgajo, la interna ringo de la bariloj de la lando. Malproksime poste, sed preskaŭ rekte antaŭe, trans larĝa lago da mallumo punktita je etaj fajroj, vidiĝis granda brulardo; kaj de ĝi leviĝis laŭ enormaj kolonoj kirligita fumo, bistre ruĝa ĉe la radikoj, supre nigra, kie ĝi mergiĝis kun la ondeganta baldakeno, kiu tegmente kovris la tutan malbenitan landon.

Sam estis rigardanta Orodruinon, la Fajromonton. Ĉiam denove la fornoj malproksimaj sub ĝia cindra konuso ardiĝis kaj kun grandaj ŝveliĝoj kaj pulsadoj elverŝis riverojn da fandita rokaĵo el abismoj en

ĝiaj flankoj. Iuj fluis flamante al Baraduro tra enormaj kaneloj; iuj serpentumis sur la ŝtonozan ebenajon, ĝis ili malvarmiĝis kaj kuŝis kvazaŭ torditaj drakformoj vomitaj el la turmentita tero. En ĝuste tia naskturmenta horo Sam ekvidis la Monton de Sorto, kaj ties lumo, barita per la alta ekrano de Efelo Duad disde tiuj, kiuj grimpis la vojon el la okcidento, nun ekflagris sur la nudaj rokfacoj, tiel ke ili ŝajnis satoriĝi je sango.

En tiu terura lumo Sam staris konsternite, ĉar nun, rigardante maldekstren, li povis vidi la turegon de Cirito Ungol en ties tuta forto. La korno, kiun li vidis de la alia flanko, estis nur ties plej supra tureto. Ĝia orienta faco baŭmis laŭ tri grandaj ŝtupoj desur breto en la monta muro fore sube; ĝia dorso estis turnita al klifego malantaŭe, de kiu ĝi elstaris je pintaj bastionoj, unu super alia, malgrandiĝantaj dum la supreniro, kun krutaj flankoj el lerta masonaĵo, kiu frontis nord-orienten kaj sud-orienten. Super la plej malalta ŝtupo, je ducent futoj sub la loko, kie Sam nun staris, troviĝis muro krenela, kiu enfermis mallarĝan korteton. Ties pordo, je la pli proksima sud-orienta flanko, malfermiĝis al larĝa vojo, kies ekstera randmuro laŭiris eĝon de krutegaĵo, ĝis ĝi deviis suden kaj serpentumis suben en la mal-lumon por aliĝi al la vojo venanta tra la Morgula Pasejo. Poste ĝi daŭris tra segildenta fendo en Morgaĵo eksteren al la valo de Gorgoroto kaj plu al Baraduro. La mallarĝa supra vojeto, kie staris Sam, saltis rapide suben por renkontiĝi kun la ĉefvojo sub la brovumantaj muroj proksime al la turega pordego.

Rigardante ĝin Sam subite komprenis, preskaŭ ŝokite, ke tiu ĉi fortikaĵo estis konstruita ne por bari eksterajn malamikojn, sed por reteni ilin interne. Ĝi estis efektive laboraĵo de Gondoro antaŭ longege, orienta antaŭposteno de la defendaĵoj de Itilio, kreita kiam post la Lasta Alianco la homoj el Okcidentio gardis la misan landon de Saŭrono, kie ankoraŭ kaŝiĝis liaj kreaĵoj. Sed simile al Narĥosto kaj Karĥosto, la Turegoj de la Dentoj, ankaŭ ĉi tie la vigilado malsukcesis, kaj perfido transdonis la turegon al la Mastro de la Ringofantomoj, kaj jam dum multaj jaroj ĝi estis okupata de misuloj. Post la reveno al Mordoro Saŭrono trovis ĝin utila; ĉar li havis malmultajn servistojn, sed multajn timigitajn sklavojn, kaj daŭre ĝia celo estis kiel pratempe malhelpi eskapon el Mordoro. Tamen se malamikoj aŭdacus provi la sekretan eniron al tiu lando, tiam ĝi estus ankaŭ lasta sendorma gardo kontraŭ iuj, kiuj eble preterpasus la vigiladon de Morgulo kaj Ŝeloba.

Tro klare Sam vidis kiel senespere estus, se li kaŝe descendus sub tiuj multokulaj muroj por pasi la gardatan pardonon. Kaj eĉ se li farus tion, li ne povus longe iri laŭ la gardata vojo; eĉ la nigraj ombroj, profunde kuŝantaj ekster atingo de la ruĝa ardo, ne longe ŝirmus lin de la noktokulaj orkoj. Sed kvankam tiu vojo estus senespera, lia tasko jam pli malbonis; ne eviti kaj eskapi la pardonon, sed eniri tra ĝi, senakompane.

Lia penso, turniĝis al la Ringo, sed tie konsolo mankis, ĉeestis nur timego kaj danĝero. Tuj post kiam li ekvidis en la foro la brulantan Monton de Sorto, li konstatis ŝanĝiĝon en sia ŝarĝo. Dum ĝi proksimiĝis al la fornegoj, kie en la fundoj de la tempo ĝi estis formita kaj forĝita, la potenco de la Ringo kreskis, kaj ĝi fariĝis pli danĝera, neregbla krom per iu fortega volo. Dum Sam staris tie, kvankam la Ringon li ne havis surfingre, kaj ĝi pendis sur sia ĉeno ĉirkaŭ lia kolo, li sentis sin pligrandigita, kvazaŭ li estus vestita en enorma distordita ombro de si mem, vasta kaj misaŭgura minaco haltigita sur la muroj de Mordoro. Li sentis, ke de tiam li havas nur du elektojn: rifuzi la Ringon, kvankam ĝi turmentus lin; aŭ pretendi ĝin kaj defii la Potencon sidantan en ĝia malhela fortikaĵo post la valo de ombroj. Jam la Ringo tentis lin, mordante liajn volon kaj racion. Nekredeblaj fantaziaĵoj leviĝis en lia menso; kaj li vidis Samsaĝon la Fortan, Heroon de la Epoko, paŝeganta kun flamanta glavo tra la sombriga lando, kaj armeojn entuziasme kuniĝantaj laŭ lia alvoko, kiam li marŝis por renversi Baraduron. Kaj poste ĉiuj nuboj forruliĝis, kaj blanka suno leviĝis, kaj pro lia ordono la valo de Gorgoroto estiĝis ĝardeno de floroj kaj arboj kaj naskis fruktojn. Necesis nur ke li surfingrigu la Ringon kaj pretendu ĝin por si, kaj ĉi ĉio povus okazi.

En tiu horo tenta, ĝuste la amo al la mastro plej helpis lin plu esti firma; sed ankaŭ en lia fundo vivis ankoraŭ nevenkita lia ordinara hobita sagaco: li sciis en la kora kerno, ke li ne sufiĉe grandas por toleri tian ŝarĝon, eĉ se tiaj vizioj ne estus nura trompo por perfidi lin. Unu ĝardeneto de libera ĝardenisto estis lia tuta bezono kaj rajto, ne ĝardeno ŝvelinta al regno; la propraj manoj uzotaj, ne la manoj de aliuloj ordonotaj.

— Kaj ĉiukaze nur truko estas ĉi tiuj ideoj, — li diris al si. — Li ekvidos min kaj senkuraĝigos min, antaŭ ol mi povos eĉ ekkrii. Li ekvidos min sufiĉe rapide, se mi surmetos la Ringon nun, en Mordoro. Nu, jen mia tuta konkludo: la aferoj ŝajnas tiel senesperaj kiel

frosto en printempo. Ĝuste kiam nevidebleco estus vere utila, la Ringon mi ne povas uzi! Kaj se mi iam sukcesos plui, ĝi estos nenio alia ol trenaĵo kaj ŝarĝo ĉiupaŝe. Do, kion mi faru?

Li ne vere dubis. Li sciis, ke li devos subeniri al la pordego kaj ne plu prokrasti. Skuinte la ŝultrojn, kvazaŭ por forskui la ombron kaj forigi la fantomojn, li komencis malrapide subiri. Je ĉiu paŝo li ŝajnis plietiĝi. Li ne multe progresis ĝis li jam reŝrumpis al tre malgranda kaj timigita hobito. Li nun preterpasis sub la muroj mem de la turego, kaj la krioj kaj sonoj de batalado estis aŭdeblaj al liaj senhelpaj oreloj. Ĉi-momente la bruo ŝajnis veni el la korto malantaŭ la ekstera muro.

Sam estis proksimume duonvoje laŭ la pado, kiam el la malhela enirejo en la ruĝan ardon enkuris du orkoj. Ili ne turniĝis liadirekten. Ili celis la ĉefvojon; sed dum la kurado ili stumblis kaj falis teren kaj kuŝis senmove. Sam vidis neniujn sagojn, sed li supozis, ke la orkoj estas pafitaj de aliaj sur la remparo aŭ kaŝitaj en la ombro de la pordego. Li pluiris, premiĝante al la muro maldekstre. Unu suprenrigardo konvinkis lin, ke ne eblas ĝin grimpi. La masonaĵo leviĝis tridek futojn, sen fendeto aŭ breto, al superpendaj tavoloj similaj al renversitaj ŝtupoj. La pordo estis la sola vojo.

Li ŝteliris pluen; kaj dumire li scivolis, kiom da orkoj loĝas en la turego kun Ŝagrato, kaj kiom havas Gorbago, kaj pri kio ili kverelas, se tia estas la afero. La trupo de Ŝagrato pli frue ŝajnis ĉirkaŭ kvardeko, kaj tiu de Gorbago pli ol duoble tioma; sed kompreneble la patrolo de Ŝagrato estis nur parto de lia garnizono. Preskaŭ certe ili kverelis pri Frodo kaj la rabajo. Momente Sam haltis, ĉar subite la aferoj ŝajnis al li klaraj, preskaŭ kvazaŭ li vidus ilin propraokule. La kiraso mitrila! Kompreneble Frodo ĝin portas, kaj certe ili trovis ĝin. Kaj laŭ tio, kion Sam aŭdis, Gorbago certe avidas ĝin. Sed la ordonoj el la Malhela Turego estis tiutempe la sola protektaĵo de Frodo, kaj se oni ignorus ilin, Frodo povus esti iam ajn mortigita.

— Ek al, mizera pigrulo! — Sam kriis al si. — Nun tempas agi!

Li elingigis Pikilon kaj kuris al la malfermita pordo. Sed ĝuste kiam li estis enironta sub la arkaĵegon li spertis ŝokon: li kvazaŭ karambolus kun ia araneaĵo simila al tiu de Ŝeloba, sed nevidebla. Neniun obstaklon li povis vidi, sed io tro fortika kontraŭ plenumo de lia volo baris al li la vojon. Li ĉirkaŭrigardis, kaj tiam en la ombro de la pordego li vidis la Du Gardantojn.

Ili similis figuregojn sidantaj sur tronoj. Ĉiu el ili havis po triigitaj

korpoj, kaj po tri kapoj frontantaj eksteren, internen kaj trans la enirejon. La kapoj havis vizaĝojn vulturajn, kaj sur iliaj genuoj kuŝis krifsimilaj manoj. Ili ŝajnis ĉizitaj el grandaj ŝtonblokoj, nmoveblaj, kaj tamen ili konsciis: iu terura spirito de fia vigileco loĝis en ili. Ili rekonas malamikojn. Ĉu videbla, ĉu nevidebla, neniu povis preteri nerimarkite. Ili malpermesus lian eniron aŭ eskapon.

Hardante sian volon Sam denove puŝis sin antaŭen kaj haltis abrupte, ŝanceliĝante kvazaŭ pro bato al liaj brusto kaj kapo. Poste, multe riskante, ĉar nenion alian fareblan li povis elpensi, responde al subita penso veninta al li, li malrapide eligis la flakoneton de Galadriela kaj alte tenis ĝin. Ĝia blanka lumo rapide viviĝis, kaj la ombroj sub la malhela arkaĵo fuĝis. La monstraj Gardantoj sidis tie fridaj kaj senmovaj, rivelitaj laŭ sia tuta hida formo. Momente Sam ekvidis brileton en la nigraj ŝtonoj de iliaj okuloj, kies malico mem timigis lin; sed malrapide li sentis ilian volon ŝanceliĝi kaj diseriĝi en timon.

Li pretersaltis ilin; sed ĝuste dum li faris tion, reŝovante la flakoneton en sian sinon, li konsciis klare, kvazaŭ ŝtala stango klakfermiĝus malantaŭ li, ke ilia vigileco renoviĝis. Kaj el tiuj fiaj kapoj eliĝis alta akra krio, kiu eĥis en la baŭmaj muroj antaŭ li. Forsupre, kvazaŭ responda signalo, raŭka sonorilo sonigis unuopan baton.

— Jen farite! — diris Sam. — Mi sonorigis ĉe la dompordo! Nu, venu jam, iu ajn! Diru al komandanto Ŝagrato, ke la granda elfa batalisto vizitas, ankaŭ kun sia elfa glavo!

Aŭdiĝis neniu respondo. Sam paŝis antaŭen. Pikilo briletis blue en lia mano. La korto kuŝis en profunda ombro, sed li vidis, ke sur la pavimo estis dissternitaj multaj kadavroj. Ĝuste antaŭ liaj piedoj estis du orkaj arkpafistoj kun ponardoj en la dorsoj. Poste kuŝis multaj aliaj: iuj unuope, morthakitaj aŭ pafitaj; aliaj duope, ankoraŭ kroĉantaj unu la alian, mortigitaj dum la pika lukto mem, strangolantaj, mordantaj. La ŝtonoj estis glitige kovritaj de malhela sango.

Sam rimarkis du livreojn, unu signitan je la Ruĝa Okulo, la alian je luno misformita laŭ hidega vizaĝo de la morto, sed li ne haltis por rigardi de pli proksime. Trans la korto, pordego sube de l' turego estis duone malfermita, kaj trairis ruĝa lumo: granda orko kuŝis morta sur la sojlo. Sam transsaltis la kadavron kaj eniris; kaj poste li ĉirkaŭgapis ne sciante kion fari.

Larĝa kaj eĥanta koridoro direktiĝis malantaŭen de la pordo al la montoflanko. Ĝin malhele lumigis torĉoj flagrantaj en krampoj sur la

muroj, sed ĝia fora ekstremo perdiĝis en sombro. Multaj pordoj kaj trairejoj estis videblaj ambaŭflanke sporadaj; sed ĝi estis malplena escepte de du-tri pliaj kadavroj dissternitaj sur la planko. Pro tio, kion li aŭdis en la parolo inter la du trupestroj, Sam sciis, ke la morta aŭ viva Frodo plej verŝajne troviĝas en ĉambro alte en la turo tre supre; sed li eble devus serĉi dum tuta tago antaŭ ol trovi la vojon.

— Ĝi proksimas la malantaŭon, laŭ mia konjekto, — murmuris Sam. — La tuta turego supreniras kvazaŭ malantaŭen. Kaj ĉiuokaze mi prefere sekvu jenajn lumojn.

Li antaŭeniris laŭ la koridoro, sed jam malrapide, ĉiupaŝe malpli volonte. Teruro komencis denove kroĉi lin. Aŭdiĝis neniu sono krom la batado de liaj piedoj, kiu ŝajnis kreski al eĥanta bruoj, kiel la frapado de manegoj sur la ŝtonoj. La kadavroj, la malpleno, la humidaj nigraj muroj kiuj en la torĉa lumoj ŝajnis guti sangon, la timo pri subita morto embuskanta en iu pordejo aŭ ombro; kaj malantaŭ lia tuta menso la atendata gvata malicaĵo ĉe la pordego: ĉio ĉi estis preskaŭ pli ol li povis devigi sin fronti. Lukto estis al li pli bonvena — kontraŭ ne tro multaj malamikoj samtempe — ol tiu ĉi hida kovanta necerteco. Li devigis sin pensi pri Frodo kuŝanta ligite aŭ dolorante aŭ mortinte ie en tiu timiga loko. Li pluiris.

Li jam pasis ekster la torĉlumon, preskaŭ ĝis granda arkaĵa pordo fine de la koridoro, la interna flanko de la suba pordo, laŭ lia prava konjekto, kiam aŭdiĝis de supre tre alte terura sufokiĝa kriĉo. Li haltis abrupte. Poste li aŭdis proksimiĝantajn piedojn. Iu kuris hastege mal-supren laŭ eĥanta ŝtuparo super lia kapo.

Lia volo tro malfortis kaj malrapidis por malhelpi lian manon. Ĝi tiris la ĉeneton kaj kaptis la Ringon. Sed Sam ankoraŭ ne surfangigis ĝin; ĉar ĝuste kiam li premis ĝin al sia brusto, venis suben klakanta orko. Elsaltinte tra senluma trairejo dekstre, li alkuris. Li estis for ne pli ol ses paŝojn, kiam, levante sian kapon, li ekvidis Samon; kaj Sam povis aŭdi lian anhelan spiradon kaj vidi la furiozon en liaj sangostriaj okuloj. Konsternite li haltis abrupte. Ĉar tio, kion li vidis, ne estis eta timigita hobito provanta teni firme la glavon: li vidis grandan silentan figuron, mantelitan per griza ombro, baŭmantan antaŭ la ŝanceliĝaj malantaŭaj lumoj; per unu mano ĝi tenis glavon kies lumoj mem estis forte doloriga, per la alia ĝi kroĉis sian bruston, sed tenis kaŝite iun sennoman minacon de potenco kaj destino.

Momente la orko kaŭris, kaj poste kun hida timojelpo li turniĝis kaj refuĝis tien, de kie li venis. Neniam estis iu hundo pli kuraĝigita,

kiam ĝia malamiko forkuris, ol Sam pro tiu neatendita fuĝo. Kun krio li postkuris.

— Jes! La elfa batalisto estas libera! — Li kriis.— Mi venas. Nur montru al mi la vojon supren, aŭ mi senhauĝigos vin!

Sed la orko estis sur propra tereno, vigla kaj bone nutrita. Sam estis fremdulo, malsata kaj lacega. La ŝtuparo estis alta kaj kruta kaj serpentuma. La spiro de Sam komencis anheliĝi. La orko baldaŭ malaperis, kaj nun nur feble aŭdiĝis la frapado de liaj piedoj, dum li pluiris supren. De tempo al tempo li eligis krion, kaj ties eĥo trakuris la murojn. Sed iom post iom ties tuta bruo formortis.

Sam plandis plu. Li sentis, ke li estas sur la ĝusta vojo, kaj lia animato jam sufiĉe fortiĝis. Li forŝovis la Ringon kaj striktigis sian zonon.

— Nu, nu! — li diris. — Se ĉiuj simile malŝatos min kaj mian Pikilon, tio ĉi eble finiĝos pli bone ol mi esperis. Kaj ĉiukaze ŝajnas, ke Ŝagrato, Gorbago kaj kompanio preskaŭ elfaris mian taskon. Krom tiu timigita rateto, neniu restas vivanta en tiu ĉi loko mi ja kredas!

Kaj tion dirinte li haltis, abrupte bremsita, kvazaŭ li frapus sian kapon kontraŭ la ŝtonan muron. La plena signifo de tio, kion li diris, trafis lin kvazaŭ bato. Neniu restas vivanta! Kies estis tiu terura sufokiĝa kriĉo?

— Frodo, Frodo! Mastro! — li kriis duonsingulte. — Se ili jam mortigis vin, kion mi faru? Nu, mi venas finfine, al la supraĵo mem, por vidi ĉion videndan.

Li daŭre supreniris. Estis senlume, escepte de okazaj torĉoj flagrantaj ĉe vojturniĝoj aŭ apud iuj trairejoj, kiuj kondukis en la pli altajn etaĝojn de la turego. Sam provis kalkuli la ŝtupojn, sed post ducento li perdis orientiĝon. Li nun movis sin kviete; ĉar ŝajnis al li, ke li aŭdas voĉojn parolantajn ankoraŭ iom supre. Pli ol unu rato restis viva, ŝajne.

Tute subite, kiam li jam supozis neebbla pluan elpumpo de spiro aŭ kurbigo de la genuoj, la ŝtuparo finiĝis. Li staris senmova. La voĉoj estis nun laŭtaj kaj proksimaj. Sam ĉirkaŭrigardis. Li ja grimpis ĝis la plata tegmento de la tria kaj plej alta ŝtupo de la turego: malfermita spaco, larĝa je ĉirkaŭ dudek paŝoj, kun malalta parapeto. Tie la ŝtuparon kovris eta kupolita ĉambro en la mezo de la tegmento, kun malalta pordo frontanta orienten kaj okcidenten. Oriente Sam povis vidi la ebenajon de Mordoro vasta kaj malhela sube, kaj la brulantajn montojn en la foro. Freŝa perturbego ŝvelis en ĝiaj profundaj putoj,

kaj la fajroriveroj flamis tiel feroce, ke eĉ je tia multmejla distanco lumo heligis la tursupron per ruĝa ardo. Okcidente la vidon baris la bazo de l' granda turo, kiu staris ĉe la malantaŭo de tiu ĉi supera korto kaj altigis sian kornon super la kreston de la ĉirkaŭantaj montetoj. Lumo ekbrilis en mallarĝa fenestro. Ĝia pordo staris apenaŭ dek paŝojn de kie troviĝis Sam. Ĝi estis malfermita sed senluma, kaj tuj el ĝia ombro venis la voĉoj.

Komence Sam ne aŭskultis; li faris unu paŝon tra la orienta pordo kaj ĉirkaŭrigardis. Li tuj vidis, ke ĉi tie supre la luktado estis plej fero-ca. La tuta korto estis ŝtopita de mortaj orkoj, de ties forhakitaj kapoj kaj membroj. Tiu loko fetoris je morto. Kolera murmurego sekvata de bato kaj krio igis lin retrosalti en kaŝejon. Leviĝis kolere voĉo orka, kaj li tuj rekonis ĝin, raŭkan, brutan, fridan. Parolis Ŝagrato, la komand-anto de la turego.

— Vi ne iros denove, ĉu vi diras? Estu malbenita, Snago, aĉa vermeto! Se vi supozas min tiel vundita, ke vi povas sendanĝere mal-obei min, vi eraras. Venu ĉi tien, kaj mi elpremos viajn okulojn, kiel mi faris al Radbugo ĝuste nun. Kaj kiam venos novuloj, mi pritraktos vin: mi sendos vin al Ŝeloba.

— Tiuj ne venos, almenaŭ ne antaŭ via morto, — respondis Snago malafable. — Mi jam dufoje diris al vi, ke la porkoj de Gorbago atingis la pordegon la unuaj, kaj neniu el la niaj sukcesis eliri. Lagdufo kaj Muzgaŝo trakuris, sed ili estas pafitaj. Mi tion vidis tra fenestro, mi diras al vi. Kaj ili estis la lastaj.

— Do devos iri vi. Ĉiuokaze mi devas resti ĉi tie. Sed mi estas vundita. La Nigraj Ŝaktoj prenu tiun fian ribelinton Gorbagon! — La voĉo de Ŝagrato deviis al listo de finomoj kaj sakroj. — Mi donis al li pli ol mi ricevis, sed li ponardis min, tiu fekulo, antaŭ ol mi sufokis lin. Vi devas iri, aŭ mi voros vin. Informo devas atingi Lugburzon, aŭ ni ambaŭ trafos en la Nigrajn Ŝaktojn. Jes, ankaŭ vi. Vi ne eskapos per kaŝiĝo ĉi tie.

— Mi ne descendos denove tiujn ŝtuparojn, — graŭlis Snago, — ĉu vi estas estro aŭ ne. Ne! For la manoj de via tranĉilo, aŭ mi sendos sagon en vian ventraĉon. Vi ne longe restos estro, post kiam oni aŭdos pri tiuj okazaĵoj. Mi batalis por la turego kontraŭ tiuj fetoraj morgul-ratoj, sed belan fatrason faris vi, du estroj, kverelante pri la rabaĵo.

— Jam sufiĉe de vi, — mordminacis Ŝagrato. — Al mi estis ordon-ite. Komencis tion ĝuste Gorbago, provante ŝtelaĉi tiun beletan ĉemi-zon.

— Nu, vi kuspis lin, estante tiel arogante ordonema: Kaj li ĉiuokaze havis pli da sagaco ol vi. Li sciigis vin pli ol unufoje, ke la plej danĝera el tiuj spionoj daŭre liberas, sed vi ne volis aŭskulti. Kaj ankaŭ nun vi ne volas aŭskulti. Gorbago pravis, mi diras al vi. Apudas granda batalisto, unu el tiuj sangmanaj elfoj, aŭ unu el la fiaj *tarkoj*¹. Li venas ĉi tien, mi diras al vi. Vi aŭdis la sonorilon. Li preterpasis la Gardistojn, kaj tio estas plenumo *tarka*. Li troviĝas sur la ŝtuparo. Kaj ĝis li forlasos ĝin, mi ne iros suben. Eĉ se vi estus nazgulo, mi ne konsentus.

— Do, jen la afero, ĉu? — kriis Ŝagrato.— Vi tion faros, aŭ vi tion ne faros, ĉu? Kaj kiam li ja venos, vi fuĝos kaj forlasos min, ĉu? Ne, vi tion ne faros! Pli frue mi aperigos ruĝajn vermtruojn en via ventro.

Tra la tura pordo la pli malgranda orko venis fuĝante. Malantaŭ li venis Ŝagrato, orko pli granda kun la longaj brakoj, kiuj, dum li kuris kaŭre, atingis la teron. Sed unu brako pendis malrigida kaj ŝajnis esti sanganta; la alia kroĉis nigran pakajegon. En la arda ruĝo Sam, kaŭranta malantaŭ la ŝtupara pordo, ekvidis fivizaĝon pasantan: ĝi estis striita kvazaŭ per ŝiraj krifoj kaj sangoŝmirita; bavo gutis de ĝiaj elstaraj dentegoj; la buŝo mordminacis bestece.

Kiom povis vidi Sam, Ŝagrato persekutis Snagon ĉirkaŭ la tegmenton, ĝis kaŭrante kaj evitante lin la pli malgranda orko kun jelpo rekuris en la tureton kaj malaperis. Tiam Ŝagrato haltis. Tra la orienta pordo Sam povis vidi lin apud la parapeto, anhelantan dum lia maldestra krifaro feble kroĉiĝis kaj malkroĉiĝis. Li surterigis la pakajegon kaj per la dekstra krifaro eltiris longan ruĝan ponardon kaj kraĉis sur ĝin. Irinte al la parapeto li kliniĝis transen, rigardante suben al la ekstera korto fore. Dufoje li kriis, sed neniu respondo aŭdiĝis.

Subite, dum Ŝagrato kliniĝis sur la parapeto dorse al la tegmento-supro, Sam vidis mirigite, ke unu el la diskuŝaj kadavroj moviĝas. Li rampis. Li etendis krifaron kaj kaptis la pakajon. Li ŝanceliĝe stariĝis. En la alia mano li tenis larĝklingan lancon kun mallonga rompita tenilo. Li pretis por pika puŝo. Sed ĝuste tiumomente siblo eskapis tra liaj dentoj, eksplodo dolora aŭ malama. Serpente rapide Ŝagrato glitis flanken, tordiĝe turnis sin, kaj per sia ponardo trapikis la gorĝon de sia malamiko.

¹ *Tark*. Gondorano (orklingve). Tiu vorto devenis de *tarkil*, kiu en la Komuna Lingvo signifas numenaronon, venintan al Mez-Tero.

— Jen al vi, Gorbago! — li kriis. — Ĉu ne tute mortinta? Nu, mi jam kompletigos mian taskon. — Li saltis al la falinta korpo, kaj furioze piedfrapis kaj stamfis ĝin, kliniĝante de tempo al tempo por piki kaj tranĉi ĝin per sia ponardo. Fine kontentigite, li ĵetis malantaŭen sian kapon kaj eligis hidan gargaran krion de triumfo. Poste li lekis sian tranĉilon, kaj metis ĝin inter la dentojn, kaj enmaniginte la pakaĵon li salte kuris al la pli proksima pordo de la ŝtuparejo.

Al Sam mankis tempo por pripensado. Li eble povis elgliti tra la alia pordo, sed apenaŭ nevidate; kaj li ne longe povus kaŝludi kun tiu hida orko. Li faris tion, kio probable estis la plej prudenta faro. Kriante li elsaltis renkonte al Ŝagrato. Li jam ne tenis la Ringon, sed ĝi estis tie, potenco kaŝita, kaŭra minaco al la sklavo de Mordoro; kaj en lia mano estis Pikilo, kaj ties lumo trafis la okulojn de l' orko kvazaŭ ekbrilo de kruelaj steloj en la teruraj elflandoj, sonĝo pri kiu signifis malvarman timon al ĉiuj liarasanoj. Kaj Ŝagrato ne povis samtempe lukti kaj tenadi sian trezoron. Li haltis, graŭlante, nudigante siajn dentegojn. Tiam ankoraŭfoje, orkmaniere, li saltis flanken, kaj kiam Sam alsaltis li utiligis la pakaĵegon samtempe kiel ŝildon kaj armilon kaj puŝis ĝin al la vizaĝo de sia kontraŭulo. Sam ŝanceliĝis, kaj antaŭ ol li povis ekvilibriĝi, Ŝagrato preterpafiĝis kaj malsupreniris la ŝtuparon.

Sam postkuris lin sakrante, sed li ne iris tre longe. Baldaŭ la penso pri Frodo revenis al li, kaj li memoris, ke la alia orko reiris en la tureton. Jen alia terura elekto, kaj mankis al li tempo por pripensi ĝin. Se Ŝagrato eskapus, li baldaŭ trovus helpon kaj revenus. Sed se Sam persekutus lin, la alia orko eble plenumus iun hidan faron tie supre. Kaj ĉiuokaze Sam eble maltrafus Ŝagraton aŭ estus mortigita de li. Li turnis sin rapide kaj rekuris supren.

— Denove malprave, mi supozas, — li suspiris. — Sed mia tasko estas unue supreniri al la altejo, kio ajn okazos poste.

Forsube Ŝagrato iris saltante tra la ŝtuparo kaj eksteren sur la korton kaj tra la pordego, kroĉante sian valoran ŝarĝon. Se Sam povus vidi lin kaj scius la doloron, alportotan de lia eskapo, li eble senkuragiĝus. Sed nun lia menso estis komplete direktita al la lasta etapo de la serĉo. Li venis singarde al la tura pordo kaj trapaŝis. Ĝi malfermiĝis al mallumo. Sed baldaŭ liaj gapaj okuloj konstatis malhelan lumeton dekstre. Tiu venis tra malfermaĵo, kiu kondukis al alia ŝtuparo, senluma kaj mallarĝa: ĝi ŝajne iris serpentume supren en la tureto laŭ la interno de ties ronda ekstera muro. Ekbriletis torĉo de ie supre.

Mallaŭte Sam komencis grimpi. Li venis al la ekbraĝa torĉo, fiksita super pordo maldekstre frontanta al fenestra fendeto, kiu elrigardis okcidenten: unu el la ruĝaj okuloj, kiujn li kaj Frodo vidis desube apud la elirejo de l' tunelo. Rapide Sam pasis la pordon kaj hastis al la dua etaĝo, ĉiumomente timante esti atakata kaj senti sufokajn fingrojn kapti lian gorĝon de malantaŭe. Li venis poste al fenestro frontanta orienten kaj alia torĉo super la pordo al koridoro tra la mezo de la tureto. La pordo estis aperta, la koridoro mallumis escepte de la ekbrilo de la torĉo kaj la ruĝa ardo de ekstere filtriĝanta tra la fenestra fendeto. Sed tie la ŝtuparo ĉesis kaj ne plu supreniris. Sam ŝteliris en la koridoron. Ambaŭflanke troviĝis po malalta pordo; ambaŭ estis fermitaj kaj ŝlositaj. Neniu sono entute aŭdiĝis.

— Sakvojo, — murmuris Sam, — kaj tio post mia longa grimpadol! Tio ĉi ne povas esti la supro de la turo. Sed nun kion mi povos fari?

Li reiris al la pli malalta etaĝo kaj provis la pordon. Ĝi rifuzis moviĝi. Li denove suprenkuris, kaj ŝvito komencis flueti sur lia vizaĝo. Li sentis, ke ĉiu minuto valoras, sed unu post alia ili forpasis; kaj li povis fari nenion. Li ne plu zorgis pri Ŝagrato aŭ Snago aŭ iu ajn alia orko iam naskita. Li sopiris nur sian mastron, unu ekvidon de ties vizaĝo aŭ unu tuŝon de ties mano.

Finfine, lacega kaj sentanta sin fine venkita, li sidiĝis sur ŝtupo sub la nivelo de la koridora planko kaj klinis sian kapon sur siajn manojn. Estis kviete, hide kviete. La torĉo, kiu jam ĉe lia alveno brulis malalte, sputetis kaj estingiĝis; kaj li sentis la mallumon kovri lin tajdece. Kaj tiam mallaŭte, je sia propra surprizo, tie en la vana fino de lia longa vojaĝo kaj lia malĝojo, motivite de nekonebla penso en la koro, Sam komencis kanti.

Lia voĉo sonis maldensa kaj tremeta en la malvarma senluma turo: la voĉo de hobito forlasita kaj laca, kiun neniu aŭskultanta orko povus iel ajn erare supozi klara kanto de elfa princo. Li murmuris malnovajn infanecajn melodiojn el la Provinco kaj fragmentojn de l' rimaĵoj de sinjoro Bilbo, kiuj venis al lia menso kvazaŭ pasemaj ekvidoj de la lando de lia hejmo. Kaj subite leviĝis en li nova forto, kaj lia voĉo sonoris, dum vortoj propraj venis nevokite, konvenaj al la simpla melodio.

*En okcident' la suno vojas
printempe, floroj plantas,
burĝonas arboj, akvoj rojas,
la gajaj fringoj kantas.*

*Aŭ eble noktas klarĉiele,
kaj portas fagoj franĝaj
la elfajn stelojn blankjuvele
inter la haroj branĉaj.*

*Kvankam mi venis al voĵfino,
al nigra entombigo
malantaŭ tura fortkulmino,
malantaŭ mont-apiko,
la suno super ombroj riĉas
kaj steloj ĉiam laŭas:
ne diras mi, ke l' tag' finiĝas,
nek stelojn adiaŭas.*

— Post ĉiuj turoj fortaj, altaj, — li rekomencis, kaj poste li abrupte silentiĝis. Li pensis, ke li aŭdis respondi al li mallaŭtegan voĉon. Sed nun li povis aŭdi nenion. Jes, li aŭdis ion, sed ne voĉon. Paŝoj proksimiĝis. Nun pordo estis kviete malfermata en la koridoro supre; la ĉarniroj grincis. Sam kaŭris aŭskultante. La pordo fermiĝis kun obtuza bato; kaj poste kriiĝis mordminaca orkvoĉo.

— Ho la! Vi tie supre, sterkeja rato! Ĉesigu la pepadon aŭ mi venos pritrakti vin. Ĉu vi aŭdas?

Neniu respondis.

— Bone, — graŭlis Snago. — Sed mi ĉiuokaze venos rigardi vin kaj konstatos pri kio vi okupiĝas.

La ĉarniroj denove grincis, kaj Sam, nun gvatante trans angulon de la koridora sojlo, vidis lumflagron en aperta pordejo, kaj la malklaran figuron de venanta orko. Li ŝajnis porti eskalon. Subite la klarigo aŭroris en Sam: la plej supra ĉambro estis alirebla tra klappordo en la koridora tegmento. Snago ŝovis la eskalon supren, stabiligis ĝin, kaj poste grimpis ekster vidatingon. Sam aŭdis la retiron de riglilo. Poste li aŭdis la hidan voĉon denove:

— Kuŝu kviete vi, aŭ vi pagos tion! Vi ne disponas longan tempon por vivi trankvile, mi konjektas; sed se vi ne volas, ke la amuziĝo komenciĝu jam nun, tenu fermita la faŭkon, komprenite? Jen memoriĝilo al vi! — Aŭdiĝis sono simila al vipkrako.

Je tio kolerego ekflamis en la koro de Sam furioziĝe. Li saltstariĝis, kuris kaj grimpis katece la eskalon. Lia kapo eliĝis meze de la planko de granda ronda ĉambro. Ruĝa lanterno pendis de la plafono; la okcidenta fenestrofendeto estis alta kaj senluma. Io kuŝis sur la planko

apud la muro sub la fenestro, sed super ĝi diskurris nigra orkfiguro. Tiu duafoje levis vipon, sed la bato neniam falis.

Kun krio Sam saltis trans la plankon kun Pikilo en la mano. La orko ĉirkaŭturniĝis, sed antaŭ ol li povis manovri Sam fortranĉis la vipmanon de lia brako. Hurlante pro doloro kaj timo la furioza orko impetis kapantaŭe kontraŭ lin. La posta bato de Sam larĝe maltrafis, kaj malekvilibre li falis malantaŭen, kroĉante la orkon dum tiu stumblis transe. Antaŭ ol li povis stariĝi, li aŭdis krion kaj falbaton. La orko en sovaĝa hasto karambolis kun la eskala supro kaj trafalis la apertan klappordon. Sam ne plu pensis pri li kaj kuris al la figuro kuntirita sur la planko. Tiu estis Frodo.

Li estis nuda, kuŝanta kvazaŭ sveninte sur amaso da malpuraj ĉifonoj: lia brako estis ŝovita supren, gardante la kapon, kaj sur lia flanko etendiĝis malbela vipcikatro.

— Frodo! Sinjoro Frodo, mia kara! — kriis Sam, dum larmoj preskaŭ blindigis lin. — Jen Sam, mi venis! — Li duonlevis sian mastron kaj premis lin al sia brusto. Frodo malfermis la okulojn.

— Ĉu mi plu songas? — li murmuris. — Sed la aliaj songoj estis hororaj.

— Vi tute ne songas, mastro, — diris Sam. — Estas reale. Estas mi. Mi venis.

— Mi apenaŭ povas kredi, — diris Frodo, kroĉante lin. — Troviĝis orko kun vipo, kaj poste ĝi fariĝas Sam! Do mi fakte ne songis, kiam mi aŭdis tiun kantadon sube, kaj mi provis respondi? Ĉu tiu estis vi?

— Vere jes, sinjoro Frodo. Mi preskaŭ rezignis pri espero. Mi ne povis trovi vin.

— Nu, vi jam trovis, Sam, kara Sam, — diris Frodo, kaj li kliniĝis en la mildaj brakoj de Sam, fermante siajn okulojn, kiel infano ripozanta kiam noktaj timoj estas forpelitaj de iu amata voĉo aŭ mano.

Sam sentis, ke li povus sidi tiel en feliĉo senfina; sed ne estis permesate. Ne sufiĉis trovi la mastron, li devis ankoraŭ provi lin savi. Li kisis la frunton de Frodo.

— Ek! Vekiĝu, sinjoro Frodo! — li diris, klopodante soni tiel gaja, kiel li estis, kiam li malfermis la kurtenojn ĉe Bag-Endo en somera mateno.

Frodo suspiris kaj rektigis sin.

— Kie ni estas? Kiel mi venis ĉi tien?

— Ne restas tempo por rakontoj, ĝis ni estos aliloke, sinjoro

Frodo, — diris Sam. — Sed ni estas en la supro de tiu turego, kiun vidis vi kaj mi defore apud la tunelo, antaŭ ol la orkoj kaptis vin. Antaŭ kiom da tempo estis tio, mi ne scias. Pli ol tago, mi supozas.

— Ĉu nur tiom? — diris Frodo. — Tio ŝajnas semajnoj. Vi devos rakonti al mi la tuton, se ni havos eblecon. Io frapis min, ĉu ne? Kaj mi falis en mallumon kaj fiajn sonĝojn, kaj vekigis kaj trovis, ke vekigo pli malbonas. Orkoj ĉirkaŭis min ĉie. Mi opinias, ke ili ĵus ĉesis verŝi iun aĉan bruligan trinkaĵon tra mia gorĝo. Mia kapo klariĝis, sed mi doloris kaj lacis. Ili senigis min je ĉio; kaj poste venis du brutegoj kaj pridemandis min, pridemandis min ĝis mi pensis frenezigi, starante super mi, ĝojaĉante, fingrumante siajn tranĉilojn. Mi neniam forgesos tiujn krifarojn kaj okulojn.

— Vi ne forgesos, se vi preparolos ilin, sinjoro Frodo, — diris Sam. — Kaj se vi ne volas revidi ilin, ju pli baldaŭ ni ekiros des pli bone. Ĉu vi kapablas marŝi?

— Jes, mi kapablas marŝi, — diris Frodo, malrapide stariĝante. — Mi ne estas vundita, Sam. Nur mi sentas min tre laca, kaj doloras ĉi tie. — Li metis sian manon al la kolo super la maldekstra ŝultro. Li stariĝis, kaj al Sam ŝajnis kvazaŭ li estus vestita en flamo: lia nuda haŭto skarlatitis pro la lumo de la lanterno supre. Dufoje li trapasis la plankon.

— Jam pli bone! — li diris, kun iomete leviĝanta animstato. — Mi ne aŭdacis moviĝi, kiam oni lasis min sola, aŭ venis unu el la gardantoj. Ĝis komenciĝis la kriadado kaj batalado. La du brutegoj: ili kverelis, ŝajnas al mi. Pri mi kaj miaj posedaĵoj. Mi kuŝis ĉi tie terurite. Kaj poste ĉio morte silentiĝis, kaj tio estis eĉ pli malbona.

— Jes, ili kverelis, verŝajne, — diris Sam. — Certe estis du centoj da kreitaĉoj en tiu loko. Iom tro multe por Sam Vato, kiel oni povus diri. Sed ili plenumis mem la tutan mortigadon. Tio estas feliĉa, sed ĝi tro longas por prikantado, ĝis ni estos for de tie ĉi. Nu, kio estas farota? Vi ne povos promenadi en la Nigra Lando en nenio krom via haŭto, sinjoro Frodo.

— Ili forprenis ĉion, Sam, — diris Frodo. — Ĉion, kion mi havis. Ĉu vi komprenas? Ĉion! — Li kaŭris denove sur la planko kun la klinita kapo, kiam la propraj vortoj rivelis al li la kompletecon de la katastrofo, kaj malespero inundis lin. — La komizio malsukcesis, Sam. Eĉ se ni eliros el ĉi tie, ni ne povos eskapi. Nur elfoj kapablos eskapi. Foren, foren el Mez-Tero, fore malproksimen trans la maron. Se eĉ ĝi estas sufiĉe larĝa por bari la Ombron.

— Ne, ne ĉion, sinjoro Frodo. Kaj ĝi ne malsukcesis, ankoraŭ ne.

Prenis ĝin mi, sinjoro Frodo, pardonpete. Kaj mi tenis ĝin sekura. Ĝi pendas nun sur mia kolo, kaj terura ŝarĝo ĝi estas cetere. — Sam palpserĉis la Ringon kaj ties ĉeneton. — Sed supozeble vi devas nun repre ni ĝin. — Kiam nun venis la momento, Sam malvolontis transdoni la Ringon kaj per ĝi denove ŝarĝi la mastron.

— Ĉu vi havas ĝin? — anhelis Frodo. — Vi havas ĝin ĉi tie, ĉu? Sam, vi estas mirindulo! — Subite kaj strange lia tono ŝanĝiĝis. — Donu ĝin al mi! — li kriis, stariĝante, etendante sian treman manon. — Tuj redonu ĝin al mi! Vi ne rajtas havi ĝin!

— En ordo, sinjoro Frodo, — diris Sam, iom konsternite. — Jen ĝi! — Malrapide li eltiris la Ringon kaj pasigis la ĉeneton trans sian kapon. — Sed vi estas nun en Mordoro, sinjoro, kaj kiam vi eliros vi vidos la Fajran Monton kaj tiel plu. Vi trovos la Ringon jam tre danĝera kaj malfacile portebla. Se la tasko estas tro malfacila, mi eble povus dividi ĝin, ĉu?

— Ne, ne! — kriis Frodo, kaptante la Ringon kaj ĉeneton el la manoj de Sam. — Ne, tion vi ne faros, ŝtelinto! — Li anhelis, fiksrigardante Samon per la okuloj larĝaj pro timo kaj malamikeco. Tiam subite, tenante la Ringon en unu mano pugnigita, li staris konsternite. Nebuleto ŝajnis foriĝi de sur liaj okuloj, kaj li pasigis manon sur sia doloranta frunto. La hida vizio ŝajnis al li tiom reala, ĉar li estis ankoraŭ duone perpleksigita pro vundiĝo kaj timo. Sam antaŭ liaj okuloj estis refariĝinta orko, gapaĉanta kaj palpanta lian trezoron, fia kreito kun la avidaj okuloj kaj bavanta buŝo. Sed jam la vizio forpasis. Jen estis Sam genuanta antaŭ li, kun la dolortordita vizaĝo, kvazaŭ li estus kore trapikita; larmoj ekfluis el liaj okuloj.

— Ho Sam! — kriis Frodo. — Kion mi diris? Kion mi faris? Pardonu min! Post ĉio, kion vi faris. Jen la horora potenco de la Ringo. Mi volus, ke ĝi neniam, neniam estus trovita. Sed ne atentu min, Sam. La ŝarĝon mi devos porti ĝis la fino. Tio ne estas ŝanĝebla. Vi ne povas interveni inter mi kaj ĉi tiu sorto.

— En ordo, sinjoro Frodo, — diris Sam, viŝante manike siajn okulojn. — Mi komprenas. Sed mi povos ankoraŭ helpi, ĉu ne? Mi devas elirigi vin el ĉi tiu loko. Tuj, ĉu ne? Sed unue vi bezonas vestaĵojn kaj ekipaĵon, kaj poste iom da nutraĵo. Plej facile estos pri la vestaĵoj. Ĉar ni estas en Mordoro, prefere ni vestu nin mordormaniere; kaj ĉiuokaze elektebleco mankas. Necesos esti orka por vi, sinjoro Frodo, bedaŭrinde. Kaj ankaŭ por mi. Se ni iros kune, prefere ni akordu. Nun volvu vin per tiu ĉi!

Sam malagrafis sian grizan mantelon kaj ĵetis ĝin sur la ŝultrojn de Frodo. Poste, demetinte sian tornistron, li kuŝigis ĝin sur la plankon. Li elingigis Pikilon. Flagro apenaŭ vidiĝis sur ĝia klingo.

— Mi forgesis pri ĉi tiu, sinjoro Frodo, — li diris. — Ne, ne ĉion ili akiris! Vi pruntedonis al mi Pikilon, se vi memoras, kaj la vitraĵon de l' Damo. Mi ankoraŭ havas ilin ambaŭ. Sed prunedonu ilin al mi iomete pli longe, sinjoro Frodo. Mi devas iri por vidi, kio estas trov-ebla. Restu ĉi tie. Iom ĉirkaŭmarŝu kaj malrigidigu la krurojn. Mi ne longe forestos. Ne necesos iri tre malproksimen.

— Estu singarda, Sam! — diris Frodo. — Kaj rapidu! Eble vivas ankoraŭ orkoj embuskantaj.

— Tion mi devas riski, — diris Sam.

Li paŝis al la klappordo kaj subeniris per la eskalo. Post minuto lia kapo reaperis. Li ĵetis longan tranĉilon sur la plankon.

— Jen io eble utila, — li diris. — Li estas mortinta: tiu kiu vipis vin. Rompis al si la kolon, ŝajne, pro la hasto. Nun suprentiru la eskalon, se vi povas, sinjoro Frodo, kaj ne subenigu ĝin, ĝis vi aŭdos min diri la pasvorton. Mi vokos: "Elbereta". Tion diras la elfoj. Neniu orko dirus tion.

Frodo sidis dum kelka tempo kaj tremetis, dum teruraj timoj persekutis unu alian en lia menso. Poste li stariĝis, kuntiris ĉirkaŭ sin la grizan elfan mantelon, kaj por okupi sian menson komencis marŝi tien-reen, strabante kaj ŝovante la nazon en ĉiun angulon de sia karcero.

Post ne tre longe, kvankam la timo ŝajnis ĝin minimume unu horo, li aŭdis la voĉon de Sam, vokanta mallaŭte desube: "Elbereta, Elbereta". Frodo mallevis la eskalon. Supreniĝis Sam, anhelante, portante pezan pakaĵegon sur la kapo. Li surterigis ĝin falbrue.

— Rapidu jam, sinjoro Frodo! — li diris. — Mi devis iom serĉi por trovi ion sufiĉe malgrandan por niaspecaj uloj. Ni devos adaptiĝi. Sed necesas rapidi. Mi renkontis nenion vivan, kaj nenion mi vidis, sed mi ne estas trankvila. Al mi ŝajnas, ke tiu ĉi loko estas gvatata. Mi ne povas klarigi tion, sed nu: sentiĝas al mi, kvazaŭ unu el tiuj naŭzaj flugantaj Rajdantoj ĉirkaŭumas, supre en la mallumo, kie li estas nevidebla.

Li malfermis la pakaĵon. Frodo rigardis malestime la enhavon, sed elekto ne estis: li devis surmeti tiujn aĵojn, aŭ resti nuda. Troviĝis longa vila pantalono el malpura bestfelo, kaj tuniko el malpura ledo. Li

surmetis ilin. Super la tunikon iris kiraso kun fortika fermaŝo, mallonga por plenkreska orko, tro longa kaj peza por Frodo. Ĉirkaŭ ĝin li ligis zonon, de kiu pendis mallonga ingo enhavanta larĝklingan pikglavon. Sam alportis plurajn orkajn kaskojn. Unu el ili sufiĉe bone laŭmezuris por Frodo, nigra ĉapo kun fera rando, kaj feraj ringoj ledkovritaj sur kiuj estis pentrita ruĝe la Misa Okulo super la beksimila nazprotektilo.

— La morgulaĵoj, ekipaĵo de Gorbago, mezuris pli taŭge kaj estis pli bone farita, — diris Sam; — sed ne estus konvene, mi konjektas, portadi ties insignojn en Mordoro post la okazintaĵoj ĉi tie. Nu jen, sinjoro Frodo. Perfekta orketo, se mi rajtas kuraĝi — almenaŭ vi estus tia, se ni povus kovri vian vizaĝon per masko, havigi al vi brakojn pli longajn, kaj igi vin kurbkrura. Tio ĉi kaŝos iom el la perfidaĵoj. — Li metis grandan nigran mantelon ĉirkaŭ la ŝultrojn de Frodo. — Jam vi pretas! Vi povos preni ŝildon dumire.

— Kio pri vi, Sam? — diris Sam. — Ĉu ni ne intencas akordi?

— Nu, sinjoro Frodo, mi pripensis, — diris Sam. — Prefere mi ne postlasu iom el miaj aĵoj, kaj ni tion ne povas detruĝi. Kaj mi ne povos surmeti orkan maŝkirason sur mian tutan vestaĵon, ĉu? Mi simple devos kovri min.

Li surgenuiĝis kaj zorge faldis sian elfan mantelon. Ĝi ampleksis surprize malgrandan rulaĵon. Tiun li metis en sian tornistron kuŝantan sur la planko. Stariĝinte, li pendigis ĝin surdorse, surkapigis orkan kaskon kaj ĵetis alian nigran mantelon sur la ŝultrojn.

— Jen! — li diris. — Jam ni akordas, sufiĉgrade. Kaj nun ni ekiru!

— Mi ne povos kuri la tutan vojon, Sam, — diris Frodo kun tordita rideto. — Mi esperas, ke vi enketis pri tavernoj sur la vojo? Aŭ ĉu vi forgesis pri nutraĵoj?

— Gardu min, mi ja forgesis! — diris Sam kaj konsternite fajfis. — Benu min, sinjoro Frodo, sed vi sukcesis igi min malsata kaj soifa! Mi ne scias, kiam lastfoje guto aŭ manĝaĵero trapasis miajn lipojn. Mi forgesis pri tio, klopodante trovi vin. Sed mi pripensu! Kiam mi lastfoje rigardis, mi havis proksimume sufiĉon da tiu vojpano, kaj da tio, kion donis al ni komandanto Faramiro, por teni min surkrura dum du semajnoj prudentaj. Sed se restas guto en mia botelo, ne estas pli ol tiom. Tio ne sufiĉos por du, neniel. Ĉu ne manĝas orkoj, kaj ĉu ili ne trinkas? Aŭ ĉu ili vivas nur per naŭza aero kaj veneno?

— Ne, ili manĝas kaj trinkas, Sam. La Ombro, kiu bredis ilin, kapablas nur kripligi, ĝi ne povas krei: ne realajn proprajn aĵojn. Mi

opinias, ke ĝi ne vivigis la orkojn, ĝi nur ruinigis kaj tordis ilin; kaj se ili entute vivu, necesas ke ili vivu kiel aliaj vivantaĵoj. Fiajn akvojn kaj naŭzajn viandojn ili ensorbis se nenio pli bona estas akirebla, sed ne venenon. Ili manĝigis min, do mi statas pli kontentige ol vi. Devas esti ie en tiu ĉi loko manĝaĵoj kaj trinkaĵoj.

— Sed mankas tempo por serĉi ilin, — diris Sam.

— Nu, la aferoj statas pli bone ol vi supozas, — diris Frodo. — Mi spertis iom da bonŝanco dum vi forestis. Efektive ili ne prenis ĉion. Mi trovis mian manĝosakon inter ĉifonoj sur la planko. Ili taŭzis tra ĝi, kompreneble. Sed mi konjektas, ke ili malŝatis mem la aspekton kaj odoron de la *lembaso*, eĉ pli ol Golumo. Ĝi estis disĵetita, kaj iom el ĝi estis surtretita kaj rompita, sed mi kunrastis ĝin. Ne estas multe malpli ol vi havas. Sed ili forprenis la nutraĵojn de Faramiro, kaj ili distranĉis mian akvuĵon.

— Nu, ne plu restas dirotaĵo, — diris Sam. — Ni havas sufiĉe por komenci. Sed pri la akvo estos maloportune. Sed ek, sinjoro Frodo! Ni ekiru, aŭ tuta lago ne utilos al ni!

— Ne ĝis vi plenigos vian buŝon, Sam, — diris Frodo. — Mi ne moviĝos. Jen, prenu ĉi elfan kukon, kaj trinku vian lastan guton en via botelo! La tuta afero estas komplete senespera, do ne helpas zorgoj pri la morgaŭo. Ĝi verŝajne ne alvenos.

Finfine ili ekiris. Suben per la eskalo ili grimpis, kaj poste Sam prenis kaj kuŝigis ĝin en la koridoro apud la kuntirita kadavro de la falinta orko. La ŝtuparo estis malluma, sed sur la tegmento estis ankoraŭ videbla la brilego de la Monto, kvankam ĝi nun formortadis al malafabla ruĝo. Ili levis du ŝildojn por kompletigi sian aliveston kaj poste pluiris.

Suben laŭ la ŝtuparego ili plandis. La alta ĉambro malantaŭe, kie ili renkontiĝis, ŝajnis preskaŭ hejme: nun ili estis denove neŝirmitaj, kaj teruro laŭiris la murojn. Ĉiuj eble estis mortintaj en la turego de Cirito Ungol, sed ĝi estis ankoraŭ trempita en timo kaj miso.

Finfine ili atingis la pordon al la ekstera korto, kaj tie ili haltis. Eĉ de tie, kie ili staris, ili sentis la malicon de la Gardantoj bati sur ilin, nigraj silentaj figuroj ambaŭflanke de la pordo tra kiu vidiĝis malklare la brilo de Mordoro. Dum ili tredis sian vojon inter la hidaj kadavroj de la orkoj, paŝado iĝis pli malfacila. Eĉ antaŭ ol ili alvenis la arkajon ili estis haltigitaj. Plu moviĝi unu colon estis doloro kaj laceco de volo kaj membroj.

Frodo malhavis forton por tia batalo. Li sinkis sur la teron kaj murmuris:

— Mi ne kapablas plui, Sam. Mi estas svenonta. Mi ne scias, kio okazas al mi.

— Mi scias, sinjoro Frodo. Regu vin jam! Temas pri la pordo. Tie troviĝas ia fimagio. Sed mi trairis, kaj mi intencas eliri. Ne povas esti pli danĝere ol antaŭe. Ek antaŭen!

Sam eltiris denove la elfan vitraĵon. Kvazaŭ por honori lian bravecon, kaj ornamu grandioze lian fidelan brunan hobitan manon, kiu plenumis tiajn bravajn farojn, la flakoneto disbrilis subite, tiel ke la tuta ombreca korto estis lumigita per blindiga radiado fulmsimila; sed ĝi restis senŝancele kaj ne forpasis.

— *Gilthorniel, A Elbereth!* — Sam kriis. Ĉar, li ne sciis kial, lia penso resaltis subite al la elfoj en la Provinco kaj al la kanto, kiu forpelis la Nigrajn Rajdantojn inter la arboj.

— *Aiya elenion ancalima!* — kriis Frodo denove de malantaŭe.

La volo de la Gardantoj estis rompita tiel subite, kiel rompiĝas ŝnureto, kaj Frodo kaj Sam stumblis antaŭen. Poste ili kuris. Tra la pordo kaj preter la sidantaj figuregoj kun la ekbrilaj okuloj. Aŭdiĝis krako. La arkaĵa ĉefŝtono falegis preskaŭ sur iliajn kalkanojn, kaj la supra muro diseriĝis kaj falis ruiniĝante. Nur harlarĝe ili eskapis. Sonorilo tintegis; kaj de la Gardantoj leviĝis alta kaj timiga lamento. Fore supre en la mallumo ĝi estis respondita. El la nigra ĉielo venis, falante kiel sago, figuro flugilhava, ŝirante la nubojn kun hidega kriĉego.

Ĉapitro 2

LA OMBRA LANDO

Al Sam restis sufiĉe da sagaco, ke li reŝovu la flakoneton sur sian Abruston.

— Kuru, sinjoro Frodo! — li kriis. — Ne, ne tien! Trans la muro estas kruta falejo. Sekvu min!

Sur la vojo for de la pordo ili fuĝis. Post kvindek paŝoj, post rapida kurbiĝo ĉirkaŭ elstaran bastionon de la klifo, ĝi forĝvidis ilin el videbleco de la turego. Ili provizore eskapis. Kliniĝante malantaŭen kontraŭ la roko, ili enspiris, kaj poste ili kroĉis siajn korojn. Sidante jam sur la muro apud la ruiniĝinta pordo la nazgulo elpuŝis siajn terurajn kriojn. Ĉiuj klifoj reeĥis.

Timigite ili stumblis antaŭen. Baldaŭ la vojo kurbiĝis orienten denove, kaj dum horora momento ĝi videbligis ilin de la turego. Transkurante ili retrorigardis kaj vidis la grandan nigran figuron sur la krenelaro; poste ili plonĝis suben inter altaj rokmuroj en tratanĉejo, kiu iris suben apike al la Morgula Vojo. Ili venis al la vojrenkontiĝo. Ankorau mankis signoj de orkoj kaj respondo al la krio de l' nazgulo; sed ili sciis, ke la silento ne longe daŭros. Iumomente la ĉasado komenciĝos.

— Tio ne taŭgas, Sam, — diris Frodo. — Se ni estus realaj orkoj, ni devus rekuri al la turego, ne forkuri. La unua renkontota malamiko rekonos nin. Ni devas iel forlasi ĉi tiun vojon.

— Sed ni ne povas, sen flugiloj, — diris Sam.

La orientaj facoj de Efelo Duad estis apikaj, falante klife kaj krutegaĵe al la nigra kavo kuŝanta inter ili kaj la interna firsto. Mallonge post la vojrenkontiĝo, post alia apika kliniĝo, fluganta ŝtonponto transsaltis la abismon kaj portis la vojon transen al la malglataj deklivoj kaj valetoj de Morgajo. Per senespera akcelego Frodo kaj Sam trakuris la ponton; sed apenaŭ ili atingis ties transan ekstremon, ili jam aŭdis la persekuton komenciĝi. Fore malantaŭ ili, jam alte super la montoflanko, baŭmis la turego Cirito Ungol, kies ŝtonoj malhele ardis. Subite ĝia malmiela sonorilo denove tintegis, kaj poste frakasige kariljonis.

Aŭdiĝis kornoj. Kaj nun de antaŭ la ponto venis respondaj krioj. Sube en la malhela kavo, forbarite de la kaduka brilego de Orodruido, Frodo kaj Sam ne povis vidi antaŭen, sed jam ili aŭdis stamfadon de ferumitaj piedoj, kaj sur la vojo sonis la rapida klakado de hufoj.

— Rapide, Sam! Ni transiru! — kriis Frodo. Ili surgrimpis la malaltan parapeton de l' ponto. Feliĉe ne plu estis terura falebleco abismen, ĉar la deklivoj jam leviĝis preskaŭ ĝis la nivelo de la vojo; sed estis tro mallume por ke ili divenu la profundon.

— Nu, jen la okazo, sinjoro Frodo, — diris Sam. — Adiaŭ!

Li malkroĉiĝis. Frodo sekvis lin. Kaj ĝuste dumfale ili aŭdis tumulton de rajdistoj transkurantaj la ponton kaj klakadon de orkaj piedoj postkurantaj. Sed Sam ridus, se li riskemus. Duontiminte frakasan plonĝon sur nevidatajn rokojn, la hobitoj surteriĝis, post falo ne pli ol dek-du-futa, kun batbruo kaj kraksono, al la lasta atenditaĵo: plektiĝo de dornaj arbustoj. Tie Sam kuŝis senmova, kviete suĉante la gratitan manon. Kiam forpasis la bruo de hufoj kaj piedoj, li riskis flustron:

— Mi estu benata, sinjoro Frodo, sed mi tute ne scius, ke kreskas io en Mordoro! Sed se mi ja scius, ĝuste ion tian mi serĉus. Jenaj dornoj certe longas unu futon, laŭ ilia sentiĝo; ili trapikis ĉion, kion mi surmetis. Se nur mi surmetus tiun maŝkirason!

— Orka kiraso ne forbaras tiujn dornojn, — diris Frodo. — Eĉ leda brustovesto ne efikas.

Nur barakte ili sukcesis forlasi la densejon. La dornoj kaj ĉiroj estis ferdrate fortikaj kaj krifare kroĉemaj. Iliaj manteloj estis ŝiritaj kaj ĉifitaj antaŭ ol ili fine liberiĝis.

— Nun ni iros suben, Sam, — Frodo flustris. — Suben rapide en la valon, kaj poste norden kiel eble plej baldaŭ.

Tago estis revenanta en la mondo ekstere, kaj fore preter la mornoj de Mordoro la suno grimpis trans la orientan randon de Mez-Tero; sed ĉi tie ĉio estis ankoraŭ nokte malhela. La Monto subbrulis kaj ĝiaj fajroj estingiĝis. La brilo forvelkis de la klifoj.

La orienta vento, blovinta de kiam ili lasis Itilion, nun ŝajnis mortinta. Malrapide kaj dolore ili grimpis suben, palpante, stumblante, rampante inter rokoj kaj dornarbustoj kaj malviva lignaĵo en la blindaj ombroj, suben kaj suben ĝis ili ne povis plu iri. Finfine ili haltis, kaj sidigiĝis flank-al-flanke, dorse al rokego. Ambaŭ ŝvitis.

— Se Ŝagrato mem proponus al mi glason da akvo, mi premus lian manon, — diris Sam.

— Ne diru tiajn aferojn! — diris Frodo. — Tio nur mise influas. — Poste li etendis sin, turnkapan kaj lacegan, kaj kelkan tempon li ne plu parolis. Poste li barakte restariĝis. Mirigite li konstatis, ke Sam dormas. — Vekiĝu, Sam! — li diris. — Ek al! Jam tempo klopodi denove.

Sam stumble stariĝis.

— Jen surprizo! — li diris. — Verŝajne mi ekdormis. Jam delonge, sinjoro Frodo, mi ne dormis normale, kaj miaj okuloj simple fermiĝis propravole.

Frodo nun gvidis, norden laŭ lia konjekto, inter la ŝtonoj kaj rokoj dense kuŝantaj sur la fundo de la ravinego. Sed baldaŭ li haltis denove.

— Ne funkcias, Sam, — li diris. — Mi ne povas toleri ĝin. Jenan maŝkirason mi aludas. Ne en mia nuna stato. Eĉ mia mitrila vesto ŝajnis peza, kiam mi estis laca. Tiu ĉi multe pli pezas. Kaj kiel ĝi utilas? Mi ne sukcesos trapasi per batalado.

— Sed eble ni devos iom batali, — diris Sam. — Kaj ekzistas ponardoj kaj vagemaj sagoj. Tiu Golumo ne mortis, ekzemple. Al mi ne plaĉas pensi pri vi kun nur peco da ledo inter vi kaj trapiko en mallumo.

— Aŭskultu, kara knabo Sam, — diris Frodo: — mi estas laca, lacega, al mi espero ne restas. Sed mi devas daŭre klopodi por alveni la Monton, tiel longe, kiel mi kapablas moviĝi. Sufiĉas la Ringo. Tiu ĉi aldonita pezo mortigas min. Ĝi devas rifuziĝi. Sed ne supozu min maldanka. Mi malamas pensi pri la fia laboro, kiun vi certe plenumis inter la kadavroj por trovi ĝin por mi.

— Ne priparolu tion, sinjoro Frodo. Estu benita! Mi portus vin sur la dorso, se mi povus. Forigu ĝin do!

Frodo flankenmetis sian mantelon, demetis la orkan kirason kaj forĵetis ĝin. Li tremetis.

— Kion mi fakte bezonas, tio estas io varma, — li diris. — Fariĝis froste, aŭ eble mi malvarmumis.

— Vi rajtas havi mian mantelon, sinjoro Frodo, — diris Sam, demetis sian tornistron kaj elprenis la elfan mantelon. — Ĉu plaĉas, sinjoro Frodo? Volvu vin strikte per tiu orka ĉifono, kaj ligu la zonon ekstere. Poste tio ĉi povos kovri la tuton. Ĝi ne aspektas tute orkeca, sed ĝi varmigis vin; kaj mi opinias, ke ĝi gardos vin kontraŭ difektiĝo pli bone ol ajna alia kostumo. Ĝin faris la Damo.

Frodo akceptis la mantelon kaj agrafis la broĉon.

— Jam pli bone, — li diris. — Mi sentas min multe malpli peza. Jam mi povos pluiri. Sed tiu ĉi blindiga mallumo ŝajnas tuŝi mian koron. Kuŝante en la prizono mi provis rememori Brandovinin kaj la

Arbarfinon, kaj la Akvon trapasanta la muelilon ĉe Hobiturbo. Sed ilin mi ne povas nun vidi.

— Vidu jam, sinjoro Frodo, ĝuste vi ĉi-foje parolas pri akvo! Se nur la Damo povus vidi aŭ aŭdi nin, mi dirus al ŝi: “Moŝtino, nia tuta bezono estas lumo kaj akvo: nur akvo pura kaj taglumo klara, pli bonaj ol juveloj, pardonpete”. Sed longa estas la vojo ĝis Lorieno.

Sam suspiris kaj gestis per sia mano al la altaĵoj de Efelo Duad, nun nur diveneblaj kiel nigreco pli profunda kontraŭ la nigra ĉielo.

Ili ekiris denove. Ili ne longe iris, kiam Frodo paŭzis kaj diris:

— Nigra Rajdanto troviĝas super ni. Mi sentas tion. Prefere ni senmoviĝu por kelka tempo.

Kaŭrante sub rokego ili sidis retrofrontante okcidenten kaj dum kelka tempo ne parolis. Poste Frodo eligis malŝarĝiĝan suspiron.

— Ĝi pasis, — li diris.

Ili stariĝis, kaj ambaŭ gapis mirigite. Fore maldekstre, sude, kontraŭ ĉielo, kiu griziĝis, la pintoj kaj altaj firstoj de la granda montaro komencis vidiĝi malhelaj kaj nigraj, formoj videblaj. Lumo kreskis malantaŭ ili. Malrapide ĝi rampis norden. Okazis batalo forsupre en la altaj spacoj de la aero. La ondantaj nuboj de Mordoro estis retropuŝataj, iliaj randoj ĉifigis, kiam vento el la viva mondo alvenis kaj balais la haladzojn kaj fumojn al la malhela lando de ilia hejmo. Sub la leviĝantaj orloj de la morna baldakeno malforta lumo likiĝis en Mordoron kvazaŭ pala mateno tra la polvoŝmirita fenestro de karcerio.

— Rigardu tion, sinjoro Frodo! — diris Sam. — Rigardu tion! La vento deviis. Io okazas. Ne ĉio prosperigas lin. Lia mallumo diseriĝas tie ekstere en la mondo. Mi volus vidi la okazantaĵon!

Estis la mateno de la dek-kvina de marto, kaj super la valo de Anduino la suno leviĝis super la orienta ombro, kaj sud-okcidenta vento blovis. Teodeno kuŝis mortanta sur la Pelenora Kampo.

Dum Frodo kaj Sam staris rigardante, la lumrando etendiĝis tra la tuta linio de Efelo Duad, kaj poste ili vidis formon moviĝantan rapidege el la okcidento, komence nur nigran makuleton antaŭ la brileta strio super la montpintoj, sed kreskantan, ĝis ĝi plonĝis kiel sago en la malhelan baldakenon kaj pasis alte super ili. Dumire ĝi eligis longan akran krion, sed tiu krio ne plu teruris ilin: ĝi estis krio de veo kaj konsterniĝo, misaŭgura informo por la Malhela Turego. La Mastro de l' Ringofantomoj jam plenumis sian sorton.

— Ĉu mi ne diris al vi? Io okazas! — kriis Sam. — “La milito bone

progresas", diris Ŝagrato, sed Gorbago ne certis. Kaj ankaŭ li tie estis. La aferoj heliĝas, sinjoro Frodo. Ĉu vi nun ne havas iom da espero?

— Nu, ne, fakte ne multon, — Frodo suspiris. — Tio okazas fore ekster la montaro. Ni iras orienten, ne okcidenten. Kaj mi tiom lacas. Kaj la Ringo tiom pezas, Sam. Kaj mi komencas vidi ĝin per mia menso la tutan tempon, kiel grandan fajroradon.

La mallonga entuziasmiĝo de Sam tuj resinkis. Li rigardis zorgoplene sian mastron kaj kaptis ties manon.

— Vidu, sinjoro Frodo! Mi jam havas unu el miaj deziraĵoj: iom da lumo. Sufiĉe por helpi nin, kaj tamen supozeble ĝi estas ankaŭ danĝera. Provu iom pli antaŭen, kaj poste ni kuŝos unu apud la alia kaj iom ripozos. Sed nun glutu ereton, iometon el la elfa nutraĵo, tio eble kuraĝigos vin.

Dividinte oblaton da *lembaso*, kaj maĉante ĝin laŭeble en la sek-egaj buŝoj, Frodo kaj Sam plandis antaŭen. La lumo, kvankam ne pli ol griza krepusko, jam sufiĉis por ke ili vidu, ke ili troviĝas profunde en la valo inter la montoj. Ĝi deklivis malabrupte norden, kaj ĉe ĝia fundo estis la kuŝejo de rivereto nun seka kaj velkinta. Trans la ŝtonoza fluejo ili vidis piedkreitan padon, kiu serpentumis ĉe la subo de l' okcidentaj klifoj. Se ili sciis, ili povus atingi ĝin pli rapide, ĉar ĝi estis pado, kiu forlasis la ĉefan Morgulan Vojon ĉe la okcidenta pont-ekstremo kaj subeniris per ŝtuparo tranĉita en la roko ĝis la vala fundo. Ĝin uzis patroloj aŭ kurieroj irantaj rapide al malpli gravaj postenoj kaj fortikaĵoj norde, inter Cirito Ungol kaj la stretoj de Isenbuŝo, la feraj makzeloj de Karaĥo Angren.

Estis al la hobitoj danĝere utiligi tiun padon, sed rapideco necesis al ili, kaj Frodo sentis, ke li ne povos fronti la strebon stumbliri inter la rokegoj aŭ en la senpadaj valoj de Morgaĵo. Kaj li taksis, ke norden estus, eble, la vojo, kiun iliaj ĉasantoj malplej atendus, ke ili iru. La vojo orienten al la ebenaĵo, aŭ la pasejo okcidenten, tiujn ili unue traserĉus plej ĝisfunde. Nur kiam li estos sufiĉe norde de la turego laŭintence li turnos sin kaj serĉos iun vojon por iri orienten, orienten dum tiu lasta malfacilega stadio de la vojaĝo. Do nun ili transiris la ŝtonozan fluejon kaj laŭiris la orkan padon, kaj dum kelka tempo ili marŝis laŭlonge de ĝi. La klifoj maldekstre superkliniĝis, kaj oni ne povis vidi ilin desupre; sed la pado ofte deviis, kaj je ĉiu devio ili kaptis la glavtenilojn kaj pluiris singarde.

La lumo ne plifortiĝis, ĉar Orodruino daŭre elsputis fumegon kiu,

supren batite de la kontraŭaj aeroj, pli kaj pli altiĝis, ĝis ĝi alvenis regionon super la vento kaj disetendiĝis je senmezura tegmento, kies centra pilastro leviĝis el la ombroj ekster ilia vidkampo. Ili jam plan-dis dum pli ol unu horo, kiam ili aŭdis sonon, kiu haltigis ilin. Nekredeble, sed nemiskompreneble — akvo fluetis. El ravineto maldekstre, tiel akra kaj mallarĝa, ke ĝi aspektis kvazaŭ la nigra klifo estus fendita per granda hakilo, akvo subengutis; la lasta restaĵo, eble, de iu dolĉa pluvo rikoltita el sunlumaj maroj, sed mise destinita fali finfine sur la murojn de la Nigra Lando kaj vagi senutile suben en la polvon. Ĉi tie ĝi venis el la rokaĵo per eta falanta rojeto, kaj fluis trans la padon, kaj turniĝinte suden ĝi forfluis rapide por perdiĝi inter la mortaj ŝtonoj.

Sam alsaltis ĝin.

— Se mi iam denove vidos la Damon, mi rakontos al ŝi! — li ekkriis. — Lumon kaj nun akvon! — Li ĉesis. — Lasu, ke mi trinku la unua, sinjoro Frodo.

— Bone, sed spaco sufiĉas por du.

— Ne tion mi celis. Mi volis diri: se ĝi estas veneno, aŭ io kio vidigos sian malutilon rapide, nu, prefere mi ol vi, mastro, se vi komprenas min.

— Mi komprenas. Sed mi opinias, ke ni kune fidu nian bonŝancon, Sam; aŭ nian benatecon. Tamen estu singarda nun, se ĝi tre malvarmas!

La akvo estis malvarmeta sed ne glacia, kaj ĝi havis guston malagrablan, samtempe amaran kaj oleecan, aŭ tiel oni dirus hejme. Ĉi tie ĝi ŝajnis pli ol laŭdinda kaj ekster timo aŭ prudento. Ili sattrinkis, kaj Sam replenigis sian botelon. Poste Frodo sentis sin pli kontenta, kaj ili pluiris kelkajn mejlojn, ĝis larĝiĝo de la vojo kaj la komenciĝo de kruda muro apud ĝia rando avertis, ke ili proksimiĝas al alia orka fortikaĵo.

— Ĉi tie ni turniĝu flanken, Sam, — diris Frodo. — Kaj ni devas direktiĝi orienten. — Li ĝemspiris rigardante la mornajn firstojn trans la valo. — Restas al mi ĝuste sufiĉe da forto por trovi ian truon tie supre. Kaj poste mi devos ripozi iomete.

La riverfundo estis nun iom sub la padnivelo. Ili stumbliris suben al ĝi kaj komencis transiri. Surprizite ili trovis malhelajn flakojn nutritaj de akvofadenoj fluantaj de iu monto pli alte en la valo. Ĉe ties randoj sub la montoj okcidente Mordoro estis lando mortanta, sed ĝi ankoraŭ ne estis morta. Kaj ĉi tie ankoraŭ kreskis aĵoj raspaj, torditaj, amaraj, baraktantaj por vivi. En la valoj de Morgaĵo aliflanke de la

valo embuskis vepraj arboj kaj kroĉiĝis, maldelikataj grizaj herbotufoj luktis kontraŭ la ŝtonoj, kaj velkaj muskoj rampis sur ili; ĉie diskuŝis grandaj tordiĝantaj dornplektaĵoj. Iuj havis longajn pikajn dornojn, iuj hokajn pikilojn, kiuj ŝiris tranĉilece. La malviglaj ŝrumpintaj folioj de la pasinta jaro pendis sur ili, grincante kaj klakante en la malgajaj aeroj, sed ties vermtrafitaj burĝonoj nur nun komencis malfermiĝi. Muŝoj, grizbrunaj, grizaj, aŭ nigraj, markitaj kiel orkoj per ruĝa okulforma makulo, zumis kaj pikis; kaj super la dornplektaĵoj nuboj da malsataj kuloj dancis kaj giris.

— Orka ekipaĵo ne taŭgas, — diris Sam svingante siajn brakojn. — Mi ŝatus havi la felon de orko!

Finfine Frodo ne povis pluiri. Ili jam grimpis supren laŭ mallarĝa dekliva ravineto, sed ankoraŭ necesis longa vojo ĝis ili povos eĉ ekvidi la lastan rokecan firston.

— Mi devos nun ripozi, Sam, kaj laŭeble dormi, — diris Frodo. Li ĉirkaŭrigardis, sed ŝajnis troviĝi nenio, kien povus besto rampi en tiu malagrabra regiono. Finfine elĉerpite, ili ŝteliris sub dornaĵkurtenon, kiu pendis kvazaŭ mato sur malalta rokfaco.

Tie ili sidis kaj manĝis tiom, kiom ili povis. Rezervante la valoran *lembason* por la misaj tagoj venontaj, ili manĝis duonon da tio, kio restis en la sako de Sam el la provianto de Faramiro: kelkajn sekajn fruktojn kaj peceton da sekigita viando; kaj ili glutetis iom da akvo. Ili jam trinkis denove el la valaj lagetoj, sed refoje ili tre soifis. En la aero de Mordoro estis amara odoro, kiu sekigis la buŝon. Kiam Sam pri-pensis akvon, eĉ lia optimisma spirito kuntiriĝis. Trans Morgajo estis transirenda la terura ebenaĵo Gorgoroto.

— Nu, vi ekdormu la unua, sinjoro Frodo, — li diris. — Jam denove malheliĝas. Mi kalkulas, ke tiu ĉi tago preskaŭ finiĝis.

Frodo ĝemspiris kaj jam endormiĝis preskaŭ antaŭ ol tiuj vortoj estis parolitaj. Sam luktis kontraŭ la propra laco, kaj li prenis la manon de Frodo; kaj tie li sidis silente ĝis la nokto nigre profundiĝis. Tiam finfine, por teni sin maldorma, li elrampis el la kaŝejo kaj elrigardis. La tereno ŝajnis plena je grincado kaj krakado kaj kaŝemaj bruoj, sed mankis sono de voĉoj aŭ piedoj. Forsupre super Efelo Duad en la okcidento la nokta ĉielo estis ankoraŭ malklara kaj pala. Tie, gvatantan inter la nubĉifonoj super alta pinto inter la montoj, Sam vidis ekbrili dum kelka tempo blankan stelon. Ties beleco emociis lian koron, dum li rigardis supren el la forlasita lando, kaj espero revenis al li. Ĉar kvazaŭ sago, klara kaj malvarma, lin trapikis la penso, ke

finfine la Ombro estas nur malgranda kaj pasema afero: ekzistas lumo kaj alta belo eterne ekster ĝia atingo. Lia kanto en la turego estis pli defia ol espera; sed tiam li pensis pri si. Nun, momente, lia sorto, kaj eĉ tiu de lia mastro, ĉesis ĝeni lin. Li rampis denove sub la dornkreskaĵon kaj kuŝiĝis flanke de Frodo, kaj forpelinte la tutan timon, li ĵetis sin en profundan malzorgan dormon.

Ili vekigiĝis samtempe, man-en-mane. Sam estis preskaŭ freŝa, preta por nova tago; sed Frodo ĝemspiris. Lia dormo estis maltrankvila, plena je sonĝoj pri fajro, kaj la vekigo havigis al li neniom da konsolo. Tamen al lia dormo ne tute mankis kuraca efiko: li estis pli forta, pli kapabla porti sian ŝarĝon tra ankoraŭ unu stadio. Ili ne konis la horon, nek kiom longe ili dormis; sed post mordeto da manĝaĵo kaj gluteto da akvo ili pluiris laŭ la ravino, ĝis tiu finiĝis per abrupta deklivo el ŝtonsplitoj kaj forglitaj ŝtonoj. Tie la lastaj vivantaĵoj rezignis pri sia lukto; la supraĵo de Morgaĵo estis senherba, nuda, akrangula, senviva kiel ardezo.

Post multe da vagado kaj serĉado ili trovis lokon, kie ili povos grimpi, kaj tra lastaj cent futoj da rampa stumbliro ili troviĝis supre. Ili venis al fendaĵo inter du malhelaj rokegoj, kaj trapasinte ili trovis sin ĉe la rando mem de la lasta barilo de Mordoro. Sube, funde de altaĵo proksimume mil-kvincent-futa, kuŝis la interna ebenaĵo etendiĝanta foren en senforman sombron ekster ilia vidkampo. La vento blovis nun el la okcidento, kaj la nubegoj estis levitaj alten, forflosante orienten; sed ankoraŭ nun griza lumo atingis la sensukajn kampojn de Gorgoroto. Tie fumoj serpentumis sur la tero kaj embuskis en kavaĵoj, kaj fetoroj likiĝis el fendetoj en la tero.

Ankoraŭ malproksime, post minimume kvardek mejloj, ili vidis la Monton de Sorto, kies subo estis starigita en cindra ruino, kies konusego leviĝis je granda alto, kie ĝia fetora pinto estis volvita en nuboj. Ĝiaj fajroj jam malardiĝis, kaj ĝi staris subbrule dormantanta, tiel minaca kaj danĝera kiel dormantanta besto. Malantaŭ ĝi pendis malhela ombro, misaŭgura kiel tondronubo, la vualo de Baraduro, kiu naskiĝis malproksime sur longa elstaraĵo de la Cindraĵo Montoj el la nordo elmetita. La Malhela Potenco profunde meditadis, kaj la Okulo turniĝis internen, pripensante informojn duboplenajn kaj danĝerajn: brilan glavon kaj severan reĝecan vizaĝon ĝi vidis, kaj dum kelka tempo ĝi malmulte atentis ion alian; kaj ĝia tuta granda fortikaĵo, pordon post pordo, estis volvita en miskova sombro.

Frodo kaj Sam elrigardis kun miksitaj abomeno kaj miro al tiu malaminda lando. Inter ili kaj la fumanta monto, kaj ĉirkaŭ ĝi norde kaj sude, ĉio ŝajnis ruina kaj morta, dezerto bruligita kaj sufokita. Ili scivolis kiel la mastro de tiu regno vivtenis kaj nutris siajn sklavojn kaj siajn armeojn. Tamen armeojn li havis. Tra ilia tuta vidkampo, laŭ la subaĵo de Morgajo kaj fore suden, troviĝis bivakoj, iuj tende, iuj urbetece ordigitaj. Unu el la plej grandaj el ili troviĝis rekte sub ili. Apenaŭ mejlon for sur la ebenaĵo ĝi amasiĝis kiel ia nestego insekta, kun rektaj mornaj stratoj da kabanaj kaj longaj malaltaj senkoloraj konstruaĵoj. Ĉirkaŭ ĝi la tero estis svarma je personoj irantaj tien-reen; larĝa vojo etendiĝis de ĝi sud-orienten por aliĝi al la Morgula Vojo, kaj sur ĝi multaj linioj da etaj nigraj figuroj rapidadis.

— Al mi ne plaĉas la aspekto de la aferoj entute, — diris Sam. — Sufiĉe senespera mi nomas tion, krom ke kie troviĝas tiom da personoj, tie devas esti putoj aŭ akvo, por ne paroli pri manĝaĵoj. Kaj tiuj estas homoj, ne orkoj, aŭ miaj okuloj misfunkcias.

Nek li nek Frodo sciis pri la grandaj sklavkulturitaj kampoj forsude en tiu vasta regno, post la fumoj de la Monto apud la malhelaj tristaj akvoj de lago Nurneno, nek pri la grandaj vojoj, kiuj etendiĝis orienten kaj suden al landoj tributaj, el kiuj la soldatoj de la Turego venigis longajn furgonarojn da varoj kaj rabaĵo kaj novaj sklavoj. Ĉi tie en la nordaj regionoj estis la minejoj kaj forĝejoj, kaj la kolektiĝoj por milito longe planita; kaj ĉi tie la Malhela Potenco, movante siajn armeojn, kvazaŭ ŝakpecojn sur tabulo, kunigis ilin. Ĝiaj unuaj movoj, la unuaj provoj de ĝia forto, estis haltigitaj sur ĝia okcidenta linio, sude kaj norde. Provizore ĝi reprenis ilin, kaj antaŭenigis novajn fortojn, amasigante ilin ĉirkaŭ Cirito Gorgor por venĝa bato. Kaj se ĝi intencis ankaŭ defendi la Monton kontraŭ ĉiu alproksimiĝo, ĝi apenaŭ povis fari pli ol ĝi ja faris.

— Nu! — Sam daŭrigis. — Kion ajn ili havas manĝeblan kaj trinkeblan, ni ne povas akiri ĝin. Troviĝas neniu vojo suben videbla al mi. Kaj ni ne povus transiri tiun tutan apertan regionon plenplenan de malamikoj, eĉ se ni sukcesus subiri.

— Tamen ni devos provi, — diris Frodo. — Ĝi ne estas pli malbona ol mi antaŭvidis. Mi neniam esperis transiri. Ankaŭ nun mi ne vidas tian esperon. Sed mi devas ankoraŭ fari mian plejebilon. Aktuale tio signifas eviti kiel eble plej longe kaptiĝon. Do ni devos ankoraŭ iri norden, laŭ mia opinio, kaj vidi kiel estas, kie la aperta ebenaĵo estas pli mallarĝa.

— Mi antaŭvidas, kia ĝi estos, — diris Sam. — Kie ĝi estas pli mal-larĝa la orkoj kaj homoj nur pli dense kunpremiĝos. Vi vidis, sinjoro Frodo.

— Verŝajne ni tion vidis, se ni entute atingos tiel malproksimen, — diris Frodo kaj forturnis sin.

Ili baldaŭ konstatis, ke estis neeble trovi vojon laŭ la kresto de Morgajo, aŭ ie ajn ĉe ĝiaj pli malaltaj niveloj, ĉar ili estis senpadaj kaj trastrekitaj je profundaj ravinetoj. Fine ili estis devigitaj retroiri tra la ravino, kiun ili jam grimpis, kaj serĉi vojon laŭlonge de la valo. Mal-facilis la irado, ĉar ili ne riskis transiri al la pado ĉe la okcidenta flanko. Post mejlo aŭ eble pli ili vidis, kaŭrantan en kavo funde de la klifo, la orkan fortikaĵon, kies proksimecon ili supozis: muron kaj grapolon da ŝtonaj kabanaj starigitaj ĉirkaŭ la malhela aperturo de kaverno. Neniu moviĝo videblis, sed la hobitoj ŝtele pasis ĝin singarde, laŭeble restante en la dornarbustoj, kiuj kreskis dense tiuloke je ambaŭ flankoj de la malnova akvofluejo.

Post du aŭ tri mejloj la orka fortikaĵo iĝis nevidebla malantaŭ ili; sed apenaŭ ili komencis spiri denove pli libere, ili aŭdis raŭkajn kaj laŭtajn orkajn voĉojn. Ili rapide nevidebligis sin malantaŭ bruna kaj naneca arbusto. La voĉoj proksimiĝis. Baldaŭ vidiĝis du orkoj. Unu estis vestita per ĉifita brunaĵo kaj estis armita per pafarko el korno; li estis eta, nigrahaŭta, kun larĝaj snufaj naztruoj: evidente iaspeca spuristo. La alia estis granda batal-orko, kiel tiuj en la trupo de Ŝagrato, portanta la insignon de l' Okulo. Ankaŭ li havis pafarkon surdorse kaj portis mallongan larĝklingan lancon. Kiel kutime ili kverelis, kaj estante malsamspecaj ili uzis la Komunan Lingvon laŭ sia maniero.

Apenaŭ dudek paŝojn de kie sin kaŝis la hobitoj, la eta orko haltis.

— Ne! — li murmuregis. — Mi iros hejmen. — Li fingromontris trans la valon al la orka fortikaĵo. — Ne valoras trivi mian nazon plu kontraŭ ŝtonoj. Nenia postsigno restas, mi diras. Mi perdis la spurodoron pro tio, ke mi cedis al vi. Ĝi supreniris sur la montaron, ne tra la valo, mi insistas.

— Ne multe utilas vi snufistetoj, ĉu? — diris la granda orko. — Laŭ mi, okuloj pli utilas ol viaj mukaj nazoj.

— Do kion vi vidis per ili? — murmuregis la alia. — Aĉ! Vi eĉ ne scias, kion vi serĉas.

— Kiu kulpas pri tio? — diris la soldato. — Ne mi. Tio devenas de la ĉefoj. Komence ili diras, ke temas pri granda elfo en hela armaĵo,

poste ĝi estas speco de eta nanhomo, poste devas esti hordo da uruk-hajaj ribelintoj; aŭ eble temas pri ĉiuj kune.

— Pa! — diris la spuristo. — Ili perdis la prudenton, jen la klarigo. Kaj iuj el la estroj perdos ankaŭ la haŭtojn, mi konjektas, se veras tio, kion mi aŭdas: la turego atakita kaj tiel plu, kaj centoj el viaj knaboj mortigitaj, kaj kaptito eskapinta. Se tiel kondukas vi, batalantoj, ne mirindas, ke malbonas la novaĵoj pri la bataloj.

— Kiu diras, ke ekzistas malbonaj novaĵoj? — kriis la soldato.

— Pa! Kiu diras, ke ne?

— Tio estas sakrinda ribela parolo, kaj mi trapikos vin, se vi ne fermos la faŭkon, ĉu komprenite?

— Bone, bone! — diris la spuristo. — Mi nenion plu diros kaj daŭre pensados. Sed kial enmiksiĝas la nigra kaŝirulo? Tiu glutegulo kun la manoj oscilantaj?

— Mi ne scias. Nenial, eble. Sed li celas nenion bonan, ĉirkaŭ-nazumante, mi vetas. Li estu malbenita! Tuj post kiam li evitis nin kaj forkuris, venis informo, ke li estas necesa vivanta, urĝe necesa.

— Nu, mi esperas, ke oni kaptos lin kaj suferigos lin, — graŭlis la spuristo. — Li fuŝis la spurodon tie malantaŭe, ŝtelinte tiun forĵetit-tan maŝkirason, kiun li trovis, kaj ĉirkaŭpadelante tra la tuta loko antaŭ ol mi povis atingi la lokon.

— Ĝi ĉiuokaze savis lian vivon, — diris la soldato. — Vidu, antaŭ ol mi sciis, ke li estas serĉato, mi pafis lin nete-netege, je kvindek paŝoj ĝuste en la dorson, sed li plu kuris.

— Pa! Vi maltrafis lin. Komence vi pafas sencele, poste vi kuras tro malrapide, kaj fine vi alvokas la kompatindajn spuristojn. Al mi jam sufiĉas pri vi. — La spuristo forpaŝegis.

— Revenu, — kriis la soldato, — aŭ mi raportos pri vi!

— Al kiu? Ne al via ŝatata Ŝagrato. Li ne plu estos trupestro.

— Mi donos viajn nomon kaj numeron al la nazguloj, — diris la soldato sible mallaŭtigante sian voĉon. — Unu el *ili* komandas nun ĉe la turego.

La alia haltis, kaj lia voĉo estis plenplena de timo kaj kolerego.

— Vi malbeninda denuncema etŝtelisto! — li kriegis. — Vi ne kapablas je via tasko, kaj vi eĉ ne povas lojali al la propra popolo. Iru al viaj fiaj kriĉistoj, kaj ili glaciigu al vi la karnon! Se la malamikoj ne trovis ilin anticipe. Oni mortigis Numeron Unu, mi aŭdis, kaj mi esperas, ke tio estas vera!

La granda orko, lanc-en-mane, saltis post lin. Sed la spuristo,

saltinte post ŝtonegon, pafis sagon en lian okulon, dum li alkuris, kaj li falis bruege. La alia forkuris tra la valo kaj malaperis.

Kelkan tempon la hobitoj sidis silente. Finfine Sam ekmoviĝis.

— Nu, mi nomas tion nete netega, — li diris, — se tiu ĉi afabla amik-iĝemo disvastiĝus tra Mordoro, duono de niaj problemoj estus solvita.

— Kviete, Sam, — Frodo flustris. — Eble aliaj proksimas. Ni evidente tre bonŝance eskapis, kaj la persekuto pli arde spuris nin, ol ni supozis. Sed tia ja estas la spirito de Mordoro, Sam; kaj ĝi disvastiĝis al ĉiuj ties popoloj. Orkoj ĉiam kondukis tiel, aŭ tion diras la rakontoj, kiam ili estas solaj. Sed ne eblas ĉerpi multe da espero el tio. Ili malamas nin multe pli, komplete kaj la tutan tempon. Se tiuj du vidus nin, ili ĉesigus sian kverelon, ĝis ni estus mortaj.

Sekvis plia longa silento. Sam denove rompis ĝin, sed ĉi-foje flustre:

— Ĉu vi aŭdis, kion ili diris pri tiu *glutegulo*, sinjoro Frodo? Mi ja diris al vi, ke Golumo ankoraŭ ne mortis, ĉu ne?

— Jes, mi memoras. Kaj mi scivolis, kiel vi sciis tion. Nu, sufiĉe! Mi opinias, ke ni prefere ne formoviĝu de ĉi tie, ĝis iĝos tute mallume. Diru al mi, kiel vi scias, kaj ĉion, kio okazis. Se tion vi kapablas kviete.

— Mi provos, — diris Sam, — sed kiam mi pensas pri tiu fetorulo, mi tiom varmiĝas, ke mi volas kriegi.

Tie la hobitoj sidis sub ŝirmo de la dornarbusto, dum la morna lumo de Mordoro velkis malrapide al profunda kaj senstela nokto; kaj Sam diris en la orelon de Frodo ĉion, por kio li povis trovi vortojn pri la perfidema atako de Golumo, la hororo de Ŝeloba, kaj liaj propraj aventuroj kun la orkoj. Kiam li finis, Frodo diris nenion, sed kaptis la manon de Sam kaj premis ĝin. Finfine li ekmoviĝis.

— Nu, supozeble ni devas ekpluiri, — li diris. — Mi scivolas, kiom longe daŭros antaŭ ol ni efektive estos kaptitaj, kaj la tuta penado kaj la ŝtelirado estos finitaj, kaj vane. — Li stariĝis. — Estas mallume, kaj ni ne povas utiligi la vitron de la Damo. Gardu ĝin sekure por mi, Sam. Nun mi ne povas retenigi ĝin krom en mia mano, kaj mi bezonas ambaŭ manojn en la blinda nokto. Sed Pikilon mi donas al vi. Mi havas orkan klingon, sed mi ne opinias, ke mia rolo iam denove postulos bati glave.

Estis malfacile kaj danĝere moviĝi nokte en la senpada regiono; sed malrapide kaj tre stumbe la du hobitoj penis norden horon post

horo laŭ la orienta rando de l' ŝtonoza valo. Kiam griza lumo revenis rampe super la okcidentaj altaĵoj, longe post kiam la tago komenciĝis en la transaj landoj, ili kaŝiĝis denove kaj dormis iom laŭvice. Dum siaj maldormaj horoj Sam okupiĝis pensante pri nutraĵoj. Finfine, kiam Frodo vekis sin kaj parolis pri manĝado kaj preparado por ankoraŭ unu plia penado, li starigis la demandon, kiu plej perturbis lin.

— Pardonpete, sinjoro Frodo, — li diris, — sed ĉu vi entute scias, kia distanco estas ankoraŭ trairota?

— Ne, tute ne klare, Sam. En Rivendelo antaŭ ol mi ekvojaĝis, oni montris al mi mapon de Mordoro, kiu estis farita antaŭ ol la Malamiko revenis ĉi tien; sed nur malprecize mi memoras ĝin. Plej klare mi memoras, ke en la nordo estis loko, kie la okcidenta montaro kaj la norda montaro etendas membrojn, kiuj preskaŭ renkontiĝas. Tio certe estas dudek leŭgojn minimume de la ponto retro apud la turego. Tio eble estus bona loko transiri. Sed kompreneble, se ni alvenus tien, ni troviĝos pli distance ol antaŭe de la Monto, sesdek mejlojn de ĝi, mi opinias. Mi konjektas, ke ni jam iris ĉirkaŭ dek du mejlojn norden de la ponto. Eĉ se ĉio iros glate, mi apenaŭ atingos la Monton post unu semajno. Mi timas, Sam, ke la ŝarĝo fariĝos ege peza, kaj mi iros des pli malrapide ju pli ni proksimiĝos.

Sam ĝemspiris.

— Ĝuste tion mi timis, — li diris. — Nu, se nenion diri pri akvo, ni devos malpli manĝi, sinjoro Frodo, aŭ alternative marŝi pli rapide, almenaŭ dum ni estos en tiu ĉi valo. Ankoraŭ unu mordo kaj finiĝos la tuta manĝaĵo krom la elfa vojpano.

— Mi klopodos iri iom pli rapide, Sam, — diris Frodo, profunde enspirinte. — Ek do! Ni rekomencu la marŝadon!

Ne tute mallumiĝis denove. Ili plandis plu, antaŭen en la nokton. La horoj pasis per laca stumbla progreso kun malmultaj mallongaj haltoj. Je la unua averto pri la griza lumo sub la rando de la ombra baldakeno ili sin kaŝis denove en malhela kavo sur superpendanta ŝtonego.

Malrapide plifortiĝis la lumo, ĝis ĝi estis pli klara ol ĝi estis ĝis tiam. Forta vento el la okcidento nun forpelis la fumojn de Mordoro el la supraj aerroj. Post nelonge la hobitoj povis vidi la formon de la tereno je kelkaj mejloj ĉirkaŭe. La kavo inter la montoj kaj Morgaĵo grade malpliĝis dum ĝi supreniris, kaj la interna firsto estis jam ne pli ol breto sur la krutaj facoj de Efelo Duad; sed oriente ĝi descendis tiel

apike, kiel antaŭe, suben en Gorgoroton. Antaŭe la akvofluejo finiĝis per rompitaĵaj ŝtupoj da roko; ĉar alsaltis el la ĉefa montaro alta senherba elstarajo, nurece ŝoviĝanta orienten. Renkonte al ĝi etendiĝis el la griza kaj nebuleca norda montaro de Eredo Litui longa elstara brakajo; kaj inter la ekstremoj estis mallarĝa breĉo: Karaĥo Angren, la Isenbuŝo, post kiu kuŝis la profunda valo Uduno. En tiu valo malantaŭ Moranono estis tuneloj kaj profundaj armejoj, kiujn la servistoj de Mordoro faris por defendo de la Nigra Pordego de sia lando. Kaj tie nun ilia mastro amasigis haste grandajn armeojn por renkonti la sturmadon de la komandantoj de la okcidento. Sur la elpuŝitaj terlangoj estis konstruitaj fortikaĵoj kaj turoj, kaj flamis gardfajroj; kaj tra la tuta breĉo estis starigita grunda muro, kaj fosita estis profunda fosaĵo, kiu estis transirebla nur pere de sola ponto.

Kelkajn mejlojn norde, altsupre en la angulo, kie la okcidenta terlango branĉiĝis for de la ĉefa montaro, staris la malnova kastelo Dartango, nun unu el la multaj orkaj fortikaĵoj, kiuj amasiĝis ĉirkaŭ la valo de Uduno. Vojo, jam videbla en la plifortiĝanta lumo, serpentumis suben de ĝi, ĝis nur unu-du mejloj de kie kuŝis la hobitoj ĝi turniĝis orienten kaj laŭiris breton tranĉitan flanke de la terlango, kaj tiel suben al la ebenaĵo, kaj pluen al Isenbuŝo.

Al la elrigardantaj hobitoj ŝajnis, ke ilia tuta vojaĝo norden estis senfrukta. La ebenaĵo dekstre estis malklara kaj fumecca, kaj tie ili povis vidi nek bivakojn nek moviĝantajn soldatojn; sed tiu tuta regiono estis observata de la fortikaĵoj de Karaĥo Angren.

— Ni alvenis sakvojon, Sam, — diris Frodo. — Se ni pluiros, ni nur atingos tiun orkan turon, sed la sola irota vojo estas tiu, kiu descendas de ĝi, krom se ni retroiros. Ni povas nek grimpi okcidenten, nek descendi orienten.

— Do necesas laŭiri la vojon, sinjoro Frodo, — diris Sam. — Ni devas sekvi ĝin kaj fidi nian bonŝancon, se bonŝanco ekzistas en Mordoro. Cedi nin utilas same kiel ĉirkaŭvagadi plu, aŭ provi retroiri. Nia nutraĵo ne sufiĉus. Ni devas alkuradi!

— Bone, Sam, — diris Frodo. — Konduku min! Tiel longe kiel restas al vi espero. Foriĝis la mia. Sed kuri mi ne kapablas, Sam. Mi simple plandados malantaŭ vi.

— Antaŭ komenci pluan plandadon, vi bezonas dormon kaj manĝaĵon, sinjoro Frodo. Venu preni da ili tiom, kiom vi povas akiri!

Li donis al Frodo akvon kaj aldonan oblaton da vojpano, kaj el sia mantelo li faris kusenon por la kapo de sia mastro. Frodo estis tro laca

por debati la aferon, kaj Sam ne sciigis al li, ke li glutis la lastan guton de ilia akvo kaj manĝis la panporcion de Sam kune kun la propra. Kiam Frodo jam dormis, Sam kliniĝis al li kaj aŭskultis lian spiradon kaj observis lian vizaĝon. Tiu estis faltita kaj malgrasa, kaj tamen dumdorme ĝi aspektis kontenta kaj sentima.

— Nu, jen komenciĝas, mastro! — Sam murmuris al si. — Mi devos por kelka tempo lasi vin kaj fidi la bonŝancon. Akvon ni devos havi, aŭ ni ne sukcesos pluiri.

Sam ŝteliris eksteren, kaj rapidante de ŝtono al ŝtono laŭ singardemo pli ol hobita, li subiris al la akvofluejo, kaj poste laŭiris ĝin kelkan tempon, dum ĝi supreniris norden, ĝis li venis al rokaj ŝtupoj, kie antaŭlonge sendube ĝia fonto suben impetis kiel akvoŝafo. Ĉio nun ŝajnis seka kaj silenta; sed rifuzante malesperi Sam kliniĝis kaj aŭskultis, kaj ĝojigate ekaŭdis sonon de fluetado. Grimpinte kelkajn ŝtupojn supren li trovis etan rojon da malhela akvo, kiu eliris el la montoflanko kaj plenigis malgrandan flakon, el kiu ĝi denove verŝiĝis kaj poste malaperis sub la malfekundajn ŝtonojn.

Sam gustumis la akvon, kaj ĝi ŝajnis sufiĉe bona. Poste li profunde trinkis, replenigis la botelon, kaj turniĝis por reiri. Tiumomente li ekvidis nigran figuron aŭ ombron moviĝanta inter la rokoj fore apud la kaŝejo de Frodo. Englutinte krion, li desaltis de la fonto kaj kuris, saltante de ŝtono al ŝtono. Tiu estis singardema kreaĵo, malfacile videbla, sed Sam malmulte dubis pri ĝi: li sopiris mankapti ĝian kolon. Sed tiu aŭdis lian proksimiĝon kaj kviete forglitis. Al Sam ŝajnis, ke li laste ekvidas tiun retrogvatanta trans la rando de la orienta krutegaĵo, antaŭ ol ĝi subenŝovis la kapon kaj malaperis.

— Nu, la bonŝanco ne perfidis min, — murmuris Sam, — sed tio estis kriza momento! Ĉu ne sufiĉas havi orkojn pomile sen ke tiu fetora fiulo venu nazumante? Mi volus, ke li estu pafita!

Li sidiĝis apud Frodo kaj ne vekis lin; sed li ne riskis mem endormiĝi. Finfine, kiam li sentis fermiĝi la okulojn kaj sciis, ke lia klopodo resti maldorma ne daŭros plu longe, li vekis Frodon milde.

— Tiu Golumo denove proksimas, mi timas, sinjoro Frodo, — li diris. — Ĉiuokaze, se estis ne li, li ekzistas duope. Mi foriris por trovi iom da akvo kaj rimarkis lin ĉirkaŭnazumanta ĝuste kiam mi ekrevenis. Mi opinias, ke ne estas sendanĝere por ni dormi samtempe, kaj pardonpete, sed mi ne povos multe pli longe teni apertaj la palpebrojn.

— Estu benata, Sam! — diris Frodo. — Kuŝiĝu kaj akceptu vian

vicon! Sed mi prefere havus Golumon ol orkojn. Li ĉiuokaze ne perfidos nin al ili — kondiĉe ke li ne estu mem kaptita.

— Sed li eble faros iom da rabado kaj murdo proprainciate, — graŭlis Sam. — Tenu la okulojn malfermitaj, sinjoro Frodo! Jen botelo plena da akvo. Trinku profunde. Ni povos replenigi ĝin, kiam ni pluiros. — Dirinte tion Sam plonĝis en dormadon.

La lumo denove ekvelkis, kiam li vekigis. Frodo sidis apogite al la malantaŭa roko, sed li endormiĝis. La botelo estis malplena. Estis neniuj indiko pri Golumo.

La Mordora mallumo revenis, kaj la gardofajroj sur la altaĵoj brulis akre kaj ruĝe, kiam la hobitoj ekiris denove al la plej danĝera stadio de sia vojaĝo. Ili iris unue al la fonteto, kaj poste grimpis singarde supren al la vojo ĉe tiu loko, kie ĝi turniĝis orienten al Isenbuŝo dudek mejlojn for. Ĝi ne estis vojo larĝa, kaj ĝi havis nek muron, nek parapeton ĉe la rando, kaj dum ĝi progresis, la apika krutaĵo ĉe ĝia rando pli kaj pli profundiĝis. La hobitoj povis aŭdi neniujn moviĝojn, kaj aŭskultinte dum iom da tempo, ili ekiris ordmarŝe orienten.

Post ĉirkaŭ dek du mejloj ili haltis. Iomete pli frue la vojo kurbiĝis certagrade norden, kaj tiu etendiĝo kiun ili trapasis, jam estis barita al la vido. Tio pruviĝis katastrofa. Ili ripozis kelkajn minutojn kaj poste pluiris; sed post nur kelkaj paŝoj ili subite en la nokta trankvilo aŭdis la sonon, kiun la tutan tempon ili sekrete antaŭtimis: la bruon de piedoj marŝantaj. Tio estis ankoraŭ iom malantaŭ ili, sed retrorigardante ili vidis la ekbrilon de torĉoj venantaj ĉirkaŭ la kurbiĝon malpli ol unu mejlon for, kaj tiuj moviĝis rapide: tro rapide, por ke Frodo eskapu fuĝante laŭ la vojo antaŭe.

— Tion mi timis, Sam, — diris Frodo. — Mi fidis nian bonŝancon, kaj ĝi perfidis nin. Ni estas enŝlositaj. — Li rigardis agitate supren al la brovumanta muro, kie la vojkonstruintoj en pratempo krutigis la rokaĵon je multaj klaftoj super iliaj kapoj. Li kuris al la alia flanko kaj transrigardis la randon en malhelan mornoputon.

— Ni estas finfine enŝlositaj! — li diris kaj sinkis teren sub la rok-muro kaj klinis sian kapon.

— Ŝajnas tiel, — diris Sam. — Nu, eblas nur atendi la okazaĵon. — Kaj tion dirinte li sidiĝis apud Frodo sub la ombro de la klifo.

Ne necesis longe atendi. La orkoj vojaĝis hastpaŝe. Tiuj en la avangardo portis torĉojn. Ili venis antaŭen, ruĝaj flamoj en la mallumo, rapide plifortiĝantaj. Nun ankaŭ Sam klinis la kapon, esperante, ke

tiel kaŝiĝos lia vizaĝo, kiam la torĉoj atingos ilin; kaj li metis iliajn ŝildojn antaŭ la genuojn por kaŝi iliajn piedojn.

“Se nur ili urĝos kaj lasos duopon da lacaj soldatoj en paco kaj pluiros”, — li pensis.

Kaj ŝajnis, ke ili tion faros. La avangardaj orkoj venis saltpaŝe, anhelante, klinante siajn kapojn. Ili estis hordo de la specoj malgrandaj malvolonte pelataj al la milito de sia Malhela Mastro; interesis ilin nur kompletigo de la marŝado kaj evito de vipo. Apud ili, kurante tien-reen laŭ la linio, iris du el la grandaj sovaĝaj *urukoj*, klakigante vipojn kaj kriante. Spaliro post spaliro pasis, kaj la riveliga torĉlumo estis jam iom antaŭe. Sam retenis sian spiron. Jam pli ol duono de la trupo preterpasis. Tiam subite unu el la sklavpelantoj rimarkis la du figurojn apud la vojo. Li frapetis per vipo al ili kaj kriis:

— Ha vi! Stariĝu!

Ili ne respondis, kaj per krio li haltigis la trupon.

— Ek al, limakoj! Ne estas tempo por sidado. — Li faris unu paŝon al ili, kaj eĉ en la malhelo li rekonis la insignojn sur iliaj ŝildoj. — Dizertantoj, ĉu? — li mordminacis. — Aŭ pripensas tion? Via tuta popolo devis esti en Uduno jam antaŭhieraŭ vespere. Tion vi scias. Stariĝu kaj enviciĝu, aŭ mi notos viajn numerojn kaj raportos pri vi.

Ili barakte stariĝis, kaj ankoraŭ kliniĝante, lamante kiel piede lacaj soldatoj, ili treniĝis direkte al la spalirofino.

— Ne, ne lastvice! — la sklavpelanto kriis. — Antaŭen je tri vicoj. Kaj restu tie, aŭ vi spertos, kiam mi revenos laŭ la linio! — Li igis sian longan viposton klaki super iliaj kapoj; poste per alia klako kaj krio li reirigis la trupon je rapida troto.

Estis sufiĉe malfacile por kompatinda Sam, kiu estis laca; sed por Frodo tio estis turmento, kaj baldaŭ koŝmaro. Li kunpremisis siajn dentojn kaj klopodis malebligi pensadon en sia menso, kaj li baraktis antaŭen. La fetoro de la ŝvitantaj orkoj ĉirkaŭ li estis sufoka, kaj li komencis anheli soifego. Daŭre ili pluiris, kaj li direktis sian tutan volpovon al spirado kaj movo de la kruroj; kaj tamen al kiu fia celo li penegas kaj suferas, li ne riskis pripensi. Elviciĝo nevidata ne esperblis. De tempo al tempo la orka pelanto revenis kaj mokis ilin.

— Jen do! — li ridis, frapetante iliajn krurojn. — Kie vipo estas, volo estas, limakoj miaj. Ne falu! Mi havigus al vi belan freŝigilon nun, sed vi ricevos tiom da vipado kiom toleros viaj haŭtoj, kiam vi alvenos malfrue al via bivako. Bonefikos al vi. Ĉu vi ne scias, ke ni jam militas?

Ili jam iris kelkajn mejlojn, kaj la vojo finfine direktiĝis suben laŭ longa deklivo al la ebenaĵo, kiam la forto de Frodo komencis elĉerpiĝi kaj lia volpovo ŝanceliĝis. Li skuiĝis kaj stumblis. Sam streĉe provis helpi kaj subteni lin, kvankam li sentis, ke li mem apenaŭ plu eltenos. Li sciis, ke la fino venos preskaŭ tuj: lia mastro svenos aŭ falos, kaj ĉio estos malkovrita, kaj iliaj teruraj penoj estos vanaj. “Mi ĉiuokaze finos pri tiu sklavpela ulaĉo”, — li pensis.

Tiam ĝuste, kiam li elmetis sian manon al la tenilo de sia glavo, venis neatendita faciligo. Nun ili estis sur la ebenaĵo proksimiĝante al la enirejo de Uduno. Iom antaŭ ĝi, antaŭ la pordo ĉe la pontekstremo, la vojo el la okcidento aliĝis al aliaj venantaj el la sudo kaj el Baraduro. Laŭ ĉiuj vojoj soldatoj moviĝis; ĉar la komandantoj de l' okcidento marŝis antaŭen, kaj la Malhela Mastro ekspedis norden siajn trupojn. Do hazarde pluraj trupoj venis samtempe al la vojrenkontiĝo, en la mallumo ekster la lumo de la gardfajroj sur la muro. Tuj okazis multe da interpuŝiĝo kaj sakrado, dum ĉiu trupo klopodis veni la unua al la pordo kaj la fino de sia marŝado. Kvankam pelantoj kriis kaj vipadis, interbatiĝo ekestis, kaj kelkaj glavoj estis elingigitaj. Trupo de pezarmitaj *urukoj* el Baraduro impetis en la Dartangan trupon kaj kaŭzis konfuzon.

Kvankam li estis sensobtuzigita pro doloro kaj laceco, Sam vigliĝis, trafis rapide la eblecon, kaj ĵetis sin teren, subentrenante samtempe Frodon. Orkoj stumblis sur ili, mordminace kaj sakre. Malrapide per la manoj kaj genuoj la hobitoj forrampis el la konfuziĝo, ĝis fine ili nerimarkite transfalis la foran randon de la vojo. Tiu havis altan trotuarrandon per kiu trupestroj povis sin gvidi en nigra nokto aŭ nebulo, kaj ĝi estis amasigita je kelkaj futoj super la nivelo de la aperta tereno.

Ili kuŝis senmove dum kelka tempo. Estis tro mallume por serĉi ŝirmejon, se entute tia estis trovebla; sed Sam opiniis, ke ili devus minimume pli malproksimiĝi de la ŝoseoj kaj de la torĉluma atingo.

— Venu, sinjoro Frodo! — li flustris. — Unu plua rampo kaj poste vi povos kuŝi senmove.

Per lasta senespera peno Frodo levis sin per la brakoj kaj baraktis pluen je eble dudek paŝoj. Tiam li falegis en malprofundan kavaĵon, kiu neatendite malfermiĝis antaŭ ili, kaj tie li kuŝis kvazaŭ mortinto.

Ĉapitro 3

LA MONTO DE SORTO

Sam metis sian ĉifitan orkan mantelon sub la kapon de sia mastro kaj kovris sin kaj lin per la griza robo de Lorieno; kaj kiam li faris tion, liaj pensoj direktiĝis al tiu bela lando kaj al la elfoj, kaj li esperis, ke la tolo, kiun ili teksis, eble havos iom da kapablo teni ilin kaŝitaj preterespere en tiu sovaĝejo de timo. Li aŭdis la interbatiĝon kaj kriojn formorti, kiam la trupoj trapasis al Isenbuŝo. Ŝajnis, ke dum la konfuzo kaj la intermiksiĝo de multaj trupoj diversspecaj ilia foresto ne rimarkiĝis, ĉiuokaze ne ĝis tiam.

Sam sorbetis gluton da akvo, sed insistis, ke Frodo trinku, kaj kiam lia mastro refortiĝis iomete, li donis al li tutan oblaton da valorega vojpano kaj devigis lin manĝi ĝin. Poste, tro elĉerpitaj por sperti eĉ iom da timo, ili etendis sin kuŝe. Ili dormis iom en maltrankvilaj periodetoj; ĉar ilia ŝvito frostiĝis sur ili, kaj la malmolaj ŝtonoj mordis ilin, kaj ili frostotremetis. El la nordo tra la Nigra Pordego kaj Cirito Gorgor fluis flustre laŭ la tero maldensa malvarma aero.

Matene venis denove lumo griza, ĉar en la altaj regionoj ankoraŭ blovis la okcidenta vento, sed sube sur la ŝtonoj malantaŭ la bariloj de la Nigra Lando la aero ŝajnis preskaŭ mortinta, malvarmega tamen sufoka. Sam supren rigardis el la kavoj. La tero ĉie ĉirkaŭe estis morna, plata kaj grizbruna. Sur la proksimaj vojoj nenio nun moviĝis; sed Sam timis pri la vaĉaj okuloj sur la muro de Isenbuŝo, je ne pli ol mejlokono norde. Sud-oriente, malproksima kiel malhela elstara ombro, baŭmis la Monto. Fumoj verŝiĝis el ĝi, kaj dum tiuj kiuj leviĝis en la supran aeron forfloris orienten, grandaj ruliĝantaj nuboj descendis sur ĝiaj flankoj kaj disvastiĝis tra la lando. Kelkajn mejlojn nord-oriente la subaj montetoj de la Cindraĵoj staris kiel sombraj grizaj fantomoj, malantaŭ kiuj leviĝis la nebulecaj nordaj altaĵoj kvazaŭ linio da fora nubo apenaŭ pli malhela ol la malaltiĝanta ĉielo.

Sam provis diveni la distancojn kaj decidi kiun vojon ili devus sekvi.

— Tio ŝajnas minimume kvindek mejloj, — li murmuris malfeliĉe, gapante al la minaca monto, — kaj tio daŭros tutan semajnon, ne unu tagon, pro la sanstato de sinjoro Frodo.

Li skuis la kapon, kaj dum li analizis la aferon, kreskis en lia menso nova malhela penso. Neniam tre longe espero mortis en lia brava koro, kaj ĉiam ĝis nun li konservis iom da pensado pri la revena vojo. Sed la malagrabla vero trafis lin finfine: plej bonokaze ilia provianto subtenos ilin ĝis la celo; kaj post kompletigo de la tasko ili finiĝos, solaj, sendomaj, sennutraĵaj meze de terura dezerto. Reveno ne povos esti.

“Do tio estis la tasko, kiun mi sentis farota, kiam mi komencis, — pensis Sam: — helpi sinjoron Frodo ĝis la lasta paŝo kaj poste morti kun li, ĉu? Nu, se tio estas la tasko, mi devas plenumi ĝin. Sed mi tre volonte volus vidi denove Apudakvon, kaj Rozinjon Kotono kaj ties fratojn, kaj la Avulon kaj Kalendulon kaj tiel plu. Ial mi ne povas supozi, ke Gandolfo sendus sinjoron Frodo plenumi tiun ĉi komision, se ne ekzistus ajna espero pri lia iama reveno. Ĉio misiris, kiam li falis en Morio. Se nur tio ne okazus. Li estus ion farinta”.

Sed ĝuste dum la espero mortis en Sam, aŭ ŝajnis morti, tio fariĝis nova forteco. La sendistinga hobita vizaĝo de Sam iĝis severa, preskaŭ minaca, dum la volpovo en li hardiĝis, kaj li sentis en ĉiuj membroj vibron, kvazaŭ li fariĝus ŝtona kaj ŝtala kreaĵo, kiun nek malespero nek lacego de senfinaj dezertaj mejloj kapablus subpremi.

Kun nova sento de respondeco li reveniĝis sian rigardon al la proksima tero, studante la postan moviĝon. Dum la lumo iom plifortiĝis, li vidis surprizate, ke tio, kio ŝajnis defore larĝaj kaj sendistingaj platejoj, estas fakte tute rompitaĵaj kaj malordigitaj. Efektive, la tuta supraĵo de la Gorgorotaj ebenaĵoj estis tramarkita per truegoj, kvazaŭ, dum ĝi ankoraŭ estis dezerto da mola koto, ĝin trafis pluvego da sagoj kaj enormaj ĵetŝtonoj. La plej grandaj el tiuj truegoj estis randitaj per krestoj el rompitaĵaj rokaĵoj, kaj larĝaj fendaĵoj etendiĝis de ili ĉiudirekten. Ĝi estis tereno, sur kiu estus eble rampi de kaŝejo al kaŝejo, nevidate de ĉiuj okuloj krom la plej atentaj: eble almenaŭ por iu kiu estis forta kaj al kiu ne necesis hasto. Por la malsataj kaj la elĉerpitaĵaj, kiuj devis iri longe antaŭ ol forvelkus la vivo, ĝi aspektis fie.

Pripensante ĉion ĉi, Sam reiris al sia mastro. Ne necesis vekti lin. Frodo kuŝis surdorse kun la malfermitaj okuloj, gapante al la nuboplena ĉielo.

— Nu, sinjoro Frodo, — diris Sam, — mi iom ĉirkaŭrigardis kaj

pensadis iom. Nenio troviĝas sur la vojoj, kaj prefere ni foriru, dum tio eblas. Ĉu vi kapablas tion?

— Mi kapablas, — diris Frodo. — Mi devas.

Ankoraŭ unufoje ili ekiris, rampante de kavo al kavo, saltante malantaŭ la malmulto da ŝirmaĵo, kiun ili trovis, sed moviĝante ĉiam oblikve al la subo de la norda montaro. Sed kie ili iris, la plej orienta el la vojoj akompanis ilin, ĝis ĝi deviis premiĝante al la orloj de la montaro, foren al muro da nigra ombro tre antaŭe. Nek homoj nek orkoj nun moviĝis laŭ ĝiaj plataj grizaj etendiĝoj; ĉar la Malhela Mastro jam kompletigis movadon de siaj armeoj, kaj eĉ en la sekureco de la propra regno li celis la sekretecon de la nokto, timante la ventojn de la mondo, kiu turniĝis kontraŭ lin flankenŝirante liajn vualojn, kaj ĝenate de informoj pri kuraĝaj spionoj trapasintaj liajn barilojn.

La hobitoj progresis jam kelkajn lacigajn mejlojn, kiam ili haltis. Frodo ŝajnis preskaŭ elĉerpita. Sam konstatis, ke li ne povos multe pli progresi tiumaniere, rampante, kliniĝante, jen elektante dubindan vojon tre malrapide, jen stumblokore hastante.

— Ni reiru al la vojo, dum lumo restos, sinjoro Frodo, — li diris. — Denove fidu la bonŝancon! Ĝi preskaŭ perfidis nin lastfoje, sed ne tute. Sendevia rapidado dum kelkaj pliaj mejloj, kaj poste ripozo.

Li riskis multe pli ol li sciis; sed Frodo estis tro okupata pri sia ŝarĝo kaj pri sia mensa luktado por debati, kaj preskaŭ tro senespera por zorgi. Ili grimpis sur la ŝoseon kaj plandis antaŭen laŭ la malmola kruela vojo, kiu kondukis al la Malhela Turego mem. Sed ilia bonŝanco eltenis, kaj dum la resto de tiu tago ili renkontis nenion vivan aŭ moviĝantan; kaj kiam noktiĝis, ili malaperis en la mallumon de Mordoro. La tuta lando nun kovadis kvazaŭ pro la proksimiĝo de granda ŝtormo; ĉar la Komandantoj el la Okcidento jam pasis la Krucvojon kaj kreis flamojn sur la mortigaj kampoj de Imlado Morgul.

Tiel daŭris la senespera vojaĝo, dum la Ringo iris suden, kaj la standardoj de la reĝoj rajdis norden. Al la hobitoj ĉiu tago, ĉiu mejlo, pli malagrabis ol la antaŭa, dum ilia forto malpliigis kaj la lando iĝis pli fia. Ili renkontis neniujn malamikojn tage. Nokte kelkfoje, dum ili kaŭris aŭ maltrankvile dormis en iu apudvoja kaŝejo, ili aŭdis kriojn, bruon de multaj piedoj aŭ rapidan trapason de kruisele pelata rajdbesto. Sed multe pli malbona ol ĉiuj tiuj danĝeroj estis la ĉiam proksimiĝanta minaco, kiu premis ilin dum la irado: la terura minaco de la Potenco, kiu atendis, kovante en profunda pensado kaj sendorma

malico malantaŭ la malhela vualo ĉirkaŭ ĝia Trono. Ĉiam pli proksimen ĝi venis, pli nigre baŭmante, kiel la venonta noktomuro ĉe la lasta fino de la mondo.

Venis finfine noktiĝo terura; kaj ĝuste kiam la Komandantoj el la Okcidento proksimiĝis al la fino de la loĝataj landoj, la du vagantoj alvenis horon de kompleta senespero. Kvar tagoj jam pasis, de kiam ili eskapis de la orkoj, sed la tempo kuŝis malantaŭe, kvazaŭ daŭre nigriĝanta sonĝo. Dum la tuto de tiu ĉi lasta tago Frodo nenion parolis, sed marŝis duonklinite, ofte stumblante, kvazaŭ liaj okuloj ne plu vidus la vojon antaŭ liaj piedoj. Sam konjektis, ke el ĉiuj iliaj doloroj la plej malbonan suferis li, la kreskantan pezon de la Ringo, ŝarĝon al la korpo kaj turmenton en la menso. Malkviete Sam notis, kiel la maldekstra mano de lia mastro ofte leviĝis kvazaŭ por malhelpi baton aŭ por ŝirmi liajn retiriĝemajn okulojn kontraŭ iu terura Okulo, kiu klopodis enrigardi ilin. Kaj kelkfoje lia dekstra mano ŝteliris al la brusto, kroĉante, kaj poste malrapide, kiam la volo rehavis mastrecon, ĝi estis reprenita.

Nun kiam revenis la nokta nigro, Frodo sidis kun la kapo inter siaj genuoj kaj la brakoj lace pendantaj ĝis la tero, kie kuŝis liaj manoj feble tikantaj. Sam rigardis lin, ĝis la nokto kovris ilin ambaŭ kaj kaŝis ilin unu de la alia. Li ne plu trovis vortojn direblajn, kaj li sin turnis al la propraj malhelaj pensoj. Kiom koncernis lin, kvankam lacan kaj sub ombro de timo, al li restis ankoraŭ iom da forto. La *lembaso* havis karakterizon, sen kiu ili antaŭ longe estus kuŝiĝintaj por morti. Deziro ĝi ne kontentigis, kaj kelkfoje la menso de Sam pleniĝis je memoroj pri manĝaĵoj kaj je sopiro al simplaj pano kaj viando. Kaj tamen tiu vojpano de la elfoj havis potencon, kiu plifortiĝis, kiam vojaĝantoj dependis sole de ĝi sen miksiĝo kun aliaj manĝaĵoj. Ĝi nutris la volon, kaj ĝi havigis forton por elteni kaj por estri tendenojn kaj membrojn netakseble laŭ homa mezuro. Sed nun nova decido necesis. Ili ne plu povis laŭiri tiun ĉi vojon; ĉar ĝi pluiros orienten en la Ombregon, sed la Monto jam baŭmis dekstre, preskaŭ rekte sude, kaj ili devos turniĝi al ĝi. Tamen daŭre antaŭ ĝi etendiĝis larĝa regiono de fuma, senkreska, cindrokovrita tero.

— Akvon, akvon! — murmuris Sam.

Li jam limigis sin, kaj en lia sekega buŝo lia lango ŝajnis dika kaj ŝvelinta; sed malgraŭ lia tuta zorgado restis al ili nun tre malmulto, eble duono da lia botelo, kaj eble kelkajn tagojn ankoraŭ ili devos pluiri. Jam delonge la tuto estus fortrinkita, se ili ne riskus laŭiri la orkan

vojon. Ĉar je longaj interspacoj sur tiu ŝoseo cisternoj estis konstruitaj por uzado de armeoj urĝe senditaj tra la senakvaj regionoj. En unu el ili Sam trovis iom da postrestanta akvo malfreŝa, kotigita de la orkoj, sed tamen ankoraŭ taŭga en ilia malespera situacio. Tamen tio okazis antaŭ unu tago. Ne estis espero pri pli.

Finfine laciĝita de siaj zorgoj Sam ekdormetis, rezigninte pri la morgaŭo ĝis ties alveno; li povis fari nenion pli. Sonĝo kaj vekigo intermiksiĝis malserene. Li vidis lumojn kiel ĝojaĉajn okulojn, kaj malhelajn rampajn formojn, kaj li aŭdis bruojn kvazaŭ de sovaĝbestoj aŭ terurajn kriojn de torturatoj; kaj li saltleviĝis por konstati la mondon tute malluma kaj ĉirkaŭe nur malplenan nigrecon. Nur unufoje, dum li staris sovaĝe ĉirkaŭgapante, ŝajnis al li, kvankam li jam estis maldorma, ke li povis plu vidi palajn lumojn okulsimilajn; sed baldaŭ tiuj estingiĝis kaj malaperis.

La malaminda nokto pasis malrapide kaj nevolonte. La taglumo kiu sekvis estis malbrila; ĉar ĉi tie pro la proksimiĝo de la Monto la aero ĉiam nebulecis, dum el la Malhela Turego rampis la ombrovualoj, kiujn Saŭrono teksis ĉirkaŭ sin. Frodo estis senmove kuŝanta surdorse. Sam staris apud li, malema paroli, kaj tamen scianta, ke nun la parolo estis lia; li devas funkciigi la mastran volon por plua klopodo. Finfine, kliniĝante kaj karesante la frunton de Frodo, li diris en ties oreilon:

— Vekiĝu, mastro! La tempo rekomenci.

Kvazaŭ viglignite de subita sonoro, Frodo leviĝis rapide, kaj staris rigardante suden; sed kiam liaj okuloj vidis la Monton kaj la dezerton, li denove retiriĝis.

— Mi ne kapblas, Sam, — li diris. — Ĝi estas tia pezego portenda, tia pezego.

Sam sciis antaŭ paroli, ke estos vane, kaj tiaj vortoj eble pli misefikos ol bonfaros, sed pro kompatato li ne povis silenti.

— Do, permesu, ke portu ĝin iomete mi, mastro, — li diris. — Vi scias, ke mi tion farus, kaj feliĉe tiel longe kiel mi havus forton.

Sovaĝa lumo aperis en la okuloj de Frodo.

— Staru for! Ne tuŝu min! — li kriis. — Ĝi estas mia, mi diras. Foriru! — Lia mano vagis al la glavtenilo. Sed poste lia voĉo rapide ŝanĝiĝis kaj li diris triste: — Ne, ne, Sam. Sed vi devas kompreni. Ĝi estas mia ŝarĝo, kaj neniu alia povas porti ĝin. Estas jam tro malfrue, kara Sam. Vi ne povos plu helpi min tiumaniere. Mi estas jam preskaŭ

sub ĝia potenco. Mi ne povas rezigni pri ĝi, kaj se vi provus preni ĝin, mi freneziĝus.

— Mi komprenas, — Sam kapjesis. — Sed mi pripensis, sinjoro Frodo, ke ekzistas aliaj aferoj, sen kiuj ni ne suferus. Kial ne malpezigi iom la ŝarĝon? Ni iru nun tien tiel sendevie, kiel ni povos. — Li indikis la Monton. — Ne valoras kunpreni ion, kion ni certe ne bezonos.

Frodo denove rigardis al la Monto.

— Ne, — li diris, — ne multon ni bezonos sur tiu vojo. Kaj ĉe la fino nenion.

Levinte sian orkan ŝildon li forĵetis ĝin kaj poste sian kaskon. Demetinte la grizan mantelon li malligis la pezan zonon kaj lasis ĝin fali al la tero, kaj kun ĝi la eningan glavon. La ĉifonojn de la nigra mantelo li forŝiris kaj disĵetis.

— Jen, mi ne plu estu orko, — li kriis, — kaj neniun armilon mi portos, ĉu bonan ĉu misan. Oni kaptu min, se tiel estos!

Sam faris same kaj flankenmetis sian orkan ekipaĵon, kaj li eligis ĉiujn aĵojn el sia tornistro. Ial ĉiu el ili iĝis al li kara, se nur pro tio, ke li portis ilin tiom pene tiom longe. Plej malfacile estis formeti lian kuirilaron. Larmoj aperis en liaj okuloj pro la penso pri forĵeto.

— Ĉu vi memoras tiun pecon da kuniklo, sinjoro Frodo? Kaj nian lokon sub la varma teramaso en la lando de komandanto Faramiro, dum la tago, kiam mi vidis olifonton?

— Ne, bedaŭrinde ne, Sam, — diris Frodo. — Almenaŭ, mi scias, ke okazis tiaj aferoj, sed mi ne povas vidi ilin. Neniu gusto manĝaĵa, sento pri akvo, bruo de vento, memoro pri arbo aŭ herbo aŭ floro, imago pri luno aŭ stelo restas al mi. Mi estas nuda en la mallumo, Sam, kaj neniuj vualo estas inter mi kaj la rado de fajro. Mi komencas vidi tiun per miaj vekigantaj okuloj, kaj ĉio alia forvelkas.

Sam aliris kaj kisis lian manon.

— Do ju pli baldaŭ ni liberiĝos de ĝi, des pli baldaŭ ni ripozos, — li diris heziteme, trovinte neniujn preferindajn vortojn por diri. — Parolado nenion riparos, — li murmuris al si, dum li kunmetis ĉion, kion li elektis forĵeti. Li ne volis lasi ilin kuŝantaj malkaŝe en la sovaĝejo videblaj de ajnaj okuloj. — Fetorulo akiris tiun orkan ĉemizon, ŝajne, kaj li ne aldonu al tio glavon. Liaj manoj sufiĉe misfaras kiam malplenaj. Kaj li ne okupiĝu pri miaj kuiriloj!

Dirinte tion, li forportis la tutan ekipaĵon al unu el la gapaj fend-aĵoj, kiuj trastrekis la regionon, kaj enĵetis ilin. La klakado de liaj amataj kuiriloj, falantaj en la mallumon, similis al lia koro

mortsonoron. Li revenis al Frodo, kaj tiam el la elfa ŝnuro li tranĉis mallongan pecon por zoni sian mastron kaj ligi la grizan mantelon firme ĉirkaŭ ties talion. La ceteron li zorge volvis kaj remetis en sian tornistron. Krom tiu li retenis nur la restaĵon de ilia vojpano, akvobotelson, kaj Pikilon plu pendantan ĉe lia zono, kaj la flakoneton de Galadriela forkaŝitan en poŝo de sia tuniko proksime al sia brusto, kaj la skatoleton, kiun ŝi donis al li por li mem.

Nun finfine ili turnis siajn vizaĝojn al la Monto kaj ekiris, ne plu pensante pri kaŝiĝo, celante sian lacecon kaj malfortiĝantajn volojn nur al la tasko iri antaŭen. En la malhelo de ĝia morna tago, malmultaj kreitoj eĉ en tiu lando atentema povus ekvidi ilin, krom de tre proksime. El ĉiuj sklavoĵoj de la Malhela Mastro, nur la nazguloj povus averti lin pri la danĝero, kiu rampis eta sed netimigebla en la kernon mem de lia gardata regno. Sed la nazguloj kaj ties nigraj flugiloj estis for pro alia komisiio: ili estis kuniĝintaj en foro, sekvante la marŝadon de la Komandantoj el la Okcidento, kaj tien la pensado de la Malhela Turego estis turnita.

Tiutage ŝajnis al Sam, ke lia mastro trovis ian novan forton, pli ol povus klarigi la malgranda malpeziĝo de la ŝarĝo, kiun li devis porti. En la komenco ili iris pli foren kaj pli rapide, ol ili anticipe esperis. La tereno estis malglata kaj malfavora, kaj tamen ili multe progresis, kaj ĉiam la Monto proksimiĝis. Sed dum la tago pasis, kaj nur tro baldaŭ la malhela lumo ekforvelkis, Frodo denove kliniĝis kaj ŝanceliĝis, kvazaŭ la renovigita peno disipis lian restantan forton.

Ĉe ilia lasta halto li sinkis teren kaj diris:

— Mi soifas, Sam, — kaj ne plu parolis.

Sam donis al li buŝplendon da akvo; restis nur ankoraŭ unu buŝpleno. Li mem detenis sin; kaj kiam la nokto de Mordoro denove enfermis ilin, tra ĉiuj liaj pensoj venis memoro pri akvo; kaj ĉiu roĵo aŭ rivereto aŭ fonto iam ajn de li viditaj, sub verdaj salikombroj aŭ briletantaj en la suno, dancis kaj ondetis turmente al li malantaŭ la blindo de liaj okuloj. Li sentis la malvarmetan koton sur la piedfingroj, dum li vadis en la lageto ĉe Apudakvo kun Ĝoja Kotono kaj Tomĉjo kaj Nibĉjo kaj ilia fratino Rozinjo.

— Sed tio estis antaŭ jaroj, — li suspiris, — kaj tre malproksime. La vojo returnen, se tia ekzistas, preterpasas la Monton.

Li ne povis dormi kaj li interne debatis kun si.

— Nu vidu, ni faris pli bone ol vi esperis, — li diris bravule. —

Bona komenco ĉiukaze. Mi kalkulas, ke ni trairis duonon de la distanco antaŭ ol halti. Ankoraŭ unu tago sufiĉos.

Kaj tiam li paŭzis.

— Ne estu stultulo, Sam Vato, — venis responde lia propra voĉo. — Li ne trairoj simile ankoraŭ unu tagon, se li entute moviĝos. Kaj vi ne povos same daŭrigi, donante al li la tutan akvon kaj plejparton el la manĝaĵo.

— Mi tamen povos daŭrigi sufiĉe longe, kaj tion mi faros.

— Kien?

— Al la Monto, kompreneble.

— Sed kio poste, Sam Vato, kio poste? Kiam vi alvenos tien, kion vi faros? Li ne kapablos mem fari ion.

Konsternite Sam konstatis, ke li ne scias respondon al tio. Li tute ne havis klaran koncepton. Frodo ne multe parolis al li pri sia komisio, kaj Sam nur sciis malprecize, ke la Ringo estas iel enmetota en la fajron.

— La Fendaĵoj de l' Destino, — li murmuris, kiam la malnova nomo leviĝis en lian menson. — Nu, se la mastro scias, kie trovi ilin, mi ne scias.

— Jen vi havas! — venis la respondo. — Ĉio tute senutilas. Li mem diris tion. La stultulo estas vi, kiu daŭre esperas kaj penadas. Vi povus kuŝiĝi kaj endormiĝi kune jam antaŭ tagoj, se vi ne estus tiom obstina. Sed vi mortos ĉiukaze same, aŭ pli malbone. Egale vi povas kuŝiĝi nun kaj rezigni. Vi neniam atingos la supron ĉiukaze.

— Mi atingos ĝin, eĉ se mi lasos malantaŭe ĉion krom miaj ostoj, — diris Sam. — Kaj mi portos sinjoron Frodo supren, eĉ se tio rompos mian dorson kaj mian koron. Do ĉesigu la diskutadon!

Sam sentis skuiĝon de la tero sube, kaj li aŭdis aŭ sentis profundan foran bruon kvazaŭ de tondro enkarcerigita sub la tero. Mallonga ruĝa flamo ekflagris sub la nuboj kaj formortis. La Monto dormis tro maltrankvile.

La lasta stadio de ilia vojaĝo al Orodruino venis, kaj ĝi estis turmento pli severa, ol Sam iam ajn pensis toleri. Li estis doloranta, kaj tiel soifega, ke li ne plu povis gluti eĉ buŝplenon da manĝaĵo. La mal-lumo daŭris, ne nur pro la fumoj de la Monto: ŝajnis, ke ŝtormo proksimiĝas, kaj fore en la sud-oriento vidiĝis ekbrilo de fulmoj sub la nigra ĉielo. Plej malbone, la aero plenplenis je fetoroj; spirado estis doloriga kaj malfacila, kaj kapturigo trafis ilin, tiel, ke ili ŝanceliĝis

kaj ofte falis. Kaj tamen iliaj volfortoj ne konsentis cedi, kaj ili baraktis antaŭen.

La Monto rampis ĉiam pli proksimen, ĝis, se ili levis la pezajn kapojn, ĝi plenigis la tutan vidkampon, baŭmante enorme antaŭ ili: grandega amaso da cindroj kaj skorio kaj bruligitaj ŝtonoj, el kiuj krutflanka konuso levigis en la nubojn. Antaŭ ol finiĝis la taglonga krepusko kaj revenis nokto vera, ili rampis kaj stumblis ĝis ties subo mem.

Kun ĝemspiro Frodo ĵetis sin teren. Sam sidiĝis apud li. Surprizite li sentis sin laca, tamen pli malpeza, kaj lia kapo ŝajnis denove klara. Neniu pliaj diskutoj perturbis lian menson. Li konis ĉiujn argumentojn pri malespero kaj rifuzis aŭskulti ilin. Lia volo estis determinita, kaj nur morto rompus ĝin. Li sentis ne plu deziron aŭ bezonon dormi, sed prefere atentemon. Li sciis, ke ĉiuj hazardoj kaj danĝeroj jam kuniĝas al pinto: la posta tago estos tago destina, la tago de fina strebo aŭ katastrofo, la lasta spirego.

Sed kiam ĝi venos? La nokto ŝajnis senfina kaj ekstertempa; minuto post minuto falis morta, kaj adiciis al neniuj pasa horo, alportante neniun ŝanĝiĝon. Sam komencis scivoli, ĉu dua mallumo jam komenciĝis kaj neniuj tago iam reaperos. Finfine li palpserĉis la manon de Frodo. Tiu estis malvarma kaj tremetanta. Lia mastro frostotremis.

— Mi ja ne devis postlasi mian lankovrilon, — murmuris Sam; kaj kuŝiĝinte li provis konsoli Frodon per siaj brakoj kaj korpo. Tiam dormo okupis lin, kaj la malhela lumo de ilia lasta serĉtago trovis ilin flank-apud-flankaj. La vento malfortiĝis dum la antaŭa tago deviante el la okcidento, kaj nun ĝi venis el la nordo kaj ekplifortiĝis; kaj malrapide la lumo de la nevidata suno filtriĝis suben en la ombrojn, kie kuŝis la hobitoj.

— Jam temp' está! Jam ek al la lasta peno! — diris Sam, barakte stariĝante. Li klinis sin al Frodo, vekante lin delikate. Frodo ĝemis; sed per granda vola klopodo li stariĝis ŝanceliĝe kaj poste falis denove surgenuen. Li levis malfacile siajn okulojn al la malbelaj deklivoj de la Monto de Sorto turantaj super li, kaj poste ekgrimpis kompatoveke antaŭen per la manoj.

Sam rigardis lin kaj ploris en sia koro, sed venis neniuj larmoj al liaj sekaj kaj brulsentaj okuloj.

— Mi diris, ke mi portos lin eĉ se tio rompos mian dorson, — li murmuris, — kaj tion mi ja faros!

— Venu, sinjoro Frodo! — li kriis. — Mi ne povas porti ĝin anstataŭ vi, sed mi povas porti vin kaj samtempe ĝin. Do stariĝu! Venu, sinjoro Frodo kara! Sam rajdigos vin. Nur diru al li, kien iri, kaj li iros.

Dum Frodo kroĉiĝis al lia dorso kun la brakoj malstrikte ĉirkaŭ lia kolo kaj la kruroj firme tenitaj sub liaj brakoj, Sam ŝancele stariĝis; kaj mirigite trovis la ŝarĝon malpeza. Li antaŭtimis, ke li apenaŭ sufiĉe fortos por levi sian mastron, kaj krom tio li atendis dividi la teruran stumbligan pezon de la malbenita Ringo. Sed tiel ne estis. Ĉu pro tio, ke Frodo estis tiel trivita per siaj longaj doloroj, tranĉila vundo, venena pikiĝo, kaj malĝojo, timo kaj senhejma vagado, aŭ pro tio, ke al li estis donita iu donaco de lasta forto, Sam levis Frodon ne pli malfacile ol se li portus iun hobitan infanon surdorse dum ludado sur razenoj aŭ grenkampoj en la Provinco. Li faris profundan spiron kaj ekiris.

Ili alvenis la subon de la Monto ĉe ties norda flanko, kaj iomete okcidente; tie ĝiaj longaj grizaj deklivoj, kvankam rompitaĵoj, ne estis krutaj. Frodo ne parolis, kaj tial Sam klopodis antaŭen laŭ sia kapablo, sen alia gvidado ol la obstino grimpi laŭeble plej alten antaŭ ol lia forto elĉerpiĝos kaj lia volo cedos. Antaŭen li penis, supren kaj pli supren, turniĝante tien kaj tien por malpliigi la deklivon, ofte stumblante antaŭen, kaj fine rampante kiel heliko kun peza ŝarĝo sur la dorso. Kiam lia volo ne povis peli lin pluen, kaj liaj membroj rezignis, li haltis kaj milde kuŝiĝis sian mastron.

Frodo malfermis siajn okulojn kaj profunde enspiris. Estis pli facile spiri ĉi tie super la fetoroj, kiuj volviĝis kaj drivis tie sube.

— Dankon, Sam, — li diris per rompita flustro. — Kiom longas la vojo ankoraŭ?

— Mi ne scias, — diris Sam, — ĉar mi ne scias, kien ni iras.

Li retrorigardis, kaj poste li rigardis supren; mirigis lin, kiom distance lia lasta klopodo trairigis lin. La Monto, starante minaca kaj izolita, aspektis pli alta ol ĝi efektive estis. Sam vidis nun, ke ĝi estas malpli impona ol la altaj trapasejoj de Efelo Duad, kiujn li kaj Frodo pli frue grimpis. La konfuzitaj kaj rompitaĵoj ŝultroj de ĝia granda fundamento levigis eble tri mil futojn super la ebenaĵo, kaj super ili duone pli alten baŭmis ĝia alta centra konuso, kiel vasta lupolsekigejo aŭ kameno ĉapelita per zigzaga kratero. Sed Sam estis jam pli ol duonvoje supre sur la fundamento, kaj la ebenaĵo de Gorgoroto estis malklara sub li, volvita en fumo kaj ombro. Rigardante supren li eligus krion, se tion permesus al li la sekega gorĝo; ĉar inter la malebenaj

ĝiboj kaj ŝultroj super li, li klare vidis padon aŭ vojon. Tiu leviĝis kvazaŭ suprenira zono el la okcidento kaj serpentece ĉirkaŭmis la Monton, ĝis antaŭ ol forpasi el la vidkampo ĝi atingis la subon de la konuso ĉe ties orienta flanko.

Sam ne povis vidi la irejon tuj super li, kie ĝi plej malaltis, ĉar kruta deklivo supreniĝis de lia starloko; sed li konjektis, ke se ili povus barakti iomete pli supren, ili trafus tiun padon. Ekbrilo de espero revenis al li. Eble ili tamen venkos la Monton.

— Nu, estas kvazaŭ oni intence metis la vojon ĉi tie! — li diris al si.
— Se ĝi ne estus tie, mi devus deklari min venkita ĉe la fino.

La pado ne estis metita por la celoj de Sam. Li tion ne sciis, sed li rigardis la Saŭronan Vojon de Baraduro al Samato Naŭr, la Ĉambroj de Fajro. Tra la enorma okcidenta pordo de la Malhela Turego ĝi transiris profundan abismon per granda ponto el fero, kaj poste pasinte sur la ebenaĵon ĝi pluiris tra leŭgo inter du fumantaj fendegaĵoj, kaj tiel atingis longan deklivan vojon, kiu kondukis supren al la orienta flanko de la Monto. De tie, serpentumante kaj ĉirkaŭante ĝian tutan larĝan mezuron de la sudo al la nordo, ĝi grimpis fine, alte sur la supra konuso, sed ankoraŭ malproksime de la fetoranta kresto, al malhela enirejo, kiu retrorigardis orienten rekte al la Fenestro de la Okulo en la ombrumita fortikaĵo de Saŭrono. Ofte barita aŭ detruita per la tumultoj de la Montaj fornoj, ĉiam tiu pado estis riparata kaj reliberigata per la laboro de sennombraj orkoj.

Sam profunde enspiris. Ekzistis pado, sed kiel li supreniros la deklivon al ĝi, li ne sciis. Unue li devos ripozigi sian doloran dorson. Li kuŝis plate apud Frodo dum kelka tempo. Neniu el ambaŭ parolis. Malrapide la lumo plifortiĝis. Subite sento de urĝeco, kiun li ne komprenis, venis al Sam. Estis preskaŭ, kvazaŭ li estus vokita: “Nun, nun, aŭ estos tro malfrue!” Li pretiĝis sin kaj stariĝis. Ŝajnis, ke ankaŭ Frodo sentis la alvokon. Li baraktis surgenuen.

— Mi rampas, Sam, — li anhelis.

Do futon post futo, kvazaŭ grizaj insektetoj, ili rampis supren sur la deklivo. Ili atingis la padon kaj trovis, ke ĝi estas larĝa, pavimita per rompitaĵoj ŝtonruboj kaj pistitaj cindroj. Frodo grimpis sur ĝin, kaj poste, kvazaŭ motivita de iu devigo, li turniĝis malrapide por fronti al la oriento. Fore pendis la ombroj de Saŭrono; sed ŝiritaj de iu ekblovo de vento el la mondo, aŭ eble movitaj de iu granda interna malkvieto, la nubmantelo kirligis kaj por momento tiriĝis flanken, kaj tiam li vidis, leviĝantajn nigre, pli nigre kaj pli malhele ol la vastaj ombroj

inter kiuj ĝi staris, la kruelajn pinaklojn kaj feran kreston de la plej supera turo de Baraduro. Nur dum momento ĝi vidiĝis, sed kvazaŭ tra iu fenestrego nemezureble alta pikiĝis norden ruĝa flamo, la flagro de la trapika Okulo. Poste la ombroj ferliĝis denove, kaj la terura vidaĵo malaperis. La Okulo ne estis turnita al ili: ĝi rigardis norden, kie la Komandantoj el la Okcidento staris defie, kaj tien turniĝis nun ĝia tuta malico, kiam la Potenco moviĝis por efektiviĝi sian mortigan baton; sed Frodo pro tiu terura ekvido falis kvazaŭ mortvundito. Lia mano serĉis la ĉenon ĉirkaŭ la kolo.

Sam genuiĝis apud li. Mallaŭte, preskaŭ neaŭdeble, li aŭskultis la flustron de Frodo:

— Helpu min, Sam! Helpu min, Sam! Tenu mian manon! Mi ne povas malhelpi ĝin.

Sam prenis la manojn de sia mastro kaj kunmetis ilin polm-alpolme, kaj kisis ilin; kaj poste li tenis ilin kompateme inter la siaj. Subite venis al li la penso: “Li rimarkis nin! Estas finite, aŭ baldaŭ estos. Jen, Sam Vato, jen estas la fina fino”.

Denove li levis Frodon kaj subentiris liajn manojn sur la propran bruston, lasante pendi la mastrajn krurojn. Poste li klinis la kapon kaj penis plu laŭ la suprenira vojo. La vojo ne estis tiel facila kiel unuavide ŝajnis. Bonsance la fajroj, kiuj elverŝiĝis dum la grandaj perturbiĝoj, kiam Sam staris sur Cirito Ungol, subenfluis plejparte sur la suda kaj okcidenta deklivoj, kaj la ĉi-flanka vojo ne estis barita. Tamen ĝi estis multloke diseriginta aŭ ĝin transis gapaj ŝiraĵoj. Rampinte orienten dum kelka tempo, ĝi retrokurbiĝis akrangule kaj kelktempe celis okcidenten. Tie ĉe la kurbiĝo ĝi estis profunde tranĉita tra amaso da malnovaj veterumitaj ŝtonoj, antaŭlonge vomitaj el la fornoj de la Monto. Anhelante pro sia ŝarĝo, Sam ĉirkaŭiris la kurbon; kaj ĝuste kiam li tion faris, li okulangule ekvidis ion falantan de sur la ŝtonamaso, kvazaŭ peceto de nigra ŝtono defalis, dum li pasis.

Subite pezaĵo frapis lin, kaj li falegis antaŭen, ŝirante la dorsojn de la manoj, kiuj plu tenis tiujn de lia mastro. Kaj li eksciis, kio okazis, ĉar kuŝante li aŭdis super si voĉon malamatan.

— Missa masstro! — ĝi siblis. — Missa masstro trompas nin; trompas Smeagolon, *golum*. Li devass ne iri tiuvoje. Li devass ne damaĝi la Trezoron. Donu ĝin al Smeagolo, jesss, donu ĝin al ni! Donu ĝin al ni!

Per forta puŝo Sam stariĝis. Tuj li elingigis sian glavon; sed li povis fari nenion. Golumo kaj Frodo estis kunkroĉitaj. Golumo ŝiradis lian

mastron, klopodante atingi la ĉenon kaj la Ringon. Probable nenio alia ol tio povus stimuli la velkantan ardon en la koro kaj volo de Frodo: atako, provo perforte senigi lin de lia trezoro. Li kontraŭluktis laŭ subita furiozo, kiu mirigis Samon kaj ankaŭ Golumon. Eĉ tiel la afero eble rezultiĝus tute alie, se Golumo mem estus neŝanĝita; sed la teruraj vojoj, kiujn li sola kaj malsata kaj senakva tramarŝis, pelite de konsumata deziro kaj timego, lasis sur li dolorajn postsignojn. Li estis kreito magra, malsatigita, marasma, tute osteca, kun streĉita flaveca haŭto. Furioza lumo flamis en liaj okuloj, sed lian malicon ne plu egaligis lia malnova tenega forto. Frodo forĵetis lin kaj leviĝis tremetante.

— Suben, suben! — li anhelis, kroĉante sian manon al sia brusto, tiel ke sub sia ledĉemiza kovraĵo li kaptis la Ringon. — Suben, rampulo, kaj for el mia vojo! Via tempo finiĝis. Vi jam ne povas min perfidi aŭ mortigi.

Tiam subite, kiel antaŭe sub la randoj de Emin Muilo, Sam vidis tiujn du rivalojn laŭ alia vizio. Kaŭra figuro, apenaŭ pli ol ombro de vivantaĵo, kreito nun tute ruinigita kaj venkita, tamen plenigita de hida avidego kaj kolero; sed antaŭ tiu staris severa, jam netuŝebla de kompatato, figuro blankvestita, sed ĉe la brusto ĝi tenis radon fajran. El la fajro parolis komanda voĉo:

— Foriru, kaj ne plu ĝenu min! Se vi iam ajn tuŝos min denove, vi mem estos ĵetita en la Fajron de Destino.

La kaŭra figuro retromoviĝis kun teruro en la palpebrumantaj okuloj, kaj tamen samtempe kun nesatigebla deziro.

Poste la vizio pasis, kaj Sam vidis Frodon staranta kun mano ĉebruste; lia spiro venis anhelege, kaj Golumo estis antaŭ liaj piedoj, apogite sur siaj genuoj kaj kun la manoj larĝe dismetitaj sur la tero.

— Gardu vin! — kriis Sam. — Li alsaltos! — Li paŝis antaŭen, svingante sian glavon. — Rapide, mastro! Iru! Iru! La tempo urĝas. Lin mi pritraktos. Iru jam!

Frodo rigardis lin kvazaŭ iun tre malproksiman.

— Jes, mi devas plui. Adiaŭ, Sam! Jen fine la fino. Sur la Monto de Sorto la sorto plenumiĝos. Adiaŭ! — Li turnis sin kaj pluiris, marŝante malrapide sed senkliniĝe, laŭ la suprenira pado.

— Nun! — diris Sam. — Finfine mi povas pritrakti vin! — Li saltis antaŭen kun elingigita glavo preta por batalo. Sed Golumo ne saltis. Li kuŝis plata sur la tero kaj ploretis.

— Ne mortigu nin, — li plorĝemis. — Ne damaĝu nin per fia kruela

ŝtalo! Lasu nin vivi, jesss, vivi nur iomete pli longe. Perditaj, perditaj! Ni estas perditaj. Kaj kiam la Trezoro foriros, ni mortos, jesss, mortos en la polvon. — Li trarastis la cindrojn de la pado per siaj longaj senkarnaj fingroj. — Jess, polvo! — Li siblis.

La mano de Sam hezitis. Lia menso estis arde kolera pro memoro pri la misado. Estus juste mortigi tiun perfideman murdeman kreaĵon, juste kaj multfoje meritite; kaj tio ankaŭ ŝajnis la sola sekura faro. Sed profunde en lia koro io bremsis lin: li ne kapablis bati tiun kreaĵon kuŝantan en la polvo, forlasitan, ruiniĝintan, komplete mizeran. Li mem, kvankam nur mallonge, iam portis la Ringon, kaj nun li mallkare divenis la agonion en la Golumaj ŝrumpintaj menso kaj korpo, sklavigitaj de tiu Ringo, senkapablaj iam ajn denove en la vivo trovi trankvilon aŭ malŝarĝiĝon. Sed Sam malhavis vortojn por esprimi sian senton.

— Ho, estu malbenita, fetorulo! — li diris. — Foriru! For! Mi ne fidas vin, eĉ tiom fore, kiom mi kapablas piedbati vin; sed foriru. Aŭ mi ja damaĝos vin, jes, per fia kruela ŝtalo.

Golumo ekstaris kvarpiede kaj retroiris kelkajn paŝojn, kaj poste li turnis sin, kaj dum Sam celis al li piedbaton li fuĝis laŭ la pado. Sam ne plu atentis lin. Li subite rememoris pri sia mastro. Li suprenrigardis laŭ la pado kaj ne povis vidi lin. Kiel eble plej rapide li plandis laŭ la vojo supren. Se li retrorigardus, li eble vidus, ke ne malproksime sube Golumo returnis sin denove, kaj poste kun sovaĝa lumo de frenezo en la okuloj, rapide tamen singarde, plurampis malantaŭe, kiel ŝtelira ombro inter la ŝtonoj.

La pado plu iris supren. Baldaŭ ĝi denove kurbiĝis, kaj laŭ la lasta direktiĝo orienten, ĝi pasis tra fendaĵo laŭ la faco de l' konuso kaj alvenis la malhelan pordon en la Monta flanko, la pordon de Samato Naŭr. Jam fore la suno, leviginta en la sudo, breĉante la fumojn kaj nebuleton, brulis misaŭgure, malbrila ŝmirita disko ruĝa; sed la tuta Mordoro kuŝis ĉirkaŭ la Monto kiel lando morta, silenta, enfaldita per ombro, atendanta iun teruran baton.

Sam alvenis la gapan enirejon kaj enrigardis. Estis malhele kaj varmege, kaj profunda bruado skuis la aeron.

— Frodo! Mastro! — li vokis. Venis neniu respondo. Momente li staris, dum lia koro batis pro konsternaj timoj, kaj poste li enplonĝis. Ombro sekvis lin.

Komence li povis vidi nenion. Pro la granda bezono li elprenis

ankoraŭfoje la flakoneton de Galadriela, sed ĝi estis pala kaj malvarma en lia trema mano kaj ĵetis neniom da lumo en tiun sufokan malhelon. Li venis al la kerno de la regno de Saŭrono kaj al la forĝejoj de lia antikva potenco, plej granda en Mez-Tero. Ĉiuj ceteraj potencoj estis ĉi tie superitaj. Timeme li faris kelkajn malcertajn paŝojn en la mallumo, kaj tiam tute subite vidiĝis ruĝa flagro, kiu saltis supren kaj frapis la altan nigran plafonon. Tiam Sam konstatis, ke li estas en longa kaverno aŭ tunelo, kiu boris la fumantan konuson de la Monto. Sed nur mallonge antaŭe ĝia planko kaj la muroj ambaŭflankaj estis dispartigitaj de granda fendaĵo, el kiu venis la ruĝa flagro, jen saltanta supren, jen formortanta en mallumon; kaj la tutan tempon forsube aŭdiĝis rumoro kaj tumulto kvazaŭ maŝinegoj pulsus kaj laborus.

Denove la lumo saltis supren, kaj ĉe la rando de la abismo, ĉe la Fendaĵo de Destino, staris Frodo, nigra antaŭ la brilo, streĉita, malkliniĝa, sed senmova kvazaŭ ŝtonigita.

— Mastro! — kriis Sam.

Frodo moviĝis kaj parolis per klara voĉo, efektive per voĉo pli klara kaj pli forta ol Sam iam ajn aŭdis lin uzi, kaj ĝi soris super la pulsado kaj perturbiĝo de Monto de Sorto, sonorante ĉe la plafono kaj muroj.

— Mi venis, — li diris. — Sed nun mi ne elektas fari tion, kion mi venis por fari. Tion ĉi mi ne faros. La Ringo estas mia! — Kaj subite, kiam li surfingrigis ĝin, li malaperis de la vido de Sam. Sam ĝemspiris, sed li ne havis eblecon ekkrii, ĉar tiumomente okazis multaj aferoj.

Io frapegis la dorson de Sam, liaj kruroj estis forbatitaj de sub li, kaj li estis ĵetita flanken, frapante sian kapon al la ŝtona planko, kiam malhela figuro transsaltis lin. Li kuŝis senmove, kaj momente ĉio nigriĝis al li.

Kaj tre malproksime, kiam Frodo surfingrigis la Ringon kaj preendis ĝin por si en Samato Naŭr, la kerno mem de lia regno, la Potenco en Baraduro estis skuita, kaj la Turego tremis de la fundamento ĝis la fera pinto. La Malhela Mastro subite konsciiĝis pri li, kaj lia Okulo breĉanta ĉiujn ombrojn, rigardis trans la ebenaĵon al la pordo kiun li kreis; kaj la grandeco de la propra stulteco riveliĝis al li en fulma ekbrilo, kaj ĉiuj planoj de liaj malamikoj estis finfine malkaŝitaj. Lia kolerego ekfajris en konsumata flamo, sed lia timo leviĝis kvazaŭ vasta nigra fumo por sufoki lin. Ĉar li konstatis sian mortdanĝeron kaj la fadenon, sur kiu nun pendis lia sorto.

El ĉiuj liaj politikoj kaj araneaĵoj de timo kaj perfido, el ĉiuj liaj strategioj kaj militoj lia menso skuiĝis liberiĝe; kaj tra lia tuta regno

kuris tremo, liaj sklavoj kuntiriĝis, kaj liaj armeoj haltis, kaj liaj komandantoj estis subite senstirilaj, senigitaj je volo, hezitudis kaj malesperis, ĉar ili estis forgesitaj. La menso kaj intenco de la Potenco, kiu regis ilin, estis jam direktitaj tute plenforte al la Monto. Pro lia alvoko, girinte kun ŝira kriĉo, en lasta fervorega vetkuro flugis pli rapide ol la ventoj la nazguloj, la ringofantomoj, kaj kun ŝtormo de flugiloj ili impetegis suden al Monto de Sorto.

Sam stariĝis. Li estis konfuzita, kaj sango fluanta de lia kapo, gutis en liajn okulojn. Li palpiris antaŭen, kaj poste li vidis ion strangan kaj teruran. Golumo sur la rando de l' abismo luktis frenezece kontraŭ malamiko nevidebla. Tien-reen li balanciĝis, jen tiel proksima al la rando, ke li preskaŭ enfalis, jen treniĝante retro, falante kaj restariĝante. Kaj la tutan tempon li siblis, sed diris nenium vorton.

La fajroj sube vekigis kolere, la ruĝa lumo ekflamis, kaj la tutan kavernon plenigis forta brilo kaj granda varmo. Subite Sam vidis la longajn manojn de Golumo supreniri al lia buŝo; liaj blankaj dentegoj brilis kaj poste kunfermiĝis morde. Frodo ekkriis, kaj jen li aperis, falinta surgenuen ĉe la rando de l' abismo. Sed Golumo, dancante frenezule, tenis alte la Ringon kun fingro ankoraŭ traŝovita interne de ĝia cirklo. Ĝi brilis nun kvazaŭ vere ĝi estus farita el viva fajro.

— Trezoro, trezoro, trezoro! — Golumo kriis. — Mia Trezoro! Ho mia Trezoro! — Kaj tion dirinte, ĝuste kiam liaj okuloj estis levitaj por triumfi pri la predo, li mispaŝis, kliniĝis, balanciĝis momente ĉe la rando, kaj poste li falis kriĉante. El la profundaĵo venis lia lasta lamento "Trezoro", kaj li estis for.

Sekvis rumoro kaj granda brukonfuziĝo. Fajroj saltis supren kaj lekis la plafonon. La pulsado iĝis granda tumulto, kaj la Monto skuiĝis. Sam kuris al Frodo, levis lin kaj portis lin eksteren ĝis la pordo. Kaj tie sur la malhela sojlo de Samato Naŭr, alte super la ebenajĵoj de Mordoro, tia mirego kaj teruro trafis lin, ke li, forgesinte ĉion alian, senmove staris kaj gapis kvazaŭ ŝtoniĝinto.

Mallonge li vidis kirliĝantan nubaron, kaj en ties mezo turojn kaj remparojn, montece altajn, fonditajn sur grandioza montotrono super nemezureblaj putoj; grandajn kortojn kaj karcerojn, senokulajn prizonojn klife apikajn, kaj gapajn pordojn el ŝtalo kaj diamantoj: kaj poste ĉio forpasis. Turegoj falis kaj montoj glitis suben; muroj diseriĝis kaj fandiĝis falegante; vastaj fumspiraloj kaj sputantaj vaporoj ondiĝis supren, supren, ĝis ili falis kiel ondo inundanta, kaj ties

sovaĝa kresto kurbiĝis kaj falis ŝaŭmante sur la teron. Kaj poste finfine tra la mejloj intere venis murmurego, fortiĝante al surdigaj krako kaj muĝo; la tero skuiĝis, la ebenaĵo supren puŝiĝis kaj fendiĝis, kaj Orodruino ŝanceliĝis. Fajro ruktis el ĝia fendita supraĵo. La ĉielo ektondris bruligate de fulmoj. Kiel draŝantaj vipoj falis torento da nigra pluvo. Kaj en la kernon de la ŝtormo, kun kriĉo, kiu superis ĉiujn aliajn bruojn, disŝirante la nubojn, venis la nazguloj, pafiĝante kiel flamsagoj, sed kaptitaj per fajra ruino de montoj kaj ĉielo ili krakis, ŝrumpis kaj malaperis.

— Nu, tio estas la fino, Sam Vato, — diris voĉo apude. Kaj jen estis Frodo, pala kaj elĉerpita, kaj tamen denove si mem; kaj en liaj okuloj nun estis paco, nek vola streĉiteco, nek frenezo, nek ajna timo. Lia ŝarĝo estis forigita. Jen estis la kara mastro el la dolĉaj tagoj de la Provinco.

— Mastro! — ekkriis Sam, kaj falis surgenuen. En tiu tuta ruiniĝo de la mondo, momente li spertis nur ĝojon, grandan ĝojon. La ŝarĝo estis for. Lia mastro estis savita; li estis denove si mem, li estis libera. Kaj tiam Sam ekvidis la vunditan kaj sangantan manon.

— Via kompatinda mano! — li diris. — Kaj mi havas nenion por vindi aŭ komfortigi ĝin. Mi prefere rezignus al li tutan manon el la miaj. Sed li jam foriris ekster revokeblon, foriris por ĉiam.

— Jes, — diris Frodo. — Sed ĉu vi memoras la vortojn de Gandolfo: *Eble eĉ Gohumo havas ankoraŭ ion farotan?* Sen li, Sam, mi ne povus detrui la Ringon. La Komisio estintus vana, eĉ en la fina fino. Do ni pardonu lin! Ĉar la Komisio estas plenumita, kaj nun finiĝis ĉio. Mi ĝojas, ke vi estas kun mi. Ĉi tie, je la fino de ĉio, Sam.

Ĉapitro 4

LA KAMPO DE KORMALENO

Ĉie ĉirkaŭ la montetoj ŝtormis la armeoj de Mordoro. La Komandantoj el la Okcidento ekdronis en amasiĝinta maro. La suno brilis ruĝe, kaj sub laflugiloj de la nazguloj la ombroj de morto falis malhele sur la teron. Aragorno staris sub sia standardo, silenta kaj severa, kvazaŭ perdita en pensoj pri pasintaĵoj aŭ foraĵoj; sed liaj okuloj brilis kiel steloj, kiuj des pli helas, ju pli la nokto profundiĝas. Sur la montetosupro staris Gandolfo, kaj li estis blanka kaj malvarma kaj falis sur lin neniun ombro. La atako de Mordoro alteriĝis ondsimile sur la sieĝataj montetoj, voĉoj muĝis kvazaŭ tajdo inter la vrako kaj klakego de armiloj.

Gandolfo ekmoviĝis, kvazaŭ al liaj okuloj estus liverita ia vizio; kaj li turnis sin, retrorigardante norden, kie la ĉielo estis pala kaj klara. Tiam li levis siajn manojn kaj kriis per forta voĉo sonoranta super la bruego:

— La agloj venas!

Kaj multaj voĉoj respondis kriante:

— La agloj venas! La agloj venas!

La armeoj de Mordoro suprenrigardis kaj scivolis pri la signifo de tiu signo.

Venis Gvajhiro la Ventmastro, kaj ĝia frato Landrovalo, plej elstaraj el ĉiuj agloj de la nordo, plej potencaj el la posteuloj de maljuna Torondoro, kiu konstruis siajn nestejojn sur la nealireblaj montpintoj de la Ĉirkaŭantaj Montoj, kiam junis Mez-Tero. Malantaŭ ili en longaj rapidaj linioj venis ĉiuj iliaj vasaloj el la norda montaro, hastante laŭ plifortiĝanta vento. Rekte suben kontraŭ la nazguloj ili direktiĝis, plonĝante subite el la plialta aero kaj la reblovo de iliaj larĝajflugiloj, kiam ili trapasis, similis uraganon.

Sed la nazguloj turniĝis kaj fuĝis, kaj malaperis en la ombrojn de Mordoro, aŭdinte subitan teruran alvokon el la Malhela Turego; kaj ĝuste tiumomente tremegis ĉiuj armeoj de Mordoro, dubemo kroĉis iliajn korojn, ilia ridado ĉesis, iliaj manoj skuiĝis, kaj iliaj membroj

malrigidiĝis. La Potenco, kiu pelis ilin antaŭen kaj plenigis ilin de malamo kaj furiozo, ŝanceliĝis, ĝia volo estis forigita el ili; kaj nun rigardante en la okulojn de siaj malamikoj, ili vidis lumon mortminacantan kaj ektimis.

Tiam ĉiuj Komandantoj el la Okcidento laŭte kriis, ĉar iliajn korojn plenigis nova espero meze de la mallumo. El la sieĝataj montoj, kavaliroj de Gondoro, rajdistoj de Rohano, dunadanoj el la nordo, dense ordigitaj trupoj, peliĝis kontraŭ siajn ŝanceliĝajn kontraŭulojn, breĉante la premadon per la ŝovado de koleraj lancoj. Sed Gandolfo levis siajn brakojn kaj vokis denove per la klara voĉo:

— Haltu, Batalantoj de l' Okcidento! Haltu atende! Jen estas la horo de l' destino.

Kaj ĝuste dum li parolis, la tero balanciĝis sub iliaj piedoj. Poste, altiĝante rapide, fore super la Turegoj de l' Nigra Pordego, alte super la montoj, granda soranta mallumo saltis en la ĉielon, fajre flagrante. La tero ĝemegis kaj tremis. La Turegoj de la Dentoj balanciĝis, ŝanceliĝis kaj falis; la fortika remparo diseriĝis; la Nigra Pordego ĵetite ruinigis; kaj de fore, jen mallaŭte, jen plifortiĝante, jen suprenirante al la nuboj venis tambura murmurego, muĝo, longa eŝanta ruliĝo de pereiga bruo.

— La regno de Saŭrono estas finita! — diris Gandolfo. — La Ringoportanto plenumis sian Komision.

Kiam la Komandantoj rigardis suden al Mordoro, al ili ŝajnis, ke, nigra antaŭ la nuba mortotuko, leviĝis enorma ombrofiguro, nepenetrebla, fulmkronita, pleniganta la tutan ĉielon. Grandega ĝi baŭmis super la mondo, kaj etendis al ili vastan minacantan manon, teruran sed senfortan: ĉar dum ĝi kliniĝis super ili, trafis ĝin forta vento, kaj ĝi estis tute forblovita, kaj ĝi forpasis; kaj poste ĉio silentiĝis.

La Komandantoj klinis siajn kapojn; kaj kiam ili denove suprenrigardis, jen! Iliaj malamikoj fuĝadis, kaj la potenco de Mordoro disiĝadis kvazaŭ polvo en la vento. Samkiel kiam morto trafas la ŝvelintan kovantaĵon, kiu loĝas en ilia rampa teramaso kaj subpremas ilin ĉiujn, formikoj ekvagadas sencele kaj sencele kaj poste feble mortas, tiel la kreitoj de Saŭrono, ĉu orko aŭ trolo aŭ besto ensorĉita, kuris tien-reen malracie; kaj iuj mortigis sin, aŭ ĵetis sin en putojn, aŭ fuĝis ululante reen por kaŝiĝi en truoj kaj malhelaj senlumejoj malproksimaj de la espero.

Sed la homoj el Rhuno kaj el Harado, orientuloj kaj suduloj, vidis la ruiniĝon de sia milito kaj la grandajn majestecon kaj gloron de la Komandantoj el la Okcidento. Kaj tiuj, kiuj plej profunde kaj plej longe servadis la mison, malamegante la Okcidenton, kaj kiuj tamen estis homoj fieraj kaj kuraĝaj, siavice nun kunigis sin por lasta kontraŭstaro en senespera batalo. Sed la plejparto fuĝis orienten laŭ la eblecoj; kaj iuj ĵetis teren siajn armilojn kaj petis indulgon.

Tiam Gandolfo, lasante ĉiujn batalaferojn kaj komandadon al Aragorno kaj aliaj estroj, stariĝis sur la montetopinto kaj vokis; kaj suben al li venis la granda aglo, Gvajhiro la Ventmastro, kaj staris antaŭ li.

— Dufoje vi jam portis min, mia amiko Gvajhiro, — diris Gandolfo. — Trifoje pagos la tuton, se vi pretas. Vi ne trovos min ŝarĝo pli peza ol kiam vi portis min el Zirak-Zigilo, kie mia malnova vivo forbrulis.

— Mi portus vin, — respondis Gvajhiro, — kien ajn vi volas, eĉ se vi estus kreita el ŝtono.

— Do venu, kaj via frato akompanu nin, kaj iu alia el via popolo, kiu plej rapidas! Ĉar ni bezonas rapidecon pli fortan ol iu ajn vento, superantan la flugilojn de la nazguloj.

— Blovas la norda vento, sed ni devancos ĝin, — diris Gvajhiro. Kaj ĝi levis Gandalfon kaj forrapidis suden, kaj kun ĝi iris Landrovalo kaj Meneldoro juna kaj rapidega. Kaj ili pasis super Uduno kaj Gorgoroto kaj vidis la tutan landon en ruino kaj tumulto sube, kaj antaŭ ili la Monton de Sorto flamanta, elverŝanta sian fajron.

— Mi ĝojas, ke vi estas ĉi tie kun mi, — diris Frodo. — Ĉi tie je la fino de ĉiuj aferoj, Sam.

— Jes, mi kunestas, mastro, — diris Sam, metante milde la vunditan manon de Frodo sur sian bruston. — Kaj vi kunestas kun mi. Kaj la vojaĝo finiĝis. Sed veninte laŭ tiu longa vojo, mi ne volas ankoraŭ rezigni. Tio ne karakterizas min, se vi komprenas.

— Eble ne, Sam, — diris Frodo, — sed ĝi karakterizas la mondajn aferojn. Esperoj velkas. Venas fino. Ni devos nun atendi nur tre mallonge. Ni estas perditaj en ruino kaj falado, kaj eskapo ne eblas.

— Nu, mastro, ni povus almenaŭ malproksimiĝi de ĉi tiu loko danĝera, de ĉi Fendaĵo de Destino, se tiel ĝi nomiĝas. Ĉu ne? Venu, sinjoro Frodo, ni subeniru per la pado, almenaŭ!

— En ordo, Sam. Se vi volas iri, ankaŭ mi venos, — diris Frodo; kaj ili stariĝis kaj iris malrapide suben laŭ la serpentuma vojo; kaj ĝuste

kiam ili pasis al la trema subo de la Monto, fumego kaj vaporo elruk-tiĝis el Samato Naŭr, kaj la flanko de la konuso estis ŝirmalfermita, kaj grandega fajra vomaĵo ruliĝis en lanta tondra kaskado suben sur la orienta montoflanko.

Frodo kaj Sam ne plu povis iri. La lasta forto de iliaj mensoj kaj korpoj rapide malflusis. Ili atingis malaltan cindran monteton amasigitan ĉe la subo de la Monto; sed el tie ne plu estis eskapa vojo. Ĝi estis jam insulo, ne longe daŭranta, en la turmento de Orodruino. Ĉie ĉirkaŭe la tero gapis, kaj el la profundaj fendaĵoj kaj putoj suprensaltis fumo kaj fetoroj. Grandaj ŝiraĵoj malfermiĝis sur ĝia flanko. Lantaj riveroj da fajro subeniris la longajn deklivojn direkte al ili. Baldaŭ ili estos inunditaj. Faladis pluvo da varmegaj cindroj.

Ili staris nun; kaj Sam ankoraŭ tenante la manon de Frodo karesis ĝin. Li suspiris.

— Kian rakonton ni partoprenis, sinjoro Frodo, ĉu ne? — li diris. — Mi tre ŝatus aŭskulti ĝian rakontadon! Ĉu vi opinias, ke oni diros: “Nun venas la rakonto pri Naŭfingra Frodo kaj la Ringo de l’ Destino”? Kaj tiam ĉiuj silentiĝos, kiel ni silentiĝis, kiam en Rivendelo oni rakontis al ni la historion pri Unumana Bereno kaj la Juvelego. Mi ŝatus aŭdi tion! Kaj mi scivolas, kiel ĝi daŭros post nia parto.

Sed ankaŭ dum li parolis tiel, por forbari timon ĝis la lasta momento, liaj okuloj plu vagadis norden, norden rekte kontraŭ la vento, ĝis kie la fora ĉielo estis klara, dum la malvarma blovado, fortiĝante al uragano, retropelis la mallumon kaj la ruiniĝon de la nuboj.

Kaj Gvajhiro ekvidis ilin per siaj akraj forvidaj okuloj, kiam laŭ la ventodirekto ĝi venis, kaj riskante la grandan danĝeron de la ĉielo ĝi cirkloflugis en la aero: du etajn malhelajn figurojn, forlasitajn, man-en-mane sur monteto, dum la mondo skuiĝis sub ili, kaj anhelis, kaj riveroj da fajro proksimiĝis. Kaj ĝuste kiam ĝi ekvidis ilin kaj zomis suben, ĝi vidis ilin fali, elĉerpitajn, aŭ sufokitajn de fumoj kaj varmego, aŭ finfine faligitajn de malespero, kaŝantaj de morto siajn okulojn.

Flank-al-flanke ili kuŝis; kaj suben plonĝis Gvajhiro, kaj suben venis Landrovalo kaj rapida Meneldoro; kaj dumsonĝe, ne sciante pri la sorto, kiu trafis ilin, la vagantoj estis levitaj kaj portitaj malproksimen el la mallumo kaj la fajro.

Kiam Sam vekigis, li konstatis, ke li kuŝas sur mola lito, sed super li milde balanciĝis larĝaj fagobranĉoj, kaj tra ties junaj folioj ekbrilis sunlumo, verdo kaj oro. La tuta aero estis plena de dolĉa intermiksita parfumo.

Li memoris tiun aromon: la dolĉodoro de Itilio. “Mi estu benata! Kiom longe mi dormis?” — li pensis, ĉar la aromo reportis lin al la tago, kiam li bruligis sian etan fajron sub la sunumita herbamaso; kaj momente ĉio alia el la intertempo foris de la vekiga memoro. Li streĉis sin kaj profunde enspiris.

— Vidu, kiun sonĝon mi spertis! — li murmuris. — Mi ĝoje vekigas!

Li eksidis, kaj tiam li vidis, ke Frodo kuŝas apude kaj dormas trankvile kun unu mano malantaŭ la kapo, kaj la alia ripozanta sur la litkovrilo. Tiu estis la dekstra mano, kaj mankis la longa fingro.

Plena rememoro inundis Samon, kaj li kriis laŭte:

— Ne temas pri sonĝo! Do kie mi estas?

Kaj voĉo mallaŭte parolis malantaŭ li:

— En la lando Itilio, kaj sub zorgo de la Reĝo; kaj tiu atendas vin.

— Gandolfo stariĝis antaŭ li, blankvestita, kun barbo brilanta kiel pura neĝo en la palpebrumado de la folia sunlumo. — Nu, sinjoro Samsaĝo, kiel vi sentas vin? — li demandis.

Sed Sam kliniĝis malantaŭen, kaj gapis kun la buŝo malfermita, kaj momente, inter miro kaj ĝojego, li ne povis respondi. Fine li eligis:

— Gandolfo! Mi supozis vin morta! Sed tiam mi supozis min mem morta. Ĉu ĉio trista estas malveriga? Kio okazis al la mondo?

— La Granda Ombro foriris, — diris Gandolfo, kaj poste li ridis, kaj la sono similis muzikon, aŭ akvon en lando malsekega; kaj kiam li aŭskultis, penso venis al Sam en la kapon, ke ridadon, la puran sonon de gajeco, li ne aŭdis jam dum tagoj nekalkuleblaj. Ĝi trafis liajn orelojn kiel eĥo de ĉiuj ĝojoj, kiujn li iam ajn spertis. Sed li mem abunde eklarmis. Poste, kiel dolĉa pluvo preterpasas sur printempa vento kaj la suno pli klare ekbrilas, lia larmado ĉesis, kaj lia ridado fontanis, kaj ridante li salte ellitiĝis.

— Kiel mi sentas min? Nu, mi ne scias, kiel diri tion, — li flirtigis siajn brakojn en la aero. — Mi sentas min kiel printempo post la vintro, kaj sunlumo sur la folioj; kaj kiel trumpetoj kaj harpoj kaj ĉiuj kantoj, kiujn mi iam ajn aŭdis! — Li ĉesis kaj returnis sin al sia mastro. — Sed kiel fartas sinjoro Frodo? Ĉu ne domaĝe pri lia kompatinda mano? Sed espereble li bonfartas rilate la ceteron. Li travivis tempon kruelan.

— Jes, mi bonfartas rilate la ceteron, — diris Frodo, sidiĝante kaj siavice ridante. — Mi reendormiĝis atendente vin, Sam, vi dormema kapo. Mi vekigis frue hodiaŭ matene, kaj jam devas esti tagmezo.

— Ĉu tagmezo? — diris Sam, provante kalkuli. — Mezo de kiu tago?

— La dek-kvara de la Nova Jaro, — diris Gandolfo, — aŭ, se vi volas, la oka tago de aprilo laŭ la Provinca kalkulo¹. Sed en Gondoro la Nova Jaro ĉiam komenciĝos je la dudek-kvina de marto, kiam falis Saŭrono, kaj kiam vi estis eligita el la fajro al la Reĝo. Li vartis vin, kaj nun li vin atendas. Vi manĝos kaj trinkos ĉe li. Kiam vi estos pretaj, mi kondukos vin al li.

— Ĉu la Reĝo? Kiu reĝo, kaj kiu li estas?

— La Reĝo de Gondoro kaj Mastro de la Okcidentaj Landoj. Li reprenis sian tutan antikvan regnon. Li rajdos baldaŭ al sia kronado, sed li atendas vin.

— Kiel ni vestos nin? — diris Sam, ĉar li povis vidi nur la malnovajn kaj ĉifitajn vestaĵojn, en kiuj li vojaĝis, kuŝantajn faldite sur la tero apud iliaj litoj.

— En la vestaĵoj de via vojaĝo, — diris Gandolfo. — Neniuj silkaĵoj kaj linaĵoj, nek ajna armaĵo aŭ heraldiko, povus esti pli honorindaj. Sed poste ni vidos.

Kiam la hobitoj estis lavitaj kaj vestitaj, kaj manĝis iomete, ili sekvis Gandalfon. Ili elpaŝis el la faglaŭbo, en kiu ili kuŝadis, kaj pasis al longa verda razeno, ardanta en la sunlumo, borderita de majestaj malhelfoliaj arboj ŝarĝitaj je skarlataj floroj. Malantaŭe ili aŭdis la sonon de falanta akvo, kaj antaŭ ili subenfluis rivereto inter florantaj teramasetoj, ĝis ĝi atingis verdan boskon ĉe la razena ekstremo kaj poste pluiris sub arkaĵo de arboj, tra kiu ili vidis la ekbrilon de akvo en la foro.

Kiam ili alvenis la malfermejon en la bosko, ili vidis surprizite kavalirojn en hela maŝarmaĵo kaj altajn gardistojn en arĝento kaj nigro, kiuj salutis ilin honore kaj riverencis antaŭ ili. Kaj tiam iu blovis longan trumpeton, kaj ili pluiris tra la arbokoridoro apud la lirlanta rivereto. Tiel ili venis ĝis vasta verda tereno, kaj post ĝi estis larĝa rivero en arĝenta nebuleto, el kiu leviĝis longa arbokovrita insuleto, kaj multaj ŝipoj estis apud ties bordoj. Sed sur la kampo, sur kiu ili

¹ Laŭ la Provinca kalendaro estis tridek tagoj en *reteo* (t.e. en marto).

nun staris, granda homamaso estis ordigita, laŭ vicoj kaj trupoj ekbrilantaj en la sunlumo. Kaj kiam la hobitoj proksimiĝis, glavoj estis elingigitaj, kaj lancoj estis skuataj, kaj kornoj kaj trumpetoj sonoris, kaj oni kriis multvoĉe kaj multlingve:

*Vivu la duonuloj! Laŭdu ilin laŭdege!
 Cuió i Pheriain anann! Aglar'ni Pheriannath!
 Laŭdu ilin laŭdege, Frodon kaj Samsaĝon!
 Daur a Berhael, Conin en Annûn! Eglerio!
 Laŭdu ilin!
 Eglerio!
 A laita te, laita te! Andave laituvalmet!
 Laŭdu ilin!
 Cormacolindor, a laita tárienna!
 Laŭdu ilin! La Ringoportintojn, laŭdu ilin laŭdege!*

Kaj tiel kun sange ruĝiĝantaj vizaĝoj kaj mirbrilaj okuloj, Frodo kaj Sam antaŭeniris kaj vidis ke meze de la klama homamaso estis metitaj tri altaj seĝoj konstruitaj el verda gazono. Malantaŭ la dekstra seĝo floris, blanka sur verdo, ĉevalego libere kuranta; maldekstre estis standardo, arĝenta sur bluo, ŝipo cignoprúa naviganta surmare; sed malantaŭ la plej alta trono meze de ĉio, granda standardo estis dismontrata en la venteto, kaj tie floris blanka arbo sur kampo zibelkolora sub brila krono kaj sep briletantaj steloj. Sur la trono sidis viro maŝkirase vestita; granda glavo estis metita sur liaj genuoj, sed neniun kaskon li portis. Kiam ili proksimiĝis, li stariĝis. Kaj tiam ili rekonis lin malgraŭ la ŝanĝiĝo, tiel altan kaj belvizaĝan, reĝecan mastron de homoj, nigraĥaran kun la okuloj grizaj.

Frodo kuris renkonte al li, kaj Sam tuj sekvis.

— Nu, ĉu tio ne kronas ĉion! — li diris. — Jen Paŝegulo, aŭ mi daŭre dormas!

— Jes, Sam, estas Paŝegulo, — diris Aragorno. — Estas longa vojo, ĉu ne, de Brio, kie mia aspekto ne plaĉis al vi? Longa vojo por ĉiuj, sed la plej malluma vojo estis via.

Kaj tiam, surprizante kaj tute konfuzante Samon, li genufleksis antaŭ ili; kaj, preninte ilin je la manoj, li kondukis ilin al la trono, kaj sidiginte ilin sur ĝin li turnis sin al la homoj kaj komandantoj apudaj kaj kriis tiel, ke lia voĉo sonoris tra la tuta amaso:

— Laŭdu ilin laŭdege!

Kaj post kiam krisaluto laŭtiĝis kaj formortis, je la lasta kaj

kompleta kontentiĝo kaj pura ĝojo de Sam, menestrelo de Gondoro paŝis antaŭen, surgenuiĝis kaj petis permeson kanti. Kaj jen! tiu diris:

— Jen, estroj kaj kavaliroj kaj kuraĝuloj nekontigitaj, reĝoj kaj princoj, kaj bela popolo de Gondoro, kaj rajdistoj de Rohano, kaj vi filoj de Elrondo kaj dunadanoj el la nordo, kaj elfoj kaj gnomoj, kaj grandkoruloj el la Provinco, kaj ĉiuj liberuloj en la okcidento, jam aŭskultu mian kanton. Ĉar mi kantas al vi pri Frodo Naŭfingra kaj la Ringo de l' Destino.

Aŭdinte tion, Sam ridis laŭte pro pura ĝojo, kaj li stariĝis kaj kriis:

— Ho, grandaj gloro kaj majesto! Kaj ĉiuj miaj deziroj realiĝis! — kaj poste li ekploris.

Kaj la tuta amaso ridis kaj ploris, kaj meze de la ĝojo kaj larmoj aŭdiĝis la klara voĉo de la menestrelo, kiu leviĝis arĝente kaj ore, kaj ĉiuj personoj silentiĝis. Kaj li kantis al ili, jen en la elfa lingvo, jen en la lingvo de la okcidento, ĝis iliaj koroj, vunditaj per dolĉaj vortoj, tropleniĝis, kaj ilia ĝojo similis glavojn, kaj ili pasis enpense al regionoj, kie doloro kaj feliĉo fluas kune, kaj larmoj estas la vino mem de beniteco.

Kaj finfine, dum la suno dekliniĝis de tagmezo kaj la arabaj ombroj plilongiĝis, li ĉesis.

— Laŭdu ilin laŭdege! — li diris kaj surgenuiĝis.

Kaj tiam Aragorno stariĝis, kaj la tuta homamaso stariĝis, kaj ili pasis al pavilonoj pretigitaj, por manĝi kaj trinki kaj jubili dum la restaĵo de la tago.

Frodo kaj Sam estis kondukitaĵe aparte al tendo, kaj tie iliaj malnovaj vestaĵoj estis formetitaj, sed falditaj kaj honore formetitaj; kaj puraj subvestoj estis donitaj al ili. Poste venis Gandolfo kaj en liaj brakoj, mirige al Frodo, li portis la glavon kaj la elfan mantelon kaj la mitrilan tunikon, forpenitajn de li en Mordoro. Por Sam li alportis kirason el orumitaj maŝoj, kaj lian elfan mantelon tute riparitan post la suferitaj makuloj kaj difektoj, kaj li metis antaŭ ili du glavojn.

— Mi deziras neniun glavon, — diris Frodo.

— Sed ĉi-vespere vi devos porti almenaŭ unu, — diris Gandolfo.

Tiam Frodo prenis la malgrandan glavon de Sam, kiu prenis ĝin en Cirito Ungol.

— La Pikilon mi donis al vi, Sam, — li diris.

— Ne, mastro! Sinjoro Bilbo donis ĝin al vi kune kun sia arĝenta maŝkiraso; li ne ŝatus se iu alia nun portus ĝin.

Frodo cedis; kaj Gandolfo, kvazaŭ li estus ilia eskviro, genuiĝis kaj zonis ilin per glavbalteoj, kaj poste li leviĝis kaj surkapigis al ili arĝentajn cirklojn. Kaj kiam ili estis bele vestitaj, ili iris al la festeno de la Reĝo, kaj ili sidiĝis ĉe ties tablo kun Gandolfo, kaj Eomero Reĝo de Rohano, kaj Princo Imrahilo kaj ĉiuj ĉefaj komandantoj; kaj tie estis ankaŭ Gimlio kaj Legolaso.

Sed kiam, post la Silenta Starado, vino estis alportita, envenis du eskviroj por servi al la reĝoj; aŭ tiaj ili ŝajnis. Unu estis vestita en la arĝento kaj zibelkoloro de la gardistoj de Minaso Tirit, kaj la alia en blanko kaj verdo. Sed Sam scivolis, kion faras knaboj tiel junaj en armeo de forteguloj. Tiam subite, kiam ili proksimiĝis kaj li povis klare vidi ilin, li ekkriis:

— Nu vidu, sinjoro Frodo! Rigardu tien! Nu, ĉu ne estas Grinĉjo, mi devus diri, sinjoro Peregrino Tjuko, kaj sinjoro Gaja! Kiom ili kreskis! Mi estu benata! Sed mi vidas, ke pli da historioj estas rakontotaj ol la nia.

— Tiel ja estas, — diris Grinĉjo, turniĝante al li. — Kaj ni baldaŭ komencos rakonti ilin, tuj post la fino de tiu ĉi festeno. Intertempe provu ĉe Gandolfo. Li ne estas tiel kaŝema, kiel antaŭe, kvankam nun li ridas pli ol li parolas. Provizore Gaja kaj mi estas okupataj. Ni estas kavaliroj de la Urbo kaj de Markio, kiel espereble vi rimarkis.

Finfine la ĝoja tago finiĝis; kaj kiam la suno estis for kaj la ronda luno rajdis malrapide super la nebuletoj de Anduino kaj traflagris la tremetantajn foliojn, Frodo kaj Sam sidis sub la flustrantaj arboj meze de la parfumo de bela Itilio kaj interparoladis ĝis profunda nokto kun Gaja, Grinĉjo kaj Gandolfo, kaj post kelka tempo aliĝis al ili Legolaso kaj Gimlio. Tie Frodo kaj Sam eksciis multon pri ĉio, kio okazis al la Kunularo post kiam ilia kunuleco estis rompita dum la misa tago ĉe Part Galeno apud la akvofalo Raŭroso; kaj daŭre estis multo demandinda kaj rakontinda.

Orkoj, parolantaj arboj, leŭgoj da herbo, galopaj rajdantoj, ekbrilantaj kavernoj, blankaj turegoj kaj oraj haloj, bataloj kaj velantaj ŝipegoj — ĉiuj ĉi pasis antaŭ la menso de Sam ĝis li perpleksiĝis. Sed meze de ĉiuj ĉi mirindaĵoj li revenis ĉiam al sia mirego pri la mezuro de Gaja kaj Grinĉjo; kaj li igis ilin stari dors-al-dorse kun Frodo kaj si mem. Li gratis sian kapon.

— Mi ne komprenas tion, ĉe via aĝo! — li diris. — Sed jen vi havas: vi estas je tri coloj pli altaj, ol vi devus esti, aŭ mi estas gnomo.

— Tio vi certe ne estas, — diris Gimlio. — Sed kion mi antaŭdiris? Mortemuloj ne povas trinkadi entajn trinkaĵojn kaj atendi neniom pli da rezulto ol okazas post glaso da biero.

— Ĉu entajn trinkaĵojn? — diris Sam. — Jen vi denove babilas pri entoj; sed kio ili estas mistifikas min. Vidu, necesos semajnoj por taksi ĉion ĉi!

— Semajnoj efektive, — diris Grinĉjo. — Kaj poste oni devos enŝlosi Frodon en la turego de Minaso Tirit por skribe registri la tuton. Sen tio, li forgesos la duonon, kaj kompatinda maljuna Bilbo terure seniluziiĝos.

Finfine Gandolfo stariĝis.

— La manoj de la reĝo estas manoj kuracaj, karaj amikoj, — li diris. — Sed vi iris ĝis la sojlo de l' morto antaŭ ol li revokis vin, uzante sian tutan potencon, kaj sendis vin en la dolĉan dorman forgeson. Kaj malgraŭ tio, ke vi ja dormis longe kaj benite, tamen jam estas tempo dormi denove.

— Kaj ne nur Sam kaj Frodo, — diris Gimlio, — sed ankaŭ vi, Grinĉjo. Mi amas vin, se nur pro la penoj, kiujn vi trudis al mi, kiujn mi neniam forgesos. Mi ankaŭ ne forgesos, ke mi trovis vin sur la monteto de la lasta batalo. Sen la gnomo Gimlio vi estus perdita. Sed almenaŭ mi nun konas la aspekton de hobita piedo, eĉ kiam nur ĝi videblas sub amaso da kadavroj. Kaj kiam mi trenis de sur vi tiun kadavregon, mi estis certa, ke vi estas mortinta. Mi pretis elŝiri mian barbon. Kaj pasis nur unu tago, de kiam vi unuafoje ellitiĝis kaj ekpromenis. Al la lito nun vi iru. Kaj ankaŭ mi.

— Sed mi, — diris Legolaso, — promenos en la arbaroj de tiu ĉi bela lando, kio estos sufiĉa ripozo. En venontaj tagoj, se permesos mia elfa mastro, iuj el nia popolo translokiĝos ĉi tien; kaj post nia veno ĝi estos benata, dum kelka tempo. Dum kelka tempo: monato, vivdaŭro, cent homaj jaroj. Sed Anduino proksimas, kaj Anduino kondukas al la maro. Al la maro!

*Al la mar', al la Maro! La mevoj nun kriĉas,
blovas la vento, kaj ŝaŭm' disflugiĝas.
En okcidento la suno sepultas.
Griza ŝip', griza ŝipo, ĉu nun vi aŭskultas
la voĉojn de mia jam fora samspeco?
L' arbaron mi lasos de mia juneco;*

*finiĝas la tagoj, kadukas la jaroj.
Velante mi solos sur vasto de l' maroj.
Longas la ondoj ĉe l' Lasta Marbordo,
dolĉas sur Fora Insul' voĉagordo,
en elfa hejmo, kiu la homojn forfermas,
kie folioj ne falas: elfa lando eternas!*

Kaj tiel kantante Legolaso foriris suben laŭ la deklivo.

Poste foriris ankaŭ la aliaj, kaj Frodo kaj Sam iris al siaj litoj kaj ekdormis. Kaj en la mateno ili leviĝis denove en espero kaj trankvilo; kaj ili pasigis multajn tagojn en Itilio. Ĉar la Kampo de Kormaleno, kie la armeo nun bivakis, estis proksima al Heneto Anun, kaj la rivereto, kiu fluis de ties akvofaloj estis aŭdebla nokte, inundanta suben tra ĝia rokporo, kaj trapasis la florkovritajn herbokampojn en la tajdojn de Anduino apud la insulo Kairo Andros. La hobitoj vagis ie-tie vizitante denove la lokojn tra kiuj ili antaŭe pasis; kaj Sam esperis ekvidi, eble, en iu ombrejo de la arbaro aŭ sekreta maldensejo, la grandan olifonton. Kaj kiam li eksciis, ke ĉe la sieĝo de Gondoro tiuj bestoj estis multaj, sed ke ili estas ĉiuj detruitaj, li taksis tion ega perdo.

— Nu, oni ne povas okupi samtempe du lokojn, supozeble, — li diris. — Sed ŝajne mi multon maltrafis.

Dume la armeo pretigis sin por reiri al Minaso Tirit. Laculoj ripozis, kaj vunditoj estis kuracataj. Ĉar iuj multe batalis kontraŭ la restaĵon de la orientuloj kaj suduloj, ĝis ĉiuj estis subpremitaj. Kaj, plej laste el ĉiuj, revenis tiuj, kiuj foriris en Mordoron kaj detruis la fortikaĵojn en la nordo de tiu lando.

Sed fine, kiam proksimiĝis majo, la Komandantoj el la Okcidento ekvojaĝis denove; kaj ili surŝipiĝis kun ĉiuj siaj soldatoj, kaj ili navigis el Kairo Andros laŭ Anduino ĝis Osgiliado; kaj tie ili restis unu tagon; kaj la postan tagon ili venis al la verdaj kampoj de Pelenoro kaj ekvidis denove la blankajn turojn sub la alta Mindoluino, la ĉefurbo de la homoj de Gondoro, lasta memoraĵo de Okcidentio, kiu trapasis la mallumon kaj fajron al nova tago.

Kaj tie meze de la kampoj ili starigis siajn pavilonojn kaj atendis la matenon; ĉar estis la antaŭvespero de majo, kaj ĉe sunleviĝo la Reĝo eniros tra sia pordego.

Ĉapitro 5

LA REGANTO KAJ LA REĜO

Super la ĉefurbo de Gondoro estis pendanta dubemo kaj granda Stimego. Bela vetero kaj klara sunlumo ŝajnis nur moki homojn, kies tagoj enhavis malmulte da espero, kaj kiuj atendis ĉiumatene novaĵojn pri misa sorto. Ilia mastro estis mortinta kaj enterigita, morta kuŝis la Reĝo de Rohano en ilia Citadelo, kaj la nova Reĝo veninta al ili nokte estis denove for al milito kontraŭ potencoj tro malhelaj kaj teruraj por konkero far ajna forto aŭ kuraĝo. Kaj neniu novaĵo venis. Post kiam la armeo forlasis la Morgulan Valon kaj laŭiris la vojon norden sub ombro de la montaro, neniu kuriero revenis, nek ajna onidiro pri tio, kio okazas en la kovanta oriento.

Kiam la Komandantoj estis for du tagojn, Damo Eovina ordonis, ke la virinoj, kiuj servis ŝin, alportu ŝian robaron, kaj ŝi rifuzis kontraŭdirojn, sed ellitiĝis; kaj kiam ili jam vestis ŝin kaj subtenis per lina skarpo ŝian brakon, ŝi iris al la estro de la Domoj de Kuracado.

— Sinjoro, — ŝi diris, — mi estas tre maltrankvila, kaj mi ne plu povas kuŝi nenion farante bradipe.

— Damo, — li respondis, — vi ankoraŭ ne resaniĝis, kaj al mi estis ordonite, ke mi flegu vin elstare zorgeme. Vi ne devis ellitiĝi dum ankoraŭ sep tagoj, aŭ tiel oni ordonis. Mi petas vin reiri.

— Mi estas kuracita, — ŝi diris, — kuracita almenaŭ korpe, escepte de mia maldekstra brako, kaj tiu estas ripozanta. Sed mi malsaniĝos denove, se nenio estas de mi farota. Ĉu ne venis militaj novaĵoj? La virinoj nenion povas sciigi al mi.

— Mankas novaĵoj. Krom ke la Mastroj rajdis al la Morgula Valo; kaj oni diris, ke la nova estro el la nordo komandas. Granda princo li estas, kaj kuraculo; kaj por mi estas ege strange, ke mano kuraca ankaŭ ŝvingas glavon. Ne estas tiel nun en Gondoro, kvankam iam estis tiel, se veras la malnovaj rakontoj. Sed dum multaj jaroj ni, kuracistoj, celis nur fliki la ŝirojn faritajn de viroj glavaj. Tamen eĉ sen ili ni ankoraŭ havus sufiĉe da okupiĝo: la mondo sufiĉe plenas je damaĝoj kaj akcidentoj sen ke militoj plinombrigu ilin.

— Necesas nur unu malamiko por krei militon, ne du, sinjoro kuracestro, — respondis Eovina. — Kaj tiuj, kiuj ne posedas glavojn, povas tamen morti per ili. Ĉu vi volus, ke la homoj de Gondoro rikoltu por vi nur kuracherbojn, kiam la Malhela Mastro kunvokas armeojn? Kaj ne ĉiam estas bone kuraciĝi korpe. Ankaŭ ne estas ĉiam mise morti en batalo, eĉ tre dolore. Se estus permesate al mi, en tiu ĉi malluma horo mi elektus tiun lastan.

La kuracestro rigardis ŝin. Alta ŝi staris, kun la okuloj brilaj en ŝia blanka vizaĝo, kaj mano pugnigita, kiam ŝi turnis sin kaj elrigardis tra lia fenestro, kiu malfermiĝis al la oriento. Li suspiris kaj skuis sian kapon. Post paŭzo ŝi turnis sin al li denove.

— Ĉu neniuj tasko farendas? Kiu komandas en tiu ĉi Urbo?

— Mi ne scias precize. Tiuj aferoj ne estas miaj zorgoj. Iu marŝalo komandas la rajdistojn de Rohano, kaj Mastro Hurino, oni diris al mi, komandas la gondoranojn. Sed Mastro Faramiro estas laŭrajte la Reganto de la Urbo.

— Kie mi povos trovi lin?

— En tiu ĉi domo, damo. Li estas grave vundita, sed nun li progresas al sano. Sed mi ne scias...

— Ĉu vi ne volas konduki min al li? Tiam vi scios.

Mastro Faramiro promenis sola en la ĝardeno de la Domoj de Kuracado, kaj la sunlumo varmigis lin, kaj li sentis, ke nova vivo trankuras liajn vejnojn; sed lia koro estis peza, kaj li elrigardis orienten trans la murojn. Kaj veninte, la kuracestro prononcis lian nomon, kaj li turnis sin kaj ekvidis Eovinan, la Damon de Rohano; kaj komparto emociis lin, ĉar li vidis, ke ŝi estas vundita, kaj lia klarvido perceptis, ke ŝi malĝojas kaj maltrankvilas.

— Sinjoro, — diris la kuracestro, — jen estas Dama Eovina el Rohano. Ŝi rajdis kun sia reĝo kaj estis grave vundita, kaj loĝas nun sub mia prizorgo. Sed ŝi ne estas kontenta, kaj ŝi volas alparoli la Reganton de la Urbo.

— Ne miskomprenu min, sinjoro, — diris Eovina. — Malĝojigas min ne manko de prizorgo. Neniuj domoj povus esti pli belaj por tiuj, kiuj deziras kuraciĝon. Sed mi ne kapablas kuŝi bradipe, senokupe, enkaĝigite. Mi atendis morton en batalo. Sed mi ne mortis, kaj la batalo daŭras.

Pro gesto de Faramiro la kuracestro riverencis kaj foriris.

— Kion vi deziras, ke mi faru, damo? — demandis Faramiro. —

Ankaŭ mi estas enkarcerigito de la kuracistoj. — Li rigardis ŝin, kaj ĉar li estis homo, kiun kompatu profunde emociis, al li ŝajnis, ke ŝia belo kaj ŝia malĝojo trapikos lian koron. Kaj ŝi rigardis lin kaj vidis la serenon teneron en liaj okuloj, kaj tamen ŝi sciis, ĉar ŝi estis edukita inter militemaj viroj, ke jen estis iu, kiun neniu rohana rajdanto povus superi en batalo.

— Kion vi deziras? — li diris denove. — Mi faros tion, kion mi kapablas.

— Mi volas, ke vi ordonu al tiu kuracestro, ke li permesu al mi foriri, — ŝi diris; sed kvankam ŝiaj vortoj estis daŭre fieraj, ŝia koro hezitis, kaj por la unua fojo ŝi dubis pri si mem. Ŝi konjektis, ke tiu altulo, samtempe severa kaj milda, eble taksos ŝin nur kaprica, kiel infanon al kiu mankas la mensa firmeco necesa por finplenumi taskon seninteresan.

— Mi mem estas sub lia prizorgo, — respondis Faramiro. — Mi ankaŭ ankoraŭ ne akceptis mian regantecon en la Urbo. Sed eĉ se mi tion farus, mi plu aŭskultus liajn konsilojn kaj ne kontraŭdirus lian volon pri liaj metiaj aferoj, krom pro iu forta bezono.

— Sed kuraciĝon mi ne deziras, — ŝi diris. — Mi deziras rajdi al la milito kiel mia frato Eomero, aŭ prefere kiel Reĝo Teodeno, ĉar li mortis kaj havas samtempe honoron kaj pacon.

— Estas tro malfrue, damo, por sekvi la Komandantojn, eĉ se vi disponus sufiĉan forton. Sed morto en batalo eble venos iam al ni ĉiuj, vole aŭ nevole. Vi estos pli bone preparita por fronti ĝin laŭ via maniero, se dum restas ankoraŭ tempo, vi faros laŭ la ordono de la kuracisto. Vi kaj mi, ni devas toleri pacience la horojn de atendado.

Ŝi ne respondis, sed kiam li rigardis ŝin, al li ŝajnis, ke io en ŝi moliĝis, kvazaŭ severa frostoj cedus pro unua febla aŭguro de la printempo. Larmo aperis en ŝia okulo kaj ruliĝis laŭ ŝia vango, kvazaŭ brileta pluvero. Ŝia fiero kapo iomete kliniĝis. Poste mallaŭte, kvazaŭ ŝi pli parolus al si ol al li, ŝi diris:

— Sed la kuracistoj volas, ke mi kuŝu en la lito ankoraŭ sep tagojn. Kaj mia fenestro ne frontas orienten.

Nun ŝia voĉo estis tiu de fraŭlino juna kaj malĝoja.

Faramiro ridetis, kvankam lian koron plenigis kompatu.

— Ĉu via fenestro ne frontas orienten? — li diris. — Tion oni povas korekti. Tiurilate mi ordonos al la kuracestro. Se vi restos en tiu ĉi domo sub nia prizorgo, sinjorino, kaj ripozos, tiam vi promenos en tiu ĉi ĝardeno en la sunlumo, laŭ via volo; kaj vi rigardos orienten, kien

iris ĉiuj niaj esperoj. Kaj ĉi tie vi trovos min promenanta kaj atendantta, kaj ankaŭ rigardanta orienten. Faciligus miajn zorgojn, se vi parolus al mi, aŭ promenus kun mi de tempo al tempo.

Tiam ŝi levis sian kapon kaj rigardis denove en liajn okulojn; kaj ŝia pala vizaĝo koloriĝis.

— Kiel mi faciligus viajn zorgojn, sinjoro? — ŝi demandis. — Kaj mi ne deziras la parolon de vivaj homoj.

— Ĉu vi volas akcepti mian malkaŝan respondon?

— Mi volas.

— Do, Eovina de Rohano. Mi diras al vi, ke vi estas bela. En la valoj de niaj montetoj estas floroj belaj kaj helaj, kaj fraŭlinoj eĉ pli belaj; sed ĝis nun mi vidis en Gondoro nek floron nek fraŭlinon tiom belan kaj tiom malĝojan. Eble nur kelkaj tagoj restas antaŭ ol mal-lumo trafos nian mondon, kaj kiam ĝi venos, mi esperas fronti ĝin sensancele; sed faciligus mian koron, se dum la suno ankoraŭ brilas, mi povus plu vidi vin. Ĉar vi kaj mi ambaŭ pasis sub la flugilojn de la Ombro, kaj la sama mano nin retiris.

— Ve, ne min, moŝto! — ŝi diris. — Ombro ankoraŭ kovras min. Ne atendu de mi kuracon! Mi estas ŝildoportantino kaj mia mano estas malmilda. Sed mi dankas vin almenaŭ pro tio, ke mi ne devos resti en mia ĉambro. Mi promenos libere dank' al la bonkoreco de la Reganto de la Urbo. — Kaj ŝi genufleksis antaŭ li kaj reiris en la domon. Sed Faramiro dum longa tempo promenis sola en la ĝardeno, kaj lia rigardo jam turniĝis prefere al la domo ol al la orientaj muroj.

Reveninte al sia ĉambro, li alvokis la kuracestron kaj aŭdis ĉion pri la Damo de Rohano, kion tiu povis rakonti.

— Sed sendube, mastro, — diris la kuracestro, — vi eksciis pli multe de la duonulo, kiu estas ĉe ni; ĉar li partoprenis la rajdadon de Reĝo Teodeno kaj estis kun la Damo en la fino, oni diras.

Kaj tiel Gaja estis sendita al Faramiro, kaj dum la tuta tago ili longe interparolis, kaj Faramiro eksciis multon, eĉ pli multon ol Grinĉjo vortigis; kaj li pensis, ke li jam iomete komprenas la malĝojon kaj maltrankvilon de Eovina el Rohano. Kaj dum la bela vespero Faramiro kaj Grinĉjo promenis en la ĝardeno, sed ŝi ne venis.

Sed matene, kiam Faramiro venis el la Domoj, li vidis ŝin, dum ŝi staris sur la muroj, kaj ŝi estis tute blankvestita, kaj brilis en la sunlumo. Kaj li vokis ŝin, kaj ŝi venis suben, kaj ili promenis sur la herbo aŭ sidis kune sub verda arbo, jen silente, jen parolante. Kaj ĉiun postan

tagon ili faris simile. Kaj la kuracestro, rigardante tra sia fenestro, ĝojis en sia koro, ĉar li estis kuracisto, kaj liaj zorgoj malpeziĝis; kaj estis certe, ke, malgraŭ pezo de la timo kaj misaŭguro en la homaj koroj, tiu duopo el liaj vartatoj plu prosperis kaj ĉiutage plifortiĝis.

Kaj venis la kvina tago, post kiam Damo Eovina unuafoje iris al Faramiro; kaj ili denove staris kune sur la urba muro kaj rigardis. Ankaŭ ne venis informoj, kaj ĉiuj koroj malhelis. Ankaŭ la vetero ne plu helis. Estis fride. Vento, kiu nokte estiĝis, jam akre blovis el la nordo, kaj ĝi plifortiĝadis; sed la ĉirkaŭaj terenoj aspektis grizaj kaj mornaj.

Ili estis vestitaj per varmaj roboj kaj pezaj manteloj, kaj super ĉio Damo Eovina portis bluan mantelegon el koloro de profunda somernokto, kaj ĉirkaŭ la orlo kaj la kolo sur ĝi estis arĝentaj steloj. Faramiro alportigis tiun robon kaj volvis ŝin per ĝi; kaj li opiniis, ke ŝi aspektas efektive bele kaj reĝinece, kiam ŝi staris tie apude. Tiu mantelego estis teksita por lia patrino, Finduilasa el Amroto, kiu mortis juna, kaj por li ĝi estis nur memoro pri belo antaŭlonga kaj pri lia unua funebro; kaj ŝia robo ŝajnis al li vestaĵo taŭga por la belo kaj malĝojo de Eovina.

Sed nun ŝi frostotremis sub la stela mantelego, kaj ŝi rigardis norden, trans la grizaj proksimaj teroj, en la okulon de la malvarma vento, kie fore la ĉielo estis malmola kaj klara.

— Kion vi serĉas, Eovina? — demandis Faramiro.

— Ĉu ne la Nigra Pordego troviĝas tie fore? — ŝi diris. — Kaj ĉu ne li jam devis alveni tien? Pasis sep tagoj, de kiam li forraĵdis.

— Sep tagoj. Sed ne pensu malbone pri mi, se mi diras al vi: ili havigis al mi samtempe ĝojon kaj doloron, kiujn mi ne supozis iam sperti. Ĝojon, vidante vin; sed doloron, ĉar nun la timo kaj dubo en tiu ĉi misa tempo iĝis efektive malhelaj. Eovina, mi ne volas, ke tiu ĉi mondo finiĝu nun, nek perdi tiel baldaŭ tion, kion mi trovis.

— Ĉu perdi tion, kion vi trovis, sinjoro? — ŝi respondis; sed ŝi rigardis lin serioze, kaj ŝiaj okuloj estis bonkoraj. — Mi ne scias, kion dum tiuj tagoj vi trovis, kion vi povus perdi. Sed vidu, amiko mia, pri tio ni ne parolu! Ni tute ne parolu! Mi staras ĉe iu terura rando, kaj en la abismo antaŭ miaj piedoj estas komplete mallume, sed ĉu estas ia lumo malantaŭ mi, mi ne povas scii. Ĉar mi ankoraŭ ne kapablas turniĝi. Mi atendas iun baton de la sorto.

— Jes, ni atendas sortobaton, — diris Faramiro. Kaj ili diris nenion plu; kaj ŝajnis al ili, starantaj sur la muro, ke la vento ĉesis, kaj la lumo forvelkis, kaj la suno estis malakrigita, kaj silentiĝis ĉiuj bruoj

en la Urbo kaj en la ĉirkaŭa regiono: nek vento, nek voĉo, nek birda trilo, nek folia susuro, nek ilia propra spirado estis aŭdebla; la batado de iliaj koroj senmoviĝis. La tempo haltis.

Kaj dum ili staris tiel, iliaj manoj renkontiĝis kaj tenis sin reciproke, kvankam tion ili ne sciis. Kaj daŭre ili atendis nekonatan. Post iom da tempo ŝajnis al ili, ke super la firstoj de la foraj montoj leviĝis vasta montego da mallumo, baŭmante kiel ondo inundanta la mondon, kaj ĉirkaŭ ĝi fulmoj flagris; kaj poste tremego trakuris la teron, kaj ili sentis ŝanceliĝon de la muroj de la Urbo. Suspireca sono leviĝis el ĉiuj ĉirkaŭaj terenoj; kaj iliaj koroj subite ekbatis denove.

— Tio memorigas min pri Numenoro, — diris Faramiro, kaj miris aŭdante sin paroli.

— Ĉu pri Numenoro?

— Jes, pri la lando Okcidentio, kiu dronis, kaj pri la malhela ondego grimpanta super la verdajn landojn kaj super la montojn, kaj proksimiĝanta, mallumo neeskapebla. Mi ofte songas pri tio.

— Do vi opinias, ke la Mallumo venas? Mallumo neeskapeblas? — diris Eovina kaj subite proksimiĝis al li.

— Ne, — diris Faramiro, rigardante ŝian vizaĝon. — Tio estis nur bildo en la menso. Mi ne scias, kio okazas. La racio de mia maldorma menso sciigas al mi, ke okazis granda misaĵo, kaj ni staras ĉe la fino de tagoj. Sed mia koro diras, ke ne; kaj ĉiuj miaj membroj malpezas, kaj venas al mi espero kaj ĝojo, kiujn neniuj racio povas malakcepti. Eovina, Blanka Damo de Rohano, en tiu ĉi horo mi ne kredas, ke iu ajn mallumo estos daŭra!

Li kliniĝis kaj kisis ŝian frunton.

Kaj tiel ili staris sur la muroj de la ĉefurbo de Gondoro, kaj ventego ekestis kaj blovis, kaj iliaj haroj, korvokoloraj kaj oraj, elstriis intermiksiĝe en la aero. Kaj la Ombro foriris, kaj la suno senvualiĝis, kaj la lumo elsaltis; kaj la akvo de Anduino ekbrilis kiel arĝento, kaj en ĉiuj domoj de la Urbo la homoj ekkantis pro la ĝojo, kiu leviĝis en iliaj koroj el kiu fonto, ili ja ne sciis.

Kaj antaŭ ol la suno multe posttagmezis, el la oriento alflugis granda aglo, kiu alportis novaĵojn preteresperajn de la Mastroj de l' Okcidento, kriante:

*Kantu jam, popolo de l' Turego Anoro,
ĉar la Regno de Saŭrono finiĝis por ĉiam,
kaj la Malhela Turego estas detruita.*

*Kantu kaj ĝoju, popolo de l' Turego Garda,
 ĉar via vaĉado ne estis vana,
 kaj rompitas la Nigra Pordego,
 via Reĝo trapasis,
 kaj li estas venkinta.*

*Kantu ĝojplene, infanoj de l' okcidento,
 ĉar via Reĝo venos denove,
 kaj li loĝados inter vi
 ĉiujn tagojn de via vivo.*

*Kaj la Arbo velkinta estos renovigita,
 kaj li plantos ĝin en la lokoj altaj,
 kaj la Urbo estos benita.*

Kantu la tuta popolo!

Kaj la homoj kantis sur ĉiuj vojoj de la Urbo.

La sekvintaj tagoj estis oraj, kaj printempo kaj somero kuniĝis kaj jubilis kune sur la kampoj de Gondoro. Kaj informoj jam venis per rapidaj rajdantoj el Kairo Andros pri ĉio farita, kaj la Urbo pretiĝis por la alveno de la Reĝo. Grinĉjo estis alvokita kaj forrajdis kun la furgonoj, kiuj portis varprovizojn al Osgiliado kaj de tie al Kairo Andros. Sed Faramiro ne iris, ĉar jam kuracita li surprenis sian aŭtoritatecon kaj la regantecon, kvankam nur por mallonga daŭro, kaj lia devo estis prepari por iu, kiu anstataŭos lin.

Ankaŭ Eovina ne foriris, kvankam ŝia frato sendis mesaĝon, kun peto ke ŝi venu al la kampo de Kormaleno. Kaj Faramiro miris pro tio, sed li malofte vidis ŝin, estante okupata pri aliaj aferoj; kaj ŝi plu loĝis en la Domoj de Kuracado kaj promenis sola en la ĝardeno, kaj ŝia vizaĝo denove paliĝis, kaj ŝajnis, ke en la tuta Urbo nur ŝi malsanetas kaj malĝojas. Kaj la kuracestro estis ĉagrenita, kaj li rakontis pri tio al Faramiro.

Poste Faramiro venis serĉante ŝin, kaj ankoraŭfoje ili staris kune sur la muro; kaj li diris al ŝi:

— Eovina, kial vi prokrastas ĉi tie, kaj ne iras al la jubilo en Kormaleno post Kairo Andros, kie via frato atendas vin?

— Ĉu vi ne scias? — ŝi diris.

Sed li respondis:

— Povas esti du kialoj, sed mi ne scias, kiu el ili estas vera.

— Mi ne emas ludi per enigmoj, — ŝi diris. — Parolu pli rekte.

— Do se tion vi volas, damo, — li diris, — vi ne foriras, ĉar alvokis vin nur via frato, kaj rigardi Mastron Aragorno, heredinton de Elen-dilo, dum lia triumfo jam ne havigus al vi ĝojon. Aŭ ĉar ne foriris mi, kaj vi plu deziras esti proksima al mi. Kaj eble pro ambaŭ tiuj kialoj, kaj vi mem ne scias elekti inter ili. Eovina, ĉu vi ne amas min, aŭ ne volas tion?

— Mi volis esti amata de alia, — ŝi respondis. — Sed mi deziras kompaton de neniu.

— Tion mi scias. Vi deziris la amon de Mastro Aragorno. Ĉar li estis alta kaj potenca, kaj vi volis havi renomon kaj gloron kaj esti levita super la mizerulojn kiuj rampas sur la tero. Kaj li ŝajnis al vi admirinda, kiel granda komandanto eble ŝajnas al juna soldato. Ĉar tia li estas, sinjoro inter la batalantoj, la plej granda nun ekzistanta. Sed kiam li donis al vi nur komprenemon kaj kompaton, tiam vi deziris havi nenion, escepte de kuraĝa morto en batalo. Rigardu min, Eovina!

Kaj Eovina rigardis Faramiron longe kaj senŝancele; kaj Faramiro diris:

— Ne malestimu kompaton, kiu estas donaco de milda koro, Eovina! Sed mi ne proponas al vi mian kompaton. Ĉar vi estas damo alta kaj brava kaj mem akiris renomon, kiu ne estas forgesota; kaj vi estas damo bela, mi opinias, kion eĉ la vortoj de la elfa lingvo ne sufiĉe pri-skribas. Kaj mi amas vin. Iam mi kompatis vian malĝojon. Sed nun, eĉ se vi estus sentrista, sen timo aŭ ajna manko, se vi estus la feliĉa reĝino de Gondoro, mi ankoraŭ amus vin. Eovina, ĉu vi ne amas min?

Tiam la koro de Eovina ŝanĝiĝis, aŭ eble ŝi finfine komprenis ĝin. Kaj subite forlasis ŝin vintro, kaj la suno brilis al ŝi.

— Mi staras en Minaso Anor, la Turego de la Suno, — ŝi diris. — Kaj jen! La Ombro foriris! Mi ne plu estos ŝildoportantino, nek konkuros kun la grandaj rajdistoj, nek ĝojos nur pri kantoj de mortigo. Mi estos kuracistino, kaj amos ĉion, kio kreskas kaj ne estas malfekunda. — Ŝi denove rigardis Faramiron. — Mi ne plu deziras esti reĝino.

Tiam Faramiro ridis gaje.

— Tio estas bona, — li diris, — ĉar Reĝo mi ne estas. Sed mi edzinigos la Blankan Damon de Rohano, se tion ŝi volos. Kaj se ŝi tion volas, ni do transiru la riveron kaj en tagoj pli feliĉaj ni loĝu en la bela Itilio kaj kreu tie ĝardenon. Ĉio kreskos en ĝojo tie, se venos la Blanka Damo.

— Ĉu do mi devos forlasi mian propran popolon, viro el Gondoro?

— ŝi demandis. — Kaj ĉu vi volas, ke via fiera popolo diru pri vi: “Jen iras princo, kiu malsovaĝigis furiozan ŝildoportantinon el la nordo! Ĉu ne troviĝis elektinda virino el la Numenora raso?”

— Mi volas, — diris Faramiro kaj brakumis ŝin kaj kisis ŝin sub la sunluma ĉielo, kaj li tute ne ĝeniĝis pro tio, ke ili staras alte sur la muro kaj estas videblaj de multaj. Kaj multaj efektive vidis ilin kaj la lumon, kiu ĉirkaŭis ilin, kiam ili venis suben de la muroj kaj iris man-en-mane ĝis la Domoj de Kuracado.

Kaj al la kuracestro Faramiro diris:

— Jen Eovina, la Damo el Rohano, kaj nun ŝi estas kuracita.

Kaj la kuracestro diris:

— Do mi liberigas ŝin el mia prizorgo kaj adiaŭas ŝin, kaj ŝi neniam denove suferu doloron aŭ malsanon. Mi rekomendas ŝin al prizorgo de la Reganto de la Urbo, ĝis revenos ŝia frato.

Sed Eovina diris:

— Tamen nun, havante permeson foriri, mi volas resti. Ĉar tiu ĉi Domo iĝis por mi la plej benita el ĉiuj loĝejoj.

Kaj ŝi restis tie, ĝis venis Reĝo Eomero.

Ĉio estis nun pretigata en la Urbo; kaj formiĝis granda homamaso, ĉar la novaĵo disvastiĝis en ĉiuj regionoj de Gondoro, de Min-Rimono ĝis eĉ Pinato Gelin kaj la malproksimaj marbordoj. Kaj ĉiuj, kiuj povis veni al la Urbo, venis rapide. Kaj la Urbo denove pleniĝis de virinoj kaj belaj infanoj, kiuj reiris al siaj domoj ŝarĝite de floroj; kaj el Dol Amroto venis harpistoj, kiuj plej lerte harpis en la tuta lando; kaj troviĝis ludantoj de vjoloj kaj de flutoj kaj de arĝentaj trumpetoj kaj klarvoĉaj kantistoj el la valoj de Lebenino.

Finfine venis vespero, dum kiu de la muroj videbliĝis la pavilonoj, kaj tra la tuta nokto lanternoj lumis, dum la homoj atendis la tagiĝon. Kaj kiam la suno leviĝis en la klara mateno super la orientajn montojn, sur kiuj ne plu kuŝis ombroj, tiam ĉiuj sonoriloj sonoris, kaj ĉiuj standardoj malvolviĝis kaj flirtis en la vento; kaj sur la Blanka Turo de la Citadelo la standardo de la Regantoj, hele arĝenta kiel neĝo en la sunlumo, surhavante nek blazonon nek devizon, estis lastfoje hisita super Gondoro.

Nun la Komandantoj de l' Okcidento kondukis sian armeon al la Urbo, kaj la homoj vidis ilin avancantaj vicon post vico, flagrantaj kaj ekbrilantaj en la sunleviĝo kaj arĝente muarantaj. Kaj tiel ili alvenis antaŭ la Pordegon kaj haltis je mejl-okono antaŭ la muroj. Ĝis nun

neniu pordoklapo estis restarigita, sed barilo estis metita trans la enirejoj de la Urbo, kaj tie staris armitoj en arĝento kaj nigro kun elingigitaj longaj glavoj. Antaŭ la barilo staris Reganto Faramiro kaj Hurino, Gardisto de la Ŝlosiloj, kaj aliaj komandantoj de Gondoro, kaj Damo Eovina el Rohano kun marŝalo Elfhelmo kaj multaj kavaliroj de Markio; kaj ambaŭflanke de la Pordego estis granda amaso da belaj homoj en buntaj vestaĵoj kaj florgirlandoj.

Do nun estis larĝa spaco antaŭ la muroj de Minaso Tirit, kaj ĝin enfermis ĉiuflanke la kavaliroj kaj soldatoj de Gondoro kaj Rohano, kaj la popolo de la Urbo kaj el ĉiuj landopartoj. Ĉiuj silentiĝis, kiam el la amaso enpaŝis la dunadanoj en arĝento kaj grizo; kaj antaŭ ili venis malrapide Mastro Aragorno. Li estis vestita en nigra maŝarmaĵo ornamita per arĝento, kaj li portis longan mantelon el pura blanko agrafita ĉe la gorĝo per verda juvelo defore brilanta; sed lia kapo estis nekovrita. Kun li estis Eomero el Rohano, kaj Princo Imrahilo, kaj Gandolfo tute blankvestita, kaj kvar etaj figuroj, pri kiuj miris multaj homoj.

— Ne, kuzino! Ili ne estas knaboj, — diris Joreta al sia parencino el Imloto Melui, kiu staris apude. — Ili estas *Perianoj* el la fora lando de la Duonuloj, kie ili estas laŭdire tre famaj princoj. Tion mi scias, ĉar mi vartis unu el ili en la Domoj. Ili estas malgrandaj, sed ili estas bravaj. Vidu, kuzino, unu el ili iris kun nur sia eskviro en la Nigran Landon kaj batalis tie sola kontraŭ la Malhela Mastro mem, kaj fajrigis ties Turegon, se tion vi povas kredi. Almenaŭ tion oni rakontas en la Urbo. Temas verŝajne pri tiu, kiu marŝas kun nia Elfŝtono. Ili estas koraj amikoj, mi aŭdis. Nu, li estas mirindulo, Mastro Elfŝtono: ne tro molparola, certe, sed li havas koron oran, kiel oni diras, kaj li havas manojn kuracajn. “La manoj de la Reĝo estas manoj de kuracisto”, mi diris; kaj tiamaniere ĉio estis retrovita. Kaj Mitrandiro diris al mi: “Joreta, la homoj longe memoros viajn vortojn”, kaj...

Sed al Joreta ne estis permesate daŭrigi la klarigon al la kampara parencino, ĉar sonoris trumpeto, kaj sekvis kompleta silento. Tiam el la Pordego venis Faramiro kaj Hurino kun la Ŝlosiloj, kaj neniuj aliaj, krom ke malantaŭ ili marŝis kvar viroj en la altaj kaskoj kaj armaĵo de la Citadelo, kaj tiuj portis grandan keston el nigra *lebetrono* ligita per arĝento.

Faramiro renkontis Aragornon meze de la kunvenintoj, kaj li genuiĝis, kaj diris:

— La lasta Reganto de Gondoro petas permeson transdoni sian oficon.

Li etendis blankan bastoneton, sed Aragorno akceptis la bastoneton kaj redonis ĝin, dirante:

— Tiu ofico ne finiĝis, kaj ĝi estos via kaj posedaĵo de viaj heredontoj, tiel longe, kiel daŭros mia nasklinio. Plenumu do vian oficon!

Faramiro starigis kaj parolis klarvoĉe:

— Homoj de Gondoro, aŭdu nun la Reganton de la Regno! Jen! Finfine venis iu por pretendi la reĝecon. Jen estas Aragorno, filo de Aratorno, ĉefo de la Dunadanoj el la Nordo, Komandanto de la Armeo de l' Okcidento, portanto de la Glavo Reforĝita, venkinto en batalo, kies manoj havigas kuracadon, la Elfŝtono, Elésaro el la linio de Valandilo, filo de Isilduro, Elendila filo el Numenoro. Ĉu li estu la Reĝo kaj eniru en la Urbon kaj loĝadu tie?

Kaj la tuta homamaso kaj la tuta popolo kriis *jes* kvazaŭ unuvoĉe.

Kaj Joreta diris al sia parenco:

— Tio ĉi estas nur ceremonio tia, kian ni havas en la Urbo, kuzino; ĉar li jam eniris, kiel mi klarigis al vi; kaj li diris al mi... — Kaj ŝi denove devis silentiĝi, ĉar Faramiro denove ekparolis.

— Homoj el Gondoro, la analistoj diras, ke en la malnova tempo la reĝo kutime ricevis la kronon de sia patro, antaŭ ol tiu mortis; aŭ se tio ne eblis, li iris sola kaj akceptis ĝin el la manoj de sia patro en la tombo, kie tiu estis kuŝigita. Sed pro tio, ke nun la aferoj devas esti alimaniere aranĝitaj, per la aŭtoritato de la Reganto mi hodiaŭ portigis ĉi tien el Rat Dineno la kronon de Earnuro, la lasta Reĝo, kies tagoj pasis dum la epoko de niaj prapatroj antaŭ longe.

La gardistoj paŝis antaŭen, kaj Faramiro malfermis la keston kaj levis la antikvan kronon. Ĝi estis formita simile al la kaskoj de la citadelaj gardistoj, sed ĝi estis pli impona, kaj ĝi estis tute blanka, kaj la aloj ambaŭflanke estis faritaj el perlamoto kaj arĝento simila al marbirdaj flugiloj, ĉar ĝi estis la emblemo de la reĝoj, kiuj venis transmaren. Sep gemoj diamantaj estis enfiksitaj en la cirkleto, kaj sur ĝia supro estis fiksita unu juvelo, kies lumo supreniris kvazaŭ flamo.

Tial Aragorno prenis la kronon, levis ĝin alte kaj diris:

— *Et Eärello Endorena utúlien. Sinome maruvan ar Hildinyar tenn' Ambar-metta!*

Kaj tiuj estis la vortoj, kiujn Elendilo parolis, kiam li alvenis el la maro sur flugiloj de la vento: “El la Granda Maro al Mez-Tero mi venis. En tiu ĉi loko loĝados mi kaj miaj heredontoj, ĝis la fino de la mondo”.

Poste, mirigante multajn, Aragorno ne surkapigis la kronon, sed redonis ĝin al Faramiro kaj diris:

— Per la penado kaj kuraĝo de multaj mi ricevas mian heredaĵon. Rekone de tio, mi deziras, ke la Ringoportinto alportu la kronon, kaj Mitrandiro metu ĝin sur mian kapon, se li konsentas; ĉar li estis la instiginto de ĉio plenumita, kaj lia estas tiu ĉi venko.

Tiam Frodo paŝis antaŭen kaj prenis de Faramiro la kronon kaj portis ĝin al Gandolfo; kaj Aragorno genuiĝis, kaj Gandolfo metis la Blankan Kronon sur lian kapon kaj diris:

— Nun venas la tagoj de la Reĝo, kaj ili estu benitaj, dum daŭros la regado de la valaroj!

Sed kiam Aragorno stariĝis, ĉiuj spektantoj rigardis lin silente, ĉar ŝajnis al ili, ke li estas rivelita al ili nun la unuan fojon. Alta kiel la pra-tempaj maraj reĝoj, li superis ĉiujn apudulojn. Multjarulo li ŝajnis, kaj tamen en la zenito de sia vivo; kaj saĝecon indikis lia frunto, kaj en liaj manoj estis forto kaj kuracemo, kaj lumo ĉirkaŭis lin. Kaj tiam Faramiro kriis:

— Vidu la Reĝon!

Kaj tiumomente ĉiuj trumpetoj estis blovataj, kaj Reĝo Elesaro eliris kaj alvenis la barilon, kaj Hurino kun la Ŝlosiloj forŝovis ĝin; kaj meze de la muziko de harpoj, vjoloj kaj flutoj kaj kantado de klaraj voĉoj la Reĝo trairis la florkovritajn vojojn kaj venis al la Citadelo kaj eniris; kaj la standardo de la Arbo kaj la Steloj estis malvolvita sur la plej alta turo, kaj komenciĝis la regado de Reĝo Elesaro, pri kiu rakontis multaj kantoj.

Dum lia epoko la Urbo estis pli ol iam ajn beligita, eĉ pli ol dum la tagoj de ĝia unua gloro; kaj ĝin plenigis arboj kaj fontanoj, kaj ĝiaj pordoj estis forĝitaj el mitrilo kaj ŝtalo, kaj ĝiaj stratoj estis pavimitaj je blanka marmoro; kaj la popolo de la Monto laboris en ĝi, kaj la popolo de l' Arbaro ĝojis veni tien; kaj ĉio estis kuracita kaj riparita, kaj domoj estis plenigitaj de viroj kaj virinoj kaj la ridado de infanoj, kaj neniuj fenestroj estis blinda, nek iu ajna korto malplena; kaj post la fino de la Tria Epoko de la mondo en la nova tempo ĝi konservis la memoron kaj la gloron de la forpasintaj jaroj.

Dum la tagoj, kiuj sekvis lian kronadon, la Reĝo sidis sur sia trono en la Halo de la Reĝoj kaj anoncis siajn juĝojn. Kaj ambasadoroj venis de multaj landoj kaj popoloj, de l' oriento kaj de la sudo, kaj de la limoj de Mornarbaro, kaj de Dunlando en la okcidento. Kaj la Reĝo pardonis tiujn orientulojn, kiuj kapitulaciis, kaj forsendis ilin liberigitaj, kaj paciĝis kun la popoloj de Harado; kaj la sklavojn de Mordoro li

liberigis kaj donis al ili ĉiujn terojn ĉirkaŭ lago Nurneno por ilia propra uzado. Kaj multaj estis kondukitaĵoj al li por ricevi liajn laŭdojn kaj kompensaĵojn pro la kuraĝeco; kaj laste la estro de la gardistoj kondukis al li por prijuĝo Beregondon.

Kaj la reĝo diris al Beregondo:

— Beregondo, per via glavo estis verŝita sango en la Sanktejo, kie tio estas malpermesita. Krome, vi forlasis vian postenon sen permeso de la Reganto aŭ de via komandanto. Pro tiuj aferoj en pratempo la puno estis morto. Nun mi devas anonci vian sorton.

» Ĉiu puno estas nuligita pro via kuraĝo en batalo, kaj eĉ pli pro tio, ke ĉio farita de vi rezultis pro amo al la mastro Faramiro. Malgraŭ tio, vi devas forlasi la gardistaron de la Citadelo, kaj vi devos foriri el la Urbo Minaso Tirit.

La sango forlasis la vizaĝon de Beregondo, kaj li estis dolorigita en la koro kaj klinis sian kapon. Sed la Reĝo diris:

— Tiel devas okazi, ĉar vi estas postenigota en la Blanka Trupo, la gardistaro de Faramiro, Princo de Itilio, kaj vi estos la trupestro kaj loĝos en Emino Arnen honore kaj pace, servante tiun, por kiu vi riskis ĉion, por savi lin el la morto.

Kaj tiam Beregondo, perceptante la indulgon kaj justecon de la Reĝo, iĝis ĝoja, kaj genuinte kisis lian manon kaj foriris feliĉa kaj kontenta. Kaj Aragorno donis al Faramiro Itilion kiel ties princlandon, kaj ordonis ke li loĝadu en la montaro Emino Arnen en la vidkampo de la Urbo.

— Ĉar, — li diris, — Minaso Itil en la Morgula Valo estos komplete detruita kaj, kvankam ĝi eble kun paso de la tempo estos purigita, neniuj povos loĝi tie dum multaj longaj jaroj.

Kaj lastan el ĉiuj Aragorno salutis Eomeron de Rohano, kaj ili brakumis sin, kaj Aragorno diris:

— Inter ni ne povas esti parolo pri donado aŭ ricevado, nek pri kompensaĵo; ĉar ni estas fratoj. En horo feliĉa Eorlo rajdis el la Nordo, kaj neniam estis ligateco de popoloj pli benita, tiel ke neniuj iam ajn malplenumis la dezirojn de l' alia, nek tion iam faros. Nu, kiel vi scias, ni kuŝigis Teodenon la Faman en tombo en la Sanktejo, kaj tie li kuŝos por ĉiam inter la Reĝoj de Gondoro, se vi volas. Aŭ se vi deziras tion, ni venos al Rohano kaj reportos lin por ripozi inter lia propra popolo.

Kaj Eomero respondis:

— Ekde tiu tago, kiam vi leviĝis antaŭ mi el la verda herbaro de la

montetoj, mi vin amas, kaj tiu amo ne velkos. Sed nun mi devos foriri por kelka tempo al mia propra regno, kie multo estas kuracenda kaj ordigenda. Sed koncerne la Falinton, kiam ĉio estos pretigita, ni revenos por li; sed intertempe li dormu ĉi tie.

Kaj Eovina diris al Faramiro:

— Nun mi devas reiri al mia propra lando kaj rigardi ĝin ankoraŭ unufoje, kaj helpi mian fraton en lia laboro; sed kiam tiu, kiun mi longe amis kiel patron, estos entombigita, mi revenos.

Tiel pasis la ĝojaj tagoj; kaj la okan tagon de majo la rajdistoj de Rohano pretigis sin kaj forrajdis laŭ la Norda Vojo, apud kiu staris homoj honorantaj kaj laŭdantaj ilin, de la Pordego de la Urbo ĝis la muroj de Pelenoro. Kaj ĉiuj aliaj, kiuj loĝadis malproksime, reiris jubile al siaj hejmoj; sed en la Urbo estis laboro de multaj manoj entuziasmaj por rekonstrui kaj renovigi, kaj forigi ĉiujn militcikatrojn kaj la memoron pri la mallumo.

La hobitoj plu restadis en Minaso Tirit kun Legolaso kaj Gimlio, ĉar Aragorno ne volis, ke la kunularo malligiĝu.

— Fine ĉio simila devos ĉesi, — li diris, — sed mi preferus, ke vi restu iomete pli longe: ĉar la kompletigo de ĉiuj faroj partoprenitaj de vi ankoraŭ ne okazis. Proksimiĝas tago, kiun mi antaŭvidis dum ĉiuj jaroj de mia vireco, kaj kiam tiu venos, mi deziras ke miaj amikoj estu kun mi.

Sed pri tiu tago li rifuzis diri ion plian.

Dum tiuj tagoj la Kunularanoj de la Ringo loĝis kune en bela domo kun Gandolfo, kaj ili iris laŭvole ien-tien. Kaj Frodo diris al Gandolfo:

— Ĉu vi scias, kia estos tiu tago, pri kiu parolas Aragorno? Ĉar ni estas feliĉaj ĉi tie, kaj ne sopiras foriri; sed la tagoj forkuras, kaj Bilbo atendas; kaj la Provinco estas mia hejmo.

— Ankaŭ Bilbo, — diris Gandolfo, — atendas tiun saman tagon, kaj li scias, kio prokrastigas vin. Kaj koncerne la pasadon de la tagoj, nun estas nur majo, kaj ankoraŭ ne komenciĝis la somero; kaj kvankam ĉio ŝajnas ŝanĝita, kvazaŭ forpasus monda epoko, tamen laŭ la arboj kaj la herbo pasis malpli ol jaro post kiam vi ekvojaĝis.

— Grinĉjo, — diris Frodo, — ĉu vi ne diris, ke Gandolfo estas malpli sekretema ol antaŭe? Li tiam laciĝis pro siaj laboroj, ŝajnas al mi. Nun li refortiĝas.

Kaj Gandolfo diris:

— Multaj ŝatas scii anticipe, kio estas metota sur la tablon; sed

tiuj, kiuj laboris pretigante la feston ŝatas teni sian sekreton, ĉar miro plilaŭtigas la laŭdvortojn. Kaj Aragorno mem atendas signon.

Venis tago, en kiu Gandolfo ne estis trovebla, kaj la kunuloj scivilis, kio estas okazonta. Sed Gandolfo kondukis Aragornon el la Urbo nokte al la suda subo de la monto Mindoluino; kaj tie ili trovis padon faritan praepoke, sur kiu malmultaj nun aŭdacis paŝi. Ĉar ĝi kondukis supren sur la monton al alta sanktejo, kien kutimis iri nur la reĝoj. Kaj ili supreniris laŭ kruta vojo, ĝis ili venis al alta kampo sub la neĝoj, kiuj vestis la imponajn montopintojn, kaj ĝi rigardis trans la kruteĝaĵon, kiu staris malantaŭ la Urbo. Kaj starante tie ili esploris la tereojn, ĉar venis la mateno; kaj ili vidis la turojn de la Urbo forsube kiel blankajn kraĵojn tuŝitajn de la sunlumo, kaj la tuta valo de Anduino similis ĝardenon, kaj la Ombrajn Montojn vualis ora nebuleto. Unuflanke ilia vidkampo etendiĝis ĝis la griza Emin Muilo, kaj la ekbrilo de Raŭroso similis stelon flagrantan en malproksimo. Kaj aliflanke ili vidis la Riveron kiel rubandon kuŝigitan ĝis Pelargiro, kaj poste estis lumo sur la orlo de la ĉielo, kiu indikis la maron.

Kaj Gandolfo diris:

— Jen via regno kaj la kerno de pli granda regno estonta. La Tria Epoko de la mondo finiĝis, kaj la nova epoko komenciĝis; kaj via tasko estas ordigi ĝian komenciĝon kaj konservi tion, kio meritas konserviĝon. Ĉar, kvankam multo estas savita, multo devas nun forpasi; kaj ankaŭ la potenco de la Tri Ringoj finiĝis. Kaj ĉiuj landoj, kiujn vi vidas, kaj tiuj ĉirkaŭantaj ilin, estos loĝataj de Homoj. Ĉar venas la tempo de la Homa Superregado, kaj la Pliiĝa Parencaro velkos aŭ foriros.

— Mi bone scias tion, kara amiko, — diris Aragorno, — sed mi volas plu havi vian konsiladon.

— Jam ne tre longe, — diris Gandolfo. — La Tria Epoko estis mia epoko. Mi estis la Malamiko de Saŭrono; kaj mia laboro ĉesis. Baldaŭ mi foriros. La ŝarĝo devas nun pezi sur vin kaj vian parencaron.

— Sed mi mortos, — diris Aragorno. — Ĉar mi estas mortemulo, kaj kvankam pro tio, kio mi estas, kaj de la raso Okcidenta nemiksita, mi eble havos vivon pli longan ol aliaj, tamen tio estos nur tempeto; kaj kiam tiuj, kiuj estas en la virinaj uteroj, naskiĝos kaj maljuniĝos, ankaŭ mi maljuniĝos. Kaj kiu tiam regos Gondoron kaj tiujn, kiuj fidas tiun ĉi Urbon, kvazaŭ sian reĝinon, se mia deziro ne estos plenumita. La Arbo en la Korto de l' Fontano ankoraŭ estas velkinta kaj malfekunda. Kiam mi vidos signon, ke iam estos alie?

— Forturnu vian vizaĝon de la verda mondo, kaj rigardu tien, kie ĉio ŝajnas malfekunda kaj malvarma!

Tiam Aragorno turnis sin, kaj malantaŭ li estis ŝtonoza deklivo subeniranta de la randoj de la neĝo; kaj rigardante li konsciiĝis, ke tie sola en la dezerta lando staris kreskaĵo. Kaj li supreniris al ĝi kaj ekvidis, ke el la rando de la neĝo leviĝis arbido alta ne pli ol tri futojn. Jam ĝi eligis junajn foliojn longajn kaj belformajn, malhelajn supre kaj arĝentajn sube, kaj sur sia svelta pinto ĝi portis florigrapoleon, kies blankaj petaloj brilis kiel la sunluma neĝo.

Tiam Aragorno kriis:

— *Yé! utúvienes!* Mi trovis ĝin! Jen! Ĉi tie estas ido de la Plejaĝa el la Arboj! Sed kiel ĝi kreskas ĉi tie? Ĉar ĝi mem ankoraŭ ne estas sep jarojn aĝa.

Kaj Gandolfo alirinte rigardis ĝin kaj diris:

— Vere ĝi estas arbido el la linio de la bela Nimloto, kaj tiu estis plantido de Galatiliono, kaj tiu estis frukto de Telperiono multnoma, la Plejaĝa el la Arboj. Kiu povas diri, kiel ĝi venas ĉi tien en la difinita horo? Sed tie ĉi estas antikva sanktejo, kaj frukto estis semita ĉi tie nepre antaŭ ol la reĝoj falis kaj la Arbo velkis en la korto. Ĉar oni diras, ke kvankam la frukto de la Arbo malofte maturiĝas, tamen la vivo en ĝi povas poste kuŝi dormanta tra multaj longaj jaroj, kaj neniu povas antaŭdiri la tempon, kiam ĝi vekigōs. Memoru tion. Ĉar se iam frukto maturiĝos, ĝi devos esti plantita, por eviti, ke la linio formortu el la mondo, same kiel la raso de Elendilo kuŝis kaŝite en la dezertoj de la nordo. Tamen la linio de Nimloto estas multe pli aĝa ol via linio, Reĝo Elesaro.

Poste Aragorno metis sian manon milde al la arbido, kaj jen! Ĝi ŝajnis kroĉiĝi nur malforte al la tero, kaj ĝi estis elterigita sendamaĝe; kaj Aragorno reportis ĝin al la Citadelo. Poste la velkinta arbo estis elradikigita, sed kun respekto; kaj oni ne bruligis ĝin, sed kuŝigis ĝin en la silento de Rat Dineno. Kaj Aragorno plantis la novan arbon en la korto apud la fontano, kaj rapide kaj ĝoje ĝi komencis kreski; kaj kiam alvenis junio, ĝi estis ŝarĝita je arbofloroj.

— La signo estas donita, kaj la tago ne malproksimas, — diris Aragorno kaj starigis sentinelojn sur la muroj.

Estis la tago antaŭ la Somermezo, kiam kurieroj venis el Amono Din al la Urbo kaj diris, ke rajdas el la nordo hela popolo, kiu nun proksimiĝas al la muroj de Pelenoro. Kaj la Reĝo diris:

— Finfine ili venas. La tuta Urbo estu pretigata!

En la antaŭvespero de la Somermezo, kiam la ĉielo estis safirkolora kaj blankaj steloj malfermiĝis en la oriento, sed la okcidento ankoraŭ oris, kaj la aero estis friska kaj belodora, la rajdantoj venis laŭ la Norda Vojo al la pordego de Minaso Tirit. La unuaj rajdis Elrohiro kaj Eladano kun arĝenta standardo, poste venis Glorfindelo kaj Ereŝtoro kaj la tuta domanaro de Rivendelo, post ili venis Damo Galadriela kaj Celeborno, la Mastro de Lotlorieno, sur blankaj ĉevaloj kaj kun ili multaj bonuloj de ilia lando grizmantelitaj kun blankaj gemoj en la haroj; kaj la lasta venis Mastro Elrondo, potenca inter elfoj kaj homoj, kun sceptron de Anuminaso, kaj apud li sur griza pordama rajdĉevalo rajdis lia filino Arvena — la vespera stelo de sia popolo.

Kaj Frodo, vidinte ŝin veni briletanta en la vespero kun steloj sur la frunto kaj dolĉa parfumo ĉirkaŭanta, emociiĝis miregante, kaj li diris al Gandolfo:

— Fine mi komprenas, kial ni atendis! Jen la finalo! Jam ne nur la tago estos amata, sed ankaŭ la nokto estos bela kaj benata kaj ĝia tuta timo forpasos!

Tiam la Reĝo bonvenigis siajn gastojn, kaj ili elseliĝis; kaj Elrondo transdonis la sceptron, kaj metis la manon de sia filino en la manon de la Reĝo, kaj kune ili supreniris en la Altan Urbon, kaj ĉiuj steloj ekfloris sur la ĉielo. Kaj Aragorno, Reĝo Elesaro, edziĝis kun Arvena Undomiela en la Urbo de la Reĝo en la tago de la Somermezo, kaj la rakonto pri ilia longa atendado kaj penado atingis plenumiĝon.

Ĉapitro 6

MULTAJ DISIĜOJ

Kiam la tagoj de jubilado fine ĉesis, la kunuloj pripensis reiron al la propraj hejmoj. Kaj Frodo iris al la Reĝo, dum tiu sidis kun la Reĝino Arvena apud la fontano, kaj ŝi kantis kanton de Valinoro, dum la Arbo kreskis kaj floris. Ili bonvenigis Frodon kaj stariĝis salute; kaj Aragorno diris:

— Mi scias, kion vi venis diri, Frodo: vi volas reiri al via propra hejmo. Nu, plej kara amiko, arbo plej bone kreskas en la lando de siaj prapatroj; sed vi en ĉiuj landoj de la Okcidento ĉiam estos bonvena. Kaj kvankam via popolo havis malmulte da famo en la legendoj de la grandiozuloj, ĝi jam havos pli da renomo ol multaj vastaj regnoj ne plu ekzistantaj.

— Vere estas, ke mi deziras reiri al la Provinco, — diris Frodo. — Sed unue mi devos iri al Rivendelo. Ĉar se io povuŝ manki en tempo tiel benita, mankis al mi Bilbo; kaj mi malĝojis, kiam mi vidis, ke el la domanaro de Elrondo ne venis li.

— Ĉu tio mirigis vin, Ringoportinto? — diris Arvena. — Vi ja konas la potencon de tiu aĵo, kiu estas nun detruita; kaj ĉio farita de tiu potenco jam forpasas. Sed via parenco posedis ĝin pli longe ol vi. Li aĝe nun maljunas, laŭ sia speco; kaj li atendas vin, ĉar li ne plu faros longajn vojaĝojn, krom unu.

— Do mi petas permeson foriri baldaŭ, — diris Frodo.

— Post sep tagoj ni iros, — diris Aragorno. — Ni rajdos longe kun vi sur la vojo ĝis Rohano. Post tri tagoj Eomero revenos ĉi tien por reporti Teodenon al ripozo en Markio, kaj ni rajdos kun li por honori la falintojn. Sed nun antaŭ ol vi iros, mi konfirmas tiujn vortojn, kiujn diris al vi Faramiro, kaj vi por ĉiam estos liberulo en la regno Gondoro; kaj same ĉiuj viaj kunuloj. Kaj se estus donacoj doneblaj konforme al viaj faroj, vi ricevus ilin; sed kion ajn vi deziras, tion vi kunportos kun vi, kaj vi rajdos honorate kaj vestite kiel princoj de la lando.

Sed Reĝino Arvena diris:

— Donacon mi donos al vi. Mi estas la filino de Elrondo. Mi ne

iros kun li, kiam li foriros al la Havenoj; ĉar mia elekto estas tiu de Lutiena, kaj kiel ŝi, tiel ankaŭ mi elektis la dolĉan kaj la amaran. Sed anstataŭ mi foriros vi, Ringoportinto, kiam venos la tempo, kaj se vi deziros tion. Se viaj doloroj ankoraŭ ĉagrenos vin, kaj la memoro pri via ŝarĝo plu pezos, tiuokaze vi rajtos iri en la Okcidenton, ĝis ĉiuj viaj vundoj kaj lacecoj kuraciĝos. Sed portu nun ĉi tion memore pri Elfŝtono kaj Vesperstelo, kun kiuj via vivo interplektiĝis!

Kaj ŝi prenis blankan gemon stelsimilan, kiu kuŝis sur ŝia brusto pende de arĝenta ĉeno, kaj ŝi metis la ĉenon ĉirkaŭ la kolon de Frodo.

— Kiam memoro pri la timo kaj la mallumo ĉagrenos vin, — ŝi diris, — tio ĉi havigos al vi helpon.

Post tri tagoj, kiel diris la Reĝo, el Rohano venis rajde Eomero, kaj kun li venis *eored*o el la plej belaj kavaliroj de Markio. Oni bonvenigis lin; kaj kiam ili ĉiuj sidis ĉe tablo en Meretrondo, la Granda Halo de la Festenoj, li vidis la belon de la ĉeestantaj damoj, kaj mirego plenigis lin. Kaj antaŭ ol li iris ripozi, li alvokis la gnomon Gimlio kaj diris al tiu:

— Gimlio, filo de Gloino, ĉu via hakilo pretas?

— Ne, sinjoro, — diris Gimlio, — sed mi povas rapide ekhavi ĝin, se estos necese.

— Vi juĝos, — diris Eomero. — Ĉar ankoraŭ kuŝas inter ni iuj malprudentaj vortoj pri la damo de la Ora Arbaro. Kaj nun mi vidis ŝin propraokule.

— Nu, sinjoro, — diris Gimlio, — kion vi nun diras?

— Ve! — diris Eomero. — Mi ne diros, ke ŝi estas la plej bela damo vivanta.

— Do, mi devos alporti mian hakilon, — diris Gimlio.

— Sed unue mi devas proponi jenan senkulpigon, — diris Eomero. — Se mi vidus ŝin en alia societo, mi dirus ĉion, kion vi deziras. Sed mi taksas la unua Reĝinon Arvena Vesperstelo, kaj mi estas preta miaparte batali kontraŭ iu ajn, kiu defias min. Ĉu mi havigu al mi mian glavon?

Tiam Gimlio malalten riverencis.

— Ne, vi estas pardonita miaflanke, sinjoro, — li diris. — Vi elektis la vesperon, sed mia amo estas direktita al la mateno. Kaj mia koro anticipe timas, ke baldaŭ ĝi forpasos por ĉiam.

Fine venis la tago de foriro, kaj granda bela grupo pretigis sin por

rajdi norden el la Urbo. Tiam la reĝoj de Gondoro kaj Rohano iris al la Sanktejo kaj ili venis ĝis la tomboj en Rat Dineno, kaj ili forportis Reĝon Teodeno sur ora kadavroportilo, kaj trapasis silente la Urbon. Poste ili metis la portilon sur grandan ĉaron, kiun ĉirkaŭis rajdistoj de Rohano kun sia standardo antaŭe; kaj Gaja, kiel eskviro de Teodeno, veturis sur la ĉaro kaj gardis la armilojn de la Reĝo.

Al la aliaj kunuloj estis havigitaj ĉevaloj konforme al ilia staturō; kaj Frodo kaj Samsaĝo rajdis apud Aragorno, kaj Gandolfo rajdis sur Ombrofakso, kaj Grinĉjo rajdis kun la kavaliroj de Gondoro; kaj Legolaso kaj Gimlio kiel ĉiam rajdis duope sur Arodo.

En tiu rajdado partoprenis ankaŭ Reĝino Arvena, kaj Celeborno kaj Galadriela kun siaj popolanoj, kaj Elrondo, kaj liaj filoj; kaj la princoj de Dol Amroto kaj de Itilio, kaj multaj trupestroj kaj kavaliroj. Neniam iu ajn reĝo de Markio havis tian akompanion, kia iris kun Teodeno, filo de Tengelo, al lia hejmlando.

Senhaste kaj trankvile ili pasis en Anorienon, kaj ili alvenis la Gri-zan Arbaron sub Amono Din; kaj tie ili aŭdis sonojn, kvazaŭ de tamburoj batantaj en la montaro, kvankam neniu vivanto estis videbla. Tiam Aragorno sonorigis la trumpetojn; kaj heroldoj kriis:

— Vidu, Reĝo Elesaro estas veninta! La arbaron Druadano li donas al Gan-Buri-Gano kaj al ties popolo, ke ĝi estu por ĉiam ilia posedaĵo; kaj ekde nun neniu eniru ĝin sen ilia permeso!

Poste la tamburoj laŭte tondregis kaj silentiĝis.

Fine post dek kvin tagoj da vojaĝado la ĉaro de Reĝo Teodeno trapasis la verdajn kampojn de Rohano kaj venis al Edoraso; kaj tie ĉiuj ripozis. La Ora Halo estis ornamita per belaj drapaĵoj, kaj ĝi estis lumoplena, kaj tie okazis la plej elstara festo, kiun ĝi konis ekde la tagoj de ĝia konstruado. Ĉar post tri tagoj la rohananoj pretigis la entombigon de Teodeno; kaj li estis kuŝigita en ŝtona domo kune kun siaj armiloj kaj multaj aliaj belaĵoj poseditaj de li, kaj super li estis starigita granda teramaso, kovrita de verda herbo kaj de blankaj miozotoj. Kaj nun estis ok teramasoj sur la orienta flanko de la Tumulkampo.

Poste la rajdistoj de la Reĝa Domo sur blankaj ĉevaloj ĉirkaŭrajdis la tumulon kaj kantis kune kanton pri Teodeno, filo de Tengelo, kiun kreis lia menestrelo Gleovino, kaj li neniam poste kreis kanton. La malrapidaj voĉoj de la rajdistoj emociis la korojn eĉ de tiuj, kiuj ne sciopovis la lingvon de tiu popolo; sed la vortoj de la kanto lumigis la

okulojn de la rohananoj: aŭdante denove en foro la tondron de la hufoj de la nordo kaj la voĉon de Eorlo, krianta super la batala bruoj sur la kampo de Celebranto; kaj la rakonto pri la reĝoj daŭris, kaj la korno de Helmo laŭtis en la montaro, ĝis venis la Mallumo, kaj Reĝo Teodeno leviĝis kaj rajdis tra la Ombro ĝis la fajro, kaj mortis grandioze, ĝuste kiam la suno, reveninte eksterespere, ekbrilis al Mindoluino en la mateno.

*El dubo, el mallumo, al tagleviĝo
li rajdis subsune kantante kun glavo nuda.
Esperon li ĉendis ree, en espero finiĝis;
super morton, timon, missorton levita
el perdo, el vivo, al longa glorado.*

Sed Gaja staris sube de la verda teramaso, kaj li ploris, kaj kiam ĉesis la kanto, li stariĝis kaj kriis:

— Reĝo Teodeno, Reĝo Teodeno! Adiaŭ! Kvazaŭ patro vi estis al mi dum iom da tempo. Adiaŭ!

Kiam la entombigo finiĝis, kaj la plorado de virinoj ĉesis, kaj Teodeno fine estis lasita sola en sia tumulto, tiam oni venis al la Ora Halo por la granda festeno kaj flankenmetis malĝojon, ĉar Teodeno vivis ĝis maljuniĝo kaj mortis ne malpli glorie ol liaj prapatroj. Kaj kiam la tempo venis, kiam laŭmore ili estis trinkontaj je memoro de la reĝoj, Eovina, Damo de Rohano, elpaŝis, ora kiel la suno kaj blanka kiel la neĝo, kaj ŝi portis plenan pokalon al Eomero.

Tiam stariĝis menestrelo-analisto kaj nomis ĉiujn nomojn de la Mastroj de Markio laŭvice: Eorlo la Juna; kaj Brego konstruinto de la Halo; kaj Aldoro frato de la malfeliĉa Baldoro; kaj Freo, kaj Freovino, kaj Orvino, kaj Deoro, kaj Gremo; kaj Helmo, kiu kuŝis en Profundaĵo de Helmo kiam Markio estis okupita; kaj tiel finiĝis la naŭ tumultoj de la okcidenta flanko, ĉar tiutempe la linio estis rompita, kaj poste venis la tumultoj de la orienta flanko: Frealafo, filo de la fratino de Helmo, kaj Leofa, kaj Valdo, kaj Folko, kaj Folkvino, kaj Fengeljo, kaj Tengelo, kaj Teodeno la plej lasta. Kaj kiam Teodeno estis nomita, Eomero eltrinkis la pokalon. Poste Eovina ordonis, ke la servantoj replenigu la tasojn, kaj ĉiuj ĉeestantoj stariĝis kaj tostis la novan reĝon, kriante:

— Saluton, Eomero, Reĝo de Markio!

Finfine, kiam la festo proksimiĝis al sia fino, Eomero stariĝis kaj diris:

— Nu, tiu ĉi estas la entombiga festo de Reĝo Teodeno; sed mi parolos antaŭ ol ni foriros pri ĝojaj novaĵoj, ĉar li ne domaĝus, ke mi tion faru, ĉar li ĉiam estis patro por Eovina, mia fratino. Do aŭdu ĉiuj gastoj, belaj popoloj el multaj regnoj, neniam antaŭe tiome kuniĝintaj en tiu ĉi halo! Faramiro, Reganto de Gondoro kaj Princo de Itilio, petas, ke Eovina, Damo de Rohano, estu lia edzino, kaj ŝi tion konsentas plenvolonte. Tial ili estos gefianĉigitaj antaŭ vi ĉiuj.

Kaj Faramiro kaj Eovina elpaŝis kaj metis manon en manon; kaj ĉiuj ĉeestantoj tostis ilin kaj ĝojis.

— Tiel, — diris Eomero, — la amikeco inter Markio kaj Gondoro estas ligita per nova ligilo, kaj tiom pli mi ĝojegas.

— Nenia avarulo estas vi, Eomero, — diris Aragorno, — tiel donacante al Gondoro la plej belan valoraĵon de via regno!

Tiam Eovina rigardis en la okulojn de Aragorno, kaj ŝi diris:

— Deziru por mi ĝojon, mia feŭdmastro kaj kuracinto!

Kaj li respondis:

— Mi deziris por vi ĝojon depost kiam mi la unuan fojon vidis vin. Kuracas mian koron jam vidi vin feliĉa.

Kiam finiĝis la festo, la forirontoj adiaŭis Reĝon Eomero. Aragorno kun siaj kavaliroj kaj la popolanoj de Lorieno kaj Rivendelo, pretigis sin por forrajdi; sed Faramiro kaj Imrahilo restis en Edoras; kaj ankaŭ Arvena Vesperstelo restis, kaj ŝi adiaŭis siajn fratojn. Neniu vidis ŝian lastan renkontiĝon kun ŝia patro Elrondo, ĉar ili supreniris en la montaron kaj tie longe interparolis, kaj maĝoĵa estis ilia disiĝo, kiu daŭros ĝis la fino de la mondo.

Laste antaŭ ol la gastoj ekvojaĝis, Eomero kaj Eovina venis al Gaja, kaj ili diris:

— Adiaŭ jam, Gajadoko de la Provinco kaj Holdvino de Markio! Rajdu al bona fortune, kaj rajdu baldaŭ retro al nia bonvenigo!

Kaj Eomero diris:

— En la pratempo reĝoj ŝarĝintus vin per donacoj, kiujn ĉaro ne eltenus, pro viaj faroj sur la kampoj de Mundburgo; kaj tamen vi akceptos nenion, vi diras, krom la armiloj donitaj al vi. Tion mi permesas, ĉar efektive mi ne posedas donacon, kiu indas; sed mia fratino petegas, ke vi ricevu tiun etaĵon, kiel memoron pri Dernkasko kaj la kornoj de Markio je mateniĝo.

Tiam Eovina donacis al Gaja antikvan kornon, etan sed rare faritan el bela arĝento kun verda balteo; kaj metiistoj gravuris sur ĝi

rapidajn rajdantojn en spaliro, kiu ĉirkaŭvolvis ĝin de la kloŝo ĝis la buŝpeco; kaj tie estis metitaj grandsignifaj runaĵoj.

— Tio estas heredaĵo de nia domlinio, — diris Eovina. — Ĝin faris la gnomoj, kaj ĝi devenis el la provizo de la drako Skato. Eorlo la Juna alportis ĝin el la nordo. Kiu blovas ĝin pro neceso, tiu timigos la korojn de siaj malamikoj kaj ĝojigos la korojn de siaj amikoj, kaj tiuj aŭdos lin kaj venos al li.

Do Gaja akceptis la kornon, ĉar ĝi estis nerifuzebla, kaj li kisis la manon de Eovina; kaj ili brakumis lin, kaj tiel ili disiĝis tiutempe.

Nun la gastoj estis pretaj, kaj ili eltrinkis la forirtason, kaj kun grandaj laŭdoj kaj amikeco ili disiĝis kaj venis finfine al la Profundaĵo de Helmo, kaj tie ili restis du tagojn. Tiam Legolaso plenumis sian promeson al Gimlio kaj akompanis lin al la Ekbrilaj Kavernoj; kaj reveninte li silentis, kaj volis diri nur, ke Gimlio sola povus trovi vortojn taŭgajn por priparoli ilin:

— Neniam antaŭe gnomo povis venki elfon en vortkonkurso, — li diris. — Nun do ni iru al Fangorno kaj ĝustigu la kalkulon!

El Profunda Kavajaĵo ili rajdis al Isengardo, kaj vidis pri kio okupas sin entoj. La tuta ŝtoncirklo estis deĵetita kaj forigita, kaj la grundo interne estis ĝardenigita, plena je hortoj kaj arboj, kaj tra ĝi fluis roĵo; sed meze de ĉio estis lago el klara akvo, kaj el ĝi leviĝis ankoraŭ la Turego de Ortanko, alta kaj nevenkebla, kaj ĝia nigra roko estis spegulata en la lageto.

Dum kelka tempo la vojaĝantoj sidis, kie iam staris la malnova pordego de Isengardo, kaj tie nun estis du arboj altaj kiel sentineloj ĉe la komenciĝo de verdranda pado kondukanta al Ortanko; kaj ili rigardis mire la faritan laboron, sed nenion vivantan ili povis vidi, ĉu fore, ĉu proksime. Sed baldaŭ ili aŭdis voĉon: “hum-hom, hum-hom”; kaj venis Arbobarbo paŝeganta laŭlonge de la pado por saluti ilin kun Rapidtrunko apude.

— Bonvenon al la Arbejo de Ortanko! — li diris. — Mi sciis, ke vi venas, sed mi laboris en la fora valo; multo estas ankoraŭ farenda. Sed ankaŭ vi ne maldiligentis fore en la sudo kaj oriento, mi aŭdas; kaj ĉio, kion mi aŭdas, estas bona, tre bona.

Poste Arbobarbo laŭdis ĉiujn iliajn farojn, pri kiuj li ŝajnis plene informita; kaj finfine li ĉesis kaj longe rigardis Gandalfon.

— Nu, vidu! — li diris. — Vi pruvigis la plej potenca, kaj prosperis ĉiuj viaj penoj. Kien vi nun volas iri? Kaj kial vi venis ĉi tien?

— Por vidi, kiel progresas via laboro, amiko mia, — diris Gandalf, — kaj por danki vin pro via helpo en ĉio, kio estas plenumita.

— *Hum*, nu tio estas sufiĉe justa, — diris Arbobarbo, — ĉar efektive entoj ludis rolon. Kaj ne nur traktante tiun, *hum*, tiun malbenitan arbomortiginton, kiu loĝis ĉi tie. Ĉar okazis granda inundo far tiuj, *burarum*, tiuj malicokulaj-nigramanaj-kurbakruraj-salikokoraj-kri-fofingraj-fetorventraj-sangsoifaj, *morimaite-sincahonda*, *hum*, nu, vi estas raso rapidema, kaj ilia plena nomo estas tiel longa kiel jaroj da turmento, tiuj orkaj fibestoj; kaj ili venis trans la riveron kaj suden el la nordo kaj ĉie ĉirkaŭ la arbaro Laŭrelindorinano, kiun ili ne povis penetri, dank' al la potenculoj, kiuj troviĝas tie. — Li riverencis al la gemastroj de Lorieno. — Kaj tiuj samaj fikreaĵoj estis pli ol surprizitaj renkontante nin ekstere sur la montetaro, ĉar ili ne aŭdis pli frue pri ni; kvankam tion oni povas diri ankaŭ pri popoloj pli valoraj. Kaj ne multaj memoros nin, ĉar ne multaj vivante eskapis nin, kaj la rivero ricevis la plejmulton el tiuj. Sed tio profitis al vi, ĉar se ili ne renkontus nin, tiuokaze la reĝo de la herblando ne rajdus malproksimen, kaj se li tamen jes, ne ekzistus hejmo, al kiu li revenus.

— Mi bone scias tion, — diris Aragorno, — kaj neniam tio estos forgesita en Minaso Tirit kaj en Edoras.

— *Neniam* estas vorto tro longa eĉ por mi, — diris Arbobarbo. — Ne dum la daŭro de viaj reĝlandoj, vi intencas diri; sed tiuj devos daŭri vere tre longe por ŝajni longaj al entoj.

— La Nova Epoko komenciĝas, — diris Gandalf, — kaj en tiu ĉi epoko eble pruviĝos, ke la regnoj de la homoj pretervivis vin, mia amiko Fangorno. Sed jam diru al mi: kio pri la tasko, kiun mi starigis al vi? Kiel fartas Sarumano? Ĉu li ankoraŭ ne tediĝis pri Ortanko? Ĉar mi ne supozas, ke li taksos plibonigita la elrigardon tra siaj fenestroj.

Arbobarbo longe rigardis Gandalfon, rigardis preskaŭ ruze, pensis Gaja.

— Ha! — li diris. — Mi supozis, ke ĝis tie vi venos. Ĉu li tediĝis pri Ortanko? Tre tediĝis fine, sed ne tiom tediĝis pri sia turego, kiom pri mia voĉo. *Hum!* Mi havigis al li kelkajn longajn rakontojn, aŭ almenaŭ kiujn oni taksus longaj en via lingvo.

— Kial do li restis por aŭskulti? Ĉu vi iris en Ortankon? — demandis Gandalf.

— *Hum*, ne, ne en Ortankon! — diris Arbobarbo. — Sed li venis al sia fenestro kaj aŭskultis, ĉar novaĵojn li ne povis akiri alimaniere, kaj kvankam li malŝategis la novaĵojn, li avidis ilin; kaj mi certigis, ke li

aŭdu ĉion. Sed mi aldonis tre multajn aferojn al la novaĵoj, kiujn estis bone por li aŭskulti. Li fariĝis treege tedita. Li ĉiam estis hastema. Tio ruinigis lin.

— Mi rimarkas, mia bona Fangorno, — diris Gandolfo, — ke tre atente vi diras *is, is, is*. Kio pri *as*? Ĉu li estas mortinta?

— Ne, ne mortinta, laŭ mia scio, — diris Arbobarbo. — Sed li foriris. Jes, li foriris. Mi permesis, ke li iru. Malmulto restis en li, kiam li elrampis, kaj lia vermulo similis palan ombron. Nu, ne diru al mi, Gandolfo, ke mi promesis reteni lin sekure, ĉar mi scias tion. Sed la aferoj ŝanĝiĝis post tiam. Kaj mi retenis lin ĝis li estis sekura, sekura je plia misfarado. Vi devus scii, ke antaŭ ĉio mi malŝatas enkarcerigon de vivantaĵoj, kaj mi ne konsentas reteni enkaĝe eĉ tiajn kreaĵojn, kiaj tiuj, pli longe ol devigas la neceso. Sendenta serpento rajtas rampi, kie ĝi volas.

— Vi eble pravas, — diris Gandolfo; — sed tiu serpento ankoraŭ posedas unu denton, al mi ŝajnas. Li havis la venenon de sia voĉo, kaj mi konjektas, ke li persvadis vin, eĉ vin, Arbobarbon, konante la molan lokon en via koro. Nu, li foriris, kaj nenio pli dirindas. Sed la Turego de Ortanko nun reiras al la Reĝo, al kiu ĝi apartenas. Kvankam eble li ne bezonos ĝin.

— Tio vidiĝos poste, — diris Aragorno. — Sed mi donos al la entoj tiun ĉi tutan valon por trakti tiel, kiel ili volas, kondiĉe ke ili vaĉu Ortankon kaj certigu, ke neniuj eniru ĝin sen mia permeso.

— Ĝi estas ŝlosita, — diris Arbobarbo. — Mi devigis Sarumanon ŝlosi ĝin kaj doni al mi la ŝlosilojn. Rapidtrunko havas ilin.

Rapidtrunko riverencis kvazaŭ arbo kliniĝanta en la vento kaj transdonis al Aragorno nigrajn ŝlosilegojn komplike formitajn, kunigitaj per ŝtala ringo.

— Mi dankas vin ankoraŭfoje, — diris Aragorno, — kaj mi adiaŭas vin. Ke via arbaro kresku pace. Kiam ĉi tiu valo estos plenigita, troviĝos pli ol sufiĉa loko okcidente de la montoj, kie iam antaŭ longe vi promenis.

La vizaĝo de Arbobarbo malĝojiĝis.

— Arbaroj eble kreskos, — li diris. — Arboj eble disvastiĝos. Sed ne entoj. Mankas entidoj.

— Tamen eble jam estas pli da espero en via serĉado, — diris Aragorno. — Oriente al vi estos malfermitaj landoj, kiuj estis longe fermitaj.

Sed Arbobarbo skuis la kapon kaj diris:

— Tio estas tre malproksima. Kaj tie troviĝas nun tro multaj homoj. Sed mi forgesas mian bonkonduton! Ĉu vi ne volos resti ĉi tie kaj iom ripozi? Kaj eble ĉeestas iuj, kiuj ŝatus trapasi la arbaron Fangorno por mallongigi la vojon al siaj hejmoj? — Li rigardis al Celeborno kaj Galadriela.

Sed ĉiuj krom Legolaso diris, ke ili devos nun adiaŭi kaj foriri suden aŭ okcidenten.

— Venu, Gimlio! — diris Legolaso. — Nun laŭ permeso de Fangorno mi vizitos la profundejojn de la Entarbaro kaj vidos tiajn arbojn, kiaj ne estas troveblaj aliloke en Mez-Tero. Vi akompanos min kaj plenumos vian promeson; kaj tiel ni plu vojaĝos kune en Mornarbaron kaj pluen.

Gimlio konsentis pri tio, kvankam ŝajne ne tre entuziasme.

— Jen do finfine okazas la finiĝo de la Kunularo de la Ringo, — diris Aragorno. — Tamen mi esperas, ke post nelonge vi revenos al mia lando kun la helpo promesita.

— Ni venos, se permesos niaj propraj mastroj, — diris Gimlio. — Nu, adiaŭ, miaj hobitoj! Vi devos jam atingi sendanĝere la proprajn hejmojn, kaj min ne tenos maldorma timo pri via endanĝeriĝo. Mi sendos informojn, kiam mi povos, kaj kelkaj el ni eble renkontiĝos de tempo al tempo; sed mi timas, ke neniam plu ni ĉiuj kuniĝos samloke.

Poste Arbobarbo adiaŭis ilin laŭvice, kaj li riverencis trifoje malrapide kaj kun respekto al Celeborno kaj Galadriela kaj diris:

— Pasis longa, longa tempo de kiam ni renkontiĝis ĉe stumpo aŭ ŝtono, *A vanimar vanimálion nostari!* Estas malĝoje, ke ni renkontiĝis nur tiel ĉe la fino. Ĉar la mondo ŝanĝiĝas; tion mi sentas en la akvo, mi sentas en la tero, kaj mi flaras tion en la aero. Al mi ŝajnas, ke ni neniam plu renkontos unu alian.

Kaj Celeborno diris:

— Mi ne scias, Plejaĝa.

Sed Galadriela diris:

— Ne en Mez-Tero, nek ĝis la landoj submaraj denove estos levitaj. Tiam en la salikejoj de Tasarinano ni eble renkontiĝos printempe. Adiaŭ!

Plejlaste Gaja kaj Grinĉjo adiaŭis la maljunan enton, kaj tiu pli-gajiĝis rigardante ilin:

— Nu, miaj ĝojuloj, ĉu vi trinkos kun mi plian gluton antaŭ ol foriri?

— Volontege, — ili respondis, kaj li kondukis ilin flanken en la ombbron de unu el la arboj, kaj tie ili vidis, ke granda ŝtona vazo estas metita. Kaj Arbobarbo plenigis tri bovlojn, kaj ili trinkis; kaj ili vidis liajn strangajn okulojn rigardantaj ilin trans la rando de lia bovlo.

— Gardu vin, gardu vin! — li diris. — Ĉar vi jam kreskis, post kiam mi lastfoje vidis vin.

Ili ridis kaj eltrinkis siajn bovlojn.

— Nu, adiaŭ! — li diris. — Kaj ne forgesu sendi al mi sciigon, se vi aŭdos en via lando novaĵojn pri entedzinoj. — Li flirtigis siajn manĝojn al la tuta societo kaj foriris inter la arbojn.

La vojaĝantoj nun rajdis pli rapide, kaj ili vojis al la Breĉo de Rohano; kaj Aragorno adiaŭis ilin finfine proksime al tiu loko, kie Grinĉjo enrigardis la Ŝtonon de Ortanko. La hobitoj malĝojis pro tiu ĉi disiĝo; ĉar Aragorno neniam perfidis ilin, kaj li estis ilia gvidinto tra multaj danĝeroj.

— Mi ŝatus havi ŝtonon, en kiu ni povus vidi ĉiujn niajn amikojn, — diris Grinĉjo, — kaj ke ni povu alparoli ilin de malproksime!

— Jam restas nur unu, kiun vi povus utiligi, — respondis Aragorno, — ĉar vi ne volus vidi, kion montrus al vi la Ŝtono de Minaso Tirit. Sed la *palantiron* de Ortanko la Reĝo retenos por vidi, kio okazas en lia regno, kaj kion faras liaj servistoj. Ĉar ne forgesu, Peregrino Tjuko, ke vi estas kavaliro de Gondoro, kaj mi ne liberigas vin el via servado. Nun vi iros forpermeso, sed mi eble revokos vin. Kaj memoru, karaj amikoj el la Provinco, ke mia regno troviĝas ankaŭ en la nordo, kaj iun tagon mi venos tien.

Poste Aragorno adiaŭis Celebornon kaj Galadrielan, kaj la Damo diris al li:

— Elfŝtono, tra mallumo vi venis al via espero, kaj jam vi posedas vian tutan deziron. Uzu bone la tagojn!

Sed Celeborno diris:

— Adiaŭ, parenco! Via sorto estu alia ol la mia, kaj via trezoro restu kun vi ĝis la fino!

Tion dirinte, ili disiĝis, kaj tiam estis la horo de sunsubiro; kaj kiam post kelka tempo ili turnis sin kaj retrorigardis, ili vidis la Reĝon de la Okcidento sidanta sur sia ĉevalo, ĉirkaŭita de siaj kavaliroj; kaj la falanta suno brilis sur ilin kaj briligis ilian armaĵon ruĝore, kaj la blanka mantelo de Aragorno estis iĝinta flamo. Tiam Aragorno prenis la verdan ŝtonon kaj tenis ĝin alte, kaj de la mano venis verda fajro.

Baldaŭ la malmultiĝinta grupo venis al Iseno, transiris ĝin, kaj venis al la transrivera dezertejo, kaj tiam ili turniĝis norden kaj transpasis la limojn de Dunlando. Kaj la dunlandanoj fuĝis kaj kaŝis sin, ĉar ili timis la elfan popolon, kvankam efektive tre malmultaj iam venis ilian landon. Sed la vojaĝantoj malatentis ilin, ĉar ili estis ankoraŭ granda grupo kaj estis bone provizitaj je ĉio bezonata; kaj ili pluiris malurĝe, starigante siajn tendojn, kiam tio eblis; kaj dum ili iris, la somero forpasadis.

Post kiam ili preterpasis Dunlandon kaj venis al lokoj, kie loĝis malmultaj personoj, kaj eĉ birdoj kaj bestoj malofte vidiĝis, ili vojaĝis tra arbaro descendanta el la Nebulecaj Montoj, kiuj nun etendiĝis je ilia dekstro. Veninte denove en nefermitan terenon ili atingis maljunulon, kiu apogis sin per bastono, kaj li estis vestita en ĉifonoj grizaj aŭ malpure blankaj, kaj post liaj kalkanoj iris alia almozulo malrekta kaj plendanta.

— Nu, Sarumano! — diris Gandolfo. — Kien vi iras?

— Kiel tio koncernas vin? — li respondis. — Ĉu vi ankoraŭ volas aranĝi miajn aferojn, kaj ĉu vi ne estas kontenta pri mia ruiniĝo?

— Vi scias la respondojn: ne kaj ne, — diris Gandolfo. — Sed ĉiukaze la tempo de miaj laboroj jam proksimiĝas al la fino. La Reĝo surprenis la ŝarĝon. Se vi atendus en Ortanko, vi vidus lin, kaj li traktus vin saĝe kaj indulge.

— Do tiom pli da motivo estas por foriri pli frue, — diris Sarumano, — ĉar de li mi deziras nek unu, nek l' alian. Fakte, se vi deziras respondon al via unua demando, mi serĉas vojon el lia reĝlando.

— Do vi denove iras malĝustan vojon, — diris Gandolfo, — kaj en via vojaĝo mi vidas neniun esperon. Sed ĉu vi rifuzas nian helpon? Ĉar tion ni proponas al vi.

— Ĉu al mi? — diris Sarumano. — Ne, volu ne rideti al mi! Mi preferas viajn brovumojn. Kaj koncerne la jenan Damon, mi ne fidus ŝin: ŝi ĉiam malamamis min kaj planis viaparte. Mi ne dubas, ke ŝi kondukis vin laŭ tiu ĉi vojo por havi la plezuron jubili pro mia malriĉeco. Se mi estus avertita pri via persekuto, mi rifuzus al vi tiun plezuron.

— Sarumano, — diris Galadriela, — ni havas aliajn komisionojn kaj zorgojn, kiuj ŝajnas al ni pli urĝaj ol persekuto de vi. Diru prefere, ke vi estas atingita de bona fortuna, ĉar nun vi havas la lastan eblecon.

— Se vere ĝi estas la lasta, mi ĝojas, — diris Sarumano, — ĉar ne ĝenos min la peno denove rifuzi ĝin. Ĉiuj miaj esperoj estas ruinigitaj, sed la viajn mi ne volas partopreni. Se tiajn vi havas. — Liaj okuloj por

momento ekardis. — Iru. Ne por nenio mi longe studadis tiujn afe-rojn. Vi kondamnis vin mem, kaj tion vi scias. Kaj havigos al mi iom da konsolo dum la vagado la penso, ke vi faligis vian propran domon, kiam vi detruis la mian. Kaj nun, kiu ŝipo vin reportos trans la vastan maron? — li mokis. — Ĉi estos ŝipo griza kaj fantomplena. — Li ridis, sed lia voĉo estis krakanta kaj hida.

— Stariĝu, idioto! — li kriis al la alia almozulo, kiu sidiĝis sur la teron; kaj li batis tiun per sia bastono. — Turnu vin! Se ĉi gloraj personoj iras sur nia vojo, ni iros alian. Stariĝu, aŭ mi donos al vi neniun pankruston por via vespermanĝo!

La almozulo turnis sin kaj pretermalrektis plorvoĉante:

— Kompatinda Grimĉjo! Kompatinda Grimĉjo! Ĉiam batata kaj malbenata. Kiom mi malamas lin! Mi ŝatus forlasi lin!

— Do forlasu lin! — diris Gandolfo.

Sed Vermlango nur direktis rigardon per la ŝmiritaj okuloj timoplenaj al Gandolfo, kaj poste pretertreniĝis malantaŭ Sarumano. Pasante la trupon, la mizera paro alvenis la hobitojn, kaj Sarumano haltis kaj gapis al ili, sed ili rigardis lin komplate.

— Do ankaŭ vi venis jubili, miaj bubetoj, ĉu? — li diris. — Al vi estas indiferentaj la mankaĵoj de almozulo, ĉu ne? Ĉar vi havas ĉion deziratan, manĝaĵon kaj belajn vestaĵojn, kaj la plej bonan pipherbon por viaj pipoj. Ho jes, mi scias! Mi scias, de kie ĝi venas. Vi ne donos pipoplenon al almozulo, ĉu?

— Mi donus, se mi havus, — diris Frodo.

— Vi povas ricevi tion, kio restas al mi, — diris Gaja, — se vi atendos momenton. — Li deĉevaliĝis kaj serĉis en la sako ĉe la selo. Poste li enmanigis al Sarumano ledan saketon. — Prenu tiom, kiom estas. Via akcepto estas bonvena, ĝi devenas de la ruboj en Isengardo.

— La mia, la mia, jes, kaj altpreze aĉetita! — kriis Sarumano, kroĉante la saketon. — Tio ĉi estas nur nominala repago; ĉar vi prenis pli, mi ĵuras. Nu, almozulo devas esti danka, se ŝtelinto redonas al li eĉ ereton de lia propraĵo. Nu, estos juste, kiam vi venos hejmen kaj trovos la aferojn en Sud-kvarono malpli agrablaj ol vi preferus. Longe en via lando estu manko de fumaĵo!

— Dankon! — diris Gaja. — Tiuokaze mi rehavu mian saketon, kiu ne estas via, kaj kiu longe kunvojaĝis kun mi. Volvu la fumherbon en vian ĉifonon.

— Unu ŝtelisto meritas alian, — diris Sarumano, turnis al Gaja la dorson kaj piedbatis Vermlangon, kaj foriris al la arbaro.

— Nu, tio plaĉas efektive! — diris Grinĉjo. — Ŝtelisto, ĉu! Kio pri nia pretendo pro embuskado, vundado kaj orka trenado de ni tra Rohano.

— Ha! — diris Sam. — Kaj li diris “aĉetita”. Kiel, mi scivolos? Kaj ne plaĉis al mi tio, kion li diris pri Sud-kvarono. Jam estas tempo, ke ni revenu.

— Certe jes, — diris Frodo. — Sed ni ne povas iri pli rapide, se ni volas vidi Bilbon. Mi iros unue al Rivendelo, malgraŭ ĉio okazebla.

— Jes, mi opinias, ke vi prefere faru tion, — diris Gandolfo. — Sed ve pri Sarumano! Mi timas, ke nenio pli estas farebla pri li. Li tute velkis. Tamen mi ne certas, ke Arbobarbo pravis; mi konjektas, ke li kapablas ankoraŭ ion misan fari laŭ maniero eta kaj malica.

Sekvatage ili venis en la nordan Dunlandon, neloĝatan sed verdan kaj agrablan terenon. Septembro komenciĝis per oraj tagoj kaj arĝentaj noktoj, kaj ili rajdis kviete ĝis ili atingis la riveron Cignorojo, kie troviĝis malnova travadejo oriente de la akvofaloj, abrupte subiĝantaj al la ebenaĵoj. Forokcidente en la nebuleto vidiĝis lagetoj kaj insuloj, kiuj serpentume vojis al Grizinundo, kie en kanoj nestis nenombreblaj cignoj.

Tiel ili venis en Eregionon, kaj finfine bela tago aŭroris, muaranta super brilaj nebuletoj; kaj rigardante de sia bivako sur malalta monto la vojaĝantoj vidis fore en la oriento la sunon trafanta tri montopintojn, kiuj baŭmis en la ĉielon tra flosaj nuboj: Karadraso, Celebdilo kaj Fanuidolo. Ili estis proksimaj al la Pordo de Morio.

Tie ili prokrastis dum sep tagoj, ĉar alvenis la tempo de alia disiĝo, kiun ili malemis realigi. Baldaŭ Celeborno, Galadriela kaj iliaj popoloj turniĝos orienten por iri tra la Ruĝkorna Pordo kaj suben laŭ la Dimrila Ŝtuparo al Arĝentvejno kaj al sia propra lando. Ili vojaĝis ĝis nun laŭ la okcidentaj vojoj, ĉar multo parolindis kun Elrondo kaj Gandolfo, kaj ĉi tie ili restadis interparolante kun siaj amikoj. Multfoje longe post kiam la hobitoj volviĝis en dormo, ili sidadis kune sub la steloj, revokante foririntajn epokojn kaj ĉiujn siajn ĝojojn kaj penojn en la mondo, aŭ konsiliĝante pri la tagoj venontaj. Se iu vaganto hazarde preterpasus, tiu vidus kaj aŭdus malmulton, kaj al li ŝajnus nur, ke li vidas grizajn figurojn ĉizitajn el ŝtono, memoraĵojn pri forgesitaj aferoj jam perditaj en landoj senhomaj. Ĉar ili ne moviĝis, nek parolis buŝe, rigardante de menso al menso; kaj nur iliaj briletaj okuloj moviĝis kaj ardiĝis, dum iliaj pensoj iris tien kaj reen.

Sed finfine ĉio estis dirita, kaj provizore ili denove disiĝis, ĝis estos

tempo de la forpaso de la Tri Ringoj. Rapide malaperinte en la ŝtonarojn kaj la ombrojn, la grizmantelaj lorienanoj rajdis al la montaro; kaj la irontoj al Rivendelo sidis sur la monteto kaj rigardis, ĝis venis el la kreskanta nebuleto ekflagro; kaj poste ili vidis nenion pli. Frodo sciis, ke Galadriela tenis alte sian ringon en signo de adiaŭo.

Sam forturnis sin kaj suspiris:

— Mi ŝatus reiri al Lorieno!

Finfine iuvespere ili venis trans la altajn erikejojn, subite, kiel ĉiam ŝajnas al vojaĝantoj, al la rando de la profunda valo de Rivendelo kaj vidis forsube la lampojn brilantajn en la domo de Elrondo. Kaj ili subeniris kaj transiris la ponton kaj alvenis la pordegon, kaj la tutan domon plenigis lumo kaj ĝoja kantado pro la hejmenveno de Elrondo.

La hobitoj unuavice, antaŭ ol manĝi, lavi sin aŭ demeti siajn mantelojn, iris serĉi Bilbon. Ili trovis lin tute solan en lia eta ĉambro. Ĝin plenigis malordaĵo da papero kaj plumoj kaj kraĵonoj; sed Bilbo sidis sur seĝeto antaŭ malgranda hela fajro. Li aspektis tre maljuna, sed trankvila kaj dormema.

Li malfermis siajn okulojn kaj supren rigardis, kiam ili eniris.

— Saluton, saluton! — li diris. — Do vi revenis, ĉu? Kaj morgaŭ estos mia naskiĝdatreveno, cetere. Kiom vi lertas! Ĉu vi scias, ke mi estos cent-dudek-naŭ-jara? Kaj post ankoraŭ unu jaro, se mi travivos, mi egalos al la Maljuna Tjuko. Mi ŝatus superi lin, sed ni vidis.

Post la festado de la naskiĝtago de Bilbo la kvar hobitoj restis en Rivendelo plurajn tagojn, kaj ili multe sidis kun sia maljuna amiko, kiu pasigis la plimulton de sia tempo nun en sia ĉambro, krom por manĝi. Por tio li kutime estis tre akurata, kaj por tio li malofte ne vekiĝis ĝustatempe. Sidante ĉirkaŭ la fajro ili rakontis al li laŭvice ĉion, kion ili memoris, pri siaj vojaĝoj kaj aventuroj. Komence li ŝajnis fari notojn, sed li ofte endormiĝis; kaj vekiĝinte li kutimis diri:

— Kiel grandioze! Kiel mirinde! Sed kie ni troviĝis?

Tiam ili daŭrigis la rakonton ekde la punkto, kie li ekdormis.

La nura parto, kiu ŝajnis vere vigligi lin kaj reteni lian atenton, estis la priskribo pri la kronado kaj geedziĝo de Aragorno.

— Mi estis invitita al la edziĝfestoj, kompreneble, — li diris. — Kaj mi atendis ĝin sufiĉe longe. Sed iel, kiam venis la momento, mi konstatis, ke mi havis ĉi tie multon farendan; kaj pakado estas tia ĝeno.

Kiam pasis preskaŭ du semajnoj, Frodo rigardis tra sia fenestro kaj vidis, ke nokte venis frostoj, kaj la araneaĵoj similis blankajn retojn. Tiam subite li komprenis, ke li devas iri kaj adiaŭi Bilbon. La vetero estis plu trankvila kaj favora, post unu el la plej viglaj someroj laŭ memoro de la homoj. Sed venis oktobro, kaj la vetero nepre ŝanĝiĝos baldaŭ, kaj komenciĝos denove pluvo kaj ventoj. Kaj ankoraŭ estis longa vojo traierota. Tamen ne la penso pri la vetero vere agitita lin. Li sentis, ke jam estas tempo reiri al la Provinco. Ankaŭ Sam sentis tion. Ĝuste la antaŭan vesperon li diris:

— Nu, sinjoro Frodo, ni multe vojaĝis kaj multon vidis, kaj tamen mi opinias, ke ni ne trovis lokon pli bonan ol tiu ĉi. Ĉi tie troviĝas iom el ĉio, se vi min komprenas: la Provinco, kaj la Ora Arbaro, kaj Gondoro, kaj reĝdomoj, kaj tavernoj, kaj herbokampoj, kaj montoj ĉiuj intermiksitaĵoj. Kaj tamen, ial, mi sentas, ke ni devus foriri baldaŭ. Mi zorgas pro mia avulo, se diri la veron.

— Jes, iom el ĉio, Sam, escepte de la maro, — Frodo respondis, kaj li nun ripetis tion al si: “Escepte de la maro”.

Tiun saman tagon Frodo interparolis kun Elrondo, kaj estis interkonsentite, ke ili foriru la postan matenon. Ĝojigante ilin Gandolfo diris:

— Mi opinias, ke ankaŭ mi kuniru. Minimume ĝis Brio. Mi volas vidi Buterburon.

Vespere ili iris adiaŭi Bilbon.

— Se necesas iri, vi devas, — li diris. — Mi bedaŭras tion. Vi mankos al mi. Estas agrable nur scii, ke vi troviĝas en la loko. Sed mi iĝas tre dormema.

Poste li donacis al Frodo sian mitrilan tunikon kaj Pikilon, forgesinte, ke li jam faris tion; kaj li donacis al li ankaŭ kelkajn librojn pri tradicioj, kiujn li diversokaze verkis, skribitajn en la araneaĵa manskribo, kaj etikedis ilin surkovrile: *Tradukis el la elfa B. B.*

Al Sam li donacis saketon da oro.

— Preskaŭ la lasta el la Smaŭga rikolto, — li diris. — Eble tio utilis, se vi pensas pri edziĝo, Sam.

Sam ruĝiĝis.

— Ne multon doneblan al vi, junuloj, mi havas, — li diris al Gaja kaj Grinĉjo, — krom bonaj konsiloj. — Kaj donacinte al ili sufiĉajn ekzemplojn de tio, li aldonis lastan eron provinc-maniero: — Ne lasu, ke viaj kapoj iĝu tro grandaj por viaj ĉapeloj! Se vi baldaŭ ne ĉesos kreski, vi konstatos, ke ĉapeloj kaj vestaĵoj multekostas.

— Sed se vi volas superi la Maljunan Tjukon, — diris Grinĉjo, — mi ne vidas, kial ni ne provu superi la Bovblekulon.

Bilbo ridis kaj elpoŝigis du belajn pipojn kun perlamotaj buŝpecoj kaj ligitaj per delikata arĝento.

— Pensu pri mi, kiam vi fumos ilin. La elfoj kreis ilin por mi, sed mi ne plu fumas. — Li subite klinis la kapon kaj endormiĝis por iom da tempo, kaj revekiĝinte li diris: — Nu, kie ni troviĝas? Jes, kompreneble, donacante. Kio memorigas min: kio okazis al mia ringo, Frodo, kiun vi forportis?

— Mi perdis ĝin, kara Bilbo, — diris Frodo. — Mi liberiĝis de ĝi, vi scias.

— Kiel domaĝe! — diris Bilbo. — Mi ŝatus ĝin revidi. Sed ne, kiel mi stultas! Ĝuste por tio vi iris, ĉu ne: por liberiĝi de ĝi? Sed estas tiel konfuzo, ĉar tiom da aliaj aferoj ŝajnas enmiksiĝi kun tio: la aferoj de Aragorno, kaj la Blanka Konsilio, kaj Gondoro, kaj la rajdistoj, kaj suduloj, kaj olifontoj — ĉu vi vere vidis tian, Sam? — kaj kavernoj, kaj turoj, kaj oraj arboj, kaj kiu scias kio cetere. Mi evidente revenis laŭ vojo multe tro rekta el mia vojaĝo. Al mi ŝajnas, ke Gandolfo devis cir-kuligi min iomete. Sed tiukaze la aŭkcio finiĝus antaŭ ol mi revenus, kaj min trafus eĉ pli da ĝenoj. Ĉiel, estas jam tro malfrue; kaj mi vere opinias, ke estas pli komforte sidi ĉi tie kaj aŭdi pri la tuto. La fajro tre varmkaresas ĉi tie, kaj la nutraĵoj ege bongustas, kaj troviĝas elfoj, kiam oni bezonas ilin. Kion plian oni povus deziri?

*La Vojo ĉiam plu pilgrimas
suben de l' pordo de l' komenco.*

*La Vojo jam tre malproksimas,
aliaj sekvu, laŭ intenco!*

*Ili vojaĝon novan iru,
sed mi finfine lacpiede
jam al taverno luma stiru,
ripoz' vespera dormoscede.*

Kaj dum Bilbo murmuris la lastajn vortojn, lia kapo kliniĝis al lia brusto kaj li profunde endormiĝis.

La vespero profundigis en la ĉambro, kaj la fajrolumo brulis pli hele; kaj ili rigardis la dormantan Bilbon kaj vidis, ke lia vizaĝo ride-tas. Dum kelka tempo ili sidis silente; kaj poste Sam, ĉirkaŭrigardante en la ĉambro kaj al la ombroj flagrantaj sur la muroj, diris mallaŭte:

— Al mi ŝajnas, sinjoro Frodo, ke li ne multe verkis, dum ni forestis. Li jam neniam skribos nian historion.

Tiumomente Bilbo malfermis unu okulon, kvazaŭ li aŭdintus. Poste li vekis sin kaj diris:

— Vidu, mi tiom dormemiĝas. Kaj kiam mi disponas tempon por skribi, mi vere ŝatas nur verki poezion. Mi scivolas, mia kara Frodo, ĉu multe vin ĝenus ordigi iom la aferojn antaŭ ol foriri? Kolektu miajn notojn kaj paperojn kaj kunprenu ilin, se vi konsentas. Komprenu, ke mi ne disponas multe da tempo por elektado kaj aranĝado kaj tiel plu. Petu helpon de Sam, kaj revenu ordiginte ĉion, kaj mi trarigardos ĝin. Mi ne tro kritikemos.

— Kompreneble mi tion faros! — diris Frodo. — Kaj kompreneble mi baldaŭ revenos: ne plu estos danĝere. Reala reĝo nun estas, kaj li baldaŭ ordigos la vojojn.

— Dankon, karulo! — diris Bilbo. — Tio vere malŝarĝas mian menson.

Dirinte tion li denove profunde endormiĝis.

La postan tagon Gandolfo kaj la hobitoj adiaŭis Bilbon en lia ĉambro, ĉar ekstere estis froste; kaj poste ili adiaŭis Elrondon kaj ties tutan domanaron.

Dum Frodo staris ĉesojle, Elrondo deziris al li bonan vojaĝon, benis lin kaj diris:

— Mi opinias, Frodo, ke eble ne necesos, ke vi revenu, krom se vi revenos tre baldaŭ. Ĉar ĉirkaŭ la sama jarsezono, kiam la folioj oros antaŭfale, serĉu Bilbon en la arbaroj de la Provinco. Mi estos kun li.

Tiujn vortojn aŭdis neniu alia, kaj Frodo konservis ilin al si.

Ĉapitro 7

HEJMENIRE

Finfine la vizaĝoj de la hobitoj estis turnitaj al la hejmo. Ili avidis nun vidi denove la Provincon; sed komence ili rajdis malrapide, ĉar Frodo estis maltrankvila. Kiam ili alvenis la Transpasejon de Bruineno li haltis kaj ŝajnis malema rajdi en la fluon; kaj ili rimarkis, ke dum kelka tempo liaj okuloj ŝajne ne vidis ilin aŭ ĉirkaŭajn aferojn. La tuton de tiu tago li silentis. Estis la sesa de oktobro.

— Ĉu al vi doloras, Frodo? — demandis Gandalfo kviete, dum li rajdis apud Frodo.

— Nu jes, fakte, — diris Frodo. — Temas pri mia ŝultro. La vundo doloras, kaj memoro pri la mallumo pezas sur min. Tio okazis antaŭ unu jaro de hodiaŭ.

— Ve! Ekzistas vundoj, kiuj ne estas komplete kuraceblaj.

— Mi timas, ke pruvigōs tiel ĉe la mia. Oni ne povas vere reiri. Kvankam mi eble revenos en la Provincon, ĝi ne ŝajnos sama. Mi estas vundita per tranĉilo, pikilo, dentoj kaj longedaŭra ŝarĝo. Kie mi trovos ripozon?

Gandalfo ne respondis.

Fine de la sekva tago la doloro kaj maltrankvilo estis forpasintaj, kaj Frodo denove estis gaja, tiel gaja kvazaŭ li ne memorus la nigron de la antaŭa tago. Post tio la vojaĝo progresis bone, kaj la tagoj rapide pasis; ĉar ili rajdis malstreĉe, kaj ofte ili prokrastis en la belaj arbaretoj, kie la folioj ruĝis kaj flavis en la aŭtuna sunlumo. Finfine ili atingis Veterverton; kaj tiam ekvesperiĝis, kaj la ombro de la monteto kuŝis sombre sur la vojo. Tiam Frodo petis, ke ili hastu, kaj li ne volis rigardi al la monto, sed trarajdis ĝian ombron kun la klinita kapo kaj mantelo dense surtirita. Tiunokte la vetero ŝanĝiĝis, kaj el la okcidento venis vento pluvŝarĝita, kaj tiu blovis akre kaj malvarme, kaj la flavaj folioj kirligis birdece en la aero. Kiam ili alvenis la Ĉetarbaron, la branĉoj estis jam preskaŭ senfoliaj, kaj kurtenego da pluvo forvalis antaŭ ili la Brian Monteton.

Tiel estis, ke proksime al la fino de sovaĝa kaj malseka vespero en la lastaj tagoj de oktobro la kvin vojaĝantoj suprenrajdis laŭ la ascenda vojo kaj alvenis la sudan enirejon de Brio. Ĝi estis firme ŝlosita; kaj la pluvo blovis sur iliajn vizaĝojn, kaj sur la malheliĝinta ĉielo preterrapidis malaltaj nuboj, kaj iliaj koroj iomete deprimiĝis, ĉar ili atendis pli entuziasman bonvenigon.

Post kiam ili kriis multfoje, finfine elvenis pordisto, kaj ili rimarkis, ke li portas bastonegon. Li rigardis ilin timeme kaj suspekteme; sed kiam li notis la ĉeeston de Gandolfo, kaj ke ties kunuloj estas hobi-toj, malgraŭ ilia stranga ekipaĵo, tiam li pligajiĝis kaj bonvenigis ilin.

— Envenu! — li diris, malŝlosante la pordon. — Ni ne restos por interŝanĝi novaĵojn ĉi tie ekstere en la malseka bruteca vespero. Sed maljuna Barlimano sendube bonvenigos vin ĉe *La Poneo*, kaj tie vi aŭdos ĉiun aŭdindaĵon.

— Kaj tie vi aŭdos pli poste ĉion, kion ni diros, kaj pli, — ridis Gandolfo. — Kiel fartas Henĉjo?

La pordisto malridetis kaj diris:

— Foriris. Sed prefere demandu Barlimanon. Bonan vesperon!

— Bonan vesperon al vi! — ili diris kaj trapasis; kaj tiam ili rimarkis, ke malantaŭ la apudvoja dornbarilo estis konstruita longa malalta kabano, kaj kelkaj homoj jam eliris kaj gaxis al ili trans la barilon. Kiam ili alvenis al la domo de Vilĉjo Filikĉjo, ili vidis, ke ties dornbarilo estas ĉifita kaj neglektita, kaj ĉiuj fenestroj estis trabobaritaj.

— Ĉu vi supozas, ke vi mortigis lin per tiu pomo, Sam? — diris Grinĉjo.

— Mi ne estas tiel optimisma, sinjoro Grinĉjo, — diris Sam. — Sed mi ŝatus scii, kio okazis pri tiu kompatinda poneo. Ĝi multfoje perturbis mian menson, kaj la lupoj ululis kaj tiel plu.

Finfine ili venis al *La Pranca Poneo*, kaj almenaŭ tiu aspektis ekstere neŝanĝita; kaj malantaŭ la ruĝaj kurtenoj en la subaj fenestroj estis lumoj. Ili sonorigis, kaj Nobo venis al la pordo, kaj malfermis ĝin fendete kaj trarigardis; kaj kiam li vidis ilin starantaj sub la lampo, li eligis surprizkrion:

— Sinjoro Buterburo! Mastro! Ili revenis!

— Ho, ĉu vere? Mi faros al ili instruon, — aŭdiĝis la voĉo de Buterburo, kaj li elkuris, kaj en la mano li tenis klabon. Sed vidante, kiuj ili estas, li haltis abrupte, kaj la nigra malrido sur lia vizaĝo ŝanĝiĝis al miro kaj ĝojo.

— Nobo, vi lankapa kreteno! — li kriis. — Ĉu vi ne kapablas nomi la malnovajn amikojn? Vi ne devus tiel timigi min en la epoko malsekura. Nu, nu! Kaj de kie vi venis? Mi ne atendis revidi iun el via grupo, fakte: irinta foren en la Sovaĝejon kun tiu Paŝegulo, dum ĉeumis tiuj Nigraj Homoj. Sed mi vere ĝojas revidi vin, kaj neniun pli ol Gandalfon. Venu! Venu! Ĉu la samajn ĉambrojn, kiel antaŭe? Ili estas liberaj. Efektive, la plimultaj ĉambroj estas liberaj nun, kion mi ne kaŝas antaŭ vi, ĉar vi rimarkos tion sufiĉe senprokraste. Kaj mi kontrolos, kio estas farebla pri vespermanĝo, laŭeble baldaŭ; sed provizore iom mankas laborantoj. He, Nobo vi sintrenulo! Diru al Bobo! Ha, sed tion mi forgesis, Bobo jam foriris: iras hejmen al sia familio nun. Nu, konduku la poneojn de la gastoj al la stalaro, Nobo! Kaj sendube vi mem kondukos vian ĉevalon al la stalo, Gandolfo. Bela besto, kiel mi diris, kiam mi la unuan fojon ekvidis ĝin. Nu, venu! Sentu vin kvazaŭ hejme!

Sinjoro Buterburo ĉiuokaze ne ŝanĝis sian parolmanieron, kaj li ŝajnis ankoraŭ vivi en senspira dismoviĝo. Kaj tamen preskaŭ neniuj ĉeestis, kaj ĉio estis silenta; el la komuna ĉambro aŭdiĝis mallaŭta murmuro de ne pli ol du-tri voĉoj. Kaj vidate de pli proksime per la lumo de du kandeloj, kiujn li flamigis kaj portis antaŭ ili, la vizaĝo de la tavernisto aspektis iom sulkoplena kaj zorgotuŝita.

Li kondukis ilin tra koridoro al la salono, uzita de ili dum tiu stranga nokto antaŭ pli ol unu jaro; kaj ili sekvis lin, iom maltrankviligite, ĉar al ili ŝajnis klare, ke maljuna Barlimano bravmiene kaŝas iun ĉagrenon. La aferoj ne plu estis tiaj, kiaj ili estis antaŭe. Sed ili nenion diris kaj atendis. Kiel ili antaŭsupozis, sinjoro Buterburo venis al la salono post vespermanĝo por konstati, ĉu ĉio estis laŭ ilia deziro. Tiel certe estis: neniuj malbona ŝanĝiĝo ĝis tiam okazis pri la biero kaj manĝaĵoj ĉe *La Poneo*.

— Nu, mi ne aŭdacos proponi, ke vi venu al la komuna ĉambro hodiaŭ nokte, — diris Buterburo. — Vi certe lacas; kaj ĉiuokaze ne multaj personoj estas tie hodiaŭ vespere. Sed se vi povos konsenti al mi horduonon antaŭ ol vi enlitiĝos, mi kore ŝatos iom interparoli kun vi, kviete inter ni.

— Ĝuste tion ankaŭ ni ŝatus, — diris Gandolfo. — Ni ne estas lacaj. Ni vivis malstreĉe. Ni estis malsekaj, malvarmaj kaj malsataj, sed tion vi kuracis. Venu, sidiĝu! Kaj se vi havas iom da pipherbo, ni benos vin.

— Nu, se vi mendus ion alian, mi pli kontentus, — diris Buterburo. — Ĝuste pri ĝi ni spertas malabundon pro tio, ke ni havas nur tiom,

kiom ni mem kultivas, kaj tiom ne sufiĉas. Neniom estas havebla de la Provinco nuntempe. Sed mi faros laŭeble.

Kiam li revenis, li alportis al ili sufiĉon por unu-du tagoj, bulon da foliaro netranĉita.

— Sud-linĉa, — li diris, — kaj la plej bona, kiun ni havas; sed ne egalas al la Sud-kvarona, kiel mi ĉiam asertis, kvankam mi subtenas Brion rilate la plimultajn aferojn, pardonpete.

Ili sidigis lin en granda seĝo apud la lignofajro, kaj Gandolfo sidiĝis aliflanke de l' kameno, kaj la hobitoj sur malaltaj seĝoj inter ili; kaj poste ili paroladis dum multaj horduonoj kaj interŝanĝis ĉiujn novaĵojn, kiujn sinjoro Buterburo volis aŭdi aŭ komuniki. La plimulto el la aferoj rakontataj de ili nur mirigis kaj konfuzis ilian gastiganton, kaj superis lian konceptivon; kaj ili ellogis malmultajn komentojn krom: “Ĉu vi diras”, ofte ripetitan malgraŭ la atesto de l' propraj oreloj de sinjoro Buterburo.

— Ĉu vi diras, sinjoro Baginzo, aŭ ĉu temas pri sinjoro Submonteto? Mi tiom konfuziĝas. Ĉu vi diras, Mastro Gandolfo? Nu, kiel strange! Kiu supozus tion en nia tempo!

Sed li ja diris multon siaflanke. La aferoj statas pli ol malbone, li kurtimis diri. Komerco ne estis eĉ mezbona, ĝi estis sendiskute malbona.

— Neniu proksimiĝas nun al Brio de ekstere, — li diris. — Kaj la brianoj plejparte restas hejme kaj baras siajn pordojn. Ĉio devenas de tiuj novevenintoj kaj banditoj, kiuj komencis alveni laŭ la Verdvojo dum la pasinta jaro, kiel vi eble memoras; sed poste venis aliaj. Iuj estis nur kompatinduloj, forkurantaj de danĝero; sed la plimulto estis maliculoj, plenaj de rabemo kaj miso. Kaj okazis problemoj eĉ ĉi tie en Brio, gravaj problemoj. Nu, okazis vera interbatiĝo, kaj kelkaj estis mortigitaj, efektive mortigitaj! Se vi volas kredi min.

— Mi certe kredas, — diris Gandolfo. — Kiom da?

— Tri kaj du, — diris Buterburo, aludante la grandulojn kaj la malgrandulojn. — Kompatinda Mato Erikpiedo, kaj Raŭlo Pomodoro, kaj eta Tomĉjo Prendorno el trans la Monteto; kaj Vilĉjo Bankso el tie-supre, kaj unu el la Submontetoj el Transio: ĉiuj bonuloj, kaj ili mankas. Kaj Henĉjo Kaprofolio, kiu antaŭe gardis la okcidentan pordon, kaj tiu Vilĉjo Filikĉjo, ili intervenis flanke de la fremduloj, kaj ili foriris kun tiuj; kaj laŭ mia opinio ili enlasis ilin. Je la punkto de la interbatiĝo, mi volas diri. Kaj tio estis post kiam ni indikis al ili la pordojn kaj forpuŝis ilin: antaŭ la jarfino tio estis; kaj la batalo okazis frue en la Nova Jaro, post la peza neĝado, kiun ni spertis. Kaj nun ili iĝis

rabistoj kaj loĝas ekstere, sin kaŝinte en la arbaroj aliflanke de Arĉeto, kaj en la norda sovaĝejo. Similas al io el la malbonaj pratagoj, pri kiuj diras la rakontoj, laŭ mi. Ne estas sekure sur la vojoj kaj neniu iras malproksimen, kaj oni ŝlosas la domojn je frua horo. Ni devas starigi sentineleojn ĉirkaŭ la tuta barilaro kaj postenigi multajn homojn ĉe la enirejoj nokte.

— Nu, neniu ĝenis nin, — diris Grinĉjo, — kaj ni alvenis malrapide kaj ne vaĉis. Ni supozis lasi malantaŭe ĉiujn problemojn.

— Ha, tion vi ne faris, sinjoro, iom pli bedaŭrinde, — diris Buterburo. — Sed ne mirinde, ke ili lasis vin netuŝataj. Ili ne atakas armitojn kun glavoj kaj kaskoj kaj ŝildoj kaj tiel plu. Devigus ilin pensi denove, tio. Kaj mi devas diri, ke iom konsternis min ekvidado de vi.

Tiam la hobitoj subite konstatis, ke la homoj mire rigardis ilin ne pro la surpriziĝo pri ilia reveno, sed pro miro pri ilia ekipaĵo. Ili mem tiom kutimiĝis al militado kaj rajdado en bone ekipitaj trupoj, ke ili tute forgesis pri la brila armaĵo vidiĝanta sub la manteloj, kaj pri la kaskoj de Gondoro kaj Rohano, kaj pri la belaj insignoj sur iliaj ŝildoj, kaj ke tiuj aspektus fremdulece en ilia propra lando. Kaj ankaŭ Gandolfo nun rajdas sian altan grizan ĉevalon, tute vestita en blanko kun mantelego blua kaj arĝenta sur la tuto, kaj kun la longa glavo Glamdringo ĉe sia flanko.

— Nu, nu, se ili timas nur kvinon el ni, — Gandolfo ridis, — ni renkontis malamikojn pli malbonajn dum nia vojaĝado. Sed ĉiuokaze ili lasos vin trankvilaj nokte dum nia restado.

— Kiom longa estos tio? — diris Buterburo. — Mi ne malkonsentus, ke ni plezure havus vin ĉi tie dum kelka tempo. Vidu, ni ne kutimiĝis al tiaj problemoj; kaj ĉiuj disiruloj foriris, diras la homoj. Mi opinias, ke ĝis nun ni ne ĝuste komprenis, kion ili faris por ni. Ĉar ĉirkaŭiris io pli malbona ol rabistoj. Lupoj hurlis ĉirkaŭ la bariloj dum la pasinta vintro. Kaj en la arbaroj estis malhelaj formoj, teruraĵoj, pensoj pri kiuj fridigas la sangon. Ĉio estis tre perturba, se vi min komprenas.

— Mi supozas, ke jes, — diris Gandolfo. — Preskaŭ ĉiuj landoj estis perturbitaj lastatempe, tre perturbitaj. Sed gajiĝu, Barlimano! Vi troviĝis rande de tre grandaj problemoj, kaj mi ĝojas nur aŭdi, ke vi ne enestis pli profunde. Sed tempo pli bona estas venonta. Eble pli bona ol vi entute memoras. Revenis la disiruloj. Ni revenis kun ili. Kaj ekzistas denove reĝo, Barlimano. Baldaŭ li turnos sian atenton ĉi tien. Tiam la Verdvojo estos ree malfermita, kaj liaj kurieroj venos norden,

kaj okazos venoj-iroj, kaj la malicaĵoj estos forpelitaj el la dezertejoj. Fakte la dezertejoj post kelka tempo ne plu estos dezertejoj, kaj troviĝos homoj kaj kampoj, kie iam estis sovaĝejo.

Sinjoro Buterburo skuis la kapon.

— Se survoje estos kelkaj decaj respektinduloj, tio ne domaĝos, — li diris. — Sed ni deziras neniom pli da kanajlaro kaj banditoj. Kaj eksterulojn ni ne deziras en Brio, aŭ entute proksime al Brio. Ni deziras, ke oni lasu nin trankvilaj. Mi ne deziras amason da fremduloj bivakantaj ĉi tie kaj ekloĝantaj tie kaj disŝirantaj la sovaĝan terenon.

— Oni lasos vin trankvilaj, Barlimano, — diris Gandolfo. — Estas sufiĉa loko por regnoj inter Iseno kaj Grizinundo, aŭ sur la bordo sude de Brandovino, sen ke iu loĝu interne de multtaga rajdado el Brio. Kaj multaj homoj antaŭe loĝis en fora nordo, cent mejlojn aŭ pli de ĉi tie, ĉe la fora ekstremo de la Verdvojo, sur la Nordaj Montetoj kaj apud la lago Evendimo.

— Fore ĉe Mortintula Ŝtonmuro, ĉu? — diris Buterburo, mienante eĉ pli dubeme. — Tiu tereno estas hantata, oni diras. Neniu krom rabistoj irus tien.

— Tien iras la disiruloj, — diris Gandolfo. — Mortintula Ŝtonmuro, laŭ vi. Tiel ĝi estas nomita dum longaj jaroj, sed ĝia ĝusta nomo, Barlimano, estas Fornosto Ereno, Norburio de la Reĝoj. Kaj la Reĝo denove venos tien iam; kaj tiam vi havos iujn bravulojn trarajdantaj.

— Nu, tio sonas pli esperige, mi konsentas, — diris Buterburo. — Kaj tio favoros la komercadon, sendube. Kondiĉe, ke li lasos Brion trankvila.

— Li tion faros, — diris Gandolfo. — Ĝin li konas kaj amas.

— Ĉu vere? — diris Buterburo iom perpleksigite. — Tamen mi certe ne scias, kial li faru tion, sidante sur sia granda trono supre en sia kastelego, centojn da mejloj for. Kaj trinkante vinon el ora pokalo, tio ne mirigus min. Kiom koncernas lin *La Poneo* aŭ kruĉoj da biero? Malgraŭ tio, ke mia biero estas bonkvalita, Gandolfo. Ĝi estas elstare bonkvalita, post kiam vi venis en la aŭtuno de la pasinta jaro kaj aprobe traktis ĝin. Kaj tio estis konsolo inter problemoj, necesas diri.

— Ha! — diris Sam. — Sed li diras, ke via biero estas ĉiam bonkvalita.

— Li diras?

— Kompreneble, li diras. Li estas Paŝegulo. La ĉefo de la disiruloj. Ĉu vi ankoraŭ ne enkapigis tion?

Ĝi finfine enkapigiĝis, kaj la vizaĝo de Buterburo estis studinde

miroplena. La okuloj sur lia larĝa vizaĝo rondiĝis, kaj lia buŝo gape malfermiĝis, kaj li anhelis.

— Ĉu Paŝegulo! — li ekkriis, kiam li rehavis spirkapablon. — Tiu kun krono kaj tiel plu kaj ora pokalo! Nu, al kio ni venas?

— Al tempo pli prospera, almenaŭ en Brio, — diris Gandolfo.

— Tion mi esperas, tute certe, — diris Buterburo. — Nu, tio estas la plej agrabla babilado, kiun mi spertis dum longega tempo. Kaj mi ne kontestas, ke mi dormos pli facile hodiaŭ nokte kaj kun pli leĝera koro. Vi donis al mi multegon pripensindan, sed tion mi prokrastos ĝis morgaŭ. Mi iras liten, kaj sendube ankaŭ vi plezure enlitiĝos. He, Nobo! — li vokis, irinte al la pordo. — Nobo, vi sintrenulo! Nobo! — li diris al si, manfrapante al si la frunton. — Nu, pri kio tio memorigas min?

— Espereble ne pri alia forgesita letero, sinjoro Buterburo? — diris Gaja.

— Nu, nu, sinjoro Brandoboko, ne memorigu min pri tio! Sed vidu, vi rompis mian pensĉenon. Nu, kie mi troviĝis? Nobo, stalaro, ha! Pri tio temas. Mi havas ion, kio apartenas al vi. Se vi memoras pri Vilĉjo Filikĉjo kaj la ĉevalrabado: tiu poneo, kiun vi aĉetis, nu, ĝi estas ĉi tie. Ĝi revenis per si mem, ĉu ne. Sed kie ĝi estintis, tion vi scias pli bone ol mi. Ĝi estis tiel vila, kiel maljuna hundo kaj svelta kiel vestaĵvergo, sed ĝi estis vivanta. Nobo prizorgis ĝin.

— Kio! Mia Vilĉjo? — kriis Sam. — Nu, mi naskiĝis bonŝanca, malgraŭ la diroj de mia Avulo. Jen plenumiĝis ankoraŭ unu deziro! Kie ĝi estas?

Sam rifuzis enlitiĝi antaŭ ol viziti Vilĉjon en la stalo.

La vojaĝantoj restadis en Brio la tutan postan tagon, kaj sinjoro Buterburo ĉiuokaze ne rajtis plendi pri sia komerco la postan vesperon. Scivolemo venkis ĉiujn timojn, kaj lia taverno estis plenplena. Pro ĝentileco la hobitoj vizitis la komunan ĉambron vespere kaj respondis sufiĉe multajn demandojn. Ĉar memoroj de la brianoj retenemas, oni multfoje demandis al Frodo, ĉu li verkis sian libron.

— Ankoraŭ ne, — li respondis. — Mi aktuale iras hejmen por ordigi miajn notojn. — Li promesis pritrakti la mirindajn okazintaĵojn en Brio, kaj tiel igi pli interesa libron, kiu verŝajne pritraktas ĉefe la forĝajn kaj malpli gravajn aferojn “tie sude”.

Poste unu el junaj homoj postulis kanton. Sed je tio ekestis silento, kaj li estis brovume oponita, kaj la postulo ne estis ripetita. Evidente mankis deziro pri iuj malraciaj okazaĵoj en la komuna ĉambro denove.

Nenia ĝenado dumtage, nek ajna bruo dumnokte perturbis la trankvilon de Brio, dum la vojaĝantoj restadis tie; sed la postan matenon ili ellitiĝis frue, ĉar la vetero plu pluvemis, ili volis atingi la Provincon antaŭ la noktigo, kaj tio postulis longan rajdadon. Ĉiuj brianoj eliris por adiaŭi ilin, kaj estis pli gajhumoraj ol ili estis jam dum unu jaro; kaj tiuj, kiuj ne vidis pli frue la fremdulojn en ilia tuta ekipaĵo, gapis mire al ili: al Gandolfo kun ties blanka barbo, kaj la lumo kiu ŝajnis ekbrili de li, kvazaŭ lia blua mantelo estus nur nubo sur sunlumo; kaj al la kvar hobitoj kvazaŭ kavaliroj vagantaj el rakontoj preskaŭ forgesitaj. Eĉ tiuj, kiuj primokis ĉian paroladon pri la Reĝo, komencis pensi, ke eble en tio estas iomete da vero.

— Nu, bonŝancon al via vojo, kaj bonŝancon al via reveno hejmen! — diris sinjoro Buterburo. — Mi devas averti vin, ke ankaŭ en la Provinco ne ĉio estas en ordo, se tio, kion ni aŭdas, estas vera. Oni diras pri strangaj okazaĵoj. Sed io elpelas alion, kaj min plenokupis la propraj ĉagrenoj. Sed se mi rajtas aŭdaci, vi revenis ŝanĝitaj el via vojaĝado, kaj jam aspektas kiel personoj kapablaj senprokraste pritrakti problemojn. Sendube vi baldaŭ ordigos ĉion. Bonŝancon al vi! Kaj ju pli ofte vi revenos, des pli kontenta mi estos.

Ili adiaŭis lin kaj forrajdis, kaj trapasis la okcidentan pordon kaj pluiris al la Provinco. Poneo Vilĉjo akompanis ilin, kaj kiel antaŭe ĝi portis sufiĉe multe da pakaĵo, sed ĝi trotis apud Sam kaj ŝajnis tute kontenta.

— Mi scivolas, kion aludis maljuna Barlimano, — diris Frodo.

— Mi povas diveni iom el ĝi, — sombre diris Sam. — Kion mi vidis en la spegulo: arbojn distranĉitajn kaj tiel plu, kaj mian Avulon forpelitan el la Vico. Mi devis reveni pli rapide.

— Kaj evidente io misas en la Suda Kvarono, — diris Gaja. — Ekzistas ĝenerala manko de pipherbo.

— Kio ajn ĝi estas, — diris Grinĉjo, — Lodo troviĝos ĉe la fundo, pri tio vi povas esti certaj.

— Ĉefunde, sed ne plej profunde, — diris Gandolfo. — Vi forgesis pri Sarumano. Li ekinteresiĝis pri la Provinco antaŭ ol Mordoro.

— Nu, ĉeestas vi, — diris Gaja, — do la aferoj baldaŭ ordigos.

— Mi ĉeestas nun, — diris Gandolfo, — sed baldaŭ mi ne. Mi ne iros al la Provinco. Vi mem ordigu ĝiajn aferojn; por tio vi estas trejnitaj. Ĉu vi ankoraŭ ne komprenas? Mia tempo forpasis: ne plu estas mia tasko ordigi aferojn, nek helpi aliulojn tion fari. Kaj koncerne vin,

karaj amikoj, helpon vi ne bezonos. Vi jam maturiĝis. Maturiĝis tre forte; inter la grandiozuloj vi troviĝas, kaj mi tute ne timas pro iu ajn el vi.

» Sed, se vi volas scii, mi baldaŭ flankeniros. Mi iros por longe interparoli kun Bombadiljo: tian interparolon mi neniam havis en mia tuta tempo. Li estas muskokovrito, kaj mi estis ŝtono, kies sorto estas ruliĝi. Sed miaj tagoj de ruliĝado finiĝas, kaj nun ni havos multon interparolindan.

Post kelka tempo ili alvenis la lokon sur la Orienta Vojo, kie ili adiaŭis Bombadiljon; kaj ili esperis kaj duone atendis vidi lin staranta tie por saluti ilin preterpasantaj. Sed pri li estis neniu indiko; kaj griza nebuleto kovris la Dolmenejon sude, kaj profunda vualo la foran Malnovan Arbaron.

Ili haltis kaj Frodo rigardis suden sopireme.

— Mi tre ŝatus revidi la karan maljunulon, — li diris. — Mi sci-volas, kiel li fartas.

— Tiel bone, kiel ĉiam, vi povas certi, — diris Gandolfo. — Tute neĝenate; kaj laŭ mia supozo li ne multe interesiĝas pri io ajn, kion ni faris aŭ vidis, krom eble niaj vizitoj al la entoj. Eble poste vi povos viziti lin. Sed je via loko, mi nun urĝus min antaŭen al la hejmo, aŭ vi ne atingos la Brandovinan Ponton antaŭ ol la pordoj estos ŝlositaj.

— Sed pordoj ne troviĝas, — diris Gaja, — ne sur la Vojo; vi tre bone scias tion. Ekzistas la Pordo Boklanda, kompreneble; sed oni tralosas min iam ajn.

— Ne troviĝis pordoj, prefere diru, — diris Gandolfo. — Mi opinias, ke nun vi trovos pordojn. Kaj vi eble havos pli da problemoj, ol vi supozas, ĉe la Pordo Boklanda. Sed vi elturniĝos bone. Adiaŭ, karaj amikoj! Ankoraŭ ne lastfoje, ankoraŭ ne. Adiaŭ!

Li forturnis Ombrofakson de la vojo, kaj la ĉevalego transsaltis la verdan ŝtonmuron, kiu randis ĝin; kaj pro krio de Gandolfo ĝi foriris, kuregante al la Dolmenejo, kvazaŭ norda vento.

— Nu, jen ni estas, nur la kvaropo, kiu kune ekvojaĝis, — diris Gaja. — Ni ĉiujn aliajn postlasis, unu post alia. Tio ŝajnas preskaŭ sonĝo, kiu malrapide forvelkis.

— Ne laŭ mi, — diris Frodo. — Laŭ mi tio pli similas reendormiĝon.

Ĉapitro 8

LA PURIGADO DE LA PROVINCO

Estis post la noktiĝo, kiam malsekaj kaj lacaj vojaĝantoj finfine venis al Brandovino, kaj ili trovis la vojon barita. Ambaŭflanke de la ponto estis granda pikilumita pordo; kaj aliflanke de la rivero estis videblaj kelkaj nove konstruitaj domoj: duetaĝaj kun mallarĝaj rektflankaj fenestroj, nudaj kaj malofte lumigitaj, tute sombre kaj neprovincece.

Ili bategis la eksteran pordon kaj vokis, sed komence venis neniu respondo; kaj poste, surprizante ilin, iu blovis kornon, kaj la lumoj en la fenestroj estingiĝis. Voĉo kriis en la mallumo:

— Kiu estas? Foriru! Vi ne povas enveni. Ĉu vi ne scias legi la avizon: *Eniro malpermesata inter sunsubiro kaj sunleviĝo?*

— Kompreneble ni ne povas legi la avizon en la mallumo, — Sam rekiis. — Kaj se hobitoj de la Provinco estas forbarotaj en pluvado dum tia nokto, mi deŝiros vian avizon, kiam mi trovos ĝin.

Tiam fenestro batfermiĝis, kaj amaso da hobitoj kun lanternoj elverŝiĝis el la domo maldekstre. Tiuj malfermis la foran pordon, kaj kelkaj transpontiĝis. Vidante la vojaĝantojn ili ŝajnis timigitaj.

— Ekagu tuj! — diris Gaja, rekoninte unu el la hobitoj. — Se vi ne konas min, Hobo Fojnvardo, tion vi devus. Mi estas Gaja Brandoboko, kaj mi ŝatus scii, pri kio temas ĉio ĉi, kaj kion faras ĉi tie boklandano kia vi. Vi pli frue postenis ĉe la Fojna Pordo.

— Benata mi estu! Vi estas sinjoro Gaja, certe, kaj tute vestita por batalado! — diris maljuna Hobo. — Vidu, oni diris, ke vi estas mortinta. Perdita en la Malnova Arbarego, laŭ la informoj. Mi ŝatas revidi vin vivanta malgraŭe!

— Do ĉesigu la gapadon al mi tra la stangoj, kaj malfermu la pordon! — diris Gaja.

— Mi bedaŭras, sinjoro Gaja, sed al ni estas ordonite.

— De kiu?

— De la Ĉefo supre en Bag-Endo.

— Ĉefo! Ĉefo? Ĉu vi aludas sinjoron Lodo? — diris Frodo.

— Supozeble, sinjoro Baginzo, sed nun ni devas diri nur “la Ĉefo”.

— Ĉu vere tiel! — diris Frodo. — Nu, mi ĝojas, ke almenaŭ li nuligis la Baginzon. Sed evidente urĝas, ke la familio pritraktu lin kaj remetu lin sur lian ĝustan lokon.

La hobitoj aliflanke de la pordo silentiĝis.

— Bono ne rezultos el tiaj paroloj, — iu diris. — Li aŭdos pri tio. Kaj se vi tiom bruos, vi vekos la grandulon de la Ĉefo.

— Ni vekos lin laŭ maniero, kiu surprizos lin, — diris Gaja. — Se vi aludas ke via Ĉefaĉo dungis banditojn el la sovaĝejo, do ni revenis ne tro frue. — Li saltis de sur sia poneo, kaj vidante la avizon per la lumo de la lanternoj, li deŝiris ĝin kaj ĵetis ĝin trans la pordon. La hobitoj retropaŝis kaj ne moviĝis por malfermi ĝin. — Ek al, Grinĉjo! — diris Gaja. — Sufiĉas du.

Gaja kaj Grinĉjo transgrimpis la pordon, kaj la hobitoj forkuris. Denove korno sonoris. El la pli granda domo dekstre aperis granda peza figuro antaŭ lumo en la pordejo.

— Kio okazas? — li minace murmuris irante antaŭen. — Ĉu por-dorompado? Foriru, aŭ mi rompos al vi viajn fiajn kolojn! — Poste li haltis, ĉar li ekvidis la brileton de glavoj.

— Vilĉjo Filikĉjo, — diris Gaja, — se vi ne malfermos tiun pordon en dek sekundoj, vi tion bedaŭros. Mi kontraŭmetos al vi ŝtalon, se vi ne obeos. Kaj malferminte la pordon, vi trairos ĝin kaj neniam revenos. Vi estas bandito kaj vojrabisto.

Vilĉjo Filikĉjo tikis kaj ŝovpaŝis al la pordo kaj ĝin malŝlosis.

— Donu al mi la ŝlosilon! — diris Gaja.

Sed la bandito ĵetis ĝin al lia kapo kaj poste forkuris en la mallumon. Kiam li preterpasis la poneojn, unu el ili batis per siaj kalkanoj kaj trafis lin kurantan. Li malaperis kun jelpo en la nokton, kaj oni neniam plu aŭdis pri li.

— Nete farite, Vilĉjo, — diris Sam al sia poneo.

— Tiom pri via grandulo, — diris Gaja. — Ni vidis la Ĉefon poste. Intertempe ni bezonas tranoktejon, kaj ĉar ŝajnas, ke vi detruis la Pontan Hotelon kaj konstruis tiun ĉi mizeran lokon anstataŭe, vi devos loĝigi nin.

— Mi bedaŭras, sinjoro Gaja, — diris Hobo, — sed tio estas malpermesata.

— Kio estas malpermesata?

— Akceptado de personoj improvize, kaj aldona konsumado de manĝaĵoj kaj simile, — diris Hobo.

— Kio okazas en tiu ĉi loko? — diris Gaja. — Ĉu la jaro estis malfekunda, aŭ kio? Mi opiniis, ke la somero kaj la rikolto estis bonegaj.

— Nu, ne, la jaro sufiĉe fekundis, — diris Hobo. — Ni kreskigis multe da manĝaĵo, sed ni ne scias certe, kio okazis al ĝi. Temas pri tiuj “kolektantoj” kaj “dividantoj”, laŭ mia opinio, kiuj ĉirkaŭiras kalkulante, mezurante kaj forprenante al konservejoj. Ili pli kolektas ol dividas, kaj la pliparton el la varoj ni neniam plu vidas.

— Ho sufiĉe! — diris Grinĉjo oscedante. — Ĉio ĉi estas por mi tro laciga hodiaŭ nokte. Ni havas manĝaĵojn en niaj sakoj. Simple donu al ni ĉambron, en kiu ni kuŝiĝu. Ĝi estos pli bona ol kelkaj lokoj, kiujn mi vidis.

La hobitoj ĉe la pordo ankoraŭ ŝajnis maltrankvilaj, evidente iu aŭ alia regulo estis rompita; sed ne eblis kontraŭstari kvar vojaĝantojn tiel komandecajn, ĉiuj armitaj, kaj du el ili nekutime grandaj kaj fort-aspektaj. Frodo ordonis, ke la pordo estu reŝlosita. Ĉiuokaze estis iom da sagaco en retenado de gardistoj, dum banditoj ankoraŭ ĉirkaŭumis. Poste la kvar kunuloj eniris la hobitan gardistejon kaj faris sin laŭeble komfortaj. Tio estis loko malbela kaj senenhava, kun magra fajrujo, kiu ne permesis taŭgan fajron. En la supraj ĉambroj estis etaj vicoj da malmolaj litoj, kaj sur ĉiu muro estis avizo kaj listo de Reguloj. Tiujn Grinĉjo deŝiris. Mankis biero, kaj troviĝis nur malmulte da nutraĵo, sed kun tio, kion la vojaĝantoj alportis kaj disdividis, ili manĝis sufiĉe bone; kaj Grinĉjo rompis Regulon 4, metinte sur la fajron pliparton de la morgaŭa lignoporcio.

— Nu, do, kio pri fumado, dum vi rakontas al ni la okazintaĵojn en la Provinco? — li demandis.

— Ne ekzistas pipherbo nun, — diris Hobo, — krom nur por la servistoj de la Ĉefo. Ĉiuj stokoj verŝajne malaperis. Ni fakte aŭdis, ke furgonoj plenaj de ĝi foriris laŭ la malnova vojo el Sud-kvarono, tie apud la Sarna Transpasejo. Tio estis ĉirkaŭ la fino de la pasinta jaro, post kiam vi foriris. Sed ĝi diskrete foriris antaŭ tiam, malgrandkvante. Tiu Lodo...

— Nu fermu la faŭkon, Hobo Fojnvardo! — kriis pluraj aliaj. — Vi scias, ke tiaj paroloj estas malpermesataj. La Ĉefo aŭdos pri tio, kaj ni ĉiuj sidos en kaĉo.

— Nenion li aŭdus, se iuj el vi ne estus fidenunculoj, — arde rediris Hobo.

— Bone, bone! — diris Sam. — Tio tute sufiĉas. Mi volas nenion plian aŭskulti. Neniu bonvenigo, neniom da biero, neniom da fumaĉo, kaj multaj reguloj anstataŭe kaj orka parolado. Mi esperis ĝui ripozon, sed mi konstatas, ke antaŭ ni estas laboro kaj problemoj. Ni dormu kaj forgesu tion ĝis la mateno!

La nova “Ĉefo” evidente havis rimedon por akiri informojn. Estis minimume kvardek mejloj de la Ponto ĝis Bag-Endo, sed iu plenumis la aliron haste. Tion Frodo kaj liaj amikoj baldaŭ spertis.

Ili nenion difinitan planis, sed pensis malprecize pri kuna irado unue al Stretkavo kaj iom da restado tie. Sed nun, konstatinte la aspekton de la aferoj, ili decidis iri rekte al Hobiturbo. Do la postan tagon ili ekiris laŭ la Vojo kaj trotis senŝancele antaŭen. La vento malfortiĝis sed la ĉielo estis griza. La tereno aspektis iom malĝoja kaj forlasita; sed tamen estis la unua de novembro kaj la lastaj tagoj de l’ aŭtuno. Tamen ŝajnis, ke kvanto nekutima de brulado okazas, kaj fumo leviĝis el multaj lokoj ĉirkaŭe. Nubego da ĝi supreniris malproksime en la direkto de Arbarfino.

Kiam vesperiĝis, ili proksimiĝis al Frogmortono, vilaĝo sur la vojo mem, ĉirkaŭ dudek du mejlojn de la Ponto. Tie ili intencis tranokti; *La Flosanta Arbotrunko* en Frogmortono estis bonkvalita hotelo. Sed kiam ili venis al la orienta ekstremo de la vilaĝo, ili renkontis barieron kun granda avizo NENIA TRAPASO; kaj malantaŭ ĝi staris granda bando da ŝirifoj kun bastonoj en la manoj kaj plumoj sur la ĉapeloj, aspektante samtempe gravaj kaj iom timigitaj.

— Kion signifas tio ĉi? — diris Frodo, sentante emon ridi.

— Jen kion ĝi signifas, sinjoro Baginzo, — diris la estro de la ŝirifoj, hobito du-pluma: — Vi estas arestitaj pro Pordorompo, kaj Ŝirado de la Reguloj, kaj Atako al Pordistoj kaj Senrajta Eniro, kaj Senpermesa Dormado en Provincaj Konstruaĵoj, kaj Subaĉeto de Gardistoj per Nutraĵo.

— Kaj pro kio cetera? — demandis Frodo.

— Tio provizore sufiĉas, — diris la ŝirifestro.

— Mi povas aldoni kelkajn aliajn, se vi volas, — diris Sam. — Insultado de la Ĉefo kun Deziro pugnobati lian Pustulan Vizaĝon, kaj Penso ke vi Ŝirifoj aspektas kiel Bando da Idiotoj.

— Vidu, sinjoro, tio sufiĉas. La Ĉefo ordonis, ke vi akompanu nin trankvile. Ni kondukos vin al Apudakvo kaj transdonos vin al la Ĉefanaro, kaj kiam li prijuĝos vian aferon, vi rajtos diri viajn vortojn. Sed

se vi ne volas resti en la ŝlostruoj pli longe ol necese, mi konsilas mal-longigi la diron, kiel farus mi sur via loko.

Perturbante la ŝirifojn, Frodo kaj liaj kunuloj ĉiuj ridegis.

— Ne parolu absurde! — diris Frodo. — Mi iros, kien plaĉos al mi, kaj laŭ mia propra horaro. Hazarde mi iros al Bag-Endo pri miaj aferoj, sed se vi insistas kuniri, nu, tio estas via afero.

— En ordo, sinjoro Baginzo, — diris la estro, forŝovante la barieron. — Sed ne forgesu, ke mi arestis vin.

— Mi ne forgesos, — diris Frodo. — Neniam. Sed mi eble pardonos vin. Nu, hodiaŭ mi ne iros plu, do se vi bonvolos akompani min al *La Flosanta Arbotrunko*, mi estos dankema.

— Tion mi ne povas fari, sinjoro Baginzo, la hotelo estas fermita. Troviĝas ŝirifejo ĉe la fino de la vilaĝo. Mi gvidos vin tien.

— Bone, — diris Frodo. — Iru vi, kaj ni sekvos.

Sam estis rigardinta atente la ŝirifojn kaj ekvidis iun, kiun li konis.

— He, venu ĉi tien, Robino Kavaĵeto! — li vokis. — Mi volas paroli kun vi.

Post embarasa ekrigardo al sia estro, kiu mienis kolere sed ne aŭdacis interveni, ŝirifo Kavaĵeto retroiris kaj marŝis apud Sam, kiu descendis de sia poneo.

— Aŭskultu, Robĉjo! — diris Sam. — Vi estas hobito edukita kaj devus esti pli sagaca, sed ne ĝeni sinjoron Frodo kaj tiel plu. Kaj kio estas pri la fermado de la hotelo?

— Ili ĉiuj estas fermitaj, — diris Robino. — La Ĉefo ne aprobas bieron. Almenaŭ pro tio komenciĝis. Sed nun mi supozas, ke liaj homoj havas la tuton. Kaj li ne aprobas translokiĝon de personoj; se ili deziras aŭ devas, ili tiam devas viziti la ŝirifejon por klarigi sian aferon.

— Vi devus honti pri okupiĝo en tia galimatio, — diris Sam. — Pli frue vi mem preferis internon de trinkejo ol la eksteron. Vi senĉese estadis tie, ĉu dumdeĵore, ĉu eksterdeĵore.

— Kaj tion mi farus ankaŭ nun, Sam, se estus eble. Sed ne traktu min severe. Kion mi povus fari? Vi scias, ke mi registriĝis kiel ŝirifo antaŭ sep jaroj, antaŭ ol komenciĝis ĉio ĉi. Por havi eblecon promeni tra la lando kaj viziti personojn, kaj aŭdi novaĵojn, kaj scii kie troviĝas la plej bona biero. Sed nuntempe estas alie.

— Sed vi povus rezigni, ĉesigi la ŝirifadon, se ĝi ne plu estas okupiĝo respektinda, — diris Sam.

— Ne estas permesate, — diris Robino.

— Se mi aŭdos *ne permesate* pli ofte, mi estiĝos kolera.

— Mi ne diras, ke mi bedaŭrus tion, — diris Robino mallauĝigante la voĉon. — Se ni ĉiuj koleriĝus samtempe, eble io fareblus. Sed temas pri tiuj homoj, Sam, la homoj de la Ĉefo. Li ĉirkaŭsendas ilin ĉien, kaj se iu el ni malgravuloj postulas siajn rajtojn, ili fortrenas tiun al la Ŝlostruoj. Unue ili prenis la maljunan Farunbulon, maljunan Vilĉjon Blankpiedo la Urbestron, kaj ili prenis multajn aliajn. Lastatempe iĝis eĉ pli malbone. Nun ili ofte batas personojn.

— Do kial vi plenumas ilian laboron? — diris Sam kolere. — Kiu sendis vin al Frogmortono?

— Neniu. Ni loĝas ĉi tie en la granda ŝirifejo. Ni estas jam la Unua Orient-kvarona Trupo. Ekzistas entute centoj da ŝirifoj, kaj pliaj estas dezirataj, pro ĉiuj ĉi novaj reguloj. La plimulto aliĝis malvolonte, sed ne ĉiuj. Eĉ en la Provinco estas iuj, kiuj ŝatas enmiksiĝi en aferojn de aliaj kaj fanfaroni. Kaj eĉ pli malbone: troviĝas kelkaj, kiuj agadas spione por la Ĉefo kaj ties homoj.

— Ha! Do tiel vi sciiĝis pri ni, ĉu?

— Vi pravas. Ne estas permesate al ni nun sendi per ĝi, sed ili utiligas la malnovan Kurieran Servon, kaj postenigas diversloke specialajn kuristojn. Unu el ili venis hieraŭ vespere kun “sekreta mesaĝo” el Blanksulko, kaj alia pluportis ĝin de ĉi tie. Kaj mesaĝo revenis hodiaŭ posttagmeze, kiu diris, ke vi estu arestotaj kaj kondukotaj al Apudakvo, ne rekte al la Ŝlostruoj. Evidente la Ĉefo deziras vidi vin tuj.

— Li ne estos tiel entuziasma, kiam sinjoro Frodo fintraktos lin, — diris Sam.

La ŝirifejo en Frogmortono estis tiel mizera kiel la Pontodomo. Ĝi havis nur unu etaĝon, sed ĝi havis similajn mallarĝajn fenestrojn, kaj ĝi estis konstruita el malbelaj palaj brikoj, mallerte starigitaj. Interne ĝi estis malseketa kaj senĝoja, kaj vespermanĝo estis dismetita sur longa nuda tablo, kiu jam de semajnoj ne estis brospurigita. La manĝaĵoj ne meritis lokon pli belan. La vojaĝantoj ĝojis forlasi la ejon. Estis proksimume dek ok mejloj ĝis Apudakvo, kaj ili ekiris je la deka matene. Ili ekirus pli frue, sed la prokrasto tiel klare ĝenis la ŝirifestron. La okcidenta vento jam turniĝis norden kaj la tago estis malpli varma, sed la pluvo ĉesis.

La kavalkado, kiu forlasis la vilaĝon, estis iom komika, kvankam malmultaj personoj venintaj por gapi al la kostumoj de la vojaĝantoj, ne ŝajnis tutcertaj, ĉu la ridado estas permesata. Dekduo da ŝirifoj

estis difinitaj kiel eskortantoj de la “arestitoj”; sed Gaja devigis ilin marŝi antaŭe, dum Frodo kaj liaj amikoj rajdis poste. Gaja, Grinĉjo kaj Sam sidis malstreĉe ridante, parolante kaj kantante, dum la ŝirifoj plandis antaŭen penante aspekti severaj kaj gravaj. Frodo tamen silentis kaj aspektis iom malĝoja kaj pensema.

La lasta persono, kiun ili preterpasis, estis fortika maljunulo, kiu tondis heĝon. Li moksalutis:

— Ha, saluton! Jam kiuj arestis kiujn?

Du el la ŝirifoj tuj elpaŝis el la trupo kaj sin direktis al li.

— Estro, — diris Gaja. — Ordonu, ke viaj uloj reiru tuj al siaj lokoj, se vi ne preferas, ke pritraktu ilin mi!

La du hobitoj pro akra komando de la estro revenis paŭte.

— Nun antaŭen! — diris Gaja, kaj poste la vojaĝantoj certigis, ke la paŝado de la poneoj sufiĉe rapidis por peli la ŝirifojn laŭeble haste. La suno aperis, kaj malgraŭ la frosteta vento, ili baldaŭ spiregis kaj ŝvitis.

Ĉe la Trikvarona Ŝtono ili rezignis. Ili iris preskaŭ dek kvar mejlojn kun nur unu ripozeto tagmeze. Estis nun la tria horo. Ili estis malsataj, kaj la piedoj tre doloris ilin, kaj ili ne povis toleri la haston.

— Nu, venu laŭ propra rapideco! — diris Gaja. — Ni pluiras.

— Ĝis la, Robĉjo! — diris Gaja. — Mi atendos vin apud *La Verda Drako*, se vi ne forgesis, kie ĝi troviĝas. Ne malrapidumu survoje!

— Vi defias areston, jen kion vi faras, — malgaje diris la estro, — kaj mi ne povas respondeci.

— Ni defios sufiĉe multajn aferojn ankoraŭ, kaj ne petos vin respondeci, — diris Grinĉjo. — Bonan ŝancon al vi!

La vojaĝantoj troitis antaŭen, kaj kiam la suno eksinkis al la Blankaj Suprejoj fore ĉe la okcidenta horizonto, ili venis al Apudakvo apud ties larĝa Akvo; kaj tie ili la unuan fojon vere dolore ŝokiĝis. Tiu ĉi estis la hejmttereno de Frodo kaj Sam, kaj nun ili konstatis, ke ili amas ĝin pli ol iun ajn alian lokon en la mondo. Multaj el la domoj konataj de ili malaperis. Iuj ŝajnis bruligitaj. La agrabla vico de malnovaj hobitaj truoj en la monteto norde de la lago estis forlasita, kaj iliaj ĝardenetoj, kiuj antaŭe etendiĝis gaje al la akvorando, estis fetore plenaj je trudherbaro. Pli malbone, troviĝis tuta vico de la malbelaj novaj domoj laŭlonge de la lagflanko, kie la Hobiturba Vojo kondukis proksime al la monteto. Arba avenuo pli frue staris tie. Ili ĉiuj forestis. Kaj rigardante konsternite laŭ la vojo al Bag-Endo ili vidis altan brikan tubon en la foro. Tiu elverŝis nigran fumon en la vesperan aeron.

Sam ege perturbiĝis.

— Mi iros rekte pluen, sinjoro Frodo, — li kriis. — Mi iras vidi, pri kio temas. Mi deziras trovi mian Avulon.

— Unue ni devas eltrovi, kio atendas nin, Sam, — diris Gaja. — Mi konjektas, ke la “Ĉefo” havas trupon da banditoj en la proksimo. Ni prefere trovu iun, kiu sciigos nin, kiel statas la aferoj en la ĉirkaŭaĵo.

Sed en la vilaĝo Apudakvo ĉiuj domoj kaj truoj estis fermitaj, kaj neniu salutis ilin. Ili miris pri tio, sed ili baldaŭ trovis la kialon. Kiam ili atingis *La Verdan Drakon*, la lastan konstruaĵon sur la Hobiturba flanko, nun senvivaj kaj kun frakasitaj fenestroj, ili perturbiĝis vidante sesopon da grandaj misaspektaj homoj, apogantaj sin al la hotela muro; tiuj estis strabaj kaj flavpalaj.

— Similaj al tiu amiko de Vilĉjo Filikĉjo en Brio, — diris Sam.

— Similaj al multaj, kiujn mi vidis ĉe Isengardo, — murmuris Gaja.

La banditoj havis klabojn en la manoj kaj kornojn ĉe la zonoj, sed aliajn armilojn ili ne havis videble. Kiam la vojaĝantoj alrajdis, ili forlasis la muron kaj marŝis sur la vojon, barinte tiun.

— Kien vi iras, laŭ via opinio? — diris unu, la plej granda kaj plej misaspekta en la grupo. — Ne estas plu vojo por vi. Kaj kie estas tiuj valoraj ŝirifoj?

— Alvenas laŭorde, — diris Gaja. — Iomete doloras la piedoj, eble. Ni promesis atendi ilin ĉi tie.

— Ha, kion mi diris? — diris la bandito al siaj kunuloj. — Mi diris al Ŝarko, ke ne utilas fidi al tiuj etaj stultuloj. Oni devis sendi kelkajn niajn homojn.

— Kaj kiel tio farus diferencon, mi petas? — diris Gaja. — Ni ne kutimiĝis al vojrabistoj en tiu ĉi lando, sed ni scias, kiel trakti ilin.

— Ĉu vojrabistoj? — diris la viro. — Do tiel vi sintenas, ĉu? Ŝanĝu tion, aŭ ni ŝanĝos ĝin favore al vi. Vi etularo iĝas tro impertinentaj. Ne tro fidu al la bonkoro de la Estro. Jam venis Ŝarko, kaj li faros laŭ ordonoj de Ŝarko.

— Kaj kio do estas tio? — demandis Frodo kviete.

— Tiu ĉi lando estas vekenda kaj ordigenda, — diris la bandito, — kaj tion aranĝos Ŝarko; kaj li dolorigos, se vi devigos lin. Vi bezonas Estron pli grandan. Kaj tiam vi ricevos antaŭ la jarfino, se vi kaŭzos pliajn problemojn. Tiam vi ellernos kelkajn aferojn, vi, ratetaro.

— Ĉu vere. Mi ĝojas aŭdi pri viaj planoj, — diris Frodo. — Mi estas survoje por viziti sinjoron Lodo, kaj eble ankaŭ li interesiĝos pri ili.

La bandito ridis:

— Lodo! Li scias tre bone. Ne zorgu. Li agos laŭ la ordonoj de Ŝarko. Ĉar se Estro iĝis ĝena, ni povas ŝanĝi lin. Ĉu komprenite? Kaj se etuloj provas enŝovigi tien, kie oni ne deziras ilin, ni povas izoli ilin de la misagado. Ĉu komprenite?

— Jes, mi komprenas, — diris Frodo. — Ekzemple, vi ĉi tie estas eksmodaj, kaj vi ne konas la novaĵojn. Okazis multo, post kiam vi forlasis la sudon. Finiĝis via epoko, kaj tiu de ĉiuj ceteraj banditoj. La Malhela Turego estas falinta, kaj troviĝas Reĝo en Gondoro. Kaj Isengardo estas detruita, kaj via mastraĉo estas almozulo en la sovaĝejo. Mi pasis lin survoje. Nun rajdos laŭ la Verdvojo kurieroj de la Reĝo, ne tiranoj el Isengardo.

La viro fikse rigardis lin kaj ridetis.

— Almozulo en la sovaĝejo! — li mokis. — Ha, ĉu vere? Paradaĉu, paradaĉu, eta kokerikulo. Sed tio ne malhelpos nin loĝadi en tiu ĉi grasa landeto, kie vi tro longe nenion faradis. Kaj... — li klakigis siajn fingrojn antaŭ la vizaĝo de Frodo. — Reĝaj kurieroj, ĉu? Tion al ili! Kiam mi vidos unu el ili, mi eble atentos.

Tio troincitis Grinĉjon. Liaj pensoj reiris al la kampo de Kormaleno, kaj jen straba fiulo nomas la Ringoportinton “eta kokerikulo”. Li ŝovis malantaŭen sian mantelon, elingigis sian glavon, kaj la arĝento kaj zibelkoloro de Gondoro ekbrilis sur li, kiam li rajdis antaŭen.

— Mi estas kuriero de la Reĝo, — li diris. — Vi alparolas amikon de la Reĝo, unu el la plej famaj en ĉiuj landoj de la okcidento. Vi estas bandito kaj stultulo. Genuiĝu sur la vojo kaj pardonpetu, aŭ mi enigis ĉi tiun trolan plagon en vin!

La glavo briletis en la okcidenta sunlumo. Ankaŭ Gaja kaj Sam elingigis siajn glavojn kaj alrajdis subtene al Grinĉjo; sed Frodo ne moviĝis. La banditoj retropaŝis. Timigado de briaj kamparanoj, kaj tiranado de konfuzitaj hobitoj estintis ilia laboro. Sentimaj hobitoj kun helaj glavoj kaj severaj vizaĝoj estis granda surprizo. Kaj en la voĉoj de la venintoj estis noto, kiun pli frue ili ne aŭdis. Tiu frostigis ilin pro timo.

— Iru! — diris Gaja. — Se vi denove ĝenos tiun ĉi vilaĝon, vi tion bedaŭros.

La tri hobitoj antaŭen iris, kaj tiam la banditoj turniĝis kaj fuĝis, forkurante laŭ la Hobiturba vojo, sed kurante ili blovis siajn kornojn.

— Nu, ne tro frue ni revenis, — diris Gaja.

— Eĉ ne unu tagon pli frue. Eble tro malfrue, ĉiuokaze por savi Lodon, — diris Frodo. — Mizera stultulo, sed mi kompatas lin.

— Ĉu savi Lodon? Kion vi volas diri? — diris Grinĉjo. — Detru lin, prefere diru.

— Ŝajnas al mi, ke vi ne tute komprenas la aferojn, Grinĉjo, — diris Frodo. — Lodo neniam intencis, ke la aferoj atingu tiun staton. Li estis malica idioto, sed nun li estas kaptita. La banditoj superas, kolektante, rabante kaj tiranante, kaj regante aŭ ruinigante ĉion laŭplaĉe, en lia nomo. Kaj eĉ ne en lia nomo multe pli longe. Li estas karcerigito en Bag-Endo nun, laŭ mia supozo, kaj tre terurita. Ni devus provi liberigi lin.

— Nu, mi estas konsternita! — diris Grinĉjo. — El ĉiuj eblaj finoj de nia vojaĝado, tiu estas la plej lasta, kiun mi atendus: devi batali kontraŭ duonorkoj kaj banditoj en la Provinco mem — por elsavi Lodon Pustulon!

— Ĉu batali? — diris Frodo. — Nu, supozeble tio povos okazi. Sed memoru: ne okazu mortigo de hobitoj, eĉ se iuj aliĝis al la kontraŭa partio. Vere aliĝis, mi volas diri; ne nur obeis ordonojn banditajn estante timigitaj. Neniu hobito iam ajn mortigis alian intence en la Provinco, kaj tio ne komenciĝu nun. Kaj neniu estas mortigota entute, se eblas tion eviti. Regu viajn temperamentojn kaj retenu viajn manojn ĝis la lasta ebla momento!

— Sed se tiuj banditoj multnombras, — diris Gaja, — tio certe signifos bataladon. Vi ne elsavos Lodon aŭ la Provincon, per nura ŝokiĝo aŭ malĝojo, mia kara Frodo.

— Ne, — diris Grinĉjo. — Ne estos tiel facile timigi ilin la duan fojon. Ili estis surprizitaj. Ĉu vi aŭdis tiun kornoblovadon? Evidente troviĝas aliaj banditoj proksime. Ili estos multe pli kuraĝaj, kiam kuniĝos multaj el ili. Ni devas pripensi noktan sinkaŝadon. Finfine ni estas nur kvar, eĉ se ni estas armitaj.

— Jen ideo, — diris Sam. — Ni iru al la domo de Tom Kotono en la Suda Vojetto! Li ĉiam estis bravulo. Kaj li havas multajn knabojn, kiuj estas ĉiuj amikoj miaj.

— Ne! — diris Gaja. — Ne utilas “nokta sinkaŝado”. Ĝuste tion farus personoj, kaj ĝuste tio plaĉas al la banditoj. Ili simple alsturmos nin multnombre, enanguligos nin, kaj poste nin elpelos aŭ bruligos interne. Ne, ni devos fari ion senprokraste.

— Fari kion? — diris Grinĉjo.

— Agiti la Provincon! — diris Gaja. — Jam nun! Veki nian tutan

popolon! Ili malamas ĉion ĉi, tion oni vidas: ĉiuj krom eble unu-du banditoj, kaj kelkaj stultuloj, kiuj celas graviĝi, sed ne tute komprenas, kio efektive okazas. Sed provincoj tiel longe vivis komforte, ke ili ne scias, kion fari. Necesas nur alumeto, kaj ili ekflamiĝos. Certe la viroj de la Ĉefo scias tion. Ili provos stamfi nin kaj estingi nin rapide. Ni disponas nur tre mallongan tempon. Sam, vi rajtas kuri al la bieno de Kotono, se vi volas. Li estas la ĉefa persono en la ĉirkaŭaĵo, kaj la plej brava. Ek al! Mi intencas blovi la kornon de Rohano kaj aŭdigi al ili muzikon, kian ili neniam antaŭe aŭskultis.

Ili rajdis denove en la mezon de la vilaĝo. Tie Sam iris flanken kaj forgalopis laŭ la vojeto, kiu kondukis suden al la bieno de Kotono. Li ne tre foris, kiam li aŭdis subitan klaran kornblovon sonoranta supren en la ĉielon. Malproksimen trans montetojn kaj kampojn ĝi reeĥis; kaj tiel deviga estis tiu voko, ke Sam mem preskaŭ turniĝis kaj retrokuris. Lia poneo baŭmis kaj henis.

— Antaŭen, knabo! Antaŭen! — li kriis. — Ni baldaŭ reiros.

Poste li aŭdis, ke Gaja ŝanĝas la tonon, kaj aŭdiĝis la kornkrio de Boklando, skuanta la aeron:

*Vekiĝu! Vekiĝu! Timo, Fajro, Malamikoj! Vekiĝu!
Fajro, Malamikoj! Vekiĝu!*

Malantaŭe Sam aŭdis tumulton de voĉoj, bruegon kaj batfermadon de pordoj. Antaŭ li lumoj alsaltis el la krepusko; hundoj bojis; piedoj proksimiĝis kurante. Antaŭ ol li atingis la finon de la vojeto, aperis terkulturisto Kotono kun tri siaj filoj: juna Tom, Ĝoja kaj Nibĉjo, rapidantaj liadirekten. En la manoj ili tenis hakilojn kaj baris al li la vojon.

— Ne! Tiu estas ne bandito, — Sam aŭdis diri la terkulturiston. — Tiu laŭmezure estas hobito, sed tre strange vestita. — Poste li kriis: — He! Kiu vi estas, kaj kio estas tiu tumulto?

— Mi estas Sam, Sam Vato. Mi revenis.

Terkulturisto Kotono venis proksimen kaj fikse rigardis lin en la krepusko.

— Nu, — li ekdiris. — La voĉo estas ĝusta, kaj via vizaĝo ne pli malbelas ol antaŭe, Sam. Sed mi preterpasus vin surstrate pro via ekiĝaĵo. Vi estis eksterlande, verŝajne. Mi timis, ke vi mortis.

— Morta mi ne estas! — diris Sam. — Ankaŭ ne sinjoro Frodo. Li estas ĉi tie kun siaj amikoj. Kaj tio klarigas la tumulton. Ili agitas la

Provincon. Ni elpelos tiujn banditojn, kaj ankaŭ ties Ĉefon. Ni komencas jam nun.

— Bone, bone! — kriis terkulturisto Kotonon. — Do finfine komenciĝas! Mi jukis aktivi la tutan jaron, sed personoj ne volis helpi. Kaj mi devis pripensi mian edzinon kaj Rozinjon. Tiuj banditoj kapablas ĉion. Sed jam ek al, knaboj! Apudakvo ekagas! Ni devas partopreni!

— Sed kio pri sinjorino Kotonon kaj Rozinjo? — demandis Sam. — Ne estas ankoraŭ sendanĝere lasi ilin tute solaj.

— Mia Nibzo estas kun ili. Sed vi rajtas iri helpi lin, se vi emas, — diris terkulturisto Kotonon larĝgridete. Poste li kaj liaj filoj forkuris al la vilaĝo.

Sam rapidis al la domo. Apud la larĝa ronda pordo supre de la ŝtupoj el la kortego staris sinjorino Kotonon kaj Rozinjo, kaj Nibzo antaŭ ili tenante fojnoforkegon.

— Estas mi! — Sam kriis altrotante. — Sam Vato! Do ne provu piki min, Nibzo. Cetere mi portas kirason.

Li salte elseliĝis kaj supreniris la ŝtupojn. Ili gapis al li silente.

— Bonan vesperon, sinjorino Kotonon! — li diris. — Saluton, Rozinjo!

— Saluton, Sam! — diris Rozinjo. — Kie vi estadis? Oni diris, ke vi mortis; sed mi atendis vin ekde la printempo. Vi ne rapidis, ĉu ne vere?

— Eble ne, — diris Sam embarasite. — Sed nun mi rapidas. Ni atakas la banditojn, kaj mi devas reiri al sinjoro Frodo. Sed mi pensis ekrigardi kaj kontroli, kiel fartas sinjorino Kotonon kaj vi, Rozinjo.

— Mi fartas bone, dankon, — diris sinjorino Kotonon. — Aŭ tiel estus, se ne temus pri tiuj rabaj banditoj.

— Nu, ek for! — diris Rozinjo. — Se vi prizorgis sinjoron Frodon la tutan tempon, pro kio vi lasis lin, ĝuste kiam aferoj ekŝajnis danĝeraj?

Tio embarasis Samon. Necesis semajnlonga klarigado, aŭ neniu. Li forturniĝis kaj surponeiĝis. Sed kiam li ekiris, Rozinjo subenkuris la ŝtupojn.

— Miaopinie vi aspektas bele, Sam, — ŝi diris. — Iru jam! Sed gardu vin, kaj tuj revenu post kiam vi ordigos la banditojn!

Kiam Sam revenis, li trovis la tutan vilaĝon agitita. Jam, krom multaj pli junaj knaboj, pli ol cent fortikaj hobitoj estis kuniĝintaj kun hakiloj, pezaj marteloj, longaj tranĉiloj kaj pezaj bastonoj; kelkaj havis ĉaspafarkojn. Ankoraŭ pli daŭre oni envenis el ekstervilaĝaj farmbienoj.

Iuj vilaĝanoj bruligis grandan fajron, nur por vigligi la okazaĵon, kaj ankaŭ ĉar tio estis unu el la agoj malpermesitaj de la Ĉefo. Ĝi brulis brile, dum profundigis la nokto. Aliaj laŭ ordonoj de Gaja starigis barierojn sur la vojo ambaŭekstreme de la vilaĝo. Kiam la ŝirifoj atingis la pli suban, ili konsternigis; sed tuj kiam ili konstatis, kiel statas la afero, la plimultaj forigis siajn plumojn kaj aliĝis al la ribelo. La aliaj forŝteliĝis.

Sam trovis Frodon kaj liajn amikojn apud la fajro parolantaj al maljuna Tom Kotono, dum admira amaso da apudakvanoj ĉirkaŭstaris kaj gapis.

— Nu, kio estas la venonta manovro? — demandis terkulturisto Kotono.

— Mi ne scias, — diris Frodo, — ĝis ni konos pli. Kiomas tiuj banditoj entute?

— Tio estas malfacile kalkulebla, — diris Kotono. — Ili ĉirkaŭmoviĝas kaj venas kaj iras. Kelkfoje kvindeko el ili troviĝas en iliaj kabanoj en Hobiturba direkto; sed ili eliras de tie ĉirkaŭvagante, por rabi aŭ “kolekti”, kiel ili nomas tion. Tamen malofte troviĝas malpli ol dudeko ĉe la Ĉefo, kiel oni epitetas lin. Li estas en Bag-Endo, aŭ estis; sed li jam ne forlasas la terenon. Dum unu-du semajnoj, efektive, vidis lin neniu, sed liaj uloj ne permesas al iu ajn proksimiĝi.

— Hobiturbo ne estas ilia sola teritorio, ĉu? — diris Grinĉjo.

— Ne, tre bedaŭrinde, — diris Kotono. — Troviĝas sufiĉe multaj sude en Longfundo kaj apud Sarna Transpasejo, oni diras; kaj kelkaj pli kaŝiĝas en la Arbarfino; kaj ili havas budojn en la Vojrenkonto. Kaj cetere estas la Ŝlostruoj, kiel oni nomas ilin: la malnovaj varkonservejoj en Mult-Fosejo, kiujn ili faris karceroj por tiuj, kiuj oponas ilin. Tamen mi kalkulas, ke ne estas pli ol tricento da ili sume en la Provinco, kaj eble malpli. Ni povos venki ilin, se ni ĉiuj lojalos.

— Ĉu armilojn ili posedas? — demandis Gaja.

— Vipojn, tranĉilojn kaj klabojn, sufiĉajn por ilia fibezono: nur tion ili ĝis nun vidigis, — diris Kotono. — Sed mi supozas, ke ili havos aliajn ekipaĵojn, se venos batalado. Iuj havas pafarkojn, ĉiuokaze. Ili pafis unu-du el nia gento.

— Jen vi havas, Frodo! — diris Gaja. — Mi scias, ke ni devos batali. Nu ili komencis la mortigadon.

— Ne precize, — diris Kotono. — Almenaŭ ne la pafadon. Tjukoĵ komencis tion. Vidu, via paĉjo, sinjoro Peregrino, li neniam akceptis tiun Lodon, jam de la komenco li diris, ke se iu devos roli kiel ĉefo je ĉi

malfrua dato, tiu estos nur la laŭrajta Superulo de l' Provinco kaj neniu parvenuo. Kaj kiam Lodo sendis siajn virojn, ili neniel efikis al li. Tjukoj estas bonŝancaj, ili posedas tiujn profundajn truojn en la Verdaj Montetoj, la Granda Smialo kaj tiel plu, kaj la banditoj ne povas atingi ilin; kaj ili ne permesis, ke la banditoj paŝu sur ilia tereno. Se ili tion faras, Tjukoj persekutas ilin. Tjukoj pafis tri el ili pro spiona vagado kaj rabado. Post tio la banditoj iĝis pli malicaj. Kaj ili tre atente vaĉas Tjuklandon. Nun neniu povas eniri aŭ eliri tie.

— Gratulon al la Tjukoj! — kriis Grinĉjo. — Sed iu estas enironta nun. Mi ekiras al la Smialo. Ĉu iu akompanos min al Tjukboro?

Grinĉjo forrajdis kun seso da junuloj sur poneoj.

— Ni revidos vin baldaŭ! — li kriis. — Estas nur ĉirkaŭ dek kvar mejloj tra la kampoj. Mi rekondukos armeon da Tjukoj matene.

Gaja blovis kornkrion post ili, dum ili forrajdis en la profundigantan nokton. La ĉeestantoj hurais.

— Malgraŭ ĉio, — diris Frodo al la apuduloj, — mi deziras neniun mortigadon, eĉ ne de la banditoj, krom se tio necesos, por malhelpi, ke ili damaĝu hobitojn.

— En ordo! — diris Gaja. — Sed vizitos nin la Hobiturba bando en tuja estonteco, laŭ mia opinio. Ili venos ne nur por interparoli. Ni provos trakti ilin nete, sed ni devas esti pretaj por la plej malbona. Mi jam havas planon.

— Tre bone, — diris Frodo. — Aranĝu la aferojn vi.

Ĝuste tiam kelkaj hobitoj, kiuj estis senditaj al la direkto de Hobiturbo, revenis kure.

— Ili venas! — ili diris. — Dudeko aŭ pli. Sed du foriris okcidenten tra la kamparo.

— Al la Vojrenkonto, tre certe, — diris Kotonon, — por aligi pli el la bando. Nu temas pri dek kvin mejloj ambaŭdirekte. Ne necesas zorgi pri ili ĝuste nun.

Gaja forrapidis por disdoni ordonojn. Terkulturisto Kotonon senhomigis la straton, sendante ĉiujn en la domojn, krom tiuj pliaĝaj hobitoj, kiuj havis iajn armilojn. Ili ne devis longe atendi. Baldaŭ ili povis aŭdi laŭtajn voĉojn, kaj poste la batadon de pezaj piedoj. Baldaŭ tuta roto da banditoj alvenis laŭ la vojo. Ili vidis la barilon kaj ridis. Ili ne supozis, ke en tiu eta lando estas io, kio kontraŭus al dudeko da ilia speco kune.

La hobitoj malfermis la barilon kaj staris flanke.

— Dankon! — la homoj mokis. — Jam iru hejmen enlitiĝi antaŭ ol

vi estos vergataj. — Poste ili plu marŝis laŭ la strato kriante: — Estingu la lumojn! Endomiĝu kaj restu tie! Aŭ ni forkondukos kvindekon el vi al la Ŝlostruoj por unu jaro. Eniru! La Ĉefo ekkoleriĝas.

Neniu atentis tiujn ordonojn; sed kiam la banditoj preterpasis, ili kviete kuniĝis kaj sekvis ilin. Kiam la homoj alvenis la fajron, tie staris terkulturisto Kotono tutsola, varmigante siajn manojn.

— Kiu estas vi, kaj kion vi faras laŭ via opinio? — demandis la banditestro.

Terkulturisto Kotono rigardis lin malhaste.

— Mi estis demandonta vin ĝuste pri tio, — li diris. — Tio ĉi ne estas via lando, kaj vi ne estas bonvena.

— Nu, vi estas ĉiuokaze bonvena, — diris la estro. — Ni deziras vin. Prenu lin, knaboj! Lin al Ŝlostruoj, kaj donu al li ion kvietigan!

La homoj faris unu paŝon antaŭen kaj abrupte haltis. Leviĝis ĉie ĉirkaŭe voĉbruego, kaj subite ili konstatis, ke terkulturisto Kotono ne estas tutsola. Ili estis ĉirkaŭringitaj. En la malhelo rande de la fajrolumo staris ringo da hobitoj venintaj ŝtele el la ombroj. Ĉeestis preskaŭ ducento da ili, ĉiuj tenis ian armilon.

Gaja paŝis antaŭen.

— Ni renkontiĝis pli frue, — li diris al la estro, — kaj mi avertis, ke vi ne revenu ĉi tien. Mi denove avertas vin: vi staras en lumo kaj celas al vi pafarkistoj. Se vi tuŝos per unu fingro tiun terkulturiston, aŭ iun ajn alian, vi estos tuj pafita. Surterigu viajn eventualajn armilojn!

La estro ĉirkaŭrigardis. Li estis enanguligita. Sed li ne estis timigita, nun kun dudeko da kamaradoj por subteni lin. Li tro malmulte konis hobitojn por kompreni sian endanĝeriĝon. Malsaĝe li decidis batali, ĉar li kredis facile trarompi.

— Kontraŭ ilin, knaboj! — li kriis. — Regalu ilin!

Kun longa tranĉilo en la maldekstra mano kaj klabo en la alia, li alkuregis la ringon, provante trarompi retro al Hobiturbo. Li celis sovaĝan baton al Gaja, kiu staris sur lia vojo. Li falis mortinta kun kvar sagoj en si.

Tio sufiĉis al la aliaj. Ili kapitulacis. Iliaj armiloj estis forprenitaj, kaj ili estis ŝnure kunligitaj, kaj devigitaj marŝi ĝis dezerta kabano, kiun ili mem konstruis, kaj tie oni ligis ilin mane kaj piede, kaj enŝlosis ilin gardate. La mortan estron oni fortrenis kaj enterigis.

— Ŝajnas preskaŭ tro facile, finfine, ĉu ne? — diris Kotono. — Mi ja diris, ke ni povos venki ilin. Sed ni bezonis instigon. Vi revenis ĝustatempe, sinjoro Gaja.

— Restas ankoraŭ farotaĵo, — diris Gaja. — Se vi pravas pri via kalkulado, ni ankoraŭ ne pritraktis dekonon el ili. Sed jam estas mal-lume. Mi opinias, ke la venonta manovro devas atendi ĝis la mateno. Tiam ni devos viziti la Ĉefon.

— Kial ne nun? — demandis Sam. — Estas apenaŭ pli malfrue ol la sesa horo. Kaj mi deziras vidi mian Avulon. Ĉu vi scias, kio okazis al li, sinjoro Koton?

— Li fartas nek bone nek malbone, Sam, — diris la terkulturisto. — Ili elfosis Bagŝutan Vicon, kaj tio malĝojige frapis lin. Li loĝas en unu el tiuj novaj domoj, kiujn la uloj de la Ĉefo konstruis, dum ili ankoraŭ faris aliajn laborojn ol bruligado kaj rabado: ne pli ol unu mejlon post Apudakvo. Sed li vizitas min, kiam okazo prezentiĝas, kaj mi certigas, ke li estas pli bone nutrita ol kelkaj el la povruloj. Tio kontraŭas La Regulojn, kompreneble. Mi loĝigus lin ĉe mi, sed tio estas malpermesita.

— Dankon, vere, sinjoro Koton, kaj tion mi neniam forgesos, — diris Sam. — Sed mi volas vidi lin. Tiu Ĉefo kaj tiu Ŝarko, pri kiu ili parolis, ili eble faros misaĵojn tie antaŭ la mateno.

— En ordo, Sam, — diris Koton. — Elektu kelkajn knabojn, kaj iru konduki lin al mia domo. Ne necesos, ke vi proksimiĝu al la mal-nova vilaĝo Hobiturbo trans Akvon. Jen mia Ĝoja montros al vi.

Sam foriris. Gaja aranĝis vaĉantojn ĉirkaŭ la vilaĝo kaj gardistojn ĉe la barieroj dum la nokto. Poste li kaj Frodo foriris kun terkulturisto Koton. Ili sidis kun la familio en la varma kuirejo, kaj la Kotonoj starigis kelkajn ĝentilajn demandojn pri iliaj vojaĝoj, sed malmulte atendis la respondojn: ilin tro koncernis la okazaĵoj en la Provinco.

— Ĉio komenciĝis de Pustulo, kiel ni nomas lin, — diris terkulturisto Koton, — kaj ĝi komenciĝis tuj post via foriro, sinjoro Frodo. Li havis strangajn ideojn, tiu Pustulo. Ŝajnis, ke li volas mem posedi ĉion, kaj poste ordonadi al aliaj personoj. Baldaŭ evidentiĝis, ke li jam efektive posedas pli ol konvenas al li; kaj li senĉese kroĉiĝis al pli, kvankam la fonto de la mono estis mistero: muelejoj kaj maltejoj, kaj hoteloj, kaj farmbienoj, kaj folioplantejoj. Li jam aĉetis la muelejon de Sabloman antaŭ ol veni al Bag-Endo, verŝajne.

» Kompreneble li komencis per multe da propaĵo, kiun li heredis de sia paĉjo; kaj ŝajnas, ke li vendadis multon el la plej bonaj folioj, kaj forsendis ĝin diskrete dum unu-du jaroj. Sed fine de la pasinta jaro li komencis forsendi amasojn da varoj, ne nur da folioj. Varoj komencis

malabundi, kaj cetere vintro proksimiĝis. Oni komencis koleriĝi, sed sian respondon li havis. Multe da homoj, plejparte banditoj, venis kun grandaj furgonoj, iuj por forporti la varojn suden kaj aliaj por resti. Kaj venis pliaj. Kaj antaŭ ol ni konsciiĝis, ili estis plantitaj jen kaj jen tra la tuta Provinco, kaj faligis arbojn kaj fosis kaj konstruis al si budojn kaj domojn laŭplaĉe. Komence la varojn kaj damaĝojn pagis Pustulo; sed baldaŭ ili komencis estrumi kaj rabi ĉion, kion ili volis.

» Tiam okazis iom da perturbiĝo, sed ne sufiĉe da. Maljuna Vilĉjo, la Urbestro, ekiris al Bag-Endo por protesti, sed li neniam venis tien. Banditoj kaptis lin kaj enŝlosis lin en truon en Mult-Fosejo, kaj tie li nun estas. Kaj post tio, kio estis certe iom post la Novjaro, ne plu ekzistis Urbestro, kaj Pustulo nomis sin Ĉefŝirifo, aŭ nur ĉefo, kaj agis laŭplaĉe; kaj se iu fariĝis "impertinenta", kiel ili nomis tion, ili sekvis Vilĉjon. Do la aferoj daŭre plimalboniĝis. Ne plu restis fumado, krom por la homoj; kaj la Ĉefo ne aprobis bieron, krom por siaj homoj, kaj fermis la trinkejojn; kaj ĉio krom Reguloj iĝis pli kaj pli malabunda, krom se oni sukcesis kaŝi iomete de sia propraĵo, kiam la banditoj ĉirkaŭiris prenante la aĵojn "por justa distribuado": tio signifis, ke ili havas ĝin kaj ni ne, escepte de la postrestaĵoj, kiujn oni povis ricevi ĉe la ŝirifejoj, se eblis toleri ilin. Ĉio tre malbona. Sed post kiam venis Ŝarko, regis plena ruiniĝo.

— Kiu estas tiu Ŝarko? — diris Gaja. — Mi aŭdis unu el la banditoj menci lin.

— La plej granda bandito el ĉiuj, verŝajne, — respondis Kotono. — Estis ĉirkaŭ la lasta rikolto, eble fine de septembro, kiam ni la unuan fojon aŭdis pri li. Ni neniam vidis lin, sed li estas supre ĉe Bag-Endo; kaj nun li estas la reala Ĉefo, mi supozas. Ĉiuj banditoj faras laŭ liaj ordonoj; kaj tion, kion li ordonas, estas plejparte: hako, bruligo kaj ruinigo; kaj jam fariĝis mortigo. Eĉ ne plu estas jam en tio ia misa senco. Ili detranĉas arbojn kaj lasas ilin kuŝantaj, ili bruligas domojn kaj ne konstruas novajn.

» Ekzemple, la muelejo de Sablomano. Pustulo detruis ĝin preskaŭ tuj post kiam li venis al Bag-Endo. Poste li enkondukis bandon da malpuraspektaj homoj por konstrui pli grandan kaj plenigi ĝin je radoj kaj strangaj aparatoj. Tio plaĉis nur al tiu stultulo Ted, kaj li laboras tie purigante radojn por la homoj, kie lia paĉjo estis la muelisto kaj propra mastro. La ideo de Pustulo estis mueli pli multon pli rapide, aŭ tion li diris. Li havas aliajn similajn muelejojn. Sed necesas havi muelotaĵon antaŭ ol povi mueli; kaj nenio plia ekzistis por la

nova muelejo ol por la malnova. Sed post kiam venis Ŝarko, oni tute ne plu muelas grenon. Ili konstante marteladas kaj eligadas fumon kaj fetoron, kaj eĉ nokte ne estas trankvilo en Hobiturbo. Kaj ili elverŝas fiaĵon intence; ili malpurigis la tutan malsupran Akvon, kaj tio ekfluas en Brandovininon. Se ili volas dezertigi la Provincon, ili ekagas laŭ ĝusta maniero. Mi ne kredas, ke tiu stulta Pustulo respondecas pri ĉio ĉi. Kulpas Ŝarko, laŭ mia opinio.

— Vi pravas! — intermetis juna Tom. — Vidu, ili eĉ kaptis la maljunan panjon de Pustulo, tiun Lobelia, kaj li tre amis ŝin eĉ se neniu alia same. Kelkaj el la hobiturbanoj vidis tion. Ŝi venis laŭ la vojeto kun sia malnova ombrelo. Iuj banditoj iris laŭ la mala direkto kun granda furgono.

»— Kien vi iras? — ŝi diras.

»— Al Bag-Endo, — ili respondas.

»— Por kio? — ŝi diras.

»— Por konstrui kabanajn por Ŝarko, — ili respondas.

»— Laŭ kiu vi rajtas? — ŝi diras.

»— Laŭ Ŝarko, — ili diras. — Do liberigu la vojon, maljuna megeraĉo!

»— Mi havigos al vi Ŝarkon, vi fiaj rabaj banditoj! — ŝi diras kaj levas sian ombrelon kaj atakas la estron, preskaŭ duoble pli altan ol ŝi. Do ili kaptis ŝin. Fortrenis ŝin al Ŝlostruoj, je ŝia aĝo cetere. Ili kaptis ankaŭ aliajn, kiuj pli mankas al ni, sed ne eblas kontraŭdiri, ke ŝi montris pli da spirito ol la plejmulto.

En la mezo de tiu ĉi interparolado venis Sam, enŝoviĝanta kun sia Avulo. Maljuna Vato ne aspektis multe pli aĝa, sed li estis iomete pli surda.

— Bonan vesperon, sinjoro Baginzo! — li diris. — Mi ĝojas revidi vin nedamaĝita. Sed mi devas kritiki vin, por tiel diri, se mi rajtas tion aŭdaci. Vi tute ne devis vendi Bag-Endon, kiel mi ĉiam diris. Tio ekirigis la tutan misaĵon. Kaj dum vi turismis en fremdujo, persekutante Nigrulojn sur montojn, laŭ tio, kion rakontas mia Sam, kvankam li ne klarigas kiucele, ili ekagis kaj trafosis Bagŝutan Vicon kaj ruinigis miajn terpomojn!

— Mi tre bedaŭras, sinjoro Vato, — diris Frodo. — Sed nun reveninte mi faros mian plejblon kompensi tion.

— Nu, oni ne povas diri pli juste, — diris la Avulo. — Sinjoro Frodo Baginzo estas vera ĝentilhobito, mi ĉiam diris, kion ajn oni opinias

pri kelkaj aliuloj samnomaj, pardonpete. Kaj mi esperas, ke mia Sam kondukis bone kaj servis kontentige, ĉu?

— Perfekte kontentige, sinjoro Vato, — diris Frodo. — Fakte, se vi volas tion kredi, li estas nun unu el la plej famaj personoj en ĉiuj landoj, kaj oni verkas kantojn pri liaj faroj de ĉi tie ĝis la maro kaj trans la Granda Rivero.

Sam hontruĝiĝis, sed li rigardis danke al Frodo, ĉar la okuloj de Rozinjo estis brilantaj kaj ŝi ridetis al li.

— Tio estas malfacile kredebla, — diris la Avulo. — Kvankam mi vidas, ke li enmiksiĝis en stranga societo. Kio okazis al lia veŝto? Mi ne aprobas portadon de feraĵoj, ĉu aŭ ne ili rezistas triviĝon.

La domanaro de terkulturisto Kotonon leviĝis frue en la posta mateno. Nenio aŭdiĝis dum la nokto, sed pliaj problemoj certe alvenos antaŭ ol la tago estos maturiĝinta.

— Ŝajnas, ke neniuj el la banditoj restis en Bag-Endo, — diris Kotonon, — sed la bando el Vojrenkonto aperos pli-malpli baldaŭ.

Post matenmanĝo enrajdis kuriero el la Tjuklando. Li estis ekzaltita.

— La Superulo agitis nian tutan landon, — li diris, — kaj la informoj fajrece disvastiĝas ĉiudirekte. La banditoj, kiuj vaĉis nian landon, fuĝis suden, tiuj kiuj eskapis vivantaj. La Superulo postsekvis ilin por forbari la bandegon en tiu regiono; sed li sendis reen sinjoron Peregrino kun ĉiuj ceteraj personoj, kiujn li povas malhavi.

La posta novaĵo estis malpli agrabla. Gaja, kiu la tutan nokton restis ekstere, enrajdis ĉirkaŭ la deka horo.

— Troviĝas bandego je proksimume kvarmejlja distanco, — li diris. — Ili venas laŭ la vojo el Vojrenkonto, sed sufiĉe multaj apartaj banditoj aliĝis al ili. Certe estas centoj da ili; kaj ili bruligas survoje. Ili estu malbenitaj!

— Ha! Tiu bandego ne prokrastos por interparoli, ili mortigos laŭeble, — diris terkulturisto Kotonon. — Se Tjukoj ne venos pli frue, ni prefere ŝirmu nin kaj pafadu sendebate. Nepras iom da batalado antaŭ ol tio ĉi finiĝos, sinjoro Frodo.

La Tjukoj efektive venis pli frue. Postnelonge ili enmarŝis centope el Tjukboro kaj la Verdaj Montetoj, kun Grinĉjo ĉekape. Gaja jam havis sufiĉan hobitaron por pritrakti la banditojn. Skoltoj raportis, ke tiuj dense kuniĝas. Ili sciis, ke la regiono ribelis, kaj klare intencis senkompate pritrakti la ribelon ĉe ties centro en Apudakvo. Sed kiel ajn

ili estis minacaj, ŝajnis ke ili havas neniun estron, kiu komprenas la militon. Ili iris sen antaŭzorgoj. Gaja rapide pretigis siajn planojn.

La banditoj alvenis trampe laŭ la ĉefvojo, kaj ne haltinte turniĝis sur la Apudakvan Vojon, kiu dum parto de la vojo deklivis supren inter altaj montetoj kun malaltaj heĝoj supre. Ĉirkaŭ vojkurbigo, proksimume mejlokono de la ĉefvojo, ili renkontis fortikan baron el renversitaj malnovaj farmfurgonoj. Tio haltigis ilin. Sammomente ili konsciiĝis, ke la ambaŭflankaj heĝoj, ĝuste super iliaj kapoj, kaŝis vicojn da hobitoj. Malantaŭe aliaj hobitoj nun elpuŝis kelkajn pliajn furgonojn, kiuj estis kaŝitaj en kampo, kaj tiel baris la retrovojon. Voĉo alparolis ilin de supre.

— Nu, vi marŝis en kaptilon, — diris Gaja. — Viaj kunuloj el Hobit-urbo faris same, kaj unu estas mortinta kaj la ceteraj estas kaptitoj. Demetu viajn armilojn! Poste reiru dudek paŝojn kaj sidiĝu. Iuj provantaj elrompiĝi estos pafitaj.

Sed la banditoj jam ne estis tiel facile timigeblaj. Kelkaj el ili obeis, sed estis tuj atakitaj de siaj kunuloj. Dudeko aŭ pli retroiris kaj atakis la furgonojn. Ses el ili estis pafitaj, sed la ceteraj elrompiĝis, mortiginte du hobitojn, kaj poste diskuris trakampare direkte al la Arbarfino. Ankoraŭ du falis dumkure. Gaja blovis laŭtan kornvokon, kaj aŭdiĝis respondaj vokoj el fore.

— Ili ne eskapos, — diris Grinĉjo. — La tuta tereno svarmas je niaj ĉasantoj.

Malantaŭe, la embuskitoj en la vojeto, ankoraŭ ĉirkaŭ okdeko, provis grimpi la barieron kaj la montetojn, kaj la hobitoj estis devigitaj pafi multajn el ili aŭ ataki ilin hakile. Sed multaj el la pli fortaj kaj pli furiozaj eliĝis je la okcidenta flanko, kaj atakis mortigeme siajn malamikojn, ĉar ili jam pli celis mortigi ol eskapi. Pluraj hobitoj falis, kaj la ceteraj ekhezitis, kiam Gaja kaj Grinĉjo, kiuj troviĝis orient-flanke, transiris kaj sturmis la banditojn. Gaja mem mortigis la estron, grandan straban banditon similan al grandega orko. Poste li retroirigis siajn soldatojn, ĉirkaŭante la lastan restaĵon de la homoj per larĝa ringo da pafarkistoj.

Post kelka tempo ĉio finiĝis. Preskaŭ sepdeko da banditoj kuŝis mortintaj sur la batalkampo, kaj dekduo estis kaptitaj. Dek naŭ hobitoj estis mortigitaj, kaj ĉirkaŭ tridek estis vunditaj. La mortintaj banditoj estis ŝarĝitaj sur ĉarojn kaj fortrenitaj al malnova sablejo en proksimo kaj tie entombigitaj: en la Bataltruo, kiel oni poste nomis

ĝin. La falintaj hobitoj estis kune kuŝigitaj en tombo sur la montoflanko, kie poste estis starigita monumento kun ĝardeneto ĉirkaŭe. Tiel finiĝis la Batalo ĉe Apudakvo, 1419, la lasta batalo okazinta en la Provinco, kaj la sola batalo depost la Verdaj Kampoj, 1147, fore en Nordkvarono. Sekve, kvankam feliĉe ĝi kostis nur tre malmultajn vivojn, ĝi havas propran ĉapitron en la Ruĝa Libro, kaj la nomoj de ĉiuj partoprenintoj estis listigitaj kaj parkeritaj de la Provincaj historiistoj. La tre konsiderinda plibonigo de la renomo kaj fortune de la familio Kotono datiĝas de tiu tempo; sed ĉe la supro de la Listo en ĉiuj versioj staras la nomoj de komandantoj Gajadoko kaj Peregrino.

Frodo partoprenis la batalon, sed li ne elingigis glavon, kaj lia ĉefa rolo estis malhelpi, ke la hobitoj, koleraj pro la perditoj, mortigu tiujn malamikojn, kiuj forĵetis siajn armilojn. Kiam la luktado ĉesis, kaj la postaj taskoj estis ordonitaj, Gaja, Grinĉjo kaj Sam aliĝis al li, kaj ili retrorajdis kun la Kotonoj. Ili manĝis malfruan tagmanĝon, kaj poste Frodo diris kun suspiro:

— Nu, supozeble jam estas tempo, ke ni pritraktu la “Ĉefon”.

— Jes ja, ju pli frue, des pli bone, — diris Gaja. — Kaj ne estu tro milda! Li respondecas pri enkonduko de tiuj banditoj, kaj pri la tuta misaĵo farita de ili.

Terkulturisto Kotono kunigis eskorton el ĉirkaŭ dudek kvar fortikaj hobitoj.

— Ĉar ni nur konjektas, ke ne restas plu banditoj ĉe Bag-Endo, — li diris. — Ni ne scias. — Poste ili ekiris marŝe. Frodo, Sam, Gaja kaj Grinĉjo iris la unuaj.

Ĝi estis unu el la horoj plej malĝojaj de iliaj vivoj. La granda tubo leviĝis antaŭ ili; kaj kiam ili proksimiĝis al la malnova vilaĝo trans la Akvo, tra vicoj da novaj domaĉoj ambaŭflanke de la vojo, ili vidis la novan muelejon en ĝia tuta grimaca kaj malpura malbeleco: granda brika konstruaĵo transarkanta la fluon, kiun ĝi malpurigis per vapora kaj fetora elverŝo. Laŭ la tuta longo de la Apudakva Vojo ĉiu arbo estis faligita.

Transirante la ponton kaj suprenrigardante ili anhelis. Eĉ tiu vizio, kiun Sam vidis en la spegulo, ne pretigis lin por tio, kion ili vidis. La Malnova Biendomo okcidente estis faligita, kaj ĝian spacon okupis vicoj da gudritaj budoj. Ĉiuj kaŝtanarboj estis for. La teramasetoj kaj veprejoj estis rompitaĵoj. Grandaj furgonoj staris malorde sur kampo paŝnudigitaj senherba. Bagŝuta Vico estis osceda sabla kaj

skoria fosejo. Bag-Endo supre estis nevidebla pro malordo da domaĉoj.

— Oni detranĉis ĝin! — kriis Sam. — Oni detranĉis la festan Arbon!

Li indikis la lokon, kie antaŭe staris la arbo, sub kiu Bilbo diris sian Adiaŭan Paroladon. Ĝi kuŝis prihakita kaj mortinta sur la kampo. Kvazaŭ tio estus la fina bato, Sam ekploris.

Rido silentigis ilin. Malafabla hobito apogaĉis sin al malalta muro de la mueleja korto. Tiu estis malpurvizaĝa kaj nigramana.

— Ĉu ne plaĉas al vi, Sam? — li rikanis. — Nu, vi ĉiam estis malfortika. Mi pensis, ke vi foriris en iu el tiuj ŝipoj. Pri kiuj vi iam babilis: velante, velante. Pro kio vi volas reveni? Laboro estas farenda nuntempe en la Provinco.

— Tion mi vidas, — diris Sam. — Mankas tempo por sinlavado, sed estas tempo por murapogado. Sed vidu, sinjoro Sablomano, mi havas ŝuldon pagotan en tiu ĉi vilaĝo, kaj vi ne aldonu al ĝi per via rikanado, aŭ vi pagos konton tro pezan por via monujo.

Ted Sablomano kraĉis trans la muron.

— Fu! — li diris. — Min vi ne povas tuŝi. Mi estas amiko de la Estro. Sed li tuŝos vin efektive, se min plu ĝenos via buŝaĉo.

— Ne malŝparu pliajn vortojn pro la stultulo, Sam! — diris Frodo. — Mi esperas, ke ne troviĝas multe pli da hobitoj, kiuj iĝis tiaj. Tio estus ĝeno pli granda, ol la tuta damaĝo farita de la homoj.

— Vi estas malpura kaj insolenta, Sablomano, — diris Gaja. — Kaj vi tre miskalkulas. Ni iras ĝuste supren por forigi vian valoran Estron. Ni jam pritraktis liajn homojn.

Ted gapis, ĉar tiumomente li ekvidis la eskorton, kiu pro signo de Gaja nun tramarŝis la ponton. Rekurinte en la muelejon, li elkuris kun korno kaj laŭte sonorigis ĝin.

— Ŝparu vian spiron! — ridis Gaja. — Pli bonan mi havas. — Poste li levis sian arĝentan kornon kaj blovis ĝin, kaj ĝia klara voko sonoris sur la Monto; kaj el la truoj kaj kabanjoj kaj malbelaj domoj de Hobit-urbo la hobitoj respondis kaj elverŝiĝis, kaj kun huraoj kaj laŭtaj krioj ili sekvis la trupon supren survoje al Bag-Endo.

Supre de la vojo la trupo haltis, kaj Frodo kaj liaj amikoj pluiris; kaj ili alvenis fine al la loko antaŭe amita. La ĝardenon plenigis budoj kaj kabanjoj, iuj tiel proksimaj al la malnovaj okcidentaj fenestroj, ke ili forbaris ties tutan lumon. Ĉie estis staploj da rubaĵo. La pordo estis cikatrata; la sonorila ĉeno pendis neligita, kaj la sonorilo rifuzis sonori. Frapado aligis neniun respondon. Fine ili puŝis, kaj la pordo cedis.

Ili eniris. La loko malbonodoris kaj estis plena de malpuraĵo kaj malordo: laŭŝajne ĝi jam delonge estis neuzita.

— Kie sin kaŝas tiu mizera Lodo? — diris Gaja, kiam ili jam traserĉis ĉiujn ĉambrojn kaj trovis nenion vivantan krom ratoj kaj musoj. — Ĉu ni funkciigu la aliajn por traserĉi la kabanajn?

— Tio ĉi estas pli malbona ol Mordoro! — diris Sam. — Iasence multe pli malbona. Ĝi hejmenigas la impresojn, kiel oni diras; ĉar hejmo ĝi estas, kaj oni memoras ĝin antaŭ ol ĝi estis ruinigita.

— Jes, tio estas Mordoro, — diris Frodo. — Nur unu el ĝiaj verkoj. Sarumano faris ĝian laboron la tutan tempon, eĉ kiam li supozis labori por si. Kaj same pri tiuj, kiujn Sarumano trompis, ekzemple Lodo.

Gaja ĉirkaŭrigardis malesperige kaj abomene.

— Ni foriru! — li diris. — Se mi konus la tutan misaĵon kaŭzitan de li, mi ja ŝovus mian pakajon tra la gorĝo de Sarumano.

— Sendube, sendube! Sed tion vi ne faris, kaj sekve mi povas bonvenigi vin en via hejmo.

Tie staranta en la pordo estis Sarumano mem, aspektanta bone nutrita kaj tre kontenta; liaj okuloj ekbrilis je malico kaj amuziĝo.

Subite eklumiĝis la menso de Frodo.

— Ŝarko! — li kriis.

Sarumano ridis.

— Do vi aŭdis mian nomon, ĉu? Mia tuta popolo antaŭe nomis min tiel en Isengardo, mi opinias. Indiko pri amo, eble¹. Sed evidente vi ne atendis vidi min ĉi tie.

— Ja ne, — diris Frodo. — Sed mi devis diveni. Iom da malico mismaniere: Gandolfo avertis min, ke vi ankoraŭ kapablas tion.

— Tute kapablas, — diris Sarumano, — kaj pli ol nur iom. Vi ridigis min, vi, hobitaj moŝtetoj, rajdantaj kun tiuj multaj granduloj, tiel sekuraj kaj etule memplaĉaj. Vi supozis, ke vi bone profitis el la tuto, kaj povis jam nur reambli kaj ĝui belan trankvilon en la kamparo. La hejmo de Sarumano povis tute detruigi, kaj li povis esti eligita, sed neniu povis tuŝi la vian. Ho ne! Gandolfo prizorgus viajn aferojn.

Sarumano ridis denove.

— Li ne! Kiam liaj iloj finas sian taskon, li forĵetas ilin. Sed vi permesis al vi pendoladi post li, prokrastante kaj babilante, kaj ĉirkaŭrajdante duoble tiom, kiom necesis. “Nu, — mi pensis, — se ili estas tiaj

¹ Probable ĝi originis de la orka vorto *ŝarkû*, kiu signifas *maljunulo*.

stultuloj, mi antaŭiros ilin kaj instruos al ili belan lecionon. Malbonfaro meritas reciprokon". La leciono estus pli akra, se nur vi havigus al mi pli da tempo kaj pli da homoj. Tamen mi jam faris multon, kion vi nur malfacile riparos aŭ renversos dum la vivtempo. Kaj estos agrable pensi pri tio kaj tiel kontraŭpezi miajn damaĝojn.

— Nu, se tion vi trovas agrabla, — diris Frodo, — mi kompatas vin. Tio estos plezuro nur memora, timinde. Iru tuj kaj neniam revenu!

La vilaĝaj hobitoj jam vidis Sarumanon elveni el unu el la kabanĵoj, kaj ili amasiĝis antaŭ la pordo de Bag-Endo. Aŭdinte la ordonon de Frodo, ili murmuris kolere:

— Ne lasu, ke li foriru! Mortigu lin! Li estas bandito kaj murdinto. Mortigu lin!

Sarumano ĉirkaŭrigardis al iliaj malamikaj vizaĝoj kaj ridetis.

— "Mortigu lin!" — li mokis. — Mortigu lin, se vi kredas vin sufiĉe multaj, miaj bravaj hobitoj! — Li rektigis sin kaj fikse rigardis ilin sombre per siaj nigraj okuloj. — Sed ne supozu, ke perdinte miajn posedaĵojn mi samtempe perdis mian tutan potencon! Kiu frapos min, tiu estos malbenita. Kaj se mia sango makulos la Provincon, tiu velkos kaj neniam plu estos resanigita.

La hobitoj retiriĝis. Sed Frodo diris:

— Ne kredu lin! Li perdis sian tutan potencon, krom la voĉo ankoraŭ kapabla timigi kaj trompi vin, se vi tion permesas. Sed mi malpermesas, ke li estu mortigita. Senutilas per venĝo rebati venĝon: tio rebonigas nenion. Iru, Sarumano, laŭ la vojo plej rapida!

— Vermo! Vermo! — Sarumano vokis; kaj el la proksima kabano venis Vermlango, rampante, preskaŭ hundece. — Al la vojo denove, Vermo! Ĉi tiuj bravuloj kaj moŝtetoj denove drivigas nin. Venu jam!

Sarumano turnis sin por foriri, kaj Vermlango treniĝis post li. Sed ĝuste, kiam Sarumano pasis apud Frodo, en lia mano ekbrilis ponardo, kaj li batis rapide. La klingo frapiĝis kontraŭ la kaŝita kiraso kaj rompiĝis. Dekduo da hobitoj kun Sam la unua saltis antaŭen kriante kaj ĵetis la banditon al la tero. Sam elingigis sian glavon.

— Ne, Sam! — diris Frodo. — Ne mortigu lin eĉ nun. Ĉar li ne malutilis al mi. Kaj ĉiuokaze mi ne volas lin mortigita en tia mishumoro. Iam li estis grandioza, el nobla speco, kontraŭ kiu ni ne aŭdacus levi la manon. Li estas falinta, kaj kuraci lin estas ekster nia povo; sed mi volas plu indulgi lin, esperante, ke kuracon li ie trovos.

Sarumano stariĝis kaj fikse rigardis Frodon. En liaj okuloj estis stranga esprimo de miksitaj miro, respekto kaj malamo.

— Vi maturiĝis, duonulo, — li diris. — Jes, vi profunde maturiĝis. Vi estas saĝa kaj kruela. Vi forrabis el mia venĝo ties dolĉon, kaj nun mi devas foriri amare, kaj en ŝuldo al via indulgo. Mi tion malamas, kaj mi vin malamas! Nu, mi iras kaj mi ne plu ĝenos vin. Sed ne atendu, ke mi deziru al vi sanon kaj longan vivon. Vi havos neniun el ambaŭ. Sed tio ne estos mia faro. Mi nur aŭguras.

Li formarŝis, kaj la hobitoj liberigis vojon, ke li trapasu; sed iliaj fingrostoj blankiĝis, dum ili premis siajn armilojn. Vermlango hezitis kaj poste sekvis sian mastron.

— Vermlango! — vokis Frodo. — Ne necesas sekvi lin. Mi scias pri neniun misfaro de vi kontraŭ min. Vi povos ricevi ĉi tie ripozon kaj manĝaĵon dum kelka tempo, ĝis vi refortiĝos kaj povos laŭiri vian vojon.

Vermlango haltis kaj rerigardis al li, duone preta resti. Sarumano turniĝis.

— Ĉu neniun misfaro? — li gakis. — Ho ne! Eĉ kiam li elŝteliris nokte, tio estis nur por rigardi la stelojn. Sed ĉu mi aŭdis iun demandi, kie sin kaŝas povra Lodo? Vi scias tion, ĉu ne, Vermo? Ĉu vi volas diri al ili?

— Ne, ne! — Vermlango plordiris kaŭrante.

— Do mi diros, — diris Sarumano. — Vermo mortigis vian Ĉefon, la kompatindulon, vian agrablan Estreton. Ĉu ne, Vermo? Trapikis lin dormantan, mi opinias. Enterigis lin, mi esperas; kvankam Vermo lastatempe tre malsatis. Ne, Vermo ne estas vere ŝatinda. Prefere lasu lin al mi.

Esprimo de sovaĝa malamego aperis en la ruĝaj okuloj de Vermlango.

— Vi ordonis tion al mi; vi devigis min fari tion, — li sibilis.

Sarumano ridis.

— Vi faras laŭ la ordonoj de Ŝarko, ĉiam, ĉu ne, Vermo? Nu, nun li ordonas: sekvu!

Li piedbatis la vizaĝon de la kaŭranta Vermlango, turnis sin kaj ekiris. Sed tiumomente io rompiĝis: subite Vermlango stariĝis, eligante kaŝitan ponardon, poste kun hundeca graŭlo li saltis sur la dorson de Sarumano, tiris malantaŭen ties kapon, tranĉis lian gorgon, kaj kun krio forkuris laŭ la vojeto. Antaŭ ol Frodo povis konsciiĝi aŭ paroli eĉ unu vorton, tri hobitaj pafarkoj kordsonoris kaj Vermlango falis mortinta.

Konsternante la apudstarantojn, ĉirkaŭ la kadavro de Sarumano kolektiĝis griza nebuleto, kaj leviĝinte malrapide al altego kiel fumo de fajro, kiel pala tukvolvita figuro, ĝi superombris la Monteton. Momente ĝi ŝanceliĝis, rigardante okcidenten; sed el la okcidento blovis malvarma vento, kaj ĝi forkliniĝis, kaj suspirante solviĝe neniĝis.

Frodo rigardis al la kadavro kun kompatato kaj hororo, ĉar dum li rigardis ŝajnis, ke longaj mortojaroj estas subite rivelitaj en ĝi, kaj ĝi ŝrumpis, kaj la ŝrumpinta vizaĝo iĝis haŭtĉifonoj sur la hida kranio. Levinte la randon de la malpura mantelo apudsternita, li ĝin kovris kaj forturnis sin.

— Kaj jen la fino de tio, — diris Sam. — Fino malbela, kaj mi preferus ne vidi ĝin; sed ĝi estas brava liberiĝo.

— Kaj la fina fino de la Milito, espereble, — diris Gaja.

— Tion mi esperas, — diris Frodo kaj suspiris. — Kaj laste lasta bato. Sed pripensu, ke ĝi okazis ĉi tie, ĉe la pordo mem de Bag-Endo! Inter ĉiuj miaj esperoj kaj timoj, mi almenaŭ neniam atendis tion.

— Mi ne nomos ĝin fino, ĝis ni estos ordigintaj la fatrason, — malĝoje diris Sam. — Kaj tio postulos multe da tempo kaj da laboro.

Ĉapitro 9

LA GRIZAJ HAVENOJ

La ordigado efektive postulis multe da laboro, sed ĝi okupis malpli da tempo ol Sam antaŭtimis. La tagon post la batalo Frodo rajdis ĝis Mult-Fosejo kaj liberigis la karcerulojn el la Ŝlostruoj. Unu el la unuaj trovitoj estis kompatinda Fredegaro Bolĝero, jam ne Dikulo. Li estis kaptita, kiam la kanajlaro elpelis trupon da ribelintoj, kiun li kondukis el kaŝlokoj supre en Brokenboro apud la montetoj Skario.

— Finfine pli profitus al vi akompani nin, povra oldulo Fredegaro! — diris Grinĉjo, dum ili elportis lin tro malfortan por marŝi.

Li malfermis unu okulon kaj brave klopodis rideti.

— Kiu estas tiu juna giganto kun laŭta voĉo? — li flustris. — Ĉu eta Grinĉjo? Kiom mezuras nun viaj ĉapeloj?

Ĉeestis ankaŭ kompatinda Lobelia. Ŝi aspektis tre maljuna kaj maldika, kiam ili savis ŝin el malluma kaj mallarĝa ĉelo. Ŝi insiste lamiris proprapiede; kaj okazis tia bonvenigo, tiom da manfrapado kaj huraoj, kiam ŝi aperis, apogante sin al la brako de Frodo, sed ankoraŭ kroĉante sian ombrelon, ke ŝi estis vere emociita, kaj ŝi forveturis larmante. Ŝi neniam antaŭe en la vivo estis populara. Sed ŝin premegis la novaĵo pri la murdo de Lodo, kaj ŝi rifuzis reiri al Bag-Endo. Ŝi redonis ĝin al Frodo kaj iris al sia propra popolo, al Bresgirdeloj en Durbotelo.

Kiam la kompatindulino mortis en la posta printempo — ja ŝi estis pli ol centjara — Frodo estis surprizita kaj multe emociita: ŝi testamentis al li la tutan restaĵon de sia mono kaj la mono de Lodo, por ke li utiligu ĝin helpante hobitojn senhejmigitajn de la perturboj. Tiel finiĝis tiu malpaco.

Maljuna Vilĉjo Blankpiedo estis en la Ŝlostruoj pli longe ol la aliaj, kaj kvankam li eble estis traktita malpli severe ol kelkaj, li bezonis multe da nutrado antaŭ ol li povis roli urbestre laŭ la aspekto; do Frodo konsentis posteni kiel lia anstataŭanto, ĝis sinjoro Blankpiedo denove bonfartiĝos. Lia sola plenumo kiel vicurbestro estis limigi la ŝirifojn al ties ĝustaj funkcioj kaj nombro. La taskon de persekutado

de la banditoj oni lasis al Gaja kaj Grinĉjo, kaj tio baldaŭ kompletigis. La sudlandaj banditoj, aŭdinte novaĵon pri la Apudakva Batalo, fuĝis el la Provinco kaj malmulte oponis la Superulon. Antaŭ la jarfino la malmultaj postvivintoj estis ĉirkaŭzonitaj en la arbaroj, kaj oni kondukis kapitulacintojn al la landlimo.

Intertempe la riparlaboro daŭris rapide, kaj Sam estis ege okupata. Hobitoj kapablas labori abelece, kiam ilin trafas taŭgaj humoro kaj neceso. Nun troviĝis miloj da laboremaj manoj ĉiuagaĵaj, ekde la etaj sed viglaj de hobitaj geknaboj ĝis la multuzitaj kaj kalaj de la geavoj. Antaŭ la Julio¹ ne plu restis eĉ briko de la novaj ŝirifejoj aŭ de io ajn konstruita de la "homoj de Ŝarko"; sed la brikoj estis uzitaj por ripari multajn malnovajn truojn, por igi tiujn pli komfortaj kaj pli sekaj. Estis trovitaj grandaj stokoj da varoj, manĝaĵoj kaj biero, kiujn la banditoj forkaŝis en budoj kaj fojnejoj kaj forlasitaj truoj, kaj precipe en la tuneloj ĉe Mult-Fosejo kaj en la malnovaj ŝtonminejoj de Skario; do tiun Julon ekzistis multe pli da plezuro, ol oni antaŭesperis.

Unu el la unuaj faritaĵoj en Hobiturbo, eĉ antaŭ forigo de la nova muelejo, estis renovigo de la Monteto kaj de Bagŝuta Vico. La antaŭaĵo de la nova sablejo estis tute nivelita kaj transformita al granda ŝirmita ĝardeno, kaj novaj truoj estis elfositaj en la sudfronta antaŭaĵo de la Monteto, kaj tiuj estis briktegitaj. La Avulo estis reloĝigita en Numero Tri; kaj li diris ofte kaj ne ĝenis sin pri aŭdontoj.

— Vere malofta vento profitas al neniuj, kiel mi ĉiam diris. Kaj fino bona — ĉio pli bona!

Oni iom diskutis pri nomo donota al la nova vico. Oni pensis pri *Batalĝardeno*, aŭ *Pli Bonaj Smialoj*. Sed post iom da tempo laŭ sagaĉa hobita maniero, oni nomis ĝin simple *Nova Vico*. Estis nura Apudakva ŝerco aludi al ĝi kiel al *Ŝarka Fino*.

La arboj estis la plej severa perdo kaj damaĝo, ĉar pro ordono de Ŝarko ili estis detranĉitaj malrespondece tre vaste en la Provinco; kaj Sam funebris pro tio pli ol pro io alia. Ekzemple, tiu misfaro nur longe kuraciĝos, kaj nur liaj pragenepoj, Sam supozis, vidos la Provincon tia, kia ĝi devus esti.

Sed subite iun tagon, ĉar dum semajnoj li estis tro okupita por

¹ La Provinca kalendaro, krom dek du 30-tagaĵaj monatoj, havis tritagan Lithon (inter junio kaj julio) kaj dutagan Julon — la jarfina kaj jarkomenca tagoj (inter la 30a de decembro kaj la 1a de januaro).

pripensi siajn aventurojn, li rememoris pri la donaco de Galadriela. Li elprenis la skatolon kaj montris ĝin al la ceteraj Vojaĝintoj (nun ĉiuj tiel nomis ilin), kaj petis ties konsilon.

— Mi scivolis, kiam vi rememoros pri ĝi, — diris Frodo. — Malfermu ĝin!

Interne ĝi estis plena da griza polvo, mola kaj fajna, en kies mezo estis semo, kvazaŭ eta arĝentumita nukso.

— Kion mi faru pri tio ĉi? — diris Sam.

— Ĵetu ĝin en la aeron dum venteta tago kaj lasu ĝin fari sian taskon! — diris Grinĉjo.

— Kie? — demandis Sam.

— Elektu lokon kiel provejon, kaj vidu kio okazas al la plantoj tie, — diris Gaja.

— Sed mi certas, ke la Damo ne estus kontenta, se mi tute retenus ĝin en mia propra ĝardeno, kiam tiom da personoj estas suferintaj, — diris Sam.

— Utiligu viajn tutajn sagacon kaj konojn, Sam, — diris Frodo, — kaj poste uzu la donacon por helpi kaj plibonigi vian laboron. Kaj uzu ĝin ŝpareme. Ne estas multo, kaj mi supozas, ke ĉiu grajno havas valoron.

Do Sam plantis arbidojn en ĉiuj lokoj, kie arboj aparte belaj aŭ amitaj estis detruitaj, kaj li metis grajnon de la valorega polvo ĉe ĉies radikoj. Li iris tien-reen en la Provinco dum tiu laboro; sed se li speciale atentis pri Hobiturbo kaj Apudakvo, neniu kulpigis lin. Kaj fine li konstatis, ke ankoraŭ restas al li iomete da polvo; do li iris al la Tri-kvarona Ŝtono, kiu estas la proksimuma centro de la Provinco, kaj ĵetis ĝin en la aeron kun sia beno.

La etan arĝentan nukson li plantis en la Festa Kampo, kie iam estis la arbo; kaj li scivolis, kio devenos el ĝi. Tra la tuta vintro li restis kiel eble plej pacienca, kaj li klopodis deteni sin de konstanta alirado por vidi, ĉu okazas io.

La printempo preteratingis liajn plej senraciajn esperojn. Liaj arboj komencis ŝosi kaj kreski, kvazaŭ la tempo mem urĝus kaj volus fari dum unu jaro laboron de dudek. En la Festa Kampo bela juna arbedo supren impetis: ĝi havis arĝentan ŝelon kaj longajn foliojn kaj eksplodis je oraj floroj en aprilo. Ĝi ja estis *malorno*, kaj ĝi mirigis la ĉirkaŭaĵon. Dum postaj jaroj, kiam ĝi kreskis gracie kaj bele, ĝi iĝis vaste konata kaj oni plenumis longajn vojaĝojn por vidi ĝin: ĝi estis la

nura *malorno* okcidente de la Montoj kaj oriente de la Maro, kaj unu el la plej superbaj en la mondo.

Entute 1420 en la Provinco estis jaro mirinda. Ne nur estiĝis bel-ega sunlumo kaj frandinda pluvo, ĝustatempe kaj laŭ ĝusta mezuro, sed ŝajne estis io plia: etoso de riĉeco kaj kreskado, kaj ekbrilo de belo superanta tiun de mortemulaj someroj, kiuj flagras kaj rapide forpasas sur tiu ĉi Mez-Tero. Ĉiuj infanoj naskitaj aŭ generitaj dum tiu jaro, kaj ili estis multaj, estis belaj kaj fortaj, kaj la plimulto havis orajn harojn, kio estintis maloftaĵo inter la hobitoj. La fruktoj estis tiel abundaj, ke junaj hobitoj preskaŭ banis sin en fragoj kaj kremo; kaj pli poste ili sidis sur la razenoj sub prunarboj kaj manĝis, ĝis ili amasigis prunkernojn kiel piramidojn aŭ kranojn amasigitajn de venkin-
to, kaj poste ili plumoviĝis. Kaj neniuj malsanis, kaj ĉiu estis kontenta, escepte de tiuj, kiuj devis falĉi la herbon.

En Sud-kvarono la vitoj estis ŝarĝitaj, kaj la rikolto de "folioj" estis miriga; kaj ĉie kreskis tiom da greno, ke postrikolte ĉiu grentenejo estis plenŝtopita. La nord-kvarona hordeo estis tiel perfekta, ke la biero de la 1420a malto estis longe memorita kaj fariĝis proverbeca. Fakte post tuta generacio oni povis aŭdi oldulon en taverno, post pajnto da meritita biero, demeti la kruĉon suspire: "Ha! Jen ĝuste la dudeka jaro, vere!"

Sam loĝis komence ĉe la Kotona familio kun Frodo; sed kiam la Nova Vico estis preta, li akompanis la Avulon. Aldone al siaj ceteraj laboroj li estris la purigadon kaj renovigon de Bag-Endo; sed li ofte vojaĝis en la Provinco pro siaj arbaraj taskoj. Do li ne estis hejme dum frua marto kaj ne sciis, ke Frodo estis malsana. La dek-trian de tiu monato bienulo Kotono trovis Frodon kuŝanta surlite; li kroĉis blankan gemon, kiu pendis per ĉeneto sur la kolo, kaj li ŝajnis duone songanta.

— Ĝi estas forpasinta por ĉiam, — li diris, — kaj jam ĉio estas malluma kaj malplena.

Sed la malsano forpasis, kaj kiam Sam revenis la dudek-kvinan, Frodo estis sana kaj diris nenion pri si. Intertempe Bag-Endo estis ordigita, kaj Gaja kaj Grinĉjo alvenis el Stretkavo reportante ĉiujn malnovajn meblojn kaj ekipaĵojn, tiel ke la malnova truo aspektis pli-malpli kiel ĝi ĉiam aspektis.

Kiam ĉio finfine estis preta, Frodo diris:

— Kiam vi intencas transloĝiĝi por esti kun mi, Sam?
Sam aspektis iom embarasite.

— Ne necesas veni tuj, se vi ne deziras, — diris Frodo. — Sed vi scias, ke la Avulo estas proksime, kaj lin tre bone prizorgos vidvino Rumblo.

— Ne temas pri tio, sinjoro Frodo, — diris Sam kaj tre ruĝiĝis.

— Sed pri kio?

— Temas pri Rozinjo, Roza Kotono, — diris Sam. — Ŝajnis ke al ŝi tute ne plaĉis mia foriro, kompatindulinjo; sed pro tio, ke mi nenion deklaris al ŝi, tion ŝi ne povis diri. Kaj mi ne deklaris, ĉar unue mi havis taskon farendan. Sed jam mi deklaris, kaj ŝi diris: “Nu, vi malŝparis unu jaron, do kial plu prokrasti?”. “Ĉu malŝparis? — mi demandis. — Tion mi ne dirus”. Tamen, mi komprenas ŝian vidpunkton. Mi sentas min disuigita, por tiel diri.

— Mi komprenas, — diris Frodo: — vi deziras edziĝi, kaj tamen vi ankaŭ volas loĝi kun mi en Bag-Endo, ĉu? Sed mia kara Sam, kiel facilege! Edziĝu laŭeble baldaŭ, kaj poste enloĝiĝu kune kun Rozinjo ĉi tie. En Bag-Endo estas spaco sufiĉa por familio tiom granda, kiom vi povus deziri.

Kaj tiel estis aranĝite. Sam Vato edzinigis Rozinjon Kotono printempe de 1420 (tiu jaro estis fama pro siaj geedziĝoj), kaj ili venis loĝi en Bag-Endon. Kaj se Sam taksis sin feliĉa, Frodo sciis, ke li mem estas pli feliĉa; ĉar neniu hobito en la Provinco estis tiel bone prizorgata. Kiam ĉiuj riparaj laboroj estis planitaj kaj komencitaj, li ekvivis kvietan vivon, skribante tre multe kaj legante ĉiujn siajn notojn. Li rezignis pri la vicurbestra posteno ĉe tiusomera Libera Foiro, kaj kara maljuna Vilĉjo Blankpiedo prezidis la bankedojn dum ankoraŭ sep pliaj jaroj.

Gaja kaj Grinĉjo kunloĝadis dum kelka tempo en Stretkavo, kaj okazis multe da irado-venado inter Boklando kaj Bag-Endo. La du junaj Vojaĝintoj multe paradis en la Provinco per siaj kantoj, kaj siaj rakontoj, kaj siaj belaj vestaĵoj, kaj siaj mirindaj festoj. “Majestaj” la popolo nomis ilin, celante nur laŭdi; ĉar varmigis la korojn vidi ilin preterrajdantaj en maŝkirasoj tiel belaj kaj ŝildoj tiel bravaj, ridantaj kaj kantantaj kantojn pri malproksimo; kaj kvankam ili estis nun grandaj kaj grandiozaj, ili estis cetere neŝanĝitaj, krom ke ili eble ja estis pli bonparolaj, jovialaj kaj ĝojplenaj ol antaŭe.

Frodo kaj Sam tamen denove vestis sin ordinaraj, krom ke laŭbezone ili ambaŭ surmetis longajn grizajn mantelojn, fajne teksitajn kaj agrafitajn ĉekole per belaj broĉoj; kaj sinjoro Frodo ĉiam portis blankan juvelon sur ĉeneto, kiun li ofte fingrumis.

Ĉio jam progresis bone, kun ĉiama espero pri plua pliboniĝo; kaj Sam estis tiom okupata kaj tiom ĝuplena, kiom eĉ hobito povis deziri. Por li nenio makulis tiun tutan jaron, escepte de ia svaga zorgo pri lia mastro. Frodo senemfaze liberigis sin de ĉiaj provincaj aferoj, kaj dolorigis Samon rimarki, kiom malmulte li estis honorata en la propra lando. Malmultaj sciis aŭ deziris scii pri liaj faroj kaj aventuroj; ili admiris kaj respektis ĉefe sinjoron Gajadoko kaj sinjoron Peregrino, kaj (se Sam sciis tion) lin mem. Cetere, aŭtune aperis ombro de malnovaj ĉagrenoj.

Iun vesperon Sam eniris la kabineton kaj trovis sian mastron strange aspektanta. Li estis tre pala kaj liaj okuloj ŝajnis vidi forajn aferojn.

— Kio estas al vi, sinjoro Frodo? — diris Sam.

— Mi estas vundita, — li respondis, — vundita. Sed tio neniam komplete kuraciĝos.

Poste li stariĝis, kaj la humoro ŝajnis forpasi, kaj la postan tagon li estis tute normala. Nur poste Sam rememoris, ke estis la sesa de oktobro. En tiu tago antaŭ du jaroj estis mallume en la kavaĵo sur Veterverto.

La tempo pasis, kaj 1421 komenciĝis. Frodo denove malsanis en marto, sed per granda fortostreĉo li kaŝis tion, ĉar Sam havis aliajn aferojn pripensindajn. La unua el la infanoj de Sam kaj Rozinjo naskiĝis la dudek-kvinan de marto, dato, kiun Sam notis.

— Nu, sinjoro Frodo, — li diris. — Mi havas problemeton. Rozinjo kaj mi anticipe decidis nomi lin Frodo, kun via permeso; tamen estas ne *li*, sed *ŝi*. Tamen tiel ĉarma knabino, kiel oni rajtus esperi, simila Rozinjon pli ol min, feliĉe. Sed ni ne scias, kion ni faru.

— Nu, Sam, — diris Frodo, — kio misas pri la malnovaj moroj? Elektu flornomon, kia estas Rozo. Duono el la knabinoj en la Provinco nomiĝas laŭ tiaj nomoj, kaj kio povus esti pli bona?

— Supozeble vi pravus, sinjoro Frodo, — diris Sam. — Mi aŭdis kelkajn belajn nomojn dum nia vojaĝado, sed supozeble tiuj estas iom tro pretendemaj por la ĉiutaga frotado, kiel oni povus diri. La Avulo diras: “Ĝi estu mallonga, kaj tiel vi ne devos malplilongigi ĝin antaŭ ol uzi ĝin”. Sed se ĝi estu flornomo, mi tiuokaze ne ĝenas min pri la longo: ĝi devos estis floro bela, ĉar, vidu, ŝi ŝajnas al mi tre bela, kaj ŝi estos ankoraŭ pli bela.

Frodo pensis momenton.

— Nu, Sam, kio pri *elanoro*, la sunstelo, ĉu vi memoras la etan oran floron en la herbo ĉe Lotlorieno?

— Denove vi pravas, sinjoro Frodo! — diris Sam ĝojgite. — Ĝustion mi volis.

Eta Elanora estis preskaŭ ses monatojn aĝa, kaj 1421 pasinta ĝis sia aŭtuno, kiam Frodo vokis Samon en la kabineton.

— Ĵaŭde estos la naskiĝdatreveno de Bilbo, Sam, — li diris. — Kaj li devancos la Maljunan Tjukon. Li estos cent-tridek-unu-jara!

— Tiel estas! — diris Sam. — Li estas mirinda!

— Nu, Sam, — diris Frodo, — mi deziras, ke vi interkonsiliĝu kun Rozinjo kaj trovu, ĉu ŝi povos malhavi vin, por ke vi kaj mi foriru kune. Vi jam ne povas iri tre malproksimen aŭ longedaŭre, kompreneble, — li diris iom sopireme.

— Nu, ne tre facile, sinjoro Frodo.

— Kompreneble ne. Sed negrave. Vi povos akompani min komence. Diru al Rozinjo, ke vi ne longe forestos, ne pli ol du semajnojn; kaj vi revenos tute sekure.

— Mi volus akompani vin la tutan vojon ĝis Rivendelo, sinjoro Frodo, kaj vidi sinjoron Bilbo, — diris Sam. — Kaj tamen ĉi tie estas la nura loko, kie mi vere deziras esti. Mi estas tute disduigita.

— Kompatinda Sam! Sentiĝos tiel, mi timas, — diris Frodo. — Sed vi kuraciĝos. Vi sortis esti solida kaj senmanka, kaj tia vi estos.

Dum postaj unu-du tagoj Frodo kontrolis kun Sam siajn paperojn kaj skribaĵojn, kaj li transdonis siajn ŝlosilojn. Troviĝis granda libro kun senornama ruĝa ledkovrilo; ties grandaj paĝoj estis jam preskaŭ plenigitaj. Ĉe la komenco estis multaj folioj kovritaj de la maldensa vaga manskribo de Bilbo; sed la plejparto estis verkita per la firma flua skribo de Frodo. Ĝi estis ĉapitre dividita, sed Ĉapitro 8o estis nefinita, kaj post ĝi estis kelkaj blankaj paĝoj. La titolpaĝo surhavis multajn titolojn, unu post alia forstrekitajn, do:

Mia Taglibro. Mia Neatendita Vojaĝo. Tien kaj Reen. Kaj Kio Okazis Poste.

Aventuroj de Kvin Hobitoj. La Rakonto pri la Granda Ringo, kompilita de Bilbo Baginzo laŭ propra observado kaj la raportoj de liaj amikoj. Kion ni faris dum la Milito de la Ringo.

Tie finiĝis la manskribo de Bilbo, kaj Frodo estis skribinta:

LA PEREO
DE LA
MASTRO DE L' RINGOJ
KAJ LA
REVENO DE LA REĜO

(Kiel spertis tion la Eta Popolo; ĉi tio estas la memoraĵoj de Bilbo kaj Frodo el la Provinco, kompletigitaj laŭ la raporto de iliaj amikoj kaj la klero de la Saĝuloj.)

Kune kun eltiraĵoj el Libro de Popolsaĝo, tradukitaj de Bilbo en Rivendelo.

— Vidu, vi preskaŭ finis ĝin, sinjoro Frodo! — Sam ekkriis. — Nu, vi vere obstinis pri ĝi, mi devas diri.

— Mi tute finis ĝin, Sam, — diris Frodo. — La restantaj paĝoj estas por vi.

La dudek-unuan de septembro ili ekvojaĝis kune, Frodo sur la poneo, kiu portis lin tutvoje el Minaso Tirit kaj nun nomiĝis Paŝegulo; kaj Sam sur sia amata Vilĉjo. La mateno estis bele ora, kaj Sam ne demandis, kien ili iros: al li ŝajnis, ke li povus diveni.

Ili ekiris laŭ la Stokvojo trans la montetojn kaj direktiĝis al Arbarfino, kaj ili lasis siajn poneojn paŝi laŭplaĉe. Ili bivakis en la Verdaj Montetoj, kaj la dudek-duan de septembro ili rajdis malabrupte suben en la komenciĝon de la arboj dum la forvelko de la posttagmezo.

— Jen, ĉu ne, la arbo mem, post kiu vi kaŝis vin, kiam la Nigra Rajdanto aperis la unuan fojon, sinjoro Frodo! — diris Sam fingromontrante maldekstren. — Nun tio ŝajnas sonĝo.

Estis vespere, kaj la steloj briletis sur la orienta ĉielo kiam ili pasis la ruinan kverkon kaj turnis sin kaj pluiris suben inter la avelujaj densejoj. Sam silentis, profunde en siaj memoroj. Baldaŭ li ekrimarkis, ke Frodo kantas mallaŭte al si la malnovan marŝkanton, sed la vortoj ne estis tute samaj:

*Atendas eble post vojorto
trovota pad', sekreta pordo;
kaj kvankam ofte iris mi ne,
alia tago venos fine*

*kaj mi vojetojn sekvos nun
inter la Luno kaj la Sun'.*

Kaj kvazaŭ responde, el sube, alvenante laŭ la vojo el la valo, voĉoj kantis:

*A! Elbereth Gilthoniel!
siliuren penna míriel
o menel aglar elenath,
Gilthoniel, A! Elbereth!
Ni tenas en memorposedo,
en jena lando subarbara,
stellumon sur lontano Mara.*

Frodo kaj Sam haltis kaj sidis silente en la mola ombraro, ĝis ili vidis muaron, kiam la vojaĝantoj proksimiĝis al ili.

Ĉeestis Gildoro kaj multaj belaj elfoj; kaj tie mirigante Samon rajdis Elrondo kaj Galadriela. Elrondo surhavis mantelon grizan kaj sur lia frunto estis stelo, kaj en lia mano estis arĝenta harpo, kaj sur lia fingro estis ringo el oro kun granda blua juvelo, Vilja, la plej potenca el la Tri. Galadriela sidis sur blanka pordama ĉevaleto kaj estis ĉirkaŭvolvita en brileta blanko, kiel nuboj ĉirkaŭ la luno; ĉar ŝi mem ŝajnis brileti per mola lumo. Sur ŝia fingro estis Nenja, la ringo farita el *mitrilo*, kiu portis unu blankan gemon flagrantan kvazaŭ frosta stelo. Rajdante malrapide poste sur eta griza poneo, kaj ŝajnante kapklini dumdorme, estis Bilbo mem.

Elrondo salutis ilin gravmiene kaj favore, kaj Galadriela ridetis al ili.

— Nu, sinjoro Samsaĝo, — ŝi diris. — Mi aŭdas kaj vidas, ke vi bone utiligis mian donacon. La Provinco de nun estos eĉ pli ol iam benita kaj amata.

Sam riverencis, sed trovis nenion por diri. Li estis forgesinta, kiom bela estas la Damo.

Tiam Bilbo vekigis kaj malfermis siajn okulojn.

— Saluton, Frodo! — li diris. — Nu mi devancis hodiaŭ la Maljunan Tjukon! Do tio estas ordigita. Kaj nun ŝajnas al mi, ke mi estas tute preta ekiri alian vojaĝon. Ĉu vi kuniros?

— Jes, mi iros, — diris Frodo. — La Ringoportintoj devas iri kune.

— Kien vi iros, mastro? — kriis Sam, kvankam finfine li komprenis, kio okazas.

— Al la Havenoj, Sam, — diris Frodo.

— Kaj mi ne povos akompani.

— Ne, Sam. Almenaŭ, ne ankoraŭ, ne pli foren ol la Havenoj. Kvankam ankaŭ vi estis Ringoportanto, se nur mallonge. Via tempo eble venos. Ne tro malĝoju, Sam. Vi ne povas ĉiam disdiiĝi. Vi devos esti unuopa kompleto, dum multaj jaroj. Vi havas tiom multe por ĝui kaj esti, kaj por fari.

— Sed, — diris Sam, kaj larmoj aperis en liaj okuloj, — mi supozis, ke ankaŭ vi ĝuos la Provincon dum jaroj kaj jaroj, post ĉio, kion vi faris.

— Ankaŭ mi iam tion supozis. Sed mi estas tro severe vundita, Sam. Mi provis savi la Provincon, kaj ĝi estas savita, sed ne por mi. Tre ofte tiel devas esti, Sam, kiam aferoj estas minacataj: iu devas rezigni pri ili, perdi ilin, por ke aliaj povu havi ilin. Sed vi estas mia heredanto: ĉion, kion mi posedis aŭ povis posedi, mi testamentas al vi. Kaj vi havas ankaŭ Rozinjon kaj Elanoran, kaj venos Frodo-knabo, kaj Roza-knabino, kaj Gaja, kaj Orhara, kaj Grinĉjo; kaj eble pli, kiujn mi ne povas vidi. Viaj manoj kaj via sprito estos ĉie bezonataj. Vi estos la Urbestro, kompreneble, tiel longe kiel vi deziras, kaj la plej fama ĝardenisto en la historio; kaj vi voĉlegos aferojn el la Ruĝa Libro, kaj tenos vivanta la memoron pri la foririnta epoko, tiel ke la popolo memoros la Grandan Danĝeron kaj tiel amos eĉ pli sian amatan landon. Kaj tio tiom okupos vin kaj feliĉigos vin, kiom feliĉa povas esti iu ajn, tiel longe kiel daŭros via parto de la Rakonto. Venu jam, rajdu kun mi!

Tiam Elrondo kaj Galadriela rajdis plu; ĉar la Tria Epoko finiĝis, kaj la tagoj de la Ringoj estis forpasintaj, kaj finiĝis la rakontoj kaj kantoj pri tiu epoko. Kun ili iris multaj elfoj el la Alta Parenaro kiuj ne plu volis resti en Mez-Tero; kaj inter ili, plenigitaj je malĝojo, kiu estis tamen benita kaj sen amaro, rajdis Sam, kaj Frodo, kaj Bilbo, kaj la elfoj ĝojis honori ilin.

Kvankam ili trarajdis la mezon de la Provinco tra la tuta vespero kaj tra la tuta nokto, neniu vidis ilin, krom sovaĝaj bestoj; aŭ ie-tie iu vaganto en la mallumo vidis ekbrileton sub la arboj, aŭ lumon kaj ombron fluantajn tra la herbo kiam la luno iris okcidenten. Kaj kiam ili jam forpasis el la Provinco, ĉirkaŭirinte la sudan randon de la Blankaj Suprejoj, ili alvenis la Distajn Deklivojn kaj al la Turegoj, kaj ekvidis la foran Maron; kaj tiel ili rajdis finfine suben al Mitlondo, al la Grizaj Havenoj en la longa Golfo de Ljuno.

Kiam ili venis al la pordo, Cirdano la Ŝipkonstruisto elpaŝis por

saluti ilin. Tre altstatura li estis, kaj lia barbo estis longa, kaj li estis griza kaj maljuna, krom ke liaj okuloj estis akraj kiel steloj; kaj li rigardis ilin kaj riverencis, kaj diris:

— Ĉio estas jam preta.

Poste Cirdano kondukis ilin al la Havenoj, kaj tie kuŝis blanka ŝipo, kaj sur la kajo staris figuro tute blankvestita, atendante ilin. Kiam li turniĝis kaj direktiĝis al ili, Frodo vidis, ke tiu estas Gandolfo; kaj sur sia mano li portis la Trian Ringon, Narĵan la Grandan, kaj la gemo sur ĝi estis ruĝa kiel fajro. Tiam la forirontoj ĝojis, ĉar ili sciis, ke ankaŭ Gandolfo akompanos ilin sur la ŝipo.

Sed Sam nun estis kore malĝoja, kaj ŝajnis al li, ke, kvankam la disiĝo estos maldolĉa, tamen eĉ pli doloriga estos la longa vojo hejmen en solo. Sed ĝuste dum ili staris tie, kaj la elfoj surŝipiĝadis, kaj ĉio estis pretigata por foriro, alrajdis tre haste Gaja kaj Grinĉjo. Kaj inter siaj larmoj Grinĉjo ridis.

— Vi provis eskapi de ni unu fojon pli frue kaj malsukcesis, Frodo, — li diris. — Ĉi-foje vi preskaŭ sukcesis, sed tamen denove malsukcesis. Ne estis Sam, tamen, kiu ĉi-foje perfidis vin, sed Gandolfo mem!

— Jes, — diris Gandolfo, — ĉar estos pli bone retrorajdi triope ol unuope. Nu, ĉi tie finfine, karaj amikoj, sur la bordoj de la maro venas la fino de nia kunuleco en Mez-Tero. Iru en paco! Mi ne diros: ne ploru; ĉar ne ĉiuj larmoj estas malbonaj.

Poste Frodo kisis Gajan kaj Grinĉjon, kaj laste Samon, kaj surŝipiĝis; kaj la veloj estis hisitaj, kaj la vento blovis, kaj malrapide la ŝipo forglisis laŭ la longa griza golfo; kaj la lumo de la vitro de Galadriela, kiun Frodo tenis, ekbrilis kaj malaperis. Kaj la ŝipo eliris sur la Altan Maron kaj forpasis okcidenten, ĝis finfine dum pluva nokto Frodo flaris dolĉan parfumon en la aero kaj aŭdis la sonon de kantado alvenanta trans la akvon. Kaj tiam ŝajnis al li, ke samkiel dum lia sonĝo en la domo de Bombadiljo, la griza pluvkurteno fariĝis arĝenta vitro kaj forruliĝis, kaj li vidis blankajn marbordojn kaj post ili foran verdan landon sub rapida sunleviĝo.

Sed laŭ Sam la vespero profunde mallumiĝis dum li staris ĉe la Haveno; kaj rigardante la grizan maron li vidis nur ombron sur la akvo baldaŭ perdiĝintan en la okcidento. Tiel li daŭre staris dum pasado de la nokto, aŭdante nur la suspiron kaj murmuradon de la ondoj sur la bordoj de Mez-Tero, kaj ties sono sinkis profunde en lian koron. Apud li staris Gaja kaj Grinĉjo, kaj ili estis silentaj.

Fine la tri kunuloj forturnis sin kaj, neniam plu retrorigardante, ili rajdis malrapide hejmen; kaj ili interŝanĝis neniun vorton ĝis ili revenis al la Provinco, sed ĉiun multe konsolis ĉeesto de la amikoj sur la longa griza vojo.

Fine ili rajdis trans la montetojn kaj laŭiris la Orientan Vojon, kaj poste Gaja kaj Grinĉjo plurajdis al Boklando; kaj jam denove ili kantis dumire. Sed Sam turnis sin al Apudakvo, kaj tiel revenis al la Monteto, kiam la tago denove finiĝis. Kaj li pluiris, kaj jen estis flava lumo, kaj fajro interne; kaj la vespermanĝo estis preta, kaj li estis atendita. Kaj Rozinjo entiris lin, kaj sidigis lin sur lian seĝon, kaj sidigis etan Elanoran sur lian sinon.

Li profunde enspiris:

— Nu, mi estas reveninta, — li diris.

GLOSARO

Brasi. Bierfari; prepari trinkaĵojn (*ankaŭ figurasence*).

Ĉendi. Ekbruligi.

Leŭgo. Malnova mezurunuo de longo, varia laŭ landoj, proksimume tri mejloj, aŭ kvin kilometroj.

Scimitaro. Mallonga unueĝa kurba glavo pli larĝa ĉe la pinto.

Skrabli. Iri laŭ malorde barakta maniero; ekzemple, kiel skarabo, klo-podanta eskapi el glaso.

Trampli. Surtreti.

Kelkaj vortoj en ĉi tiu traduko estas uzataj en senco pli vasta, ol (N)PIV kaj aliaj vortaroj rekomendas (ekzemple: *apika, brovumi, halo, kuratoro, plandi, preter, retro*). Atentigite pri tio ĉe la pretigado de la unua eldono, William Auld respondis, ke verkistoj kaj aliaj lingvouzantoj kreas la lingvon, kaj vortaristoj nur registras la uzadon. En la dua eldono la redaktoro kaj la prov-legantoj ŝanĝis nenion en ĉi tiu “devia” uzado, kritikita en kelkaj recenzoj aperintaj post la unua eldono.

Krome, en la libro estas pluraj vortoj (la nomoj de rasoj kaj popoloj, aliaj “realaĵoj”), kreitaj aŭ adaptitaj de Tolkien kaj tradukitaj de Auld.

*Ĝi estas la 101a libro
kuneldonita de Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov*

ENHAVO

Resumo	7
LA KVINA LIBRO	
1. Minaso Tirit	13
2. La forpaso de la Griza Trupo	42
3. La apelo en Rohano	62
4. La sieĝo de Gondoro	78
5. La rajdado de la rohananoj	105
6. La batalo sur la Kampoj Pelenoraj	115
7. La ŝtiparo de Denetoro	128
8. La Domoj de Kuracado	137
9. La lasta debato	153
10. La Nigra Pordego malfermiĝas	165
LA SESA LIBRO	
1. La turego de Cirito Ungol	179
2. La ombra lando	200
3. La Monto de Sorto	218
4. La Kampoj de Kormaleno	235
5. La Reganto kaj la Reĝo	246
6. Multaj disiĝoj	263
7. Hejmenire	280
8. La purigado de la Provinco	289
9. La Grizaj Havenoj	315
Glosaro	327
Enhavo	328

Джон Рональд Руэл Толкин
“Хранители кольца”

Приложение к журналу “La Ondo de Esperanto”
Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации
по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций.
Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Сдано в набор 10.05.2007. Подписано в печать 30.05.2007.
Формат 60 × 84/16. Объем 20,5 п. л. Тираж 500 экз. Заказ
Отпечатано в Литве.

